



is
,
H. J. Bulthuis



Idoj de Orfeo







de la ² auteur

W. Muller

den Haag Januari 1924.

115391

H. J. Bulthuis
ANO DE LA LINGVA KOMITATO

24118

Idoj de Orfeo

Originala romano
Rekomendita de
Esperantista Literatura Asocio
Kronika de la Esp. Akademio.



Den Haag (Nederlando) 1923

Propra eldono de la aŭtoro

Daguerrestraat n-o 84

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj.

Copyright 1923 by H. J. Balthuis, Den Haag.




Enkondukaj paroloj.

Estis iam du monaĥoj, kiuj devis fari pilgrimadon al sankta loko por esti senpekigataj, kaj ĉar iliaj pekoj estis gravaj, la monaĥoj devis pilgrimi kun pizoj en la ŝuoj, por ke ilia irado estu kiel eble plej doloriga. Ili tamen ekpilgrimis. Unu el ili iradis kun granda peno, ĉar la malmolaj pizoj tre doloris liajn piedojn. La alia tamen marŝadis kun ĝoja vizaĝo kaj kvazaŭ „pizoj“ tute ne ekzistus. Post longa pilgrimado, alveninte al sia celo, ili povis demeti la ŝuojn kaj elĵeti la pizojn. Nun la monaĥo, kiu estis marŝinta kun tiom da doloro, ekvidis, ke lia kunulo elĵetis el siaj ŝuoj platigintajn pizojn, kaj li demandis al li klarigon. Ho, diris la ĝoja monaĥo, mi devis, kiel vi, pilgrimi sur „pizoj“, sed mi kuiris ilin antaŭ ol meti en la ŝuojn. Per tio ili fariĝis molaj kaj ne ĝenadis min dum mia marŝado al ĉi tiu sankta loko.

Kara leganto, pesimismo kaj kredo al fatalismo malagrabiligas la vivon, tial imitu dum via „pilgrimado“ la ĝojan monaĥon. Se mia romano povus instigi vin al tio, mi estas kontenta, ĉar tiam mi ne verkis sen celo kaj sen frukto.

La verkinto.



Unua Parto

La Insulano



Unua Ĉapitro.

Pripensoj sur ŝtuparo — Mia Insulo kaj ĝia sola domo —
Miaj gepatroj — Robinsono Kruso — Miaj kvarpiedaj amikoj
— Vilhelmo Tell — La desegna talento de mia patrino —
Kiel mi pasigis miajn tagojn — La ofico de mia patro.

Mi staris sur la ŝtuparo, kiu atingis de la subtegmenta planko ĝis la kvadrata aperturo en la plata tegmento de nia domo. Mi apogis la bruston kontraŭ la ŝtupoj, kaj rigardis rekte antaŭ mi en la maron, sin etendanta tiel malproksimen, ke la malmultaj ŝipoj sur la horizonto similis malgrandajn makuletojn, kiuj iom post iom pli-etiĝis, ĝis fine ili tute malaperis. Mi miris kien iris tiuj ŝipoj. Ŝajnis al mi, kvazaŭ ili falus en senfundan abismon sur por mi nevideblan lokon sub nia Insulo, ĉar post la horizonto mi ja vidis plu nenion. Mia patro jam multfoje al mi diris, ke tiuj ŝipoj iras al Anglujo, Svedujo, Norvegujo, Danujo, Rusujo, Germanujo, Islando aŭ Ameriko (mi lernis tiujn nomojn kiel vilaĝa lernanto lernas la nomojn de planedoj kaj astroj, tute ne formante al mi ian precisan ideon pri ĉiuj tiuj landoj kaj cetere). Mi tamen neble povis imagi, kiel en tiu abismo povas esti insuloj aŭ landoj.

Unu el la ŝipetoj trenis post si longan nigran strion, kiu kelkfoje serpentsimile moviĝis en la aero. Ĝi estis vaporboato. Ŝajnis al mi strange, ke tia boato povas ŝipiri sen veloj. Mia patro unu fojon klopodis klarigi al mi, ke tiaj ŝipoj tute ne bezonas venton, sed nur bolantan akvon por sin movi antaŭen. Liaj klarigoj

tamen malbone kontentigis min, ĉar la kaldrono sur nia forno ankaŭ ellasis strion de vaporo, sed spite tio la kaldrono, same kiel la forno, restis sur la sama loko.

Ĉiuj ŝipoj kaj ankaŭ la vaporboato malaperis, sed anstataŭe ekaperis aliaj. Estis al mi nesolvebla enigmo, kiel ili povis suprenveni el tiu abismo, ĉar laŭ mia opinio, ŝipoj povas veliri nur sur ebena akvo. Sed mia patro ĉiam diradis la veron, sekve tiuj ĵus aperintaj ŝipoj nepre devis veni de unu el la subinsulaj landoj.

Mi turnis min sur mia ŝtuparo kaj apogante la dorson kontraŭ la ŝtupoj, mi rigardis refoje antaŭ min. La vidaĵo sin nun prezentanta al mi, estis tute malsimila. Rekte kaj malrekte je tre granda distanco elstaris el la maro du nigraj pecoj da tero. Sur la pli granda mi vidis nenion krom sablo. Tiu peco da lando estis nun videbla, sed kelkfoje, kiam la alfluo komenciĝis, ĝi tute malaperis sub la ondojn. Estis iam tempo, kiam mi pensis, ke tiu landpeco povis movi sin supren kaj malsupren laŭ sia plaĉo. Mia patro tamen antaŭ kelka tempo diris al mi, ke ĝi restadas ĉiam en la sama loko, sed ke la maro povas plialtiĝi, kaj ke en tiuj okazoj la akvo superverŝas tiun pecon da tero. Ĉe refluo la ondoj refoje forfluas kaj videbligas „la plataĵon“.

La pli malgranda terpeco, elstaranta el la alia flanko de nia Insulo, estis ĉiam videbla kaj sur ĝi, de la loko, kie mi staris, mi klare povis distingi maldikan altan konstruaĵon, kiun mia patro nomis „la lumturo“. Krom tiu turo mi vidis nenion tie, ĉar la insulo estis ĉirkaŭita per dunoj fiel altaj, ke la maro neniam povis superverŝi ĝin. Sur tiu insulo (ĉar insulo ĝi estis) loĝis homoj, kiuj vespere devis ekbruligi la lanternon de la turo, por ke la maristoj pli bone povu trovi la vojon laŭ la marbordo. Sed, ĉar la distanco inter tiu insulo kaj mi estis tre granda, mi ne povis alveni tien, nek naĝante

nek boate, ĉar la boato, kiun ni posedis, estis uzata nur de mia patro por viziti „la Vilaĝon“ unufoje po monato. Trans tiuj du aluditaj terpecoj sin etendis griza tre longa strio, kies finiĝon mi neniam povis vidi, ĉar ambaŭflanke ĝi perdiĝis aŭ kunfandiĝis kun la maro kaj la ĉielo. Super tiu senfina strio, kiun mia patro nomis „la digo“, altiĝis sur tri lokoj malproksimaj unu de la alia, la supra parto de tri turoj. Kvankam mi en la vesperoj neniam vidis lumon en ili, mi opiniis, ke ili devas esti „lunturoj“ por servi kiel signoj al maristoj. Mia patro diris tamen, ke tiuj konstruaĵoj utilas nur al vilaĝanoj por vidi kioma horo estas, kaj por pendigi en ili grandajn sonorilojn, kiuj ĉiam sonoradis, kiam homoj estis enterigataj aŭ kiam komenciĝis la diservoj. Ĉion tion mi komprenis nur malbone, sed la klarigoj kontentigis min.

Neniam mi vidis „vilaĝojn“, ĉar, kvankam mi estis jam altkreska, forta knabo (eble dekjara, sed tion mi ne sciis), mia patro ne permesis al mi forlasi la Insulon por akompani lin al „la Vilaĝo“, kiam li iris tien por aĉeti mangaĵojn kaj aliajn necesajojn, kiujn ne liveris „la Insulo“. Unu fojon mi petis akompani lin, sed ĉar li respondis per nur la unu vorto „neeble“, mi jam neniam ripetis la peton. La rifuzo eĉ ne ĉagrenis min, ĉar estis multaj aliaj aferoj, kiujn mi ankaŭ vane deziris, ekzemple viziti la lunon, kiu vespere tiel mirinde povis lumi, aŭ la super mi starantajn stelojn, kiuj lumis ankoraŭ pli brile. Sed, ĉar viziti tiujn ĉielajn lokojn ankaŭ estis neeble, mi tuj rezignis, kiam mia patro certigis al mi, ke estas neeble viziti „la Vilaĝon“.

La ĉielo sin etendis nun kiel hela kloso sur ĉio, kion mi povis vidi. Ĉio kuŝis tie trankvile kaj senmove en la bela maro kaj la solaj estaĵoj, rigardantaj kun mi tiun belan panoramon, estis la ĉiuloke ŝvebpendantaj mevoj. Mi pensis al la multaj ovoĵ, demetitaj de ili en

la sablo, kiujn mi preskaŭ ĉiutage en ĉi tiu monato devis serĉkolekti. Ho, mi ne amis tiujn birdojn, ĉar ili multfoje bekatakis min, kiam mi forprenis iliajn ovojn. Ili estis la solaj por mi ekzistantaj malamikoj. Mi tamen ne staris nun sur la ŝtuparo kun mia kapo ekster la tegmento, por rigardi la mevojn, ĉar mi vidis ilin en ĉiuj horoj de la tago. Mi staris tie por vidi ĉu la patro jam revenas de „la Vilaĝo“. Sed vane mi rigardadis sudorienten, kie lia boato laŭkutime ekaperis du tagojn post kiam li forlasis la Insulon. La boato ankoraŭ ne estis videbla, kiom ajn mi streĉis la okulojn, kaj tede pro la longa observado, mi malrapide forlasis la aperturon kaj lasis min gliti laŭ la ŝtuparo. Mi ne fermis tiun aperturon, ĉar la vetero estis bela, kaj post duona horo mi sendube starus refoje tie supre sur la ŝtuparo por vidi, ĉu jam estas revenanta la boato. — La vento estas kontraŭa —, mi pensis, — mia patro devas luvadi, kaj tio prenas multan tempon.

Mi sidigis sur la plej malalta ŝtupo kaj ekpensis. Mi ekpensis pri la vilaĝoj kaj kiel ili aspektas.

Sur la Insulo, kie mi loĝis kun du aliaj homoj, staris nur unu domo, la nia, kaj en ĉiu vilaĝo, kiel mia patrino rakontis al mi, staras multaj, tre multaj domoj, en kiuj loĝas centoj da homoj. Ĉu ili ĉiuj aspektas kiel miaj gepatroj? Ĉu ĉiuj viroj similas mian patron? Li estis mallonga, dika viro, kun grizaj haroj, kiujn li ĉiam kombis laŭ la kranio ĝis la nuko, kie malofte ili estis horizontale tranĉataj, tiel ke la dika hartavolo kaj la nuda ruĝa nuko formis rektan angulon. Ĉar li ĉiam malsekigis matene la harojn per sapakvo, ili, sekiginte, fariĝis tiel rigidaj, ke la plej forta ventego ne povis movi eĉ unu hareton de tiu dika griza tavolo, kiun ĉiam kovris nigra ĉapo kun larĝa viziero el ledo. Li havis malgrandajn helbluajn okulojn, super kiuj sidis hartufoj tiel dikaj kiel

lia dika fingro. Lia nazo estis ruĝa kaj maldika kaj sub ĝi montris sin larĝa buŝo, kiu nur malofte malfermiĝis kaj kiu ŝajnis esti tranĉita tie kvazaŭ per unu ekbato de tranĉilo. Tra la oreloj li portis orajn ringojn. Sub lia mentono kreskis longaj moviĝantaj haroj, kiujn mi ĉiam admiradis, ĉar mia kaprino ankaŭ posedis tiajn, per kio tiuj du kreitaĵoj multe similis unu al la alia, tiom pli, ĉar la kaprino ankaŭ estis griza. Mia patro posedis nur du vestarojn. Unu por porti, kiam li estis sur la Insulo, kaj unu, kiun li almetis, kiam li iris al la Vilaĝo. Sur la piedoj li havis botojn de la mateno ĝis la vespero. Mia patro estis silentema kvieta homo. Li neniam atentis min kaj neniam sin okupis pri mi kaj parolis nur al mi, kiam mi faris demandojn pri la maro, pri la vilaĝoj, kies turojn mi povis vidi, se la vetero estis klara, kaj pri ŝipoj. Rilate al la vilaĝoj mi sciis nenion precize, sed pri ŝipoj mi akiris grandan konon. Mi povis distingi ilin ĉiujn. Laŭ la mastoj kaj la veloj mi tuj povis diri, ĉu ŝipo estas brigo, kutero, skuno, trimasta barko, brig-skuno kaj cetero.

Mia patrino, nun kudranta ĉe la tablo en la ununura ĉambro de nia domo, estis laŭ karaktero kaj eksterajo tute malsimila al sia edzo. Ŝi estis longa maldika virino. Mi kredas, ke ŝiaj haroj jam griziĝis, sed, ĉar preskaŭ ĉiam ilin tute kovris blanka kufo, mi jam ne bone memoras ilian koloron. Ŝi havis la samajn bluajn okulojn kiajn posedis mia patro. La koloro de ŝia vizaĝo estis iom pala tute kontraŭa al tiu de mia patro, kiu havis ruĝe branan vizaĝon. Ĉiam mia patrino portis la samajn vestojn. En la vespero ŝi de tempo al tempo legis al mi el tri libroj. La unua estis la rakontoj pri feinoj, en kiu sin trovis la rakontoj pri: La Blua Barbo, La Ruĝa Ĉapeto, La kato kun botoj, Cindrulino kaj La Malgranda Fingrulo. Tiuj rakontojn mi konis tute parkere.

La dua libro estis eltirajo el „Mi kaj unu Noktoj“, kiujn mi tre amis pro la mirindaj okazintaĵoj, kiujn ili enhavis. Multfoje mi songis pri ĉiaj tiuj rakontoj, kiuj havigis al mi tre malĝustan ideon pri homoj, bestoj kaj pri la mondo. La tria libro, kiun mia patro estis donacinta al mi antaŭ kelkaj monatoj, estis la historio pri Robinsono Kruso. Sidante sur la ŝtupo, mi nun pensis pri la patro revenonta kun la boato, pri la Vilaĝo (kiun mi ankoraŭ neniam vizitis, ĉar tio estis neebla); pri la rakontoj el la libroj, kaj fine pri Robinsono Kruso, en kapraj feloj nanta laŭ la bordo de sia insulo por rigardi, ĉu ŝipo alproksimiĝas al la insulo por kunpreni lin al Anglujo. Mi komparis mian situacion kua tiu de Robinsono. Li forkuris de la gepatra domo, kaj post multaj aventuroj fine alvenis al insulo izolita en la Granda Oceano, kie li vivis kun kaproj, katoj, hundo kaj papago. Mi ne forkuris de la gepatra domo, sed spite tion, mi loĝis sur samspeca insulo en akompano de du homoj, unu kaprino, unu kato, unu bovino kaj unu papago. Lia papago povis diri: Kompatinda Robinsono, kaj la nia parolis kelkajn vortojn, kiujn nek miaj gepatroj, nek mi povis kompreni, nome: — Go til fanen! — Kelkfoje ĝi diris: — Mivenis —, aŭ: — Mi iras —; du frazetoj, kiujn ĉiam diris mia patro, kiam li alvenis aŭ forlasis la domon, kaj al kio mia patrino kutimis diri: — Nu, bone!

Kial Robinsono do devis forkuri el Anglujo por veni al insulo kaj kial mi devus forkuri el insulo por alveni en Anglujon aŭ en la Vilaĝon, kien iris ĉiunmonate la patro? Mi ne povis solvi tiun misteron kaj miaj pensoj konfuziĝis, kaj sencele mi rigardis la subtegmentejon, kie mi sidis sur la plej malalta ŝtupo de la ŝtuparo. Mi pensis: La budo de Robinsono sendube ne estis tiel fortika kiel nia loĝejo, konstruita el brikoj kaj havanta subtegmentejon, kiu ripozis sur trabegoj tiel dikaj, ke ili

du jarcentojn povis subteni la supraĵon de la domo. En angulo rekte antaŭ mi staris speco de ŝranko kun du larĝaj pordoj. Tiu ŝranko estis mia lito, kie mi ĉiam dormis kaj songis pri Ali Baba, pri la terura Blua Barbo kaj cetere. Mi tamen neniam dormis sola, ĉar flanke de mi kuŝis mia kato, kiun kelkfoje tute kovris la litotukoj, precipe kiam la vetero estis malvarma. La kara besto tiam sin premis al mia brusto kaj kontente murmurante dormadis tiel la tutan nokton. Sur miaj piedoj ĉiam kuŝis mia hundeto. Se estus eble, mi volonte konsentus, ke ankaŭ la kaprino kuŝus ĉe mi, sed laŭ diro de mia patrino, tio ne decidis. La kaprino sekve devis kuŝi kaj dormi en la stalo kune kun la bovino. Krom tiu lito sin trovis sur la planko de la subtegmentejo du kestoj, kiuj mi facile povis malfermi, ĉar ili ne surhavis serurojn. En unu el ili kuŝis eluzitaj vestoj, en la alia segiloj, boriloj, rabotiloj, marteloj kaj aliaj similaj iloj de ĉarpentistoj. En la mezo de la planko estis la ĉiam nefermita aperturo, el kiu elstaris la supraĵo de forprenebla ŝtuparo, laŭ kiu mi povis malsupreniri al la stalo, formanta la duonan parton de nia domo. En tiu ĉi momento tiu ŝtuparo ektramis kaj tuj poste ekaperis sur ĝia plej alta ŝtupo mia kato. Per unu eksalto ĝi staris sur mia ŝultro, kaj kontente murmurante la besto karesis mian vangon per sia kapo. — Ho, Sim! — mi diris. Sim estis la nomo de mia kato. — Ho, Sim! . . . Ĉu vi jam venis? . . . Nu, bone! — Rraŭ!! — diris la kato, ĉiam karesante mian vangon. — Rraŭ!! — — Jes, vi estis bona Sim —, mi diris.

Frapado malsupre en la ĉambro haltigis mian mallongan interparoladon. Mi aŭskultis, kaj la voĉo de mia patrino laŭte demandis: — Ĉu li jam venas? — — Ne! — mi respondis, — li ankoraŭ ne venas!

Kiam mia patrino parolis pri la patro, ŝi nomis lin

ĉiam „li“, ĉar estis nur du li-personoj sur la Insulo, nome la patro kaj mi.

Mi ekstaris kaj kun la kato sur mia ŝultro mi refoje supreniris la ŝtuparon por vidi ĉu „li“ jam estas venanta. Sed kiom ajn mi streĉis la okulojn, mi ne ekvidis la boaton, sekve „li“ ankoraŭ ne estis revenanta. Sim ankaŭ rigardis eksteren el la tegmento, sed verŝajne ne pro la patro, ĉar la besto tute ne lin amis, ĉar li neniam ĝin atentis; rilate al tio la besto kaj mi estis samsortuloj, per kio nia amikeco fariĝis pli intima. Mi malsupreniris, kaj ĉar „li“ eble ne venus en longa tempo, ni ambaŭ (la kato kaj mi) forlasis la subtegmentejon laŭ la dua ŝtuparo kaj nun staris en la stalo. Ĝi formis, kion mi jam antaŭe diris, la duonan parton de nia domo kaj estis vasta kvadrata loko. Ĉe la norda muro post alta krado el ligno kuŝis fojno kaj karotoj por la bovino kaj la kaprino. La karotojn tamen mi kelkfoje ankaŭ manĝis, kaj mi trovis ilin delikataj, precipe post kiam mi estis irinta longan tempon sur la dunoj por serĉkollekti ovojn. Ĉe la sudokcidenta muro estis vasta loko, kie povis kuŝi la bovino kaj kaprino en la nokto kaj dum malbona aŭ pluva vetero. Ili estis tiam tie kiel grandaj amikoj. En ĉi tiu momento la bestoj estis ekstere kaj promenadis tute libere, ĉar forkuri estis neeble. Ne vidante ilin, mi direktis min al la orienta muro, en kies mezo troviĝis alta, larĝa pordo, kiun mi puŝmalfermis. Enirinte en la ĉambrom, mi eksidis ĉe tablo kontraŭ mia patrino, kiu silente kudradis.

— Li ankoraŭ ne venas —, mi diris.

— Nu, bone —, respondis mia patrino. Tiel ŝi preskaŭ ĉiam respondis post ĉio, kion oni al ŝi diris.

La ununura ĉambro, kie mi nun sidis kun la kato sur ŝultro, konsistis el kvar kalkŝmiritaj muroj. Sur unu pendis spegulo, flanke de kiu estis fotografajoj de per-

sonoj tute nekonataj de mi. Unu el la aliaj muroj estis ornamita per kvar bildoj en egalaj kadroj el bruna ligno. Tiuj kvar bildoj prezentis la vivon de Vilhelmo Tell. Pli ol mil fojojn mi atente estis rigardinta ilin, kaj ĉiam mi memoros pri ili. La unua prezentis la heroon, tenanta malgrandan knabon ĉe la mano. Du soldatoj kun lancoj minacis la viron, ĉar li rifuzis malkovri la kapon antaŭ longa stango kun ĉapo sur ĝi en la mezo de vasta urbplaco. Sur la dua bildo tiu sama viro devis forpafi per pafarko pomon de la kapo de l'knabo. Multaj personoj, ĉiuj urbanoj en strangaj vestoj, ĉeestis kaj unu el ili, virino, svenis pro timo, ke la sago traboros la frunton de la juna knabo. Tiu knabo estis la filo de Vilhelmo Tell, laŭ diro de mia patrino. La tria bildo prezentis ŝaŭmantan, sovaĝan lagon. Vilhelmo Tell estis transportata en boato, sed la ventego fariĝis tiel terura, ke la soldatoj devis forpreni la katenojn de la kaptito, ĉar li estis la sola persono, kiu kapablis direkti la boaton tra la dancantaj ondegoj. Subite li direktis la boaton al la lagbordo, kaj per unu lerta saltego li liberigis sin, puŝante la boaton en la ondojn, kie ĝi devis pereii. Sur la kvara bildo la heroo vagis tutsola sur monto kaj rigardis malsupren en profundan valon, kie ekaperis rajdantoj. La ĉefrajdanto estis la persekutinto de Vilhelmo Tell. Per unu paŝo la heroo traboris la bruston de la kruelan rajdantestro. La sago ankoraŭ ĉiam sidis en la koro, kaj mi miris, ĉu tio multe doloris la kruelan mortigiton. Tiujn bildojn mi trovis belegaj, kaj mi estus trovinta ilin ankoraŭ pli belegaj, se Vilhelmo Tell vere estus vivinta. Sed mia patrino rakontis, ke ĉio estas nur fabelo, same kiel la rakontoj pri Ali Baba kaj la kvardek rabistoj, pri Blua Barbo kaj ceteraj. Laŭ ŝia diro, la historio de Robinsono Kruso vere okazis, tial mi tre ŝatis ĝin kaj deziris, ke

la vespero jam estu veninta, por ke mi povu aŭdi la daŭrigadon de la rakonto.

En la suda muro de la ĉambro estis du fenestroj kun flankaj kurtenoj. La nigre pentrita plafono estis subtenata per dikegaj traboj. La planko ne estis pentrita, sed mia patrino kutimis ŝuti blankan sablon sur ĝin laŭ la jena maniero. Ŝi plenigis paperan saketon per sablo kaj forŝirinte unu el la anguletoj de la saketo, ŝi lasis la sablon forflui per maldika strio, kaj rapide movante la ŝutantan manon tien kaj reen super la planko, ŝi skribis la plej strangajn figurojn, kiuj jen similis al serpentoj, jen al kabalaj figuroj, jen al literoj de la greka, araba aŭ la hebrea alfabetoj. Tiuj figuroj tamen ofte estis baldaŭ detruitaj, kiam „li“ estis hejme, ĉar li kutime maĉis tabakon, kaj kraĉante ĉiuflanke kaj tute ne atentante la desegnan talenton de sia edzino, li kvazaŭ korektante erarojn en skribaĵo de lernanto, kraĉtrastrekis per sia bruna maĉaĵo multajn belajn literojn, kiujn mia patrino kun lerteco estis skribinta sur la planko.

Meblojn oni vidis nur malmultajn en nia ĉambro, ĉar krom la tablo kaj la lampo, nur du ŝrankoj, unu por manĝaĵoj kaj unu por vestoj, kvar seĝoj kaj unu forno sin trovis tie. La lito, kie miaj gepatroj dormadis, ne estis videbla; ĝi estis kvazaŭ ŝranko kun du pordoj, kiuj nur nokte estis nefermitaj.

Mi rigardis tra la fenestroj. En la malproksimeco mi distingis nur la lokon, kie „li“ devos alboriĝi, kaj kie ĉiumomente eble estis aperonta lia kapo. Mi rigardis tamen vane, ĉar nenio ekaperis. Mia patrino, divenante pri kio mi pensas kaj rompante la silenton, reganta en la ĉambro, diris:

— Li forrestas longe.

— Jes —, mi respondis, — la vento estas kontraŭa, li devas luvadi, sed li baldaŭ venos.

— Nu, bone —, diris mia patrino, kaj daŭrigante sian kudradon, ŝi diris plue:

— Multaj ovoĵ hodiaŭ?

— Ne —, mi respondis, — morgaŭ mi serĉkolektos.

— Nu bone —, ŝi refoje diris, kaj vidante trans la katon, ankoraŭ sidantan sur mia ŝultro, ŝi diris plue: — Jen Sam, kin alvenas.

— Me-e-e! — respondis Sam.

Sam estis mia kaprino. La besto ĉiam libere iradis, tamen ne estis permesite al ŝi, eniri la ĉambron; neniam ŝi iris trans la sojlon, kaj ankaŭ nun la besto staris antaŭ ĝi, rigardante min kaj la katon. Estis al mi neklarigeble, kial la kaprino ne rajtis eniri la ĉambron kaj kial la hundo povis iri ĉien laŭ sia plaĉo. La kaprino donadis lakton kaj la hundo donadis nenion, sekve laŭ mia opinio, la kaprino devus havi tiun saman rajton. Mia patrino opiniis tute kontraŭe, dirante ke ne decas, ke kaprinoj eniras la ĉambrojn. Mia Sam tre bone sciis tion, kaj trankvile ŝi staris kun oblike tenita kapo kaj atendis, ĉu mi venos por ludi kun ŝi. Ĉar mi restis sidanta, la besto fine foriris, trapaŝis grave la stalon kaj tuj poste ŝi ekaperis antaŭ la fenestro, kie ŝi montris siajn longajn kornojn. Ŝi rigardis min, sed ĉar mi ne venis, ŝi refoje diris: — me-e-e! — kaj malrapide foriris.

— Ĉu estas multaj kaprinoj en la Vilaĝo? — mi demandis.

— Jes —, diris mia patrino ĉiam kudrante.

— Kaj ankaŭ katoj?

— Jes, ankoraŭ pli multe.

— Kaj ankaŭ hundoj?

— Kompreneble, ankaŭ hundoj.

— Kaj ankaŭ bovinoj? — mi demandis post momento.

Anstataŭ la patrino, nun respondis la papago, sidanta en kupra kaĝo sur la vestoŝranko.

— Go til fanen! — ĝi ekkriis.

— Go til fanen! — mi diris ridante. Mi tamen ne komprenis tiujn vortojn.

— Mi jam venis! — ekkriis la birdo kaj post tiu frazo ĝi ekfajfis tiel laŭte, ke la kato ektimis kaj saltis de mia ŝultro sur la plankon.

— Ĉu vi refoje legos el Robinsono! — mi demandis al mia patrino.

— Se estos eble —, ŝi respondis. Mi sciis, kion tio signifis. Mia patro, post kiam li revenis de la Vilaĝo, ĉiam kunportis grandan pakajon da gazetoj, kiuj enhavis la novaĵojn de tuta monato. Se la deziro lin kaptis legi la gazetojn, tiam estus „neeble“ al la patrino legi el Robinsono. Mi sekve esperis, ke li ne legus, por ke mi povu aŭdi la daŭrigadon de tiu rakonto, kiu tiel interesis min. Mi eĉ deziris, ke „li“ ne revenu antaŭ la sekvanta tago, sed por tio la vento ne estis sufiĉe kontraŭa. Pensante pri tiuj aferoj mi jetis lastan rigardon sur la sagon, kiu jam dum tiom da jaroj trapikis la koron de la rajdanta reĝo, ekstaris kaj foriris el la ĉambro, dirante: „Mi iras“, al kio respondis mia patrino per sia kutima: „Nu bone!“ Mi do iris kaj direktis la paŝojn al la tiel nomata „haveno“, tio estis la loko, kie ĉiam la boato albordigis. La Insulo estis okulforma, nur la suda parto ne havis dunojn kaj ĉe tajdo mi povis marŝi tie pli ol mil paŝojn sur la ŝlimhava tero, kiu oblikve sin etendis en la maro. Okcidente en tiu ĉi ŝlimaĵo staris du longaj vicoj da fostetoj, utilantaj kiel gvidmarkiloj, en kies mezo la boato devis ŝipveli aŭ luvadi de la digo al nia Insulo. Sen tiuj markiloj estus absolute neeble atingi la „havenon“, ĉar eĉ ĉe alfluo la akvo sur multaj lokoj ne estis sufiĉe profunda por esti ŝipirebla. La distanco de nia domo al la „haveno“ estis tricent paŝojn; mi sekve alvenis tie baldaŭ. La kaprino,

kiu kuratingis min, kiam ŝi min ekvidis eliri la domon, nun staris ĉe mia flanko. Ŝiaj mentonharoj flirtis en la vento kaj ni ambaŭ rigardis suden por vidi, ĉu, li^a jam estis venanta. Sed li ne estis ankoraŭ videbla. La du vicoj da palisetoj etendiĝis tiel longe en la maro, ĝis ili fariĝis nedistingeblaj, sed en la mezo de la markiloj, kiuj en la malproksimeco aspektis kiel du linioj de punktetoj unu tuj post alia, mi vidis nenion krom blua strio da akvo perdiganta ĉe la fino sub la malalta digo, kiu limigis la horizonton. — Li ankoraŭ ne venas, Sam —, mi diris. — Me—e—e! — respondis la besto, kaj ĉar mi returnis min al la mezo de la Insulo, la kaprino returnis sin kun mi. Mi pasis mian domon kaj irante okcidenten, mi baldaŭ staris sur la vasta herbejo, sin etendanta ĉiuloken ĉirkaŭ la tuta domo ĝis la sablaj montetoj kaj ĝis la ŝlimajo. Tiu herbejo, kiu somere estis falĉita, produktadis multan fojnon por la du remaĉantoj kvarpieduloj. Estis nun en Septembro, la fojno jam de longe estis kolektita malantaŭ la krado el ligno en nia stalo, kaj la herbo jam komencis denove elkreskadi, tiel ke la bovino kaj la kaprino ĉiam trovadis sufiĉe da manĝaĵo, kiam ili sin paŝtadis sur la Insulo, kaj ĉiam ili libere paŝtadis sin. Se ekpluvegis, ili povis trovi rifugejon en la stalo, kiu en la somero neniam estis fermita. Kiam la aŭtuno komenciĝis, ni kutime lokis la du bestojn en la stalon, kie ili bone sin trovis sur dika tavolo da pajlo. La du bestoj estis al ni tre utilaj pro la lakto, kiun ili donadis.

Persono, loĝanta en vilaĝo aŭ en urbo, ne facile povus kutimi al vivado sur nia Insulo pro la granda soleco kaj unutoneco ĉiam regantaj ĉe ni, sed la vivo en vilaĝo aŭ en urbo estis al mi tute nekonata, sekve mi ne sentis tiun solecon, nek tiun unutonecon kaj vivadis feliĉe kaj kontente, neniam enuante kaj estis rilate al

tio kiel birdo en kaĝo. Mi estis libera en ĉio, kaj nur laboris, kiam mi deziris labori; la gepatroj neniam devigis min fari ion, kio estis kontraŭa al mia volo aŭ deziro. Ili agis kun mi tute kiel kun la kvarpieduloj, kiuj estis bone traktataj kaj nutrataj kaj nur vintre devis resti hejme, same kiel mi, ĉar en tiu sezono la vetero estis ordinare tiel malagraba, ke nur kun peno mi povus pasigi longan tempon eksterdome pro la neĝo, tiam preskaŭ ĉiam kovranta la tutan Insulon, aŭ pro la akra vento, kiu libere kaj sen kontraŭstaro blovis ĉiuloken. Ĉiu imagebla ŝirmilo kontraŭ la furiozeco de la vento malestis, ĉar krom la domo, nenia staranta objekto, eĉ ne arbo, sin trovis sur la peco da tero, kie mi pasigis mian junan aĝon. Ĉiu peno planti arbojn, estis estinta vana. La tero estis sufiĉe nutra por kreskigi ilin, sed ĉiun plantitan arbon jam renversis la kelkfoje regantaj uraganoj, tiel ke mia patro ne klopodis plu planti aliajn. Mi sekve ueniam vidis arbon. En la vintro mi preskaŭ ĉiam sidadis hejme kaj trikadis ŝtrumpojn por mia patrino. Por ĉiu trikita ŝtrumpo mi ekhavis arĝentan monereton kaj ĉar mi trikis lerte, mi jam kolektis skatoleton plenan je tiaj moneroj, kies valoron mi tamen tute ne konis. Mi multfoje ludadis kun ili sur la tablo, konstruadis el ili domojn, barkojn, brigojn kaj eĉ bovinojn kaj kaprinojn. Tiel trikadante kaj ludante mi pasigis feliĉe kaj kontente la vintron. Mia patro en tiu sezono faris malmulton. Li nur melkis la bestojn kaj „dejoris“, kiel li diris, nur malofte pro la malbona vetero. La deĵorado konsistis el tio, ke li kolektis ĉiajn objektojn, kiujn la maro jetis sur la Insulon. Mia patro estis ŝtata kolektisto de ŝpruinaĵoj. Post uragano preskaŭ ĉiam ŝipo ruinigis en nia proksimeco kaj post tiaj okazintaĵoj la tuta bordo de nia Insulo estis jetkovrita de pecoj de rompiĝintaj ŝipoj, de bareloj, de plenaj

sakoj kun rizo, tabako kaj tiel plu. Kiel eble plej multe ni tiam metis la objektojn de valoro en la stalon, sur la subtegmentejon kaj eĉ en nian ĉambron, kaj poste mia patro transportis ilin al la Vilaĝo, kie ili estis vendataj de la vilaĝestro. En tiaj tempoj „li“ havis multon por fari kaj kiel ajn volonte mi deziris akompani lin, ĝi estis neebla, kaj kun rezigno mi restis sur la Insulo jam ne pensante pri la okupoj de mia patro.

Mi ne sciis, ĉu la Insulo estis granda aŭ malgranda, ĉar pri grandeco mi havis neĝustan ideon. „Li“ unu fojon diris, ke ĝi estas vasta cent hektarojn, sed ĉu tio estas multa aŭ malmulta, mi ne povis diri.

Estis nun bela vetero kaj la suno faris proksimume la tri kvaronojn de sia irado super la horizonto, tiel ke ĝiaj radioj estis sufiĉe varmaj, por ke mi povu kuŝi en la herbo, kaj tion mi tuj faris. Sam sin paŝtis apud mi kaj mi rigardis la ĉielon, kiu kiel blua bela kloŝo el vitro staris super nia Insulo. Ĉiuloke la mevoj flugis kaj blekadis laŭte. „Atentu nur“, mi pensis, morgaŭ mi refoje forprenos viajn ovojn kaj metos ilin en la korbon, kaj poste hejme en la kestetojn inter la segopolvo, kaj patro vendos ilin en la Vilaĝo. Tiuj ovoj estis tre grandaj, multe pli grandaj ol anasovoj kaj ili estis tre delikataj, sed ne tiel nutraj kiel anasovoj. Mi kolektis kelkfoje pli ol cent en unu tago, precipe kiam estis la tempo, en kiu la mevoj kutime demetis ilin.

Subite Sam ekhaltis sin paŝti kaj klinante la kapon teren, ĝi faris kelkajn strangajn saltojn flanken kaj an tamen. Tuj poste laŭta bojado anoncis al mi, ke Jafet alproksimiĝis. Sendube la hundo estis ie dorminta kaj vekiginte, serĉis min. Jen ĝi staris ĉe mia kapo kaj lekis mian vangon. Jafet estis bona besto, vivanta ĉiam en harmonio kun la kaprino. De tempo al tempo ili ludis unu kun la alia kaj ŝercbatalis, sed neniam ili faris al

si reciproke malbonon. La hundo estis multe pli malgranda ol la kaprino, kaj anstataŭ griza, ĝi estis tute nigra. Mi neniam vidis aliajn bestojn krom la niaj kaj kredis, ke ĉiuj hundoj estas nigraj, ĉiuj kaprinoj grizaj, ĉiuj katoj blankaj kaj ĉiuj bovinoj blankaj kun nigra kapo. Nia bovino ne havis nomon, ĉar ĝi neniam volis ludi kun mi. Mi do ne okupis min multe pri ŝi. La aliajn kvarpiedulojn mi nomis Sim, Sam kaj Jafet, ĉar tiuj nomojn mi lernis, kiam mia patrino en unu vintra vespero rakontis al mi la historion pri Noa kaj lia arkeo. Sim, Sam kaj Jafet estis la filoj de Noa kaj min kaptis la ideo, ke ankaŭ niaj bestoj povus esti nomataj tiel. Pri aliaj nomoj mi neniam aŭdis, ĉar knabojn aŭ knabinojn mi ne konis, sekve mi ne sciis, kiel ili estas nomataj. Ĉiuj niaj bestoj konis sian nomon. La papago ne estis mia amiko, ĉar antaŭ kelkaj vintroj en unu mateno, kiam mi volis doni al ĝi peceton da sukero, la birdo tiel mordis mian fingron, ke la sango elgutiĝis, post tiu pruvo de malamikeco kontraŭ mi, neniam mi ekpensis doni al ĝi unu nomon. Ĝi nomiĝis „la papago“, ĉar tiun nomon ĝi portis de la tempo, kiam mia patro trovis la birdon en forlasita ŝipruino sur la ŝlimaĵo de la Insulo. Tiu ŝipo estis el Danujo, ĉar laŭ diro de mia patro ĝi portis la danan nomon „Viking“. La ŝipanoj verŝajne estis dronintaj, neniam oni eksciis ion pri ili.

Mi nun ekstaris kaj ludante kun la kaprino kaj la hundo, mi iris hejmen por anonci al la patrino ke „li“ ankoraŭ ne estis venanta.

Tiun vesperon mi sidis ĉe la tablo kaj aŭskultis la legadon pri Robinsono. Mia patro, kiu estis reveninta kelkan tempon antaŭ la subiro de la suno, jam kuŝis en la ŝranklito, ĉar li estis laca pro la vojaĝo kaj multaj okupoj en la Vilaĝo. Li sekve ne deziris legadi la kun-

portitojn gazetojn, sed tuj post la rehejmiĝo iris dormi, parolante nur malmultajn vortojn al mia patrino, kaj dirante nenion al mi. Dormante, li multfoje laŭte ronkadis, kaj ĉar tio tre malhelpis la legadon de mia patrino, mi estis ferminta ambaŭ pordojn de la ŝranklito, tiel ke la dormanto ne nur estis nevidebla, sed eĉ preskaŭ neaŭdebla. Nur tre mallaŭte mi kelkfoje aŭdis la ronkadon kvazaŭ ia mistere kaŝita segisto ie tre malproksime laboradus. Tion tamen mi fine jam tute ne atentis kaj nur aŭskultante la historion pri mia amata heroo, mi eksciis, kiel Robinsono post multaj jaroj da restado sur sia insulo fine konatiĝis kun Vendredo, la sovaĝulo, kiu poste vivis en intima amikeco kun li. Mi ekaŭdis pri la hommanĝantoj kaj multaj aliaj strangaj aferoj, kaj la patrino fermis la libron ĉenova ĉapitro, kiu rakontos pri refoja vizito de la sovaĝuloj kaj aliaj mirindaj okazintaĵoj, kiujn mi ekaŭdus la sekvantan vesperon, se „li“ ne legus en la gazetoj. Mi iris dormi, kunprenante kun mi Sim kaj Jafet, kaj kvankam mia patrino estis leginta al mi pri tiuj grandaj danĝeroj, kiuj estis minacintaj mian heroon, mi en tiu nokto tute ne songis, sed dormadis tiel kviete kun Sim kontraŭ mia brusto kaj Jafet sur miaj piedoj, kvazaŭ danĝeroj neniam estus ekzistintaj nek okazontaj.

Dua Ĉapitro.

La skuno — Matenmango kun preĝado — Mi serĉkolektas ovojn — Revado pri Vendredo la sovaĝulo — La nudulo — Mi ektimas kaj forkuras — Fremdulo en mia domo — Kuiru viajn pizojn! — Kiel Johano estis eksigita kiel aktoro — Pri mia nomo — Ĉu miaj gepatroj vere estas miaj gepatroj? — Mi montras la Insulon al nia gasto.

La sekvantan matenon mi vekigis jam frue. Sim ankoraŭ dormis sur mia brako kaj faris mienojn, kvazaŭ ĝi jam neniam vulus ellitiĝi. Sed post kiam mi sidigis. Jafet vekigis, rektigis kaj saltis el la lito, kaj Sim sekvis ĝian ekzemplon, baldaŭ poste mi staris sur la planko antaŭ mia dormŝranko kaj tuj supreniris la ŝtuparon por ekrigardi eksteren, ĉar mi volis serĉkolekti ovojn, se la vetero tion ebligus al mi. La vetero estis belega. La suno leviginta antaŭ du aŭ tri horoj, staris kiel ora disko super la digo kaj jetis brilantajn radiojn antaŭ sin sur la akvon. Estis belega vidaĵo. Tute kiel ordinare la mevoj ŝvebis super la maro por kapti nutraĵojn kaj tute ne antaŭsentis, ke mi baldaŭ venos por forpreni la grandajn blue makulitajn ovojn en la dunoj. Tre malproksime mi ekvidis aperantan skunon. Ĝi venis, kiel mi kredis, el la profunda abismo, kaj grave alproksimiĝis al nia Insulo. Laŭ la vento ĝi devis luvadi kaj tion ĝi faris kun veloj sur ambaŭ mastoj. Ho! mi deziris esti sur ĝi, sed tio estis neebla. Oni faros min maristo post multaj jaroj, sed antaŭe mi devos multe lerni, kaj ĝis nun mi lernis nenion, ĉar neniu estis sur la Insulo por

instrui. Mia patrino klopodis instrui al mi la legarton, sed tio sukcesis al ŝi nur malbone. Mi konis kelkajn literojn, sed formi vortojn el ili, estis al mi tute neeble, ĉar el „jo—a—mo“ ŝi faris „jam“, el „jo—e—so“ ŝi formis „jes“, el „ho—a—ro—o—jo“ ŝi faris „haroj“, kaj ĉio tio ŝajnis al mi tre stranga. Poste mi do devos lerni, sed la patro ĉiam prokrastis. Tre mi deziris lerni legi librojn, tio verŝajne estus ankoraŭ pli amuza ol kolekti ovojn de marbirdoj.

Mi malsupreniris la du ŝtuparojn kaj eniris kun Sim kaj Jafet en la ĉambron por matenmanĝi.

— Mi jam venis! — mi diris, eksidante ĉe tablo.

— Nu bone —, diris mia patrino.

Sim sidigis flanke de mi sur mia seĝo kaj Jafet eksidis sur sia postajo, tenante la antaŭpiedojn antaŭ si kaj movetante ilin supren kaj malsupren; ĝi petis peceton da pano dum Sim pacience atendis, ĝis kiam mi donos ion al ĝi.

La manĝaĵo estis preta kaj konsistis el pano, biskvito, fromaĝo, lakto kaj ovo. Mia patro, kiu estis leginta el gazeto, metis ĝin flanken, kaj ekkaptis la ĉapon, kiu ĉiam kovris lian dikcan grizan hartavolon. Li nur demetis la ĉapon por preĝi. Ĝis tiu tempo mi havis strangan ideon pri preĝo, ĉar tio okazis silente. Dum la tiel nomita preĝo, mia patro metis la ĉapon antaŭ la vizaĝon, kvazaŭ li volus kaŝi ĝin por ni ĉiuj. Nur liaj longaj mentonharoj tiam sin montris sub la plektitaj manoj, kiuj tenis la ĉapon. Mi ankaŭ portis ordinare ĉapon, sed ĉar mi ankoraŭ ne estis almetinta ĝin ĉi tiun matenon, mi preĝis sen ĉapo antaŭ la vizaĝo, nur interfingrante la manojn kaj rigardante mian patrinon, kiu faris kiel mi, sed fermis preme la okulojn kaj en tiu sintenado ni atendis, ĝis kiam la patro refoje surmetis la ĉapon. Kiam li tion estis farinta, la preĝo estis finita. Dum

tiu ceremonio mi kaŝe rigardis Jafet kaj, ĉar la hundo estis malsata, ĝi pli kaj pli movetadis la antaŭpiedoĵojn, eligante de tempo al tempo mallaŭtan ekbojeton, kiun ĝi neeble povis retenigi pro malpacienco.

Ni manĝis. Mi laŭvice donis peceton al Sim, al Jafet kaj al mi mem. La papago, kiu tre amis malsekan biskviton, sed ankoraŭ ricevis nenion, fine ekkriis: „Mi jam venis“, post kio mia patrino alportis al ĝi duonan biskviton, trempitan en kafon. La birdo kun gracia movo ekkaptis sian nutraĵon per unu ungego kaj, firme sidante per la alia sur la horizontala bastoneto en la kaĝo, ekmanĝis, dirante nenion plu. Mia patro tute ne atentis min, eĉ diris al mi nenion, kaj matenmanĝinte kviete, refoje preĝis, prenis tiam la gazeton por legi, dum mia patrino formetis la manĝilaron.

Oni tamen ne devas opini malfavore pri „li“, ĉar li tute ne estis malica viro. Neniam li riproĉis, nek batis min. Li nur agis kvazaŭ mi ne ekzistus, kaj tion li ne faris pro malbona humoro, kontraŭe, lia humoro neniam ŝanĝiĝis. Li ĉiam kviete, malrapide iris sian vojon. Mi jam kutimadis al tio kaj kredis, ke ĉiu patro estas kiel la mia.

Post la manĝado Sim iris en la stalon. Mi prenis grandan korbon kaj sekvis la hundon dirante laŭkutime: „Mi iras“, post kio mia patrino diris: „Nu bone!“ „Go, til fanen!“ ekkriis la papago, sed mi jam estis en la stalo, kaj en akompano nur de Jafet, ĉar la kato neniam volis nin akompani, ni iris trans la herbejon al la dunoj. Mezvoje ni renkontis la bovinon, kiu sin paŝtis. La hundo salutis ĝin per laŭta bojado: la bovino tamen daŭrigis sin paŝti kaj ni pasis ĝin kaj estis baldaŭ en la dunoj. Malrapide ni marŝis en la mola sablo kaj serĉadis. Mia hundo ĉiam akompananta min, kiam mi serĉkolektis ovojn, jam flaradis, ĉu ĝi povus ion malkovri. Tiel ni

iris kelkajn minutojn. Jafet, serĉante kelke da paŝoj antaŭ mi, fine ekhaltis kaj rigardis posten al mi, kvazaŭ por anonci, ke ĝi trovis neston. Mi baldaŭ estis sur la loko, kaj ekvidis mevon sidantan sur nesto. La birdo rigardis la hundon kun malfermita beko kvazaŭ defendante sin, kaj la hundo, kiu estis malgranda kaj iom timema, restis staranta, atendante ĉu mi forpelos la sidantan mevon. La birdo, rimarkante min, ektimiĝis, kaj lasante sian neston forflugis kun laŭtaj ekkrioj. El la kvar ovoj, kuŝantaj en la nesto, mi forprenis tri, ĉar ĉiam mi lasis unu por kredigi al la birdoj, ke mi ne forprenis iliajn ovojn. Mia patro instruis al mi, ke mevoj por ĉiam forlasas neston, el kiu oni forprenis ĉiujn ovojn. Daŭrigante la serĉadon, mi laŭ tiu maniero akiris proksimume kvardek ovojn kaj, laciĝinte pro la laciga marŝado en la dunoj, kiuj jen altiĝis, jen malaltiĝis, mi eksidis por ripozadi. Jafet, kvankam neniam laca, kiom ajn longe ĝi marŝadis aŭ kuradis, ankaŭ eksidis kaj, vidante ke mi metis la duone plenigitan korbon sur la sablon, kuŝiĝis kviete, ripozigante la kapon sur la antaŭpiedoj. En tiu sintenado ĝi komence rigardadis min, sed ĉar mi nur malmulte atentis ĝin, la hundo post kelka tempo fermis la okulojn kaj ekdormetis ĉe mia flanko. Sidante kun suprentiritaj kruroj, kiuj mi kune tenis per la brakoj kaj interfingritaj manoj, mi sencele rigardis antaŭ min trans la altaĵojn de la sablo kaj ekrevis. La vetero, kiu ĝis nun estis tre bela, subite ŝanĝiĝis. Densa nebulo neatendite ĉirkaŭis nin, sed, ĉar tio estis tute sendanĝera veterŝanĝo, kaj ĉar ne ekpluvis, mi restis, kie mi estis, atendante ĉu la suno malaperinta baldaŭ forpelos tiun nebulajon. Tio tamen ne okazis kaj mi restis sidanta . . . revanta . . .

Mi imagis esti sur izolita insulo, kaj ke mi estas Robinsono. Mi vagadis tra la arbetaro de tiu insulo,

tamen tute ne sciante kiel arbetaro aspektas. Mi vagadis image laŭlonge de la marbordo kun paŭlo sur mia ŝultro kaj kun hundo ĉe mia flanko. La papago, kelkfoje dirante: „Kompatinda Robinsono!“ sidis sur alia mia ŝultro, kaj mi vagadis kaj vagadis, ĝis kiam subite mi vidis en la malproksimeco ekaperi Vendredon. Mia koro forte ekbatis, ĉar tiu parto de la rakonto estis ekscitinta min en tre alta grado, kaj donante min tute al mia revado, mi ne rimarkis, ke fine la suno reekaperis kaj forpelis la nin ĉirkaŭantan nebulajon. Mia rigardo estis liksata sur la sama loko, kie laŭ mia imago, ekaperis la sovaĝulo. La sovaĝulo fariĝis pli kaj pli granda kaj tre surprizis min lia nuda korpo, kiu ŝajnis al mi tiel natura, ke mi ektimis pri ĝi. Mi nun rimarkis, ke la nebulo malaperis, kaj kun surprizo mi rigardis ĉirkaŭ mi. Jafet ankoraŭ dormadis. Refoje direktante la rigardon sur la lokon, kie estis aperinta Vendredo, mi kun ektimo vidis, ke la aperaĵo ne nur estas ankoraŭ tie, sed ke ĝi fariĝis pli kaj pli klara. Mi nun povis distingi la trajtojn de la aperaĵo kaj, kredante ke mi songas, mi pinĉis al mi la brakon por sperti, ĉu mi dormas aŭ ne. Mi tamen sentis la pinĉon kaj pli kaj pli granda fariĝis la teruro, kiu ekkaptis min. La revado ŝanĝiĝis en realecon, ĉar vere tie antaŭ mi je distanco de ĉirkaŭ du dek paŝoj staris nuda homo. Mi tiel ektimis, ke mi sentis mian koron salti en la gorĝon; mi volis ekkrii, sed ne povis. „Ho Dio!“ mi ĝemis, „kie do estas tio!“ Mi volis ekstari por forkuri, sed tio estis al mi neebla, mi ne povis malplekti la manojn kaj restis sidanta kun supren tiritaj genuoj, ĉiam kun teruro rigardante la aperaĵon. Jafet ankoraŭ dormis kaj ne sciis, en kia stato mi troviĝis. „Jafet!“ mi ekkriis. Sed mia voĉo estis tro malforta pro la emociego, por vekti la hundon. En tiu momento la sovaĝulo altiĝis la manon kaj tenante ĝin super la

okuloj, li rigardis la lokon, kie mi sidas. Miaj haroj ekstaris sur mia kapo kaj mi kredis, ke mi estas tuj mortonta. Feliĉe la teruro fine donis al mi la kapablon ekstari kaj mi ekstaris, puŝante per la piedo la hundon, kiu vekigis. — Jafet! — mi diris per tremanta voĉo, — Jafet!...rigardu tien! — kaj mi fingre montris la nudulon, kiu subite vokis al mi ion per laŭta voĉo. Mi sekve ne trompis min, ĉar la homo povis paroli, kaj li ne estis la rezultato de mia revado, sed vera vivanta homo — eble sovaĝulo, ĉar li estis tute nuda, same kiel Vendredo. Ektimante, ke li estas tuj manĝonta min, mi turnis al li mian dorson kaj forkuris kiel eble plej rapidpiede, lasante la korbon sur la loko, kien mi estis metinta ĝin. Eĉ ne rigardante post min, kaj aŭdante la laŭtan bojadon de Jafet, kiu verŝajne iris ataki la sovaĝan homon, mi kiel sago el pafarko rapidis hejmen por serĉi rifuĝejon en la gepatra domo. Jafet povis kuri tre rapide, pli rapide ol mi, sed en ĉi tiu okazo ĝi sen ia dubo ne povus kuratingi min, eĉ se ĝi volus. La pordo de la stalo estis nefermita kiel kutime; mi do ne bezonis malfermi ĝin kaj, saltante trans ĝian sojlon, mi ekvidis, ke la ĉambra pordo ankaŭ estis nefermita. Mia patrino sidis ankoraŭ ĉe tablo tute ne atendente min. Ankoraŭ tremante en mia tuta korpo mi kun laŭta ekkrio enkuris, kaj ne dirante kiel ordinare: — Mi venis! — mi falis sur seĝon.

Mia emocio tre surprizis mian patrinon. Rigardante min kun larĝe malfermita buŝo kaj per grandegaj okuloj, ŝi demandis, haltigante sian trikadon, kio okazis nur tre malofte:

- Kio estas, knabo?
- Sovaĝulo! — mi ekkriis.
- Sovaĝulo!? — demandis mia patrino.
- Jes, en la dunoj!

— Mi ne komprenas —, ŝi diris plue.

— Sovagulo estas en la dunoj! — mi ekkriis. — Li estas tute nuda.

— Sovagulo en la dunoj!? . . . Sed knabo, kio do estas al vi Ĉu vi songas?

— Mi ankaŭ kredistion —, mi respondis, — sed ĉar li estis alparolanta al mi, mi fine eksciis, ke mi ne songis. Mi vidis lin kiel mi nun vidas vin, li iris al mi, sed mi forkuris Jafet eble atakis lin, ĉar kiam mi forkuris, ĝi bojadis furioze kaj ne min sekvis hejmen.

— Sed knabo, vi nepre songis pri la libro, el kiu mi legis al vi hieraŭ vespere. Mi jam ne legos, ne povas esti homoj sur la Insulo, kiel do ili povus veni ĉi tien?

— Mi ne scias —, mi respondis, ĉiam rigardante la pordon, kaj timante ke mia sovaĝulo venos, mi ekstaris kaj iris al la pordo por fermi ĝin. En tiu momento mia patrino eligis laŭtegan ekkriion de teruro; mi turnis min kaj vidis, ke ŝi kovris al si la okulojn per ambaŭ manoj, dum ŝi ĝemkriis:

— Ho, Dio mia, kio estas tio?

La kaŭzo de ŝia ekkrio tuj fariĝis al mi klara. Antaŭ la fenestro staris mia sovaĝulo. Por kovri sian nudan korpon, li tenis mian korbon antaŭ si kaj en tiu sintenado li rigardis internen.

— Irufor! — laŭte kriis mia patrino. — Ho Dio, helpu min! — Jafet, kiu sendube estis sekvinta la nudan viron, bojadis kiel ĝi neniam antaŭe bojis, sed la sovaĝulon tio tute ne timigis, ĉar li restis staranta ĉe la fenestro kun la korbo antaŭ la ventro. Per la alia mano li fine frapetadis sur la vitron, kaj je nia ambaŭa surprizo li diris kun voĉo, kiu ne apartenis al hommaĝanto:

— Sinjorino, pruntedonu al mi pantalonon, mi petas, por ke mi povu eniri.

— Kiu vi estas? — demandis mia patrino.

— Mi estas preskaŭ-droninto, sed feliĉe povis naĝ-atingi ĉi tiun insulon. Miaj vestoj estas sur la ŝipo.

— Kiu ŝipo? — demandis mia patrino, rigardante tra la fingroj la strangan preskaŭ-droninton.

— La skuno —, li diris.

— Ho! mi scias! — mi subite diris — Skuno luvadis hodiaŭ matene okcidente de la Insulo.

Mi nun konsciis, ke la sovaĝalo tute ne estas danĝera, kaj kurinte al la vestŝranko, mi prenis pantalonon de mia patro kaj iris stalon. La homo, vidante tion, tuj forlasis la fenestron kaj iris al mi renkonten por akcepti la petitan pantalonon.

— Dankon, knabo! — li diris, kaj turnante al mi sian dorson, li almetis la pantalonon kaj sekvis min en la ĉambron, kie li metis la korbon sur la tablon. Mia patrino jam rekvietiĝis.

— Sinjorino —, diris la homo, — ne ekkoleru kontraŭ mi kaj ne ofendiĝu pro la stranga maniero, en kiu mi prezentas min al vi, sed mi estas devigata agi tiamaniere, ĉar la knabo forkuris de mi, tiel ke mi ne povis peti lin alporti la pantalonon.

— Mi vin kredis hommanĝanto —, mi diris por senkulpigi min.

— Hommanĝanto?

— Jes, kiel la sovaĝuloj, kiuj volis manĝi Vendredon —, mi klarige respondis.

Li laŭte ekridegis kaj refoje sin turnante al mia patrino, li diris plue: — Ni luvadis kaj antaŭeniris nur tre malrapide, kaj ĉar la vetero estis belega, mi volis bani min kaj naĝi kelkajn minutojn apud la ŝipo. Malfeliĉe densa nebulo surprizis min; mi perdis la bonan direkton de la ŝipo, naĝis sendube en malĝustan direkton kaj ĉiam la nebulo foriĝis, mia ŝipo estis tiel malproksima,

ke estis al mi neeble naĝatingi ĝin. La bordo de via Insulo tamen estis sufiĉe proksima kaj mi naĝis tien, alvenis en la duonoj, kie mi vidis vian knabon, kiu tamen forkuris de mi, kvazaŭ mi estus la diablo mem.

Dum la fremdulo parolis, mi rigardis lin sen interrompo kaj sen plua timo. Li aspektis tute alie ol mia patro; li estis pli juna, multe pli altkreska, pli babilema kaj multe pli bela laŭ vizaĝo, kvankam li ne havis mentonharojn. Tiurilate li similis pli mian patrinon, kiu same kiel li, havis senharan vizaĝon. Komence mi eĉ supozis, ke li estas virino, sed ĉar li estis maristo, li nepre devis esti viro. La fremdulo rakontis, ke li naskiĝis en la „Urbo“. Kiam miaj gepatroj parolis pri la „Urbo“, ili ĉiam aludis la grandegan vilaĝon, kiu estis kvar horojn sude de la digo, kaj nia vizitanto vere naskiĝis tie. Li ĵus venis per la skuno „Fantazio“ de Hamburgo kaj lia ŝipo iris Londonon. Dum li rakontis, mia patrino serĉis en la ŝranko ŝtrumpojn, ĉemizon kaj aliajn veŝtojn, por ke nia neinvitita gasto dece povu sin vesti, kaj ŝi ĵus trovis ĉion, kio mankis al la vestaĵaro de la maristo, kiam Jafet enkuris la ĉambron laŭte bojante. Ĝin sekvis mia patro. Surprizite li ekhaltis sur la sojlo, kiam li vidis ĉe la tablo fremdan viron kun nudaj piedoj, nuda supra korpo kaj sen ĉapo. Li rigardis mian patrinon kvazaŭ por peti informojn kaj eĉ ne diris: „Mi venis“. La fremdulo, kiu ekaŭdis lin veni, tuj ekstaris kaj salutante lin, donis al li sian manon. Li tiam ridetante klarigis, kiel li alvenis sur la Insulon kaj petis lian helpon por unu aŭ du tagoj, ĉar li deziris, se eble, foriri plej baldaŭ por ne ĝeni nin. — Morgaŭ aŭ postmorgaŭ —, tiel li finis, — mi volas foriri.

— Neeble! — diris mia patro, kaj post tiu unu tre klara vorto li sidigis sur la kvara seĝo de nia ĉambro.

— Kial neeble? — diris la fremdulo.

— Ĉar mi ŝipiras nur unufoje po monato al la Vilaĝo!

— Tamen vi povos iri tien pli ofte, se vi deziras.

— Ne, ĉar mi estas ŝtata kolektisto de ŝipruinaĵoj.

— Nu?

— Nu, mia regularo permesas al mi, ke mi nur unu fojon po monato iras vilaĝon pro dejoraj aferoj.

Surprizite mi ekrigardis mian patron. Neniam li estis dirinta tiom da vortoj per unu fojo.

Nia gasto ridetis afable; ŝajnis al mi, ke li estas ĉiam ridetanta homo.

— Mi sekve estos devigata resti ĉi tie tutan monaton? — li diris.

— Vi povos tion —, respondis mia patro.

— Sed mi havas nenion ĉe mi por pagi.

— Estos senpage —. Mia patro post tiu mallonga respondo prenis botelon kaj glasetojn el ŝranko kaj metis ilin sur la tablon.

— Mi dankas pro via afableco —, diris la fremdulo.

— Sed ne estas lito por vi en mia domo.

— Tio ja tute ne estas malhelpaĵo, mi povas dormi sur pajlo, se pajlon vi havas.

— Mi havas —, diris mia patro plenigante tri glasetojn per brando. Fariĝis malgranda paŭzo, kiun mi utiligis por esprimi ke ne nia gasto, sed mi volas dormi sur tiu pajlo.

— Li (mi montris la mariston, kies nomon mi ja ne konis) povas dormi sur mia lito —, mi diris.

— Vi estas bona knabo —, respondis la fremdulo, frapetante amike mian ŝultron —, sed mi ne akceptas tiun proponon; mi dormos sur la pajlo, kaj vi dormos kiel kutime sur via lito.

— Nu bone! — diris mia patrino, prezentante vestojn al la maristo. — Jen vi havas por vesti vin dece.

Li akceptis dankante kaj surmetante ilin (ŝtrump-

ojn, botojn, ĉemizon kaj jakon) li diris: — Mi ĝis nun ne diris mian nomon; mi nomiĝas Johano.

— Go til fanen! — subite ekkriis la papago.

La maristo ridis laŭte kaj demandis: — Kiu el vi, krom la birdo, povas paroli tiel bone dane?

— Ĉu tio estas dana? — demandis mia patrino.

— Jes, tio estas dana.

— Kion ĝi signifas? — diris plue mia patrino.

Johano estis klarigonta, sed mia patro interrompis lin demandante: — Ĉu vi ne malsatas?

— Ho, tute ne; mi manĝis antaŭ tri horoj.

Mi silente admiris la mariston, kiu ĉiam tiel afable sin kondutis kaj ĉiam ridetadis; li ja estis por mi io tute nova, kaj la junua homo (krom miaj gepatroj) kiun mi vidis ĝis nun. Mi trovis lin tre bela kaj jam kutimis, ke li ne havis mentonharojn; mi sentis, ke mi amos lin pli ol miajn gepatrojn, se li povus restadi sufiĉe longan tempon ĉe ni. Bedaŭrinde li volis forŝipiri post monato por vojaĝi Londonon. Mi deziris akompani lin, sed mia patro ne konsentus, ĉar mi estis ankoraŭ tro juna. La maristo parolis multe, precipe al mia patrino, kiu estis pli babilema ol ŝia edzo, kaj mi aŭskultis kun malfermita buŝo, ĉar li rakontis pri Hamburgo, pri tiu bela grandega urbo, kiun li vizitis jam multfoje. Li rakontis pri multaj aferoj (pri kiuj eĉ neniam legis mia patrino el „Mil kaj unu noktoj“) al mi tute nekonataj. Ho! kiom volonte mi vizitus ankaŭ Hamburgon kaj certe mi volus iri tien, kiam mi estus sufiĉe aĝa kaj maristo, kiel Johano.

— Ĉu via Insulo estas malgranda? — fine li demandis.

— Mi volas montri al vi la Insulon —, mi diris, kaj mi sentis min feliĉa, ĉar mi povus fari al li servon.

— Nu bone! — diris mia patrino.

Johano siavice estis respondonta al mi, sed mia

patro interrompis, prezentante al li paperan saketon. Johano sin turnis al li kaj preninte la saketon rigardis en ĝin; tiam li kun afabla rideto redonis la saketon kaj diris: — Mi tre dankas . . . , mi neniam maĉas tabakon . . . , neniam maĉis. — Silente mia patro reprenis la saketon, eltiris el ĝi plenmanon da tabako, kiun li enbuŝigis, kaj metinte la paperan tabakujon en la poŝon, komencis maĉadi kvazaŭ sur peco da pano, kaj tuj poste kraĉis dekstren kaj maldekstren (ne antaŭ sin, ĉar tie sidis Johano) kaj trastrekis la plej belajn literojn el sablo, kiujn mia patrino en la mateno estis ŝutpentrinta sur la planko. La fremdulo tute ne atentis ĝin, li ĉiam montris gajan ridetantan vizaĝon kaj fariĝis pli kaj pli babilema, rakontis senhalte kaj nur de tempo al tempo estis interrompata de mia patrino. Mia patro tamen nur aŭskultadis kaj al demandoj, kiujn al li faris kelkfoje Johano, li respondis nur per „jes“ aŭ per „ne“.

Mi estis ravita kaj trovis, ke Johano parolas tre lerte; ŝajnis al mi, kvazaŭ li rakontus fabelojn kaj la tempo pasis tiel rapide kiel ankoraŭ neniam. Li rakontis pri vojaĝoj, pri urboj, pri teatroj, pri ĉio, kaj laŭ lia diro, li estis la plej feliĉa homo, kiu iam vivis.

— Ĉu vie stas jam longan tempon maristo? — mi fine demandis.

— Ne, mia knabo —, li respondis, — mi estas maristo nur dum du jaroj.

— Kio do vi estis antaŭ tiu tempo? — diris mia patrino, kiu refoje sin montris pli scivola ol ŝia edzo.

— Mi rakontos tion —, li diris, kaj atendante belan rakonton aŭ fabelon, mi atente aŭskultis.

La fremdulo jetis unu kruron trans la alian, krucigis la brakojn sur la brusto kaj komencis ridetante:

— Mi estas nun maristo, sed antaŭe mi estis ĉio, kion vi povas imagi. Mi spertis multajn kontraŭaĵojn,

sed spite tion mi estis kaj mi estas ankoraŭ nun kaj mi restos ĉiam la plej feliĉa el ĉiuj homoj. Fakte mi estas filozofo, almenaŭ tion oni certigis al mi.

— Kio estas filozofo? — mi demandis.

— Mi klarigos —, li diris. — Filozofo estas ĉiam kontenta homo. Filozofo estas viro, kiu ĉiam kuiras siajn pizojn, kaj mi kuiradis ilin ĉiam. Filozofo estas persono, kiu ne havas malamikojn kaj kiu estas la malamiko de neniu. Filozofo estas persono, kiu rezignacias je ĉiuj kontraŭaĵoj, kiuj povus sin prezenti sur lia vojo, kaj kiu spite ĉion povas esti ĉiam kontenta kaj sekve ĉiam feliĉa. Unuvorte, ĝi estas homo, kiu ĉiam kuiras siajn pizojn.

— Glason da brando? — subite kaj lakone interrompis mia patro.

— Malgrandan glason mi akceptos —, diris la maristo, kaj dum mia patro ŝovis antaŭ sian gastan plenan glason, la filozofo diris plue:

— Kiam mi estis juna knabo, miaj gepatroj (ili jam ne vivas) loĝis en „la Urbo“. Ili havis grandan magazeno kaj vendis pretigitajn vestojn. Komence ili volis fari el mi klerulon, sed ĉar mi devis lerni tro multe por fariĝi klerulo, mi prefere helpis en la magazeno, kaj tion mi faris ĝis mia deksepa jaro. Miaj gepatroj volis, ke mi ĉiutage staru post la montrobenko de la oka horo matene ĝis la deknua vespere, sed tion farante mi preskaŭ neniam povus eliri, kaj mi amis eliri por ĝuadi la belan veteron kaj por promenadi; mi tial deziris fariĝi soldato, kaj soldato mi fariĝis.

— Kun lanco? — mi demandis, pensante pri la soldato, kiu arestis Vilhelmon Tell.

— Ne, mia knabo, kun pafilo —, kaj li rakontis plue: — Mi tamen baldaŭ spertis, ke la soldata vivo konsistas ne sole el promenadoj kaj fari malmulton, sed ke tiu vivo kaŭzas kelkfoje malagrablajn momentojn. Mi tamen

ne murmuris pro tio; mi kuiradis miajn pizojn kaj estis kiel eble plej kontenta. Se aliaj soldatoj marŝadis kun pleuplea peza dorsosako, mi enlokis mian brosilon, kiun mi metis tiel de unu larĝa flanko al la alia, ke ĝi elstaris kiel la plej plena sako el ĉiuj de miaj kamaradoj. Aliaj soldatoj marŝadis kaj fariĝis lacaj pro la pezaj sakoj sur siaj dorsoj, sed mi marŝadis kiel la monaĥo, kiu kuiris antaŭe siajn pizojn, kaj min ne doloris miaj ŝultroj, nek la dorso. Kiam miaj kamaradoj deziris eliri vespere dum deĵoro, ili petis permeson por eliri kaj kelkfoje ricevis rifuzan respondon kaj devis restadi en la kazerno. Sed mi eliris ĉiam, neniam petante permeson; mi metis soldate vestitan balailbastonon en mian liton kaj eliris laŭ la dekstra flanko de la gardisto, kiam li rigardis maldekstren, aŭ laŭ lia maldekstra, kiam li rigardis dekstren. Kelkfoje oni ekkaptis min kaj mi estis arestita por pasigi du aŭ tri tagojn en malliberejo. Tio estis malagraba, sed mi ĉiam kuiris miajn pizojn, kaj, ĉar miaj kamaradoj min amis, ili kaŝe englitigis en mian malliberejon tiom da cigaroj, tiom da manĝaĵoj kaj tiom da libroj, kiom mi nur deziris por forpeli la enuon. Mi tamen ne studadis por gradaltiĝi, ĉar tio kostus al mi tro multe da libera tempo, krom tio, mi ne volis restadi soldato ĝis mia morto; mi do ne studadis, sed marŝadis kun malplena dorsosako, eliris, kiam mi deziris eliri kaj amuzadis min. Kiam mi fine ricevis mian pasporton, mi fariĝis kelnero, sed, ĉar mi eliris tro multe, mi ricevis tiom malmulte da trinkmono, ke mi ne povis pagi la lupagon de mia ĉambreto kaj kiam mi estis forlasinta mian oficon, kiu malebligis al mi promenadi kaj ĝuadi la sanigan aeron, min ekkaptis la ideo fariĝi aktoro. Tamen, ĉar bona aktoro devas multe studadi por lerni parkere siajn rolojn, mi kontentiĝis kun roletoj, tiel ke mi bezonis diri nur du aŭ tri frazojn dum la tuta pre-

zentado. Kiam estis ludata ekzemple la dramo de Vilhelmo Tell, mi estis en la unua akto la soldato, kiu arestis Vilhelmon. En la dua mi estis unu el la rigardantoj, kiam Vilhelmo forpafis la pomon de la kapo de sia filo, kaj bezonis diri tute nenion. En la sekvanta akto mi estis unu el la konspirantoj kaj vokis nur la vortojn: — Mi ĵuras!! — Tiel ludante, mi ne bezonis studadi kaj povis promenadi la tutan tagon, dum nur en la vesperoj mi ludadis kaj per tia laboro mi perlaboris multe pli ol mi elspezadis. Oni tamen ne povas ĉiam esti aktoro, kaj kvankam aliaj aktoroj tre min amis, mi fine devis forlasi la teatron, post kiam mi dum la prezentado de Hamleto estis ludinta tro nature, eĉ tiel nature, ke ĉiuj rigardantoj aplaŭdis min, anstataŭ la aktoron, kiu fakte estis meritinta tiujn aplaŭdojn. Mi rakontos, kiel tio okazis. La aktoro estis duelonta, kaj mi devis alporti al li la spadon. Mi ĝin alportis kun teatra gesto, sed malfeliĉe la princo Hamleto (tiu estis la aktoro) ne povis eligi la spadon el la spadingo. Rimarkante, ke mi estis doninta rustitan spadon, mi aliris helpi al li, laŭte dirante: — Atendu, sinjoro Májer (la aktoro nomiĝis Májer), mi helpos al vi eltiri la spadon, ĝi rustaliĝis al la spadingo. — Post tiuj vortoj, kiuj ne staris en mia rolo, sed kiujn mi eldiris tre nature, ektondris tia aplaŭdado, ke ŝajnis, kvazaŭ la tuta teatro eksplodas. Neniam aktoro havis tian sukceson kiel mi, kaj sinjoro Májer, kiu verŝajne fariĝis jaluzo, rigardis min furioze, kaj post tio la aplaŭdoj iĝis ankoraŭ pli bruaj. Kelkaj rigardantoj ekkriis „bíz!!“ Mi sentis min tre flatita pro la honoro, kiun la aŭskultantaro al mi faris, kaj turnante min al ĝi, mi faris profundan riverencon. Tiam la aplaŭdadoj rekomenciĝis, kaj, ĉar ili tute ne finiĝis, la reĝisoro igis malsupreniri la kurtenojn. Dek minutojn poste mi staris kun miaj akiritaj laŭroj ekster la teatro,

ĉar la direktoro estis eksiginta min pro la skandalo, kiun mi, laŭ lia diro, estis kaŭzinta dum la prezentado de Hamleto. Kvankam mi estis ludinta ĉe li du plenajn jarojn, li neniel pardonis al mi mian konduton. Refoje mi staris sen salajro, kaj baldaŭ poste sen subtegmenta ĉambreto por dormi. Sed, ĉar mi kuiras ĉiam miajn pizojn, mi ankaŭ tiam faris tion, pasigante la dumnoktajn horojn sub granda ponto, kie mi dormis tre bone, ĉar la vetero ne estis ankoraŭ malvarma. Mi tamen ne ĉiam povis dormi tie, kaj kiam la malbona vetero komenciĝis, mi iun vesperon kaŝis min sub velo, kuŝanta sur la ferdeko de skuno, kiu la sekvantan matenon devis ŝipiri al Hamburgo. En la mezo de la maro mi subite rampis el mia kaŝejo, kaj, ĉar la skuno ne povis returnen iri pro mi, mi restis sur ĝi, laborante por la maristoj, ĝis kiam mi alvenis Hamburgon. En tiu urbo mi restis kelkan tempon, laborante tie ĉi kaj tie, ĝis min tedis la laborado, kaj mi fine fariĝis maristo. La lasta ŝipo, sur kiu mi servis, estas la skuno „La Fantazio“, kiu ĉi tiun matenon ludadis proksime de via Insulo.

— Drinku fojon —, interrompis mia patro, kiu mem jam estis malpleniginta sian glaseton.

La ĉia-metiisto, kiun mi admiris ankoraŭ pli multe, post kiam mi eksciis, ke li ludis en Vilhelmo Tell, malrapide eltrinkis la brandon, kaj lian ekzemplon sekvis mia patrino. Ŝi tamen estis ŝutinta antaŭe sukeron en sian glaseton. Ne estis permesate al mi trinki brandon, sed mia patrino, trinkinte glaseton da tia likvoro, kio okazis malofte, ĉiam donis al mi la restintan sukeron, kiun pro la dolĉeco mi trovis tre delikata. Ankaŭ nun ŝi regalis min tiamaniere. Mia patro kutimis trinki du glasetojn kaj li estis plenigonta la glaseton de Johano, sed ĉi tiu kovris ĝin per la mano, dum li diris ridetante,

ke li trinkis nur por fari honoron al miaj gepatroj, je kies konatiĝo li volonte malplenigis unu glaseton.

Mia patrino, verŝajne pensante al la kuiritaj pizoj de la maristo, subite demandis al li, ĉu li estas ŝipa kuiristo.

— Ho ne! — li respondis, — mi estas nur ordinara maristo, kial do mi estus kuiristo?

— Ĉar vi ĉiam kuiras pizojn —, ŝi diris.

La maristo laŭte ekridis, tiam li diris:

— Jes, vi estas prava, mi ĉiam kuiras ilin, sed laŭ simbola senco. Mi klarigos tion. Estis iam du monaĥoj, kiuj devis fari pilgrimadon al sankta loko por esti senpekigataj, kaj ĉar iliaj pekoj estis gravaj, la monaĥoj devis pilgrimi kun pizoj en la ŝuoj, por ke ilia irado estu kiel eble plej doloriga. Ili tamen ekpilgrimis. Unu el ili iradis kun granda peno, ĉar la malmolaj pizoj en la ŝuoj tre doloris liajn piedojn. La alia tamen marŝadis kun ĝoja vizaĝo kaj kvazaŭ la pizoj ne estus en liaj ŝuoj. Post longa pilgrimado ili alvenis al sia celo kaj tie ili povis demeti la ŝuojn kaj forjeti la pizojn. Nun la monaĥo, kiu estis marŝinta kun tiom da doloro, ekvidis, ke lia kunulo eljetas el siaj ŝuoj platigintajn pizojn, kaj li demandis al li klarigon. „Ho“, diris la ĝoja monaĥo, „mi devis kiel vi, pilgrimi kun pizoj en miaj ŝuoj, sed mi kuiris ilin antaŭ ol meti ilin en la ŝuojn. Post kiam mi tiel estis aginta, la pizoj fariĝis molaj kaj ne ĝenadis min dum mia marŝado al ĉi tiu sankta loko.“ Vi komprenas sendube mian fabelon. Mi agas ĉiam kiel la ĝoja praktika monaĥo, kaj ĉiam kuiras miajn pizojn, neniam plendante pri mia sorto, sed ĉiam agante laŭ cirkonstancoj. Soifante, mi trinkas puran akvon, se mi ne havas monon por aĉeti bieron, kaj malsatante, mi manĝas nigran panon, eĉ sen butero aŭ sen fromaĝo, se mi ne posedas monon, sed kiam mi havas sufiĉan monon por havigi al mi pli bon-

gustan manĝaĵon, mi aĉetas ĝin. En realo ĉio estas egale delikata, tio dependas nur de tio, ĉu oni malsatas aŭ ne. Sekve: se vi volas manĝi kun bona apetito, tiam atendu, ĝis kiam nigra pano estos laŭ via gusto. Nur kuiru viajn pizojn kaj vi neniam estos malkontenta nek malfeliĉa, eĉ ne malriĉa. Neniam mi posedis multan monon, tamen neniam mi estis malriĉa.

Dum Johano tiel rakontis, la tempo de tagmanĝo alproksimiĝis, kaj ni tagmanĝis. La manĝaĵo konsistis kiel ofte, el terpomoj, viando, rizo. Legomojn ni preskaŭ neniam manĝis, ĉar estis tro maloportune por mia patro kunporti ilin de la Vilaĝo, sed anstataŭe mia patrino pretigis manĝaĵojn preparitajn parte el lakto. Laŭkutime mia patro malkovris sian kapon por preĝi, kaj ni ĉiuj preĝis. Johano verŝajne ne kutimadis meti la ĉapon antaŭ sian vizaĝon; li pendigis ĝin sur la dorso de sia seĝo kaj kun plektitaj manoj rigardis rekte antaŭ sin al la bildoj de Vilhelmo Tell, kiuj laŭ mia opinio devis interesadi lin en alta grado, ĉar li iam ludis teatraĵon pri tiu heroo. Dum la manĝado Johano parolis multe kaj mi miregis, ke li tiel bone povis manĝi kaj rakonti en la sama tempo. Post la manĝado mia patro eklegis la gazetojn, donante ankaŭ unu al sia gasto. Ĉi tiu metis ĝin antaŭ sin sur la tablon, sed ŝajne li ne estis inklina legadi, ĉar la novaĵoj interesis lin nur malmulte. Mi sidiĝis ĉe lia flanko.

— Ĉu vi povas legi? — li demandis.

— Mi lernis literojn —, mi respondis.

Li fingre montris kelkajn, kiujn mi bone konis, sed baldaŭ li eksciis, ke mi ne povas silabi.

— Ĉu vi legis multajn librojn? — mi demandis.

— Ho jes.

— Ankaŭ pri fabeloj?

— Kompreneble.

— Ĉu vi povas rakonti fabelojn?
— Kelkajn mi memoras, sed ne ĉiujn, kiujn mi legis —, li diris afable ridetante, kaj li diris plue: — Ĉu vi amas fabelojn?

— Jes, mi amas.

— Morgaŭ mi rakontos kelkajn al vi.

— Ĉu ne hodiaŭ?

— Tio ĝenus vian patron, kiu nun legas.

— Nu, mi povas montri al vi la Insulon, kaj intertempe vi povos rakonti —, mi proponis naive.

— Vi estas prava —, kaj turnante sin al mia patrino, li diris plue:

— Vi do konsentas, ke ni promenados kelkan tempon?

— Nu bone! — diris mia patrino, kaj ni eliris.

Johano aspektis tre stranga en la vestoj de mia patro. Liaj kruroj estis multe tro longaj por la pantalone, kaj marŝante ĉe mia flanko, mi komparis lin kun la cikonio, kiun mi vidis iam sur unu el la bildoj de „Mil kaj unu noktoj“. Li mem tamen tute ne rimarkis, kiel strange li aspektas, ĉar refoje kuirante siajn pizojn, li estis feliĉa, ke la vestoj, kiujn li lasis sur la ŝipo, estis anstataŭigitaj de aliaj, tute egale, ĉu ili vestas bone aŭ malbone.

— La Insulo ŝajnas al mi malgranda —, diris Johano.

— Ŝajnas tamen, ke ĝi estas granda —, mi diris.

— Kial?

— Tion mi ne scias; ĉu Hamburgo estas pli granda ol la Insulo?

Johano rigardis min ridetante, kaj li diris post momento:

— Hamburgo estas eble centfoje pli granda.

— Ĉu loĝas tie multaj homoj? - - - pli ol cent?

— En Hamburgo loĝas duono da miliono.

— Ĉu tio estas tre multe?

— Ĉu vi ne scias, kiom estas miliono?

— Ne.

— Kiom estas milo?

— Milo? Mi pripensu! — mi respondis. Mi ja devis pripensi, ĉar eble mi ankaŭ ne sciis, kiom ĝi estas; pri tiom multe mi ja preskaŭ neniam aŭdis paroli.

— Mi klarigos. —, li diris, vidante, ke mi ankaŭ ne scias, kiom tio estas.

Ni estis nun en la dunoj kaj Johano ekhaltis, rigardante ĉirkaŭ sin.

— Kiom da paŝoj ni faris de via domo ĝis tie ĉi? — li demandis, mezurante la distancon per la okuloj.

— Kvin cent! — mi diris, feliĉa, ke mi fine povis doni bonan respondon.

— Nu —, li diris. — Kvin cent kaj kvin cent faras milion. Imagu ke vi staras ĉi tie kaj mi je distanco de mil paŝoj.

— Mi povas tion.

— Bone. Imagu plue, ke je ĉiu paŝo staras unu homo.

— Mi povas ankaŭ tion.

— Bone; tiam vi vidus mil homojn, ĉu ne vere? Imagu poste kvin cent tiajn vicojn da homoj, unu vico flanke de alia.

— Mi povas imagi tion.

— Nu, vidante ĉiujn tiujn homojn kune, vi vidas la homojn loĝantajn en Hamburgo.

Mi devis bone pripensi por formi al mi ĝustan ideon pri tiom da homoj, kiuj eble nur kun peno povus stari sur la Insulo.

— Pri kio vi revas? — li demandis, ekstarante kaj sidigante min ĉe sia flanko.

— Pri tiom multe da homoj —, mi diris, — ĉar mi kredis, ke tiom da ili tute ne ekzistas. Mi vidis nur vin kaj miajn gepatrojn.

- Ĉu vi jam longe loĝas sur la Insulo?
- Mi ne scias, neniam ekpensis pri tio.
- Kiom da jaroj vi havas?
- Kiom da jaroj? Patrino neniam ĝin diris.
- Kaj la patro? . . . Ĉu li neniam diris tion?
- Li preskaŭ neniam diras ion al mi . . . , nur se mi demandas.

— Ĉu vere ili estas viaj gepatroj? — li diris post momento, rigardante min kun atento.

— Kial ili ne estus?

— Ĉar vi estas tiel bela knabo, kaj ĉar vi tute ne estas simila al via patro, nek al via patrino.

— Ĉu ili do ne estas belaj? . . . Kaj „li“ havas tiel belajn mentonharojn.

Johano ridis.

— Mi eble diris sensencaĵon, demandante, ĉu ili estas viaj gepatroj —, li diris tiam. — Vi nepre devas esti tia, ĉar vi ja naskiĝis ĉi tie. — La lastan frazon li eldiris laŭ duone demanda tono, kaj li daŭrigis:

— Ĉu vi memoras ĉion pri via plej juna aĝo? Kiel vi venis sur ĉi tiun insulon? — li diris, refoje rigardante min atente.

— Per si mem —, mi respondis, post kio li ridis laŭte.

— Vi estas vera naŭvulo! — li diris, — kaj bona knabo, vi ja ebenigos al vi la vojon tra la mondo. Sed diru al mi, kiel estas via nomo?

— Mia nomo? . . . Mia patrino nomas min ĉiam „knabo“ —, mi respondis.

— Kaj via patro? —

— Mi ja diris, ke li preskaŭ neniam parolas al mi, sed kiam li parolas pri mi al la patrino, tiam li min nomas „li“.

Mi rigardis Johanon kaj al mi ŝajnis, ke stranga ŝanĝo subite fariĝis en la ridetantaj trajtoj de la maristo, li

dum momento fikse rigardis min, tiam deturnante la okulojn de la miaj, li pripensadis kaj aspektis, kvazaŭ io ekĝenus lin. Estante jam intima kun li, mi fine kuragiis interrompi lian revadon kaj mi demandis:

— Pri kio vi pensas?

— Pri vi, mia knabo.

— Pri mi!?

— Jes; io mistera sin kaŝas sub tio, ke la gepatroj tiel malzorgas vin.

— Ĉu ili ne estas sufiĉe bonaj al mi?

— Jes, sed kial vi lernis ankoraŭ nenion? Kial vi neniam iras vilaĝon? Kial — Li ekhaltis kaj subite diris:

— Aŭskultu, knabo; ne diru al viaj gepatroj ke mi parolis al vi pri tiuj aferoj, kiuj ja ne devas tuŝi min. Krom tio, mi sendube trompis min.

— En kio? — mi demandis kun surprizo.

— Ne demandu. Poste ili memkompreneble prizorgos vian edukadon, tio estas nun eble tro malfacila sur ĉi tiu insulo, kaj eble mankas al ili la mono por irigi vin al la vilaĝo, por ke vi povu vizitadi lernejon.

— Mi ne scias —, mi diris.

Johano refoje meditis momenton kaj dum li karesis la kapon de mia hundo, kiu same kiel mi jam amikiĝis kun li, mi demandis:

— Ĉu vi restos ĉe ni tutan monaton?

— Jes.

— Kaj post la monato?

— Tiam mi iros Londonon al la ŝipanaro, kiu nun kredas min droninta; sed feliĉe mi ne dronis; mi naĝis al via insulo, kie mi vidis vin sidantan sur la sablo kaj rigardantan min, kvazaŭ mi estus la plej stranga kaj la plej teruriga besto, kiu iam staris antaŭ vi.

— Mi kredis vin hommanĝanto.

— Ho ne —, li diris ridetante, — mi ne manĝas homojn —, kaj kaptante mian brakon, li starigis min kaj ni triope iris laŭ la dunoj.

— Morgaŭ mi serĉkolektos ovojn —, mi diris.

— Mi vin akompanos.

— Ĉu vi tiam rakontos?

— Sendube.

— Pri kio?

— Pri kio ajn povas interesi vin.

— Ankaŭ pri Hamburgo?

— Jes —; kaj kun peno farante la samajn longajn paŝojn de mia longkrura amiko, mi kun li laŭiris la okulforman bordon de nia Insulo, ĉar mi deziris montri al li ĉion. Rapide pasis la horoj, kaj kiam vesperiĝis kaj la suno subiris sub la horizonton en tiun profundan misterplenan abismon, mia kapo turniĝis pro ĉio nova kaj ĉio admirinda, kion Johano estis rakontinta. Ho, se li povus restadi ĉiam, pensis mi, kiam mi supreniris la ŝtuparon por iri dormi kun Sim kaj Jafet, kiuj kiel kutime akompanis min al mia subtegmentejo. Kiam mi kuŝis sur mia lito, mi klare povis aŭdi malsupre en la ĉambro la klaran ridon de nia gasto, kiu ankoraŭ parolis al miaj gepatroj, kaj fine, laca pro tiaj eksterordinaraj okazintaĵoj de la tago, mi ekdormis.

Tria Ĉapitro.

Mi serĉkolektas ovojn kun filozofo — La nigraj manoj kaj la blankaj — La ĉarpentistedzino de Gaŭda — Filozofo, kiu perdas sian egalpezon — Kial mi ne povis dormi — Por la unua fojo mi ne dormas ĉe bestoj.

Ĉu estas strange, ke mi sonĝis tiun nokton? Mi sonĝis, ke nia Insulo ŝanĝiĝis en grandan urbon kaj tiu urbo estis Hamburgo. La herbejo estis malaperinta, kaj ĉiuloke staris multaj malaltaj domoj. Bovinoj kaj kaprinoj iris libere en la stratoj kaj la stratoj estis tiom homplenaj, ke la promenantoj sin interpuŝadis. Meze de ili mi vidis mian longkruran amikon. Li portis la vestojn de mia patro kaj sub lia mentono pendis longaj brunaj haroj, kiujn mi tre admiris. Li parolis al si mem kaj fine rimarkante min, li ekkaptis mian manon kaj premis ĝin forte dum li diris:

— Jam estas malfrue, mia knabo, malsupreniru.

Mi tre miris pro tiu „malsupreniru“, ĉar kiel mi malsuprenirus, starante en strato inter tiom da homoj kaj bestoj?

— Kiel malsupreniri? — mi demandis.

Refoje li premis mian manon, ektiregis kaj . . . mi vekigis. La urbo estis for, ankaŭ la homoj kaj la bestoj, sed jen antaŭ mi staris Johano, kiu estis eltironta min el mia lito. Estis la unua fojo, ke iu vekis min. Miaj gepatroj lasis min ĉiam dormadi, ĝis kiam mi vekigis mem, tute egale ĉu tio estis frue aŭ malfrue, kaj se okaze mi estus restinta tutan tagon sur mia lito, mia patro

eĉ ne tion ekrimarkus. Min tre tuŝis la pruvo, ke Johano jam tiel frue en la mateno ekpensis pri mi.

— He! ĉu estas vi? — mi demandis, larĝe malfermante la okulojn. — Mi sonĝis, ke mi estas en Hamburgo kaj ke vi havis mentonharojn. — La maristo laŭte ridegis.

— Ĉu mentonharojn, kaj en Hamburgo!? — li diris. — Ho ne, mi estas ankoraŭ sur via Insulo Kio estas tio? — li subite diris, fingre montrante mian litkovrilon sub kio io ekmoviĝis.

— Tio estas Sam —, mi diris. Samtempe la kapo de mia kato ekaperis kaj tuj poste la tuta besto, kiu, vidante fremdan viron, al kiu ĝi ne kutimis, kurbigis alte sian dorson kaj per laŭta siblado anoncis sian malami-kecon. Tiam ĝi saltis de la lito, sur la ŝtuparon kondukantan al la tegmento kaj malaperis tra la nefermita aperturo. Johano ridis.

— Jen ankoraŭ unu, kiu timas, ke mi ĝin manĝos —, li diris. Jafet tute ne ektimis. Ĝi salutis la mariston per moviĝanta vosto kaj lekis liajn manojn.

— Jafet ne min timas —, li diris. La hundo saltis el la lito, mi sekvis ĝian ekzemplon kaj ni iris malsupren por matenmanĝi. Apenaŭ mia patro la duan fojon estis metinta sian ĉapon sur la dikan hartavolon, kiam mi ekstaris. Jafet, divenante mian intencon, kuris bojante eksterdomen. Mi prenis la korbon kaj atendis, ĝis Johano ekstaris por iri kun mi al la dunoj.

— Ho jes! — li diris, ni serĉos ovojn.

— Nu bone! — diris la patrino.

Mia patro silentadis kaj eklegis gazeton, kiel kutime.

— Mi iras! — mi diris.

— Nu, bone! — refoje diris mia patrino kaj ni eliris.

— Ĉu via patro neniam serĉas ovojn? — demandis Johano.

— Li? . . . Ho ne, li legas gazeton kaj poste iras al la maro por vidi, ĉu bareloj aŭ kestoj aŭ io alia alnaĝis sur la Insulon.

— Ĉu tio estas ĉio, kion li faras?

— Ne; li melkas aŭ iras sur la herbejon.

— Por kion fari?

— Por fari fojnon aŭ por kapti talpojn.

Je kelka distanco sin paŝtis Sim. La kaprino ankoraŭ ne ekvidis nin, sed aŭdante nin paroli, ŝi turnis sin kaj rimarkante nekonatulon, ŝi rigardis lin kun videbla surprizo, ekstaris sur la malantaŭaj piedoj, faris la plej strangajn saltegojn kaj klinante la kapon faris mienon, kvazaŭ ŝi volus ataki mian kamaradon. Johano ridis.

— Nur venu! — li diris al la kaprino. — Nur venu, ni baldaŭ amikiĝos. — Sim tamen ŝajne ne samopiniis, ĉar ŝi ne venis, sed ĉiam rigardante nin, lauris grandan duoncirklon, ĝis kiam ŝi estis post ni, kaj sekvinte nin kelkajn paŝojn, subite turnis sin kaj kviete sin ekpaŝtis, kvazaŭ la entrudulo tute ne tuŝus ŝin plu.

Ĉiam babilante, la longkrura maristo daŭrigis sian vojon kaj mi marŝis ĉe lia flanko atente aŭskultante ĉion, kion li rakontis aŭ diris, ĉar tre interesa ĉio estis por mi, kiu ankoraŭ nenion interesan aŭdis antaŭ la alveno de Johano. En la dunoj ni serĉadis ovojn, sed mi tre miris, ke mi sola trovis ilin, ĉar kiel ajn Johano klopodis, li malsukcesis kaj trovis eĉ ne unu. Per tio li tamen ne perdis sian bonan humoron.

— Morgaŭ mi trovos ĉiujn, kaj vi neniujn —, li diris ŝerce. Jafet serĉis tiel diligente kiel mi, kaj post unu horo mia korbo estis preskaŭ plena. Pli ol unu plenan korbon mi neniam kolektis en unu tago, ĉar se oni forprenas tro multe da ovojn, la mevoj tro malmultiĝas sur la Insulo aŭ eble estus fortimigataj; mi sekve devis esti singarda kaj ne serĉi kun tro granda fervoro.

— Ni ripozu momenton —, diris Johano, kaj li eksidis. Memkompreneble mi ankaŭ eksidis kaj Jafet tuj sekvis mian ekzemplon. Ni sidis unu flanke de la alia kun nia nova amiko en la mezo, kaj tiel kiel, tri bonaj kamaradoj, ni ripozis post laciga marŝado tra la mola sablo. Mi rakontis al Johano pri miaj arĝentaj moneroj kolektitaj de mi kaj kiel mi ludadis kun ili dum la longaj vintraj vesperoj.

— Kion vi poste aĉetos per ili? — li demandis.

— Mi neniam pensis pri tio. Kion mi povos aĉeti?

— Tio dependas de la kvanto —, li diris ridetante pro mia naiveco, kaj li diris plue:

— En „la Urbo“ vi povas aĉeti vestojn, poŝhorloĝon aŭ vi povas iri per via mono en teatron; vi povas vojaĝi per la vagonaro kaj cetero kaj tiel plu.

— Kiom da mono mi devas doni por iri teatron?

— Tio dependas; kiam mi havas multan monon, mi kutimas aĉeti enirbileton por bona sidloko, kiam mi havas malmultan monon, mi kontentiĝas kun malpli bona sidloko, sed en realo ĉiuj sidlokoj estas egale bonaj. Mi vidis riĉajn sinjorojn kaj sinjorinojn, kiuj enuis sur la plej bonaj sidlokoj kaj samtempe mi vidis malriĉulojn sur la malplej bonaj sidlokoj, kaj ili sin amuzadis treege. Sekvas el tio, ke ĉio dependas de cirkonstancoj.

— Ĉu mi devas multon pagi por vojaĝi vagonare al Hamburgo?

— Al Hamburgo? Ho ne; sed diru, kiom da tiaj moneroj vi havas.

— Tri cent tridek du.

— Nu, per tiom da mono vi povas vagonare vojaĝi eĉ pli malproksimen ol Hamburgo.

— Mi neniam vidis vagonaron.

— Kompreneble, vi neniam ĝin vidis.

— Cu estas amuze vojaĝi en vagonaro?

— Tio dependas de cirkonstancoj.

— Ĉu tio ankaŭ dependas de cirkonstancoj?

— Jes, mia knabo; ĉio dependas de cirkonstancoj.

— Mi ne komprenas.

— Vi komprenos poste.

— Ĉu vi multfoje vojaĝis vagonare?

— Se mi havas monon, mi vojaĝas tiel nur por alveni pli baldaŭ al la celo de mia vojaĝo, sed en realo nenio estas pli agrabla ol promenadi.

— Ĉu vi do ne povas promenadi al Hamburgo?

— Mi povas, sed estas pli malmultekoste iri tien per vagonaro.

Mi larĝe malfermis la okulojn pro surprizo, ĉar al mi estis tre malklare, ke promenadi kostas monon.

— Vi miras pri tio?

— Jes, mi pensis, ke marŝadi kostas nenion.

— Mi klarigos. Se vi volas promenadi al Hamburgo, vi devas marŝadi multajn tagojn kaj survoje vi devas manĝi, kaj la noktojn vi devas pasigi en hotelo, kaj tio kostas kune multe pli da mono ol unu bileto de vagonaro, per kiu vi vojaĝas al Hamburgo en kelkaj horoj.

— En kelkaj horoj?

— Jes, ĉar la vagonaro iras dekfoje pli rapide ol piediranto.

— Ĉu dekfoje?

— Jes, vagonaro iras per vapore same kiel vaporŝipo.

— Ĉu vi povas klarigi, kiel vapore povas movi ŝipojn kaj vagonaron?

— Mi ne povas.

— Nu bone! — mi diris, imitante la kutiman diradon de mia patrino, kaj mi diris plue:

— Eble mi spertos tion poste?

Johano ne respondis al tiu demando, sed ridetis.

momenton kaj ekludis kun Jafet. Mi interrompis lin dirante:

- Vi promesis al mi rakonti fabelon.
- Jes, mi promesis.
- Pri kio vi rakontos?
- Mi pripensu —, li diris, kaj pripensinte momenton, li rakontis:

La nigraj manoj kaj la blankaj*.

Rakonto por ĉiuj infanoj, sed precipe por la maldiligentaj. Iam estis knabeto, nomita Lazaroni, kiu, dum li dormadis, sentis, ke li estas lulata per stranga zumado, pleniganta la tutan domon. La postan matenon, kiam li estis levigonta, tiu knabeto trovis sur la tablo apud la lito blankan paneton, pli blankan ol la neĝo kaj pli bongustan ol la plej bongusta el ĉiuj kukoj. Unu tagon, vidinte belan ĉevalon el ligno ĉe unu el siaj kamaradetoj, Lazaroni enviis la posedadon de ĉi tiu kamaradeto. En la vespero tamen, li ne plu pensadis pri tio, sed dum lia dormado tiu stranga zumado, pri kiu mi parolis, estis tiel forta tiun nokton, ke la knabeto vekigis. Tiam ŝajnis al li, kvazaŭ li vidus du strangajn ombrojn, kiuj antaŭen ŝoviĝis en la mallumo de la ĉambro. La knabeto ektimis kaj sin kaŝis sub la litkovrilo. La morgaŭan matenon Lazaroni trovis apud sia lito flanke de la ĉiutaga paneto, belegan ĉevalon el ligno, pli belegan ol tiu de lia kamaradeto. Kiel granda estis la ĝojo de la knabeto! Li ludadis la tutan tagon kun la ĉevalo, poste ĝi tedis lin kaj li deziris posedi alian ludilon. La mistera zumado en la sekvanta nokto aŭdiĝis pli forte en la domo, kaj la sekvantan matenon, kiam la juna Lazaroni vekigis, li trovis la novan ludilon, kiun li estis dezirinta. Tiam lia deziro pli kaj pli grandigis, kaj ĉiun tagon la trodorlotita

* Ĉerpita el „Les Belles Images“ no. 466. Jarkolekto 1913.

intano deziris ion tute novan, kion ĉiam alportis la du strangaj ombroj de la nokto. La knabeto fariĝis knabo . . . junulo, sed li ĉiutage esprimis novan deziron. Jen ĝi estis belega vestaĵo, jen multekosta juvelo aŭ belforma meblo. Nelacigeble kaj obeeme la du misteraj ombroj kontentigadis ĉiujn dezirojn de Lazaroni. Fine tio lin scivolemigis, kaj li decidis esplori, kio estas tiuj ombroj, kiuj fariĝis liaj submetitaj sklavoj. Tial unu nokton li restis sidanta en la lito kun brulanta kandelo en la mano. Subite li mirkonsterniĝis, vidante ke tiuj dumnoktaj vizitantoj estas du gigantaj manoj, sed tiel kalaj kaj nigraj, kaj kies fingregoj ŝajnis tiel maldelikataj, ke la junulo ekprenis kun abomeno la veluran mantelon broditan kun oro, kiun li estis dezirinta la antaŭan tagon, kaj kiun al li alportis la sklavaj manoj. Vidante tamen, kiel riĉa kaj bela estas tiu mantelo, li forgesis la abomenon, kiun al li inspiris tiuj nigraj manaĉoj, kaj dezirante scii, ĝis kie atingos ilia sorĉpovo, li ordonis al ili senprokraste alporti la plej belan ĉirkaŭkolon el oro, la plej belajn agrafojn el diamanto, kiujn ili povus trovi. La nigraj manoj malaperis momenton, sed revenis baldaŭ kun la deziritaj objektoj, kiuj estis milfoje pli belaj ol ĉio, kion Lazaroni povus imagi. Li sin kovris per tiuj belaj donacoj kaj trovis, ke ili estas tiel belegaj, ke li devas honti pro la ĉambro, en kiu li loĝas. Kaj li ordonis al la nigraj manoj mebloprovizi ĉambregon, indan je li. La sklavoj obeis kaj kelkajn sekundojn poste la junulo sin trovis meze de vastega salono subtenata de la plej delikataj kolonoj el marmoro, ornamitaj de dekoracio el oro kaj juveloj, kaj kiuj agrable harmoniis kun kelkaj mebloj, kiujn ĉiuminute alportis la misteraj manoj. Scivola kaj ravita, Lazaroni deziris vidi, kie prenis tiuj strangaj manoj ĉion, kion ili alportis al li. Tiam li vidis, ke ili fosas la teron per la viglaj fingroj kaj ke

ili eltiras el profunda sulko la deziritajn objektojn. La miraklo estas tre simpla, diris la junulo, kaj sin amuzante, li mendis ordone la plej diversajn objektojn, kiujn la manoj eltiris el la tero, ĉiam kun la sama obeemeco. Tamen, malgraŭ la facileco, kun kiu laboradis tiuj manoj, vidiĝis klare, ke laceco ekpemis ilin. Ili estis kovritaj de ŝvito kaj ekstremadis. Krom tio, ili pli kaj pli nigriĝis. — Diablo! — diris al si Lazaroni, — ŝajnas, kvazaŭ la sorĉopovo de miaj sklavoĵ elĉerpiĝas. Mi profitu de ili. — Kaj li ordonis, ke ili konstruu par li kastelon. Obeemaj, la manoj fosadis refoje la teron, sed kun multe da peno. Ili tamen eltiris el ĝi tiom da ŝtonoj, ke ili povis konstrui belegan kastelon, milfoje pli vastan kaj pli luksegan ol ĉiuj kasteloj el la ĉirkaŭaĵo. Lazaroni, vidante ke la sklavoĵ fariĝis pli kaj pli kvazaŭfebraj, laborigis ilin senhalte kun pli da vigleco. Li ĉirkaŭigis la kastelon per parko belbrilega, kie la floroj, la plej maloftaj konkuradis pri beleco kun la plej graciaj fontanoj, la plej elegantaj statuoj. Nesatigebla, Lazaroni ĉiam trovis image ion pli belan konstruotan, kiam subite la manoj streĉiĝis kaj falis senmove sur la tapiŝon de la salono. La juna homo komprenis, ke la sklavoĵ perdis la sorĉkapablon. — Mi faris bone, profitadi de ili —, li diris, — sed mi esperas, ke tiuj malbelaj manoj ne restadu tie! — En tiu momento la koko ekkantis kaj la misteraj manoj plimalgrandiĝis laŭ tio, kiel la tago alproksimiĝis; poste, iom post iom, ĉe la finoj de la manoj aperis la formo de homa korpo. Fine la silueto de viro montriĝis en la ombro, kaj kiam la matenruĝo plenigis per rozkoloraj radioj la salonon de Lazaroni, ĉi tiu kun mirego ekvidis, ke la viro kun la nigraj manoj estas lia patro . . .

Konsternita, li ne povis deturni la okulojn de tiuj manoj ankoraŭ grandaj, kvankam ili estis perdintaj sian gigantan formon, sed kiuj ŝajnis pli nigraj, pli kalaj kaj

pli maldelikataj ol antaŭe. La kompatinda maljunulo movis ilin ĝemante kaj li diris: — Rigardu, la magia potenco, kiu aliigis ilin en du feojn, en du sklavojn de via deziro, tiu magia potenco faris ilin tiel lacaj, ke nun miaj kompatindaj manoj preskaŭ mortis. Ili pendas senfortaj ĉe la fino de miaj brakoj, ke nenio povas revenigi ilian iaman fervoron. Sed tio ne gravas, mi bedaŭras nenion, kaj mi estas feliĉega vidi vin tiel brilanta, tiel lukse bela —, kaj preskaŭ plorante pro ĝojo, la maljunulo estis ĉirkaŭbrakonta sian filon . . . , sed ĉi tiu, vidante la nigrajn kalhavajn manojn alproksimiĝantaj al li, postenpaŝis senvole, protektante sian belan vestaĵon el silko, kaj diris al la maljunulo: — Atentu viajn malbelajn manojn, mia patro, vi estas malpurigonta min! — — Estas vere —, diris ĉi tiu ĝemante, kaj li sin retiris; sed kiam li estis malfermonta la pordon, Lazaroni revokis lin: — Mia patro!

La patro returnis sin feliĉa, sed la filo diris plue: — Ne tuŝu tiel la pordon, ĝia koloro estas tiel delikata, vi povus nigriĝi ĝin. — La maljunulo sin retiris konfuzita en sian ĉambron, sed kiam en la posttagmezo li vidis la riĉajn sinjorojn, kiuj vizitis lian filon, la patro estis tiel feliĉa pro la prospero de Lazaroni, ke li rigardadis lin kun ravego, ne rimarkante, ke la vizitantoj rigardadis siaflanke kun mirego la strangajn manojn de la bona viro.

Lazaroni ruĝiĝis pro honto kaj incitetite li flustris al sia patro: — Kaŝu do viajn manojn. — La kompatindulo obeis, sed larmoj rulis sur liaj vangoj. Tiam li sentis, ke la aspekto de la nigraj manoj fariĝis ĝenanta por lia filo. Ĉi tiu per tuko viŝis la meblojn, la tablotukon kaj la pordon, kiujn nesingarde la maljunulo tuŝis per la maldelikataj manoj. Li kun obeemo rigardis tiujn manojn, kiam ili alproksimiĝis al la liaj. Fine, unu tagon la maljuna viro decidis retiri sin en dometon,

kiun li posedis malproksime sur la kamparo. Kaj la filo lasis lin foriri, ĉar nun li povos daŭrigi sian vivadon de granda sinjoro, ne plu bezonante honti pro la nigraj manoj de la patro. Unu nokton, li dormis trankvile, kiam li estis vekata de stranga zumado, kiu memorigis al li tiun, per kiu estis lulata lia ĵuneco. Sed ĉi tiu bruo estis pli gajiga. Ĝi similis al tintado de oraj moneroj, kiuj kune dancas senbride. Lazaroni ne atentis tion, sed ŝajnis al li, ke ĉiun nokton malaperis el lia kastelo multvalora objekto. Surprizite, la juna homo unu nokton ne dormis, sed kaŝobservadis kaj vidis, ke refoje misteraj manoj lin vizitas. Sed tiuj ĉi, anstataŭ nigraj kaj maldelikataj, estis mirinde blankaj, delikataj kaj elegantaj. Ĉe tiuj manoj elŝiris ĉiujn florojn en la parko kaj sur ilia loko ekkreskis dornarbetoj. La blankaj manoj laboradis kun tia ĉarmo, ke Lazaroni trovis la vidon alloga. Tamen, tiuj misteraj vizitantoj estis enirintaj en la salonojn kaj kaptante la meblojn kun apatia gesto, ili ŝetadis ilin el la fenestro, kaj ĉiuj ĉi tiuj multvaloraĵoj tuj aliĝis en rozan vaporon, kiu dismalaperis en la aero. Lazaroni estis tiel surprizita, ke li eĉ ne havis la forton forpeli la ruinigantajn manojn, kiuj senigis lin de liaj juveloj, de liaj riĉaj vestaĵoj; kiuj sammaniere ĉiuj forfandiĝis en rozan vaporon. Lia kastelo forflugis en gracia nuboj kun la sama rapideco, kaj subite Lazaroni, vestita ĉifone, kuŝis sur mizera litaĉo. En tiu momento la koko ekkriis, anoncante la tagiĝon. La manoj malgrandiĝis, aliĝis al homa korpo kaj la juna viro kun teruro ekvidis, ke estas liaj propraj manoj, kiuj estis kaŭzintaj ĉi tiun ruinegiĝon. Tiam, freneza pro doloro kaj malespero, li kuris al la loĝejo de sia patro, kaj sin ŝetante antaŭ liaj piedoj, li petis pardonon, kaj rakontis al li ĉion, kio okazis. La bona maljunulo, kies malfortaj manoj nun estis vakskoloraj, benis lin dirante:

— Mia filo, vi povas reakiri vian perditan posedajon, se vi volas nur dediĉi viajn manojn al la magia ensorĉo, al kiu mi dediĉis la miajn, kaj vi spertos, kiajn rimedojn ĝi povas havigi al vi. — — Mia patro, mi estas inkлина al ĉio. Kiel sin nomas tiu magiarimedo? — — La laboro —, respondis la maljunulo.

La juna viro komprenis; kaj liaj blankaj manoj komencis fosadi la teron. Komence li tiris el ĝi nur nigran panon, sed iom post iom liaj manoj bruniĝis sub la sunbrilo kaj la kolorŝanĝintaj manoj baldaŭ havigis al li blankan panon. Li ne ĉesis laboradi diligente, fariĝis riĉega kaj lia patro vivis neesprimeble feliĉa ĉe li ankoraŭ multajn jarojn.

— Kion vi opinias pri mia rakonto? — Johano demandis.

— Ĉu ĝi vere okazis?

— Jes kaj ne.

— Mi ne komprenas.

— Vi komprenos poste, kiam vi estos vivinta kelkajn jarojn inter la homoj.

— Lazaroni havis bonan patron —, mi diris.

— Jes, li havis —, diris la maristo; kaj mi demandis:

— Ĉu tiu patro estis pli bona ol la mia?

— Tion vi spertos poste —, li respondis. Mi ekpensis, ke ekzistas ankoraŭ tre multaj aferoj en la mondo, kiujn mi devus sperti.

— Kion vi rakontos nun? — mi demandis, tute ne pensante, ke oni povas esti tro scivola aŭ maldiskreta; mi ja ne sciis, ke diskreteco ekzistas.

— Mi nun rakontos ion, kio vere okazis —, li diris.

— Nu, bone! — mi respondis, kaj Johano komencis la rakonton pri:

La ĉarpentistedzino de Gaŭda.

Gaŭda estas tre bela kaj purega urbeto en Holandujo. Ĉiuj ĝiaj stratoj kaj stratetoj estas zorge pavimitaj,

kaj laŭlonge de ĉiu (kun escepto de nur unu) fluas kanaleto aŭ branĉo de la riveroj Gaŭe kaj Isel. Nun aŭskultu! Antaŭ pli ol tri cent jaroj, la burĝoj de Gaŭda estis dividitaj en du religiaj partioj, kiuj sin malamis reciproke kaj seninterrompe batalis pro la potenco.

Okazis, ke la Nigra partio (mi volas nomi ĝin per tiu nomo) regis. La urbestro, la skabenoj, la policianoj, unuvorte ĉiuj personoj, kiuj estis salajrataj de la urbeto, apartenis al la Nigra partio, kaj ilin oni nomis la Nigruloj. Ĉiuj Blankuloj (la kontraŭpartianoj) estis persekutataj en terura maniero. Oni forpelis ilin eksterurban, aŭ ĵetis en malliberejon, aŭ eĉ mortigis ilin sen kompatato. La teruro estis granda en la malfeliĉa Gaŭda kaj la komerco, la industrio kaj tiel plu malprosperis kiel neniam antaŭe. La urbestro, tre fanatika Nigrulo, diskurigis tra la urbeto soldatojn kaj policianojn, kiuj arestis ĉiujn danĝerajn kontraŭulojn.

Okazis, ke unu el tiuj persekutatoj, fervora Blankulo, sin savis, kaj kiel ajn oni serĉis, nenie oni povis trovi kaj aresti lin. La urbestro estis furioza. Li mem tra-serĉis kun helpantoj ĉiujn suspektajn domojn, sed sen dezirita rezultato. Supozante, ke la persekutato sin ne trovas en sia propra domo, la kolera urbestro unue tra-serĉis la domojn de liaj partianoj, sed ne trovinte lin tie, oni iris al la domo de la Blankulo mem. La pordo estis nefermita kaj la persekutantoj eniris. Suprenirinte la ŝtuparon, ili puŝmalfermis la pordon de la loĝoĉambro. La edzino de la Blankulo sidis sur sia seĝo, kaj ŝi tiel terurigis, vidante la kolerantan urbestron kaj liajn policianojn, ke preskaŭ ŝi svenis.

— Kie estas via edzo!? — demandis la koleranto.

La virino volis respondi, sed ne povis; ŝajnis al ŝi, kvazaŭ la lango gluiĝis al la palato, kaj ŝi eligis nur kelke da nekompreneblaj sonoj.

— Respondu tuj! — ekkriis la urbestro. — Via edzo sin kaŝas tie ĉi, se ni ne lin trovos, mi bruligos la tutan domon. — Dirante tion, li piedfrapis tiel forte sur la plankon, ke la mebloj ekdancis.

Ĉar la virino daŭrigis silenti, li ordonis al siaj kunuloj, ke ili serĉu. Tion ili faris, sed sen bona sukceso; la Blankulo ne estis trovebla. Intertempe la virino iom post iom rekonsciigis kaj kiam refoje demandis al ŝi la urbestro, kie ŝi kaŝis la „Blankulaĉon“, ŝi respondis per tremanta voĉo:

— Sinjoro, ne lin serĉu plu en ĉi tiu domo, vi jam traserĉis de la kelo ĝis la tegmento; kie do vi pensas, ke mi kaŝus lin? — La urbestro ordonis, ke oni gardu bone la domon ekstere, ĉar nepre la malbenita Blankulaĉo devus esti interne, aŭ baldaŭ li revenos en ĝin. La persekutantoj lasis la virinon sola, ili daŭrigis la serĉadon en la urbo, dum unu el ili zorge gardis la domon sur la strato.

Vi povas kompreni, kiel la virino ĝojis, kiam estis forrintaj la urbestro kaj liaj helpantoj, precipe, ĉar oni ne plenumis la minacon de la urbestro, nome ekbruligi la domon. Tamen la Blankulo estis en bona rifuĝejo. Vi do devas scii, ke li estis ĉarpentisto, kaj ke li estis farinta en sia domo kaŝejon tiel bonan, ke estis neeble trovi ĝin. Li konstruis tiun rifuĝejon en tempo, kiam liaj partianoj, la Blankuloj, regis la urbeton kaj kiam li antaŭvidis, ke la tempo povus veni, en kiu la kontraŭuloj estus „majstroj“ en la urbetu.

Mi nun ne diras al vi, kie nia Blankulo sin trovis, ĉar se mi dirus tion, la intereso de mia rakonto fariĝus pli malgranda. Se iam vi vizitos Gaŭda, ĉiuj infanoj sur la strato povos al vi montri la domon kun la kaŝejo, ĉar ĝi ekzistas ankoraŭ; en memoro de la virino oni ne volas malkonstrui aŭ ŝanĝi la loĝejon. Eĉ la verda

anaso, kiun antaŭ tri cent jaroj oni vidis skulptita sur la fasado de la domo, ankoraŭ nun estas sur tiu sama loko, kaj la birdo ankoraŭ ĉiam rigardadas la saman direkton kiel antaŭe, tute ne laciĝante. Sed mi rakontu plue: Vespere de la tago, kiam la Nigruloj tiel terurigis la edzinon en la „Anasdometo“, la ĉarpentisto sidis kviete ĉe la tablo en ĉeesto de sia edzino ka jili laŭdis Dion pro Lia helpo, ĉar neniu el la Nigruloj sukcesis trovi eĉ unu postsignon, kvankam du- aŭ trifoje la soldatoj revizitis kaj traserĉis la tutan domon. Kiam oni dum la semajno ankoraŭ vizitis la „Anasdometon“ sen bona rezultato por la Nigruloj, ĉiuj supozis, ke la ĉarpentisto estis forkurinta eksterurben, kaj neniu soldato aŭ policano malkvietigis plu la loĝantojn de la Anasdometo.

Ĉu vi aŭdis iam la proverbon: Severaj mastroj ne regas longe? — Ne? — Nu, tio estas holanda proverbo kaj ĝi estas bona kaj bela, ĉar preskaŭ ĉiam ĝi veriĝas. Ankaŭ en mia rakonto ĝi veriĝas, ĉar kiam la Nigruloj estis regintaj ses monatojn, ilia regado estis renversita kaj anstataŭita de tiu de la Blankuloj. Vi eble diros, ke tio estis tre stranga tempo, en kiu okazis tiaj teruraĵoj kaj maltrankviligaj aferoj; vi estas prava, sed ni ne forgesu, ke la homoj de la nuna epoko estas pli saĝaj kaj ne tiel malamikaj unu kontraŭ la alia, kiel antaŭ tricent jaroj.

Sed mi rakontos plue. La Blankuloj siavice do tenis la kondukilojn de la regado, kaj ili komencis persekuti la Nigrulojn kaj ĉiuloke la iamaj mastroj sin savis. La urbestro ankaŭ volis forkuri, ĉar li sin trovis en granda danĝero esti kaptata kaj pendigata. Li mem ja ekzekutis antaŭe multe da kontraŭuloj, kaj la Blankuloj volis venĝi sin. Forkuri tamen estis malfacile, ĉar la pordegoj de la urbeto estis bone gardataj kaj nur tra ili oni povis forlasi la urbeton. Jam meznokte la eks-

igita urbestro estis forlasinta sian domon, timante, ke oni lin tie serĉus. Envolvita en larĝa nigra mantelo, li ŝteliris tra la stratoj por esplori, ĉu ie li povus vidi rifuĝejon. Ĉar li estis altkreska viro, li timis, ke liaj persekutantoj baldaŭ rekonus lin, kaj li ne sin trompis, ĉar kelkaj soldatoj, irantaj kun brulantaj torĉoj, ekvidis lin je la dua horo nokte kaj tuj komencis kuri post li. La forkuranto rapide sin kaŝis en strata angulo kaj rimarkis kun batanta koro, ke la soldatoj preterkuris ne ekvidinte lin. Por momento li estis refoje libera, sed antaŭvidante, ke oni returnos sin por serĉi en la apudaj stratoj, li ĉien direktis la rigardojn, esplorante, ĉu ie bona okazo sin prezentus por sin kaŝi. Okaze li sin trovis en tiu momento antaŭ la Anasdometo, kaj ne plu sciante, kion fari, li laŭte faligis dufoje la pordfrapilon. Li atendis dum unu, du minutoj, kaj ĵus kiam la persekutantoj reaperis apud la stratangulo, la pordo malfermiĝis, kaj la nigra figuro de la eksurbestro sin ŝovis internen, refermante senbrue post si la pordon. Supre sur la ŝtuparo staris malgranda virino. Ŝi pensis, ke ŝi malfermis por sia edzo, kiu ankoraŭ ne estis rehejmiĝinta, kaj ekvidante tiun nigran altkreskan figuron ĉe la pordo mal-supre de la ŝtuparo, ŝi eligis mallaŭtan krion, tamen rekonsciigante, ŝi demandis: — Kiu vi estas? Mi pensis, ke mia edzo

— Sinjorino —, respondis la eksurbestro, — pro la amo de Dio, helpu min, oni persekutas kaj volas mortigi min. — La virino rekonis la voĉon de la iama urbestro kaj tuj ŝi komprenis ĉion.

— Ĉu vi scias, al kiu vi petas helpon? — ŝi diris; — ĉu vi scias, ke . . . — La eksurbestro, suprenirante la ŝtuparon, interrompis ŝin:

— Ne, sinjorino —, li diris, „en mia timo mi laŭhazarde

frapis sur ĉi tiu pordo, sed kiu ajn vi estas, vi helpos al mi, se vi estas kristanino.“

— Sekvu min —, respondis la virino, „sed rapide, ĉar mi aŭdas bruon de paŝoj sur la strato, eble oni vidis, ke vi eniris mian domon.

Unu minuton poste ili estis en la sama ĉambro, kie antaŭ kelkaj monatoj la urbestro estis serĉanta la ĉarpentiston, la edzon de ĉi tiu virino, al kiu li nun petis protekton. La virino ne konigis sin kaj ne dirante eĉ unu vorton, ŝi forŝovis la spegulon, puŝis sur najlon per la fingro kaj subite kaŝita pordeto malfermiĝis; tiam ŝi diris: „Eniru tien, sed precipe ne faru bruon, por ke neniu aŭdu vin, mi zorgos por ĉio.“

La eksurbestro enrampis en la rifuĝejon, la sekreta pordeto refoje fermiĝis, kaj la spegulo estis ŝovata sur sian kutiman lokon.

Kiam je la sesa horo la ĉarpentisto rehejmiĝis, li rakontis detale, ke oni ĉie kaj dum la tuta nokto estis serĉinta la malbenitan eksurbestron, sed ke nenie oni povis lin trovi.

La virino nun havis en sia potenco la vivon de sia iama persekutanto, kaj kion vi pensas, ke ŝi faris? Ĉu vi iam aŭdis pri la viro, kiu trovis sian dormantan malamikon sur la rando de alta ŝtonego? Mia patrino legis pri tio al mi, kiam mi estis okjara knabo, kaj mi memoras bone, ke grandaj larmoj rulis sur ŝiaj vangoj, kiam ŝi legis la finon de la rakonto „kaj la viro, ne vekante sian malamikon, fortiris lin de tiu danĝera loko kaj daŭrigis sian vojon.

La edzino de la ĉarpentisto ne perfidis la forkurinton, kiun Dio estis konfidinta al ŝiaj zorgoj kaj protektado. Ŝi faris kvazaŭ tute nenio eksterordinara estus okazinta en ŝia domo. Kiam ŝia edzo estis eĉ sia laboro eksterdome, ŝi portis manĝaĵon kaj trinkaĵon al sia malliber-

ulo ĝis la tempo, kiam neniu plu pensis pri li, ĝis la tempo, en kiu la ordo estis reveninta en la urbeto Gaŭda.

Unu vesperon ŝi elvenigis la eksurbestron el la kaŝejo kaj donante al li vestojn por fari sin nekonebla al la urbanoj kaj la pordega gardisto, ŝi parolis al li:

— Sinjoro, la danĝero, kiu ĝis nun minacadis vin, tute pasis, iru kun Dio, forlasu la urbon, neniu rekonos kaj atentos vin, fartu bone!

La iama urbestro tiris grandan monujon el sia poŝo kaj prezentante ĝin al la virino, li diris:

— Sinjorino, vi savis mian vivon, prenu ĉi tiun monujon kun la enhavo kiel rekompenco por via nobla konduto je mi, sed diru, kiel vi povis kaŝi min tiel bone, ke eĉ via edzo ne eksciis tion?

La virino respondis:

— Sinjoro, gardu vian monon, vi bezonos ĝin mem dum via forkurado; sed mi diros al vi, kiel mi povis kaŝi vin tiel bone. Tiun kaŝejon, kie vi pasigis tiom da tagoj, mi ankaŭ uzis por kaŝi mian edzon, kiam vi kiel urbestro de Gaŭda serĉis lin por pendigi. Vi faris al ni multe da malbono, sed ĉar mi penadas esti vera kristanino, mi pardonis al vi, ĉar mi legis en tiu sankta libro (ŝi ekkaptis la manon de la konsternita eksurbestro kaj kondukis lin al malgranda bretaro, de kiu ŝi prenis religian libron): „Pardonu al viaj malamiko kaj amu ilin!“

La pala eksurbestro, rekonante la virinon de la ĉarpentisto, fariĝis ankoraŭ pli pala; liaj genuoj fleksiĝis sub lia korpo kaj li estis tiel emociita, ke li ne povis respondi. Honte li mallevis la kapon kaj dum la virino refermis la kaŝejon kaj ŝovis la spegulon sur la ordinaran lokon, li malaperis el la ĉambro kaj senbrue forlasis la Anasdometon.

Johano silentis kaj mi pripensis pri la nobla konduto de tiu virino.

- Pri kio vi pensas? — fine li demandis.
— Pri tiu ĉarpentistedzino.
— Kiel vi opinias pri ŝi?
— Ho, ŝi estas tiel bona kiel la patro de Lazaroni.
— Kion, laŭ via opinio, dirus via patrino, se tiu urbestro venus ĉe vin por aresti vian patron?

Mi pripensis refoje.

- Nu? — li demandis plue. — Kion ŝi dirus? #
— Ho, ŝi dirus: Nu bone! — mi respondis, — ĉar ŝi ĉiam respondas tiel —, kaj ne atendente, kion respondos al tio la maristo, mi daŭrigis:

— Ĉu vi nun rakontos pri Hamburgo?

— Jes, sed tio ne estos fabelo nek rakonto —, kaj li rakontis pri tiu granda urbo; ke ĝi estas tiel malnova, ke ĝi kuŝas apud la larĝaj riveroj Elbe kaj Alster, ke la haveno estas tiel granda kaj preskaŭ plenplena je ŝipoj; ke la urbo konsistas el du partoj, unu nova, alia malnova; ke antaŭe la urbo estis fortikajo, sed ke de post cento da jaroj la muregoj estis forigitaj kaj ke sur ilia loko estas belegaj promenadejoj, kaj tiel plu. Li rakontis pri la soldatoj, pri preĝejoj, pri teatroj kaj ke li sentus sin feliĉa refoje esti en Hamburgo.

— Mi dezirus, ke vi ĉiam restu tie ĉi —, mi subite diris.

— Neeble!

— Tion ankaŭ ĉiam diras mia patro, aŭ ke vi restu almenaŭ unu jaron.

— Kial do?

— Ĉar vi povas tiel bele rakonti.

— Nur tial?

— Ne, ĉial! — mi diris. — Mi estis ĝis nun tiel sola sur la Insulo, sed tion mi ne sentis; tamen, post kiam vi estos for, mi eble enuos tie-ĉi.

— Kuiru viajn pizojn, mia knabo!

— Mi klopodos, sed kial mi ne povos iri kun vi al Londono, kaj poste al Hamburgo? — Mi preskaŭ ekploris.

La maristo rigardis min kaj la samaj ĝis antaŭ kelkaj tagoj al mi nekonataj esprimoj de kompato, kiun li sentis por mi, refoje glitis sur lia vizaĝo. Li tiam frapetis amike mian ŝultron kaj diris refoje:

— Kuiru ilin, mia amiketo, kaj ĉio fariĝos bona.

Mi ne respondis, sed ekstaris por plue serĉkolekti ovojn. Ĉiam rakontante kaj parolante Johano helpis al mi, sed ovojn li trovis neniujn. Mia korbo estis preskaŭ plena, kaj ĵus mi trovis novan neston kaj klinis min por elpreni la ovojn. Flanke de mi sin klinis la maristo; liaj kruroj disstaris, ili estis tiel longaj, ke mi facile povus rampi sub ili kaj mi ekmiris pri tiaj longaj kruroj, kiam subite per neatendita kaŭzo la maristo perdis la egalpezon kaj rulfalis antaŭ mi sur la sablon. Liaj botoj priskribis rapide duoncirklon tra la aĉro kaj jen mia amiko kuŝis momenton kun etendita korpo sur la sablo. Mi estis mirkonsternita, sed feliĉe la maristo tuj ekstaris kaj, plengorĝe ridegante, montris la pugnon al io, staranta post mi. Turnante min, mi vidis Jafet. La kaprino estis sekvinta nin kaj atendante bonan okazon por montri sian malamikecon al mia amiko, ŝi estis per siaj kornoj tiel forte puŝtuŝeginta lian postajon, ke la surprizita maristo estis jetata kelkajn paŝojn antaŭen. Vidante ke tio ne multe doloris Johanon, mi ankaŭ ridegis. La kaprino tamen jam estis je kelka distanco, eble por refoje ataki sian malamikon, sed vidante, ke tiu estas singarda, ŝi turnis al ni la voston kaj malrapide iris for. Ni plue serĉis ovojn kaj dum Johano rakontis fabelojn pri „La malbela anasido“, pri „La najtingalo“, (ŝajnis al mi, ke li estas neelĉerpebla rilate al fabeloj), la tempo pasis rapidege.

La lastajn tagojn dum lia ĉeesto mi sentis min tute

alia knabo. Vekiĝis en mi subite la deziro ekscii ĉion, kio okazas en la mondo kaj precipe en Hamburgo. Mi deziris konatiĝi kun ĉiuj eksterinstulaj aferoj, al mi ĝis nun tute fremdaj. Sendube en tiu „mondo“ mi estus feliĉa, ĉar laŭ mia imago ĉiuj homoj tie devus nepre esti kiel Johano; ili ridetus al mi kaj agus tute alie ol miaj gepatroj, kiuj lasis min nur fari, sed kiuj ne konsciis, ke fine mi ne povus kontentiĝi kun mia unutona vivo.

Kun korpremo mi atendis la lastan tagon de la monato, kiam mia amiko forirus por neniam reveni. Mi kalkulis la tagojn, kion mi antaŭe neniam estis farinta. Ĉiumatene mi ĝojis, ĉar nova tago alvenis por pasigi kun iu, kiu povis kompreni min kaj kiu volis ĉion, kion mi volis, kiu unuvorte tute samopiniis kun mi, kaj ĉiuvespere mi malĝojis, ke tago estis pasinta, ĉar ĉiu tago de tiu monato estis al mi kvazaŭ parto de trezoro, kiu iom post iom por mi perdiĝis. Kaj kio restus, post kiam mi estus perdinta tiun trezoron? Nur soleco, unutoneco kaj enuo. Tion mi klare antaŭsentis. Miaj bestoj, precipe la hundo, povus ludi kun mi kiel antaŭe, sed ĝi ja estis muta kaj ne kapabla forigi la misteran premadon, kiu subite kaptis mian koron, kiam mi pensis pri la venonta monato.

En la noktoj mi ne povis plu kviete dormi. Multfoje mi eksidis en mia lito kaj rigardante en la min ĉirkaŭantan duonlumon, mi ekploris. Se mi nur povus kuiri miajn pizojn, sed, ho ve! mi ne estis filozofo kiel Johano; krom tio, ili estus tro malmolaj, ili premus kaj dolorus min kaj neniu venus por forpreni ilin el miaj ŝuoj. Kiam ektagiĝis, mia ĉagreno foriĝis, ĉar mi povus refoje promeni kaj ludi en la dunoj kun Johano; tie ni saltadis, kuradis, tie li rakontadis kaj mi amuzis min; sed tago post tago pasis senrevene, kaj fine venis la lasta. Meznokte, ne povante dormi, mi ellitiĝis kaj

senbrue malsupreniris la ŝtuparon al la stalo, kie li dormis.

Mi aŭskultis En la ĉambro mallaŭte ronkadis mia patro kiel mistera kaŝita segisto, escepte tion ĉio estis silenta. En angulo de la stalo kuŝis la pajlolo, sur kiu la maristo ripozis. La lunlumo penetris tra la nefermita pordo kaj mi povis distingi la dormanton. Mi aliris kaj kaŭriĝis ĉe lia kuŝejo. Li kviete dormis kaj nur kun peno mi povis aŭdi lian regulan spiradon. Mi palpescerĉis lian manon kuŝantan sur la litkovrilo, kaj li vekigis. Mi ne povis vidi, ĉu li malfermis la okulojn, mi tamen vidis, ke li sin movas.

— Kio estas? — li diris kvazaŭ en sonĝo.

— Estas mi.

— Ĉu vi, mia knabo? . . . Kio estas al vi? . . . Kial vi ne dormas?

— Mi ne povas . . . ĉar vi foriros morgaŭ. — Kaj mi ekploretis.

— Kvietigu! — li diris mallaŭte, — ne ploru, ĉio fariĝos bona.

— Ho ne . . . , vi ja foriras.

— Sed mi povas reveni.

— Kiam?

— Mi ne scias; tio dependos de cirkonstancoj.

— Ho, vi ne revenos . . . Kial mi ne povas iri kun vi kaj fariĝi maristo, kiel vi?

— Vi estas tro juna. Restu kviete ĉi tie, vi ja ne estos sola, ĉar viaj gepatroj restos.

— Sed ili tute ne min amas; . . . ili eble ja eĉ ne estas miaj gepatroj.

— Silentu, knabo, ne diru tian sensencaĵon.

— Vi mem tion supozis.

— Jes, sed mi eraris. Ili diris al mi, ke vi estas ilia filo, vi ja naskiĝis tie ĉi. Ili estas simplaj kvietaj

homoj kaj ne scias rakonti kaj ludi kun vi, kiel mi faris; tion vi devas kompreni.

— Vi diras tion por kvietigi min, sed ili tute ne min amas; mia hundo min amas pli multe.

— Ili tamen estas bonaj je vi.

— Ili neniam batis, eĉ ne riproĉas min. Ili lasas min ĉiam fari kion mi nur volas, sed io sekrete diras al mi, ke ili ne min amas, kaj ke mi tute ne amas ilin; mi pli amas mian hundon. Antaŭe mi ne sentis tion, sed post kiam vi venis sur la Insulon, mi amas nur vin kaj vi reciproke min amas, tion mi sentas; spite tion vi volas foriri kaj mi restos tute forlasita . . . — Mi ploris denove.

— Se mi nur ne estus veninta! — li diris ĝemante, kaj post momento li diris plue: — Mi faris vin malfeliĉa.

— Ne diru ĝin! . . . Mi ja ĝojas, ĉar vi venis.

— Nu, se tio estas, ĉio fariĝos bona. Vi baldaŭ kutimos al via sorto . . . Iru nun al via lito kaj dormu.

— Mi volas kuŝi ĉe vi tiun ĉi lastan nokton.

— Bone! — li diris, farante lokon por mi. Nur kuŝigu ĉe mia flanko kaj dormu.

Mi ekkaptis lian manon kaj kuŝante ĉe lia flanko, mi ekdormis.

Kvara Ĉapitro.

La moneroj en la duonŝtrumpo — Nia gasto adiaŭnas nia —
Da leteroj — La sorĉisto — Nea respondo de mia patro —
Mi forkuras kun Jafet, sed ne atingas mian celon — En la
mezo de la maro — Malsato, soifo kaj malespero — Kiel mi
seniĝas min de rabia hundo — La nigraj neĝeroj.

Frumatene la sekvantan matenon mi vekigis. Jafet, ne trovinte min en la lito, estis serĉonta min, sed ne povante aliri al mi, staris ĉe la plej supra ŝtupo kaj eligis mallaŭtan ĝembojadon. Mi supreniris, vestis min kaj reiris kun la hundo malsupren en la stalon. Ĉiuj dormis ankoraŭ, sed mi ne povis plu dormi. Mia patro ronkadis kaj Johano kuŝis kviete en la sama sintenado, en kiu li ekdormis la nokton, post kiam mi estis vekinta lin. Kion mi farus? Mi rigardis mian amikon kaj min ekpemis subite la sama korpremo, kiu jam kelkajn fojojn turmentis min. Li estis forironta post kelkaj horoj. Li estis farinta por mi tiom; ĉu mi povus fari ion por li reciproke? Mi pripensis kaj subite naskigis en mia kapo ideo. Li estis al mi dirinta, ke li posedas plu nenian monon; li sekve devus marŝi multe da horoj por alveni Londonon. Mi ne sciis, ke tiu urbo estas atingebla nur per ŝipo. Mi do volis donaci al li parton de la arĝentaj moneroj, kiujn mi perlaboris trikante ŝtrumpojn kaj serĉante ovojn. Tiu mono estis mia propraĵo, mi do povus donaci al li tiom da ĝi, kiom mi dezirus. Timante tamen, ke li malakceptus, mi devigus lin akcepti vole-nevole, sed kiel? Pri tio mi ankaŭ pripensis starante

antaŭ la lito de Johano, ĝis kiam mi trovis rimedon. Mi ŝteliris en la ĉambron, ĉar mi ne volis vekigi la gepatrojn, timante ke ili malhelpus mian intencon. Mi malfermis la vestoŝrankon, elprenis la kesteton, en kiu mi konservadis mian monon, kaj serĉis skatoleton por enmeti plenanon da moneroj, sed ne trovis ĝin. Mi tamen bezonis ujon. Subite miaj okuloj falis sur ŝtrumpon, je kiu mi estis laborinta jam kelkajn vesperajn horojn. Tiu duonŝtrumpo povus utili. En malmulta tempo mi faris el ĝi specon de saketo, kaj enmetinte la monerojn, mi ĝin fermis per fadeno kaj reiris al la stalo. Johano dormis ankoraŭ. La por li tro mallonga pantalono de mia patro, kiun li nepre devus almeti, ĉar alia ne troviĝis por li, pendis sur najlo super lia kapo. Mi glitigis la saketon en unu el la profundaj poŝoj kaj atendis, ĝis kiam li vekigis. Se mi povus skribi tiam, mi estus aldoninta letereton, sed skribi mi ja ne povis. Tamen, trovante la saketon, li kompreneble divenus tuj, ke ĝi estas donaco de mi. Ĝi farus al li plezuron kaj krom tio, ĝi estus utila al li, ĉar sen mono li estus devigata marŝadi longan, tre longan vojon, kaj per tiu mono li povus vojaĝi vagonare al Londono. Tiel mi pensis, kiam mi vidis lin moviĝanta. Li rektigis sin, malfermis la okulojn kaj ridetis al mi.

— Ĉu vi estas jam vestita? — li demandis.

— Jes, mi ne povis plu dormi.

Li sidigis sur la pajlolito kaj demandis plue:

— Ĉu ili dormas ankoraŭ?

— Jes, nur aŭskultu, „li“ ronkas.

— Mi ĝin aŭdas... Nu, mia knabo, post du aŭ tri horoj mi foriros kun via patro... Ĉu vi volas al mi fari plezuron, antaŭ ol mi forlasos vin?

— Ho jes, nur diru!

— Nu, promesu esti kvieta, kiam la boato de via

patro velveturos for. Mi promesas, ke mi revenos kiel eble plej baldaŭ. Tio daŭros versajne unu jaron, eble nur kelkajn monatojn . . . Kia estas la vento? — li diris, vidante ke refoje mi estis ploronta.

— Vi povas velveturi —, mi respondis, retenante la larmojn.

— Vi jam vidis tion?

— Jes, en la aperturo de la tegmento . . ., tion mi ekzamenas ĉiumatene.

— Nu, en du horoj la boato estos ĉe la „digo“ —, li diris ekstarante kaj kaptante sian pantalonon; li almetis ĝin kaj ne rimarkis la saketon, kiun mi estis metinta en la profundan poŝon.

— Estu nun saĝa knabo —, li diris post momento, — mi lavos min, kaj post la matenmanĝo vi akompanos min al la haveno. Ĉu vi promesas al mi esti saĝa? . . . Estu kuraĝa kaj kuiru . . .

— Mi klopodos kuiri ilin —, mi interrompe diris, — sed estos tre malfacile al mi.

Li komprenis, ke tio estos malfacila kaj li diris:

— Ne kredu, ke mi forlasas vin kun plezuro, sed mi ja ne povas restadi; via patro gastigis min dum plena monato, mi estus sendanka kaj maldiskretulo, se mi petus por pasigi duan monaton ĉe li. Mi manĝis ĉe li dum tiu tempo kaj eĉ portis liajn vestojn, kiujn mi resendos, post kiam mi estos aĉetinta novajn en Londono. Resendante ilin, mi skribos leteron al viaj gepatroj kaj ankaŭ unu al vi.

— Mi ne povas legi.

— Via patro aŭ via patrino ja povos legi ĝin al vi. En tiu al vi adresita letero mi sciigos, kiam mi revenos. Mi jam konsilis al via patro, ke li kunprenu vin baldaŭ al la Vilaĝo. Dum kelkaj jaroj vi povos esti paganta gasto ĉe vilaĝano, kaj post tiu tempo vi povos fariĝi

maristo. Tiam ni dungigos nin sur la sama ŝipo kaj kune ni faros la vojaĝon ĉirkaŭ la tero.

Mi rigardis tian vojaĝon kiel ion tre strangan. Sur mia ŝtuparo mi povis vidi la supran parton de la tuta tero; mi sekve imagis, ke nia ŝipo velus sub la Insulo de unu horizonto al alia. Dum tiu vojaĝo mi do devus vidi ĉiujn landojn, ankaŭ Hamburgon.

Johano vidis min pripensadi, sed ne povus supozi, ke mi pensis pri io tiel eksterordinara kaj li diris:

— Kaj mi montras al vi ĉion de la mondo, same kiel vi montris al mi ĉion de la Insulo, kaj ni restos ĉiam kune.

Mi kredis, ke li diris tion por konsoli min kaj mi eksilentis. Ni lavis nin kaj eniris la ĉambron. Miaj gepatroj jam levigis. Post la matenmanĝo mia patro portis kelkajn malplenajn kestojn kaj sakojn kaj dekuon da kestoj kun ovoĵoj al la boato kaj pretigis ĉion por ekveli.

Johano adiaŭdiris mian patrinon, dankante ŝin pro tio, kion li ĝuis en ŝia domo dum la monato kaj certigis, ke li estus tre feliĉa, se li iam siavice povus esti agrabla al ŝi.

— Nu bone! — estis ĉio, kion ŝi respondis.

La maristo tiam premis al ŝi la manon kaj eliris la domon. Mi iris kun li al „la haveno“, kie mia patro jam atendis. Mia adiaŭdiro al Johano daŭris tre mallonge, ĉar la patro jam pretigis la velon de la boato.

— Nu, mia knabo! — li diris, dum li klopodis montri al mi ridetantan vizaĝon kaj kaptante miajn manojn, — nu, mia knabo, kuragōn, fartu bone kaj ne forgesu min...; baldaŭ mi sendos leteron... — Li ellasis miajn manojn, karesis la hundon, kiu staris ĉe mi, kaj li saltis en la boaton.

Mi ne povis paroli.

Kiam antaŭ monato la maristo neatendite aperis antaŭ miaj surprizitaj okuloj, tiam mia koro pro ektimo kvazaŭ saltis en mian gorĝon kaj malebligis al mi eldiri unu vorton. En ĉi tiu mateno, dum la maristo estis forlasanta min, mia koro refoje faris tian movadon kaj refoje estis al mi neeble paroli. Li ekvidis tion, sed ŝajnis ne vidi ĝin. Sidante en la boato, li diris ankoraŭ fojon: — Nu, knabo, mi baldaŭ skribos, adiaŭ!

La boato ekmoviĝis kaj ekvelis inter la du vicoj da markiloj.

Mi staris sur la bordo de la haveno kaj postrigardis la pli kaj pli malgrandiĝantan ŝipeton. De tempo al tempo Johano svingis la longan brakon kiel signo de adiaŭo, ĝis kiam mi ne povis plu distingi lin. Post kelkaj minutoj mi vidis nur malgrandan punkton, ankoraŭ kelkaj minutoj pasis kaj la boato estis malaperinta kaj kun ĝi mia patro kaj mia amiko. Li do estis for kun mia duonŝtrumpo en la poŝo. Mi ekpensis pri tio, kion li farus kun la moneroj. Ĉu li aĉetus novajn vestojn? Ĉu li vojaĝus vagonare al Londono? . . . Ho, se li nur baldaŭ trovus la monujon, mi diris al mi, kaj forlasante la havenon, mi malrapide kaj malĝoje iris hejmen por sciigi al mia patrino, ke Johano estis for, post kio ŝi memkompreneble diris:

— Nu bone!

Ŝi jus plensutis per sablo la plankon per misteraj figuroj, kiujn mia patro nun ne povis trastreki per sia kraĉaĵo, ĉar li forestos du tagojn.

Havante, kiel kutime, nenion por fari, mi supreniris la du ŝtuparojn por postrigardi la boaton (se eble), esperante, ke ĝi estu ankoraŭ videbla, sed ho ve! ĝi estis for.

Antaŭe mi neniam pensis pri tio, kion mi farus, ĉar min ne tedis la soleco; sed nun subite tio aliĝis; mi estis

sola kaj tute forlasita. Mia patrino kaj mia patro ja neniam faris sian eblon por esti al mi agrablaj, kaj se ŝi de tempo al tempo en la vesperoj voĉlegis, tio okazis plejparte, ĉar ŝi mem sin amuzis, kiam ŝi legis; multfoje en dimanĉoj ŝi foliumis la „Mil kaj unu noktojn“, eĉ kiam mi ne ĉeestis.

La historio pri Robinsono estis finlegita, sekve restis neniu libro por legi.

Mi malsupreniris la ŝtuparojn kaj iris kun Jafet al la dunoj. Mi kunprenis la korbon por serĉi ovojn, ĉar per tiu okupiĝo la tempo pasus pli rapide kaj malpli unutone. Antaŭ la alveno de Johano mi eĉ ne rimarkis, ke ĝi pasis, ĉar mi ne konis la enuon; mi ne pensis pri tio, ke la tago havis fiksitajn nombrojn da horoj, monato kvar semajnojn kaj semajno sep tagojn; ĉiuj tagoj ja estis por mi egalaj. Por la unua fojo mi ekalkulus la tagojn, ĉar post monato mia patro refoje irus al la „Vilaĝo“ kaj revenante, li eble kunportus leteron de Johano; eble Johano mem revenus, sed tio estis preskaŭ neefektivebla, ĉar la maristo intencis vojaĝi Londonon, kaj tio ja prenis multan tempon. Mi tamen esperis, kaj esperante mi jam imagis la ĝojon, kiun mi sentus revidi lin.

Mi nun estis sur la loko, kie mi vidis Johanon por la unua fojo kaj tie mi eksidis. Jafet kuŝiĝis ĉe mia flanko. Refoje mi revadis, sed kiom ajn mi dediĉis min al mia revado, ĝi ne ŝanĝiĝis en realecon; neniu „nudulo“ ekaperis, kaj se mil nuduloj estus aperintaj, mi sendube ne forkurus, ĉar ili ĉiuj estus bonvenaj. Tiel revante, mi kuŝis longan tempon sur la sablo; la vetero estis bela kaj fine mi komencis serĉkolekti ovojn, ĝis kiam la korbo estis plenplena. Refoje mi perlaboris unu arĝentan moneron. Kion mi farus kun la moneroj, kiujn mi estonte akirus? Mi ja ne povis esperi, ke an-

koraŭ fojon maristo en tia stranga maniero naĝus al nia Insulo kaj ke li post monato irus for kun ili. Mi sekve vole-nevole pensis pri tio, kion mi farus kun ili. Subite kaptis min ideo. Se Johano revenus, mi donus al li mian monon, ĝi nepre utilis al li. Sed se li ne revenus? Mi denove ekpensis. Li sendus al mi leteron. Ĉu mi povus sendi al li mian perlaboritan monon? Eble, sed kiel? Jen nova enigmo. Mi pensis pri ĉiuj tiaj kaj aliaj aferoj, ĝis mia kapo turniĝis. Fine la tago pasis kaj mi iris kun miaj du kvarpiedaj amikoj al la subtegmentejo por enlitiĝi.

La dua tago post la foriro de Johano pasis kiel la unua. Kiam mia patro en la vespero revenis tute sola, sed kiel kutime kun manĝaĵoj kaj paketo da gazetoj, mi demandis, ĉu Johano estis vojaĝinta al Londono. Li respondis:

- Ne.
- Kien li do iris?
- Urbon.
- Kaj poste?
- Mi ne scias.
- Ĉu li diris nenion pri mi?
- Li diris: „Salutu la knabon por mi.

Mi estis kontenta, li ja pensis pri mi kaj pensus pri mi dum sia tuta vojaĝo kaj ankaŭ poste; li tion promesis antaŭ ol foriri. Mi deziris, ke la monato jam estus pasinta, ĉar tiam mi ricevus lian leteron. En antaŭaj tempoj mi neniam pensis pri tio, kiun daton ni havas, ĉar tio ja ne interesadis min. Post la foriro de Johano tamen mi komencis kalkuli la tagojn. Mi sciis (Johano estis instruinta tion al mi), ke unu monato havas dudek-ok, tridek aŭ tridek-unu tagojn. Li ankaŭ estis instruinta al mi, kiuj monatoj havas tiujn nombrojn da tagoj. Ni estis en Aŭgusto, en monato kun tridek-

unu tagoj. Ĉiutage mi faris entranĉon en malnovan laton, kiun mi trovis en mia subtegmentejo, imitante per tio la ekzemplon de Robinsono. Tiamaniere mi povis kalkuli, post kiom da tagoj mia patro irus al „la Vilaĝo“, kaj du tagojn poste mi ricevus la leteron de la maristo. Neniam dum mia vivo unu monato daŭris tiel longe kiel la lasta. Ŝajnis al mi, kvazaŭ ĝi ne volus pasi. Ĉiutage mi kalkulis la entranĉojn kaj mi ĝojis, kiam la lasta semajno komenciĝis. Post sep tagoj mia patro irus „Vilaĝon“ kaj post sep farotaj entranĉoj, li irus kun sia boato por alporti la leteron, kiun mi atendis kun tiom da malpacienco. Sed, ho ve!... la semajno pasis, la patro iris vilaĝon kaj revenis... sed sen la letero. La maristo resendis la vestojn de mia patro kun folieto da papero, per kiu li sciigis, ke li estis aĉetinta vestojn en „la Urbo“, ke li resendas tiujn de mia patro, ke li dankas pro la boneco montrita al li kaj ke li estis ironta Hamburgon, kaj ke el tiu urbo li skribus longajn leterojn (unu al ili kaj unu al mi). Mi do devis atendi duan monaton kaj tion mi faris kun la sama malpacienco. Refoje mi faris entranĉojn kaj refoje mi pasigis unu-tonan longan monaton; fine ĝi pasis kaj kiam ĉe la komenco de la tria monato mia patro revenis de „la Vilaĝo“, li kunportis, krom la manĝaĵoj kaj la gazetoj, sendaĵon de Johano kun du leteroj, unu por la gepatroj kaj unu por „la knabo“. Mi deziris, ke mia patro tuj en la vespero legu la leterojn kaj feliĉe li ne diris „neeble“, ĉar post kiam la kunportitaj manĝaĵoj estis metitaj en la ŝrankon, li malfermis la sendaĵon de mia amiko. Mi neniam forgesos tiun momenton. La sendaĵo enhavis sep paketojn, ĉiu surhavis numeron. Mi estis tre feliĉa; sed la plezuro, kiun mia patro sentis, ne estis tiel granda, ĉar antaŭ ol ricevi la sendaĵon, li devis pagi al la poŝtestro de „la Vilaĝo“ sufiĉe altan mon-

sumon da limimposto. Li nun legis la leterojn. Al miaj gepatroj Johanō estis skribinta la jenon:

Hamburgo, daton de poŝtmarko.

Karaj gegastigintoj.

Fine mi povas skribi al vi. Ĝis nun tio estis neebla, ĉar mi ne volas forsendi leteron antaŭ ol mi povas sciigi bonan novaĵon. Tio estas versajne iom nedankema, sed mi ĉiam rigardas la mondon el filozofa vidpunkto kaj nur volas fari al iu plezuron, kaj letero kun malbona novaĵo povas kaŭzi nur malplezuron al la legantoj.

Venante en „la Urbon“ mi tuj aĉetis novajn vestojn per mono, kiu sorĉisto estis doninta al mi en duonŝtrumpo . . .“

Mia patro haltigis la legadon kaj kuntirante la dikajn brovojn, li diris:

— Ĉu li frenezigiĝis? . . . Sorĉistoj ja ne ekzistas, kaj se ili ekzistus, ili ne donus monon en duonŝtrumpo . . .

— Nu bone! — interrompis mia patrino, — nur daŭrigu legi —, kaj li legis plue:

„ . . . en duonŝtrumpo, kaj restis al mi sufiĉe da mono por vagonare vojaĝi Hamburgon, ĉar la ideo, iri al Londono, forlasis min subite pro tio, ke la vivado de maristo jam ne plaĉas al mi. Ĉiam mi kuiradis miajn pizojn kaj en Hamburgo mi refoje volis fari tion. Veninte tien, mi du tagojn promenadis por viziti ĉiujn lokojn, kie mi antaŭe tiom multe min amuzis, jen kiel kelnero, jen kiel aktoro kaj tiel plu. Mi sekve ankaŭ vizitis la teatron, kie mi ludis jam ofte. Post la dua akto de la teatraĵo mi petis aŭdiencon ĉe la reĝisoro, kiu komence ne volis akcepti min, sed ĉar persistanto ĉiam sukcesas, mi ankaŭ sukcesis kaj li ak-

ceptis min. Mi demandis, ĉu li bezonas aktorojn kaj feliĉe li bezonis unu. En du minutoj mi estis dungita, kondiĉe ke mi neniam plu faru skandalon sur la scenejo kiel en la vespero, kiam ĉiuj rigardantoj tiel aplaŭdadis min. Mi promesis kaj jen mi estas refoje artisto de teatro.

Mia tempo pasas tre agrable. Matene mi el-litiĝas je la oka, kaj duonan horon poste mi promenas. Post sufiĉe longa promenado (dependanta de la vetero) mi eniras butikon de bakisto por aĉeti panetojn kun sekvinberoj, kiuj estas tre bon-gustaj kaj kiujn mi pro la sekvinberoj povas manĝi sen butero kaj sen fromaĝo. Ĉar mia ĉambreto, kiun mi luis, estas malgranda kaj kuŝas tre alte (kvina etaĝo kaj tuj sub la tegmento), mi ne reiras en la ĉambron por manĝi mian matenmanĝon, sed iras en la stacidomon, kie en la atendejo mi libere kaj oportune povas sidi tiom da tempo, kiom al mi plaĉas. Tre longe mi tamen ne restas tie (precipe dum bela vetero), ĉar, manĝinte miajn panetojn, mi refoje iras promenadi, kaj estante la-ca kaj se estas bona vetero, mi eniras parkon, kie mi povas ripozi sur unu el la benkoj, tien lokitaj speciale por personoj kiel mi. Sub bela arbo mi tiam ĝuas la veteron kaj mi rigardas la piedirantojn. Intertempe alproksimiĝas la tagmezo kaj refoje mi aĉetas sekvinberpanetojn, kiujn mi enŝoŝigas por manĝi en vasta salono, nomata legosalono. En tiu salono, lukse mebloprovizita speciale por personoj kiel mi, mi eksidas (post kiam la pordisto en livreo malfermis por mi la pordon), kaj elektinte belan libron aŭ gazeton, mi legas tiom, kiom al mi plaĉas. Intertempe mi manĝas miajn panetojn, kiuj ĉiam estas bongustaj pro la farita promenado, ĉar sciuj:

ju pli oni promenis, des pli bongusta fariĝos la manĝaĵo. Mi do legas kaj se tio ekenuigas min, mi eliras la salonon, post kiam tiu sama pordisto refoje malfermis por mi la pordon. En la posttagmezo mi ankaŭ promenas aŭ iras en muzeon, speciale malfermitan por personoj, kiuj kiel mi, amas „la artojn“. Tie mi admiras la pentraĵojn, dum lakee vestita klarigisto klarigas ĉion, kion mi volas ekscii pri la pentraĵoj kaj cetere. Admirinte sufiĉe longan tempon la muzeon, mi eliras kaj ĉar preskaŭ ĉiam en la posttagmezo, tie aŭ aliloke estas bela koncerto en parko aŭ en la soldatejo, mi iras tien por aŭdi la plej belan muzikon, kiun oni povas deziri. Post la koncerto mi iras al la teatro por ekzerci la ludotajn teatraĵojn kaj, ĉar mi ne kaŭzas plu skandalojn (aŭ pli ĝuste dirite, ĉar mi ne faras plu riverencojn, kiam la rigardantoj aplaŭdas), la reĝisoro same kiel la ĉefaj aktoroj estas kontentaj pri mia konduto kaj ĉiam ili estas afablaj al mi. Post multaj de ni luditaj dramoj restas manĝaĵo, kiun la aktoroj sur la scenejo devus manĝi, sed kompreneble ili pli parolas ol manĝas, sekve preskaŭ ĉio restas staranta sur la tablo. La reĝisoro (tre aminda persono) ĉiam al mi permesas manĝi tiujn restaĵojn. Meznokte post la ludado mi kviete promenas al mia subtegmentejo kaj tie dormas kiel reĝo. Vi vidas, mi estas la plej feliĉa homo, kiu povas ekzisti, kaj se la teatro jam ne plaĉas al mi, tiam mi elektos alian metion, eble tiam mi fariĝos tombisto aŭ lanternisto, ĉar tiuj du oficoj ebligas ankaŭ multan okazon por promenadi. Mi forĝesis skribi, ke preskaŭ la tuta Hamburgo min admiras nuntempe pro la plej bela horloĝa ĉeno, kiun el ĉiuj samurbanoj mi portas. Horloĝon

mi ne posedas, al kio ĝi utilas? Mi ja ĉiuloke en la urbo povas vidi kioma horo estas. Mi fabriks tiun ĉenon el nuraj moneretoj argentaj (tri vicoj unu sub la alia). Se iam mi refariĝos maristo kaj alvenos en „la Urbon“ per mia ŝipo, tiam mi nepre vizitos vin sur via „Insulo“ kaj mi montros al vi mian belan ĉenon. Tiujn monerojn mi alie verŝajne elspezus, sed ĉar ne estas permesate pagi per truhavaj moneroj, mi devigis al mi gardadi ilin ĝis mia morto kaj mi gardados ilin en memoro al la bona sorĉisto, kiu prezentis ilin al mi en tiu duonŝtrumpo.“

Refoje mia patro ekhaltis legi, dirante:

— Mi vere kredas, ke li perdis la prudenton.

— Nu bone —, diris mia patrino; — daŭrigu

legi —; kaj li legis plue:

Mi preskaŭ finis mian leteron, ĉar mi sciigis ĉion, pri kio mi povus skribi. Mi aldonas kelkajn paketojn:

Numero unua: Pipo, tabakujo kaj alumetujo; por la gastiginto.

Numero dua: Boteloj da kolonja akvo, naztukoj kaj parfumigita sapo; por la gastigintino.

Numero tria: Libro kun fabeloj, poŝtrancilo kaj saketo je germanaj moneroj el nikelo, por mia bona „knabo“, pri kies nomo mi forgesis informiĝi.

Numero kvara: Kolbaso; por Jafet, kiu tiel bone amikiĝis kun mi.

Numero kvina: Muso el ĉokolado (vivanta muso nenie estis akirebla tie ĉi); por Sim.

Numero sepa: Skatolo je dolĉaj kuketoj; por la papago, ĉar ĝi ĉiam diris al mi: „Go til fanen!“

Numero oka: Fajlilo; por Sam, kiu tiel Jerte farigis al mi aersalton. Se iam mi revenos sur

„la Insulon“, vi antaŭe per tiu ĉi fajlilo defajlu al la kaprino la kornojn, por ke ĝi jam ne povu ataki min de malantaŭe.

Kaj jen mi finas, refoje esprimante mian sinceran dankon pro ĉio, kion vi faris por mi dum tuta monato; kaj dezirante al vi ĉiuj (eĉ al la kaprino) bonan sanon kaj ĉiaman prosperon, mi volonte daŭre restas:

Via Johano.

La al mi adresita letero estis pli mallonga. Mia patro ĝin voĉlegis kaj post la legado mi konis ĝin parkere, kaj neniam mi forgesos la enhavon. Jen ĝi estas:

Mia bona „knabo“!

Al viaj gepatroj mi skribis pri miaj aferoj, kiel mi sanas kaj kiel mi vivas en Hamburgo kiel riĉa sinjoro. Al vi mi volas tion rakonti, kio okazis dum mia promenado de „la Vilaĝo“ al „la Urbo“. Tute neatendite mi dum tiu promenado eksciis, ke ekzistas ankoraŭ sorĉistoj en la mondo, kaj eĉ tre bonkoraj. Vi scias, ke mi alvenis sur „la Insulo“ tute nuda kaj sekve sen groŝo en poŝo, kaj ĉar mi perlaboris nenion tie, estas kompreneble, ke mi ne eliris el ĝi kiel riĉulo. Sed mi ĉiam kuiras miajn piĵojn kaj pensante pri mia malriĉeco (mona malriĉeco) dum mia promenado al „la Urbo“, mi ankaŭ kuiris ilin, atendante ĉu iel la sorto helpus al mi. Ĝuste en tiu momento staris antaŭ mi persono ĉifone vestita, kiu etendis la manon kaj petis almozon. Mi ekhontis, ĉar mi posedis nenion por doni, kaj tion mi diris al li. La almozulo tamen respondis afable: — Vi ne mensogis, sed vi ankaŭ ne diris la veron —. Vidante ke mi ne komprenis tion, li ektuŝis per bastono la poŝon de mia pan-

talono, dirante: „Metu la manon en tiun poŝon kaj vi komprenos miajn vortojn“. Mi enpoŝigis tiuj mian manon kaj trovis duonŝtrumpon, kiam mi el-tiris. Kiel mi miris, vidante ke enestas granda monsumo. Sentante min feliĉa, ĉar mi posedis monon kaj povis doni almozon, mi jam estis prezentanta al li kelkajn monerojn, sed jen:subite li estis for kaj kien ajn mi direktis la okulojn, li ne reaperis. Mi do promenadis pluen kun mia trezoro. Vi komprenas, kiel danka mi estis. Neniam mi forgesos pri mia sorĉisto, eĉ se mi fariĝus miljarulo.

Estas homoj, kiuj bonfaras pro egoismo (poste vi spertos, kion tiuj vortoj signifas), kaj estas personoj, kiuj bonfaras pro nura altruismo (vi spertos ankaŭ, kion tio signifas). Mi tamen estas konvinkita, ke mia bonfarinto agis pro nura altruismo kaj ĝuste tial lia helpo tiom multe valoras, kaj ĝuste tial mi neniam povos forgesi lian agadon. Se iel mi povos, mi helpos al li kaj mi esperas, ke iam venu tempo, kiam mi povos montri al li, kiel granda estas mi dankemo. —

Nu, mia knabo, fartu bone; mi esperas, ke la tri aldonitaj donacetoj plaĉu al vi kaj ke vi ĉiam memoru la donacinton, kiu restas via ĉiama amiko:

J o h a n o.

Mia patro, leginte la leteron, rigardis ĝin kelkan tempon, kvazaŭ ĝi estus io tre stranga, tiam li ĝin donis al mi, dirante:

— Li sen ia dubo frenezigiĝis aŭ estas frenezigonta . . .
Jen via letero.

— Mi ĝin gardos —, mi diris.

— Nu bone —, diris mia patrino.

La birdo, kiu dum kelkaj tagoj estis silentema, subite ekkriis: — Go til fanen! —, post kiam mia patrino oferis al ĝi unu el la ĵus alvenintaj kuketoj. La papago kiel kutime akceptis ĝin tre gravmiene kaj tuj manĝis kun apetito. La kato ne volis manĝi la museton el ĉokolado, tial mia patrino donis ĝin al mi. Estis la unua fojo, ke mi gustumis ion tiel bongustan, ĉar mia patro neniam alportis ĉokoladon, nek por mi, nek por mia patrino. Koncerne al la kolbaso, la hundo manĝis peceton da ĝi, la plej grandan parton tamen mia patrino dispartigis la sekvantan tagon dum la matenmanĝo inter la patro, si mem kaj mi, opiniante ke ne decas, ke hundoj manĝas ion tiel delikatan kaj multekostan. Mi tre bedaŭris tion, ĉar Johano estis destininta la kolbason al la hundo, ĝi sekve devus manĝi ĝin. Kaŝe enpoŝigante la al mi donitan peceton, mi ĝin donis poste al Jafet, kiu englutis ĝin en tre malmulta tempo.

Mi estis scivola, ĉu mia patro vere defajlus la kornojn de Sim, sed feliĉe li metis la fajlilon en la keston sur la subtegmentejo. Mi ĝojis pro tio, ĉar Johano ja nur ŝerce skribis tion. Mi estis tre kontenta kun mia bela letero, kiun mi tamen nur malbone komprenis, precipe koncerne la vortojn: „egoismo“ kaj „altruismo“. Estis tamen al mi klare, ke li estis trovinta la monon, ke li akceptis ĝin kun plezuro, ke li bone uzis ĝin kaj ke li komprenis, ke mi enmetis la duonŝtrupon en la profundan poŝon. Ankaŭ mi ĝojis, ĉar li tiel lerte kredigis al miaj gepatroj, ke aliulo estis la donacinto de la moneroj; li eble supozis, ke mi estus riproĉata, se ili eksciis, ke mi estis fordoninta ĉiun mian monon posedajon.

La tria monato post la foriro de mia amiko komenĉigis. Ĝi estis al mi ankoraŭ pli enuiga ol la du an-

taŭaj. Mi sentis kiel birdo, al kiu oni rabis la liberecon kaj kiu en tre malgranda kaĝo sopiras la liberan aeron kaj la liberan movadon. Sencele mi vagadis sur la duonoj kaj ofte mi demandis al mi, kiom da tempo mi restus ankoraŭ sur „la Insulo“ antaŭ ol eniri „la mondon“. La espero, ke Johano revenus por preni min kun si, jam de longe min forlasis.

Unu vesperon mi demandis al mia patro, kiam mi iros „Vilaĝon“ por vizitadi la lernejon.

— Mi ne scias —, li respondis.

— Mi do devas ion lerni —, mi kuragis diri plue. Liaj kuntiritaj brovoj ektimigis min.

— Ankoraŭ tro juna.

— Sed kiam mi do iros tien?

— Mi ne scias.

— La sekvantan someron?

— Neeble.

— Kial?

— Ĉar estas neeble! — li diris refoje, sed pli laŭte ol la unuan fojon.

Mi sentis, ke mi estis ploronta, sed ne volante montri mian ĉagrenon, mi ekstaris kaj aliris al mia subtegmentejo, eĉ ne dirante: — Mi iras.

Post tiu lasta respondo de mia patro mi ekmalamis lin; mi sentis, ke li kondukis kontraŭ mi kiel malbona patro. Pli kaj pli mi deziris, ke iu alia, ekzemple Johano, povus esti mia patro, sed ho ve! Johano estis tro juna kaj alian patron mi verŝajne neniam trovus. Mi malesperis, enlitigis kun Jafet kaj Sim, sed mi ne povis dormi. La teruriga vorto „neeble!“ seninterrompe tintadis en miajn orelojn. „Kial tio estas neeble?“ mi demandis al mi. Sed la respondon mi ne povis doni. Mi pripensadis... Kion mi devas fari?...

Refoje mi komparis mian sorton kun tiu de Robinsono. Li forkuris el Londono kaj alvenis al Insulo; mi ne forkuris, sed spite tion mi trovis min sur Insulo, kie mi devus pasigi sendube ankoraŭ multajn jarojn... Ĉu estus rimedo forkuri el „la Insulo“ por alveni al Hamburgo?... La tutan nokton tiu penso ne eliris mian kapon kaj turmentadis min... Ĉu mi forkurus?... Kiam mi forkurus?... Kien mi forkurus? — Ĉe tiu lasta demando mia pripensado ekhaltis momenton... Kiel forkuri?... Ĉu naĝante?... Ĉu velante?... Mi povis naĝi kiel hundo, sed la distanco de „la Insulo“ al „la digo“ estis tro longa kaj mi dronus mezvoje. Ĉu mi povus atingi „la digon“ per la boato de mia patro?... Sed mi neniam veliris kaj ne sciis, ĉu tio estas facila aŭ malfacila... Dum bona vetero, kvieta maro kaj suda vento mi tamen povus riski kaj klopodi. La boato ĉiam kuŝis en „la haveno“ kaj dum la akvo estis alta, mi tre facile povus puŝe ŝovi ĝin inter la du vicojn da markiloj, kiel li ĉiam faris, kiam li iris al „la Vilaĝo“. La velon mi povus pretigi kiel li ĉiam faris, kaj manuzi la direktilon ŝajnis al mi facila laboro. Ju pli mi pripensadis la aferon, des pli ĝi ŝajnis al mi efektivebla; sed kion farus miaj gepatroj, se la boato estus for? Tiam li ja neniam povus aliri al „la Vilaĝo“ por alporti manĝaĵojn. Sed subite kaptis min la ideo, ke li povus ekbruligi grandan fajron sur la marbordo por montri, ke li estas en danĝero. Tion li faris jam antaŭe, post kiam ventego jetis la boaton en la maron, kie ĝi forperdiĝis. Ankaŭ tiam per fajra signalo li montris, ke li bezonas helpon, kaj tri tagojn poste alvenis homoj kun du novaj boatoj, el kiuj unu restis ĉe la Insulo. Tio okazis antaŭ multaj jaroj; mia patrino estis rakontinta ĝin al mi.

Sed forirante per boato, kion mi kunportus? Tion mi baldaŭ povus decidi... Mi kunprenus: la tranĉilon,

la germanajn monerojn, la leteron; jen ĉio, kion mi posedis. Tiel revante pri mia forkuro, mi sidis en mia lito kaj rigardis antaŭ min. Jen kuŝis Jafet sur miaj piedoj. Ĉu la hundo min akompanus?

Estis ankoraŭ tre frue en la mateno; la krepusko jam malaperis kaj la lumo de la leviĝanta suno penetris tra la aperturo de la tegmento. Ĉio ĉirkaŭ mi estis klare distingebla. Mi leviĝis kaj supreniris la ŝtuparon. Jafet vekigis tuj poste kaj rektiĝinte saltis sur la plankon. Sim daŭrigadis dormi. Mi rigardis eksteren, al la suda parto de „la Insulo“, kie kuŝis la boato. La vetero estis belega kaj malforta venteto blovis suden. Mi do tuj povus efektiviĝi mian intencon, ĉar kial mi prokrastus? Ĉiu tago estus por mi nova ŝarĝo, pezanta sur mia brusto kiel plombo. Senbrue mi vestis min kaj palpserĉante en la poŝoj de mia pantalono mi sentis, ke tie estas ankoraŭ la tranĉilo, la letero kaj la saketo kun la nikelaj moneroj. Jetante lastan rigardon sur ĉion en la subtegmentejo, mi prenis Jafet sub la brakon kaj malsupreniris la duan ŝtuparon. En la stalo mi ekhaltis momenton kaj aŭskultis. Kiel kutime, mia patro ronkadis, sekve li dormis; mia patrino ne sin movis, ŝi sekve ankaŭ dormis. Mi eliris la stalon kaj tuj kuris al „la haveno“. La okazo favoris min, ĉar la akvo staris tre alte, eĉ tiel alte, ke mi kun malmulta peno povis ŝovi la boaton inter la gvidmarkilojn. Mi saltis en la ŝipeton, metis la hundon sur la fundon kaj supreniris la veleton, kiun mia patro pro la bela vetero ankoraŭ ne estis kunfaldinta. Mi fiksas la ŝnuron, per kiu mi estis tirinta supren ĝin, kaj kaptante la direktilon, lasis gliti antaŭen la boaton.

Jen mi veliris kvazaŭ mi estus la plej sperta maristo, kiu iam manuzis direktilon. Ĉio prosperis bone laŭ mia opinio.

Alia knabo sendube pensus pri la ĉagreno aŭ

malespero, kiujn sentus liaj gepatroj, kiam ili eksciĝus, ke ilia filo tiel subite malaperis, sed mi tute ne pensis pri io tia. Ili ja verŝajne ne estis miaj gepatroj; ĉi-
okaze ili ne min amis (mi opiniis) kaj ili tute ne
malesperus, post kiam ili rimarkus, ke mi estas for.
Mia patro kuntirus la dikajn brovojn kaj mia patrino
kompreneble dirus: „Nu bone.“ Feliĉe li ne povus
postveli min per alia boato, ĉar li posedis nur unu.

Mi intencis veliri ĝis „la digo“ kaj lasante tie la
boaton, mi daŭrigus la vojaĝon piede al „la Vilaĝo“
kaj poste al „la Urbo“. Tie mi petus informojn pri la
vojo al Hamburgo. Per miaj moneroj mi aĉetus panetojn
kun sekvinberoj. En Hamburgo mi serĉus kaj trovus
memkompreneble Johanon; mi nur atentus la ĉenojn,
kiujn la sinjoroj portas en tiu urbo kaj fine mi vidus la
lian.

En la komenco la boato glitis malrapide inter la du
vicoj de markiloj kaj jam „la Insulo“ estis je distanco
de centoj da metroj. Iom post iom la irado fariĝis pli
rapida; la vento plenklovetis la veleton, kaj ĝis nun mi
direktis sen kontraŭaĵo. Kelkfoje mi rigardis post min al
„la Insulo“, kiu pli kaj pli malproksimiĝis. La vento
tamen fariĝis pli forta kaj post kelkaj minutoj mi veliris
tiel rapide, ke mi povis direkti mian boaton nur kun peno.
Subite la velo per ekblovo de la vento sin klinis flanken,
la boato priskribis kurban linion kaj tuj poste ĝi velis
tra du gvidmarkiloj kaj sin trovis ekster la vojo, kiun
mi devus sekvi por atingi la digon. Kiom ajn mi penadis
direkti la ŝipeton refoje inter la gvidmarkilojn, mi ne
sukcesis, kaj kun ektimo mi rimarkis, ke la boato velis
okcidenten. Miaj manoj estis tro malfortaj por manovri
per la direktilo, kaj ne plu sciante kion fari, mi lasis
min al la kapricoj de la sorto, kiu tamen igus min
albordiĝi ie malproksime de mia Insulo. Jafet sidis

kviete sur la fundo de la boato. Mi rigardis ĉirkaŭe, sed jam ne vidis la Insulon. Kie ĝi estis? Post momento mi rimarkis ĝin, sed en tute alia loko, ol mi supozis. La digon mi tute ne vidis kaj tio ekmaltrankviligis min, ĉar ĝi ja estis la unua celo de mia forkuro. Sed mi ne malesperis; mi ja venus ien kaj sendube albordiĝus post du aŭ tri horoj. La tri horoj pasis kaj ankoraŭ nenie „la digo“ estis videbla. Ĉie ĉirkaŭ mi sin etendis la senfina maro, kaj mi vidis nenion krom akvo, eĉ „la Insulo“ estis malaperinta kaj mi tute ne sciis, kie ĝi sin trovas. Ŝajnis al mi, ke la boato kuŝas sen movo, sed ĉar la velo estis plena je vento, mi nepre velis antaŭen. Ĉien mi direktis la okulojn por ekvidi velojn de ŝipoj, sed vane . . ., mi vidis nur la akvon, nenion krom akvo.

Forlasante la domon de miaj gepatroj, mi tute ne pensis pri tio, kunpreni manĝaĵon aŭ akvon; mi ja alvenus, mi pensis, la digon en almenaŭ tri horoj, kaj mi manĝis nenion, ĉar mi ne malsatis tiam, sed nun mi ekmalsatis.

La suno staris jam alte sur la ĉielo, sed nenie mi vidis velojn, nek „la digon“ kaj mi ektimis. Mi tamen esperis, ke baldaŭ ŝipo aperus sur la horizonto, kaj la tutan horizonton mi atentis ekzamenis, sed sen bona rezultato. Mia koro ekbatis, miaj okuloj pleniĝis je larmoj kaj preskaŭ malesperante, mi ekploris. Horoj pasis; la vespero alproksimiĝis kaj nenie ekaperis helpo. Jafet ankaŭ maltrankviliĝis; la hundo malsatis kiel mi, sed vidante, ke mi posedas nenion por doni, ĝi kun rezignacio kuŝis ĉe miaj piedoj, sen interrompo rigardante min per grandaj okuloj. Mi kore kompatis la beston, sed ne povis helpi al ĝi.

Pluaj horoj pasis kaj fine venis la nokto. Feliĉe la luno staris sur la ĉielo, sed en ĝia lumo mi vidis nur la arĝentkoloran akvon. Mi ne povis nek kuraĝis dormi

kaj daŭre mi pensis pri mia lito sur la subtegmentejo, kie alie mi kuŝis kaj dormis tiel trankvile kaj feliĉe.

Kiam ektagiĝis, mi rimarkis, ke la okuloj de mia hundo fariĝis tute ruĝaj. La besto rigardis min tiel strange, kvazaŭ ĝi ne konus min plu. Ĝia lango pendis el la buŝo, kiu estis kovrata per blanka ŝaŭmo. Mi timis, ke ĝi min atakus kaj mi ekkaptis mian tranĉilon por defendi min, se necese. La besto tamen kuŝis senmove kaj ĉiam fiksadis sur min la ruĝajn okulojn. Tiel mi pasigis kelkajn horojn. Fine ekkaptis min la ideo kunligi la piedojn de la hundo. Mi detranĉis pecon de la ŝnuro per kiu la velo estis suprentirita, sed Jafet, timante, ke mi estas faronta al ĝi malbonon, montris al mi la dentojn kaj eklekis en teruriga maniero. Por eviti mordojn de la besto, mi posten iris kelkajn paŝojn. Mi tiel malsatis kaj soifis, ke mi jam pensis pri tio, mortigi la hundon por manĝi, sed mi ne kuraĝis kaj siaflanke ĝi rigardadis min, kvazaŭ ĝi pro la sama motivo volus engluti min, kaj mi tenadis la tranĉilon por min defendi.

Ĉe mia flanko staris kesto sen kovrilo. En tiu kesto kuŝis akvoŝovelilo, martelo kaj ŝnuroj. Ĉiam rigardante Jafet, mi elprenis ilin kaj metis la keston antaŭ min kiel ŝirmilon, se la hundo volus salti sur min. Mi metis ĝin tiel, ke la hundo povis vidi la al mi turnitan fundon. Subite ideo naskiĝis en mia kapo kaj tuj mi efektivigis ĝin. Ĉiam tenante mian tranĉilon, mi rapidmove ŝovis la keston paŝon antaŭen kaj tiam renversis ĝin sur la hundon, kiu per tio estis kaptita sub ĝi. Ĉar Jafet estis malgranda hundo, ĝi ne povis levi sian malliberejon kaj mi estis senigita de la plej granda danĝero, kiu en tiu momento minacis min. La hundo eligis raŭkajn blekadojn, sed baldaŭ eksilentis. Timante ke ĝi povus renversi la keston, mi eksidis sur ĝi kaj refoje rigardadis

ĉirkaŭe por esplori, ĉu ŝipo ekaperas, sed nenie mi vidis unu. Mi tiel malsatis kaj soifis, ke preskaŭ mi ne povis restadi sidanta sur la kesto. Mi tamen restadis sur ĝi dum horoj, kiuj ŝajnis al mi terurige longaj kaj fine mi sentis, ke miaj fortoj estas forlasontaj min. Refoje horo post horo pasis, kaj ĉiam antaŭen velveturis mia boato. Mi ne sciis, kie mi trovas min, sed antaŭsentis, ke mi mortus sur la vasta maro en akompano de mia hundo kaj ke mi neniam revidus Johanon. Mi prenis la leteron, kiun li estis skribinta al mi kaj kiun mi portis en la saketo ĉe la moneroj. Mi malfaldis la papereton kaj rigardante la por mi nelegeblajn signojn, mi ektremis. Estis al mi, kvazaŭ mia amiko parolus la samajn vortojn, kiujn mia patro parolis, legante tiujn signojn. Mi esploris... Subite ventpuŝo ekkaptis mian papereton kaj ĝi forflugis ekster la boato en la akvon. Ankoraŭ kelkajn minutojn mi povis vidi ĝin, tiam ĝi fundiris kaj kun ĝi malaperis por ĉiam la lasta saluto de mia amiko.

Terura kapdoloro estis turmentinta min la lastajn horojn, mi tiel malfortigis, ke mi ne povis plu resti sur la kesto; mi deglitis kaj sidis sur la fundo de la boato. Mia dorso apogis kontraŭ la kesto kaj en tiu sintenado mi atendis kaj atendis...

Mi ne memoras, ĉu estis frue aŭ malfrue, vespere aŭ nokte, ĉar mi preskaŭ ne havis forton por pensadi aŭ rigardadi.

Ŝajnis fine al mi, kvazaŭ neĝadus, sed la neĝeroj estis nigraj kiel fulgo. Pli kaj pli dense tiuj neĝeroj falis sur min, ĝis la tuta ĉirkaŭaĵo fariĝis nigra kiel la nokto. Stranga zumado plenigis miajn orelojn; mi penadis aŭskulti, kio ĝi estas, sed la fortoj forlasis min kaj mi perdis la konscion...

Kvina Ĉapitro.

Sur fremda ŝipo — Kiun lingvon mi parolas? — Ivan, la alt-
ŝultra kniristo — Granda urbo — Unua promenado en granda
urbo — La patrino de mia nova amiko — La stranga akvo-
simila likvoro — La dancanto — La buboj — La rompita
vitro — Ivan malaperas — La stranga, sed belega ĝardeno —
Mia nova dormejo.

Longa tempo pasis kaj refoje mi aŭdis tiun zumadon. Mi konfuze pensis pri Lazaroni, kiu estis lulata per la sama zumado, kaj fine mi imagis esti Lazaroni mem kaj volis eksidi por rigardi, ĉu la nigraj manoj jam enŝoviĝis en mian ĉambron; sed mi ne povis movi min kaj mi estis tiel malforta, ke mi nur kun peno povis malfermi la okulojn. La zumado ne ĉesis, kaj estis tiel mallume, ke mi vidis nenion, kaj malklare mi memoris pri nigraj neĝeroj, kiuj estis ŝutataj sur min... Ĉu la nigraj manoj ŝutis ilin? Mi klopodis pensi pri tio, sed ne povis. Mi volis voki, sed mia lango gluiĝis al la palato de mia buŝo, kiun mi malfermis, sed eĉ la plej mallaŭtan sonon mi ne kapablis eligi. Intertempe la zumado daŭradis plenigi miajn orelojn. Mi volis levi la manojn por forigi la nigrajn neĝerojn, sed la forto mankis al mi; tro dika tavolo de tiaj neĝeroj kuŝis sur ili. Refoje mi malfermis la okulojn, kaj la nigra ĉirkaŭaĵo iom heliĝis. La dika tavolo sur miaj manoj perdis la nigran koloron, kaj ŝanĝiĝis en blankan... Ĉu la blankaj manoj faris tion?... Ĉu vere mi estis Lazaroni?... Li vekigis sur lito, mi same vekigis sur lito, ĉar subite

mi rimarkis, ke mi jam ne kuŝas sur la fundo de boato, sed sur lito... Mi do povus esti Lazaroni, ĉar laŭ mia opinio mi nun ne ŝipveturas... Mi sekve ne estis la sama knabo, kiu forkuris kun sia hundo... Mi tamen posedis hundon... Ĉu mi estis Lazaroni?... Ĉu mi estis alia knabo?... Pensante pri tio mi malkvietiĝis pro la besto, kiun mi tamen posedis iam... Iom post iom mi eksentis en mi la forton movi la langon; mi streĉis la fortojn kaj mallaŭte diris: — Jafet... Jafet.

Refoje mi rimarkis du manojn, sed ili estis nek nigraj nek blankaj, sed el ordinara koloro. Unu el ili tenis boteleton, la alia kuleron, kiun tiu mano ŝovis inter miajn lipojn. Stranga likvoro malsekigis miajn langon kaj gorĝon. Varma sento trakuris miajn vejnojn kaj mi rekonsciĝis. La manoj estis ankoraŭ tie kaj mi vidis, ke ili apartenas al fremda viro, kiu staris antaŭ mi. Fikse mi lin rigardis kaj refoje mi diris: — Jafet!

— Jafet? — li demandis.

— Jes —, mi respondis, — Jafet.

La ĉirkaŭaĵo estis nun hela kiel la tago, kaj mi sentis min multe pli bona, kvankam ankoraŭ tre malforta. La fremdulo ekparolis, sed ĉiuj liaj vortoj estis al mi tiel fremdaj, ke mi komprenis ne unu.

— Jafet! — mi diris.

La viro parolis ankoraŭ kelkajn vortojn, sed vidante, ke mi ne lin komprenis, li iris for.

Mi rigardis ĉirkaŭe kaj vidis, ke mi kuŝas sur blanka lito en malgranda ĉambreto, kie ĉio aspektis mirinde bela. Mi vidis multajn objektojn, kiujn mi antaŭe neniam vidis, kaj mi miregis. — Kie mi estas? — mi demandis al mi.

En tiu momento la fremdulo revenis kaj lin akompanis alia viro. Tiu lasta iris al mia liteto kaj eksidis sur seĝo, kiun mi ankoraŭ ne estis rimarkinta. Tiam li

diris kelkajn vortojn, sed mi komprenis nur unu, nome „Jafet“.

— Jes —, mi diris per malforta voĉo, — kie estas Jafet?

Li skuis la kapon, tiris mian manon el sub la blanka litkovrilo kaj palpis mian pulson; tiam li parolis al la alia viro, kiu estis foririnta, sed tuj poste revenis kun taso. La sidanta sinjoro prenis la tason kaj portis ĝin al mia buŝo. Mi trinkis ĝis neniu guto postrestis kaj sentis min pli forta, sed sidigi mi ne povis. Mi sekve restis kuŝanta kaj la viroj rigardis min atente. La sidanto tuŝis miajn vangojn, kaj mi sentis, ke lia mano estas malvarma. Li forprenis de mia frunto blankan tukon, kiun mi ne estis rimarkinta tie, kaj prenante kombilon, li kombarangis miajn harojn, dum li ridetis afable al mi.

— Jafet! — mi diris refoje, kaj li balancis la kapon. Mi timis ke la hundo estis mortinta.

En tiu momento venis aliaj viroj, kiuj rigardis min scivole; neniam mi vidis tiom da personoj kune. Ili komencis paroli inter si, sed mi komprenis nenion. Tiam la sidanta viro, kiu ŝajnis al mi eminenta sinjoro, pripensis momenton kaj demandis min denove. Ŝajnis al mi, ke lia voĉo subite ŝanĝiĝis, kvazaŭ alia persono parolus. Mi tre miris pri tio, sed silentis, ĉar mi ne lin komprenis. Tiam lia voĉo por la dua fojo ŝanĝiĝis, kaj feliĉe mi komprenis du vortojn el ĉio, kion li diris, nome la vortojn *ŝ t a d kaj n a m e n*, kaj mi respondis en mia Insula lingvo:

— Diht bi ŝtad —, kio signifas: „Tuj apud la urbo.“ Li daŭrigis demandadi min kaj mi komprenis la vortojn *F a t e r kaj l e e f t*, kion mi tradukis al mi per *p a t r o kaj v i v a s*.

— Op 't ajln d —, mi respondis, volante komprenigi, ke li *v i v a s* sur la *I n s u l o*.

— Ajlnd? — li demandis plue; — Inĝliŝ ajlnd?

Mi kredis, ke li demandis, ĉu mia patro vivas sur angla insulo, sed ne sciante, al kiu lando la Insulo apartenas, mi respondis:

— 'k Loof van najt —, kio signifas: — Mi kredas ke ne. Denove li pripensis, tiam li demandis:

— Hir is Jafet?

Mi tradukis la demandon per „kiel estas Jafet?“ kaj mi diris:

— 'k Wajt najt, vast vel dom, van haj vol mi bit'n*. Tiuj vortoj, kiuj sendube sonis strange en la orelojn de la eminenta sinjoro, estis al li nekompreneblaj, sed li persistis ankoraŭ momenton por eksci, kiu mi estas kaj de kie mi venis, kaj li demandis:

— Hajst du Jafet?

Mi komprenis, ke li demandis, ĉu mi nomiĝas Jafet kaj tuj mi respondis:

— Ikke? ... nej! — kio signifas: — Ĉu mi? ... ne!

— Sprihst du daniŝ? ... taler du dansk? — li subite demandis.

— Papegoj prot deens —, mi respondis, kaj imitante mian papagon mi diris plue: — Go til tanen!**.

Surprizite la sinjoro rigardis min kaj ekridis, tiam li palpesploris refoje mian pulson por senti, ĉu mi havas febron, kaj tradukante miajn lastajn vortojn al la ĉeestantoj, ĉiuj plengorge ridegis, pri kio mi tre miris. Tiam li faris ankoraŭ kelkajn demandojn, kiujn mi ne komprenis; li skuis la kapon kaj karesinte miajn vangojn, li ekstaris kaj iris for. La aliaj lin sekvis, kaj mi restis sola.

Super mia kapo mi aŭdis de tempo al tempo strangan bruon, kaj mi estis scivola, kio ĝi estas kaj pensis pri

* Mi ne scias, verŝajne ĝi estis rabia, ĉar ĝi volis min mordi.

** Iru diabloo!

tio, kiam refoje paŝoj sonis sur ŝtuparo, per kiu oni povis en- kaj eliri mian ĉambreton. Mi direktis la rigardon al la pordeto, kiu ĉiufoje estis malfermata, kiam ĵu eniris, ĉar ĝi estis tuj malsupre ĉe la ŝtuparo. Mi ekvidis eniri tre strangan viron. Li havis tre malgrandan, preskaŭ rondan trunkon, sed longegajn brakojn kaj krurojn. Lia kapo preskaŭ tute malaperis inter liaj altaj ŝultroj. Li portis blankajn vestojn kaj blanka ĉapo kovris lian kapon. Sur unu el liaj brakoj pendis blanka tuko kaj en la manoj li havis grandan pleton el nikelo, sur kiu staris teleretoj kun manĝaĵoj.

En la „Mil kaj unu noktoj“ staris homvestita simio, kaj ŝajnis al mi, ke tia simio subite eniris.

Li ridetis (mi ekkredis, ke ĉiuj homoj, kun escepto de miaj gepatroj preskaŭ ĉiam ridetas al mi) kaj alproksimiĝis al mi, ĵetis la pleton sur la liton kaj signodonis, ke mi eksidu. Mi faris tion kun lia helpo; li ŝovis la kapkusenon kontraŭ mia dorso, por ke mi pli oportune sidu, kaj pendigante la blankan tukon sur mia kolo antaŭ mia brusto, li montris la manĝaĵojn. Mi rigardis la teleretojn kaj tiam la viron, ne sciante, kion mi devus manĝi, ĉar tiajn manĝaĵojn mi neniam vidis. Li verŝajne komprenis tion kaj manĝigis min. Unue li prezentis al mi ion blankan, kio aspektis kiel amelo. Mi trovis ĝin delikata. Laŭ la sama maniero li manĝigis al mi kelkajn fruktojn. Lia brusto elstaris tiom multe, ke ĝi kelkfoje tuŝis mian kapon. Ĉiufoje kiam li sin klinis, mi rimarkis, ke lia dorso ankaŭ elstaras. Poste mi eksciis, ke li estas kuiristo kaj ĝibulo. Li kun pacienco staris ĉe mia lito, ĝis kiam mi estis manĝinta sufiĉe, tiam li forprenis la tukon de mia kolo, aranĝis por mi la kapkusenon kaj mi ekkuŝis. Tiam li foriris kun la manĝilaro. Ĉe la pordo li turnis sin, ridetis, kapsalutis kaj malaperis fermante post si la pordeton.

Mi estis laca kaj pensante pri la stranga persono, kiu ĵus min forlasis, mi fermis la okulojn kaj ekdormis.

Mi dormis longe, kaj vekigante mi sentis min tre bona. La kapdoloro ne suferigis min plu, kaj mi povis bone pensi, kaj mi pensadis. Mi sentis, ke mi estis estinta malsana pro malsato kaj soifo. Post la manĝaĵo, kiun la kuiristo estis portinta al mi, miaj fortoj estis revenintaj. Miajn vestojn mi ne vidis, alie mi estus leviginta, sed pro ilia malesto mi estis devigata restadi sur mia lito. Mi eksidis tamen kaj ekzamenis mian ĉambreton. Ĝi estis tre malgranda kaj brune pentrita. Flanke de mi en la ligna muro (ĉar mi kredis, ke ĝi estas nomata tiel) estis fenestreto tute ronda kun flava travidebla kurteneto. Ŝajnis al mi, ke ĉe la ekstera flanko de tiu fenestreto, sed iom pli malsupre, staras iu, kiu de tempo al tempo ĵetis ŝaŭmantan akvon por purigi la vitron. Tra tiu vitro mi vidis nur la bluan ĉielon. La plankon kovris tapiŝo kaj sur ĝi staris ĉe la muroj du benkoj; tableto pendis de la plafono. Mi tre miris pri tiu tableto, ĉar pendanta tablo estis por mi io tute nova kaj eksterordinara.

Mi estis iom malsata post la longa dormado kaj deziris, ke oni alportu iom da manĝaĵo, kaj mi atendis pacience, ĝis kiam iu ĝin alportus. Dum tiu tempo mi faris al mi multajn demandojn: „Kiel mi venis en ĉi tiun ĉambreton? — Kie mi estis? — Kiel longe mi restus tie ĉi? — Ĉu neniu el la ĉi tieaj homoj povus kompreni min? — Kien mi irus? — Ĉu la homoj en Hamburgo ankaŭ min ne komprenus? — Ĉu mi povus lerni la lingvon, kiun parolis miaj novaj kunuloj... kaj cetere, kaj cetere, ĝis la pordeto malfermiĝis kaj eniris la sama stranga persono kun la pleto, sur kiu same kiel hieraŭ staris manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Vidante min, la kuiristo tuj rimarkis, ke li estas bonvena. Mi manĝis

kaj trinkis sen lia helpo kaj kiam mi satiĝis, mi diris, ke mi dezirus ellitiĝi. Li altigis la altajn ŝultrojn tiel ke la kapo ankoraŭ pli multe profundigis inter ili, kaj suprentiris la brovojn; lia vizaĝo kaj liaj movoj diris al mi sufiĉe klare, ke li ne min komprenis. Mi ŝovis la litkovrilojn flanken, kaj pendigante la krurojn de la lito, mi montris per signoj, ke mi deziras almeti mian pantalonon. Li komprenis, sed lia vizaĝo, kiu ŝajnis esti kapabla esprimi preskaŭ ĉiujn liajn pensojn, diris: „Mi ne scias, ĉu estas permesate . . . , mi ne povas permesi, sed eble alia persono permesos, kaj li fingremotris supren. Mi retiris la krurojn kaj restis sidanta sur mia lito. Refoje la kuiristo fingre montris supren kaj komprenigis al mi, ke li demandos al iu tie supre, ĉu mi povus leviĝi. Mi dankis lin. Li iris for kaj post momento la eminenta sinjoro eniris. Li amike frapetadis mian ŝultron, parolis malmulte kaj palpis mian pulson. Li ŝajnis esti kontenta pri la stato de mia saneco, ĉar malferminte tre malgrandan pordeton flanke de mia lito, li elprenis miajn vestojn kaj mi povis leviĝi kaj vesti min. Tuj poste mi forlasis mian ĉambreton, supreniris la ŝtupetaron kaj mi trovis min sur la ferdeko de granda velŝipo. De sur mia Insulo mi estis vidinta milojn da ŝipoj, sed ĉiam de tre malproksime; por la unua fojo mi povus rigardi ŝipon en ĉiuj detaloj kaj ĉar la eminenta sinjoro permesis al mi tion, mi ekzamenis ĉi tiun ŝipon tre atente. Venante sur la postan parton, mi tute neatendite vidis mian boaton. Ĝi kuŝis sur unu flanko, la masto estis elprenita kaj kuŝis post ĝi sur la kunvolvita velo. Mi tuj rigardis la fundon kaj trovis la keston, sub kiu mi estis malliberiginta mian hundon. Jafet tamen estis for. Mi montris per la fingro la keston al unu el la ŝipanoj kaj ŝajnis, ke miaj demandantaj okuloj komprenigis al li, kion mi deziris ekscii. Li siavice montris la maron,

faris malĝojan mienon kaj diris vorton, kiun mi ne komprenis. Mi tamen ne dubis plu pri la sorto de Jafet; la besto ne estis sur la ŝipo, nek sub la kesto, sekve ĝi mortis kaj ripozis sur la fundo de la maro. Mi tre malĝojis, sed kuiris miajn pizojn kaj rezignaciis, ĉar nenio estis farebla por rehavigi al mi la hundon.

En ĉambreto, el kiu eliris multa vaporo, mi retrovis la kuiriston. Li ridetis, mansalutis kaj vokis min al si. Mi eniris lian ĉambreton (la kuirejon de la ŝipo) kaj post kiam li montris benketon, por ke mi povu sidigi, mi rigardis, kiel li pretigis la manĝaĵojn kaj purigis telerojn, forkojn kaj kulerojn. Mi komprenigis, ke mi dezirus helpi al li kaj li konsentis. Mi estis feliĉa, ke mi povis esti utila sur la ŝipo, kaj de tiu tempo mi estis la helpanto de la kuiristo, kun kiu mi baldaŭ amikiĝis kaj kiu instruis al mi pri multaj nomoj de objektoj en la kuirejo kaj sur la ŝipo, sed interparoladi ni povis nur malbone. La maristoj kaj eĉ la kapitano kaj la eminenta sinjoro, kiu estis la kuracisto, estis ĉiam tre aĉablaj al mi kaj la tuta ŝipanaro nomis min Jafet, kredante, ke tio estas mia nomo. Komence mi miris pri tio, sed poste mi eksciis, ke la doktoro el miaj vortoj estis kompreninta, ke mia nomo estas Jafet. Mi kontentigis pri ĝi kaj ĉar mi ĝis nun tute ne havis nomon, krom „knabo“, mi decidis gardadi ĝin.

Nia ŝipo estis trjasta skuno. De kie ĝi venis kaj kien ĝi estis velveturanta, mi komence ne povis ekscii, ĉar demandante tion, mi ricevis respondojn, kiujn mi ne bone komprenis. Post kelkaj tagoj la kuiristo komprenigis al mi, ke ĝi venis de Londono kaj estis velveturanta al Patersburgo*.

Ĉu Patersburgo estis urbo, lando aŭ io alia? Li ne povis respondi al tiuj demandoj, ĉar li ne min komprenis.

* La leganto ne miksu „Patersburgo“ kun „Petersburgo“.

lutage li prezentis al mi grandan arĝentan moneron, kiun mi rigardis kun surprizo, ĉar ĝi estis al mi tute fremda. Kiam mi volis redoni la moneron, li diris, ke tiu mono estas la mia. Tiam mi eliris mian saketon kaj montris mian nikelan monon.

Dum nia vojaĝo la vetero estis ĉiam bela kaj la tagoj pasis rapide, ĉar mi laboris kun plezuro. Ankorau trifoje la kuiristo donacis al mi grandan moperon, kaj ĉiufoje mi metis ĝin en mian saketon.

Kiom da tagoj mi pasigis sur la ŝipo, mi ne scias, ĉar mi ne kalkulis ilin. La estonto tute ne igis min maltrankvila, ĉar ĉio marŝadis bone. Mi ne pensis pri tio, ĉu mi restus sur la ŝipo aŭ ĉu mi forlasus ĝin, post kiam ni alvenus en urbo; tio ja dependus de cirkonstancoj, kaj kun konfido mi iris renkonte al la vivo, kiun por mi rezervis la sorto. Mi jam ne dormadis en tiu sama ĉambreto, kie mi pasigis la unuan tagon, sed en lito tuj post la kuirejo. En tiu dormejo estis du litoj, unu sub la alia. La kuiristo dormadis sub mi, sed feliĉe li ne ronkadis.

Post longa vojaĝo nia ŝipo alvenis en haveno de granda urbo kaj mi komprenis tiam, ke tiu urbo estas Patersburgo, ĉar ofte mi aŭdis elparoli tiun nomon.

La haveno estis plena je ŝipoj ĉiuspecaj. Mi vidis skunojn, fregatojn, vaporsipojn. Ĉie malgrandaj boatoj kun maristoj sin movadis inter ili por remi urbon aŭ por returni sin al la ŝipoj.

Nia skuno kuŝis proksimume tricent paŝojn distance de la kajo, kaj klare mi povis vidi la vicojn de domoj sin etendantaj dekstren kaj maldekstren. Sidante sur kesto mi rigardadis ĉion kun scivoleco; estis ja la unua fojo, ke mi vidis urbon kaj mi jam deziris eniri ĝin. Mi pripensadis tion kaj ekpensis, kion faras ĉiuj tie loĝantaj homoj, ĉar ĉiuj ne povus esti maristoj, ŝufaristoj

aŭ bakistoj; pri aliaj metioj mi aŭdis nur malmulte. Jam tutan horon mi kun atento rigardis ĉion tie sur la stratoj kaj en la haveno, kiam iu frapis min sur la ŝultron. La kuiristo staris apud mi, sed ĉe la unua ekrigardo mi ne lin rekonis. Li portis nigran vestaĵaron kaj ĉapelon kaj en la mano li havis bastonon. Samtempe mi ekvidis, ke du aliaj maristoj malsupreniris ŝnurŝtuparon, kiu pendis sur la flanko de la ŝipo kaj kiu kondukis al boato tuj apud nia ŝipo. La maristoj estis remontaj al la kajo por viziti la urbon. Mi montris la boaton. La kuiristo komprenis, ke mi deziris iri kun la maristoj kaj puŝante min al la ŝtupareto, li helpis min malsupreniri. Li sekvis min kaj jen ni kvarope sidis en la boato. Mi ĝojis, ĉar fine mi vizitos urbon. Jam dufoje mezvoje al Patersburgo mi vidis en malproksimeco du urbojn; mi memoras, ke la kuiristo nomis ilin Kopenhago kaj Malmö, sed ni ne jetis tie la ankron por ekhalti, tiel ke neniu el la maristoj povus remi al ili.

Kiam mi antaŭe pripensadis pri urboj, mi ĉiam imagis, ke ili konsistas el mirinde belaj stratoj, tiel puraj kiel la plej pura planko kaj ke la domoj estas bele pentritaj kaj aspektas kiel mi vidis ilin sur la bildoj de „Mil kaj unu noktoj“. Jam post la unua paŝo sur la kajo mi tamen ekvidis, ke mi eraris. La stratoj de Patersburgo estis plenaj je polvo kaj malpurajo kaj la domoj estis malnovaj; anstataŭ bele pentritaj, ili tute ne estis pentritaj, sed ŝajnis al mi nuraj amasoj da ruĝaj ŝtonoj.

Ni iris kune tra labirinto de mallargaj stratoj kaj post duona horo la du maristoj iris sian propran vojon kaj lasis la kuiriston kaj min solaj. Ni do iris duope plue. Mi vidis objektojn, kiuj estis al mi tute fremdaj kaj bestojn, kiujn mi antaŭe neniam vidis. Tre mi miris pri bicikloj, ĉevaloj kaj precipe pri veturiloj, kiuj veturis antaŭen

sen ĉevalo, sed mia miro atingis la plej altan gradon, kiam mi vidis hundojn. Ŝajnis al mi, ke ili estas pen-
tritaj, ĉar ilia koloro estis tre malsimila al tiu de Jafet.
Mi tamen ne povis informiĝi, ĉar la kuiristo ja ne kom-
prenus min. Silentante mi tial iris ĉe lia flanko. Vestite
kiel kuiristo, li estis malbela viro, sed en siaj nigraj
vestoj li estis ankoraŭ multe pli malbela. Liaj maldikaj
kruroj faris tre longajn paŝojn kaj ĉe ĉiu dua paŝo li
levis sian bastonon kaj remetis ĝin sur la straton, post
kio li faris du aliajn paŝojn. Mi miris, kial li faris tion.
Intertempe ni daŭrigis nian vojon kaj mi demandis al
mi, kien ni iras. Sur la stratoj iris multaj homoj, kiuj
ne atentis sin reciproke. Kelkaj buboj kriis al ni, post
kiam ili pasis nin, kaj la kuiristo montris kolerantan
vizagon, sed li diris nenion kaj daŭrigis kun mi la pro-
menadon. Ni trairis jam multajn stratojn kaj mi miris,
ke unu urbo povas enhavi tiom da domoj kaj tiom da
homoj kaj vole nevole mi pensis pri Johano kaj Ham-
burgo. Mi tamen ne estis en Hamburgo, sed en Paters-
burgo; mi ne promenis kun Johano, sed kun malbel-
forma kuiristo, kiun mokis la buboj kaj kiu tamen estis
bona viro. Li estis doninta al mi tri grandajn monerojn
kaj estis montrinta per tio, ke li tute ne estas avarulo.

Fine ni venis en larĝan straton kun altaj domoj, kiuj
aspektis pli puraj. Mia akompananto eniris en unu el
ili, kies pordo staris nefermita. Mi sekvis lin kaj ni
estis en speco de butikoj, kie multaj objektoj, kiel
ekzemple tabakujoj, cigaringoj, tabako, cigaroj kaj cetere
estis aĉeteblaj. La kuiristo aĉetis novan pipon kaj
tabakon kaj demandis al mi, ĉu mi deziras pipon, sed
mi malakceptis, ĉar mi ne povis fumi. Sur la Insulo
fumis nur mia patro. Spite mia malakcepto li aĉetis
por mi maldikan bastonon. Paginte li forlasis la butikon
kaj mi refoje sekvis lin. Mi ekprenis mian bastonon

kaj volis imiti per ĝi la movadojn, kiujn per la sia faris la kuiristo, sed ho ve! Jam post malmultaj paŝoj ĝi glitis inter la ŝtonojn de la strato; mi ne rimarkis tion kaj kiam mi faris paŝon antaŭen, la bela donaco de la kuiristo subite rompiĝis. Peco restis inter la ŝtonoj kaj la pli longan pecon mi tenis en la mano. Mia akompananto laŭte ridis. Mi ridis ankaŭ, kvankam mi bedaŭris, sed kuiris miajn pizojn. Mi eltiris mian tranĉilon kaj fortranĉante la splitojn, mi promenadis plue kun mia plimallongigita bastono. La kuiristo komprenigis al mi, ke li volas aĉeti alian, sed mi ne akceptis, ĉar la mia estis sufiĉe longa. Kelkfoje ni ekhaltis antaŭ belaj butikoj, sed plej multe mi admiris dikan altan turon en la mezo de kvadrata placo. Estis la unua fojo, ke mi vidis la malsupran parton de turo. Mi tamen ankaŭ esplorigardis la supran parton por vidi la sonorilon, kiu ja ĉiam sonoradas, kiam homoj iras preĝejon, sed mi ĝin ne vidis. En tiu momento mi ekaŭdis post mi laŭtan bruadon kaj turnante min, mi ekvidis aron da rajdantoj sur ĉevaloj. Mi ekhaltis por rigardi ilin pli bone. Ĉiu rajdanto havis longan lancon en la mano kaj portis altan ĉapelon faritan, kiel mi supozis, el pentrita kaprina felo. Daŭris longan tempon antaŭ ol la lasta preteriris kaj ni refoje ekpromenis.

— Kozakoj! — diris la kuiristo.

Mi do vidis aron da kozakoj. Kvankam mi promenis jam pli ol unu horon, la stratoj ne finiĝis, sed ŝajnis al mi, ke ni fine alvenis al nia celo, ĉar la kuiristo refoje eniris domon. La pordo, tra kiu ni eniris, estis alta kaj ĉe la vestiblo mi vidis virinon, al kiu la kuiristo parolis kelkan tempon. Ŝi fingre montris antaŭ sin kaj ni sekvis la direkton, kiun ŝi estis montrinta. Ni laŭiris longan koridoron, ĉe kies du flankoj estis multaj pordoj. Flanke de ĉiu staris pentrita litero aŭ ciferoj.

Fine la kuiristo trovis la numeron, kiun li serĉis. Li malfermis la pordon kaj eniris. Ni troviĝis en ĉambreto, kie maljuna virino sidis laboranta ĉe tablo. Apenaŭ ŝi vidis nin, ŝi ^{salte} levigis kaj falis sur la kolon de la kuiristo, kiu ŝin kisis. Post tiu kora saluto ni sidiĝis kaj la virino, kiu estis tre ĝoja, komencis paroli kun la kuiristo, kiu laŭ mia opinio estis ŝia filo. Ili multe parolis pri mi kaj la virino regalis min per kuketoj, buterpanetoj kaj kafo kun sukero. Kvankam mi ne malsatis, mi manĝis por fari al ŝi plezuron. Ŝi karesis miajn harojn, ridetis kaj estis tre feliĉa, ĉar ŝia filo revenis. Ni restis longan tempon, post kiu la kuiristo ekstaris por foriri kun mi. Antaŭ ol foriri el la ĉambreto, li donis al sia patrino multan monon, kiun ŝi metis en ŝrankon. La maljunulino akompanis nin ĝis la alta pordo kaj mansalutis nin ankoraŭ multajn fojojn; poste ni refoje estis sur la strato. Fine ŝia salutanta mano malaperis kaj ni daŭrigis nian vojon tra la labirinto de stratoj. Ĉu ni iris returnen al la haveno aŭ ĉu ni iris laŭ aliaj stratoj pli malproksimen en la urbo, mi ne sciis, ĉar preskaŭ ĉiuj stratoj similis unuj la aliajn, sed momenton poste mi kredis esti en strato, ke ni estis antaŭe. Mi aŭdis zumadon de voĉoj en unu el la domoj kaj en tiun eniris la kuiristo. Mi sekvis lin kaj ni estis en salono, kie staris longaj benkoj kun tabloj. Multaj homoj sidis tie kaj tie ĉi kaj laŭte interbabilis, ridis kaj trinkis flavan aŭ blankan likvoron. Post longa bufedo staris dika viro, kiu plenigis glasojn, dum alia viro disportis ilin al la sidantoj. Mi estis en marista trinkejo.

— Ivan! . . . Ivan! . . . — subite kriis voĉo.

— Ivan! . . . Ivan! . . . — kriis aliaj kaj Ivan, kiu estis mia akompananto, levis ambaŭ manojn, kunfrapadis ilin kelkajn fojojn kaj laŭte ridis; tiam li aliris al kelkaj homoj, sidantaj kune ĉe la sama tablo, kaj donis al ili

la manon. Ili salutis sin reciproke, post kio unu el ili fingre montris min, demandante ion, kio plengorĝe ridiĝis la aliajn. Ivan ridis ankaŭ, sidiĝis kaj ekrakontis, ĉiufoje rigardante min, kaj ĉar la aliaj ankaŭ rigardis min kun videbla surprizo, mi konjektis, ke la kuiristo rakontis, kiel liaj samsipanoj trovis min sur la maro kaj ke neniu scias ankoraŭ, kiu mi estas kaj de kie mi venis. Ĉiuj aŭskultis kun intereso kaj kiam mia amiko Ivan eksilentis, unu el la aliaj direktis kelkajn vortojn al la maristoj, kaj ĉiuj laŭte aplaŭdis. Intertempe la disportanta viro de la trinkejo estis metinta antaŭ Ivan glason da akvokolora likvoro, kiun li malplenigis tuj; post tio la disportisto alportis du glasojn, unu por Ivan kaj unu por mi. Mi gustumis la likvoron, sed kun abomeno elkraĉis ĝin, ĉar ĝi tiel brulis mian buŝon, ke larmoj eniris en miajn okulojn. La maristoj tre sin amuzis. Ŝajnis tamen, ke Ivan tre amis tiun trinkadon, ĉar li trinkis multajn glasetojn da ĝi kaj fariĝis tre gaja. La maristo, kiun oni tiel brue estis aplaŭdinta, nun ekstaris kaj ĉiuj rigardis lin. Mi estis tre scivola pri tio, kion li faros. Li flanken ŝovis kelkajn benkojn, tiel ke malplena loko formiĝis sur la planko. Tiam li eksidis sur unu kalkano kaj ĵetante antaŭen la alian kruron, li komencis danci laŭ stranga maniero. Jen li saltis antaŭen, jen malantaŭen, dum liaj kalkanoj laŭvice kaj laŭtakte tuŝis la plankon. Jen li subite ekstaris, turnis sin ĉirkaŭ si mem kaj dancis refoje antaŭen kaj malantaŭen, maldekstren kaj dekstren, de tempo al tempo kunfrapante la manplatojn post si kaj antaŭ si; tiel li dancis kelkan tempon dum ĉiuj maristoj en la salono atente lin rigardadis. Fine li haltis kaj eksidis, laŭte aplaŭdante de ĉiuj rigardantoj. Li fariĝis ruĝa pro forteca streĉado kaj eltrinkis la enhavon de granda glaso plena je bruna likvoro. Tiam li demetis la ĉapon kaj

iris preter la viroj, kiuj ankoraŭ staris ĉirkaŭ la loko, kie li estis dancinta. Al ĉiu li etendis la ĉapon kaj ĉiu enĝetis moneron el arĝento. Mi tre miris pri tio, sed miris ankoraŭ pli multe, kiam li iris al mi, deprenis mian ĉapon kaj enŝutis la tutan kolektitan monsumon. Mi rigardis la dancinton kun surprizo kaj ĉiuj laŭte ridis. Ivan per gestoj diris al mi, ke tiu mono estas mia kaj tirante la saketon el mia poŝo, li enŝutis en ĝin la monerojn, kiujn la dancinta maristo perlaboris por mi. Mi estis tre emociita, enpoŝigis la saketon, sed ne sciis kiel danki mian bonfarinton; mi do prezentis al li mian manon, kiun li forte premis. La maristoj estis tre soifaj kaj trinkis multe, sed neniu tiom kiom Ivan, kiu tre ŝatis tiun akvosimilan likvoron. Li eltrinkis almenaŭ ses aŭ sep glasetojn kaj post ĉiu glaseto li fariĝis pli gaja. Lia ĉapelo sidis malrekte sur liaj haroj kaj liaj okuloj fariĝis vitrece ruĝaj. Fine li ekkantis kaj eĉ penis danci, sed en tio li malsukcesis, ĉar jam post la dua paŝo li falis sur la plankon, laŭte aplaŭdate de ĉiuj maristoj. Li tamen tuj ekstaris, sed trovante, ke liaj kruroj estas tro malfortaj por danci, li sidiĝis, trinkis kaj kantis, kelkfoje frapetante miajn ŝultrojn. Mi miris pri lia konduto; mi ja ne sciis, ke li estas ebria, ĉar ebrian viron mi ankoraŭ neniam vidis.

La dancinta maristo post kelka tempo foriris kun multaj aliaj, nur malmultaj restis en la trinkejo. Mi ĝojis, kiam Ivan fine ankaŭ leviĝis, pagis kion li ŝuldis kaj foriris kun mi.

Post kiam Ivan trinkis la glasetojn da akvokolora likvoro, li ŝajnis tute alia viro. Antaŭ tiu tempo li marŝadis kiel kuraĝa soldato kaj manuzis la bastonon en lerta maniero, kvazaŭ li estus la plej eminenta sinjoro el la urbo, sed trinkinte tiun likvoron, li apenaŭ povis marŝi; li apogis sin sur la bastono, kaptis mian ŝultron por ne perdi la egalpezon, kaj liaj piedoj tiel mallaŭtakte sin movis jen antaŭen, jen flanken, ke

mi ekmiris pri lia malforteco kaj timis, ke li subite ek-
malsaniĝis. Mi tre lin kompatis kaj kiam mi rigardis
en liajn vitrecajn okulojn, mia kompato fariĝis ankoraŭ
pli granda. Li volis paroli, sed ekparolis lingvon an-
koraŭ pli strangan ol ordinare. Li balbutis en teruriga
maniero, sed parolis, kvazaŭ mi komprenus ĉion, kion
li diris. — Ho, se mi nur estus ĉe la haveno! — mi
pensis, sed la haveno estis laŭ mia opinio tre malprok-
sima kaj la fortoj jam ekforlasis la kompatindulon. Kel-
kaj buboj mokis lin kaj Ivan ekhaltis, rigardis la mo-
kantojn per siaj vitrecaj okuloj kaj minacis ilin per la
bastono, pro kio ili tre sin amuzis. Lia brako tiel peze
ripozis sur mia ŝultro, ke mi nur kun peno restis sta-
ranta. Mi volis iri plue, sed ĉar la buboj denove
mokis lin kaj montris sian langon, la kuiristo tiel furioz-
iĝis, ke li lasis min por bati la mokantojn, sed ho ve!
li falis sur la genuoj, post kio la buboj mokridis. Mi
tamen sukcesis starigi lin kaj ni jam estis daŭrigontaj
nian vojiron, kiam aliaj buboj alkuris, kiuj siavice mo-
kadis la ebrian kuiriston. Li jam ne klopodis bati ilin,
ĉar li timis fali, sed balbutante kaj minacante la bubojn
per la bastono, li iris plue. Tuj apude estis butikio
kun granda vitro, post kiu estis elmetitaj komercaĵoj. Ĉiam
balbutante kaj irante kvazaŭ li estus luvanta boato, li alpaŝis
al tiu vitro kaj rigardis internen. Tie interne staris du
junaj virinoj, kiuj ne povis ne ridi pri la strangaj gestoj
kaj paŝoj de la maristo. Li per sia bastono ankaŭ
minacis ilin kaj ili paŝis posten, sed tuj poste aperis
sur la sama loko sinjoro. Li per ordona voĉo diris
kelkajn vortojn, kiujn la kuiristo tuj respondis, svingante
sian bastonon. Mi tiel ektimis, ke mi lasis mian amikon.
La buboj kriis pli kaj pli laŭte per mokantaj vortoj.
Ivan sin turnis por denove minaci ilin. Intertempe
aro da scivolaj homoj kaj virinoj amasiĝis antaŭ la

butiko por vidi, kio okazas. Ĉiuj ridis kaj sin amuzis. Mi tute ne sciis, kion pensi pri Ivan. Li sendube ne estis danĝere malsana (mi pensis), ĉar la homoj ne kompatis lin.

Inter la rigardantoj staris du sabre armitaj viroj, kiujn mi kredis esti soldatoj. Ili nur ridetis, sed diris nenion. Laŭ mia opinio ili ne estis policanoj, ĉar alie ili ja forpelus la netaŭgajn knabojn. Ĝuste la saman tempon, kiam Ivan sin turnis, alvenis du knaboj, el kiuj unu portis sur la brako korbon kun ovoj. Ili partoprenis la ĝeneralan ĝojon. Ivan jen minacis la sinjoron en la butiko, jen la bubojn. La butikisto fine aperis sur la sojlo de la butiko kaj diris kelkajn vortojn al la armitaj viroj, kiuj tamen ŝajnigis sin surdaj, ĉar ili faris nenion por silentigi la bubojn, nek por forkonduki la minacantan mariston. Ĉi tiu fariĝis pli kaj pli furioza kaj svingadis la bastonon, kvazaŭ li estus tuj ĵetonta ĝin al la ridanta homamaso. Subite ovo flugis tra la aero, priskribis belan duoncirklon kaj trafis la kuiriston ĝuste sur la nazon, kie ĝi disrompiĝis. Laŭtegaj ridegoj kaj kriegoj eksplodis ĉiuloke. La trafito kriegis kiel sovaĝulo, faris paŝon antaŭen por sin ĵeti sur la bubojn, sed faletis kaj lasis fali la bastonon. Li turnis sin por serĉi, kie ĝi falis, sed perdis la egalpezon kaj falegis, kapo antaŭen, tra la granda vitro. Laŭta tintado de rompiĝintaj pecoj de la vitro trafis miajn orelojn. La buboj kuris for kaj jen mi vidis la kompatindan kuiriston. Liaj kruroj pendis el la fenestro kaj la cetera parto de lia korpo kuŝis sur la elmetitaj komercaĵoj. Li tiris la krurojn post sin kaj jen li sidis sur la elmetejo. Li estis vundita sur la manoj kaj la vizaĝo, kaj momenton poste lia vizaĝo estis sangkovrita. Li jam ne parolis, sed rigardis ĉirkaŭe kvazaŭ ne sciante kio okazis. Mi staris je kelka distanco, sed ne

kuraĝis aliri al li, timante ke la butikisto farus al mi malbonon. La du armitaj viroj iris en la butikon kaj deŝiris Ivan de la elmetejo. Jen li staris kaj volis foriri, sed la butikisto retenis lin kaj laŭta disputo fariĝis inter li kaj la armitaj viroj. Fine tiuj ĉi kaptis la vunditan mariston ĉe la brakoj kaj trioje, Ivan en la mezo, ili forlasis la butikon kaj sekvate de la buboj, kiuj estis revenintaj, trairis kelkajn stratojn, ĝis kiam ili alvenis al granda konstruaĵo, antaŭ kiu staris du soldatoj kun paŝiloj. Granda pordo malfermiĝis, Ivan kun la armitaj viroj eniris kaj la pordo refermiĝis post ili. Mi volis ankaŭ euri, sed unu el la soldatoj forpelis min. Estis al mi klare, ke la kuiristo sin trovis en malliberejo kaj jen mi staris en la granda Patersburgo kun sufiĉe da mono en mia poŝo, sed sen alia helpo. Mi ekploris, sed pensante al Johano, mi forviŝis la larmojn, ĉar li ĉiam kuiris siajn pizojn, mi volis fari tion saman. Mi decidis atendi kun pacienco, ĝis kiam la triopo revenus, sed kiel granda estis mia disreĝo, kiam post momento revenis nur la armitaj viroj. Kial Ivan ne revenis ankaŭ? Ĉu li restus post tiu granda pordo? Volonte mi demandus pri tio al la du viroj aŭ al la gardisto, sed ili ja ne komprenus min. Antaŭsentante, ke pli longa atendo ĉe tiu pordo estus vana, mi pripensis kion fari kaj decidis reiri al la haveno por konduki unu el la ŝipanoj al la soldato, por ke ĉi tiu povu informiĝi, kial Ivan ne forlasis tiun grandan konstruaĵon. Mi do ekmarŝis, sed tuj ekhaltis; kien mi devus direkti la paŝojn? Tion mi ne sciis kaj informiĝi pri la vojo al la haveno mi ne povis, ĉar neniu komprenus min. Pli ol iam mi spertis, kiel maloportune al mi estis ne povosci paroli la lingvon de la urbanoj, en kies mezo mi troviĝis. Mi estis kiel surdmutulo inter miloj da homoj. Kiu helpus al mi? Mi rigardis ĉirkaŭe, ĉu okaze maristo preteriras, por ke

mi povu lin sekvi; eble li ja irus al ia ŝipo en la haveno kaj pere de li mi povus trovi la mian. Mi atendis, ĝis preteriris persono, kiu laŭ la eksterajo ŝajnis al mi esti maristo, kaj mi sekvis lin je kelka distanco. Longan tempon mi denove iris tra multaj stratoj, kiuj estis pli belaj ol tiuj, kiujn mi ĝis nun vidis. La supozita maristo ne iris havenon, sed ekhaltis antaŭ domo, kies pordon li malfermis per ŝlosilo. Li malaperis post tiu pordo kaj kun li mia espero, baldaŭ trovi mian skunon. Lian revenon mi ne atendis, sed iris plue tra tre belaj stratoj kaj laŭlonge de ĝardenoj. Pli ol centfoje mi ekaŭdis pri ĝardeno, sed nun mi vidis unu kun veraj arboj kaj eksidante sur pordo de unu el tiuj ĝardenoj, mi admiris la arbojn kaj la florojn. Sur multaj lokoj staris pentritaj benkoj, kie sinjoroj kaj sinjorinoj sidis. Vole nevole mi ekmemoris Johanon, kiu, kiel li skribis, post promenadoj ripozis sur tia benko en Hamburgo. La postajn tagojn mi eble ankaŭ ripozus sur benko. La postajn tagojn! . . . Min subite ekfrapis la penso, ke jam alproksimiĝanta nokto antaŭiris la unuan postan tagon. Kie mi devus pasigi tiun unuan nokton? Johano dormadis sub ponto aŭ en sia subtegmentejo. Sed ponton mi ne vidis kaj subtegmentejon mi ne havis en ĉi tiu urbo. Nur monon mi havis, kaj eĉ plenan sakon, sed kiel mi devus lui ĉambreton (kvar- aŭ kvinetaĝan); kiel mi komprenigus, ke mi deziras lui unu? Jen refoje la barilo, la nesciado de la lingvo sin prezentis. Spite ĉio mi tamen devis ie pasigi la unuan nokton, kaj mi ekserĉis. En tiuj ĝardenoj mi ja ne povus kuŝi, sekve mi iris plue, ĉiam plue por serĉi. Jam ekvesperiĝis, mi do devus rapidi kaj ne perdi tempon. Post longa marŝado mi rimarkis ĝardenon, kiu estis tute ĉirkaŭita de alta muro. Ĝardeno ĝi nepre estis, ĉar mi vidis la suprojn de arboj

supre de la muro. Mi laŭiris la muron kaj trovis feran barpordon, kiu staris duone fermita. Mi rigardis internen. Granda ĝardeno kun multaj arboj ĉe ĉiuj flankoj sin etendis antaŭ miaj okuloj kaj en la malproksimeco apud la muro mi rimarkis malaltan dometon. Mi iris tra la barpordo kaj ekpromenis. Nenie mi vidis homojn. Ĉiuloke sur la herbo staris krucoj el marmoro aŭ el ligno kun oraj surskriboj, kaj malgrandaj malaltaj tegmentformaj montetoj ŝajnis dissemitaj ĉiuloke inter la krucoj. Mi iris plue tra vojetoj bele rastitaj kaj miris pri la multaj girlandoj, kiuj kuŝis sur kelkaj montetoj aŭ pendis sur krucoj. Plej multe frapis min la granda silento, kiu regis ĉie. Nur kelkaj birdoj kantetis sur la arboj, sed krom tio mi aŭdis nenion. Mi pensis, ke la posedanto de tia ĝardeno estus tre riĉa sinjoro, sed samtempe mi ekmiris, ke la bela multekosta ĝardeno estis tute forlasita. Promenante plue preter benketoj, mi atingis la dometon. Ĝi estis preskaŭ malplena. Pentraĵoj malestis same kiel fotografajoj aŭ spegulo. Nur ŝnuroj tre dikaj kaj kvar fosiloj kuŝis ĉe unu muro, kaj ĉe la kontraŭa muro staris sur la sabla planko du tre strangaj objektoj el nigre pentrita ligno. Ili similis malaltajn benketojn kaj estis forportebblaj per du elstarantaj lategoj, najlitaj ĉe la du plej longaj flankoj. Sur ĉiu benketo kuŝis nigra tuko.

En ĉi tiu dometo mi decidis dormi, sed ĉar estis ankoraŭ tro frue, mi eliris por promenadi, ĝis kiam mi fariĝus dormema. Mi sekve promenadis tra la mallarĝaj vojetoj preter krucoj kaj montetoj, sidigis de tempo al tempo sur benko por kviete rigardi la belan ĉirkaŭaĵon. Fine mi laciĝis kaj eksentis, ke la dormo ekatakas min, kaj mi reiris al mia dometo. Mi kuŝiĝis sur unu el la malaltaj benketoj, kovris min per la nigra tuko, fermis la okulojn kaj baldaŭ ekdormis.

Sesa Ĉapitro.

Mi imitas filozofon — Mi klopodas „kuri miajn pizojn“ —
Mia lito malaperas — Nova dormejo — La kvar strangaj
„kesto“ — Mi serĉas laboron, sed ne ĝin trovas — La nova
„kesto“ — Miaj piedoj estas malsekaj — Nova hejmo — Mi
estas lavata — La familio Romeskaŭ — Kiel mi silabas —
Mi aŭdas muzikon — Kio mi volas fariĝi.

La postan matenon mi vekigis jam frue. La plej granda silento ĉirkaŭis min, kiam mi sidigis sur mia benko por pripensi kion fari. Mi memoris, ke Johano sin nomis „filozofo“, ĉar li ĉiam agis laŭ cirkonstancoj. Mi tuj decidis sekvi lian ekzemplon, sternis la nigran tukon sur la benko kiel mi estis trovinta ĝin, kaj eliris eksterdomen.

Sur la Insulo kaj sur la ŝipo mi kutimadis lavi min ĉiumatene, sed ĉar en mia nuna dormejo sin ne trovis akvo, mi devis eliri nelavita. Tion mi trovis negrava, ĉar mi jam lavis min tiom da fojoj dum mia vivo; kaj ĉar mia dometo estis pura, mi imagis, ke neniu povus vidi, ke mi en ĉi tiu mateno ne lavis min. Cetere, povus ja okazi, ke mi iel renkontus akvon, kaj tiam mi lavus min tuj. La vetero estis mirinde bela kaj la birdoj kantadis pli bele ol la antaŭan vesperon. Min ravis ilia kantado, kaj eksidinte sur benko tuj apud mia dometo, mi aŭskultis. Neniam dum mia tuta vivo mi estis aŭdinta muzikon, sed multfoje mia patrino legis pri ĝi. Tiu kantado de la birdoj sonis en miajn orelojn, kvazaŭ ĝi estus muziko. Pensante ke mi same bone povus

aŭskulti promenante, mi ekpromenis kaj trairis multajn vojetojn, ĝis kiam mi atingis la grandan kradpordon. Ĝi staris nefermita kaj mi eliris la ĝardenon. Ŝajnis al mi strange, ke la posedanto ne fermis tiun pordon, ĉar se tio ne estis necesa, li ja ne bezonus ĉirkaŭigi la ĝardenon per alta muro. Kio ajn estus, mi ne komprenis tion, sed jam ne pensante pri ĝi, mi promenadis plue.

Johano ĉiumatene promenadis en la urbo Hamburgo kaj aĉetadis panojn kun sekvinberoj. Mi volis imiti lin kaj promenante serĉis butikon por havigi al mi tiajn panetojn. En la stratoj, kiujn mi estis trairinta, nenie estis panbutiko; mi sekve devis serĉi en aliaj stratoj. Sed timante perdi la vojon al mia dometo, mi bone atentis, kien mi direktis miajn paŝojn. En flankata strateto mi fine rimarkis, kion mi serĉis, kaj feliĉa, ke mi ne bezonus marŝi tra pluaj stratoj, mi eniris la butikon. Post ligna tablo, kiu aspektis kiel longa kesto, sidis dika juna virino kun ruĝaj vangoj. Ŝi afable ridetis kaj demandis ion al mi; anstataŭ respondi mi ankaŭ ridetis kaj montris kelkajn sekvinberajn panetojn. Ŝi metis du el ili sur la tablon antaŭ mi, sed mi montris al ŝi kvin fingrojn, komprenigante per tio, ke mi bezonas kvin panetojn. Ŝi rigardis min kun kompatado, verŝajne ŝi kredis min surdmutulo, kaj elpoŝigante mian tutan trezoron, mi elprenis plenmanon da moneroj kaj etendis al ŝi mian manon. Ŝi rigardis min kun miro, ekzamenis la nikelajn monerojn kun atento, remetis ilin sur mian manplaton kaj elektis unu el la moneretoj el arĝento, kiujn al mi estis doninta la dancanta maristo. Mi prenis la kvin panetojn kaj eliris, ekstere mi enpoŝigis mian monujon. Rigardante malantaŭen al la afabla virino, mi vidis, ke ŝi salutas per la kapo ĉiam ridetante, kaj mi decidis tuj, ĉiam aĉeti miajn panetojn en tiu butiko. Returnante

min laŭ la samaj stratoj, kiujn mi bone ekmemoris, mi eksidis sur benko en unu el la belaj parkoj kaj manĝis du panetojn, kiujn mi, same kiel Johano, trovis bongustaj.

Ĉe miaj gepatroj kaj sur la ŝipo mi kutimis trinki kafon aŭ lakton je la matenmanĝo, kaj mi rigardis ĉirkaŭe, ĉu laktvendisto preteriras, por ke mi povu aĉeti iom da lakto, tute ne pensante pri tio, ke mi ne posedis laktujon. La sorto ne estis favora al mi, ĉar vendisto de lakto ne prezentis sin. — Nu — mi pensis, — aliloke mi ja trovos okazon por trinki, ĉu pagante ĉu senpage. Mi sciis, ke akvo kostas nenion, kaj mi esperis trovi ie puton por trinki senpage. Mi enpoŝigis la tri restintajn panetojn por manĝi ilin en la tagmezo aŭ poste (tio dependus de cirkonstancoj, kiel dirus Johano), kaj kviete mi rigardis la ĉirkaŭaĵon. Multe da preterpasantoj jam ne interesadis min, sed de tempo al tempo mi vidis personojn, bestojn aŭ objektojn, kiuj al mi estis tute fremdaj. Promenante kun la kuiristo (kompatinda viro; li eble sidis aukoraŭ en tiu granda konstruaĵo), mi estis vidinta pentritajn hundojn, kaj nun, sidante sur benko, mi vidis pentritajn katojn kaj eĉ pentritan bovinon, kiun pelis antaŭ si homo kun blanka antaŭtuko. Mi vidis eĉ pentritan sinjorinon, kaj pri ŝi mi miris plej multe. Tiu sinjorino, kiu promenis kun tre bela knabino, kiu ne estis pentrita, okaze sidiĝis sur mia benko, sed kiel eble plej malproksime de mi. Ŝiajn vangojn kovris dika tavolo da ŝmiraĵo. Ekvidante, ke mi rigardas ŝin kun miro, ŝi leviĝis kaj foriris kun la knabino.

Sur mia Insulo mi neniam vidis duradajn veturilojn (veturilojn ni tute ne havis, kaj en la libroj mi vidis nur kvarradajn), sed en Patersburgo miloj da viroj, virinoj kaj geknaboj veturis sur ili. Johano nomis ilin bicikloj. Mi trovis ilin tre amuzaj, sed ŝajnis al mi, ke estas

malfacile veturi sur tiuj du radoj kaj mi demandis al mi, ĉu mi povus lerni pieduzi ilin. Tiel rigardante kaj pensante, mi pasigis longan tempon kaj tiam mi denove ekpromenis.

Bedaŭrinde mi ne povis legi, alie mi irus al legsalono, same kiel Johano en Hamburgo. Sed por rigardi pentraĵojn, oni ne bezonas la legarton; mi do povus eniri muzeon, sed kie ĝin trovi? Mi ne povus informiĝi pri la vojo tien, nek pri la loko, kie mi povus auskulti koncerton, ĉar tiu sama barilo, la nesciado pri la lingvo de la Patersburganoj malebligis tion al mi. Ho, se mi nur povoscius paroli kiel la urbanoj, tiam sen dubo mi fariĝus filozofo kiel Johano; tiam mi povus lui subtegmentejon kaj ludi en la teatro; sed antaŭe mi devus studadi, sed kiel? Mi ja povus diri al neniu, ke mi deziras studadi. Ĉiuj tiaj pripensoj amasiĝis en mia kapo, kaj timante, ke fine min ekkaptus kapdoloro, mi decidis „kuiiri miajn pizojn“ kaj kviete atendi. La sorto ja helpus al mi, kaj provizore min kontentigis la penso, ke mi posedas dormejon por pasigi la noktojn, monon por aĉeti sekvinberpanojn kaj liberan tempon por promenadi laŭ deziro; kaj mi promenadis laŭdezire, ripozante en intertempoj sur benko, manĝante sekvinberajn panetojn, kiujn mi ĉiutage aĉetis de la afabla ruĝvanga virino, kiu baldaŭ konis min kaj ĉiam kredis min surdmutulo. La sperto instruis al mi, kiom mi devis pagi por kvin panetoj, kaj kun preta mono mi aĉetadis ilin en la sekvantaj tagoj, ĉiam je la sama tempo en la mateno. Ĉe puto mi trankviligadis mian soifon, tiel ke mi jam ne penis trovi laktovendiston. Kiam mi estis vespermanĝinta, mi regule iris al mia dometo, kaj refoje dormis tie sub tiu nigra tuko, kvazaŭ mi kuŝus sur mia propra lito de mia Insulo. Tiel pasis kvar tagoj. Kiam en la kvina vespero mi revenis en

mian dormejon, mi tuj vidis, ke la du benketoj kun la nigraj tukoj estis malaperintaj. Mi sekve devis dormi sur la sabla planko kaj sen kovrilo, sed ĉar la nokto ŝajnis al mi varmeta, mi resignaciis, esperante, ke mi retrovus mian tutan liton en la sekvanta vespero. Mi tamen ne povis dormi, la sablo estis tro malseka kaj malvarma kaj kiel ajn mi klopodis „kui mi miajn pizojn“, ili estis tro malmolaj, la dormo ne ektuŝis miajn okulojn kaj mi eliris la dometon por kuŝiĝi sur unu el la benkoj en la ĝardeno. Apenaŭ mi kuŝis, ne malproksime de mia domo jen subite mi aŭdis super mia kapo raŭkajn kriojn de iu birdo. Tiu birdo, kiun mi vidis, ĉar la luno lumis klare, seninterrompe eligis la saman tirtonan u... u... u! Mi ekkaptis mian bastoneton, kiu ĉiam akompanis min kaj ĵetis ĝin inter la branĉojn por forpeli la malkvietiganton de mia ripozo. Ĝi forflugis, sed residiĝis sur alia proksima arbo, kie ĝi tuj daŭrigadis turmentadi min per la samaj u... u... -krioj. Por la dua fojo mi fortimigis ĝin, sed ho ve, sur alia arbo samspeca birdo komencis blekakompani la unuan, kaj ambaŭ birdoj tiel kaj tiom plenigis la aeron per siaj krioj, ke mi preskaŭ ne dormis la tutan nokton. Fine je mateniĝo ili flugis for kaj mi ekdormis, sed du horojn poste miaj membroj estis tiel rigidaj pro malvarmo, ke mi vekigis. Mi ekstaris kaj aliris al la elirejo de la ĝardeno. La pordo tamen estis fermita, kaj mi ne povis eliri. Estis laŭ mia opinio la unua fojo, ke la posedanto de la ĝardeno fermis tiun pordon, sed esperante, ke ĝi baldaŭ estus malfermita, mi promenis plue tra multaj vojetoj, kaj alvenante la duan fojon ĉe la pordo, mi trovis ĝin nefermita. Mi faris mian ĉiutmatenan promenadon, kaj aĉetinte kvin panetojn ĉe la ruĝvangulino, mi eksidis sur parkbenko por matenmanĝi. Mi ĵus ekmordis en mian unuan paneton, kiam preteriris

viro kun ĉareto plena je fruktoj. Mi postkuris lin kaj montrante al li grandan moneron el arĝento, mi komprenigis, ke mi deziras aĉeti kelkajn pomojn. Li akceptis la moneron, donis al mi kvin pomojn kaj daŭrigis sian vojiron, gardante la tutan moneron. Mi returnis min al mia benko, estis feliĉa kun mia manĝaĵo, sed opiniis la pomojn tre multekostaj, ne komprenante, ke la vendisto estis trompinta min. Mi manĝis du el la pomoj kaj enpoŝigis la ceterajn kune kun tri panetoj por manĝi poste en la tago. Mi pensis pri la pasinta nokto kaj timis, ke mi estus devigata dormi refoje sur tiu benko sub la ĉielo. La penso ektimigis min, kaj mi vole nevole pensis pri mia lito en la gepatra domo kaj pri la liteto sur la ŝipo. Mi tamen pensis: „mi kuro miajn pizojn“ kaj agos laŭ cirkonstancoj. La ĉirkaŭaĵo, en kiu mi nun estis sidanta, jam ne interesadis min tiom, kiom la unuajn tagojn, ĉar mi jam kutimis al ĝi, kaj iom post iom mi sentis ekenuon. Trairi aliajn, al mi nekonatajn stratojn por serĉi novajn ĉirkaŭaĵojn, mi ne kuraĝis, timante, ke mi ne povus trovi mian dometon; mi sekve pasigis la tutan tagon en la parko, kaj je la vespero reiris al mia ĝardeno. Malfeliĉe la sorto estis denove al mi malfavora, ĉar la dometo estis tute malplena, kaj ĉar la sabla planko ne plaĉis al mi, mi eliris por serĉi alian dometon; la ĝardeno estis tiel granda (mi pensis), eble ie mi trovis pli oportunan dormejon. Mi serĉis longan tempon kaj jam timis ne trovi, kion mi deziris, kiam ankoraŭ pli malgranda dometo ol tiu, kiun mi forlasis, ektrafis miajn okulojn. Ĝi staris sur izolita loko en angulo de la ĝardeno post arbeto ĉe la muro kaj estis tre malalta kaj kaduka kaj pro la malmola sabla tero enprofundiĝis en ĝin preskaŭ ĝis la pinta tegmento. Mi iris ĉirkaŭ la stranga konstruaĵeto kaj trovis ŝtonan ŝtupareton kondukantan en kvarangulan

foson, kvin paŝojn malsupren. Mi malsupreniris la ŝtupareton kaj staris antaŭ ŝlosita pordeto. Mi bedaŭris, ke la pordo estis ŝlosita kaj serĉante plue, trovis ĉe la kontraŭa flanko de la dometo unu fenestron sen vitro, sed kun tri stangetoj el fero. La kadro tamen, en kiu staris tiuj stangetoj, estis tiom vermotruita kaj putrinta, ke mi per mia tranĉilo facile povis forigi ilin. Mi faris tion kaj englitis tra la kadro en la dometon. Ĝia interno estis pli malgranda kaj multe pli malalta ol tiu de mia antaŭa dometo, sed la planko estis el ligno. Ĉe ĉiu el la plej longaj muroj staris du brunaj „kestoj“, el kiuj tri estis tre malnovaj kaj verŝajne kadukaj, ĉar feraj ligiloj ĉirkaŭis ilin, por ke ili ne disfalu. Krom tiuj kestoj, kiujn mi ne kuraĝis kaj ne volis malfermi, ĉar ili ja ne apartenis al mi, nenio estis en la dometo. Mi tuj decidis pasigi tie la estontajn noktojn kaj dormis jam tie la alproksimiĝantan. La postan matenon mi rampis tra la fenestreto, ordigis poste la stangetojn, tiel ke neniu povus vidi, ke mi tuŝis ilin, kaj iris sur la stratojn por aĉeti ion, kio povus utili al mi kiel kovrilo dum la noktoj, kaj mi aĉetis specon de mantelo. La vendisto tamen postulis por ĝi tiom da mono, ke restis al mi nur unu granda monero el arĝento kaj dudek malgrandaj moneretoj. La nikelan monon, senditan de Johano, neniu volis akcepti, ĝi sekve estis al mi tute senvalora.

Ŝajnis al mi, ke Johano estas alispeca filozofo ol mi, ĉar li sin amuzis, farante nenion krom promenadi; sed tio jam ne plaĉis al mi. Mi dezirus labori, sed kiel sciigi al la homoj mian deziron? Kvar pluaj tagoj pasis kaj estis al mi, kvazaŭ ili daŭrus kvar semajnojn. Mi promenis kaj promenigis manĝis panetojn kun sekvinberoj, sidis sur la parka benko kaj dormis en mia malalta dometo sub mia mantelo kaj inter la kvar

„kestoj“, sed intertempe mia mona posedaĵo plimalgrandiĝis en teruriga maniero. Kion mi devus fari, post kiam mi estus elspezinta mian lastan moneron? Mi preskaŭ ne kuraĝis pensi pri tio, kaj malĝoje mi pasigis tagon post tago. La vetero ĉiam plimalvarmiĝis kaj mi jam ŝanĝis mian lastan arĝentan moneron, kaj kalkulante miajn restantajn moneretojn, mi kun teruro antaŭvidis, ke post du semajnoj mi posedus nenion plu krom la nikelaj moneroj de Johano, kiujn neniu volis akcepti. Kvar pluaj tagoj pasis kaj la kvinan mi decidis serĉi laboron, sed denove tiu sama barilo, la nesciado de la Patersburga lingvo, sin prezentis al mi. Tamen mi farus mian eblon, kaj enirinte butikon, kie mi vidis du personojn, kiuj post fenestro en malgranda strato riparis ŝuojn, mi penis sciigi al ili, ke mi dezirus labori ĉe ili. Komence ili sin amuzis pro miaj gestoj, sed fine ili forpelis min. Mi sciis antaŭe, ke aliaj metiistoj sammaniere forpelus min, se duan fojon mi klopodus akiri laboron, kaj plorante mi iris laŭ la stratoj kaj pasigis la noktojn inter la kvar „kestoj“. La malbona vetero fariĝis ankoraŭ pli malbona. Tagoj pasis; miaj vestoj eluziĝis kaj en unu vespero, returninte min en mian dormejon (estis ankoraŭ frue, sed jam iom mallume), mi rimarkis, ke en la plandoj de miaj ŝuoj estas truoj. Monon por aĉeti novajn aŭ por riparigi la miajn preskaŭ eluzitajn, mi ne posedis, ĉar tio kostus ja tro multe, kaj restis al mi nur sufiĉaj moneretoj por aĉeti panojn por kvin tagoj. Sed ankoraŭ ĉiam „mi kuiradis miajn pizojn“; mi esperis, ke la sorto fine iel helpus al mi.

Mi dormis refoje sub mia mantelo kaj la sekvantan matenon mi vidis, ke estis neĝinta dum la nokto. Grandaj neĝeroj disflugis ankoraŭ en la aero kaj la blanka neĝtavolo, kovranta la teron, plidikiĝis ĉiumomente. Ĉu mi elirus? Ĉu mi restus en mia dometo? Mi pri-

pensis kaj tiam decidis aĉeti dek panetojn kaj kun tiuj mi tuj revenus por ne plu eliri la tutan tagon nek la sekvantan. Mi ekpaŝis en la neĝo kaj sentis la malvarmon penetri miajn ŝuojn, sed mi ja devus manĝi.

Mi sekve iris plue mian vojon, aĉetis la panetojn kaj reiris kiel eble plej rapide en mian dometon.

Mi demetis la malsekajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn, el kiuj fluis la akvo, kaj frotinte miajn piedojn por varmigi kaj sekigi ilin, mi restis sidanta sur la planko kaj pripensis kiel ĉiam oni pripensas, kiam oni estas tute sola kaj sen okupoj. Mi pensis pri mia Insulo, pri la skuno, kun kiu mi alvenis en Patersburgo, pri la ĝibhava kuiristo, pri la dancanta maristo kaj pri Johano. Fine ekvesperiĝis kaj mi kuŝiĝis por dormi. Miaj piedoj tamen estis tiel malvarmaj, ke mi ne povis dormi, tial mi denove frotadis ilin, ĝis kiam ili iom varmiĝis kaj duan fojon mi klopodis dormi. Sed la ekpenso, ke post du tagoj mi estus sen mono kaj ke miaj truhavaj ŝuoj ne ebligus al mi eliri pro la neĝo, tiel ĉagrenis min, ke mi eksidis kun la dorso kontraŭ nun el la kestoj kaj iĝis preskaŭ malesperanta.

Johano kutime diris, kio ĉio fariĝos bona, se oni nur kuiras siajn pizojn; sed la miaj estis tro malmolaj. Mi sentis min tiel forlasita kaj mizera, ke mi ne povis plu reteni la larmojn, kaj kovrante la vizaĝon ambaŭmane, mi laŭte ekploris. Grandaj larmoj fluegis inter miajn fingrojn kaj ekvarmigis miajn manojn, sed la varmecoj daŭris nur mallonge, ĉar la frostoj estis tiel severa, ke baldaŭ strioj da glacio frostkunigis miajn fingrojn.

— Ho Dio! — ekkriis mi. — Kial mi forkuris de mia domo?

Kaj mi pensis pri mia subtegmentejo sur la Insulo kaj pri mia varma lito, en kiu mi tiel bone kaj feliĉe

povis dormi kun la kato sur la brako kaj la hundo sur la piedoj. Ho, ke mi estus refoje tie... kiel varme al mi estus kaj kiel mi estus feliĉa! — La filozofio de Johano tute ne taŭgas —, diris mi, — ĉar neniu povas kuiru siajn pizojn en tia severa malvarma vetero, dum li sidas tiel kurba en malalta dometo, kies fenestro ne havas vitrojn, kie staras nek fornĉo por varmigigi, nek estas lito por kviete kaj feliĉe dormi.

Refoje miaj pensoj flugis al mia Insulo kaj image mi vidis tie ĉion kiel antaŭe. Ho, se mi povus dormi, eble mi forgesus mian mizeron kaj la malvarmon, kiu tremetigis mian tutan korpon. Mi suprentiris la genuojn al la brusto, krucigis la brakojn kaj kuŝigante la frunton sur ilin, mi fermis la okulojn; eble, tiel mi pensis, la dormo fine min atakos. Mi restis en tiu ŝintenado, sed la dormo ne venis. Iom post iom ŝajnis al mi, kvazaŭ la malvarmo fariĝus malpli terura kaj stranga sentado trairis miajn membrojn, ĝis kiam mi fariĝis varma. Timante, ke refoje al mi estiĝus malvarme, se mi ekmovus min, mi restis sidanta kun suprentiritaj kruroj, kun kurba dorso kaj kun frunto sur la krucigitaj brakoj. Kaj mi revadis... kaj revadis... Strangaj, rapide sin sekvantaj pensoj en- kaj eliris mian kapon; mi ne sciis, ĉu estas vespero aŭ mateno kaj image mi vidis aferojn, per kiuj mi forgesis mian teruran situacion. Jen mi promenis en Patersburgo, jen mi estis sur la Insulo kun Johano. Li rakontis al mi rakontojn kaj kiam fine li kaptis mian brakon, ni flugis kune tra la aero al la ĝardeno, kie staris mia dometo. Ĉio estis blanka pro la neĝo kaj seninterrompe falis tia amaso da neĝeroj, ke mi preskaŭ ne povis vidi. Mi volis forviŝi la neĝon de miaj palpebroj, sed mi ne povis movi la brakojn. Subite mi sidis sola en mia dometo kaj aŭdis ekstere la voĉon de Johano, kiu diris: — Kuiru

viajn pizojn, mia kara, kaj ĉio fariĝos bona! — Mi volis respondi, ke ili estas tro malmolaj, sed, ho ve! mi ne povis disigi la lipojn; mi volis plori, sed ne povis. Subite la pordo knaris sur siaj hokoj kaj malfermiĝis. Ĉio fariĝis hele luma ĉirkaŭ mi kaj ekstere mi ekvidis kelkajn nigre vestitajn virojn kun nova bruna kesto, kiun ili enportis kaj metis sur la plankon. Mi aŭdis ilin paroli, sed neniu mi komprenis, eĉ ne Johanon, kiu alproksimiĝis al mi kaj ekskuis min. Li parolis al la aliaj viroj kaj prenante min en la brakojn, iris kun mi eksteren kaj metis min en la molan neĝon, kiu kuŝis tiel alte, ke mi preskaŭ malaperis en ĝi. Daŭrigante paroli al la ĉirkaŭ ni starantoj, li frotis miajn piedojn, manojn kaj vizagojn per neĝo. Al mi fariĝis pli kaj pli varme, sed la manoj de Johano, kiuj estis tute nigraj same kiel tiuj de l' patro de Lazaroni, daŭrigis frotadi min. Mi volis paroli al li, sed ne povis, mi volis ek-kapti liajn manojn por ĉesigi la frotadon, kiu tro min varmigis, sed mi sentis, ke ĉiuj fortoj estis forlasintaj min. Post longa frotado la filozofo denove prenis min en la brakojn, forportis min kaj la aliaj viroj nin sekvis. Rigardante posten, mi vidis, ke unu el la viroj staras ankoraŭ ĉe la pordo de mia dometo. Rigardante internen, mi vidis la ĵus enportitan keston kaj ekmiris, kio estus en ĝi, sed miaj pensoj konfuziĝis pli kaj pli. Mi sentis, ke Johano portas min tra la dika neĝtavolo, kovranta la tutan ĝardenon, mi vidis, ke la pordo de mia dometo estis ŝlosata kaj ke la ŝlosinto kuratingis nin... Tiam densa griza nubo envolvis min kaj mi vidis plu nenion. Sed miksitaj bruoj penetris la grizan nubon; inter stranga zumado mi aŭdis la krakadon de la neĝo, tra kiu la viroj paŝis... kaj ion similantan la tintadon de malproksimaj sonoriletoj. Tiam mi sentis, ke Johano kuŝigis min...; la tintado fariĝis pli laŭta...

vipo klakis . . . , mi sentis ekskuon kaj estis ŝovata antaŭ-
en . . . , la viroj ĉirkaŭ mi flustris unuj al aliaj . . . , la flustrado
kaj la tintado pli kaj pli mallaŭtigis . . . , la min ĉirkaŭ-
anta nuboj levis min supren, mi sentis min ŝvebanta tra
la aero . . . , la flustrado kaj la tintado kvazaŭ formortis
en la malproksimeco . . . , kaj mi aŭdis plu nenion . . .

Vekiĝante mi sentis min tre bone kaj varme. Mi
rigardis ĉirkaŭen kaj volis eksidi, sed dika lana kovrilo
tiel fikse ĉirkaŭis mian korpon, ke mi nur kun peno
povis min movi.

— Johano! — ekkriis mi.

Iu alproksimiĝis, sed anstataŭ Johano staris antaŭ
mi maljuna virino. Ni rigardis nin reciproke.

— Johano!? — ekkriis mi denove — Vor is Johano?*)

La virino, kiu estis vestita kiel servistino, laŭte diris
kelkajn vortojn.

Voĉo de persono, kiun mi ne vidis, respondis ŝin.
Mi turnis la kapon kaj ekvidis knabineton, sidantan apud
fenestro post mi. Ŝi tuj ekstaris kaj kuris eksteren. La
virino refoje komencis paroli. Miaj okuloj tamen klare
diris, ke mi ne komprenas, kaj plue parolante al si
mem, ŝi helpis min eksidi. Tio rememorigis al mi la
kuiriston, kiu estis farinta al mi tian saman servon sur
la ŝipo. Vole nevole mi okulserĉis ĉiuloke, ĉu Johano
estas en la ĉambro, sed vane, nenie mi lin vidis kaj mi
konjektis el tio, ke verŝajne mi estis vidinta lin nur en
mia sonĝo, kaj pensante pri liaj vortoj: — Kuiru viajn
pizojn, mia kara, kaj ĉio fariĝos bona —, mi devis konfesi,
ke lia filozofio tamen estas bona, ĉar jen subite mi vidis
min sidanta sur kanapo en bela varma ĉambro kun multaj
mebloj, dum virino kun ĝentila vizaĝo ridetis al mi.

*) Kie estas Johano?

En tiu momento eniris nigre vestita sinjoro. Li komencis al mi paroli, sed ĉar mi respondis al ĉio, kion li diris, per kapskuo kaj per la vortoj: — Ken ju najt verston*) — li fine eksilentis kaj ordonis ion al la virino. Tuj ŝi forprenis de mi la lanan kovrilon, ek-kaptis mian manon kaj kondukis min tra koridoro en ĉambreton, kie estis nur malmultaj mebloj. Mi vidis inter aliaj malaltan benkon kaj longforman kuvon el stano, en kiu pendis longa kaŭĉuka tubo venanta el la muro tra kupra tubo kun krano. Kiam la virino turnis la kranon, strio da varma akvo enfluis en la kuvon. Mi antaŭvidis, ke mi devus lavi min kaj mi ĝojis pri tio, ĉar tia tavolo da malpurajo kovris mian vizaĝon, ke mi aspektis kiel cigano. La servistino helpis min demeti miajn vestojn kaj enirigis min en la duone plenigitan kuvon. Mi lavis min kaj la servistino foriris por alporti purajn subvestojn. Ŝajnis al mi, ke knabo de mia aĝo estas en la domo, ĉar la puraj subvestoj vestis min bone. Post kiam mi estis almetinta ilin, ŝi kombis miajn harojn, kio prenis multan tempon; ili estis krispaj kaj tre intermiksiĝintaj, ĉar dum la tuta tempo de mia vagado en la urbo mi ne kombis ilin. Kiam ŝi estis ordiginta miajn harojn, kiujn ŝi tre admiris, ŝi donis al mi por manĝi kaj trinki en la salono, kie min atendis la viro. Mi estis malsata kaj kiam mi estis trankviliginta malsaton kaj soifon, la viro, kiu sen interrompo rigardis min, ekstaris kaj malfermis pordon de alia ĉambro, kie staris bela lito. En tiu ĉambro mi devis dormi. Mi estis tiel emociita, ke mi kaptis la manon de la viro kaj kisis ĝin. Li ja sin okupis kun mi kaj kondukis tute alie ol mia patro, kiu neniam rigardis min kaj kiu ĉiam agis, kvazaŭ mi tute ne ekzistus.

*) Mi ne povas vin kompreni.

La viro rigardis min afable, kaj mi rimarkis, ke larmoj estis en liaj okuloj; sed mi ne komprenis kial. Li kar-esis miajn vangojn kaj buklojn kaj helpis al mi enlitigi. Tiam li foriris kaj lasis min sola. Antaŭ ol ekdormi, mi pensis pri ĉio, kio okazis tiun lastan tagon kaj pri la dirajo de Johano: — Ĉio fariĝos bona! — Nu, ĉio fariĝis bona, ĉar fine mi trovis hejmon, kaj jam ne pensante pri miaj vagadoj kaj mizeroj, mi ekdormis.

Kiam la sekvantan matenon mi vekigis, tiu sama viro staris antaŭ mia lito. Estis jam hela tago, kaj por la unua fojo mi vidis, ke li estas bela viro kun tre longaj nigraj haroj. Sur la nazo, ĝuste antaŭ la okuloj, li portis nun vitretojn, tra kiuj li rigardis min. Ankoraŭ neniam mi vidis tiajn vitretojn kaj mi miris, kial li portas ilin. Li salutis min afable kaj fingre montris seĝon apud la lito; sur tiu seĝo kuŝis vestoj. Mi leviĝis kaj vestis min. Rigardante min en spegulo, kie mi povis vidi min de la kapo ĝis la piedoj, mi preskaŭ ne rekonis min mem. Tiajn belajn vestojn mi neniam surhavis, ĉar sur la Insulo mi ĉiam portis la saman malbelan vestajaron. La viro rimarkis, ke mi rigardas min kun ekmiro; li ridetis, ekkaptis mian manon kaj iris kun mi en belan salonon. Tie mi vidis la saman knabineton, kiun mi vidis la antaŭan vesperon. Ŝi salutis kaj kisis min. Mi estis tre feliĉa, ĉar ŝi tiel afable kondukis kaj mi demandis al mi, ĉu mi povus restadi en ĉi tiu bela domo tiom da tempo, kiom mi dezirus. Apenaŭ mi sidis kun la viro kaj la knabino ĉe la sama tablo por matenmanĝi, kiam eniris tre dika viro kun ruĝaj haroj. Estis la unua fojo, ke mi vidis tiajn harojn kaj mi ne povis ne rigardi ilin kun surprizo. Li alproksimiĝis gravmiene, eksidis kaj parolis, de tempo al tempo rigardante min kaj esprimante parole kaj geste la plej grandan miregon. Post kelka tempo la du viroj eniris la apudan salonon, kaj

post kvarono da horo ili revenis kaj tiam la ruĝharulo forlasis la domon.

Post la matenmanĝo mi restis sola kun la knabino. Ŝi devis legi kaj skribi, kaj mi eksidis ĉe la fenestro por rigardi esteren, ĉar kion mi alie farus? Mi ne povosciis interparoli kun la knabino, ŝi do studadis kaj mi... faris nenion krom rigardi el la fenestro.

La neĝo sen interrompo falis sur la straton, kaj mi denove ekmemoris la du lastajn tagojn, kiam tiu neĝo tiom maltrankviligis min.

Sur mia Insulo ankaŭ kelkfoje neĝis, sed tiajn grandajn neĝerojn, kiaj falis sur la straton tie ekster la domo, mi ankoraŭ neniam vidis. Ĉiuj homoj, preterirantaj la fenestron, kun peno antaŭen paŝis sur la ĉiam plidikiĝanta neĝtavolo, kaj mi kompatis la malbonevestitojn, kiuj sin trenadis antaŭen kun suprentiritaj ŝultroj, blovante antaŭ si vaporsimilajn nubetojn. Frostis kaj la neĝo kraketis sub la piedoj de la homoj. Mi tamen ne povis alporti helpon al la malriĉaj, malbone vestitaj preterirantoj, kvankam mi imagis, kiel malvarmaj ili sin sentas en tiu severa vetero.

La knabino kelkfoje interrompis sian studadon kaj ĉe tiuj okazoj ŝi rigardis min kun rideto.

Mi deziris, ke ankaŭ mi povus studadi kiel ŝi, mi ja devus ion lerni; ĝis nun mi lernis nenion kaj faris nenion krom serĉkolekti ovojn kaj triki ŝtrumpojn kaj vagadi, sed tio ja ne estis taŭga destino. Mi volis lerni, fariĝi io, sed kio mi fariĝus? Mi pripensadis pri tiu demando, sed ne kapablis doni la respondon.

Fine ŝi rimarkis kun kiom da atento mi rigardis ŝian studadon, kaj ekstarinte ŝi alpaŝis al alta ŝranko, kiu havis pordetojn el vitro; ŝi malfermis tiujn kaj elprenis dikkan libron, kiun ŝi metis sur miajn genuojn kaj montris al mi belajn ilustraĵojn, samtempe ŝi penis klarigi

kelkajn figurojn kaj tio tre amuzis min. Frapis min tamen, ke la literoj sub la ilustraĵoj estis tute malsimilaj al tiuj de „Mil kaj unu noktoj“, kaj montrante la al mi strangajn literojn, mi rigardis ŝin demande. Ŝi komprenis, iris al la ŝranko kaj elprenis alian libron, montris la literojn, sed refoje mi kapskuis, tiajn literojn mi ankaŭ neniam vidis. Ŝi elprenis trian libron kaj mi vidis en tiu lasta la samajn literojn, kiajn al mi estis instruinta mia patrino. Sed mi ne sciis legi; mi sciis nur nebone silabi, kaj mi eksilabis, ĉar mi estis fiera, ke fine mi povis montri, ke mi lernis almenaŭ ion. Mi eksilabis: Le-a Pe-re-e-me-i-e-re-e Fe-o-i-se-q...

Mi ekhaltis, ĉar jen mi vidis literon, kiun mi neniam estis lerninta. La knabino ridis, sed jam eksciis, ke mi ne povoscias legi, almenaŭ tiun libron. Ŝi do plue montris ilustraĵojn, ĉiam klarigante kiel eble plej bone. Subite ŝin kaptis ideo; fermante la libron, ŝi fingremontris la tablon kaj eldiris vorton. Mi komprenis, ke ŝi nomas la tablon per tiu vorto, kaj mi ripetis ĝin. Ŝi ridis kaj montris aliajn objektojn. Ĉiufoje mi ripetis, ĝis kiam mi lernis parkere la nomojn de multaj mebloj en la ĉambro. Ni estis ravitaj, tiom pli, ĉar mi sen peno povis memori la vortojn. Sur nigre polurita kesto ĉe la muro (ŝi nomis tiun keston „piano“), staris fotografajoj. Unu el ili prezentis la knabinon mem kun bela knabo. Mi montris fingre la knabon kaj demande rigardis ŝin. Ŝia buŝo nerveme kuntiriĝis kaj larmoj ekvenis en ŝiaj okuloj. Ŝi ne respondis, sed montris per la mano la direkton de la misterplena ĝardeno kaj mi komprenis, ke tiu knabo estis ŝia mortinta frato. Subite trafis miajn okulojn la vestoj de tiu knabo; ili estis la samaj, kiujn mi almetis ĉi tiun matenon kaj per signoj mi montris al ŝi tion. Ŝi kapjesis kaj rigardis min malĝoje.

Subite fariĝis al mi klare, ke mia dometo estas loko, kie ripozas la mortintaj familianoj de la knabino, ke plue la nova tien portita kesto enhavas la mortintan fraton kaj ke mi estis pasiginta multajn tagojn kaj noktojn en mortintejo. Mi ekmiris, ke tiu penso nur nun kaptis min, ĉar antaŭe mi ĉiam opiniis, ke enterigejo aŭ mortintejo aspektas tute alie ol mia ĝardeno. En „Mil kaj unu noktoj“ mi vidis bildon pri ĝi, sed sur tiu bildo ne staris krucoj nek dometoj.

Post tiu portreto staris alia, prezentanta la gepatrojn de la knabino. Mi montris ŝian patrinon, kaj ŝi komprenigis al mi, ke ŝia patrino estas ĉagrenmalsana pro la morto de sia filo kaj ke ŝi kuŝas en lito en la apuda ĉambro. Ŝi aliris al tiu ĉambro kaj singarde malfermante la pordon, rigardis en ĝin. Rideto kuris sur ŝia vizaĝo, mi iris al la pordo kaj vidis ŝian patrinon. Ŝi vokis nin al si kaj eksidante interparolis kun la knabino, kaj ĉar tiu ĉi diris kelkajn vortojn, kiujn mi jam lernis tiun matenon, mi komprenis, ke ili parolis pri la fotografajo kaj pri la knabo, kies vestojn mi surhavis. Ni ne povis resti longe en tiu ĉambro, ĉar la virino estis ankoraŭ iom malforta kaj bezonis ripozon; ni sekve reiris en nian ĉambron, kie la knabino instruis al mi plue pri la nomoj de ĉiuj objektoj, kiuj sin trovis tie. Ŝi montris sin mem kaj diris, ke ŝi sin nomas Aleksandra Romeskaŭ. Mi sekve estis ĉe la familio Romeskaŭ. Mi komprenigis al ŝi, ke mia nomo estas Jafet. Ŝi montris du fingrojn, diris refoje: Aleksandra Romeskaŭ kaj kvazaŭ informiĝis pri mia dua nomo. Mi diris, ke mia nomo estas „Jafet“, sen alia nomo, pri kio ŝi tre miris. Mi pensis, ke sendube mi havas ankaŭ du nomojn, sed mi neniam eksciis la duan.

Je la vespero la ruĝhara sinjoro revenis kaj refoje li eniris en la ĉambron de sinjorino Romeskaŭ. Mi

eksciis per tio, ke li estas la resanigisto. La du postaj tagoj pasis kiel la unua. Aleksandra instruis min, la ruĝharulo revenis ĉujn matenojn kaj ĉujn vesperojn. La kvaran tagon li permesis al la sinjorino, ke ŝi leviĝu. Post kelkaj tagoj ŝi estis preskaŭ tute resaniĝinta kaj pasigis kun ni la tutan vesperon en la ĉambro, kie Aleksandra ordinare studadis. Ni sidis ĉe tablo kaj trinkis teon, kiun la maljuna servistino enportis, kaj ĉar mi ne povis partopreni la interparoladon, mi foliumis libron kun ilustraĵoj. Aleksandra sidis ĉe mia flanko kaj instruis al mi kiel kutime pri novaj vortoj. Tiel ni sidis proksimume horon, kiam sinjoro Romeskaŭ diris ion al sia filino, dum li montris la pianon. Aleksandra sidiĝis antaŭ ĝi kaj levis kovrilon de elstaranta parto. Tiun kovrilon mi ĝis nun ne rimarkis, kaj mi rigardis kun scivoleco, kion ŝi estis faronta. Ŝi forprenis pecon de blanka ŝtofo el kotono, kiun ŝi kunfaldis kaj mi vidis, ke sub tiu kotona peco sin trovas longa vico de eburaj objektoj, aspektantaj kiel giganta dentaro. Malferminte libron kun strangaj figuroj, ŝi metis ĝin antaŭ sin super la stranga dentaro kaj tiam ŝiaj ambaŭ manoj ekmanovris dekstren kaj maldekstren sur la eburaj dentoj, kiuj sin movis malsupren sub ŝiaj rapidaj fingroj, samtempe mi aŭdis belan muzikon. Sur mia vizaĝo sin montris sendube granda surprizo, ĉar ĝesinjoroj Romeskaŭ ridetis, rigardante min. Mia surprizo montris klare, ke mi ankoraŭ neniam aŭdis muzikon, kaj ĝi tuŝis min en la plej alta grado. Kiam Aleksandra finis la muzikaĵon, ŝi foliumis en la libro antaŭ si kaj sinjoro Romeskaŭ sin levis post kelkaj signoj de lia edzino. Mi ne komprenis tiujn signojn, sed baldaŭ mi komprenus ilin. Li prenis strangforman nigran kesteton el ŝranko, kiun mi ĝis nun ne estis rimarkinta, malfermis tiun kesteton kaj elprenis strangan flave brunan objekton el ligno, sur

kiu estis streĉitaj kvar kordoj, kaj specon de bastoneto, sub kiu estis fiksitaj aro da longaj flavaj haroj. Mi atendis refoje muzikilon kaj mi ne trompis min. Romeskaŭ surŝultrigis la instrumenton, fikstenis ĝin per unu mano kaj per la mentono, kaj per la alia mano skrekadis sur la kordoj per la harhava bastoneto, dum Aleksandra siaflanke ludadis sur la piano.

Ofte mi ekaŭdis paroli pri muziko, kiam mia patrino legis al mi el libroj, sed neniam mi povis imagi, ke la forto de bela muziko estas tia, ke ĝi kapablas plorigi min. La malgranda muzikilo eligis tiel mirindajn sonojn, ke mi ne povis reteni la larmojn. Mi kredis sonĝi, dum misteraj voĉoj flustradis al mi siajn plendojn kaj ĝojon. Jen la instrumento ĝojkriis, jen ĝi rakontis, ke ĝi suferas kaj mi ĝojis kaj suferis kun ĝi. Mi jam ne atentis la personojn en la ĉambro, mi nur aŭdis la misterajn sonojn, kiuj ŝajnis veni el malproksimaj sferoj. Mi sidis kvazaŭ alforĝita al mia seĝo kaj vidis nenion de ĉio, kio okazis ĉirkaŭ mi, ĉar larmoj blindigis miajn okulojn.

Fine la muziko eksilentis. Mi forviŝis miajn larmojn kaj petege rigardis la ludinton. Li premis min en la brakoj; mia tuta teniĝo estis parolinta pli klare ol vortoj povus, kaj ĉiuj en la ĉambro, komprenante min, konsciis, kion mi petegis, kiam mi direktis miajn okulojn al la artisto. Mi volis lerni tiun arton, mi fine komprenis min mem; mi estis aŭdinta belan muzikon kaj mi konsciis, ke mia estonto estus nur muziko, kaj eĉ tiu muziko, kiun oni povas fari sur tiu malgranda instrumento. Kaŝita voĉo en mi flustris al mi, ke Romeskaŭ estas granda artisto, tia artisto mi volis ankaŭ fariĝi.

Sepa Ĉapitro.

Maksimo Bjelski — Mia unua leciono en la rusa lingvo —
Frotado de manoj — Kie do mi naskiĝis? — Vortoj, kiuj apartenas al nenia lingvo — Mia studado — Mi ekscias, ke mi dormis inter ĉerkoj sur mortintejo kaj ke mi estas talentulo — Mi superas mian instruiston — Mi devas solludadi — Mia sukceso — Ivan reaperas — Refoje la stranga akvokolora likvoro.

Mi atendis, ke Romeskaŭ instruos al mi la ludadon sur la violono, sed ne antaŭsentis, ke li jam tiel baldaŭ komencus la lecionojn. La sekvantan semajnon, iun matenon la vetero estis tiel malbela, ke neniu ekpensis eliri, se ne estus necese.

Mi sidis ĉe la fenestro kaj rigardis eksteren al la preterirantoj, dum mi de tempo al tempo studadis la ilustraĵojn. Okaze miaj okuloj falis sur malgrandan, malgrasan, palvizaĝan viron, kiu alproksimiĝis sur la strato. La maniero, laŭ kiu li sin trenis tra la neĝo, montris klare, kiel malvarma li sin sentis. Sub unu brako li portis nigran paperujon, kiun la vento ĉiumomente klopodis fortiri, sed la vireto premis ĝin kun tia forto al sia korpo, ke li sukcesis gardi ĝin tie. Li alproksimiĝis, ĉiam rigardante nian domon, kaj kiam li ekvidis min, li faris sian eblon rideti, sed la vento blovis kun tiom da furiozeco la neĝerojn sur lian vizaĝon, ke lia naskiĝanta rideto ŝanĝiĝis en grimacon, kiu ridigis min. En tiu momento Romeskaŭ eniris kaj mi jam ne atentis la malgrasan vireton. Mi refoje rigardis miajn ilustraĵojn, sed apenaŭ mi fiksis mian atenton sur ilin, kiam la sonorilo

anoncis vizitonton. Romeskaŭ eliris la ĉambron kaj revenis post momenteto, enkondukante la saman malgrasan vireton kun la paperujo. Ambaŭ viroj rigardis min. La vireto faris al mi riverencon (kio ŝajnis al mi tre stranga, ĉar ankoraŭ neniam oni faris al mi tian honoron) kaj Romeskaŭ signodonis al mi sekvi lin. Mi ekstaris kaj la vireto prezentis al mi sian manon, kiun mi premis, ĉar mi ne sciis kion fari alie. Mi rigardis lin kun surprizo kaj li balbutis kelkajn vortojn, kiujn mi ne komprenis. Mi sekvis Romeskaŭ al la koridoro, kaj li supreniris la ŝtuparon kondukantan al etaĝa ĉambro; mi ankaŭ supreniris. Post mi aŭdiĝis mallaŭta brueto de ŝoviĝantaj ŝuoj kaj rigardante posten, mi ekvidis, ke la vireto ankaŭ supreniris. Mi ne havis la tempon longe pensi pri tio, kion Romeskaŭ estis faronta, ĉar tuj poste li eniris la ĉambron de la dua etaĝo kaj lin sekvis mi kaj fine la vireto. En la ĉambreto, kiun mi neniam antaŭe eniris dum la malmultaj tagoj, kiujn mi pasigis ĉe la familio Romeskaŭ, staris krom kelkaj ordinaraj mebloj unu granda tablo plena je libroj kaj skribilaro. Romeskaŭ diris kelkajn vortojn al la vireto; tiu ĉi riverencis nerveme kaj Romeskaŭ lasis nin solaj. La vireto ŝajnis tre nervema; li metis la paperujon sur la tablon, frotis al si la manplatojn (pro la malvarmeco, mi pensis) kaj invitis min afable eksidi. Mi eksidis kaj estis scivola, kion ni kune farus. La vireto eksidis mem ĉe mia flanko, malfermis la paperujon kaj elprenis folion da papero kaj libreton, kiujn li metis antaŭ nin. Tiam li refoje frotis al si la manplatojn. Farinte tion li prenis el sia poŝo du krajonojn, metis ilin sur la folion de papero kaj komencis paroli en nervema maniero. Kvankam mi ne komprenis komence liajn vortojn, mi tamen konjektis, ke la vireto estas mia instruisto; mi ekĝojis, ĉar fine mi studadus. La instruisto en tre afabla ma-

niero, de tempo al tempo frotante al si la manplatojn, ekinstruis al mi kelkajn el la strangaj literoj, kun kiuj mi jam konatiĝis pere de la libroj montritaj al mi de Aleksandra. Mi estis tre atenta, ĉar mi deziris studadi, kaj la vireto tiel sin donis al sia tasko, ke lia vizaĝo tute ruĝiĝis pro streĉeco. Mi lernis dum tiu unua leciono kelkajn literojn, post kio la vireto ekparolis pri kraĵonoj, pri la libreto, pri papero, pri la tablo kaj cetero. Li klarigis al mi la kolorojn, li instruis al mi kalkuli ĝis dek, montrante ĉiujn siajn fingrojn, kiuj estis ekstreme malgrasaj. Lia tasko estis malfacila, ĉar li devis samtempe instrui al mi la lingvon, kiun mi ne komprenis, la legadon kaj la skribadon; sed ĉar mi estis tre atenta kaj diligenta, li estis tre kontenta pri mi kaj iom post iom fariĝis malpli nervema, tiel ke fine li frotadis al si la manplatojn nur malofte.

Sur seĝo post mi kuŝis violono, kiun mi jam rimarkis enirante la studejon; mi tamen ne sciis, kial ĝi kuŝas tie. Post proksimume unu horo da instruado la instruisto fermis la paperujon, enpoŝigis la kraĵonojn kaj ekkaptis la violonon. Mi pensis, ke li intencas ludi sur ĝi, sed baldaŭ mi rimarkis, ke li volas instrui min pri la nomoj de la partoj, el kiuj ĝi konsistas. Mi fariĝis ankoraŭ pli atenta ol antaŭe, kaj ni ambaŭ estis tre kontentaj pri la progresoj, kiujn mi faris. Nia studado fine estis interrompata de Romeskaŭ. Enirante li montris sian poŝhorloĝon kaj la instruisto ekstaris. Lia vizaĝo (alitempe paleta) estis ruĝa pro streĉeco, tiel ruĝa, ke mi miris pri tio. Romeskaŭ per gesto diris, ke mi restu en la studejo kaj li malsupreniris la ŝtuparon. Lin sekvis la instruisto, post kiam li faris por mi sian riverencon. Mi lin trovis ne nur bonkora, kvankam ekstreme nervema vireto, sed ankaŭ tre lerta instruisto, ĉar mi lernis multon dum la du horoj, en kiuj li min instruis.

Kiam Romeskaŭ revenis, li tuj komencis kun mi la unuan lecionon je la violono. Li estis tre kontenta, ĉar mi tiel baldaŭ scipovis lerni parkere ĉiujn partojn de la muzikilo en por mi tute fremda lingvo, ĉar tio utilis multe al ni ambaŭ en lia instruado je la violono.

Mi ne bezonas diri, ke mi sekvis la kurson de Romeskaŭ kun granda atento, kaj kiam mi post unu horo bone povis teni la violonon kaj la arĉon kaj laŭ lia deziro ludis la notojn, pri kiuj li min instruis, li frapetis mian ŝultron kaj montris sian plei grandan kontentecon.

Jus ni estis elirontaj la studejon, kiam aperis ĉe la pordo, kiu duone malfermiĝis, la ridetanta kapeto de Aleksandra. Ŝi estis aŭskultinta la lecionon de sia patro kaj tre entuziasmiĝis pro la rezultato. Ŝi frapetadis al si la manojn, kaj kaptante mian brakon, salte supreniris kun mi la ŝtuparon.

En la posttagmezo mi devis daŭrigi mian studadon, tio estis: mi devis ekzerci min en la skribarto, silabado kaj ripeti sur la violono.

La tagoj, kiuj sekvis, pasis por mi agrablege, ĉar mi fine havis celon kaj tiun celon mi volis atingi kun helpo de miaj du instruantoj. Tago post tago pasis laŭ la sama maniero. La nervema vireto, kies nomo, kiel li diris al mi, estis Maksimo Bjelski, ĉiutage venis akurate la saman horon, pala, nervema kaj frotante al si la manplatojn, kaj ĉiutage du horojn poste Romeskaŭ devis horloĝmontrante diri, ke la du horoj estas pasintaj, ĉar alie la fervora, malgrasa vireto estus restinta la tutan tagon por sin dediĉi al sia tasko, kaj forirante, li ĉiam estis tiel ruĝa pro streĉeco, ke mi kompatis lin. Tamen ŝajnis, ke li tute ne estis kompatindulo, ĉar li ĉiam kun vizaĝo, kiu esprimis feliĉon, premis al mi la manon kaj malaperis post profunda riverenco, per kiu

li ne nur montris sian dankemon pro mia diligenteco, sed ankaŭ, ke li konsideris min, kvazaŭ mi estus granda eminentulo.

Post tri monatoj mi lernis tiom de la rusa lingvo, ke mi komprenis preskaŭ ĉion, kion Maksimo Bjelski al mi diris. Lia metodo instrui estis tia, ke mi nepre devis fari progresojn en la lingvo. Kelkfoje ŝajnis al mi, ke li mem studadis pli multe ol mi, por sin prepari por nova leciono. Li posedis francan vortaron de Larouse kun multaj ilustraĵoj, kaj kopiis por mi preskaŭ ĉiujn ilustraĵojn, aldonante rusajn klarigojn, por ke mi povu lerni kiel eble plej multe da vortoj. Tion li trovis necesa, ĉar li ne komprenis la lingvon de miaj gepatroj, kaj ĉar mi parolis nur tiun lingvon, restis al li nur tiu sola rimedo: verki por mi vortareton. La plej malfacila parto de la lingvo, kiun mi devis lerni, estis tamen la aliaj elementoj, precipe la adjektivoj, ĉar tiujn li ne povis prezenti pere de ilustraĵoj aŭ desegnaĵoj.

Post kiam mi kapablis iomete esprimi miajn pensojn en la rusa lingvo, Maksimo Bjelski demandis min pri miaj gepatroj, pri la loko de mia naskiĝo kaj pri ĉio, kio koncernis miajn antaŭajn jarojn, por havigi al Romeskaŭ la rimedojn malkovri, de kie mi venis, por, se eble, trovi miajn gepatrojn. Sed mi povis rakonti nur, ke mi naskiĝis sur „la Insulo“, kies nomon mi neniam aŭdis eldiri, ĉar ni nomis ĝin „Insulo“. Mi ne konis la nomojn de miaj gepatroj, eĉ ne mian propran; mi ne sciis, kiam mi naskiĝis kaj al kiu lando apartenas la insulo de mia naskiĝo. Maksimo Bjelski klopodis malkovri, kiun lingvon miaj gepatroj parolis al mi, sed li malsukcesis malgraŭ sia granda kono pri multaj lingvoj. Mia lingvo laŭ lia opinio ne estis la franca, nek la germana, nek la angla nek la holanda, ĉar la lingvo de mia Insulo (li estis notinta multajn el la vortoj de mia gepatra

lingvo, post kiam mi eldiris ilin) multe tro multe deflankiĝis de ĉiuj tiuj lingvoj. La vortojn ŝinvat = lanterno, fōr = patro, maŭr = patrino, bōksm = pantalono, slōp = duonsuo, hōs = ŝtrumpo, sik = kaprino, dēl = planko, pōtje = infano kaj tiel plu, li retrovis en neniŭ el la lingvoj, kiujn li komparis kun la mia. Restis sekve nur la ebleco, ke mi naskiĝis sur unu el la insuloj kuŝantaj okcidente de Ŝlesvigo, aŭ sur dana insuleto, ĉar dum mia vojaĝo mia ŝipo veliris laŭ Kopenhago kaj Malmō. Sur la danaj insuloj oni plejparte parolas dialektojn, li diris, kaj mia lingvo estis tiel mal-simila al ĉiuj eŭropaj lingvoj, ke ĝi sen dubo devus esti dialekto kaj eĉ dana dialekto.

Mi ankaŭ rakontis pri mia amiko Johano, kiu estis estinta aktoro de Hamburga teatro, kaj ke li estas la sola viro, kiu scias la nomon de mia patro kaj de la insulo, kie li pasigis monaton ĉe ni.

Sinjoro Romeskaŭ petis mian instruiston, ke li sin turnu al la eksterlandaj ambasadoroj por informiĝi, ĉu ie perdiĝis juna knabo el insuleto, sed ĉio estis vana. Maksimo Bjelski tiam proprainiciate skribis en germana lingvo al la direktoroj de teatroj en Hamburgo por peti informojn rilate al mia amiko Johano, sed post deko da tagoj li ricevis respondon, ke nenie en la urbo sin trovas aktoro nomata Johano kaj ke en nenia teatro estas nek estis tia aktoro, sed ke antaŭ kelka tempo en la urbo loĝis persono longkreska, nomata Johano, kiu kiel statisto kunludadis en kelkaj teatraĵoj kaj fine estis eksigata pro nedeca konduto dum prezentado de la dramo Hamleto. En la tria akto, kie la malfeliĉa princo elparolis sian saman: Ĉu esti aŭ ne esti, tiel staras la demando..., la nomita statisto ne atentante sian propran rolon, estis elpaŝinta el post la kuliso, kaj sin turnante al Hamleto, li subite estis

ekkriinta: — Kuraĝon, sinjoro Vajsviŝ, kuraĝon; kuiru viajn pizojn kaj ĉio fariĝos bona! — Per tiuj neatenditaj vortoj la rigardantoj tiel aplaŭdadis kaj faris tiom da bruo, ke la aktoro „Hamleto“ neeble povis ludadi plue, tiel ke li devis forlasi la scenejon. La reĝisoro devis fari finon al la sceno kaj malsuprenigi la kurtenon. La statisto depost tiu vespero malaperis de la scenejo kaj trairinte ankoraŭ kelkajn tagojn Hamburgon kiel promenanta reklamilo de granda magazeno de pretigitaj vestoj, li estis forlasinta la urbon kiel maristo. Maksimo Bjelski estis tradukinta la respondon de la Hamburga teatra direktoro en la rusan lingvon, kaj dum sinjoro Romeskaŭ legis la enhavon, mia instruisto fariĝis tiel nervema kaj tiel nerveme frotadis al si la manojn, ke mi vere kompatis lin.

Ni tre bedaŭris, ke provizore estis neeble akiri informojn pri miaj gepatroj, sed ni esperis, ke la stranga statisto — promenanta reklamilo kaj maristo — iam reaperu por flankenŝovi la nigran tukon, kiu tiel mistere pendis antaŭ mia naskiĝa loko kaj antaŭ la nomoj de mia parenkaro.

Intertempe la tagoj, semajnoj kaj monatoj pasis por mi agrable; mia studado plaĉis al mi pli ol vagadi en la mondo kiel cigano, aŭ serĉkolekti ovojn sur la dunoj de mia Insulo, kaj ambaŭ miaj instruantoj estis kontentaj pri miaj progresoj. Mi studadis regule pli ol dek horojn ĉiutage kaj kiam la somero revenis, mi multfoje promenadis kun Aleksandra kaj Maksimo Bjelski, dum kio li ĉiam instruadis min en la ĉiutaga konversacio. Ĝenadis min tamen, ke li ĉiam kondukis al mi, kvazaŭ mi estus tre eminenta sinjoro. Ĉiufoje li nomis min „sinjoro Romeskaŭ“, kvankam mi insiste petadis lin, nomi min Jafet, ĉar mi deziris esti intima kun mia instruisto, kiu estis la plej bona, la plej sincera kaj modesta kaj sam-

tempe la plej klera vireto, kiun oni iam renkontis. Li tre honoris sinjoron Romeskaŭ, kiu estis, li al mi diris, la plej fama violonisto de sia tempo.

Dum unu el niaj promenadoj, al kiu ne partoprenis Aleksandra, mi parolis kun li pri la stranga maniero, en kiu mi envenis en la domon de Romeskaŭ.

— Mi legis pri tio en la gazeto —, diris li, kaj li rakontis al mi pri la morto de l' filo de Romeskaŭ, kiel oni estis trovinta min duone frostita en la dometo kaj kiel la familio Romeskaŭ de tiu tempo adoptis min kiel sian propran filon en memoro al la mortinto.

— Ĉu ĉio tio staris en gazeto? — demandis mi.

— Jes, kaj ke la familio klopodas malkovri la naskiĝlokon kaj la gepatrojn de la knabo.

— Ĉu iam ili malkovros ĝin?

— Ni esperu —, li diris, frotante al si la manojn, — kaj verŝajne viaj gepatroj, kiuj perdis vin en tiu stranga maniero, revidos vin poste kiel faman artiston.

— Kiel faman artiston? — mi demandis surprizite.

— Jes —, li diris, ruĝiĝante kaj frotante ankoraŭ pli forte la manojn, — sinjoro Romeskaŭ diris al mi, ke vi havas talentojn, kaj ke vi fariĝos fama violonisto. Vi faris en malmultaj monatoj pli da progresoj sur la violono ol aliaj en multaj jaroj. Vi ne konscias tion, sed pli poste vi spertos ĝin mem.

La vireto vidis, ke mi tute ne scias, ke mi estas talentulo, ĉar mi miris tiom pri tio, kion li diris, kaj subite li kaptis mian brakon, haltigis la promenadon kaj balbutis:

— Precipe ne diru al sinjoro Romeskaŭ, ke mi parolis pri viaj talentoj.

— Kial? — mi demandis.

— Ho —, li respondis, lasante mian brakon kaj promenante plue, — eble li ne deziras, ke mi parolu

pri tio; eble li ne volas, ke vi konsciui pri viaj talentoj, ĉar alie li ja mem ĝin estus dirinta al vi —, kaj ruĝiĝante pli multe, li nerveme frotadis al si la manojn. La bonkora vireto timis esti malagrabla al sinjoro Romeskaŭ, kies adoptiton li instruis. Mi trankviligis lin, promesante silenti pri tio, kion li estis konfidinta al mi, kaj ĉar li refoje frotadis al si la manojn, mi demandis:

— Diru foje, sinjoro Bjelski, ĉu al vi estas tiom malvarme?

— Ho ne! — li respondis, — tute ne, la vetero ja estas nun bona kaj tute ne malvarma.

— Kial do vi ĉiam tiel frotadas al vi la manojn? — mi demandis; en mia naiveco mi ne sciis, ke li faris tion pro nervemeco.

— Ĉu mi ĉiam frotadas ilin? — li diris.

— Jes, vi faras; kial?

— Nu —, li respondis, — eble mi frotadis ilin; tion mi faras senkonscie, ĉar mi estas iom nervema.

— Kial vi estas nervema?

— Tia estas mia karaktero —, li respondis.

— Ne ofendiĝu, sinjoro Bjelski, ĉar mi demandis ĝin —, mi diris, ĉar mi ekpentis pro mia scivoleco. Li rigardis min kun surprizo.

— Mi neniam ofendiĝos pro kio ajn, kion vi faros aŭ diros al mi —, respondis la vireto, — ĉar vi kondutas je mi ĉiam tro atable kaj tro amike. Ni promenadis plue; ŝajnis al mi, ke li estis rakontonta, kial li estas tiel nervema, sed li silentis. La kialon de lia stranga nervemeco mi eksciis poste.

Tre mi ĝojis pri miaj talentoj, kaj post tiu promonado kun Bjelski mi pli ol antaŭe dediĉis min al mia violono, kaj mi rimarkis, ke Romeskaŭ estis surprizita pri miaj pli kaj pli grandiĝantaj progreŝoj en la muziko. Vespere mi multfoje ludadis, dum Aleksandra min

akompanis per la piano. Mi ne sciis, ĉu mi ludas facilajn aŭ malfacilajn muzikaĵojn, ĉar miaj progresoj fine ebligis al mi ludi preskaŭ ĉion, kion Romeskaŭ metis antaŭ min. La tiel nomata tekniko je mia muzikilo tute ne estis por mi malhelpaĵo, kaj Romeskaŭ estis surprizita, ke mi preskaŭ sen peno venkis teknikajn malfacilaĵojn, kiuj al li mem estis prenintaj tiom da studotempo. Kelkfoje li skuis la kapon dirante: — Estas nekomprenoble! — kaj kredante, ke mi ne manuzis la arĉon laŭ lia deziro, mi rigardis lin por ekscii, ĉu mi pekis kontraŭ la teknikaj reguloj, sed tiam li ridetis, dirante: — Nur ludu plue, mia knabo, vi baldaŭ superos min mem —. Mi ne konsciis, ke mi ludadis preskaŭ neriproĉeble la plej malfacilajn komponaĵojn, super kiuj Romeskaŭ mem devis studadi longan tempon. Miaj fingroj kvazaŭ per si mem flugis super la kordoj kaj ĉion, kion mi ludis du- aŭ trifoje, mi sciis parkere. Plej multe tamen surprizis Romeskaŭ la fantaziaĵoj, kiujn mi povis ludi; en tio, li diris, mi superas lin jam de longa tempo. Ankoraŭ neniam mi ludis antaŭ la publiko, ĉar Romeskaŭ nur konsentus tion, post kiam mi povus esti certa pri granda sukceso. Ĉeestante, kiel aŭskultante koncertojn, mi spertis, ke Romeskaŭ estis konsiderata kiel granda, eĉ fama artisto; li estis ĉiam varme aplaŭdata, ricevis preskaŭ ĉiam ghirlandojn de la aŭskultantaro, sed multfoje lia muziko jam ne plaĉis al mi. Kvankam mi estis juna knabo, mi konsciis, ke mankas io al lia arto kaj ke mi mem ludus kelkajn muzikaĵojn tute alie ol li. Kiam mi ludadis, mi estis kvazaŭ la komponisto mem kaj sentis funde tion saman, kion li sentis komponante sian muzikan verkon. Aleksandra nur malofte kunludis antaŭ la publiko. Ŝia patro opiniis prave, ke ŝi ludas bonete, sed ke ŝi ne havas sufiĉan talenton por aperi antaŭ la publiko, al-

menaŭ kiel solludantino. Ŝi komprenis tion kaj kontentiĝis kunludi en koncertoj.

Iun vesperon Romeskaŭ studadis komponicion, kion li devus solludi dum granda koncerto, en kiu partoprenus aliaj famaj artistoj. Li ne estis kontenta pri sia ludomaniero kaj petis min ludi. Mi jam travidis la notojn kaj plene komprenis la ĝustan percepton de la komponisto; mi ankaŭ konsciis, ke Romeskaŭ ne ĝin komprenis, sed tion mi ne kuraĝis eldiri. Mi prenis la violonon kaj ludis. Li aŭskultis ĝin la fino kaj estis ravita. — Vi jam superas min! — li diris kaj kaptante la instrumenton, li refoje ludis; sed sentante, ke li ne povas imiti mian ludadon, li ĵetis la arĉon kaj eksidis, rigardante antaŭ sin kun sulkiĝinta frunto. Mi rigardis lin kaj timante, ke mi kaŭzis al li malĝojon, mi kaptis lian manon kaj diris:

— Vi ja ne koleras pro mi?

Li premis mian kapon al sia brusto kaj ekkriis:

— Ho ne, mia knabo; sed mi konscias, ke al mia ludado mankas multe tro multe. Vi ludis kvazaŭ vi estus la komponisto mem —, kaj atendante momenton, dum kiu li pripensadis, li diris plue:

— Mi ne ludos tion dum la koncerto, sed vi, Jafet!

Mi ne kredis al miaj oreloj kaj diris:

— Ĉu mi ludos tion?

— Jes, vi!

— Sed mi ne povoscios.

— Vi povoscios, vi havas la bezonan talenton por ludi tion, kaj vi ludos.

— Sed mi neniam antaŭe ludis por la publiko.

— Iam vi ja devus ludi; nu, vi faros tion anstataŭ mi, kaj vi havos sukceson.

— Sed mi neniam solludis por tiom da homoj.

— Des pli granda estos la sukceso.

— Tamen la afiŝoj estas jam presitaj.

— Tio ne gravas, mia nomo estas Romeskaŭ kaj vi ankaŭ portas tiun nomon.

— Sed mi ne havas nigraĵu vestojn.

— Mi pretigos ilin jam morgaŭ.

— Sed la publiko atendas vin kaj ne min.

— Silentu! — li diris frapetante mian ŝultron, — vi ludos, kaj ĉar vi estas mia lernanto, ni ambaŭ estos ne nur kontentaj, sed eĉ fieraj pro via unua publika solludado.

Aleksandra estis enirinta la ĉambron dum nia interparolado; ŝi estis ravita pro miaj estontaj laŭroj kaj ekridis, ekkriante:

— Mi ĉeestos, ĉu ne, paĉjo?

— Kompreneble! — diris ŝia patro.

La knabino kuris for por sciigi la por ŝi ĝojigan novaĵon al la patrino.

Mi volis pli funde studadi la ludotan muzikajon, sed Romeskaŭ certigis al mi, ke tio estas tute superflua.

Jam la postan tagon la tajloro faris por mi la nigran kostumon, kiun mi devus surhavi dum mia unua koncerto. Tiun postan tagon je la ordinara horo venis Maksimo Bjelski por plue instrui min pri la rusaj vortoj. Mi jam sidis en mia studejo, kiam li eniris nerve kiel kutime. Li donis al mi sian manon, riverencis kaj antaŭ ol eksidi, flustris al mi en la orelon, frontante siajn manojn:

— Sinjoro Romeskaŭ, vi do plenumis vian promeson?

— Kian promeson?

— Pri viaj talentoj. Vi ja memoras, ke mi parolis pri ili antaŭ kelkaj tagoj?

— Ho, mi komprenas; sed jam ne estas necese, ke mi ĝin plenumu, ĉar sinjoro Romeskaŭ mem diris al mi hieraŭ, ke mi havas talentojn.

— Cu vere? — li diris ruĝigante, dum li eksidis.

— Jes, kaj postmorgaŭ en la vespera koncerto mi solludos antaŭ la publiko en la granda koncertejo. —

— Ĉu vere? — li diris.

— Jes, kaj vi ĉeestos ankaŭ.

— Ĉu mi!?

— Vi ekhavos enirbileton por du personoj —, kaj mi prezentis al li la invitajon. Li refoje estis frontonta siajn manojn, sed ĉar li devis akcepti la bileton, li ĉi tiun fojon ne frotadis ilin.

— Dankon, sinjoro Romeskaŭ —, li diris, — mi ĉeestos kaj mia patrino akompanos min.

— Ĉu ŝi kutimas akompani vin al la teatro? — mi demandis.

— Pardonu al mi, sinjoro Romeskaŭ; mi neniam iras tien.

— Kial?

— Estas por mi tro multekosta —, li malkaŝe diris.

Al tio mi povis nenion respondi; mi ŝekve demandis plue:

— Ĉu vi ŝatas muzikon?

— Ho jes —, li diris, — mi tre ĝiu ŝatas, same kiel ĉiujn artojn.

— Nu, se mi povas fari al vi plezuron, mi multfoje prezentos al vi invitajon, ĉiu solludanto rajtas disdoni kelkajn, kaj vi faros al mi honoron akcepti ĉiam unu el miaj.

— Tre volonte, sinjoro Romeskaŭ —, li diris, kaj timante, ke estos tro malmodeste forbabili pli da tempo, li komencis instrui al mi la rusajn verbojn.

Nur poste, kiam mi funde posedis la rusan lingvon, mi eksciis, kiom da tempo la bona Bjelski bezonis por prepari siajn lecionojn. Li verkis speciale por mi fabelojn, en kiuj li uzis nur tiujn verbojn, kiujn li vo-

lis instrui dum la leciono. Li tamen neniam priparolis, eĉ neniam aludis la malfacilan taskon, kiun li propravole postulis de si mem, sed agis, kvazaŭ tio estus nur lia natura devo, tute ne pensante, ke la salajro, kiun li ricevis por tiu laboro, estis eble dekfoje tro malalta.

Post du horoj Aleksandra eniris kaj tio estis la signo, ke la kursohoro finiĝis. Ŝia patro ne venis post ĉiu leciono, ĉar li ne instruis plu al mi la muzikon, opiniante, ke mi ne bezonas pluajn teknikajn kaj teoriajn studojn en la muziko, sed ke mi mem povas ekzercadi min.

Maksimo Bjelski iris for post sia kutima manpremo kaj riverenco. Frotante siajn manojn, li malsupreniris la ŝtuparon kun mia invitaĵo en la poŝo kaj ekŝajnis al mi, ke la vireto portis ankoraŭ la samajn nigrajn vestojn, en kiuj li sin prezentis ĉe mi, kiam li al mi estis dononta la unuan lecionon, kaj la unuan fojon la ekpenso naskiĝis en mia kapo, ke mia instruisto estas malriĉa vireto, kaj mi decidis pensi pri rimedoj helpi al li, se eble.

Aleksandra interrompis miajn pensadojn.

— Via nova kostumo estas malsupre, — ŝi diris, — panjo deziras, ke vi tuj provalmetu ĝin —, kaj por plivigliĝi min, ŝi kaptis mian brakon kaj ni malsuprensaltetis la ŝtuparon.

Mi eksciis, ke la tajloro estis laborinta preskaŭ la tutan nokton por pretigi mian kostumon, kaj mi kompatis la viron, kiu pro mi ne povis ĝui sian dumnoktan ripozon. Volonte mi estus sendinta al li invitaĵon por la koncerto, por ke li povu admiri sian laboron, sed mi ne kuraĝis. Mi surmetis mian novan kostumon kaj rigardis min en la granda spegulo, kie mi povis vidi min de l'kapo ĝis la piedoj, kaj mi ekpensis pri miaj gepatroj sur la Insulo kaj pri Johano, kiel ili mirus, vidante min tiel bele vestitan, ĉar la diferenco inter la

ovoserĉanta bubo kaj Jafet Romeskaŭ estis grandega. Ĉiuj admiris min, sed plej multe admiris min la maljuna servistino, kiu okaze ĉeestis. Ŝi rigardis min kun surprizo kaj sen dubo komparis min kun la miizera vagulo, kiun ŝi vidis antaŭ kvar jaroj, kiam oni portis lin en la domon, pala kiel la morto kaj tiel malseka kaj malpura, ke li bezonis plenan funton da sapo por purigi al si la korpon. Pro ekmiro ŝi levis la brovojn kaj la manojn, kaj kiam ŝi eliris la ĉambron, mi aŭdis ŝin diri:

— Kiu do ekpensus, ke el tiu malpura bubo elkreskis tiel belega junulo!

Mi ridis, sed la dirajo de la servistino flatis min.

La vespero de la koncerto estis veninta. La muzikistoj sidis sur sia loko kaj mi sidis en ilia mezo. Mi rigardis la aŭskultantaron por vidi, kie sidas sinjorino Romeskaŭ kaj Maksimo Bjelski kun lia patrino. Mi ne serĉis longe; ili havis tre bonan lokon, kaj mi mansalutis ilin. Mia instruisto estis pli nervema ol iam; li sciis, ke mi devos solludi sur mia violono kaj esperis, ke mia unua apero antaŭ la publiko estu granda sukceso. La vireto, kiu sidis flanke de malgrasa proksimume sesdekjara sinjorino, kiu estis lia patrino, momenton interrompis la frotadon de siaj manoj, por montri al sia patrino, kie mi sidas. La vireto surhavis refoje la saman malnovan kostumon, sed nun li portis gantojn, kaj ĉar lia patrino estis vestita tre malnovmode, mi jam ne dubis pri ilia malriĉeco. Miaj rigardoj vagadis de ili al aliaj vizitantoj kaj subite kaj neatendite mi ekvidis en la mezo de la koncertejo sur parteraj sidlokoj tri mariste vestitajn virojn. Rigardante pli atente, mi rimarkis, ke la plej malgranda el ili estas la kuiristo Ivan. Li arde interparolis kun la du aliaj kaj faris tiom da gestoj per la longaj brakoj, ke li tute ne rimarkis, ke li vekis la

atenton de ĉiuj en lia proksimeco sidantaj homoj. Multaj sin amuzis pro lia stranga konduto kaj aliaj deziris, ke li sidu malproksime, por ke li ne ĝenu la tuj komenciĝontan muzikon. La timo, ke li ĝenu, tamen estis malpravigita, ĉar apenaŭ la muzikestro donis la signon de la komenciĝo, kiam Ivan plena je atento aŭskultis kun ridetanta vizaĝo, ne nur ne dirante unu solan vorton, sed ankaŭ sidante tiel senmove, kvazaŭ li estus skulptita altŝultra faŭno.

La unua numero de la programo, la uverturo de „Vilhelmo Tell“ pasis, kaj min trafis la bela violonĉelo, kiu per tremetantaj tonoj eligis la unuajn sonojn. Apenaŭ formortis la finalo, aplaŭdado eksplodis en la salono kaj la skulptita altŝultra faŭno subite fariĝis tiel moviĝema kaj tiel alparolis al siaj du kamaradoj, ke li denove altiris sur sin ĉiujn rigardojn.

Volonte mi estus forlasinta mian sidlokon dum momento, sed tio estis neebla, mi eĉ ne povis sciigi al Romeskaŭ, ke en la koncertejo estas persono, kiu eble povus doni informojn pri mia Insulo. Mi sekve restis sidanta kaj decidis atendi ĝis la paŭzo, ĉar mi estis certa, ke viro, kiu kun tiom da atento aŭskultis la muzikon, ĉeestus la tutan koncerton.

Du aliaj muzikajoj pasis kaj tiam venus laŭ la programo la vico de Romeskaŭ kun solludo sur violono.

Ĉiuj atendis ion belan, ĉar Romeskaŭ estis amata kaj fame konata artisto. Mia koro ekbatis, kiam Romeskaŭ ekstaris kaj alpaŝis antaŭ la publikon. Ĉiuj rigardis lin kun surprizo, ĉar li ne kunportis sian instrumenton. Anstataŭ ludi li sciigis al la publiko, ke ne li ludos, sed ke la juna Jafet Romeskaŭ, lia adoptita filo kaj lernanto anstataŭos lin. — Mi esperas —, li diris, — ke la publiko estu iom indulgema je la juna violonisto —, sed li atendis samtempe, ke la talento de la

juna artisto, kiu per sia unua publika ludado komencis sian muzikan karieron, estas tia, ke neniu en la salono bedaŭrus la anstataŭigon.

Ĉiuj estis ekaŭdintaj, en kiu mirakla maniero mi estis savata de certa morto en la tago, kiam la ĉerko de la juna Romeskaŭ estis portata al mia „dometo“, kaj ĉiuj sciis, ke Romeskaŭ adoptis la junan fremdan knabon, sed neniu, aŭ preskaŭ neniu iam ekaŭdis pri tio, ke li instruis al tiu knabo sian arton. Estis do memkompreneble, ke ĉiuj kun streĉita atento rigardis min, kiam mi je ĉi tiu koncerto ekstaris por alpaŝi al la antaŭaĵo de la scenejo. Zumado de miloj da flustrantaj voĉoj trairis la salonon, sed kuraĝe mi staris antaŭ la publiko kaj ekludis. La zumado tuj eksilentis; ĉiuj aŭskultis, ĉar ĉiuj estis scivolaj. Mi tute ne atentis la aŭskultantaron; mi ludis, kvazaŭ mi starus en mia studejo. Min ne tuŝus aplaŭdoj de la publiko, ĉar mi tute ne estis ambicia; min nur tuŝus, ĉu Romeskaŭ estus kontenta pri mi. Estis al mi, kvazaŭ neniu krom mi mem sin trovas en la koncertejo; neniu mi vidis, nenion mi aŭdis krom la sonoj de mia violono. Mi ludis la muzikajon sen notoj antaŭ mi, ĉar ili estis al mi superflujaj; mi ne bezonis ilin, ili staris en mia animo kaj mi redonis ilin, kiel mi ilin sentis. Apenaŭ la finalo formortis, mi rigardis la aŭskultantaron kaj ĉiuj sidis antaŭ mi tiel senmovaj, kvazaŭ ili atendus ian daŭrigon; la muzikajo tamen estis finludita. Mi rigardis Romeskaŭ starantan malproksime, lia vizaĝesprimo montris kontentecon, kaj mi estis feliĉa; tio sufiĉis al mi, kaj mi estis irona al mia sidloko, kiam la surprizo de la aŭskultantoj estis pasinta. Post surprizo sekvis ĝenerala admiro, kaj longa tondra aplaŭdado eksplodis. Mi ne sciis, kiel konduki kaj refoje rigardis Romeskaŭ. La aplaŭdado ne finiĝis. Kelkaj kriis: — Biz! ... Biz! — La orkestestro flustris,

revokinte min: — Riverencu! — Sed mi ankoraŭ neniam riverencis; mi nur vidis la riverencojn de Maksimo Bjelski, sed neniam mi mem faris unu. Konsciante, ke mi dankis mian sukceson al mia bonfaranto kaj instruanto en muziko, mi alpaŝis al li, ekkaptis lian manon, kondukis lin antaŭ la publikon kaj faris la plej mallertan riverencon, kiu iam sur scenejo fariĝis.

Kiam mi residiĝis sur mia sidloko, mi rigardis sinjorinon Romeskaŭ kaj Aleksandra, kaj mi vidis, ke ili partoprenas mian feliĉon; mi rigardis poste Maksimon Bjelski, kiu, mi kredas, la tutan vesperon ne perdis min el la okuloj. Li estis tiel ruĝa pro nura entuziasmo kaj feliĉa pro mi, ke lia vizaĝo ŝajnis esti ruĝe kolorigita. Kiam fine mi rigardis la kuiriston, li sidis ankoraŭ kiel skulptita altŝultra faŭno kaj tute ne aplaŭdis; mi demandis al mi, ĉu li eble estis rekoninta min kaj ĉu li estis kaptita de tia surprizo pro la neatendita revido, ke li jam ne povis sin movi.

Apenaŭ la orkestrestro demetis sian bastoneton post la lasta numero de la programo antaŭ la paŭzo, kiam mi ekstaris por serĉi okazon, paroli kun mia amiko Ivan, sed kiom ajn mi serĉadis, nenie li estis trovebla. La sidlokoj de la tri maristoj estis neokupitaj kaj la maristoj estis for. Mi okule serĉis en la apuda teatra trinkejo, sed tie estis sidantaj amase tiom da personoj, ke mi ne vidis Ivan kun liaj kamaradoj. Tial mi petis folieton da papero ĉe la bufedo kaj skribis sur ĝi la jenon:

— Amiko Ivan, atendu min post la koncerto ĉe la elirejo de la teatro, mi devos paroli kun vi —, kaj mi subskribis „Jafet“. Tiun papereton mi metis sur lian sidlokon en la teatra parteroj kaj petis al apude sidanta sinjoro, enmanigi min letereton al la plej malgranda maristo, post kiam li revenus el la promensalono. Post la paŭzo mi ankoraŭ unu fojon devis solludi kaj la suk-

ceso estis la sama kiel post mia unua solludado. Kun granda bukedo (miaj unuaj laŭroj) mi returnis min al mia seĝo. La maristoj tamen ne revenis en la koncertojn kaj tion mi tre bedaŭris. Mi jam en antaŭaj tagoj estis pensinta viziti la patrinon de la kuiristo, sed nenie mi povis trovi la domon, kie mi konatiĝis kun ŝi dum mia unua promenado kun Ivan en la urbo, kaj ne konante ŝian familian nomon, mi ne povis akiri informojn pri ŝia loĝejo, nek pri ŝi mem.

Kiam la koncerto estis finita, gesinjoroj Romeskaŭ kun Aleksandra kaj mi returnis sin hejmen en kaleŝo. Mezvoje okaze jetante rigardojn tra la veturila fenestro sur la lumigitajn stratojn, mi rimarkis du virojn, kiuj kun peno iris sur la trotuaro, trenante inter si trian viron, kiu ŝajnis esti malsana, ĉar liaj kruroj ne kapablis porti lin. Rigardinte pli atente, mi ekvidis, ke tiu tria viro estis mia amiko, la kuiristo. Mi haltigis la kaleŝon kaj aliris al la maristoj, sed kiom ajn mi faris mian eblon paroligi la altsultrulon, li silentadis kiel fiŝo, ĉar li estis trinkinta dum la paŭzo tiom da akvosimila likvoro, ke li ebriiĝis kaj eĉ tiagrade, ke li jam vidis kaj aŭdis nenion. Li rigardis min per siaj vitrecoj okuloj, kvazaŭ li estus idiotulo; lia ĉapo sidis malrekte sur liaj haroj kaj verŝajne estis falinta de lia kapo, ĉar ĝi estis kotmakulita; liaj pendantaj kaj treniĝantaj kruroj estis tiel longaj, ke ŝajnis, kvazaŭ la maristoj trenus kun si home vestitan orangutangon. Mi kompatis la viron, sed ne povis helpi al li. Post kiam mi notis la nomon de la ŝipo de la maristoj, mi reeniris la kaleŝon por plue reveturi hejmen.

Oka Ĉapitro.

Mi vizitas Ivan — Viva la brando! — Mi legas, ke mi estas artisto — Vojaĝo eksterlanden — Mi savas homan vivon — Nova samhejmano — La teruriga letero — La frostulo rakontas — Netaŭgaj buboj kaj procentegisto — Respondo al la teruriga letero — Kion Maksimo Bjelski volas aĉeti per sia perlaborita mono.

La postan tagon mi aliris al la haveno kaj serĉis „Petro la Granda“. Ĝi kuŝis ankrita proksimume cent metrojn de la kajo. Mi luis boateton kaj kun helpo de lerta remisto baldaŭ staris sur la ŝipo, kie mi tuj trovis la kuiriston en lia kuirejo. Li jam tute malebriĝis kaj kuiradis, kvazaŭ li la pasintan tagon trinkis nenion krom pura akvo. La „faŭno“ tute reŝanĝiĝis en modestan pure vestitan kuiriston kun ĉapo pli blanka ol neĝo. Mi salutis lin, sed li min ne rekonis.

— Ivan —, mi diris, etendante al li mian manon.

— Mi estas Ivan, la kuiristo —, li diris, — sed mi vin ne konas.

— Rigardu min fikse, kaj vi rekonos min.

— Mi rekonas —, li diris, — almenaŭ se min ne trompas miaj okuloj; vi estas la juna violonisto, kiu ludis hieraŭ vespere en la teatro.

— Mi estas; sed ne kiel violonisto mi etendas al vi mian manon, sed kiel bona konato. Ĉu vi vere ne min rekonas?

— Ŝajnas al mi, ke mi pli frue vidis tiujn trajtojn kaj okulojn —, li diris, sulkigante la frunton por pli

bone pripensadi, — sed mi ne memoras, kie mi vidis ilin pli frue.

Li frapetis al si la frunton per la montra fingro, kvazaŭ tiu manparto helpus al lia memoro, sed ĝi ne helpis, ĉar post momento li sensulkigis la frunton kaj diris plue:

— Mi ne plu memoras.

— Ĉu vi ankaŭ ne memoras vian junan subkuiriston?

— Mian sub...!?... pro la diablo!... Ĉu vi estas...? Nu, tio ja estas neebla; la juna Jafet ne ludis violonon.

— Sed estas eble, ke li lernis tion poste.

Ivan kaptis mian manon, kiun mi ankoraŭ etendis al li, kaj li ekkriis:

— Dank' al Dio, ĝi estas li mem!... kaj kiel vi sanas?

— Ho, tre bone; sed post kiam la policanoj kondukis vin en la malliberejon, mi travivis terurajn tagojn.

Ivan aspektis subite tre gravmiena kaj diris:

— Pardonu al mi, mia juna sinjoreto, ke mi tiam tiel malbone zorgis pri vi; sed tiam mi trinkis tro multe da brando.

— Same kiel hieraŭ vespere —, mi diris.

— Vi estas prava, mi trinkis tro multe. Kiam mi estas surŝipe, mi neniam trinkas brandon, eĉ ne unu solan glaseton; sed kiam mi eliras kun kamaradoj... nu, tiam mi ne povas ne trinki. Ĉiam mi tiam diras al mi: Ivan, trinku nur unu solan glaseton da brando; sed trinkinte ĝin, mi ĉiam diras plue: ... ankoraŭ unu solan glaseton mi trinkos, kaj nenion plu; sed ho ve, post la dua glaseto mi jam ne povas kontraŭstari mian propran volon, kaj mi trinkas la trian, kaj trinkinte la trian, mi pensas, ke mi povas fortrinki centon da glas-

etoj. Sed mi juras, ke mi jam neniam trinkos pli ol unu solan glaseton; jen mia mano —, li diris.

Mi rakontis per malmultaj vortoj miajn aventurojn kaj poste demandis, kiel sanas lia patrino.

— Mirinde bone! — li diris, — hieraŭ posttagmeze mi alportis al ŝi preskaŭ tutan mian monon, ĉar se mi gardus ĝin en mia poŝo, tiam la policanoj eltirus ĝin, post kiam mi trinkis mian lastan glaseton, kaj tiam ŝi havus nenion.

— Kial vi ne donas al ŝi ĉion? — mi demandis.

— Ho, kia malsaĝa demando; tiam mi ja ne povus eliri por trinki unu solan glaseton kun la kamaradoj; kaj unu glaseton mi ja povas trinki, tia estas mia karaktero.

Mi demandis pri Jafet.

— Jafet! sed vi ja estas Jafet mem.

— Mi aludas mian hundon.

— Vian hundon! . . . Ho, mi memoras, ĝi kuŝis mortinta sub tiu renversita kesto kaj ni ĵetis ĝin akvon.

— Ĉu vi scias —, mi demandis plue, — ĉe kiu insulo vi trovis min sur la maro?

— Neniu sciis tion —, li respondis, — nek la kapitano, nek unu sola alia maristo sciis tion, eĉ ne la doktoro. Ni kredis, ke via boato venis el unu el la holandaj aŭ germanaj insuletoj, sed ĉar vi parolis nek holande nek germane, ni konjektis fine, ke vi falis el la luno —, kaj la kuiristo laŭte ekridis.

Mi ekvidis, ke mi ne staras sur la ŝipo, kies maristoj trovis min sur la maro, kaj mi demandis al Ivan novaĵojn pri la kapitano, pri la doktoro kaj pri la ceteraj maristoj de lia antaŭa ŝipo.

— Ĉiuj fundiris —, li respondis.

— Ĉu ili fundiris!? — mi ekkriis.

— Jes, mia juna sinjoro, ĉiuj dronis; mi sola estis savita.

— Kiel okazis tio?

— Nu, post kiam la buboi jetis min tra tiu vitro, mi devis pagi por nova, sed mi jam fortrinkis tutan mian monon, tiel ke la policanoj kondukis min malliberejon, kie mi restis plenan monaton. Dum tiu monato mia kapitano ekvelveturis sen mi, kaj ĉar la ŝipo pereis, la tuta ŝipanaro fundiris kaj dronis... nur Ivan la kuiristo ne fundiris kun ili dank' al liaj glasetoj da brando; sekve: Vivu la brando!! kaj li svingis siajn longajn brakojn.

Mi nun sciis, ke Ivan ne povas informi min pri mia „Insulo“, kaj ĉar mi devis foriri, mi diris:

— Nu Ivan; salutu vian patrinnon por mi kaj sanu bone.

Ivan premis mian manon, dirante:

— Mi ĝojas, ke mi falis tra tiu vitro, ĉar sen tio ni ambaŭ verŝajne ne plu vivus.

— Kial? — mi demandis tute ne pripensante lian diradon.

— Ho! tio ja estas memkomprenebla. Sen miaj glasetoj mi estus returninta min kun vi al la skuno kaj ni estus dronintaj same kiel la aliaj; sekve dank' al la glasetoj da brando mi vivas ankoraŭ, kaj vi fariĝis fama violonisto... Nu, mia juna sinjoro —, kaj li forte premis mian manon, — sanu bone; vi faris al mi grandan plezuron, ĉar vi ne forgesis min, kaj se iam mi povos servi al vi, mi faros mian eblon.

— Vi povos servi al mi —, mi diris; — se iam vi renkontos tre longan mariston, nomitan Johano, parolu tiam pri mi kaj se li memoros min, petu lin skribi al mi, kie mi naskiĝis kaj kiel mi nomas min.

La kuiristo suprentiris la brovojn kaj ŝultrojn, ekkriante:

— Sed kiel mi rekonos vian Johanon?... Estas tiom multe da longaj maristoj.

— Nur atentu lian horloĝan ĉenon; se ĝi estas far-

ita el arĝentaj moneretoj, tiam la portanto, la serĉota longa maristo, estas mia Johano.

— Nu, mi petos al ĉiuj longaj maristoj diri al mi, kioma horo estas . . .

Mi interrompis la kuiriston kaj diris:

— Ne faru tion, ĉar kvankam Johano portas belan ĉenon, la poŝhorloĝo mankas.

— Nu bone, mi atentos nur la ĉenon —, li diris.

Mi ellasis lian manon, donis mian adreson kaj adiaŭ-diris lin.

La vesperon de tiu sama tago Romeskaŭ enmanigis al mi la ĵurnalon kaj fingre montris artikolon, subskribitan de „H. M.“ Tiu „H. M.“ estis severa kritikisto, kies artikoloj timigis eĉ la plej bonajn artistojn, ĉar li indulgis neniun. Mi sciis, ke mi estas legonta kritik-aĵon pri mia solludado, sed la literoj „H. M.“ jam ne timigis min, ĉar la vizaĝo de Romeskaŭ trankviligis min antaŭe. En tiu artikolo mi sciigis, ke mi ĉiurilate estas la plej lerta violonisto, kiu en la lastaj jaroj partoprenis la koncertojn en la imperiestra teatro de Patersburgo. Romeskaŭ ne estis jaluzaj; sincere li gratulis min, certigante, ke mia famo estas fondita.

De tiu tempo mi regule ludis antaŭ la publiko tutan jaron, kaj la famo de mia talento disvastiĝis ĉiuloken.

Mi nun estis pasiginta kvin jarojn ĉe la familio Romeskaŭ kaj estis faronta artistan vojaĝon eksterlanden. Romeskaŭ, lia edzino kaj Aleksandra akompanus min. Provizore mi kaŭze de tio ne povus plu sekvi la kursojn de Maksimo Bjelski, kaj tion mi sciigis al li. Estis por mi granda malagrablo paroli pri tio al mia instruisto, unue ĉar mi ankoraŭ ne lernis sufiĉe la francan lingvon, kiun mi ja parte devus koni kiel artisto, ĉar mian gepatran lingvon, la rusan, neniuj komprenas en eksteraj landoj; due mi supozis, ke Bjelski, kiu estis laŭ mia opinio mal-

riĉa, tre bezonus la salajron, kiun li ordinare ricevis por siaj lecionoj. Mi tamen ĝojis, ke nia vojaĝo daŭrus nur ses monatojn; post tiu tempo li ja tuj povus rekomenci la interrompitan kurson, precipe en la franca, kaj se necese, en aliaj lingvoj.

Semajnon antaŭ nia foriro mi rakontis al li nian intencon. Li fariĝis tiel nervema, ke mi kore kompatis lin, sed por iom rekompenci al li, mi elpensis mensogeton, dirante, ke mi deziras daŭrigadi liajn lecionojn skribe. Mi interkonsentis kun li, ke li sendu al mi ĉiusemajne francan literaturajon kun klarigaj notoj, kiujn mi regule studadus, kaj lian salajron mi jam antaŭe pagus al li. Komence li malakceptis tiun monon pro nura modesteco, sed ĉar mi insistis, li fine cedis, esprimante sian koran dankon. La kompatinda vireto adiaŭis nin kun pala vizaĝo, kiu tre trafis min. Starante antaŭ ni por danki gesinjorojn Romeskaŭ pro ĉio, kion ili faris por li, li tiel terure balbutis kaj tiel nerve me frotadis al si la manplatojn, ke fine Romeskaŭ ekkriis, frapante lian ŝultron:

— Sufiĉas, sinjoro Bjelski; ni ĉiuj komprenas, kion vi estas al ni dironta. Ni dankas vin reciproke pro viaj bonegaj lecionoj al mia adoptita filo, kaj por esprimi ne nur vorte, sed alimaniere nian dankon, ni petas vin, ke vi bonvolu akcepti ĉi tiun koverton. Rigardu la enhavon kiel nuran pruvon de nia estimo kaj danko.

Kiam li estis for, riverencinte kvar fojojn (ni estis kvarope), Romeskaŭ diris al mi, ke li estis metinta en tiun koverton tiom da mono, kiom Bjelski regule ricevis kiel salajron en ses monatoj, kaj mi dankis lin el la fundo de mia koro.

Mia vojaĝo estis, por tiel diri, triumfojaĝo. Ĉie kie mi ludis, mi estis aplaŭdata kiel ankoraŭ preskaŭ neniu antaŭ mi.

Jam semajnon post mia forveturo el Patersburgo Maksimo Bjelski sendis al mi sian unuan skriban lecionon. Mi ĉiam estis admirinta lian fervorecon, sed pli ol iam mi ĝin admiris, post kiam mi trarigardis lian unuan senditan literaturaĵon kun la klarigaj notoj. La vireto sendis al mi la duonon de la romano Romain Kalbri de Hektoro Malot, kun tiom da skribitaj notoj, ke li bezonis almenaŭ dek horojn por pretigi tiun lecionon.

Mi tuj skribis al li, ke mi havas malmultan tempon (pro miaj koncertoj) por funde studadi la lecionon, kaj ke mi atendas la duan leteron nur post du monatoj. Tiel mi volis ŝparigi al li lian tempon. Post la dua leciono mi sciigis al li, ke al mi mankas ĉiu tempo kaj okazo por plue studadi, kaj ke mi ne atendas la trian leteron. Li sendube ne kuraĝis persisti sian diligentecon kaj fervoron, ĉar la trian fojon mi ricevis nur lian leteron, en kiu li esprimis sian dankon, esperante, ke mi baldaŭ revenu la urbon por denove sekvi lian buŝajn lecionojn.

Tamen ni ne tiel baldaŭ reiris Patersburgon, kiel mi atendis, ĉar mia ludado havis ĉie tiom da sukceso, ke ni prokrastis la reirvojaĝon ĝis post ses aliaj monatoj. Fine post forestado dum plena jaro ni ekvojaĝis hejmen, kie min jam atendis invitajo de la imperiestra teatro por ludi en benefica koncerto. Provizore mi malakceptis, ĉar mi bezonis ripozon post mia streĉa laboro.

Tagon antaŭ nia alveno en Patersburgo mi skribis al mia instruisto, petante lin veni al ni dum unu el la tuj sekvantaj tagoj por preparoli mian novan buŝan studadon. Preskaŭ semajno pasis, sed Maksimo Bjelski ne venis, kvankam ni jam estis kelkajn tagojn en la urbo. Ni estis surprizitaj, ĉar ĉiam antaŭe niaj petoj estis por li kiel ordonoj. Timante, ke li ne ricevis mian leteron, mi skribis alian, sed Bjelski ne aperis.

Mi estis skribonta trian, sed antaŭ ol komenci, mi torĵetis la plumon por tuj esplori, ĉu io eksterordinara okazis al la vireto. Mi sciis, kie li loĝis, kiam ni forvojaĝis eksterlanden, kaj direktis miajn paŝojn al lia loĝejo. Post kiam mi sonorigis, aperis en la duone fermita pordo grasa malĝentile aspektanta viro. Mi demandis, ĉu en ĉi tiu domo loĝas Maksimo Bjelski.

— Loĝis tie ĉi —, li respondis.

— Ĉu loĝis? — mi demandis.

— Jes, li foriris antaŭ semajno, post kiam lia patrino estis mortinta.

— Ĉu lia patrino mortis!? . . . kaj kie li loĝas nun?

— Mi ne scias.

— Ĉu li ne postlasis sian novan adreson?

— Li postlasis nur ŝuldojn.

Mi ekmiregis.

— Ĉu Maksimo Bjelski ŝuldas al vi monon?

— Jes, li foriris ne paginte du monatojn da lupago.

— Li foriris propravole?

— Kiu vi estas, kiu estas tiel scivola pri li?

— Lia amiko Romeskaŭ.

— Ho, vere!? — diris plue la grasa viro, montrante vizaĝon iom pli neĝentilan ankoraŭ.

— Kaj mi dezirus ekscii, ĉu li foriris propravole.

— Mi ne lin retenis, sed ĉar li jam ne pagis tiun lupagon por du monatoj, mi ne povis toleri lin pli longe en mia ĉambreto, kaj aliulo luis ĝin.

— Sekve, vi devigis lin foriri —, mi diris indigne.

Anstataŭ respondi, la grasulo jetfermis la pordon antaŭ mia nazo kaj jen mi staris sur la strato ne sciante kion fari por informiĝi pri mia instruisto. Mi antaŭsentis, ke la vireto pro malriĉeco estis cedinta sian ĉambreton, kaj timego ekkaptis min, ke li verŝajne sin trovas en granda mizero. Kie serĉi lin? Enprofundiĝinte en

pensojn, mi iris plue. La mortintejo estis proksima kaj vole nevole mi eniris ĝin tra la nefermita barpordo, tra kiu mi tiom da fojoj iris en la lastaj jaroj, ĉar la mortintejon mi vizitis ofte; ĝi ja rememorigis al mi la plej strangan aventuron de mia vivo. Irante laŭ vojetoj preter la familia tombejo de Romeskaŭ kaj preter la benketo, sur kiu mi pasigis kelkajn noktajn horojn dum miaj vagadoj, mi iom post iom alproksimiĝis al la dometo, kiu estis iam mia dormejo kaj kiun mi neniam pasis ne rigardante internen. Ankaŭ nun mi rigardis internen, sed kun ekkrio de teruro kaj abomeno mi paŝis posten. Mi tamen tuj ekhaltis, rapidiĝis refoje antaŭen tra la pordeto, kaj elpoŝiginte mian tranĉilon, detranĉis kordon, je kiu pendis viro. Ĉar la interno de la dometo ĉiam estis nebone lumigita de la suno, mi ĉe la unua ekrigardo ne vidis, kiu estas tiu viro, sed stranga antaŭsento diris al mi, ke li estas Maksimo Bjelski. La viro estis maldika, malgranda kaj nigre vestita, same kiel mia instruisto. Liaj piedoj preskaŭ tuŝis la sablon, tiel ke mi sen peno povis tratranĉi la kordon tuj super la kapo de la pendiginto. Tiam faligante mian tranĉilon, mi kaptis la memmortiginton en miaj brakoj kaj kuŝigis lin sur la sablan plankon. Lia vizaĝo glitis laŭlonge de la mia, kaj mi sentis, ke ĝi estas ankoraŭ varmeta; la korpo tamen estis tiel malrigida, ke la genuoj fleksiĝis, kiam la piedoj tuŝis la teron. La ĉapelo de la kompatindulo glitis de lia kapo, kaj rigardante lin atente, mi rekonis mian instruiston. Mia koro kvazaŭ eksaltis en mian gorgon pro eksciteco, sed mi konsciis bone, kion mi farus. Tuj mi forigis la ŝnuron de lia kolo, sur kiu mi vidis ruĝetan strion; mi jam estis malbutonumonta lian veŝton, sed ĝi estis tiel vasta kaj plena je faldoj, ke mi lasis ĝin kiel ĝi estis. Mi levis lian kapon, subtenis ĝin kaj rigardis la vireton dum momento, kaj mi aŭskultis, ĉu

ekstere iu alproksimiĝas por helpi al mi, ĉar mi ne sciis kiel agi plu en ĉi tiu terura cirkonstanco. Subite la de mi subtenata kapo ruĝiĝis, la sango tamen tuj refluis kaj Bjelski aspektis ankoraŭ pli pala ol antaŭe. Mi timis, ke jam li estas mortinta kaj ekploris pro kompato kaj ĉagreno. Ŝajnis al mi tamen, ke li vivas, ĉar li ne tute malvarmiĝis kiel mortinto. Mi atendis denove momenton kaj ektuŝis lian bruston por senti, ĉu lia koro batas; en tiu momento liaj okulharoj ekmoviĝis kaj je mia neesprimebla ĝojo mi vidis, ke li levas la okulojn. Li do vivis; mi sekve ne venis tro malfrue. Levante pli alte lian korpon, mi klinis min super li kaj vidis, ke li min rigardas. Tremeto trakuris lian manon, kiun mi tenis, kaj profunda longa elspiro eliris el lia buŝo. Mi plorsingultis pro ĝojo kaj benis la momenton, en kiu mi estis forĵetinta mian plumon por tuj aliri al li. Li rekonis min kaj malfermis la buŝon por paroli, sed nur kelkaj nekomprenablaj sonoj trafis miajn orelojn.

— Kara amiko! — mi diris, — kion do vi faris!?

Dua elspiro eliris el lia buŝo kaj malforte li flustris

— Ili... mortigis... min.

— Kiu? — mi ekkriis.

— La netaŭgaj buboj.....

— Ĉu buboj pendigis vin?

— Kaj Barazof — ... li flustris plue.

— Barazof?

Li kapjesis kaj mi helpis al li eksidi, komprenante nenion pri tiu ĉi misterplena krimo. Mi ne konis Barazof, sed estis al mi enigmo, kiel homoj povus esti kapablaj mortigi la plej mildan kaj helpeman viron el la urbo, kaj mi kredis, ke li deliras. Li sidis kelkan tempon sin apogante kontraŭ mi kaj mi atendis, ĝis kiam liaj fortoj revenus. Fine li rekonsciiĝis tute, kaj mi diris:

— Amiko Bjelski, aŭskultu: vi estas malsana kaj ne povas resti tie ĉi. Kie vi loĝas? ... Mi kondukos vin hejmen.

Li ridetis grimace kaj diris per malforta voĉo:

— Mi ne havas plu hejmon.

— Kie vi do dormis la lastajn noktojn?

— En ĉi tiu dometo —, li diris, kaj tria elspiro eliris lian buŝon.

Mi ne plu aludis liajn mortigintojn, kredante lin deliranta, kiam li parolis pri la knaboj kaj Baraŝof; ĉar nenie sur la mortintejo mi estis vidinta personojn. La kompatinda vireto ne povis tamen pasigi pluan nokton sur ĉi tiu loko, kaj ĉar li ne havis plu hejmon, restis al mi nenia rimedo, krom konduki lin al miaj geadoptintoj, kaj mi demandis:

— Ĉu vi estas sufiĉe forta par piediri?

— Mi kredas ke jes, sed se mi povus, mi ne kuraĝus iri sur la stratojn.

— Kial? — mi demandis, kredante ke refoje li deliras.

— Pro mia kolo; la homoj vidos, ke ĝin ĉirkaŭas ruĝa strio, kaj ili divenos, kion mi faris.

— La strio preskaŭ foriĝis; nur ekstaru, apogu vin sur mia brako kaj ni iros kune.

Li klopodis levigi, tiam li diris:

— Mi timas, ke miaj kruroj estos tro malfortaj.

— Viaj kruroj? ... Ĉu ili doloras vin?

— Ne, sed mi ne manĝis dum tri tagoj —; kaj refoje li ridetis grimace.

Ĉu mi alportu manĝaĵon? — mi demandis.

Li ne respondis, sed kovrante al si la vizaĝon ambaŭmane, li ekploris mallaŭte, dum lia korpo tremetadis, kvazaŭ elektra fluo ĝin trakurus.

— Rekvietiĝu, mia amiko —, mi diris, — mi helpos al

vi; mi devas lasi vin dum momento, sed revenos tuj kun veturilo por veturilkonduki vin al mia domo.

— Al la domo de sinjoro Romeskaŭ? ... Sed kion li diros? ... Li jam faris por mi tro multe.

— Vi tamen ne povos resti sur la strato aŭ en tiu ĉi konstruajeto —, mi diris, rigardante ĉirkaŭe. Bjelski rimarkis, ke mi rigardas la portilojn, kiuj staris apude unu sur la alia kaj kiujn li estis uzinta por stari sufiĉe alte por fiksi la kordon al trabeto, je kiu li estis pendiginta sin. Li ĝemadis refoje kaj kovris al si la okulojn per la manoj, kvazaŭ li hontus pro tio, kion li faris.

— Ho patrino, patrino! — li flustris.

Mi estis kortuŝita kaj diris:

— Kuragŝon! ... mi ja volas helpi vin.

— Ho, li diris —, mi estas tro mizera; neniu povas helpi min.

— Kial?

— Barazof ne lasus min kvieta.

— Kiu estas tiu Barazof?

Li hezitis; tiam li respondis kvazaŭ por eviti la veron:

— Mi rakontos poste ... Ho Dio, Dio!

Mi pensis, ke li aludis la grasulon, kaj diris plue:

— Ne malkvietigu pri Barazof; mi ja aranĝos tiun aferon por vi. Refoje lin atakis tiu sama kvazaŭ elektra ektuŝo, kaj momenton poste li flustris:

— Mi ŝuldas tro multe, ... multe tro multe ..., mi ja ne povus toleri, ke vi pagu ..., vi jam pagis al mi tro multe ... —; tiam li ekkaptis mian manon kaj premis ĝin nerveme.

— Atendu tie ĉi momenton —, mi diris, — mi tuj revenos kun veturilo, sed promesu al mi, ke vi ne refoje —, mi eksilentis, sed fingre montris la tratanĉitan ŝnuron.

— Mi promesas —, li diris, ekfrotante al si la manplatojn.

Mi eliris la dometon kaj post kvarono da horo revenis en veturilo. Duonan horon poste la veturilo ekhaltis antaŭ nia domo. Aleksandra sidis ĉe la fenestro kaj turnis sin al iu en la salono, kiun mi ne povis vidi. Kiam ŝi turnis la kapon al mi, mi signodonis, ke ŝi tuj malfermu la pordon. Ŝi malaperis kaj apenaŭ mi helpis la vireton el la veturilo, la pordo malfermiĝis, kaj kaptante Bjelski sub la brako, mi kondukis lin en la koridoron, kie Aleksandra kaj ŝia patrino nin rigardis kun vizaĝoj esprimantaj pli da demandoj ol mi povis respondi tie. Mi eniris kun Bjelski en la studejon de Aleksandra, kaj ŝi sekvis kun la patrino.

— Alportu tuj lakton aŭ buljonon —, mi diris, sidigante la vireton sur la kanapo, — li mortas pro malsato.

Mia adoptintino levis la manojn pro surprizo, sed Aleksandra rapidis for kaj alportis lakton; Bjelski tamen estis tiel nervema kaj tiel hontis, ke li ne povis teni la glason, kaj mi trinkigis lin kiel oni trinkigas infanon; tiam mi kuŝigis lin sur la kanapo kaj diris:

— Nun retranskviliĝu kaj dormu momenton, se vi povos, hodiaŭ vespere ni parolos plue.

Li signodonis, ke li sekrete volas ion diri al mi. Mi klinis min super li kaj li flustris en mian oreilon:

— Mi petas, ne parolu pri . . . pri tio, kion mi faris.

— Mi promesas, . . . nun klopodu ekdormi.

Refoje li premis mian manon kaj fermis la okulojn.

Longe ni lin rigardis. Fine ni eksidis kaj mi metis la manon sur mian buŝon por komprenigi, ke neniu parolu. Aleksandra rigardis demande jen la vireton, jen min, sed mi silentis.

Kiam Bjelski dormis, mia adoptintino alproksimiĝis al la kanapo kaj rigardis la dormanton.

— Ho-o-o! — ŝi ekkriis, — mi komprenas —, kaj ŝi montris la kolon de la vireto; la ruĝeta strio fariĝis blua kaj ĝi pruvis klare tion, kio estis okazinta.

Aleksandra tamen ne rimarkis ĝin; ŝi staris tro malproksime. Mi refoje metis mian manon sur mian buŝon kaj sinjorino Romeskaŭ sternis tukon sur la korpon de la vireto, tiel ke la strio estis nevidebla; tiam ŝi eksidis denove.

— Kio do okazis? — fine demandis Aleksandra. Mi respondis: — La luiganto forpelis lin, ĉar li ne povis plu pagi la lupagon, tiam li vagadis senhejme kaj sen mono tra la urbo ĝis kiam mi lin trovis.

— Kie? — demandis ambaŭ.

— En la dometo sur la enterigejo.

Longa silento sekvis, tiam mi diris:

— Kaj mi promesis helpi al li.

Aleksandra rigardis pete sian patrinon kaj ĉi tiu diris:

— Li restos tie ĉi.

Romeskaŭ estis elirinta en la mateno; estis nun la sepa horo en la vespero, kaj nun ni aŭdis lin reveni. Li eniris en la ĉambron, kie ni sidis mallaŭte parolantaj. La sinjorino ekstaris kaj flustris ion al li en la orelon. Li tuj iris al la kanapo, levis la tukon kaj rigardis explore la kolon de la vireto; tiam li diris, skuante la kapon:

— Mi ne vidas ĝin.

Mi alproksimiĝis kaj ekvidis, ke la strio tute malaperis, kaj mi ĝojis pro tio.

— Bonvolu ne paroli pri ĝi —, mi diris, rigardante lin pete.

— Ne timu —, li respondis. Li eksidis apud mi kaj mi rakontis detale ĉion, kio estis okazinta, nur ne parolante pri la maniero, en kiu mi savis la vivon de Bjelski. Aleksandra ne devus tion eksci. Romeskaŭ tre

miris, kiam li ekaŭdis pri la buboj kaj pri Barazot. Li pripensadis, kaj tiam diris:

— Eble li ne deliris, sed ni ne aludu ilin, li per si mem ja rakontos ĉion. Tiu Barazot tamen ne estas lia luiginto, sendube io mistera sin kaŝas sub tio.

Je la oka horo Bjelski vekigis. Mi donis al li tason da buljono, kiun li trinkis sen mia helpo. Li sentis sin multe pli bone kaj eksidis sur la kanapo. Mi flustris al li, ke la postsigno tute malaperis kaj li dankis min.

Romeskaŭ nun aliris al la kanapo kaj esprimis sian bedaŭron, ĉar li revidis lin en tia stato, kaj diris plue:

— Mi tamen kredas, ke vi baldaŭ resaniĝos, sinjoro Bjelski, kaj mi petas vin fari al ni la plezuron esti nia gasto. Se vi refoje estos sufiĉe forta por daŭrigi viajn kursojn kun Jafet, tiam vi povas restadi ĉe ni kiel lia instruisto, ĉar Jafet spertis, ke al lia kono mankas ankoraŭ multe. Ĉu vi akceptas tiun proponon?

La vireto aspektis kiel iu, kiu ne kredas al siaj oreloj; post momento li diris kun voĉo, kiu tremetis:

— Ĉu tio ne estus tro malmodesta miaflanke, sinjoro?

— Tro malmodesta? ... Sed mia kara, oni povas esti ankaŭ tro modesta. Vi instruos al Jafet, kiu bezonas multajn lecionojn, kaj kiel rekompenco mi proponas al vi ĉambron en mia domo, kaj salajron. Ĉiu laboranto valoras sian salajron, estus do sensencaĵo paroli pri malmodesteco, se vi akceptus ĝin —, kaj Romeskaŭ etendis al li sian manon, kiun la vireto, interrompante la frotadon de la siaj, ekpremis.

Estis nun decidite, ke Maksimo Bjelski restus ĉe ni, kaj mi estis feliĉa pro li.

La postan matenon ni volis venigi la doktoron, sed Bjelski certigis, ke li sin sentas tre bone kaj ke li jam tiun saman tagon dezirus komenci la kurson; sed la pala vizaĝo de la vireto kaj lia nervemeco montris su-

fiĉe klare, ke li bezonas ripozon, ne nur korpe, sed ankaŭ spirite. Romeskaŭ diris, ke mia instruisto ĝuos libertempon da du semajnoj, dum kiuj li devus ne studadi, sed pasigi la tempon promenante kaj farante absolute nenion, kio povus lacigi lin. Ni estis rimarkintaj, ke la nigra kostumo de Bjelski estis tiel eluzita, ke li ne povus eliri en ĝi. La tajloro venis, almezuris al li novan grizan vestajaron, kaj du tagojn poste la vireto promenis kun mi tra la stratoj de Patersburgo, kaj li aspektis, kvazaŭ li ĵus estus elpaŝinta el modobildaro.

En la vespero ni sidis kune en nia granda salono, sed Bjelski malestis. Ni pensis, ke li estis irinta en sian ĉambron por aranĝi malgrandan aferon, kaj ke li baldaŭ revenos. Li tamen restis for kaj mi iris por vidi, kion li faras. Li sidis tre modeste en sia ĉambro ĉe la fenestro kaj rigardis eksteren. Vidante min li tuj ekstaris.

— Kial do vi ne venis al ni? — mi demandis.

Li rigardis min, kvazaŭ li tute ne komprenus mian demandon.

— Ĉu vi sentas vin nebone? — mi demandis plue.

— Ho jes, eĉ tre bone —, li respondis.

— Kial do vi sidas tie ĉi tute sola?

Refoje li ŝajnis ne kompreni min; ne respondante li rigardis min demande kaj frotadis al si la manojn.

— Nu!? — mi diris, irante al li kaj kaptante lian brakon, — vi devas pasigi la vesperon ĉe ni en la salono; ni kune babilos kaj poste mi ludos iom kun Aleksandra.

— Sed, ĉu tio ne estas tro malmodesta, se...

— Ho ne, tio tute ne estas tro malmodesta, sinjoro Bjelski, vi ja estas kvazaŭ familiano kaj ne devas pasigi viajn vesperojn tutsola ĉe tiu fenestro.

— Sed ĉu la gesinjoroj trovos...

— La gesinjoroj trovos, ke vi estas multe tro modesta —, mi diris, kaj ili deziras, ke vi tuj revenu kun mi en la salonon.

Pasis kelkaj semajnoj kaj mia kurso jam rekomencigis.

Unu vesperon, kiam ni sidis kune en la salono, la servistino eniris kun letero, kaj ĉar ŝi ne povosciis legi, ŝi enmanigis ĝin al Romeskaŭ.

— Por sinjoro Maksimo Bjelski —, li diris, leginte la adreson.

La vireton kvazaŭ ektuŝis elektra fluo; li fariĝis morte pala, liaj manoj tiel multe ekstremitis, ke li nur kun peno povis akcepti la leteron. Kun surprizo ni rigardis lin, kiam li deŝiris la koverton por elpreni la al li adresitan leteron. Li legis, lasis fali la leteron kaj rigardis nin dirante:

— Jen vi havas!

— Kio estas? — demandis Romeskaŭ.

— Letero de Barazof —, li flustris. — Li eltrovis min.

— Kiu estas Barazof? — plue demandis Romeskaŭ.

— Negocisto.

— Negocisto!?!... Nenio krom tio?

— Kaj pruntedonisto —, li diris, preskaŭ rompante al si la manojn.

Romeskaŭ signe ordonis al Aleksandra, forlasi la salonon, kaj kiam ŝi estis for, li diris:

— Amiko Bjelski, pro nura modesteco vi kaŝas antaŭ ni ion, kio premadas vin jam longan tempon. Forjetu de vi tiun modestecon kaj konfidu al ni la sekretan ĉagrenon, kiu subfosas ne nur vian feliĉon, sed ankaŭ vian sanon. Vi scias, ke ni helpas al vi kiel bonaj amikoj.

La vireto ekbabilis kelkajn vortojn, kaj Romeskaŭ ekstaris, frapetis al li la ŝultron kaj kuraĝigis lin, dirante:

— Nu, do; estu viro, ne fariĝu tiel nervema, sed rakontu malkaŝe kaj kviete tion, kio vin ĝenas, kaj pri tiu Bazarof.

Maksimo Bjelski viŝis al si la vizaĝon per la naztuko, nerveme enpoŝigis la tukon, refoje eltiris ĝin, premis ĝin, kvazaŭ ĝi estus lia plej granda malamiko, kaj rakontis, ekhaltante de tempo al tempo.

— Kiam antaŭ kelkaj jaroj mortis mia patro, li lasis post si nur tiom da mono, kiom ni bezonis por pagi la koston de lia enterigo. Mi ĵus akiris oficon kiel instruisto en unu el la publikaj lernejoj de la urbo, kaj estis feliĉa, ke mi povus subteni mian patrinon. Jam tre baldaŭ tamen mi eksciis, ke mi en realo ne taŭgas kiel instruisto; mi estis iom nervema kaj mi ne povis estri la netaŭgajn knabojn. Kelkaj knaboj en mia klaso estis bonaj kaj diligentaj kaj faris progresojn, sed aliaj estis malobeemaj kaj maldiligentuloj. Kiam mi admonis ilin, ili mokridis min pro mia nervemeco, kaj se mi volis puni ilin, ili insultis min kaj per tio mi fariĝis ankoraŭ pli nervema, kaj fine ĉiuj knaboj partoprenis turmentadi min. Ŝajnas al mi, ke mi jam en tiu tempo kelkfoje frotis al mi la manojn, precipe kiam mi volis esti severa kontraŭ la lernantoj; kaj tion ili rimarkis. Por sin amuzi, unu el ili en unu mateno estis desegninta mian portreton sur la nigra tabulo, kaj sub la desegnaĵo li estis skribinta la vortojn: „Maksimo Bjelski, la frotulo“. Mi fariĝis tiel nervema, ke mi ne povis paroli kaj eliris la klason, sed revenis post duona horo. Reveninte, mi vidis, ke la knaboj sidis sur siaj benkoj kun serioza vizaĝo, sed ĉiuj frotadis al si la manojn. Mi ekkoleris, admonis, sed miaj vortoj ne faris impresojn sur la sentaŭguloj. Ili kviete daŭrigis froti al si la manojn, kaj mi foriris por plendi al la lernejestro. Li venis, sed apenaŭ li estis en mia klaso, ĉiuj knaboj diligente skribis.

Li iris for, vidante ke la lernantoj kondutas dece, sed ho ve, apenaŭ li fermis post si la pordon, jen la frotado rekomenciĝis. La desegnaĵon la lernejestro estis forviŝinta kaj li malpermesis, ke oni refoje desegnu tian bildon kun tia subskribo. La sekvantan matenon staris sur la nigra tubulo ne bildo, sed la vortoj: „La frotanto!!!“ kun tri ekkripunktoj. Mi iris plendi al la lernejestro, sed kiam li venis, la vortoj estis malaperintaj, kaj ĉiuj knaboj kondutis dece. Du monatojn mi deĵoris en tiu lernejo, sed la netaŭgaj buboj tiom turmentadis min, ke mi preskaŭ frenezigiĝis pro ĉagreno...

Ho, sinjoro Romeskaŭ, la knaboj ne estas malicaj, tia ne estas ilia karaktero, sed ili estas senkompataj nur por sin amuzadi, kaj tiu senkompatemeco preskaŭ mortigis min...

Ho, sinjoro Romeskaŭ, se ili sciis, kion ili faras, tiom turmentadi sian instruiston! Ili per sia turmentado mortigas la nervemajn instruistojn korpe kaj anime...

Fine mi devis ekŝiĝi; mi ne povis estri la lernantojn, kaj se mi persistus resti ilia instruisto, tiam mi fariĝus nervmalsana. Sed mi devis subtenadi mian patrinon; mi lokigis anoncon kiel privata instruisto, pensante, ke mi povus estri unu aŭ du knabojn, eĉ turmentemajn. Intertempe mi estis sen mono kaj la malmultaj lecionoj, kiujn mi poste donis al kelkaj lernantoj, ne sufiĉis por mia patrino kaj mi...

Esperante trovi aliloke pli taŭgan por mi oficon, mi prunteprenis cent rublojn de Barazof, promesante pagi ĉiusemajne unu rublon procente. Tiu mono tamen baldaŭ estis elspezita, kaj post tri monatoj mi duan fojon prunteprenis cent rublojn; sed ĉar mi ne kapablis repagi la unuajn cent rublojn, mi de tiu dua pruntepreno devis pagi du rublojn ĉiusemajne, tiel ke la mono ankoraŭ pli rapide estis for ol post la unua pruntepreno... La

trian fojon mi iris al Barazof kaj denove prenis cent rublojn, sed ĉiusemajne de post tiu tempo mi devis pagi tri rublojn por la tuta prunteprenado. Kiam por la kvara fojo mi petis lian helpon, li postulis de mi kvindek rublojn kiel repagon de la jam prenita sumo, sekve mi ricevis nur kvindek, sed mia ŝuldo plialtiĝis je cent. Tiel ĉiam prunteprenante, mi fine ŝuldis al li mil rublojn, kvankam mi estis ricevinta nur sescent kvindek, kaj la pagota rento estis tiel alta, ke mi devis vendi multajn meblojn kaj librojn por kontentigi mian helpanton... Mi troviĝis en tiuj cirkonstancoj, kiam via filo fariĝis mia lernanto... Dank' al Dio, li estis tre fervora kaj ĉiam faris sian plej grandan eblon por lerni, kaj dank' al lia karaktero li ne turmentis... sed helpis al mi, kiam li ekvidis min nervema... Li mem konsciis neniam, kiel danki mi estis, ĉar se li estus estinta kiel preskaŭ ĉiuj aliaj lernantoj, tiam mi..., mi... —

La vireto tiel nervemiĝis, ke li refoje devis haltigi sian rakonton; post momento li rakontis plue:

— Pro la salajro, kiun mi ricevis tie ĉi, mi ne bezonis pruntepreni pli da mono, sed nur pagi regule mian renton..., kaj mi pagis multe, preskaŭ tiom, kiom mi prunteprenis entute, sed spite tion, la ŝuldo restis la sama... Mi tamen povis modeste vivi kun mia patrino, sed ho ve!... vi devis foriri eksterlanden, kaj kvankam vi malavare rekompencis miajn lecionojn, fine tuta mia mono estis for pro grava malsano de mia patrino... La kuracisto postulis memkompreneble sian salajron; mi devis aĉeti medikamentojn, kiuj ĉiam estas multekostaj; mi devis regule pagi al Barazof kaj fine mortis mia kara patrino... —

Nervema grimaco glitis sur la vizaĝo de la vireto, ĉar li volis reteni la larmojn, kiuj jam aperis en liaj okuloj, kaj li rakontis plue:

— Restis al mi apenaŭ sufiĉe por pagi la enterigon, kaj kiam mi revenis de la mortintejo, mia luiganto postulis de mi, ke mi tuj pagu al li la lupagon de kvin monatoj, ĉar mi ŝuldis tion. Mi posedis tamen nenion plu kaj vendis la lastajn meblojn, eĉ la liton, sur kiu estis mortinta mia patrino, kaj donis al mia luiganto ĉion, sed ŝuldis ankoraŭ por du monatoj. Li forpelis min el mia ĉambreto... Sen mono kaj sen hejmo mi vagadis tra la urbo, ne sciante kion fari... Milfoje mi pensis al vi, esperante ke vi revenu baldaŭ, por ke mi povu rekomenci la interrompitajn lecionojn kun via filo; sed vi ne venis... Mi pensis pri liaj vagadoj kaj sentis, kiom da mizero li travivis antaŭ kelkaj jaroj... La nokto alproksimiĝis, kaj ne posedante hejmon por dormi, mi same kiel via filo eniris la dometon sur la mortintejo por pasigi tie la nokton. Mi dormis tie dum du noktoj, sed mi ne manĝis, kaj almozpeti mi ne kuraĝis...

Tial post la dua nokto mi ne forlasis plu la mortintejon kaj restis en la dometo por atendi mian morton... Mi estis jam mortonta, sed feliĉe via filo trovis kaj helpis min... kaj... kaj mi estas tre danka... —

Li eksilentis kaj ekploris.

La letero de Barazof kuŝis ankoraŭ ĉe la piedoj de Bjelski. Romeskaŭ prenis ĝin de la planko, dirante:

— Ĉu estas permesate, ke mi legu, kion tiu vampiro skribis?

Bjelski kapjesis kaj diris:

— Ho jes, sinjoro, memkompreneble.

Romeskaŭ legis kaj estis indignata.

— Kion vi respondos al li, sinjoro Bjelski?

— Mi ne scias, sinjoro; li postulas sian renton, kaj mi jam propraimpulse alportus ĝin, sed...

— Mi scias, kion vi ne kuraĝas eldiri; mi ankoraŭ ne pagis al vi vian salajron. Mi antaŭsentis, ke premadas

vin monaj malagrablajoj; mi eĉ antaŭvidis, ke via procentegisto per si mem sin prezentus, sed ĉar vi ne estas sufiĉe energia kaj kuraĝa por kontraŭstari tian vampiron, mi volonte prenas sur min reguligi kun li vian konton... Ĉu vi konsentas?

— Ho jes; sed mi promesis, neniam paroli al kiu ajn pri la kondiĉoj, laŭ kiuj li pruntedonis al mi.

— Tiajn promesojn neniu bezonas plenumi; li malbonuzis vian mizeran situacion.

Romeskaŭ senprokraste skribis la jenan letereton al Barazof.

— Mi konsideras sinjoron Maksimo Bjelski kiel mian familianon; li konsentis, ke mi aranĝu ĉiujn liajn aferojn. Sekve de tio mi invitas vin al mi morgaŭ antaŭ la tagmezo je la deka horo, por preparoli kun vi en ĉeesto de polica inspektoro la manieron, laŭ kiu vi pruntedonis monon al sinjoro Bjelski. Vi povos eviti la preparoladon, resendante tuj la lastan ŝuldodokumenton (subskribitan de Sro B.) per kio la ŝuldo estos nuligita. Se vi nek konsentos en tio, nek aperos ĉe mi la nomitan horon, tiam mi persekutos vin laŭleĝe.

Atendante:

S. Romeskaŭ. —

La servistino forportis la leteron kaj revenis post unu horo kun la respondo. Sinjoro Romeskaŭ deŝiris la koverton kaj elprenis la lastan ŝuldan dokumenton de la vireto kaj malgrandan leteron. Li legis:

— Ĉi kune mi resendas la de vi aluditan dokumenton, Sinjoro Maksimo Bjelski ŝuldas al mi plu nenion.

Kun estimo:

M. Barazof. —

De post la legado de tiuj linioj la vireto fariĝis alia persono, la peza ŝarĝo, kiu jam jam tiel longe turmentegis

lin, estis forigita. Romeskaŭ ankoraŭ la saman vesperon pagis al mia instruisto la salajron, kiun li perlaboris dum la lastaj semajnoj.

— Jen, amiko Bjelski —, diris li, — jen vi havas por havigi al vi ĉion, kion vi bezonas aŭ deziras, sed neniam plu prunteprenu de procentegistoj, ili estas ankoraŭ pli danĝeraj ol sentaŭgaj knaboj.

Bjelski dankis modeste kaj ekpripensis, fine li diris:

— Morgaŭ mi mendos belan krucon —. Ni lin ne komprenis.

— Por kion fari? — demandis Romeskaŭ.

Kaj la vireto respondis:

— Por starigi sur la tombo de miaj gepatroj.

Naŭa Ĉapitro.

Maksimo Bjelski fariĝas kvieta — Mi iras kun li Holandujon — Fremda lingvo, kiun mi komprenas, sed ne parolas — Kurhaŭskoncerto — Pri tri artistoj — Mi estas surprizata same kiel ĉiuj aliaj — La naŭa ĉapitro ne finiĝas — Kelkaj vortoj al la leganto.

Post kiam Maksimo Bjelski estis senigita de la ŝarĝo, kiu dum tiom da tempo premeĝis lin, li fariĝis alia viro. Lin ne forlasis lia nervemeco, ĉar la vireto havis nerve-man karakteron, sed li forĵetis iom post iom la strangan kutimon de la frotado. Nur de tempo al tempo, ĉe eksterordinaraj okazoj, li senkonscie sin donis al tiu kutimo, sed monaton, post kiam li ricevis de la procentegisto la sciigon, ke li plu ŝuldas al li nenion, li fariĝis kvieta kaj feliĉa viro, kiu estis kontenta je sia sorto, kaj vivis nur por servadi aliajn personojn, precipe min, ĉar mi savis lian vivon. Regule li instruis al mi kaj faris sian eblon, por ke mi povu sufiĉe bone paroli la francan lingvon. Sed kvankam mi facile lernis lingvojn, mi lernis la francan nur teorie, kaj mi konsciis, ke mi havus multan penon flue paroli en tiu lingvo. Mi tamen persistadis.

Jaron post kiam Maksimo Bjelski estis mia samhejmano, mi refoje deziris vojaĝi eksterlanden por doni koncertojn.

Dum miaj unuaj eksterlandaj vojaĝoj mi vizitis multajn landojn, sed ne Holandujon. La celo de la dua vojaĝo estis tiu lando. Mia instruisto tre bedaŭris, ke

mi interrompus la studadon, ĉar kvankam mi estis plenkreska junulo (eble dekokjara) mi ne lernis ankoraŭ tiom multe, kiom aliaj junuloj samaĝaj kutime lernis, kaj kiel artisto mi almenaŭ devus esti sufiĉe instruita por movadi min oportune ĉie, kien mia kariero min vokus. Mi do proponis, ke li min akompanu, kaj ĉar li neniam vidis fremdajn landojn, li kun ĝojo akceptis.

Ni ekvojaĝis kune Nederlando kaj alvenis en la urbo Haag en la monato Julio 1914^a.

Mi ne volas rakonti tion, kio okazis al mi en tiu urbo tuj post mia alveno, ĉar tio ne indas esti priskribata. Estis tamen io, kio min trafis, kaj tion mi devas rakonti per malmultaj vortoj.

Jam tuj kiam mi la unuan fojon aŭdis la holandan lingvon, kio okazis en Oldenzaal, mi estis surprizata en alta grado, ke tiu lingvo ŝajnis al mi tiu sama, kiun mi aŭdis, kiam mia patrino legis al mi la rakontojn pri „Mil kaj unu noktoj“ kaj aliaj. Sed ŝi same kiel ŝia edzo parolis tute alian lingvon; sekve la holanda ne povis esti ŝia gepatra lingvo. Mi do supozis, ke ŝi ie en Holandujo lernis tiom de la holanda lingvo, kiom oni bezonas por legi kaj kompreni, ke ŝi amis la literaturon holandan kaj tial legadis en tiu lingvo. Bjelski ĉiam certigis al mi, ke la lingvo, kiun miaj gepatroj kun mi parolis sur la Insulo, estas dialekto dana aŭ germana. Mi do komprenis sufiĉe bone la holandan lingvon, sed ne povis paroli ĝin, kaj Bjelski devis esti mia tradukisto kaj li uzis plej parte la germanan lingvon, kiun ĉiuj komprenis en Nederlando kaj multaj parolis. Neniu tamen parolis la strangan dialekton de mia Insulo.

Per miaj antaŭaj koncertoj mi perlaboris tiom da mono, kiom mi bezonis por pasigi longan tempon en Haag, kaj mi ne volis tuj min ligi al koncertejo. La

okazo por ligi min al granda koncertejoj tamen baldaŭ sin prezentis laŭ eksterordinara cirkonstanco.

Monaton post kiam ni estis en Haag, la Eŭropa militego komenciĝis. Rusujo partoprenis, kaj timante ke mi devus plenumi mian servadon en la rusa armeo, mi decidis ne revojaĝi Rusujon, ĉar ne estante ruso mem, mi ne sentis en mia koro la devon batali por la rusa imperio. Krom tio, mi ne amis la militon, nek la metion de soldato, kaj neniam fariĝus heroo; sekve mi restis provizore en mia nova patrujo por pacience atendi la iradon de la milito. Ankaŭ mi ekpensis ofte, ke eble mi estas germano, kaj neniuj ja povus devigi min, batali kontraŭ miaj propraj samlandanoj. Mi volis esti kaj resti neŭtrala kaj en neŭtrala lando.

Kelkaj monatoj pasis. Ian vesperon mi legis sur publika afiŝo, ke du fame konataj artistoj partoprenus kiel solludantoj en koncerto en Kurhaŭs. La artistojn mi ne konis persone, sed jam multfoje mi aŭdis kaj legis pri ili. Unu estis germana internigita militisto; la alia estis holanda soldato.

Tuj la ekpenso eniris mian kapon, ke tria fame konata artisto pligrandigus ankoraŭ la sukceson de la koncerto, kiu estus donata profite de la holanda „Ruĝa Kruco“.

Bjelski kaj mi tuj iris al la Kurhaŭs en Scheveningen por paroli kun la direktoro de tiu entrepreno. Kiam ĉi tiu direktoro aŭdis mian nomon, li sen prokrasto per telefono preparolis mian proponon kun la estraro de la „Ruĝa Kruco“, kaj en duona horo oni decidis akcepti min kiel kunlaboronton.

La koncerto estus aranĝata post tri tagoj. Mi tre ĝojis konatiĝi kun la du aliaj solludantoj, kiuj alvenus horon antaŭ la komenciĝo de la koncerto. Tio estis en realo malfrue, sed la holanda soldato ne povis

alveni pli frue pro militaj deĵoroj kaj la germana internigito devis alveni de internigejo sin trovanta en alia urbo, kaj la vagonaro estis alvenonta je la sesa kaj duono.

Aldona afiŝo, kun sciigo, ke tria, nome la rusa violonisto Jafet Romeskaŭ partoprenos kiel sulludanto en la koncerto, estis algluita al la jam algluitaj afiŝoj, kaj la ĵurnaloj la antaŭan matenon de la koncerto anonciston saman.

Unu horon antaŭ la komenciĝo mi jam troviĝis kun Bjelski en la Kurhaŭs, ĉar, se eble, mi deziris konatiĝi kun la du famaj artistoj antaŭ la koncerto.

Tamen la oka horo sonis; la unua kaj la dua numero de la programo pasis, sed la solludistoj ne venis. Ĉar telegramo ne sciigis ilian forrestadon, ĉiuj esperis, ke ili baldaŭ venos. Plua numero pasis kaj jen venis du telegramoj, kiuj anoncis, ke la artistoj alvenos la dekan horon. Estis jam la vico de la holanda artisto por solludi, sed ĉar li estis alvenonta nur post kvarona horo, mi prenis lian lokon kaj ludis la de mi elektitajn numerojn, kiel la programo anoncis ilin, nome: Zigeuner-Weise von Pablo de Sarasate, Spanischer Tanz von Pablo de Sarasate kaj Spanische Simphonie von Lalo.

Mi estis laute aplaŭdata kaj ĵus estis eksidonta inter la muzikistoj, kiam eniris la germana kaj tuj post li la holanda artistoj.

La aŭskultantaro, kiu ĵus finis sian aplaŭdadon pro mia ludado, rimarkis ilin, same kiel mi ilin rimarkis.

Mi estis irona al la artistoj por prezenti min, sed restis staranta ĉe mia seĝo, kvazaŭ alnajlita sur la planko.

Dum mia vivo mi multfoje estis surprizata, sed ankoraŭ neniam tigrade kiel nun . . . vidante tiujn du artistojn.

Ni rigardis nin reciproke kaj ĉiuj rigardantoj en la

koncertejoj rimarkis nian reciprokan surprizegon. Siavice la aŭskultantaro montris sian surprizon kaj persono post persono ekstaris por pli oportune rigardi tiajn artistojn, ĉar ili estis
.
. ĉi tiu ĉapitro estos daŭrigata

Kelkaj paroloj al la leganto.

Sendube la leganto partoprenus la ĝeneralan surprizon, post kiam mi estus priskribinta la du alvenintajn artistojn; sed li (la leganto) devas pacience atendi . . .

Kiel verkisto de romano mi havas la rajton marŝi antaŭen, paŝon post poŝo, ekhalti kaj denove antaŭeniri, se mi volas, eĉ per paŝegoj de giganto. Rilate al tio mi estas pli potenca ol la tempo mem, kiu nur laŭtakte seninterrompe antaŭenpaŝas, antaŭenpaŝis kaj antaŭenpaŝados kun ĉiamaj egalaj paŝetoj, ne havante la kapablon deflankiĝi eĉ unu centimetron de la vojo, kiun ĝi mem por si destinis.

Mi, kiel verkisto, deflankiĝas de mia vojo tiom, kiom al mi plaĉas, eĉ postenpaŝas centjaron, se tion mi bezonas por mia rakonto.


Ĉi tiun kapablon mi uzos tie ĉi, kaj faras returnan saltegon, ne de centjaro, sed de dek-ok jaroj:

En ĉi tiu romano la ĉapitro alproksimiĝos iom post iom, en kiu la scivola leganto povos legi la daŭrigon de la Unua Parto de mia rakonto, kiun mi pro gravaj motivoj tiel subite interrompis.

Fino de la Unua Parto.

Dua Parto

La Trovito



Unua Ĉapitro.

Malgranda vilaĝeto — Fraŭlino, kiu ankoraŭ neniam parolis, sendube io stranga ĉe la ina sekso — Spicisto Pentman — Dometo, kiu nokte kaj tage restas neŝlosita — La stranga kesteto kaj kion ĝi enhavas — Kiel pensas mutulino — Kion ŝi faras, post kiam ŝi trovis „trezoron“.

Kiu neniam vizitis la vilaĝeton Brej, geografie apartenantan al la vilaĝo Warfum en la norda parto de la holanda provinco Groningen, tiu tute ne povas imagi, kiel petrinde bela estas tiu domareto.

Ĝi kuŝas ĉe la makadama vojo, kondukanta de la vilaĝo Ballo al Warfum, kaj konsistas el nur dudeko da dometoj, unu lernejo kaj bela malgranda preĝejo kun pinta tureto.

Laŭlonge de tiu vojo, kiu iras tra la domareto, sin trovas mallarĝaj longfosetoj, super kiuj estas ĵetitaj tabuloj, utilantaj kiel pontetoj. Irante de la vojo trans la tabulojn, oni atingas la dometojn, kiuj staras apartigitaj unu de alia, kaj ĉiun dometon ĉirkaŭas legomĝardeneto kun pirarboj.

En tiuj dometoj loĝas kamparanoj laborantaj ĉe la riĉaj farmistoj, kies farmejoj kuŝas tre malproksime de la vojo, tiel malproksime, ke oni ne vidas ilin pro la altaj arboj, kiuj ilin tute ĉirkaŭas.

Sablaj flankvojetoj, ankaŭ borderitaj de mallarĝaj longfosetoj, kondukas al tiuj farmejoj, kaj nur tie kaj tie ĉi staras izolita dometo, kvazaŭ ĵetita tien laŭhazarde de kaprica giganto, kiu per tio volis interrompi la unu-

tonecon de la riĉaj kampoj, kie kreskas aveno, sekalo, hordeo, pizoj, terpomoj kaj aliaj kreskaĵoj, kiuj povas prosperi nur en grasa fruktodona tero, kian oni vidas en la nordo de Groningen.

En unu el tiuj malmultaj izolitaj dometoj, proksime de bela kaj riĉa farmejo, loĝas Rika, la „mutulino“.

Ordinare oni nomas ŝin per la lasta nomo, ĉar en la apudaj vilaĝoj, kien ŝi kelkfoje iras por fari komisionojn aŭ por viziti la gefratojn, estas multaj knabinoj kaj fraŭlinoj nomataj Rika, sed neniu el ili estas surdmuta, kiel ŝi.

Ofte la vilaĝanoj demandis unu la alian, kial la „mutulino“ en sia juneco ne iris urbon por vizitadi tie la lernejon de la surdmutuloj, kaj la respondo estis ĉiam la sama: La gepatroj de Rika estis tro malriĉaj kaj bezonadis ŝin pro la junaj gefratoj; krom tio, la vilaĝa estraro, konsistanta el obeema cedema vilaĝestro kaj farmistoj, opiniis, ke tio estas tute superflua. Simpla servistino, tiel ili opiniis, ne bezonas lerni la skribarton, se tio kostas tiom da mono; sen tiu arto ŝi ja perlaboras sufiĉe por vivi, kaj la kaso de la vilaĝo bezonas tro multe por riparado de makadamaj vojoj, por pagi la salajron de la instruistoj, de la policano, de la tom-bisto kaj cetere. Rika sekve ne vizitadis la Instituton de la surdmutuloj kaj restadis hejme ĉe siaj gepatroj kaj gefratoj.

Rika estas tridekjara fraŭlino. Ŝiaj gepatroj, kiuj ne vivas plu, havis multajn infanojn kaj laboradis sur la kamparo de la mateno ĝis la vespero, kaj ĉar ŝi estis la plej aĝa el la infanoj, ŝi devis gardadi kaj flegadi siajn gefratojn. Tion ŝi faras kun plezuro, ĉar ŝi estas bonkora kaj tre amas infanojn. Unue mortis la patrino, kaj kiam kelkajn jarojn poste ŝi perdis la patron, la gefratoj jam servadis kiel servistoj kaj servistinoj ĉe

farmistoj en Brej, Warfum kaj Uskvert, kaj la mutulino restis sola en la izolita dometo; la gefratoj lasis al ŝi la tutan heredajon de la patro, konsistantan el tiu dometo kaj kelkaj mebloj.

La dometo estas simpla, malalta kaj malnova. Ĝin tute ĉirkaŭas hedero kovranta la kvar murojn tiel, ke oni vidas nur la kvin fenestretojn kaj la solan pordon. Ĝi staras sur kampo apud sabla vojeto, kondukanta de la makadama vojo al la farmejo, kie ŝi servadas kiel melkistino kaj kuiristino por la geservistoj.

Enirante tra la sola pordo, antaŭ kiu kuŝas strateto el kvadrataj plataj ŝtonoj, oni venas en koridoron, lumigatan de nur unu fenestreto. En tiu koridoro, kiu estas la kvina parto de la konstruaĵeto, staras forprenebla ŝtuparo, per kiu oni povas supreniri al la subtegmentejo, kiu vintre utilas por gardadi torfojn. Kontraŭ la koridora fenestreto estas pordeto, tra kiu oni povas eniri la ununuran ĉambron. Malferminte ĝin, oni vidas rekte antaŭ si malnovmodan kamenkapuĉon kaj fajrolokon, de kiu supre pendas je longa ĉeno kupra kaldrono, ĉe kies flanko staras brilanta fajroprenilo. Flanke de la kamenkapuĉo, sed iom pli malalte, estas du fenestretoj. Ĉe la dekstra endoma tabula vando oni vidas kvar pordetojn; post la du mezaj sin trovas la lito, post la du aliaj estas du ŝrankoj, unu por vestoj, alia por manĝilaro kaj ceteraj domaj necesajoj. Antaŭ ĉiu ŝrankpordo staras unu seĝo. Ĉe la maldekstra muro, antaŭ la du fenestroj sin trovas du pluaj seĝoj kaj inter la fenestroj pendas iom pli alte speguleto tiel malnova, ke oni nur kun peno povas vidi sin en ĝi, kaj antikva kolorita bildo, kiu prezentas la filinojn de Faraono, trovantaj sur Nilo la junan Moseon en naĝanta kesto.

En la mezo de la kahelplanko staras kvadrata tablo kovrita per ruĝa tuko.

Estas somero kaj la kvina horo en la mateno.

La mutulino ĵus leviĝis, sin lavis kaj sin vestis por eliri, ĉar la sesan ŝi devas esti ĉe la farmisto Klomp por melki la bovinojn.

Klomp estas farmisto laŭ ĉiuj signifoj de tiu vorto. En la provinco Groningen, „farmisto“ signifas ne nur „kamparano“, sed ankaŭ „aroganta, fiera, preskaŭ ĉiam malsprita homo“, pensanta tamen, ke li estas tre spritega.

Kie ajn li estas, ĉu en sia farmejo, ĉu en la vilaĝo, ĉu en la urbo, ĉie li agas kaj kondutas, kvazaŭ li estus hejme, kaj kvazaŭ li estus ĉefulo kaj eminentulo, kiu rajtas ordonadi kaj komandadi. Fremduloj tamen havas ĉe li nenion por ordoni kaj komandi, kaj eĉ ne eniras en lian ĉiutagan ĉambbron. Ili restas en la antaŭĉambro, en la kuirejo aŭ en la grenejo, se ili deziras paroli la farmiston, ĉar la familia ĉambro estas sanktejo, en kiun eniras nur alia farmisto aŭ eminentaj personoj, kiel ekzemple la notario, la predikisto kaj la doktoro de la vilaĝo.

Klomp estas kiel preskaŭ ĉiuj farmistoj en la provinco Groningen; eble li estas pli riĉa ol multaj el ili, sed ne malpli aroganta kaj fiera. Klomp opinias, ke li apartenas al ia „nobela“ klaso, nome al la „farmista klaso“, al la plej eminenta el ĉiuj klasoj. De la farmistoj (tiel li opinias) devenas ĉio, kio estas utila kaj necesa, kaj sekve ĉiuj nefarmistoj devas esti dankaj, ke la farmista klaso ekzistas, ĉar sen farmistoj ja ne estus produktata greno, nek terpomoj, nek hordeo kaj tiel plu. Kion (laŭ la opinio de Klomp) farus la vilaĝanoj kaj la urbanoj sen tiuj produktajoj? La bakisto ne povus baki panon, la bierfaristo ne povus fari bieron, la buĉisto ne povus buĉi kaj la forĝisto perlaborus tro malmulte, se farmistoj ne ekzistus; sekve: la farmista klaso estas sen kontraŭdiro la ĉefa el ĉiuj klasoj, kaj ĉe Klomp,

ano de tiu klaso, laboradas Rika la mutulino, kies dometon ni ĵus eniris.

Kvankam Rika ne havas horloĝon, ŝi neniam venis tro malfrue en la farmejon. Ŝi mem estas kvazaŭ horloĝo, ĉion farante aŭtomate. Aŭtomate ŝi vekigas ĉiam la saman horon en la mateno kaj aŭtomate ŝi ĉiam alvenas ĉe sia laboro, precize la sesan horon. Dek minutojn antaŭ la sesa, ŝi ĉiam eliras el sia dometo, kies solan pordon ŝi fermas nur rigle, ĉar ŝtelistoj neniam forprenis ion. Ŝi ŝlosas ordinare nur unu el la ŝrankoj, en kiu ŝi gardas kelkan monon, perlaboritan dum la jaroj post kiam mortis la patro, kaj de kiam ŝi laboris en la farmejo.

Kiam ŝi laŭiras la sablan vojeton al la farmejo, ŝia korpo aspektas kiel du blue pentritaj abelujoj, unu sur la alia. Sub la malsupra aŭtomate moviĝas la piedoj, kiujn ĉiam kovras pezaj lignoŝuoj; ĉar lignoŝuojn ŝi portas vintre kaj somere. Sur la supra „abelujo“ staras blanka kufo. Aŭtomate tiu stranga figuro de la mutulino iras antaŭen. Rika ne rigardas dekstren, nek maldekstren, nek posten, sed ĉiam antaŭen, kvazaŭ nur rekte antaŭ ŝi estus la celo, kiun ŝi neniam devas perdi el la okuloj.

Kiam ŝin renkontas sur la vojo konato, ŝi aŭtomate kapklinas unu fojon, sed tre rapide por kiel eble plej baldaŭ repreni la antaŭan teniĝon.

Rika ridetas nur malofte, sed kiam ŝi ridetas, ŝi montras du vicojn de dentoj, pli blankaj ol perloj.

Ŝia vizaĝo estas bruniginta de la suno.

En la vilagoj oni diras, ke ŝi estas beleta fraŭlino, kaj rigardante ŝin en la vizaĝon, oni ne povas ne rimarki la blujn okulojn, kiuj ĉiam brilas, kaj la plenajn vangojn kun kavetoj. Ŝia mentono estas belforma, kaj ĉar ŝi havas belan nazon, neniu povas diri, ke ŝi ne estas beleta. Ŝiaj haroj tamen faras strangan kontraston kun ŝia vizaĝo;

fakte ili estas blondaj, sed ĉar ŝi tro ofte purigas ilin per akvo, ili iom post iom perdis la naturan koloron.

Rika neniam pensas pri tio, ĉu ŝi estas bela aŭ melbela, ĉar tio al ŝi estas tute indiferenta. Kviete ŝi iras jam dum jaroj sian kutiman vojon, kaj kviete ŝi iros ĝin plue tiel longe kiel ŝi estos tia sama laborema mutulino, kia ŝin konas ĉiuj vilaĝanoj.

Post kiam la melkado kaj aliaj laboroj okazis, Rika kelkfoje devas iri al Warfum por aĉeti bezonaĵojn por la farmistedzino.

Ankaŭ ĉi tiun tagon post la melkado ŝi tien iras pro la sama motivo. Laŭkutime ŝi iras kun korbo pendanta sur ŝia brako, kaj ni volas sekvi ŝin. Aŭtomate la du „abelujoj“ kun la blanka kufo iras antaŭen kaj sin movas supren kaj malsupren laŭ tio, kiel la lignoŝuoj paŝetas antaŭen. La malmultaj preterpasantoj ŝin salutas ĝentile, kaj per sia kutima rapida kapklino ŝi respondas la salutojn. Post duona horo da tiu laŭtakta, sed rapida movado de la ligoŝuoj sur la makadama vojo, la mutulino atingas la vilaĝon kaj tuj sin direktas al la spicisto Pentman. Li staras post la butikotablo kaj salutas, kiam ŝi eniras. Laŭkutime ŝi montras dum sekundo la blankajn dentojn; la kavetoj en la vangoj pliprofundiĝas dum tiu sama sekundo, kaj post la rapida kapklino ŝi metas la korbon sur la tablon. La spicisto elprenas papereton kaj legas, kion bezonas la farmistedzino.

Pli ol milfoje la mutulino venis en ĉi tiun butikon, kaj ĉiam la spicisto elprenis tian papereton kaj leginte ĝin, enmetis sukeron, sapon, oleon kaj cetere. La mutulino instinkte konscias, ke tia papereto kvazaŭ parolas kaj ke la viro komprenas la desegnaĵojn starantajn sur ĝi, sed ŝi jam ne miras pri tio. Instinkte ŝi ankaŭ konscias, ke ĉiuj homoj (nur ne ŝi mem) per movadoj

de la buŝo povoscias kompreni sin reciproke, kaj ankaŭ pri tio ŝi jam ne miras, sed estas io alia, kio naskas ŝian miron multfoje, nome ke homoj movas la lipojn kaj per tio parolas kun aliaj homoj, kiuj estas en alia ĉambro. Fine ŝi tamen konsciis, ke tia interkompreniĝado okazas pere de organo, troviĝanta interne de la oreloj, ĉar ĉiuj hundoj, katoj kaj ĉevaloj ekmovetas la orelojn, kiam la homoj parolas al ili. Kelkfoje ŝi bedaŭris, ke al ŝi mankas tiu organo, sed jam de longe ŝi rezignaciis kaj ŝin kontentigis la penso, ke ŝi povoscias kompreni multajn movadojn de la buŝo.

La korbo nun estas plena kaj Rika forlasas la butikon por returni sin al la farmejo de Klomp kaj tuj poste la lignoŝuoj tuŝadas laŭtakte la straton de la vilaĝo, poste la makadaman vojon kaj fine la sablon de la flankvojeteto kondukanta al la farmejo.

La farmisto Klomp okaze vidas alproksimiĝi la mutan servistinon, kiu ĉe ĉiu paŝo postlasas sian postsignon, nome nubeton el sablo, kiun ŝia lignoŝuo ĵetas flanken.

Klomp, kiu rigardas la geservistojn kiel necesan malbonaĵon, kaj toleras ilin en sia domo kaj sur siaj kampoj nur por laboradi, staras nun en la mezo de la sabla vojeto, kun la manoj en la poŝoj.

La mutolino preterpasas lin kun rapida kapklino, sed ne montrante la blankajn dentojn, ĉar ŝi ne amas la farmiston, sentante, ke li siaflanke tute ne estimas kaj eĉ ne ŝatas ŝin. Klomp resalutas kun preskaŭ nevidebla mangesto, refoje enpoŝigas la manon kaj ekmarŝas kelkajn paŝojn sur la vojeto. Tiam li iras trans tabulon, kiu kuŝas de la vojeto ĝis unu el la kampoj, kaj iras tie plue per longaj malgraciaj paŝoj por esplori, ĉu ĉio estas en ordo, nome: ĉu la „necesa malbonaĵo“ diligente laboras sur la kamparo. Intertempe li kalkulas, kiom li perlaboros tiun someron per siaj fruktoj, tute

ne plu pensante pri la mutulino, kiu eniras lian farmejon por laboradi ĝis la vespero. —

La liberajn horojn, kiuj restas al Rika, ŝi uzis por kudri siajn vestojn kaj triki siajn ŝtrumpojn; tiel pasis por ŝi jaro post jaro. Tiel pasas ankaŭ ĉi tiu somero kaj alproksimiĝas nova sezono kun novaj monatoj ĝis refoje venos la monato majo.

En tiu monato ĉiuj servistoj kaj servistinoj ĝuas liberan semajnon kaj ordinare faras nenion krom amuziĝi en la vilaĝaj trinkejoj aŭ en la urbo, kien ili iras por elspezi tiom da mono, ke post la sepa tago restas al ili preskaŭ nenio.

Rika neniam partoprenis al tio, ĉar ŝi estas surdmuta; ŝi pasigas tiujn liberajn tagojn en sia dometo, purigante ĝin de la subtegmentejo ĝis la kahelplanko, kaj se restas kelkaj tagoj, ŝi vizitas siajn fratojn kaj fratinojn, loĝantajn en la apudaj vilaĝoj.

Refoje venis tia libera semajno, kaj puriginte sian dometon, ŝi iris al Uskvert, al frato, kiu loĝas tie kun sia familio. Ŝi foriris tien tute ne ŝlosinte la pordon de sia dometo, ĉar tiu pordo estas senserura; neniam oni forŝtelis ion el la dometo, kaj ŝi tute ne pensas pri tio, ke ŝtelisto eniros por forpreni la meblojn dum ŝia malesto.

Du tagojn poste, en la mateno ŝi refoje forlasas sian fraton per returni sin al sia dometo. Aŭtomate kiel ĉiam ŝi laŭiras la makadaman vojon de Uskvert al Warfum. En Warfum ŝi aĉetas lanon ĉe butikisto, kie ŝi kutime ankaŭ aĉetas aliajn bezonaĵojn por triki kaj kudri, kaj duonan horon poste ŝi staras sur la ŝtona strateto antaŭ la pordo de sia dometo. Ŝi malfermas ĝin, levante la riglilon, eniras, trairas la koridoreton ĝis la ĉambra pordo kaj subite ekhaltas. Tiu pordo

estas fermita, kaj ŝi ne fermis ĝin, kiam antaŭ du tagoj ŝi forlasis la ĉambron.

Ŝi pripensas pri tio laŭ sia maniero, ne per vortoj, sed per imagoj. Enpense ŝi vidas iun eniri kaj eliri la dometon, sed kiu eniris kaj eliris? ... Kial oni eniris kaj eliris? ... Ŝi kaptas la ringon, pendantan sur la pordo kaj hezitas, ĉu ŝi eniros aŭ ne. Enpense ŝi vidas personon en la ĉambro kaj ŝi ellasas la ringon, per kiu ŝi estas levonta la riglilon, pripensas momenton kaj eliras la koridoreton eksterdomen por rigardi tra la fenestro, ĉu vere iu estas en la ĉambro. Ŝi klinas sin por enrigardi trans la vitraĵon, kiu kovras la malsupran parton de la fenestro. Neniu enestas, sed sur la tablo staras bruna kesteto. Larĝe Rika malfermas la okulojn kaj stranga sono eliras el ŝia buŝo. Ŝi ne timas, ĉar kesteto ne povas fari malbonon, sed estas al ŝi enigmo, kiel la kesteto venis tien... kaj kio do enestas? ... Ŝi rigardas ĉirkaŭe por vidi, ĉu eble persono ie staras, kiu enportis la kesteton, sed la sabla vojeto estas senhoma same kiel la kamparo. Enpense ŝi vidas la farmistedzinon, kiu enportis la kesteton por surprizi sian servistinon, kaj vidigante por momento la blankajn dentojn, la mutulino forlasis la fenestron kaj eniras la dometon. Ŝi turnas la ringon de la ĉambra pordo, la riglilo sin levas kaj per du longaj paŝoj, kiuj klaksonas sur la kahelplanko, ŝi staras antaŭ la stranga surprizaĵo. La kovrilo estas nek najle-, nek ŝnurefermita, sed staras tiel, ke ŝi povas vidi parton de la enhavo, nome blankan tolajon. Rika ekpensas pri sia lito kaj image vidas novajn litkovrilojn, kaj singarde ŝi forŝovas la kestkovrilon. Subite ŝi puŝas ĝin tiel forte, ke ĝi falas sur la plankon. Ŝi ne aŭdas la bruon, kiun ŝi per tio kaŭzis, sed rigardas kun larĝe malfermitaj okuloj en la kesteton, ĉar tie kuŝas, duone kovrita per tola tuko, mirinde bela in-

faneto. Ŝi ne kredas al siaj okuloj kaj staras momenton rigardante la „surprizaĵon“, ne sciante, kion pensi aŭ fari. Ŝi paliĝas kaj la neatendita surprizo tiel ektuŝas ŝin, ke ŝi devas apogi sin kontraŭ la tablo, ĉar ŝiaj kruroj ektremas kaj tiu sama stranga sono, kiun nur mutulo povas aŭdigi, eliras refoje el ŝia gorgo, sed baldaŭ ŝi regas sin. La falanta kovrilo vekis la infaneton, kiu nun per grandaj brunaj okuloj rigardas la mutulinon. Rideto ludas sur la buŝeto de la infano, kiu kuŝas tie kiel anĝeleto.

Strangaj pensoj kaj imagoj amasiĝas en la kapo de Rika.

— Kiel venis tien tiu infano? ... Kial oni ĝin metis tie sur la tablon? ... Ĉu ĝi estas donaco? ... Ĉu oni venos por repreni ĝin?

La infano ridas kaj sen timo rigardas la mutulinon. Ŝi forprenas la tolaĵon, metas ĝin flanke de la kesteto kaj jen la infaneto estas simila al la malgranda Moseo en la kesteto sur la akvo de Nilo. Antaŭ Moseo staras belaj fraŭlinoj, belaj princinoj kun ventumiloj en la mano, kaj ili estas prenontaj Moseon el la kesteto, naĝanta sur la akvo inter la altaj kanoj. Antaŭ ĉi tiu bruna kesteto sur la tablo staras la mutulino, kiu vole-nevole rigardas la bildon sur la muro, kaj ankaŭ ŝi estas elprenonta sian Moseon.

— Kiel longe li kuŝis en ĝi? ... Si pripensas pri tio, sed subite alia ekpenso ŝin trapas.

— Ĉu la infano soifas aŭ malsatas? ... Eble ne, ĉar ĝi ne ploras, sed ridas.

— Ĉu ĝi estas pura kaj seka?

Rika scias sperte, ke multaj infanoj kelkfoje ne ploras, kiam ili estas malsekaj, kvankam estas necese, ke ili estu puraj kaj kuŝu en sekaj vindotukoj.

Ŝi prenas la infaneton sur la brakon kaj ridas al ĝi;

la infaneto malfermas la buŝon kaj movetas la lipojn. Rika scias, ke ĝi eligas sonojn, sed ŝi ne aŭdas ilin. Ŝi tamen ĝojas, ke la etulo ridas, kaj ŝi premas ĝin al sia koro, dum larmoj rulas al ŝi sur la vangoj pro emocio... Ŝi pensas memore al siaj gefratoj, kiam ili estis tiel malgrandaj kiel ĉi tiu infaneto... Ŝi remetias la etulon en la kesteton, pretigas varmetan akvon kaj forigas la vindotukon. Tion saman ŝi faris pli ol milfoje, kiam la gefratoj estis suĉinfanoj, kaj ŝi estas lertulino en tiu laboro. La infano (ŝi nun vidas) estas belforma knabeto. Ŝi purigas lin kaj ekpensas pri vindotukoj, laktobotelo kaj aliaj necesajoj kaj pri tio, kion ŝi devos fari kun la knabeto, kiu estas tiel bela kaj dolĉa. Image ŝi vidas malriĉajn gepatrojn kun multaj infanoj, tiom multaj, ke ili ne sufiĉe bone povas nutri ĉiujn. Image ŝi vidas plue, ke la patro metas ĉi tiun knabeton en la kesteton kaj alportas lin en ŝian dometon, ĉar ŝi estas lerta vartistino kaj havas sufiĉan monon kaj tempon por prizorgi la etulon.

— Ĉu ŝi devas gardi lin?

Kiam ŝi denove rigardis la knabeton, ĉi tiu ridas refoje kaj Rika sin klinas super li, kisas lin kaj ekpensas:

— Mi gardos, flegos kaj mi amos lin.

Sed jen alia ekpenso:

— Ĉu oni forprenos de ŝi la etulon?

Ŝi malkvietiĝas; oni propravole donacis al ŝi la knabeton, ŝi volas gardi lin sekrete, por ke neniu povu lin forpreni. Ŝi ekstaras por serĉi lokon, kien ŝi povas plej bone meti la kesteton tiel, ke neniu de ekstere povus vidi ĝin. Flanke de la kamenkapuĉo estas sufiĉa loko por starigi seĝon, kaj sur tiun seĝon ŝi povus meti la kesteton, kiun ŝi uzos kiel lian liteton. Stariginte la seĝon kun la kesteto tien, ŝi eliras kaj rigardas tra la fenestroj por esplori, ĉu el tie enrigardanto povas

rimarki ŝian etulon. Ŝi tuj reiras hejmen, turnas la dorson de la seĝo al la fajroloko, pendigas tukon sur la apogilon, kaj refoje eliras por explore rigardi. Ŝi estas kontenta, ĉar ŝi vidas nur la tukon. Enirante la duan fojon, ŝi estas kaptata de la ekpenso, ke oni povas forŝteli la knabeton dum ŝia forestado kaj tuj ŝi decidis havigi al si seruron por ĉiam ŝlosi la pordon, kiam ŝi devas lasi la infanon sola. Sed tiun seruron ŝi volas posedi kiel eble plej baldaŭ. Ŝi metas la kesteton sur la liton, fermas la litopordojn kaj eliras por senprokraste aĉeti la seruron, ĉar jam post kelkaj tagoj ŝi regule devos esti eksterdome por laboradi ĉe Klomp... Ŝi eliras.

Aŭtomate, sed pli rapide ol alitempe, la lignoŝuoj disjetas la sablajn nubetojn kaj scivole la malmultaj homoj, kiujn ŝi renkontas survoje, rigardas posten al la mutulino kaj ekmiras pro la rapideco, kun kiu ŝi kontraŭ sia kutimo sin direktas al la vilaĝo.

Veninte tien, ŝi iras al forĝisto kaj fingre montras seruron kun ŝlosilo kaj du ferajn krampojn. Ŝi aĉetas ilin tuj pagante. Forlasinte la forĝiston, kiu miras pro la tuja pagado, ĉar Klomp pagas nur unu fojon ĉiujare, kion li bezonis dum tiu tempo, la mutulino eniras butikon por aĉeti botelon por suĉinfano kaj aliajn bezonaĵojn por la etulo. La butikisto komence ne komprenas, kion ŝi deziras, sed esplorrigardinte, ŝi fingre montras kion ŝi volas aĉeti, kaj la viro miras, ĉar la farmistedzino ne havas infanojn; sed Rika ne atentis lian miron kaj post kapklino ŝi forlasas la butikon.

Reveninte al sia domo, ŝi per la lignoŝuo enbatas unu krampon en la pordokadron kaj la alian en la pordon tiel, ke la kurbaĵoj preskaŭ sin tuŝas por trairigi la seruron. Esplorinte poste, ke la krampoj sidas fortike, ŝi eniras kaj prenas la kesteton de la lito kaj metas ĝin sur la seĝon ĉe la fajroloko. La knabeto

dormas kviete. Rika eliras, ŝlosas la pordon, kaj aŭtomate, sed rapide la du lignoŝuoj disjetas la sablajn nubetojn sur la vojeto, ĝis kiam ŝi malaperas en la farmejo por preni lakton. Tiun lakton ŝi prenas en la laktejo kaj enpoŝiginte la plenan botelon, kiun neniu povas vidi, ĉar la plej malsupra abelujo estas tiel larĝa, ke ŝi povus sen peno kaj nerimarkite kaŝi sub ĝi dek botelojn.

Reveninte hejmen, ŝi prenas unu alumeton el alumetujo kaj metas ĝin sur la kamenkapuĉon, ĉar ŝi volas poste pagi la prenitan lakton, kaj ne povosciante legi aŭ skribi por noti la botelojn, ŝi post kelkaj tagoj kalkulus per la alumetoj, kion ŝi ŝuldos al Klomp.

Ŝi nun boligas iom da lakto por doni al la knabeto, kiam li vekigos.

Kviete ŝi eksidas ĉe la kesteto, sen interrompo rigardante la anĝeleton, kiun la sorto tiel subite kaj mistere lokis sur ŝian vojon.

Ŝiaj vangoj estas pli ruĝaj ol kutime, ŝiaj okuloj brilas pli hele ol iam antaŭe. Amplene ŝi admiras la belan estaĵon, kies patrino ŝi volas esti kaj por kiu ŝi volas laboradi ĝis kiam li fariĝos bela plenkreska junulo. Ho, kiom da pensadoj kaj imagoj atakas la mutulinon! Inter ili estas nur unu, kiu maltrankviligas ŝin: La patro povus reveni por repostuli la knabeton, sed se li revenas, ŝi volas peti, ke li cedu lin al ŝi, ĉar ŝi povas labori por li kaj prizorgi lin, kaj tion ŝi volas.

Minutoj pasas . . . , horoj pasas kaj jam ekvesperiĝas, sed la mutulino sidas kviete kun interplektitaj manoj kaj atendas pacience por suĉigi sian adoptiton por la unua fojo.

Dua Ĉapitro.

Kian karakteron havas surdmutuloj — La gefarmistoj Klomp — Sinjorino Klomp fariĝas scivola — Malkovraĵo de sinjorino Klomp — Stranga interparolado de du virinoj — Kial rompiĝas la pipo de la pastro — La farmejo de Klomp — Stranga interbatalo kaj stranga bano — Kiel la farmistedzino rekvietigas Rika.

Preskaŭ ĉiuj surdmutuloj havas la saman karakteron. La plej multaj estas tre sentemaj por bonaj traktadoj kaj servemaj al ĉiuj, kiuj siaflanke sin montras indulgaj kaj amikaj al ili. Kontraŭe ili estas kapricaj kontraŭ personoj, kiuj ilin mokas, turmentetas aŭ malbone traktas, jen al tiuj mokantoj aŭ malbontraktantoj ili sin montras malservemaj, jen ili agas kontraŭ ili laŭ indifera maniero.

La edzino de Klomp, kiu havas senteman karakteron, sin montras ĉiam kompatema kaj intima al la muta servistino, precipe ĉar tiu ĉi estas diligenta, ne perdante sian tempon farante nenion, sed konstante laboradas, eĉ se aliaj servistinoj de tempo al tempo trovas okazon senbezone forĵeti sian tempon.

Matene Rika kutime de la dekdua ĝis la unua horo iras al sia dometo; la farmistedzino lasas ŝin iri, ĉar post kiam ŝi revenis, ŝi uzas tiel bone kaj diligente sian tempon, ke neniu el ĉiuj servistinoj ŝin superas. Rika laboris jam tiom da jaroj ĉe Klomp, ke neniu bezonas montri al ŝi, kion ŝi devas fari. Kiam la merkado estas okazinta, la mutulino per si mem ĉiam scias, kiun novan

laboron ŝi povas komenci, kaj se kelkfoje ŝi ne tuj scias kion fari, kaj se ne komisionoj estas farotaj, tiam ŝi nur rigardas sian mastrinon. Tiu bezonas nur unu mangeston por diri, kie ŝi povas trovi alian laboron. Neniu krom la farmistedzino ordonas al ŝi, ĉar la aliajn la mutulino tute ne atentis, eĉ ne la farmiston mem. Ŝi obeas al la farmistedzino volonte, ĉar ĉi tiu ĉiam estas amika. Rika sentas, ke ŝia mastrino ŝin komprenas kaj ŝi komprenas reciproke la mastrinon, por kiu, se bezonus, ŝi riskus sian vivon. Reciproka intimeco kaj amikeco unuigas tiujn du virinojn kaj pro tio la mutulino (eĉ ne aludante ĝin) restas en la sama farmejo, dum aliaj servistinoj ĉiujare je fiksita tempo antaŭ la monato majo devas esti redungataj.

Dum kelkaj tagoj la edzino de Klomp rimarkis, ke Rika kelkfoje interrompis sian laboron, kaj ke ŝi enpense rigardas sencele antaŭ sin, dum rideto glitas sur ŝia vizaĝo. Ŝi rimarkis ankaŭ, ke la mutulino pli rapide ol laŭkutime iras al sia dometo ne nur la tagmezon, sed ankaŭ vespere post la dumtaga laboro. Io eksterordinara sen ia dubo devas esti la kaŭzo de tio, kaj ĉar virinoj estas scivolaj, ankaŭ la mastrino de Rika estas tia, kaj ŝi decidas spionadi la servistinon.

Pasis nun semajno, de kiam la mutulino adoptis la infaneton, kaj estas la deka en la mateno. La lignoŝuoj ĵus laŭtakte disjetas la sablajn nubetojn sur la vojeto kaj la duobla abelujo kun la blanka kuŝo sin direktas rapidmove al la vilaĝa spicisto, ĉar Rika devas fari komisionojn. La mastrino ŝin sekvas per la okuloj, ĝis kiam la stranga figuro tute malaperis; tiam laŭirante la vojeton el sablo, ŝi iras al la dometo, kies pordo (kiel ŝi jam multfoje vidis) estas ĉiam nefermita. Kiel granda estas ŝia surprizo, kiam ŝi vidas nun la pezan seruron, kiu al ŝi baras la enirejon de la dometo. Sinjorino

Klomp ekkaptas, levas kaj ellasas la seruron, kiu kun laŭta bruo refalas sur la pordon.

— Io mistera sin kaŝas sub tio —, pensas sinjorino Klomp kaj sin klinante super la vitraĵo de la fenestro flanke de la pordo, ŝi rigardas internen. Ŝi neniam vizitis la loĝantaron, sekve ŝi ne povas vidi, ĉu io ŝanĝiĝis en la sola ĉambreto; tamen ŝi explore rigardas ĉiujn lokojn, sed vidas nur unu tablon kaj kvar seĝojn, el kiuj unu estas kovrita per tuko. Nenio suspektinda trafas ŝiajn okulojn, tamen io sendube ŝanĝiĝis aŭ okazis en tiu ĉambro, ĉar alie ne estus necese fermi la dompordon per tiu seruro. La sinjorino ĉirkaŭiras la dometon, rigardas tra ĉiuj fenestroj, sed rimarkas nenion eksterordinaran. Ŝia virina instinkto tamen certigas al ŝi, ke la mutolino ne sen kaŭzo almetis tian seruron. Pripensante momenton, ŝi foriras.

Estas proksimume tagmezo, la sablaj nubetoj sin sekvas rapide sur la vojeto kaj la mutolino alproksimiĝas sian hejmon. Foriginte la seruron, ŝi eniras, metas la korbon en la koridoron kaj alpaŝas al la tuke kovrita seĝo. Ŝiaj brilantaj okuloj sin fiksas sur la knabeton. Li ridas kiel nur infano povas ridi. La mutolino ne aŭdas ĝin, ŝi vidas la ridadon kaj feliĉe rigardas la malgrandan Moseon kun amo kaj emocio. Ŝi balbutas kelkajn raŭkajn kriojn, kiuj tamen ne timigas la knabeton, ĉar li jam kutimis al ili kaj scias, ke post tiuj krioj sekvos la dolĉa lakto. Post kiam ŝi sufiĉe longe ĝuis la ridadon de la knabeto, ŝi elprenas lin el la kesteto, purigas lin, almetas puran vindotukon, kaj turninte la dorson de sia seĝo al la pordo, ŝi suĉigas la infanon. Subite ŝajnas al ŝi, kvazaŭ nigreta ombro sin ŝovas sur la vando antaŭ ŝi. Aliulo ne rimarkus tion, sed surdmutuloj rimarkas preskaŭ ĉion. Ŝi sin turnas, sed vidas nenion. Tuj poste la sama ombro

reŝoviĝas, sed tuj malaperas. La mutulino refoje sin turnas, sed neniu staras ĉe la fenestro ekster la domo.

— Eble nubo preteriris —, ŝi pensas, kaj denove ŝi rigardas la suĉantan infanon.

Kiam li suĉtrinkis ĝissate, ŝi remetas lin en la kesteton, premas kison sur la anĝelan vizaĝan kaj staras en kurba sintenado, rigardante la etulon, ĝis kiam ŝia dorso doloras. Tiam ŝi turnas sin por eliri, ĉar estas kvarona horo antaŭ la unua. Sed apenaŭ la lignoŝuoj klaketis kvarfoje sur la kahelplanko, ŝi kun teruro ekhaltas, ĉar rekte antaŭ ŝi staras la farmistedzino, kiu kun pala vizaĝo, kiu esprimas kompaton, surprizon kaj bedaŭron, baras al ŝi la elirejon de la ĉambro.

Terurekkrio eliras el inter la lipoj de la mutulino kaj mastrino kaj servistino sin rigardas. Neniu el ambaŭ scias, kion pensi, nek kion ekfari.

La servistino timas, ke ŝi perdos la infanon, ĉar oni malkovris lin; la mastrino ekpensas, ke la infano naskiĝis en ĉi tiu dometo kaj teruraj flankpensoj akompanas tiun konjekton. Ŝi tamen ne kondamnas la mutulinon, kiun ŝi ja devas konsideri kiel naivan senkulpan kreitaĵon.

La mastrino kiel unua rompas la mortan silenton, regantan en la ĉambro kaj ĝemdiras:

— Ho Dio, knabino, kion vi faris!?

La mutulino ne aŭdas la parolojn, sed ŝi konscias, ke la mastrino juĝas nejuste pri ŝia konduto. Ŝi volas komprenigi, ke la infano ne naskiĝis al ŝi, kaj kiel li envenis en ŝian dometon. Ŝi fingre montras Moseon sur la enkadrigita bildo, prenas la kesteton, starigas ĝin sur la tablon kaj faras gestojn por montri, ke fremdulo enportis la kesteton; tiam ŝi frapetas kelkajn fojojn per la montrofingro sur sian bruston, skuadas la kapon, kvazaŭ por diri:

— Li ne estas mia, mi trovis lin sur la tablo en tiu ĉi kesteto, same kiel tiuj virinoj sur la bildo trovas tiun infanon en kesteto sur la akvo.

La farmistedzino komprenas malbone la gestojn de sia servistino, ŝi prenas la knabeton sur la brakon kaj admiras lian belan kapeton kun la brunaj, preskaŭ nigraj okuloj kaj samkoloraj haroj; tiam ŝi metas lin sur siajn genuojn kaj pripensante la strangegan okazon, ŝi rigardas antaŭ sin.

Rika staras senmove kaj pensas:

— Ĉu oni forprenos lin de mi? — Tiam ŝi tuŝas la brakon de la sinjorino. Ĉi tiu rigardas ŝin. Rika refoje frapetas al si la bruston komprenigante: — Li ne estas mia —; tiam ŝi metas la fingron sur sian buŝon, etendas brakon en la direkto de la farmejo kvazaŭ por diri, ke la mastrino pri la infano ne parolu al Klomp. La sinjorino, kiu bone konas sian edzon, decidas, ke ŝi previzore ne parolos al li pri tio, ĉar li jam ne tolerus la mutulinon en la farmejo, kiam li eksciis, ke ŝi havas infanon, kaj ŝi kapneas; tiam ŝi ekstaras por foriri.

Estas nun preskaŭ la unua horo, kaj Rika starigas la kesteton sur la seĝon flanke de la fajroloko, ekkaptas la korbon kaj sekvas sian mastrinon eksteren. Tie ŝi ŝlosas la pordon kaj kuratingas sur la vojeto la farmistedzinon, kiu direktas siajn paŝojn al Brej. Haltigante ŝin per la brako, ŝi refoje fingre montras la farmejon kaj frapetas al si la buŝon.

— Ne! — diras la sinjorino, kapskuante, — Ne! mi ne parolos!

Rika ridetas, rekvietiĝas kaj ŝiaj lignoŝuoj turnas la kalkanumojn al la mastrino, kiu iras plue al la domareto, dum la mutulino rapidas al la farmejo.

Sinjorino Klomp dume iras malrapide plue, pensante ke ŝi do konjektis prave, ke io eksterordinara okazis en

la ŝlosita dometo. Ŝi enprofundiĝas en pensojn. — Cu Rika naskis tiun infaneton? Sed tio ja estas neebila; ŝi neniam havis interrilatojn kun viroj, kaj eĉ se ŝi havus interrilatojn, ŝi estas honestulino Sed senhontulo povus delogi kaj trompi ŝin, tamen ankaŭ tio estas neverŝajna; Rika neniam malsaniĝis, alvenis ĉiutage al sia laboro kaj forrestis nur dum la libera semajno, kaj en tiu semajno la knabeto jam de longe estis naskita, ĉar li havas almenaŭ tri monatojn — Cento da tiaj pensoj trairas ŝian kapon, fine ŝi diras al si:

— Sed ni ne povas ĉiam kaŝi la infanon, la homoj fine ekscios pri tio

Irante plue ŝi atingas la domareton kaj la preĝejon kun la malalta pinta turo. Ĝi staras meze de la alte lokita enterigejo inter tomboŝtonoj kaj tombofostoj, indikantaj la nomojn de la sub si ripozantaj mortintoj. Krucojn oni ne vidas tie, ĉar la loĝantoj de Brej apartenas al la protestanta religio.

Post la enterigejo staras en bela ĝardeno la blanke pentrita domo de la predikisto. Mallarĝa vojeto iras de la tombejo al la ĝardeno kaj la predikisto promenas tie kun libro en la mano kaj longa argila tabakpipo en la buŝo. Li estas viro de meza kresko, ankoraŭ fraŭlo kaj ĉiam nigre vestita. Li havas nebelan aspekton, ĉar lia malsupra makzelo staras tro multe antaŭen, sed por kaŝi tiun malbeliĝon, li portas barbon, kiu kovras ne nur la mentonon ĝis la lipo, sed ankaŭ la vangojn. Lia barbo, same kiel liaj kraniharaj estas tute blankaj, ĉar li estas jam sesdekjara viro. Li estas miopa, kaj rigardante per la grizaj okuloj personojn, kun kiuj li parolas, li ĉiam sulkigas la frunton, imagante, ke tiam li pli klare povas vidi.

Jam tridek jarojn li loĝas en la domareto Brej kaj ne volonte forlasus ĝin, ĉar li kutimis al ĝi kaj al la

blanka domo, kie li loĝas kun maljuna mastrumistino kaj juna servistino. Li konas ĉiujn homojn de la ĉirkaŭaĵo kaj la junajn li ĉiujn baptis. Kvankam li ne estas elokventa paroladisto (li kutimas legadi siajn predikojn) oni tre ŝatas lin pro liaj bonaj moroj kaj pro la amika, preskaŭ intima maniero, per kiu li kondutas kun la Brejanoj. Li estas la konsilanto de ĉiuj kaj tre ŝatas, ke oni venas al li por peti lian konsilon.

Ekvidante yiriron eniri la tombejon, li sulkgigas la frunton, prenas la pipon el la buŝo kaj fikse rigardas ŝin. Komence li ne povas distingi, kiu laŭiras la vojeton el konkoj, kiu ĉirkaŭas la tombejon kaj la sulkoj pli-profundiĝas. Nur post kiam la virino faris kelkajn paŝojn sur la al la ĝardeno kondukanta vojeto, li kredas, ke ŝi estas sinjorino Klomp, kaj sulkgigante la frunton plej eble profunde, li estas certa, ke ŝi estas tiu sinjorino.

— Estas neordinara tempo por promenado —, pensas li, kaj sensulkgiginte la frunton, li iras al ŝi renkonte kaj salutas amike.

— Bonan tagon, pastro! — diras sinjorino Klomp kaj ŝi plue laŭiras la vojeton kondukantan al la ĝardeno. La pastro, por akompani ŝin, devas sin turni; li sin turnas kaj ili promenas unu flanke de la alia. Strabe la pastro rigardas la sinjorinon kaj spite al sia miopeco li rimarkas, ke ŝi venas por preparoli ion neordinaran, tamen tuj rigardante antaŭ sin, li diras:

— Bela vetero hodiaŭ, sinjorino.

— Tre bela, pastro.

— Eĉ pli bela ol hieraŭ.

— Jes.

— Mi tamen antaŭsentas pluvon.

— Ĉu vi antaŭsentas tion?

— Jes, miaj koloj doloras, kaj tiam ĉiam ekpluvos.

Ili promenas plue.

Refoje li strabe rigardas ŝin kaj dum dekono da sekundo lia frunto sulkiĝas; tiam li tuŝas per la pipo belan rozon, kiun ili ĵus estas preterpaŝontaj, kaj li diras plue:

— Pro miaj rozoj mi esperas, ke miaj kaloj doloru ankoraŭ pli multe, ĉar ili bezonas akvon, la rozoj memkompreneble.

La sinjorino ne respondas, sed tusetas du aŭ tri fojojn; ŝajnas kvazaŭ kelkaj vortoj volas eliri el ŝia gorgo, sed subite renkontas barilon; la tusetoj tamen ne forigas tiun barilon kaj ŝi promenas plue.

Ili nun estas en la mezo de la ĝardeno; rekte antaŭ ili sin trovas la nefermita pordo de la pastrejo, kaj la sinjorino alpaŝas al ĝi, dirante:

— Pastro, mi bezonas vian konsilon.

Rapida rideto plilarĝiĝas la barbon de la predikisto, ĉar li jam rimarkis, ke liaj miopaj okuloj divenis ĝuste.

— Ho, se mi povoscias doni ĝin, sinjorino, mi estos je via dispono.

Li pipe montras la nefermitan pordon kaj la sinjorino transiras la sojlon. La pastro ŝin sekvas kaj ambaŭ staras en la larĝa koridoro. La antaŭĉambra pordo staras ankaŭ nefermita, kaj denove la longa pipo montras al la sinjorino, ke ŝi estas invitata eniri.

Ŝi eniras kaj la trian fojon la pastro uzas sian pipon nome por montri seĝon. Ambaŭ sidigias.

Sinjorino Klomp rigardas esplore ĉirkaŭe kaj la pastro, spite al sia miopeco rimarkas, kion tio signifas. Li ekstaras kaj fermas la pordon kaj sidiginte denove, li diras:

— Mi estas je via dispono, sinjorino Klomp.

— Mi unue havas ion por informiĝi, pastro . . . hm! . . . hm! Ĉu ĉiuj naskitaj infanoj devas esti enskribataj?

— Jen tre stranga demando —, pensas la pastro, kiu

ne klare komprenas, kaj li respondas al tiu stranga demando per la vortoj:

— Komprenoble mi enskribas ĉiujn naskitajn infanojn, post kiam mi baptis ilin.

— Jes, memkomprenoble, sed mi ne aludas la preĝejan registron, sed tiun de la kumunum-estraro.

La pastro ne povas ne sulkigi tre profunde la fruntojn kaj la sinjorino, rimarkante la surprizon de la pastro, diras plue:

— Ĉu vi scias, post kiam da tagoj nove naskitaj infanoj devas esti enskribataj?

— Post dudek kvar horoj sed

— Jes, pastro, mia demando estas iom stranga, sed antaŭ ol klarigi ĝin, mi dezirus ekscii, ĉu malplenumo de tiu devo estas leĝe punata.

— En realo, jes.

— Ĉu severe?

— Tio dependos de la motivoj de la malplenumo.

— Supozu, pastro, ke malobeanto ne scias, ke tiu devo ekzistas.

— Sed, ni ja ne povas supozi, ke tiaj homoj sin trovas tie ĉi.

— Tamen supozu momenton.

— Nu, tiaokaze la puno ne estus tre severa sed mi ne kom

— Kaj vi ne povas kompreni, kial mi informigas pri tio. Mi do devas paroli pli klare, sed antaŭe vi permesu, ke mi faru alian demandon: — Kion vi opinias pri la fraŭlinoj de nia domareto?

— Kiom mi scias, ĉiuj estas honestaj kaj bonmoraj.

— Mi samopinias, sed honestulino povas esti delogata kaj trompata

La pastro metas la pipon sur la tablon, sed tuj re-

prenas ĝin, kaj sin klinante antaŭen tiel, ke la pipo tuŝas lian ŝultron, li flustras.....

— Ĉu unu el la filinoj de ĉi tiuj loĝantoj.....?

— Okaze mi rimarkis, ke unu el ili havas tri- aŭ kvarmonatan infaneton.... kiu ne estas enskribita.

— Tri- aŭ kvarmonatan infanon!..... Kiam vi rimarkis tion?

— Antaŭ duona horo.

La pastra vizaĝo ŝanĝiĝis. La sulkoj sur lia frunto pliprofundiĝis, kaj lia malsupra makzelo elstaras ankoraŭ pli multe ol kutime. La bona viro enprofundiĝas en pensojn, lia pipo traboradas la blankajn harojn sur lia kapo, kvazaŭ ĝi volas serĉi sur la kranio la solvon de la enigmo, kiu tiel subite okupas liajn meditojn.

— Kiu do povas esti tiu knabino? — li demandas al si. Li konas ĉiujn, vidas ilin preskaŭ ĉiutage, sed neniam li rimarkis ion suspektindan. Fine li flustras:

— Kiu ŝi estas?

— La mutulino.

— Rika! — La serĉanta pipo jam ne serĉas sur la kranio inter la haroj de la pastro, sed falas el la mano de la konsternita viro, kaj kvar pecoj tintas sur la planko inter la piedoj de la du interparolantoj.

— Pardonu —! diris la sinjorino, ĉar mi ekterurigas vin.

— Ho, tio ja ne estas grava.... ĝi estas nur argila pipo.....

Sinjorino Klomp kolektas la pecojn kaj metas ilin singarde sur la tablon, tiam ŝi atendas por ekaŭdi, kion diros plue la pastro, sed li silentas ankoraŭ momenton, fine li diras:

— Tamen, estas ja neeble, ke la infano estas ŝia. Mi vidas ŝin preskaŭ ĉiutage.

— Mi ankaŭ pensis tion, sed ŝi havas infaneton, mi

ĝin vidis antaŭ duona horo —, kaj la sinjorino rakontas detale ĉion, kion ŝi spertis en la dometo de la mutulino.

La frunto de la pastro subite sensulkiĝas kaj rideto refoje plilarĝiĝas lian barbon; tiam li diras:

— Nu, povas ja esti, ke ŝi trovis la infanon.

— Sur la tablo?

— Jes, kial ne? ... la pordo, kiel vi diris, estis ĝis antaŭ kelkaj tagoj ĉiam nefermita, kaj nekonata persono eble eniris kaj postlasis la kesteton kun la infano ... Ĉiokaze mi esploros tion kaj parolos kun la vilaĝestro, por ke la infano povu esti enskribata. Mi klopodos, ke laŭleĝa persekuto estos evitata.

— Sed kiel trovi pruvojn, ĉu la infaneto estas ŝia aŭ ne? Rika ne povas paroli.

— Estos malfacile; sed mi ekzamenos la kesteton, eble ĝi havigos al mi la fadenon, laŭ kiu mi povos eliri el ĉi tiu labirinto.

Sinjorino Klomp ĝemas. Ŝi kompatas la mutulinon kaj estus tre feliĉa ne nur, se la pastro pruvus, ke la infano estas trovito, sed ankaŭ, se Rika ne renkontus malagrablajojn.

Ŝi ekstaras, dankas la pastron kaj eliras. La pastro akompanas ŝin ĝis la makadama vojo; tiam li donas al ŝi la manon kaj post saluto ili disiras; la pastro al sia domo por pripensadi tiun strangan aferon kaj la sinjorino iras al la farmejo.

Intertempe Rika estas laboranta en la laktejo. Ŝi staras nun ĉe alta laktobarelo, el kiu ŝi forigas la jus faritan buteron. Per ambaŭ manoj ŝi ĉerpas la naĝantan buteron el la barelo kaj metas ĝin en argilan poton. De tempo al tempo ŝi interrompas tiun laboron kaj staras kun premitaj lipoj kaj rigardas sencele antaŭ sin, pens-

ante pri la infano kaj pri la mastrino, kiu malkovris la sekreton; kaj ŝi estas malkvieta.

Klomp, kiu preskaŭ neniam sin okupas pri la buterfarado, okaze preteriras la laktejon kaj rigardas internen. Li tuj rimarkas, ke ĉio ne marŝas bone, ĉar unu el la servistinoj ne laboras, sed staras ĉe la laktobarelo, farante nenion kaj rigardante antaŭ sin. Li restas staranta ekstere kaj atendas por vidi, ĉu ŝi eklaboros. La mutulino eklaboras, sed nur mallongan tempon, ĉar jen ŝi denove faras nenion. Klomp ĝojas, ke li venis kaj ke ĝuste en tiu tempo ĉio ne marŝas bone. Li eniras la laktejon, sed la mutulino ne atentigas lin; kun permitaj lipoj ŝi staras ĉe la barelo farante nenion. Klomp staras kun la manoj en la poŝoj kaj ne eltiras ilin. Fikse rigardante la mutulinon, li paŝas al ŝi per kvar longaj pezaj paŝoj, kaj per la kubuto tuŝegas ŝin. Rika rigardas lin, sed tuj poste jam tute ne atentante la farmiston, ŝi reprenas sian antaŭan sintenadon. Klomp ruĝiĝas pro indigno, atendas minuton por vidi, ĉu ŝi komencos labori, sed vidante, ke la tuŝego restis sen rezulto, li la duan fojon ŝin tuŝegas, sed pli forte. La mutulino estas surprizita, ĉar ŝi ne komprenas, kion intencas la farmisto. Ŝi turnas al li la dorson, sed ne eklaboras.

Du aliaj servistinoj, ankaŭ laborantaj en la laktejo, ekhaltis por vidi tion, kio okazos, ĉar ili konas la mutulinon kaj scias, ke ŝi obeas nur al la mastrino.

— Eklaboru! — krias Klomp al ili. La servistinoj obeas, sed retenas kun peno moka rideton. Rika tamen ne obeas kaj Klomp por la tria fojo puŝegas ŝin kubute. La mutulino sin turnas al li kaj minace rigardas la farmiston, kies kolero ekflamis. Li montras kubute la barelon kaj krias: — Laboru!

Rika, anstataŭ obei, metas ambaŭ manojn sur siajn

koksojn kaj mokincitante rigardas la farmiston rekte en la okulojn.

Subpremata rido eksonas post Klomp kaj la servistinoj sin turnas por ne vidi la mokantajn, ridantajn vizaĝojn.

Klomp furioziĝas tiagrade, ke li jam ne povas regi sin. Li elpoŝigas unu manon kaj batas la mutulinon sur la vangon.

Kun raŭka terura ekkrio la batita kaptas apud si starantan balailon kaj puŝas ĝin en la vizaĝon de la farmisto. Lia ĉapo defalas de lia kapo kaj laŭtaj ridegoj de la servistinoj aŭdiĝas post li. Li nun elpoŝigas la duan manon por refoje bati la mutulinon, sed ĉi tiu alte levas la balailon, kiu per mirinda rapideco tuj refalas sur la kranion de ŝia atakanto. La farmisto kriegas kaj blasfemas kiel ebria homo kaj estas jetonta sin sur la mutulinon, sed ŝi kuras post la barelon. Klomp volas ekkapti ŝin, sed refoje la balailo sin levas. La farmisto sin kurbigas por eviti la baton, sed faletas sur la glataj kaheloj de la laktejo; anstataŭ kapti la mutulinon, li kaptas la bareltabulojn, la barelo ŝanceliĝas, renversiĝas kaj rulas sur la falintan farmiston, sur kiun surversiĝas la tuta blanka enhavo de la barelo. Kiel fiŝo en ŝlimajo Klomp baraktas sur la planko. Li ekstaras kaj la buterlakto fluadas el ĉiuj liaj vestoj. Li denove volas ataki la mutulinon, sed ŝi staras antaŭ li kiel vundita tigrino kaj swingadas la balailon kun tiom da lerteco, ke la farmisto ektimas kaj paŝas posten.

Ĝuste en tiu momento eniras la farmistedzino.

Tuj divenante tion, kio okazis, ĉar ŝi konas la karakterojn de la gebatalantoj, ŝi iras kviete al Rika, skuas la kapon kiel signo de malaprobo kaj sen peno prenas la balailon, kiun ŝi metas teren; tiam ŝi kaptas ŝian manon kaj sin direktas al la apuda kuirejo.

Rika sekvas kiel ŝatido. La farmistedzino prenas

ambaŭ manojn de sia servistino kaj refoje skuante la kapon, ŝi duone riproĉe, duone malĝoje rigardas en la okulojn de la mutulino. Ĉi tiu ekstremitas, falas sur la genuojn kaj kaŝante la vizaĝon sur la antaŭtuko de sia mastrino, laŭte ekkriploras pro eksciteco kaj nervemeco. Tuta ŝia korpo skuigās. La farmistedzino karesas al ŝi la kapon kaj levas ŝian vizaĝon, kiu banas en larmoj. Iom post iom Rika rekvietigās, fine ekstaras kaj ambaŭ iras en la laktejon, kie la du servistinoj purigas la kahelplankon. Iliaj vizaĝoj estas ankoraŭ ruĝaj pro ridado. Ili scias, ke la mutulino atendas ordonojn nur de la mastrino, sed ili ne estis atendintaj, ke ŝi tiel kuraĝe repagus unu solan vangfrapon de la farmisto, tiom pli, ĉar li estas vera giganto kaj dekfoje pli forta ol Rika. Ili kun ĝojo vidis, ke la farmisto, post kiam lia edzino forkondukis Rika, foriris el la laktejo, eĉ ne rigardante post si, kaj tiel malseka de la blanka bano, ke li lasis longajn striojn da buterlakto post si de la loko de l'batalo ĝis la antaŭdoma pordo, tra kiu li malaperas por almeti sekajn vestojn. La servistinoj tute haltigas la ridadojn. Ili scias, ke Klomp, kiu en realo estas malkuraĝulo, jam ne revenos por esplori, ĉu ĉio marŝas bone en la laktejo.

Rika reprenas sian laboron kaj la farmistedzino sin turnas al la servistinoj por informiĝi pri la kaŭzo de la stranga bapto, kiun ĵus ekhavis ŝia edzo kaj ili detale ĉion rakontas de la komenco ĝis la fino.

— Mi ja konjektis, ke li ŝin batis —, ŝi diris, kaj vidante ke Rika laboras, ŝi kviete iras al la familia ĉambro, kie ŝi trovas Klomp. Li almetis jam alian pantalonon kaj staras antaŭ la spegulo per kombi al si la harojn ankoraŭ malsekajn pro la akvo, per kiu li purigis ilin. Vidante eniri sian edzinon, li iom hontas, sed ĉar lia

fiereco estas vundita kaj li estas ankoraŭ en kolera humoro, li diras kun voĉo tremetanta:

— Mi forpelos tiun malbenitan mutulinon!

Kviete sinjorino Klomp respondas:

— Vi ne rajtas forpeli ŝin.

— Ĉu mi ne rajtas?... Ŝi spertos tion!

— Vi ne rajtas, ĉar vi ŝin batis.

— Kiu diris tion?... Ĉu la servistinoj babilis al vi?

— Neniu bezonis elbabili tion; ŝia vango estis ruĝa pro la bato.

Klomp ektimetas kaj diras:

— Mi tamen preskaŭ ne tuŝis ŝin.

— Vi ne pensis pri tio, ke mano tiel forta kiel via, ĉiam tuŝas tro forte.

— Sed ŝi ne laboris kaj ne obeis, kiam mi ordonis al ŝi eklabori.

— Kiamaniere vi ordonis?

— Per mia kubuto.

— Vi ne rajtas tuŝi ŝin per la kubuto; vi estas malprava.

— Ho jes, kompreneble, mi malpravis; nur virinoj ĉiam pravas, eĉ se ili estas mizeraj servistinoj.

— Mi neniam tuŝas Rika, tamen ŝi ĉiam obeas al mi; ne estas necese komandi aŭ tuŝi ŝin per la kubuto, simpla rigardo sufiĉas.

— Sekve mi ne rajtas ordoni geservistojn, al kiuj mi pagas?

— Memkompreneble vi rajtas komandi, sed ne puŝante kaj batante. Estu de nun pli saĝa kaj jam ne okupu vin kun servistinoj. Sen viaj komandoj la laboro marŝas tre bone en la laktejo.

Klomp almetas veŝton, jakon kaj kaptante sian ĉapon, li foriras murmurante, sed dirante nenion plu. Li hontas, li estas humiligita, tamen li bolas pro kolero, sed li

estas tro malkuraĝa por ĝin eksplodigi nun. Li iras sur la kampojn, eble tie li renkontos laboriston, kiu same kiel Rika ne laboras kaj li promesas al si, ke li sur tiun sentaŭgulon libere ellasos sian ĝis nun retenitan koleron. Liaj dikaj piedoj malgracie paŝon post paŝo portas lin plue, dum la pezaj ŝuoj dispecigas la argilpecojn sur la kampo, kvazaŭ ĉiu el tiuj pecoj kaŝus en si surdmutan servistinon. Li rigardas ĉirkaŭe, sed . . . ĉio marŝas bone, ĉar sur la kampoj la laboristoj laboras diligente, kaj fine por serĉi distradon, li saltas trans la foson sur la makadaman vojon, kaj laŭiras ĝin ĝis la vilaĝo, kie li en trinkejo trovas konsilon ĉe kelkaj glasetoj da brando.

Rika dume laboradas sen interrompo, ne pro la farmisto, kiu ŝin insultis, sed pro la mildaj rigardoj de lia edzino.

Rika sentas pli ol iam antaŭe, ke Klomp estas aroganta stulta diablo, kiu ŝin malamas, sed ŝi ne timas lian malamon. Ŝi sentas ankaŭ, ke la mastrino estas anĝelo, kiu komprenas, estimas kaj ŝatas ŝin, kaj helpas al ŝi ne nur kontraŭ tiu diablo, sed ankaŭ por protekti la infaneton, kaj feliĉa rideto naskiĝas sur ŝia vizaĝo. La kavetoj en la vangoj dum momento pliprofondiĝas kaj jam ne pensante pri la survango, nek pri la farmisto, ŝi enpense kaj image vidas la knabeton en sia dometo, kaj ŝi daŭrigas sian laboron, feliĉa, ke la horo alproksimiĝas, kiam ŝi povos rapidi hejmen por suĉigi kaj varti lin.

Tria Ĉapitro.

Kiel matenmanĝas la geedzoj Klomp — Vesteto por baptono — Novaj vestoj — Rika eniras konstruaĵon, kie ŝi ĉeestas strangan por ŝi ceremonion — La viro, kiu tiras malsupren ŝnuregon — Moseo Landman kaj lia infaneco — La ĵorgeno — Moseo, ido de Orfeo.

Kelkaj tagoj pasas kviete. Klomp, kiel ĉiuj Brejanoj kaj Warfumanoj ekaŭdis pri la trovito de la surd-muta Rika. Kelkaj ne kredis, ke ŝi trovis la infanon kaj jam esploris inter si, kiu povus esti la patro de la knabeto. Kelkaj tamen, konantaj la mutulinon, kaj kiuj ŝin vidis ĉiutage, kredas al la vortoj de la pastro, per kies bonaj zorgoj la infano estis enskribata kiel trovito, sub la nomo Moseo. Li elektis tiun nomon, ĉar la knabeto, same kiel Moseo el la Biblio, estis trovita en kesteto, kaj ĉar la mutulino, kiam ŝi laŭ sia maniero klarigis, kiel ŝi trovis sian Moseon, de tempo al tempo fingre montris Moseon sur la enkadrigita bildo.

Estas nun dimanĉo kaj la oka horo en la mateno. La geedzoj Klomp sidas kune ĉe la tablo kaj matenmanĝas. Li intertempe legas gazeton kaj ŝi enverŝas kafon kaj pretigas kelkajn infanvestetojn. Klomp, manĝante grandajn pecojn da pano kun fromaĝo, strabe rigardas trans la gazeton, kiun li tenas preskaŭ horizontale antaŭ si, kaj ekvidas la vestetojn. Li konjektas, ke ili estas por la infano de Rika, sed preskaŭ ne kuraĝas informiĝi pri tio. Li bolas pro retenata kolero, ĉar li malamas la mutulinon; kaj ĝenas lin, ke lia edzino tiel sin interesas pri la trovito. Sinjorino Klomp kviete

trinkas sian kafon, manĝas sian buterpanon kaj de tempo al tempo daŭrigas aranĝi la vestetojn. Fine la farmisto jam ne povas regi sin kaj pro kolero enbuŝigas grandan pecon da pano. Ĝi preskaŭ sufokas lin; li tusas per ĉiuj fortoj kaj kiam fine li sukcesis engluti la pecegon, li estas ruĝa kiel ĉerizo. Li fintrinkas la tason da kafe kaj montrante per la gazeto la vestetojn, kiujn lia edzino kunfaldas, li demandas:

— Kio estas tio?

— Vestetoj.

— Tion mi vidas . . . , sed por kiu?

— Por Moseo.

— Por la trovito? . . . Hm! . . . Ĉu la mutulino mem ne povas prizorgi tiujn vestojn?

— Ŝi povas, sed mi volas surprizi ŝin.

— Surprizi!?

— Jes, la infano havas sufiĉajn vestojn, sed ili ne taŭgas por la ceremonio.

— Ceremonio!?

— Moseo kompreneble devas esti baptata kaj por tiu ceremonio li bezonas specialajn vestetojn.

— Nu! . . . ĉu vi devas pretigi ilin?

— Mi ne devas, sed plaĉas al mi pretigi ilin, ĉar Rika ne komprenas, nek pri baptado, nek pri vestoj bezonataj por tiu baptado.

— Ĉi tiu infano devas esti baptata!?

— Memkompreneble! . . . Ni loĝas en kristana vilaĝeto, kie ĉiuj infanoj estas dece baptataj. Kial do oni farus escepton kun Moseo?

— Jen io bela! . . . Ĉu la parencoj de la mutulino ne povas zorgi pri ĝi?

— Sendube ili povos, sed mi ja povas ankaŭ, kaj la pastro petis al mi aranĝi ĉion.

— Hm! . . . bela afero!

— Vi do ne kontraŭstaros?

Klomp, ne respondante al tiu demando, diras plue:

— Kiu certigas, ke la gepatroj de la infano estas kristanoj?... Oni diris en la vilaĝo, ke li estas simila al juda infano.

— Eble li estas judo, sed tio ne malhelpas. Multaj judoj fariĝas kristanoj.

— Povas ankaŭ esti, ke li estas turko.

— Turko!?

— Jes, turko... Ĉiuj turkoj havas nigrajn harojn kaj nigrajn okulojn.

— Tio ankaŭ ne malhelpas. Ciu povas fariĝi kristano, eĉ turko.

— Kaj kiam li devas esti baptata?

— Hodiaŭ.

— Hodiaŭ!?

Klomp forĵetas la gazeton kaj kun surprizo li rigardas sian edzinon.

— Hodiaŭ!?! — li rediras — Kial vi ne jam parolis pri tio?

— Ĉar antaŭ kelkaj tagoj vi petis al mi, ke mi jam neniam parolu pri Rika.

Klomp ekpromenas tien kaj reen en la ĉambro. Li pensas pri tio, ke li ĉiam iras preĝejon dimanĉe, ne el religiaj motivoj, sed por pasigi parton de la por li enuigaj dimanĉoj. Se li ankaŭ nun iros, li sidos preskaŭ vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun Rika, ĉar lia preĝeja benko staras tuj antaŭ tiu, kie kutime sidas la gepatroj, kies infanoj devas esti baptataj. Li povus nun resti hejme, sed ne kuragiĝas timante, ke oni mokos lin poste en la vilaĝa trinkejo, ĉar sendube lia malesto estus rimarkata kaj priparolata. Ĉiu ekaŭdis pri la renversita laktobarelo, kaj oni dirus, ke li ne venis en la preĝejon pro la mutulino.

Sinjinorino Klomp divenas facile, ke ŝia edzo prefere ne irus nun al la preĝejo, nome por eviti Rika, sed ŝi tute ne aludas tion. Silentante ŝi prenas la vestetojn, ekstaras, vestas sin por eliri; tiam ŝi diras al Klomp:

— Vi ja ne devas ĉeesti la baptadon.

— Sed kion diras la farmistoj, se mi malestos? Ili diras: Klomp ne kuraĝis iri preĝejon pro la mutulino.

— Lasu ilin paroli.

— Mi dezirus, ke tiu malbeninda mutulino estu ĉe ĉiuj diabloj!

Sinjinorino Klomp kapskuas, sed ne respondas al tiu deziro, ĉar ŝi konas sian edzon kaj ne volas inciti lian koleron. Trankvile ŝi do prenas la paketon kun la vestetoj sub la brakon kaj eliras.

La farmisto restas en la ĉambro; li ŝtaras kun distarigitaj kruroj, kiuj ŝajnas pli multe esti kruroj de elefanto ol de viro; li sin klinas kaj postrigardas ŝin tra la fenestro.

Ŝi iras al Rika. Atinginte ŝian dometon, ŝi rigardas tra la vitraĵo de la fenestro kaj vidas, ke la mutulino suĉigas la knabeton. Rika tamen tuj rimarkas la mastrinon, ĉar ŝi rigardas post sin. Rideto ludas sur ŝia vizaĝo kaj fingre montrante la pordon ŝi petas la sinjinorinon al si.

La farmistedzino eniras kaj montras la paketon.

Rika levas la brovojn supren kaj la kavetoj en ŝiaj vangoj pliprofundiĝas, ĉar ŝi divenas tuj, ke la mastrino volas surprizi ŝin.

Minuton poste ambaŭ sidas unu flanke de la alia, kaj dum la infano suĉas kaj laŭvice rigardas la virinojn, sinjinorino Klomp malfermas la paketon, elprenas la vestetojn kaj pendigas ilin sur unu el siaj manoj, kiun ŝi levas alten por montri, kiel sidos la blanka kufeto, la blanka jupeto kaj cetere.

Rika admir-ekstarigas kaj dankas la mastrinon per laŭtaj krioj kaj manpremo. Ŝi fingre montras la biblian Moseon por diri, ke ŝia Moseo estos tiel bela kiel tiu alia, kaj sinjorino Klomp kapklinas ridetante kvazaŭ por diri: Vi estas prava . . . li estas tiel bela.

Moseo nun trinkis sufiĉe kaj li estas vestata per la novaj neĝblankaj vestetoj. La mastrino prenas lin sur la brakoj kaj ekstaras je kelkaj paŝoj por vidigi al la mutulino, kiel bele aspektas ŝia knabeto, kaj Rika kunfrapadas la manojn pro ĝojo kaj admiro. Ŝi volas reprene la infanon, sed sinjorino Klomp subite prezentas al ŝi alian paketon kaj geste diras:

— Malfermu! . . . ĝi estas via.

Rika komprenas, obeas kaj eltiras el ĝi blankan kufon, belan silkan mikskoloran antaŭtukon kaj paron da ŝuoj.

Ŝuojn Rika neniam portis kaj ŝi miras, refoje supren tirante la brovojn; tiam ŝi frapetadas per la fingro la ŝuojn kaj sin mem kaj demandis per tio:

— Ankaŭ miaj?

La mastrino kapklinas ridetante kaj geste diras:

— Almetu ilin!

Rika almetas ilin kaj feliĉe la novaj ŝuoj sidas bone, kiel knabineto, kiu por la unua fojo surhavas novajn botetojn, tiel la mutulino admiras la ŝuojn kaj faras kelkajn paŝojn sur la kahelplanko. Tiam ŝi surmetas la kufon kaj la antaŭtukon kaj rigardas sin en la spegulo.

Estas nun proksimume la naŭa kaj duono. La farmistedzino signodonas, ke la mutulino sekvu ŝin eksteren, sed ĉi tiu restas staranta, ne sciante, kial eliri. La mastrino jam estas kun la infano en la koridoro kaj denove signodonas.

Rika, kiu fidis en ĉio la mastrinon, sekvas kaj ambaŭ eliras en la direkton de Brej.

Strangaj pensoj eniras la kapon de la mutulino: Kial ŝi devas iri kun la mastrino?... Kien?... Kial la infano ĉeestas?...

Ili iras plue laŭ la sabla vojeto. La ŝuoj de Rika nun tute ne flanken jetas nubetojn el sablo, ĉar ili estas tre malpezaj, kaj estas al ŝi, kvazaŭ ŝi irus nud-piede. Ili atingas la makadaman vojon kaj Rika ekvidas, ke la paŝoj de la mastrino sin direktas al la mortintejo. Ili iras trans la mortintejon kaj en tiun turhavan konstruaĵon, kies internon la mutulino neniam vidis. Ŝi scias, ke la blankbarbulo multfoje eniris ĝin, sed kial, ŝi ne scias, ĉar pri religio ŝi komprenas absolute nenion. Tamen ĉar la blankbarbulo ĉiam estas afabla al ŝi, Rika plenkonfide sekvas la mastrinon tra la turpordo kaj trans la turplankon, faritan el grandaj bluaj kaheloj. Rika rigardas supren al la alta plafono, tra kiu pendas dikega ŝnuro ĝis la planko. La mastrino paŝas preter la ŝnurego, eniras la preĝejon kaj la mutulino sekvas. Ŝi vidas plankon el gigantaj grizaj ŝtonegoj kun surskribaĵoj. En du vicoj staras flave pentritaj tre longaj benkoj. Ili preteriras ilin kaj ekhaltas preskaŭ tuj antaŭ granda bruna skulptita objekto el ligno, kiu estas simila al barelo kaj super kiu sin etendas kvadrata tabulo en horizontala pozicio, tenita per dika fera stango eliranta el la muro tuj apud la plafono. Ĉe ĉiu flanko de tiu barelo (Rika ne scias, ke tio estas la predikseĝo) staras sur la planko alta benko, formanta kune kun la du muroj triangulon. Al unu el tiuj benkoj iras la mastrino kaj la mutulino sekvas. Ambaŭ eksidas kaj Rika paci-ence, sed scivole atendas, kion ŝi devos fari en tiu benkplena ĉambrego, kies muroj kaj plafono estas neĝo-blankaj. Antaŭ ŝi la turpordo staras nefermita, kaj la dika ŝnuro tieldire dividas ĝian kadron en du egalajn partojn. Subite viro, kiun ŝi konas kiel laboriston kaj

kiu nun estas dimanĉe vestita, venas el la mortintejo; li ekhaltas sur la tura planko kaj ekkaptas la ŝnuregon, tiras ĝin ambaŭmane malsupren, sed tuj ellasas ĝin, post kio ĝi propramove supreniras. Apenaŭ ĝi supreniris, la laboristo denove tiras ĝin malsupren, kaj tiun al Rika nekomprenoblan movadon li ripetas kelkajn fojojn. La mutulino kubute puŝetas la mastrinon kaj fingre montras la tirantan viron. Sinjorino Klomp, komprenante, ke la mutulino deziras ekscii, kion faras tiu viro, ridetas, sed, ĉar ŝi ne povas klarigi tion, ŝi metas la manon sur la buŝon por diri, ke en ĉi tiu konstruaĵo oni ne parolu. Rika komprenas, ke ŝi devas silenti kaj kviete ŝi sidas, jen rigardante Moseon, jen rigardante ĉirkaŭe. Rekte antaŭ ŝi, supre de la preĝejo enirejo pendas la orgeno, kies ladaĵ tuboj brilas kiel arĝento en la sunbrilo, kaj ŝi miras, kio do estas tiu stranga tubhava objekto, antaŭ kiu ĵus eksidis la sinjoro loĝanta en la domo proksime de la preĝejo. Rika ne scias, ke tiu viro estas orgenisto, ŝi tamen scias, ke li instruas al infanoj de la vilaĝeto, kaj ke li poste ankaŭ instruos Moseon.

Sub la orgeno kaj tra la nefermita pordo eniras en intertempoj viroj, virinoj kaj geknaboj. La viroj sidiĝas sur la dekstraj benkoj, kaj la virinoj kaj geknaboj sur la maldekstraj. Antaŭ ĉiu benko altiĝas la dorso de alia benko; sur tiu dorso sin trovas deklivaj tabuletoj, kiuj utilas por meti la psalmolibrojn.

Preskaŭ ĉiuj sidlokoj nun estas okupitaj, ĉar pro la baptado de la trovito eĉ ne unu el la ordinaraĵ vizitantoj volas malesti.

La du benkoj flanke de la predikseĝo estas turnitaj al ĉiuj aliaj, tiel ke Rika oportune povas vidi ĉiujn homojn eniri kaj eksidi. Fine eniras Klomp. Liaj pezaj ŝuoj sonas sur la tombŝtonoj en la preĝejo kaj ri-

gardante nek dekstren, nek maldekstren, li eksidas en la benko antaŭ Rika kaj sia edzino. Klomp ŝajnigas ne vidi ilin. Laste eniras la pastro. Enirante li demetas la altan ĉapelon kaj gravmiene iras al la predika seĝo, ekhaltas tie, metas la ĉapelon antaŭ la vizaĝon kaj preĝas enpense. Tiam li supreniras la malaltan ŝtuparon, kondukantan en la „barelon“ kaj ekstaras tie.

Rika miregas. — Kion la blankbarbulo faros tie? — ŝi pensas.

La pastro benas la aŭskultantaron, preĝas laŭvoĉe, kaj poste ĉiuj kantas psalmon.

Rika vidas, ke ĉiuj malfermis libreton kaj movadas la lipojn. Ŝi rimarkas, ke ĉiuj sammaniere movadas ilin kaj ŝi konjektas el tio, ke ĉiuj legas la samajn vortojn, sed tre malrapide. Ŝi ne konscias, ke oni kantas kaj ke la orgeno ludas.

Post kiam ĉiuj ĉesis movadi la lipojn, la pastro sola faras tion; li predikas. La unua parto de la prediko daŭras duonan horon.

La predikisto havas strangan manieron de prediko; li laŭvice rigardas tra la du fenestroj flanke de la predikseĝo, kaj sur la skribitan predikaĵon antaŭ si, ĉar li ĉiam legas ĝin.

Klomp tute ne aŭskultas; li malbenas enpense la mutulinon, ŝian infanon kaj deziras, ke ili ambaŭ estu ĉe ĉiuj diabloj. Li ekmemoras la renversitan laktobarelon kaj la ridadon de la servistinoj, kaj li ekhontas kaj ekbolas pro interna kolero, sed en la preĝejo li ne povas eksplodigi tiun koleron. La antaŭ li sidanta servistinaĉo ĝenas lin kaj por eviti ŝiajn rigardojn, li ŝajnigas legi en la psalmolibro. Anstataŭ legi tamen, li kalkulas sian gajnon de la aveno, de la hordeo, de venditaj bovinoj kaj ĉevaloj kaj tiel plu. Lian kalkulon fine interrompas la pastro, kiu malsupreniras la ŝtup-

areton de la predikseĝo kaj ekstaras antaŭ la aŭskultantaro ĉe la baptopelvo. Samtempe sinjorino Klomp ekstaras, kaj sur la brakoj ŝi portas la infanon al la predikisto. Li surŝprucigas iom da akvo sur la vizaĝon de la infano kaj solene diras: — Moseo, mi vin baptas en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito; amen!

La mutulino sidas kun etendita kolo kaj rigardas; ŝi tamen ne komprenas tion, kio okazas, sedkonscias, ke la tuta soleno fariĝas en honoro de la infano, kaj ŝi estas kortuŝata kaj ellasas du grandajn larmojn. Ŝi nun scias, kial la mastrino tiel bele vestis ŝin kaj ŝian knabeton, kaj kiam la mastrino returnas sin kun la baptita Moseo kaj eksidas refoje ĉe sia flanko, la mutulino kaptas ŝian manon kaj premas ĝin.

Ambaŭ estas feliĉaj, pli feliĉaj ol Klomp, kiu en re-alo hontas, ĉar lia edzino tiel publike sin okupas kun tia ordinara servistino kaj kun tia bubaĉo, kiu eble estas nur judo aŭ turko, kaj li ĝojas, kiam la dua parto de la prediko estas finita kaj ke li povos reiri hejmen por fordormi kelkajn pluajn horojn de la enuiga dimanĉo.

Ne nur Rika miras dum la ceremonio, sed ĉiuj aliaj vizitantoj miris: Rika pro la honoro, farita al la knabeto kaj la aliaj pro tio, ke Klomp dum la predikado ne dormis kiel laŭkutime.

Moseo, kies familia nomo estas Landman, ĉar la mutulino sin nomas tiel, Moseo estas sana knabeto. Li kreskadas tiel ĉi kiel brasiko, manĝadas kiel lupoj, kaj jam ne suĉas lakton. Lia stomako estas tia, ke li povas manĝkonsumi ĉion, kaj ĉion li manĝas kun admirinda apetito. Neniam li malsanas, neniam li ploras, ĉar li estas ĉiam kontenta.

Li estas nun kvinjara kaj regule akompanas la mutulinon

al la farmejo, kie li sin amuzas en la ĝardeno kun la kokinoj, aŭ sur la herbejon, kie li ludas kun la ŝafidoj.

Ĉiuj loĝantoj de Brej kaj Warfum konas Moseon, kaj ĉiuj trovas lin belega knabo, ĉar belega li estas. Neniu oni vidis pli belajn krispajn harojn ol tiujn de Moseo; neniu knabo iam havis pli belajn, pli nigrajn kaj pli honestajn okulojn, pli rektan nazon kaj pli belan buŝon ol Moseo.

Kiam la mutulino iras al Pentman, ĉiam Moseo akompanas ŝin kaj ĉiam la spicisto prezentas al li kuketon aŭ figon, kiun la knabo memkompreneble tuj formangas kun apetito.

Rika scias, ke li povas aŭdi kaj paroli kaj ke li havas en la oreloj tiun mirindan senton, kiu al ŝi mankas, kaj ŝi estas feliĉa pro tio.

Kun miro ŝi rigardas lin, kiam li same kiel la spicisto movadas la lipojn, se li volas komprenigi ion al li.

Moseo povas kuri kiel leporo, ĉar de sia juna aĝo li lernis movadi la piedojn en vigla maniero. Rika ĉiam iras rapide, sekve por ne postresti, li estas devigata rapidigi ilin, ĉar ili estas pli mallongaj ol tiuj de la „patrino“.

Kiam Rika iras kun Moseo, kiun ŝi preskaŭ ĉiam tenas ĉe la mano, ĉiuj preterpasantoj postrigardas ilin, kaj ĉiuj (nur ne Klomp), sentas admiron kaj respekton por la servistino, kiu kiel vera patrino sin dediĉas al fremda infano, kiun ŝi amas kiel propran filon.

Instinkte ŝi scias, ke la homoj ŝin estimas pro la trovito, kaj ŝi fieriĝas pro tio.

Moseo konas ĉiujn flankvojetojn de Brej kaj povas salti trans multajn longfosojn. Kelkfoje li saltas en unu el ili kaj rehejmiĝas malseka kiel akvorato, sed Rika ne koleras pro tio. En tiuj okazoj ŝi surmetas al li sekajn vestojn, la malsekajn ŝi purigas, sed neniam ŝi punas la

knabon, ŝi eĉ ne sulkigas la frunton, kiam Moseo venas hejmen post tia malsukcesinta salto, ĉar li estas ŝia karulo, kaj ĉio, kion li faras, estas bone farita. Li tamen ne estas trodorlotita knabo, sed ĉiam la samhumora, kontenta, feliĉa bubeto, amata de ĉiuj, nur ne de Klomp. Ĉi tiu ununura malamiko tamen ne kuraĝas montri sian malamon, sekve li evitas lin same kiel li evitas la mutulinon.

Estas io, kio tre surprizas Rika. Kelkfoje la knabo iras al Brej kaj eksidas sur la planko de la nefermita turo kaj kun dispartigitaj lipoj fikse rigardas antaŭ sin al la malbela ruĝa muro, kvazaŭ li aŭskultus ion misteran, sin trovantan post ĝi en la preĝejo.

Multfoje, precipe en sabato je la dekdua horo, kiam ŝi ne trovas la knabon en la dometo, ŝi iras al la turo kaj tiam li sidas tie sur la malvarmaj kaheloj kaj aŭskultadas.

La orgenisto, kiu ordinare sabate ekzercas la psalmojn, ludotajn en la posta tago dum la diservo, ankaŭ multfoje, forlasante la preĝejon, rimarkas tie la sidantan knabon kaj ĉiam li diras al si:

— Li amas muzikon.

Moseo estas jam tro granda knabo por dormi en la kesteto, sekve Rika aĉetis forporteblan liteton, kiu staras flanke de la ŝia, kaj la kesteton kun la misterplena skribaĵo, kiun neniu povoscias deĉifri, staras nun en la subtegmentejo.

Kaj Moseo kreskas . . . kreskadas.

Monatoj pasas, Moseo fariĝis sesjara kaj devas vizitadi la lernejon de Brej. Rika scias nun, ke la viro, kiu sidis antaŭ la orgeno, kiam la knabo estis baptata, instruadas infanojn, kaj ŝi volas, ke Moseo lernas skribi kaj legi, ĉar ĉiuj homoj povoscias tion, nur ne ŝi mem.

Moseo konas la vojon al la lernejo kaj fidele vizi-

tadas ĝin. Li amas lerni, kio tre surprizas la instruiston, kiu ĉiam opiniadis, ke tia sovaĝa knabo, kiu nur saltetis trans longfosojn, nur grimpadis sur arbojn, ne amas sidadi kviete sur lerneja benko por aŭskultadi la instruiston kaj por skribadi kaj legadi.

La instruisto sin trompis tamen, ĉar la knabo diligente lernadas kaj ĉiam aŭskultas atente, kiam li rakontas pri kio ajn.

Post unu jaro la knabo povoscias ion legi kaj skribi kaj donace ekhavis ardezon kun bela grifelo kiel rekompencon de diligenteco, kaj Rika fieriĝas ankoraŭ pli multe pro sia adoptita filo.

Dimanĉe, kiam la orgenisto ne ludas, Moseo sidas ĉe la tablo kaj Rika rigardas kun profundaj kavetoj en la vangoj, kiel li manuzas la grifelon kaj kiel lerte li legas en bildolibreto. Ŝi deziras, ke li posedu multajn tiajn librojn kaj ĉiusemajne ŝi aĉetas unu po dek cendoj ĉe la libristo de Warfum, kaj Moseo kun ĝojo rigardas la belajn bildojn kaj legas la sub ili starantajn presitajn vortojn.

La instruisto jam sciigis pli ol unu fojon al la pastro, ke Moseo estas la plej bona lernanto el lia klaso kaj la pastro, ride plilarĝigante la blankan barbon, ĉiufoje respondis al tio:

— Mi neniam dubis, ke li fariĝos bona lernanto; nur rigardu al li en la okulojn, kaj vi ne povas ne remarki tion.

— Sed —, tiel ĉiam diras plue la instruisto, — li plej amas la orgenon.

De post la tempo, kiam la orgenisto eksciis, ke Moseo amas la muzikon, la knabo regule akompanas lin sur la orgenejon, ne nur sabate, sed ankaŭ dimanĉe dum la diservo.

Moseo ĉiam sidadas senmove, kiam la sonoj de l'

orgeno movas lian animon kaj ĉiam kun miro li rigardas la libron, en kiu la ludanto kvazaŭ legas, kion li ludas. Moseo fine konscias, ke oni legas la muzikon same kiel rakonteton, kaj la deziro lin kaptas ankaŭ lerni tiun arton. Li petas, ke la orgenisto instruu al li pri tiuj nigraj punktoj en la kvin vicoj da rektaj linioj, kaj lia deziro estas plenumata.

Refoje jaro pasas kaj Moseo, kiu faris jam grandajn progresojn en legado kaj skribado, ankaŭ lernis la nomojn de la notoj kaj tiel komencis studadi la unuajn elementojn de la muziko.

Kvara Ĉapitro

Kermeso en la vilaĝo — La karuselo kaj kio plej multe
interesas Moseon — La Valpurgisnokto — Du flutoj —
Kion oni vidas en la cirko — Moseo estas rajdisto kaj li
mem scias nenion pri tio.

Estas en la jaro 1904a kaj en la monato Junio, kaj
en tiu monato la vilaĝo Warfum ĉiujare havas sian
kermeson.

En la tiel nomita Turstrato, tio estas tiu strato, ĉe
kies okcidenta flanko staras la preĝejo kun la alta turo,
sin etendas du vicoj da kermestendetoj, kie la kermesaj
vizitantoj povas aĉeti ludilojn por infanoj, kukojn, ĉoko-
ladon, fritpastajojn kaj cetere.

Inter tiuj tendetoj staras aliaj, kie oni vete jetas
ringojn ĉirkaŭ tranĉiloj, starantaj iom poste kaj en longaj
vicoj sur dekliva tabulo. En aliaj la vizitantoj trovas
okazon farigi siajn portretojn, esplori sian estonton, vidi
dikegan, tricent-kilograman sinjorinon, aŭ ĉevalon kun
 kvin piedoj kaj aliajn mirindaĵojn.

Proksime de tiu tendetaro, en flankstrato antaŭ la
publika lernejo sin turnadas karuselo. Ĝi estas plena
je knaboj kaj knabinoj. Unuj sidas sur ligna ĉevalo,
aliaj sur ligna virineto de maro kun bela kurba vosto,
aŭ sur ligna oŝcedanta leono kun longaj kolharoj.

Tuj apud la karuselo staras longa fosto, sur kiu
estas najlita fera kesteto, en kies mezo troviĝas ronda
elstaranta butono. La infanoj, kiujn rapidege turnas la
karuselo, tenas en la mano maldikan lanceton el fero,

kaj ĉiu laŭ sia vico klopodas tuŝi kaj puŝi la butonon en la kesteton. La butono korespondas kun aŭtomato kaj se la butono estas sufiĉe forte tuŝata, tiu aŭtomato efikas kaj supren saltas el la kesteto ligna grimacanta kapo de viro. La feliĉa knabo, kiu laŭ tiu maniero supren saltigis la kapon, ne bezonas pagi por la sek-vanta turnado.

Dum granda orgeno, staranta ĉe la dika akso de la karuselo, ludas, la geknaboj kun kapturniĝanta rapideco preterflugas la kesteton kaj la tintado de iliaj lancoj sur la kesteto sin miksas kun la sonoj de l'orgeno kaj la laŭtaj krioj kaj ridoj de l'infanoj.

Moseo tamen ne partoprenas tiun turnirludadon. La lanco, kiun li de la komenco de l'turnado havis en la mano, restas tie sen movo. Li ne celas la butonon por aŭtomate aperigi la grimacantan virkapon; li nur rigardas antaŭ sin kaj al sia patrino, kiam lia leono en fluganta rapideco preterpasas ŝin. Li aŭskultas la orgenon, kiu ne ludas psalmojn, sed valsojn kaj muzikajojn el operoj. Ĝi ĵus ekludis la Valpurgisnokton el Faust, kaj la knabo estas ravita de la bela muziko, kiu tuŝas tutan lian animon. Intertempe li turniĝas kaj turniĝas; ĉiufoje, kiam la leono flugpasas la mutulinon, li ŝin rigardas, ĉiam aŭskultante la operomuzikaĵon. Li ne ekpensas pri tio forlasi sian lokon kaj por ĉiu turnado de la karuselo, daŭranta proksimume tri minutojn, li pagas unu cendon al la karuselisto. Ĉi tiu trovas, ke li estas bela knabo; li frapetas al li sur la ŝultron aŭ sur la vangon aŭ sur la belajn buklojn ĉiufoje, kiam li ricevas la cendon kaj Moseo ridetas, turniĝadas kaj aŭskultadas. Jam pli ol dudekfoje li pagis unu cendon kaj dume li aŭdis la Valpurgisnokton almenaŭ dek fojojn, tiel ke li konas parkere la tutan melodion, kiu tamen ne enuigas lin. Fine li sentas,

ke lin kaptos vertigo, kaj li ekstaras post la leono. La mutolino tuj alkuras kaj helpas al li eliri la karuselon, kaj ili iras duope al la Turstrato por rigardi kaj admiri la tendetojn. Antaŭ unu el tiuj ili ekhaltas.

Oni vendas tie ludilojn, kaj Rika okule serĉas, kion ŝi aĉetos por la knabo, ĉar ŝi vidis, ke ankaŭ aliaj virinoj faris tion por siaj knaboj kaj knabinoj. La tendisto montras pafiletojn, soldatajn ĉapeletojn kaj tiel plu, sed Moseo ne volas ilin havi. La tendisto serĉas plue kaj ekkaptas fajfilojn el lado, ekfajfas sur ili por aŭdigi la belan sonon, kaj Moseo elektas unu. Rika tamen aĉetas tri de diferenca longeco, kaj la knabo estas feliĉa kun la trezoro. Nun li ja povos fari muzikon mem. Rika pagas kaj ŝi promenas plue kun Moseo.

Estas nun la tria horo en la posttagmezo. Promenante preter ĉiuj tendetoj, ili fine atingas la finon de la strato. Irante maldekstren laŭ alia strato, ili vidas je kelka distanco sur placo antaŭ hotelo la cirkon de Blanuso kaj kompanio. Tiu cirko vizitas jam dum multaj jaroj ĉiujn kermesojn de la grandaj vilaĝoj en la provinco Groningen. La cirko estas negranda, posedas nur unu ĉevalon, sed pro kelkaj aliaj mirindaj bestoj kunlaborantaj, kaj pro kelkaj bonaj artistoj la direktoro Blanuso ĉie havas sufiĉan sukceson perlabori la ĉiutagan panon por ĉiuj kunludantaj homoj kaj bestoj.

La prezentado estas komenciĝonta kaj arlekeno en mikskolora kostumo laŭte anoncas al „la estimata publiko“, ke oni devas rapidi por aĉeti enirbiletojn, ĉar restas nur malmultaj neokupitaj sidlokoj en la cirko.

Multaj homoj kun infanoj eniras kaj Rika, legante la scivolecon sur la vizaĝo de Moseo, aĉetas du biletojn po kvardek cendoj, kaj ŝi eniras kun la knabo.

Estas la unua fojo, ke Rika vidas la intermon de cirko. Ĝis nun Moseo estis tro juna por ĉeesti prezen-

tadon, kaj ŝi mem neniam sentis deziron eniri. Ŝi nun eniras kun Moseo, kaj nur pro li. La arlekeno montras la lokojn, kie ili eksidu, kaj ili eksidas. Preskaŭ ĉiuj lokoj estas okupitaj. Rika kaj Moseo rigardas ĉirkaŭe, atendante pacience tion, kio okazos en ĉi tiu stranga, ronda, tolkovrita tendo, kies interno aspektas kiel giganta blanka pluvombrelo.

Sur la cirkloforma planko kuŝas dika tavolo da sablo bele rastita.

Ekstere la arlekeno ankoraŭ ĉiam instigas „la estimatan publikon“ tuj aĉeti la lastajn disponeblajn enirbiletojn, kaj dum la ankoraŭ neokupitaj sidlokoj iom post iom estas prenataj, la prezentado komenciĝas.

Flanke de Rika, en loko apartigita de ĉiuj aliaj sidlokoj, sidas tri muzikistoj, kiuj ludas per ĉiuj siaj fortoj. La muziko ne estas tre bela, sed ĉar la oreloj de vilaĝanoj ordinare ne estas trodorlotitaj, la „estimata publiko“ trovas ĝin sufiĉe bela; la plej multaj eĉ tute ne aŭskultadas la muzikon, faratan sur fluto, violono kaj malgranda tamburo.

Moseo aŭskultas atente la jus komenciĝintan valson, sed la mutulino, kiu ne komprenas, kion faras tiu violonisto, tiu flutisto kaj tiu tamburisto, jam ne atentis ilin. Ŝi rigardas ĉirkaŭe kaj fariĝas scivola. — Kio do okazos sub tiu ĉi grandega ombrelego, de kies pinta supropendas du ŝnuregoj kun dika horizontala bastono? Al kio servos aliaj ŝnuroj fiksitaj al la palisegoj ĉe la enirejo de la cirko? — Tiel ŝi pensas.

Flanke de Moseo, kiu nur rigardas la rapidajn fingrojn de la flutisto kaj de la violonisto, sidas lia amiko, la spicisto Pentman, kiu tre ĝojas, ke la trovito okaze sidas tuj apud li, ĉar li amas babiladi kun la knabo.

— Bela cirko, ĉu ne vere, Moseo? — li diras.

— Jes... kaj bela muziko.

Pentman, kiu jam multfoje aŭdis la muzikon de la militista stabo en la urbo, ridas pro la naiveco, de la knabo; li tamen diras:

— Ho jes, sufiĉe bela.

— Ĉu estas malfacile ludi sur tia instrumento? — kaj Moseo ŝingre montras la violonon.

— Sur violono?

— Jes.

— Mi ne scias, kial vi demandas tion?

— Ĉar mi dezirus lerni ludi sur ĝi.

La spicisto ridas, tiam li demandas plue:

— Ĉu vi neniam aŭdis violonon antaŭe?

— Nur la orgenon en Brej, kaj tiun en la karuselo... Tiu en la karuselo ludas belege, mi aŭskultis ĝin — kaj aperigante fluton el sub la frako, li demandas:

— Ĉu mi povus lerni ludi tion sur la fluto, kion ludis la orgeno de la karuselo?

— Eble, Moseo; vi povos klopodi.

— Mi klopodos —. Moseo refoje subfrakigas la fluton, tiam montrante la pendantan bastonon, li demandas al Pentman:

— Kio estas tio?

— Tio estas trapezo.

— Al kio servas trapezo?

— La arlekeno laboros sur ĝi.

— Ĉu laboros? — Moseo ne komprenas kiel oni povas „labori“ sur tia bastono.

— Jes, vi tuj vidos, sed antaŭe okazos io alia.

— Kio?

La spicisto havas programon kaj li klarigas:

— Unue la direktoro rajdos sur sia ĉevalo, kiun li dancigos.

— Ĉu la ĉevalo povas danci!?

— Jes, kaj poste la arlekeno aperos kaj ludos intertempan amuzajon.

— Kio estas tio?

— Vi vidos, mi ne povas bone klarigi tion; kaj tiam eniros fraŭlino, kiu dancos sur tiu ŝnurego.

— Ĉu sur tiu ŝnuro? — Moseo ne kredas tion, kaj la spicisto klarigas plue:

— Jes, sed antaŭe oni streĉos la ŝnuron de tie al tie —, kaj li montras la lokojn.

— Kio okazos poste?

— Poste refoje okazos intertempa amuzajo kaj tiam sekvas tre bela numero, en kiu partoprenos kvar bestoj, kiuj rajdos unu sur la aliaj...

La spicisto volas daŭrigi la klarigadon kaj legi la tutan programon, sed lin interrompas la apero de la direktoro. Sur la ununura ĉevalo de la cirko li enrajdas, ekhaltas en la mezo de l'areno kaj la ĉevalo faras riverencon antaŭ „la estimata publiko“; post la riverenco la besto ekdancas gracie, dum la muziko ludas: „Sur la ondoj“ de Straus.

Ĉiuj rigardantoj kun atento sekvas la belan beston per la okuloj, kaj ĉiuj estas ravitaj pro la graciaj paŝoj de la ĉevalo. Fine ĝi ĉirkaŭgalopas kelkajn fojojn kaj tiam malaperas, laŭte aplaŭdate de la rigardantoj.

La intertempa amuzajo, kiu nun sekvas, konsistas el kelkaj aersaltoj de la arlekeno kaj interparolado inter li kaj alia ludanto, kiun oni konas sub la nomo: „malsprita Aŭgusto“.

Ili havas kompreneble grandan sukceson kaj apenaŭ ili foriris, kiam oni streĉas la ŝnuregon.

Moseo estas scivola, kiel oni povos danci sur ĝi kaj li etendas la kolon por pli bone vidi. La dancistino tuj poste aperas kun graciaj saltetoj kaj riverencetoj. La malsprita Aŭgusto volas helpi al ŝi suprensalti sur

la ŝnuron, sed li agas tiel mallerte, ke la fraŭlino ĉiujfoje devas resalti sur la sablon de la areno. Ĉiuj rigardantoj ridegas. Fine la arlekeno forpelas la mallertulon per longa bastono kaj per unu salto la fraŭlino staras sur la ŝnurego, kie ŝi ekdancas kun longa balancostango. Rapide ŝi kuras antaŭen, malantaŭen, sin rulas ĉirkaŭ si mem, reekstaras, refoje kuras kaj dorse returnen kuras, kaj fine forjetante la balancostangon, ŝi saltetas antaŭen kaj returnen kun du flagetoj, kiujn ŝi svingadas super sia kapo.

Subite la arlekeno kaj la malsprita Aŭgusto revenas laŭte interdisputante pri la dancistino. La disputado estas tre amuziga kaj ĉiuj laŭtege ridas pro la demandoj kaj la respondoj, kiuj sin sekvas rapide. Intertempe la dancistino malaperas, kaj rapide engalopas la ĉevalo. La besto ĉirkaŭgalopas du fojojn kaj tiam eniras kaprino, kiu ekhaltas en la mezo de la areno. Vidante la kaprion, la ĉevalo ekhaltas kaj atendas pacience, ĝis kiam ŝtuparo estas lokata de la sabla planko ĝis la vosto de la ĉevalo. La kaprino supreniras la ŝtuparon kaj ekstaras sur la ĉevaldorso. Post la kaprino enkuras hundo, kiu saltas sur la kaprion kaj fine ensaltas sur la malantaŭaj piedoj simieto. Dum laŭtaj ridegoj de la publiko la simieto rampas sur la ĉevalon, de ĝi sur la kaprion kaj poste sur la hundon. Gravmiene la direktoro, staranta en la mezo de la areno, faras sian riverencon, klaketas per la vipo kaj la ĉevalo ekpaŝas kaj fine galopas ĉirkaŭen kun la tri rajdantoj sur la dorso.

Kvankam ĉi tiu numero de la programo havas en realo nenion rimarkindan por persono, kiu vidis prezentadojn en granda cirko, tiuj kvar bestoj-artistoj tamen kaŭzas la plej grandan admiron de vilaĝanoj, kiuj nur unu foje ĉiujare ĉeestas ion tian dum la kermeso. Estas do memkompreneble, ke la bestoj post tiu numero de

la programo estas revokataj por akcepti siajn laŭrojn de la publiko.

Ankaŭ Rika partoprenas al la aplaŭdado. Ŝi kun intereso sekvas ĉiujn numerojn de la programo, ne nur pro la plezuro, kiun ili kaŭzas al ŝi mem, sed precipe pro Moseo, kiu kun ruĝaj vangoj sidas sur sia loko, jen rigardante la artistojn, jen aŭskultante la belan muzikon ĉe sia flanko.

Venas nun la vico de la gimnastikisto por „labori“ sur la trapezo. Lin sekvas denove intertempa amuzajo de du arlekenoj kaj de la malsprita Aŭgusto.

Dum la lastaj numeroj la mutulino ekrimarkis, ke la malsprita Aŭgusto multfoje rigardas ŝin kaj Moseon, sed precipe la lastan. Ŝajnas al ŝi, ke tiu stranga viro intencas ion kun la knabo kaj ŝi jam ne perdas lin el la okuloj. Ŝi rimarkas, ke li parolas al la direktoro pri Moseo, kaj ke la direktoro siavice atente rigardas kaj okule ekzamenas ŝian knabon.

— Kion do ili intencas kun li? —, ŝi pensas.

— Eble ili trovas lin rimarkinda knabo —, ŝi pensas post kelka tempo. Momenton poste la malsprita Aŭgusto, ĉiam dirante ŝercaĵojn, kiuj laŭte ridigas la rigardantojn, eksidas post la spicisto, kaj dum la du arlekenoj duope kaptas la atenton de la rigardantoj, li mallaŭte diras al la spicisto:

— Diru foje, sinjoro, tiu knabo do ne estas via filo?

— Mia filo?... Ho ne!

— Kies filo li estas?

— De la surdmuta virino, sidanta ĉe lia flanko.

— Ĉu li vere estas ŝia filo?

— Kial vi deziras scii tion?

— Tial, ke li tute ne similas ŝin, nek iun alian en la tuta vilaĝo. Ŝajnas al mi, ke li ne naskiĝis tie ĉi,

kaj ke li estas eksterordinara knabo; kaj ni bezonas eksterordinaran knabon por helpi al ni.

— Ĉu por helpi al vi?

— Jes, knabon, kiu kunludas en la antaŭlasta numero. Ĉu ŝi kaj li konsentos en tio?

— Mi ne scias; demandu do al Moseo mem, li eble volonte konsentos.

— Dankon!

Aŭgusto flustras kelkajn vortojn en la orelon de la knabo, kiu komence estas surprizita, sed poste ekridetas kaj kapjesas. La malsprita Aŭgusto iras for kaj lin sekvas per la okuloj la mutulino, kiu ne povas diveni, kion intencas tiu arlekeno, sed ĉar la knabo ŝajnas kontenta kaj ridetas ankoraŭ, ŝia malkonfido tuj malaperas; krom tio ŝi scias, ke ĉiuj homoj amas la knabon, ŝi do havos nenion por timi, kaj refoje ŝi kun scivolo atendas tion, kio estas okazonta sur la areno.

— Kion li flustris al vi, Moseo? — demandas la spicisto.

— Ĉu mi volas rajdi fojon sur la ĉevalo por amuzi la homojn.

— Ĉu vi povas rajdi?

— Mi multfoje rajdas sur la blankulo de Klomp.

— Ĉu vi ne timas defali de la ĉevalo?

— Ho, ne! ... — Li volas paroli plue, sed io nova estas komenciĝonta kaj li eksilentas, rigardante la lokon, kie eniras la artistoj kaj la bestoj. La direktoro jus eniris. Li salutas per la vipo la rigardantojn kaj diras, ke li havas la honoron anonci specialan numeron titolitan: „La misterplena rajdado“, per kiu „la estimata publiko“ spertos la mirindan fortecon de la hipnoto. — La hipnoto — tiel la direktoro diras plue, — havas la mirindan fortecon, ke ĝi povas fari por momento artiston el ĉiu ajn persono ĉeestanta la prezentadon, kondiĉe, ke la

elektita persono plenvole konsentas submeti sin sen kontraŭstaro al la povo de la hipnoto. Tian personon ni trovis hodiaŭ en la bela knabo, sidanta sur la tria benko tie antaŭ mi, kaj mi petas lin, ke li malsupreniru en la arenon.

Moseo tamen restas sidanta, ne ĉar li timas, sed ĉar ĉiuj fikse rigardas lin. Fine la spicisto diras al li:

— Nu, Moseo, iru do, ne timu, estas ja nur ŝerco.

Moseo ekstaras kaj antaŭ ol la mutulino konjektas, kio okazos, la knabo forlasis sian benkon kaj jam staras sur la areno.

Vidante ke Rika malkvietiĝas iom, la spicisto ridetante komprenigas al ŝi, ke ŝi ne timu, kaj ŝi reŝtas kvieta sur sia sidloko.

La direktoro sidigas la knabon sur seĝon kaj donas signon al arlekeno; ĉi tiu foriras, sed revenas tuj kun juna fraŭlino, kiu ekstaras antaŭ Moseo. Ŝi demandas al li:

— Ĉu vi povas rajdi?

— Jes, mi povas.

— Ĉu vi povas rajdi staranta sur ĉevalo?

— Tion mi neniam faris.

— Sed ĉu vi volas?

Moseo ne scias kion respondi kaj silentas. Kelkaj personoj vokas:

— Diru „jes!“

— Jes! — diras Moseo.

— Bone —, diras la direktoro, — vi rajdos... Nun fikse rigardu la fraŭlinon en la okulojn.

Moseo rigardas la fraŭlinon, kiu kvazaŭ jetas al li plenmanojn da neekzistantaj objektoj. Ĉiufoje la knabo palpebrumas, ĉar ĉiufoje ŝajnas al li, ke ŝi kaptas en la aero ĉiuspecajn objektojn por ĵeti al li en la okulojn;

li tamen ne timas, kvankam la fraŭlino fikse rigardas lin kun sulkigitaj brovoj. Fine ŝi diras ordone:

— Dormu!

Post tiu vorto Moseo estas tre surprizita, li jam ne ridetas, sed iom timetas. La fraŭlino nun malrapide paŝas dorse malantaŭen kaj signodonas al Moseo, ke li sekvu ŝin. La tuta publiko tre miras, ĉar la knabo ekstaras kaj sekvas la fraŭlinon, kiu sen interrompo rigardas lin fikse en la okulojn. Post tridek-kelkaj paŝoj ambaŭ malaperas kaj la areno estas malplena. Flustrado trankuras la cirkon, kelkaj rigardantoj pensas nur pri ŝercaĵo, aliaj tamen, kredantaj pri la forteco de la hipnoto, atendas ion seriozan. La muziko komencas mallaŭte ludi. Ĉiu kun scivoleco atendas tion, kio okazos. Oni scias, ke Moseo ne povas rajdi staranta sur la ĉevalo, spite tio la hipnotistino promesis, ke li vere faros tion dank' al la forteco de la hipnoto. Post kiam la muziko ludis kelkajn minutojn, engalopas la ĉevalo sen rajdisto. La direktoro sin lokas en la mezo de la areno kaj klakas per la vipo por plirapidigi la beston. Apenaŭ ĝi faris tri aŭ kvar ĉirkaŭiradojn, kiam Moseo reaperas sen la hipnotistino. Lin sekvas Aŭgusto la malspritulo, kiu sin klinas kun kapo turnita al la galopanta ĉevalo. En tiu sintenado li restas staranta, rigardante post sin al Moseo. Ĉi tiu ekkuregas, saltas sur la dorson de la malspritulo, kaj ĝuste en tiu momento, kiam pretergalopas la ĉevalo, li per unu lerta saltego saltas de la dorso de Aŭgusto sur la ĉevalon. Ĉiuj estas mutaj de surprizo kaj oni aŭdas nur la muzikon kaj la spiregadon de la galopanta ĉevalo, sur kies dorso ĉiam staras la knabo, kiu kun serioza mieno rigardas rekte antaŭ ŝin trans la orelojn de la kvarpiedulo.

La mutulino ekstaras, ĉar ŝi timas, ke la knabo falos, sed la direktoro vokas admone:

— Eksidu kaj silentu, alie la hipnoto ne efikas.

Pentman kvietigas la terurigitan mutulinon, kiu restas sur sia sidloko, daŭre sekvante la knabon per la okuloj.

La ĉevalo galopadas kaj galopadas, dum la direktoro klakadas per la vipo. Trankvile Moseo staras sur la ĉevalo, kvazaŭ liaj piedoj estus najlitaj sur la dorso de la besto. Jen li demetas sian kitelon kaj ĵetas ĝin sur la arenon, jen li demetas la pantalonon kaj la lignajn ŝuojn, kaj minuton poste la knabo ŝanĝiĝis en la plej belan rajdiston, kiun oni iam vidis en cirko. Vestita per flava orbrodita trikoto, sub kiu lia bela korpo plene sin montras, la knabo similas princon el fabelo. Liaj nigraj harbukloj flirtadas ĉirkaŭ lia kapo, kaj liaj okuloj brilas kiel neniam antaŭe. Ĉiam fiksante la rigardon antaŭ sin, li staras gracie kaj tiel oportune sur la besto, kvazaŭ li jam dum jaroj estus cirka rajdisto. Neniu povas kompreni, kiel estas eble, ke tia juna knabo, kiu neniam staris sur ĉevalo, sed nur de tempo al tempo rajdis sidante kaj sub la gardo de plenkreska servisto, tiel subite aperis kiel sperta rajdisto. Sendube io mistera sin devas kaŝi sub tio, sed neniu el la publiko povas klarigi ĝin; tamen neniu dubas pri la memeco de la knabo, ĉiuj lin konas tro bone por dubi pri tio. Ĉiam la ĉevalo rapidas ĉirkaŭe, dum la direktoro klakadas per la vipo. La mutulino rigardas la malgrandan rajdiston, kvazaŭ ŝi songus; ŝi klare vidas, ke li estas ŝia Moseo, ĉar nur li havas tiajn trajtojn, tiajn harojn kaj tiajn okulojn, tamen ŝi demandas al si kiel li akiris la lertecon por tiel rajdi...

Sed la vipo klakadas kaj la ĉevalo daŭrigas sian galopadon.

Jen aperas denove la hipnotistino. Ŝi havas du brulantajn torĉojn en la manoj kaj ĵetas ilin al la knabo, kiu ekkaptas ilin kaj ekbalancas kun ili, ĝis kiam ili preskaŭ estis forbruliĝintaj. Tiam ŝi prenas fajfilon kaj ankaŭ ĵetas ĝin supren al la manoj de la knabo; li ek-

kaptas ĝin kaj fajfas belan melodion kaj fine ŝi ekstaras sur seĝo, alte tenas ringegon kaj la knabo saltas tra ĝin. Post ĉiu salto liaj piedoj gracie retuŝas la dorson de la ĉevalo, ili nek hezitas, nek faras unu malbonan paŝon aŭ movon. La malspritulo fine jetas al la knabo ŝnuron kaj li salte ludas per ĝi. Post du aŭ tri minutoj, dum la galopado iom post iom malrapidiĝas, li forjetas la ŝnuron kaj la ĉevalo ekhaltas. Laŭtaj krioj de admiro resonas tra la cirko, Moseo desaltas de la ĉevalo, sid-iĝas refoje sur la seĝo kaj la fraŭlino, tuŝante lian frunton, diras: — Vekiĝu!

Tiam ambaŭ forlasas la arenon kaj fariĝas paŭzo, dum komenciĝas laŭtega interparolado de la rigardantoj, kiuj priparolas inter si la fortecon de la hipnoto. Kel-kaj dubas pri la artaj procedoj, en kiuj la knabo perdis sian propran volon kaj obeis aŭtomate al la fraŭlino, kiu hipnotigis lin; ili kredas, ke la rigardantoj sub influo de mistera imago kredis vidi la rajdantan knabon. Aliaj kontraŭe opinias, ke pupo, speco de aŭtomato staris sur la ĉevalo anstataŭ Moseo.

La leganto de tiu ĉi rakonto mem kredos, opiniante same kiel kelkaj rigardantoj de la cirko, ke mistero sin kaŝas sub ĉio, kio rilatas la strangan rajdadon, kaj li pavas: Vere io mistera sin kaŝas sub tio, sed ne estas ankoraŭ tempo forpreni la tukon, per kiu ni kaŝas tiun misteraĵon. Iom post iom en ĉi tiu libro alproksimiĝas la ĉapitro, en kiu la verkisto propravole fortiros tiun tukon kaj tiam ĉiu spertos, ke la okazo estas tre ordinara.

Kio ajn estas: Moseo estas la heroo de la tago kaj lia nomo flugas de buŝo al buŝo, kaj kiam li fine re-aperas sur la areno, li estas salutata per laŭtaj krioj kaj aplaŭdoj.

Kviete, kvazaŭ nenio eksterordinara estus okazinta, li

eksidas sur sia benko, kaj Rika ĝojas, ke li revenis sen rompitaĵoj, sed sana kiel antaŭe. Ŝi kaptas lian brakon kaj per larĝe malfermitaj okuloj, supren levita fingro kaj skuanta kapo komprenigas al li jam ne partopreni tiajn plendangerajn akrobataĵojn.

Moseo komprenas nenion pri la al li montritaj ap-
laŭdoj, kaj kiam la spicisto demandas al li, ĉu li estas
laca, la knabo kviete respondas:

— Kial?

— Pro la rajdado.

— Kia rajdado?

— Vi ja rajdis!

La fraŭlino promesis al mi, ke mi rajdu, sed mi tute
ne rajdis.

Pentman ne estas surprizita pro la respondoj de la
knabo; li ja scias, ke la dorminto neniam memoras, kion
li faris dum la hipnota dormo, sed almenaŭ Moseo de-
vus esti laca post tiom da saltoj kaj saltegoj; tamen li
havas eĉ ne unu malsekan haron sur la kapo.

— Kion vi faris ekster la areno? — plue demandas
la spicisto.

— Ŝi kondukis min en malluman ĉambreton, kaj tie
mi sidis longan tempon; krom tio mi faris tute nenion.

Pentman pensas pri la hipnota dormo kaj ridetas.
Aliaj personoj, sidantaj antaŭ kaj malantaŭ la knabo,
volas kontentigi sian scivolecon pri la mistera rajdado
kaj jam multaj demandoj direktiĝas al Moseo, sed li ne
povas respondi ilin, ĉar ĉiuj parolas samtempe; li sekve
altigas la ŝultrojn, ridetas, sed silentas, tiom pli, ĉar la
paŭzo finiĝas kaj la pantomimo komenciĝas. Oni nun
ludas „Arlekeno kaj Argentino“. La pantomimo estas
akompanata de dolĉa muziko, kiu tre plaĉas al Moseo,
kaj fine la vilaĝa turo sonigas la sesan horon, kaj la
prezentado estas finita.

Moseo kaj la mutulino iras hejmen, ĉar ili vidis sufiĉe.

Tiun vesperon la tuta vilaĝo parolas pri la rajdado de Moseo kaj ĉiuj provas trovi la solvon de la mistero, kiu okazis en la cirko; kaj la mutulino tiun nokton sonĝas, ke refoje la knabo faras la samajn arlekenajojn kaj ke li rompas al ŝi ambaŭ krurojn. Kun raŭkaj ekkrioj ŝi vekigās, sed kiam ŝi vidas flanke de sia lito la dormantan Moseon (kies belan kapon plene lumigas la enrigardanta luno, kaj kiu trankvile kuŝas kun la tri flutoj antaŭ si), la kavetoj en ŝiaj vangoj pliprofundigās, kaj feliĉa ŝi reendormigās.

Kaj Moseo mem? Li dormas, tute ne pensante plu pri la okazintaĵo en la cirko; sed li sonĝas, ke li povas ludi sur la fluto, sur la violono, kaj ke ĉiuj admiras lian ludadon.

Kvina Ĉapitro.

Pri neĝo kaj iu, kin vsĝadas en la neĝo — Rifuzita rifuĝejo —
La izolita dometo — Stranga sonĝo kaj ... hundoj kaj katoj —
Stranga dumaokta muziko — La ratkaptisto de Hameln — La
„Kol-Nidreĵ“ de Maks Bruch — Violonĉelisto kaj flutisto —
Pri multekosta muzikilo — Ripozo post laciga nokto.

Neĝo, neĝo, neĝo en la aero, kie mili-
onoj da rulŝvebantaj neĝeroj sin interpuŝadas Neĝo
sur la domoj, sur la senfoliaj arboj, sur la kamparo kaj
sur la frostiĝinta akvo en la longfosoj kaj kanaloj
Neĝo sur la vojoj Neĝo ĉie

Unu vasta dika tavolo griza kovras kvazaŭ unu sola
vata tuko la tutan ĉirkaŭaĵon. Nur la arboj elstaras el
ĝi, kaj ĉar la vento forpelis de ili iom de la falanta
neĝo, la malhelaj branĉoj sin etendas ĉiuloken kvazaŭ
por peti protekton kontraŭ la rigida malvarmo, kaj ili
malakre konturiĝas sur la griza ĉielo.

Estas la kvina horo en la mateno. Ĉie regas granda
nokta silento, nur kelkfoje interrompata de la muĝanta
vento, kiu ĉirkaŭpelas la neĝerojn, ĝis kiam ili atingas
siajn antaŭ ili falantajn kamaradojn malsupre sur la
griza tero.

Nur unu sola homo al si liberigas vojon tra la neĝo
sur la vojo al Brej. De kie li venis, neniu povus diri;
kien li iras, ankaŭ neniu povus diri, eĉ li mem ne ŝajnas
tion scii, ĉar de tempo al tempo, kiam la neĝeroj al li
ne malhelpas, li vidas ĉirkaŭe, kvazaŭ por esplori, ĉu
baldaŭ sin montras loko por rifuĝi. Kun peno liaj ri-

gidaj kruroj portas lin pli malproksimen. Jen li ekhaltas, blovante en la malvarmajn manojn, kiujn li tuj poste remetas en la profundajn poŝojn de la longa surtuto, jen li ekmarŝas plue. Pro la neĝeroj kaj la griza ĉirkaŭaĵo ne estas eble diri, kiel li aspektas; oni nur vidas, ke li konstante sin klinadas teren por ne perdi la egalpezon, ĉar sur la dorso li portas objekton, kiu ŝajnas esti peza kaj kiu similas grandan longforman sakon.

Spiregante li iras plue sian vojon tra la griza tavolo, kiu ĉe ĉiu minuto plidikiĝas, ĉar la neĝeroj daŭradas fali kaj frapadas al li en la vizagon. La viro, ne vidante taŭgan lokon por ekhalti, marŝas kaj marŝadas plue. Ĉe ĉiu paŝo la ŝuoj faras profundajn truojn en la neĝo kaj ju pli longe li marŝadas, des pli multe li sentas, ke liaj fortoj fine lin forlasos. Li tamen ne perdas la kuragon kaj iras plue. Li pasas la preĝejon, sed tute ne rimarkas ĝin pro la falanta neĝo, preskaŭ blindiganta lin. Li nur vidas antaŭ sin sur la vojo kaj sur la iom pli mallumajn longfosojn ĉe liaj flankoj. Ankoraŭ kvarono da horo, kaj li staras sur loko, kie li devas turni sin dekstren aŭ maldekstren, ĉar tie la vojo subite trafas alian vojon, kun kiu ĝi formas grandan ĉefliteron T.

La viro rigardas dekstren kaj ekpripensas. Kiun direkton li sekvos? Li ne scias, kaj ne sciante kial, li sin turnas maldekstren. Ĉi tiu nova vojo, same kiel la jus forlasita, estas ambaŭflanke limigita de longfoso kaj montras la saman aspekton. Nur tie kaj tie ĉi staras malalta arbeto, arbeto aŭ krado, tra kiu oni povas eniri la kamparon aŭ la herbejon transe de la longfosoj. Nenie sin montras domo. Ĉirkaŭe dum kvarono da horo li sekvas la jus elektitan vojon kaj jen li por la dua fojo iras maldekstren, ĉar la vojo faras rektan angulon kaj de tie plilongiĝas tiom, kiom la okuloj povas vidi. Feliĉe je kelka distanco tuj apud la vojo kaj en ĝardeneto

tute ĉirkaŭita de plektobarilo, staras dometo. La viro ekmarŝas iom pli rapide, kaj enirinte la ĝardeneton, kie staras nur du nudaj neĝkovritaj pirarboj kaj kelkaj rib-arbetoj, li ekhaltas antaŭ la dometo. Li klopodas enrigardi tra la du fenestroj, sed ĉio interne estas malluma. Li iras al la pordo, frapas kaj atendas. Neniu respondas la frapadon; li frapegas dufoje kaj denove atendas kaj aŭskultas. Fine li aŭdas brueton en la domo kaj malrapide la pordo malfermiĝas. Estas tre mallume post la pordo, la viro distingas tute nenion de persono, kiu retenas la pordon per unu piedo, kvazaŭ ĝi timus, ke ĝi perforte estos tute malfermata de nekonatulo, staranta eksterdome en la neĝo. En la interspaco de la pordkadro kaj la pordo aŭdiĝas la neĝgentila voĉo de la loĝanto:

— Kio estas?

La vaganto respondas germane:

— Vojaĝanto, kiu perdis la vojon.

— Kion vi volas?

— Ĉu vi bonvolas diri, kie mi estas?

— Apud Warfum.

— Warfum!?

— Jes, Warfum estas tute proksime. Iru laŭ la vojo ĉe via dekstramano. Ĉe via maldekstra estas la vojo al Brej.

La voĉo eksilentas kaj la pordo refermiĝas. La vojaĝanto, kiu estas petonta rifuĝejon, ekkonscias, ke plua frapado por remalfermigi la pordon estos vana. Li eliras la ĝardeneton kaj daŭrigas iri al Brej. Estas al li indiferente, iri al Warfum aŭ al Brej, ĉar li konas nek unu, nek la alian, li sekve sin donas al la hazardo kaj post duono da horo estas tre surprizita sin trovi ĉe loko, kie la vojo refoje sin dividas. Ŝajnas nun al li, ke li ĉirkaŭiris grandan kvadratan pecon da kamparo kaj post kelka tempo revenos sur la saman lokon, kie li sin tro-

vis antaŭ unu horo kaj duono. Li tamen ne estas certa pri tio kaj esplorigardas dekstren kaj maldekstren. Ĉe lia dekstra mano la vojo kondukas al granda farmejo, ĉirkaŭita de altaj arboj, kiuj etendas la nudajn senfoliajn branĉojn ĉielen. Tie sekve ne povas esti la vilaĝeto. Li rigardas maldekstren kaj ekrimarkas subite je sufiĉe longa distanco ion, kio ŝajnas esti preĝejo kun tureto. Tio do devas esti Brej. Estas la sama tureto, kiun li pasis antaŭ pli ol unu horo, sed kiun li tiam ne ekrimarkis pro la neĝeroj. Esperante trovi en Brej hoteleton por ripozi, li estas ekmarŝonta tien, kiam subite trafas liajn okulojn stranga estaĵo rapide alproksimiĝanta. Ĝi similas grandan moviĝantan sonorilon. Aŭtomate ĝi alvenas per rapidaj movetadoj. La vojaĝanto, ekkonante virinon envolvitan en larĝa mantelo, tiel ke la kapo kaj la brakoj estas tute kaŝitaj, ekĝojas. Eble ŝi povas diri al li, kie li povos trovi la deziratan hoteleton en Brej kaj irante al ŝi renkonten, li estas alparolonta ŝin, sed tre li miras, kiam la sonorilego, tute ne atendente lin, pasas kaj aŭtomate iras plue al la granda farmejo. Senbrue, sed rapide la stranga figuro, ĉe ĉiu paŝo ĵetante flanken nubeton da neĝo, daŭrigas sian vojon, eĉ ne rigardante malantaŭen kaj baldaŭ malaperas en la grizaj neĝeroj. La vojaĝanto ekintencas kuratingi la marŝantan sonorilegon por peti informojn, sed li estas multe tro laca kaj jam ne vidante la strangan figuron, li kun malĝojo iras plue sur la antaŭ li sin etdanta vojo al Brej. Li estas nun tiel laca kaj liaj piedoj estas tiel rigidaj, ke nur kun granda peno li sin trenas antaŭen. Je kelka distanco li subite ekvidas dometon antaŭ si ĉe la maldekstra flanko de la vojo. Du vicoj de malhelaj truoj en la neĝo, venantaj kurblinie de la pordo al la vojo kaj perdiĝantaj en la direkto al la farmejo, montras, ke antaŭ nelonge persono kun grandaj ŝuoj aŭ botoj

forlasis tiun dometon. La vojaĝanto ekpensas, ke ili nepre devenas de viro, ĉar virino, laŭ lia opinio, ankoraŭ neniam portis tiajn grandajn ŝuojn. Estas do verŝajne, ke virino estas interne kaj ŝi sendube ne rifuzos doni al li informojn aŭ la jam tiel longe deziritan ripozejon. Eble ŝi ne jetfermos antaŭ lia nazo la pordon, kiel faris tiu alia kamparano. Pensante pri tio, li direktas la paŝojn al la pordo.

Antaŭ ol atingi ĝin, li ekhaltas, ĉar misteraj sonoj de du flutoj streĉas lian atenton. Ŝajnas al li, ke la sonoj venas el tiu dometo, sed li ne estas certa pri tio. Li aŭskultas atente kaj aŭdas la melodion de bela muzikaĵo. La flutistoj ludas tiel bele kaj tiel korekte, ke la viro estas surprizita en plej alta grado. Ĉiam li opiniadis, ke kamparanoj neniam sin okupas pri muziko, kaj jen tute neatendite kaj eĉ en tia frua horo de la mateno li aŭdas dueton tiel belan, ke eĉ artistoj ne povus plibeligi ĝin. Kio plej multe surprizas lin, estas, ke la du flutistoj ĝuste laŭ la sama maniero aldonas fantaziaĵojn al la melodio, kvazaŭ unu persono ludus samtempe sur du flutoj. Li aŭskultas plue, ĝis kiam la muzikistoj ĉesas ludadi. Malrapide li nun sin direktas al la pordo. Estas kvazaŭ la mistera dumnokta muziko altirus lin, kaj li jam ne povas kontraŭstari frapi al la pordo. Antaŭ ol frapi, li enrigardas tra unu el la du fenestretoj. Li vidas ĉambreton kun malmultaj mebloj. Lampeto staras sur la tablo en la mezo de la ĉambro kaj ĝia lumo disĵetas nigrajn grandajn ombrojn sur la plankon, kiu estas tute farita el kaheloj. Homojn li ne vidas, kaj tion li trovas stranga, ĉar la dometo estas laŭ lia opinio tiel malgranda, ke ĝi enhavas nur ĉi tiun unu ĉambreton. Li iras al la pordo por frapi, sed antaŭe li turnas la feran ringon, per kiu ordinare la kamparanaj dompordoj estas malfermataj. Mallaŭta grincado anoncas al li, ke la riglilo

leviĝas, kaj puŝetante la pordon per la genuo, li estas kaptata de granda surprizo. Frapado estas tute superflua, la pordo subite ekmalfermiĝas. La viro deskuas de si la neĝon, kiu ĉie kovras lin, kaj prenante la longan sakon de la dorso, li mallaŭte enŝoviĝas internen kaj sen bruo refermas post si la pordon. Li staras en malluma koridoro, sed strio da lumo malsupre ĉe la muro, tri paŝoj antaŭ li, montras, kie sin trovas la pordo de la ununura ĉambro. Sciante ke neniu homo enestas, li ŝovpaŝas al la lumstrio, tuŝetas la pordon kaj trovinte ringon, turnas ĝin kaj malfermas singarde la pordon. Li enrigardas kaj samtempe varma aero venas renkonte al li. Estas do varme en tiu ĉambro kaj la varmo enlogas lin pli proksimen, tiel proksimen, ke fine li estas en la ĉambro. Starante kelkan momenton ne sciante kion fari, li senkonscie fermas la pordon kaj metinte la sakon sub la tablon, li eksidas sur seĝo kaj aŭskultas denove. La muziko tamen ne rekomenciĝas. Strange estas, ke li nenie aŭdas eĉ la plej mallaŭtan brueton. En la ĉambro eĉ ne horloĝo tiktakas, ŝajnas, kvazaŭ la morto regas en la domo. Kion li faros? Ĉu li vokos por veki personon, kiu eble dormas post tiuj duone malfermitaj pordoj transe de la tablo? Nenia signo de vivo tamen sin montras post tiuj pordoj, en kies malgranda interspaco pendas multkolora tuko, servanta kiel litkurteno. La viro eĉ ne aŭdas mallaŭtan spiradon de dormanto. La tie dorminto verŝajne jam sin levis por eliri. La vojaĝanto pensas pri la du vicoj da truoj en la neĝo, irantaj de la pordo al la vojeto kaj plue al la farmejo; eble (tiel li pensas) ili estas faritaj de iu, kiu estas dorminta post tiu litkurteno kaj eble la lito estas malplena. Metante la kubuton sur la tablon, li ripozigas la kapon sur la pugnita mano kaj ekrevas. En tiu momento kelkaj lignaĵoj sur la kameno ekkrakas kaj ekflamas; hele

ili lumigas la vizaĝon de la vojaĝanto. Li estas ĉirkaŭ kvindekjara, bela viro kun kurba nazo kaj longaj grizigantaj lipharoj. Profundaj sulkoj sur la alta frunto kaj ĉe la buŝanguloj donas melankolian esprimon al la nobla vizaĝo kaj montras klare, ke la viro ne estis sen zorgoj kaj ĉagreno en la lastaj tempoj. Li havas grizajn bukajn harojn, kiujn kovras granda artista ĉapelo, de kies rando, pendanta malsupren, fluetas sinsekve gutoj da neĝakvo sur la longan jakon, de kie ili, kune kun la fandiĝantaj neĝeroj, gutfalas klaketante sur la kahelojn de la planko. Tiu klaketado tamen ne malhelpas al li enprofundiĝi en pensojn. La nigraj okuloj, ombrigitaj de grizaj brovegoj, post momento fermiĝas kaj la metitado de la viro iom post iom ŝanĝiĝas en profundan dormon. Dormante li sonĝas:

Li sin trovas en granda hele lumigita salono plena je rigardantoj, antaŭ kiuj li devas ludi. Li ja estas artisto, kies famo disflugis tra la tuta mondo.

Li ludas. Majstre li manuzas la arĉon kaj la belaj tonoj de lia instrumento ravas ĉiujn aŭskultantojn ĝisplene. Post la ludado li ekhavas girlandon el belaj floroj kaj denove li devas ludi. Li estas ekkomencanta, sed io neatendita malebligas al li ludi plue. El iu loko, li ne scias kie, subite eksonas dolĉa muziko de du flutistoj. Ĉiuj ĉeestantoj kun miro rigardas ĉiuloken; la flutistoj tamen estas nevideblaj, sed ili daŭrigas la ludadon, jen duope, jen unuope. Rave ili ludas la Valpurgisnokton el Faŭst, tiel rave, ke la aŭskultantaro jam ne atentis pri la violonĉelisto, kaj la violonĉelisto mem mallevas la manon, lasas fali la arĉon kaj ankaŭ aŭskultas...

Intertempe io stranga okazas je la girlando, kiun li pendigis sur la dorso de sia seĝo. Estas, kvazaŭ ĝiaj koloroj aliĝis kaj kvazaŭ mistera forto enblovus vivon en ĝin. Ĝi aŭdigas mallautan krion, similtan al miaŭado

de kato kaj tuj poste ĝi desaltas de la seĝdorso sur la plankon, kie ĝi prenas la formon de vera kato, kaj dum la flutistoj ludas plue kaj neniu en la salono jam atentis lin, la violonĉeliston, la besto miaŭdas pli laŭte kaj eksaltas sur lian ŝultron...

Kun ekkrio li vekigās... La salono malaperis, sed ne la kato, ĉar efektive ĝi staras sur lia ŝultro kaj ŝovas sian tutan korpon laŭ lia vango por karesi lin.

La flutoj eksilentis, kaj nenio aŭdiĝas en la ĉambreto krom la kontenta murmurado de la kvarpiedulo.

Katoj estas karakterhavaj bestoj, pli karakterhavaj ol ni pensas.

Ordinare malmultaj homoj opinias, ke valoras la penon studadi la karakteron de katoj kaj sen plua pripensado juĝas ilin falsaj bestoj, tute aliaj ol hundoj, kiujn ili rigardas kiel sincerajn kaj bonajn amikojn de la homoj. Fakte tamen la kato estas estiminda besto pro la firmeco de karaktero.

Estas klare kaj nature, ke ambiciaj homoj ne amas katojn, sed des pli la humilajn hundojn, kiuj sen kontraŭstaro sin submetas sub ilia volo kaj ambicio. Estas konate, ke la ambicia franca reĝo Henriko la tria malamis la katojn kaj ekzilis ilin de sia kortego, dum li ĉiam estis akompanata de belaj humilaj hundoj. Nur malmultaj ambiciuloj amis katojn kaj unu el ili estis la fama kardinalo Richelieu. Ĉi tiu tamen ne nur estis ambicia, sed ankaŭ homo de fortika karaktero, same kiel liaj miaŭantaj amikoj.

Oni eraras tamen opiniante, ke katoj estas indiferentaj pri homa amikeco. Hundoj estas, kiel ni jam diris, humilaj kaj ĉiam sin submetas al la volo de siaj mastroj, kies sklavoj ili estas. Per tio ili montras malsincerecon kaj malfirmecon de karaktero.

La katoj kontraŭe iras nur siajn proprajn vojojn kaj

rifuzante ĉiun laboron, nur agas laŭ sia plaĉo kaj oni konas nur tre malmultajn ekzemplojn, kiuj instruas al ni, ke ilia karaktero povas esti facile regata de la homa volo. Ĉiuj hundoj lernas artaĵojn, vole-nevole ili reportas al sia mastro forĵetitajn bastonojn, ili prezentas al li la antaŭan piedon kaj obeas ĉiujn ordonojn, kiujn la mastro konigas, ĉu buŝe, ĉu geste. Tion neniam faras la katoj. Ili agas nur propraplaĉe kaj montras amikecon nur al personoj, elektitaj de si mem. Instinkte la katoj konas siajn amikojn kaj malamikojn inter la homoj. Kelkfoje ili saltas sur la genuon de persono, kiun ili neniam antaŭe vidis kaj montras al ĝi per tio sian amikecon. Sammaniere agis la kato, kiam ĝi saltis sur la ŝultron de la songanta fremdulo. El amikeco al li, ĝi karesas per la tuta korpo la vangon de la vekiginta fremdulo kaj malrapide kaj singarde irante de lia ŝultro, ĝi eksidas plenfide sur lia genuo, ĉiam kontente murmurante kaj rigardante lin per la grandaj rondaj okuloj, kvazaŭ por peti reciprokan amikecon kaj karesadon.

La besto juĝis prave, vidante en la fremda viro novan amikon, ĉar li karesas ĝin ridetante. La fremdulo pripensas pri la stranga songo, pri la mistera muziko kaj rigardas ĉirkaŭe.

La flamo en la kameno disĵetas ne nur agrablan varmon en la ĉambro, sed samtempe heligas ĝin sufiĉe, por ke li povu distingi ĉiujn objektojn. Ĉie regas trankvilo kaj paco, sed estas al li enigmo, ke en la ĉambro, kaj eble en la tuta domo malestas loĝantoj, kaj ke ili eliris ne ŝlosinte la pordon. Por kiu do brulas tiu fajro sub la kamenkapuĉo? Eble la elirintoj revenos baldaŭ?... Kiu loĝas en ĉi tiu izolita, sed agrabla dometo? Jen demandoj, kiujn la fremdulo ne povas respondi.

Li ekstaras, elrigardas eksteren tra la fenestretoj kaj vidas nur neĝon, nur unu blankan vastan dikan tavolon,

kiu kiel unu sola ondiga blanka tuko kovras la kamparon, la longfosojn kaj vojojn. Liaj vestoj estas jam sekaj, la varma kamena fajro sekigis ilin, nur sur la kaheloj montriĝas kvazaŭ laĝeto da neĝakvo ĉe la seĝo, sur kiu li sidis dum sia dormado, malgranda laĝeto, dissendanta du aŭ tri mallarĝajn serpentumantajn striojn sur la ruĝaj kaheloj. Al li estas nun varme kaj li ne sentas plu la rigidecon en la kruroj. Li sentas, ke la dika surtuto lin ĝenas kaj estas demetonta ĝin, kiam subite ree la sonoj de tiuj samaj flutoj ekaŭdiĝas. Ŝajnas al li, ke ili venas el la subtegmentejo de la domo, kaj malferminte la pordon de la ĉambro, li ekstaras en la pordokadro por aŭskulti. Li pravis, ie sur la subtegmentejo estas la misteraj flutistoj; jen unu, jen ambaŭ ludas. En tiu ĉi momento bela dueto sonas de supre kaj tuj poste unu flutisto majstre ludas la „Ave Maria“. La fremdulo estas ravita, sed vane li streĉas la okulojn, la flutistoj estas kaj restas nevideblaj kaj ŝajnas sin kaŝi tie supre kiel koboldoj el fabelaro.

Ni konas la rakonton pri la ratkaptisto de Hameln, kiu allogis al si ne nur la ratojn, sed eĉ ĉiujn infanojn el Hameln kaj malaperis kun ili en monton. Kial la fremdulo, kiu estas artisto, ne povus allogi al si la kaŝitajn flutistojn? Li demetas la surtuton, kaptas la longan sakon de sub la tablo, eltiras nigran strangforman skatolon, en kiu kuŝas brilanta violonĉelo. Li eksidas, starigas la muzikilon inter la kruroj, kaj dum la kato rigardas lin scivole de malproksime, li prenas la arĉon, atendas momenton kaj kiam la flutistoj finis sian muzikaĵon, la violonĉelisto ekludas la saman melodion. Ravige la sonoj de la unua parto triladas tra la ĉambro kaj supreniras al la subtegmentejo, kie nun regas subita silentego. La „Ave Maria“ finiĝis, sed ĝin sekvas tuj la bela „Kol-nidreĵ“ de Maks Bruĥ. Antaŭ ol ĉi tiu muzikaĵo

finiĝis, aŭdiĝas supre mallaŭtaj paŝoj. La koboldoj venas, la sonoj de la violonĉelo allogis ilin malsupren kaj apenaŭ la lastaj triladoj formortis, kiam ekaperas en la kadro de la malfermita pordo la figuro de mirinde bela knabo. Li estas ĉemize vestita. Li ekhaltas sur la sojlo, rigardante la ludinton per grandaj nigraj surprizitaj okuloj kaj kun malfermita buŝo.

La fremdulo rigardas lin kaj lin frapas la beleco de la knabo. Longaj nigraj harbukloj serpentumiĝas ĉirkaŭ lia kapo. Li staras tie kiel kerubo, kaj ĉar li ŝajne ne kuraĝas alproksimiĝi, li restas staranta, rigardante jen la muzikilon, jen la artiston, kiu siaflanke sen interrompo fiksas la rigardojn sur la nudpieda, ĉemize vestita knabo.

Fine la viro ekrompas la silenton kaj ekparolas germane, tiel ke la knabo komprenas lin, ĉar la dialekto en la norda parto de Groningen kaj la germana lingvo tre similas unu la alian:

— Ĉu vi estas la koboldo, kiu ludis tiel bele sur la fluto tie supre?

— Jes, mi ludis.

— Jam tiel frue en la mateno?

— Mi kuŝis sendorma en mia lito kaj ludis; tion mi faras ofte.

— Kial vi ne alproksimiĝas?

La knabo ne respondas; li tremetas pro malvarmo, ĉar li staras en la aertrablovo, iranta de la varma ĉambro en la koridoron.

— Ĉu al vi estas malvarme?

— Miaj vestoj estas supre.

— Almetu ilin, kaj revenu por varmiĝi.

La knabo ne timas, sed li estas surprizita. Li pensas: Kiu do estas tiu fremda sinjoro?... Kiel li venis kaj kion li volas?

Li tamen ne elparolas tiujn demandojn, sed post kiam li sin vestis, li aliras al la fremda sinjoro kaj diras:

— Mia patrino ne estas hejme.

— Kaj via patro?

— Mi ne havas patron.

— Ĉu li mortis?

— Mi neniam havis patron; mi havas nur patrinon.

Tiu stranga respondo kredigus al la fremdulo, ke la knabo estas idiota, sed liaj okuloj esprimas la malon, kaj li diras:

— Eble li mortis antaŭ via naskiĝo?

— Mi ne scias; li alportis miu ĉi tien en kesteto, kaj neniam li revenis.

Jen dua respondo ankoraŭ pli stranga ol la unua, sed la okuloj de la knabo montras klare, ke li estas nek idiotulo nek simplulo kaj la fremda sinjoro ekpensas, ke li ne bone komprenis la respondon de la knabo, kaj metante la manon sur lian bukloriĉan kapon, li demandas plue:

— Kiel vi nomiĝas?

— Moseo.

— Kaj kiel estas via familia nomo?

Moseo pripensas kaj tiam respondas:

— Landman, ĉar mia patrino sin nomas Landman.

La fremdulo kredas, ke li trovis la solvon de la mistero, ekpensante ke la knabo estas bastardo, kies patro restis nekonata, kaj kompatante lin, li ekkaptas lian manon kaj sidiginte lin sur sian genuon tuj apud la violonĉelo, li demandas:

— Kiom da jaroj vi havas?

— La kesteto estis portata ĉi tien en 1896^a; mi estis tiam tre juna infaneto.

— Kie estas nun via patrino?

— Ĉe Klomp.

— Ce kiu?

— Ĉe Klomp.

— Kiu estas Klomp?

— Farmisto de la tiea farmejo —. Dirante tion, Moseo fingre montras en la direkton, kie malaperis la marŝanta sonorilego.

— Kion ŝi faras tie?

— Ŝi laboras kaj melkas la bovinojn, kaj poste ŝi faras komisionojn.

— Kaj vi mem?... Ĉu vi ne laboras ĉe Klomp?

— Mi vizitas ĉiutage la lernejon en Brej, nur ne sabate kaj dimanĉe, ĉar tiujn tagojn la lernejo estas fermita..., kaj vespere dufoje en la semajno mi iras al la lernejestro por lerni muzikon.

— Kian muzikon?

— Li instruas al mi notojn kaj ludi sur la preĝeja orgeno.

— Ho, sur orgeno?... Vi do ne lernas ĉe li ludi sur la fluto?

— Ne, tion mi lernis per mi mem.

— Sed kiu instruis al vi la muzikaĵojn, kiujn vi ĵus ludis?

— Mi aŭdis ilin dum la kermeso tiun someron; la granda orgeno de la karuselo ludis ilin, kaj nun mi konas ilin memore.

— Mi scias, kies filo vi estas, Moseo —, subite diras la viro.

— Ĉu vi scias?

— Jes, vi estas kiel mi, filo de Orfeo.

La knabo rigardas la fremdulon surprizite; pri Orfeo li neniam aŭdis, kaj li demandas:

— Kie do estas Orfeo?... kaj kiu li estas?

— Ho, li estas fama kantisto de Grekujo kaj en li la mitologio unuigas ĉiujn fortojn de la poezio de Apolono

aŭ de la riverdio Oiagruso kaj la muzo Kaliope. Per la forto de siaj kanto kaj liuto li malsovaĝigis la plej sovaĝajn bestojn kaj allogis al si arbojn kaj ŝtonojn.

Moseo aŭskultas kun streĉita atento, sed liaj surprizitaj okuloj klare diras:

— Pri tio mi komprenas nenion —, kaj la fremdulo demandas:

— Ĉu vi ne komprenas min?

— Ne, sinjoro.

— Nu, mia bubo, eble mi klarigos tion al vi poste, sed jam nun mi povas diri, ke en vi sin kaŝas artisto. Juna knabo, kiu tiel bone kaj korekte fajfludas tiujn muzikaĵojn, nepre povas fariĝi granda muzikisto. Sed diru, kiu fajfis kun vi?

— Mi fajfis sola.

— Sola!?. . . Mi aŭdis tamen du fajfilojn.

— Mi ludis sur ambaŭ kune; sed mi neniam plu volas ludi sur ili.

— Kial?

La knabo silentas momenton, tiam rigardante al la violonĉelo kaj dolĉe tuŝante la kordojn, li diras:

— Mi ne amas plu la flutojn.

— Kial?

— Post kiam mi aŭdis la muzikon de ĉi tiu violonego, mi konscias, ke mi fajfludas malbele.

— Tio estas violonĉelo. . . Ĉu vi neniam aŭdis tian instrumenton?

— Mi aŭdis nur la blindan Petron, ludantan sur sia violono, sed li ne ludas bele; la sonoj de tiu ĉi granda violono estas multe pli belaj.

— Do, vi ĝin amas?

— Ho jes; ĝi estas ankoraŭ pli bela ol la orgeno en la karuselo kaj eĉ pli bela ol tiu de la preĝejo en Brej.

Refoje la knabo eksilentas momenton; li rigardas avide al la violonĉelo, fine li diras:

— Jam longe mi lernas ludi sur la orgeno de la preĝejo; la instruisto de la lernejo instruis tion al mi, sed... mi ankaŭ ne volas plu ludi sur la orgeno...

— Kion do vi volas?

— Ludi sur tia violonĉelo..., eble la instruisto de Brej povos instrui min; mi lin petos.

— Povas tamen esti, ke vi ne povos lerni tion.

— Ho jes, mi povos, se mi nur havus ĝin kaj se nur iu min instruas.

— Sed mi kredas, ke la instruisto ne posedas violonĉelon.

— Mia patrino aĉetos unu por mi..., kiom ĝi kostas?

— Tio dependas de la kvalito, unuj estas multekostaj, aliaj ne.

Moseo jam fariĝis intima kun la fremdulo kaj ne sciante, ke li estas iom maldiskreta, li demandas:

— Kiom kostis la via?

La violonĉelisto ridetas; li respondas:

— Mia instrumento kostis dek mil rublojn.

— Kiom estas unu rublo?

— Ĉirkaŭe du guldenoj kaj duono.

La grandaj okuloj de Moseo fariĝas ankoraŭ pli grandaj; li iam aŭdis, ke la farmisto Klomp, kiu estas riĉulo, pagis dek mil guldenojn por la rekonstruado de sia farmejo; tiu ĉi violonĉelo sekve kostis pli ol du tiaj novaj farmodomoj. Li kredas, ke la fremdulo mokis lin kaj la esprimo de liaj grandaj okuloj klare montras lian pensadon.

— Vi ne kredas tion? — demandas la fremdulo.

— Vi mokis min, tia ligna muzikilo ja neeble povas valori tiom... la tuta farmodomo de Klomp ne kostis tiel multe.

— Estas kompreneble, mia bubo, ke vi ne kredas al mi, spite tio mi ne ŝercas. Sed ne ĉiuj violonĉeloj kostas tiom da mono, kiom la mia. Vi povos aĉeti uzeblan instrumenton por cent guldenoj.

— Cent guldenoj!?!... Ho, mia patrino konsentos pagi tion.

— Ĉu vi pensas, ke ŝi konsentos?

— Jes, ŝi konsentas ĉian en ĉio, kion mi petas.

— Ĉu via patrino ankaŭ amas muzikon?

— Ŝi estas muta... surdemuta, ŝi eĉ ne povas paroli kun ĉiuj homoj, sed min ŝi bone komprenas.

La vizaĝo de la fremdulo esprimas koran kompaton. Longe li fiksas la okulojn sur Moseon kaj ludante kun liaj bukloj, li enprofundiĝas en pensojn. Subite stranga kaprico lin ekkaptas kaj ekstarante li demandas:

— Ĉu via patrino konsentos, ke mi vin instruos?

— Vi!?!

La knabo laŭte eligas tiun unu vorton, la demando surprizas lin.

— Jes, mi... ĉu ŝi konsentus?

— Ho jes, sinjoro.

— Kiam ŝi rehejmiĝos?

— Je la dekdua kaj kvarono.

— Bone; mi atendas ŝian revenon. Se vere ŝi konsentos, tiam mi iros al la farmisto, ĉe kiu ŝi laboras, por preparoli mian intencon, li...

Moseo interrompas lin:

— Ne iru al Klomp, sinjoro; Klomp ne amas min, nek mian patrinon, mi petas: iru al la orgenisto aŭ al la pastro en Brej.

— Bone, mi iros tien.

La artisto remetis sian instrumenton en la ujon, kiun li starigas en angulo de la ĉambro; tiam li rigardas eksteren por vidi, ĉu jam ektagiĝas. La lampeto

brulas ankoraŭ, sed ĝia lumo estas kiel varmega najlo, kiu ne dissendas plu lumon. Jam estas tiel lume en la dometo, ke lampo estas superflua. Moseo ĝin blove estingas, metas kelkajn torferojn en la kamenan fajron kaj pretigas sian maŝenmanĝon. La fremdulo intertempe sidas ĉe la tablo, li etendas la krurojn al la ekbrulantaj torferoj, metas la kubuton sur la tablon kaj apogante la kapon sur la mano, li fermas la okulojn, sin donas al meditado kaj iom post iom endormiĝas.

Sesa Ĉapitro.

Pri pastro verkanta predikajon kaj per kio li estas interrompata — Letero de nekonatulo — Kovacs — La rompĝanta taseto — Pri terura malsano — Kial artisto ne plu ludas antaŭ la publiko kaj kiel li venis en Brej — Pri tio, kion Kovacs intencas fari kun la trovito.

Estas sabato kaj la tria horo en la posttagmezo. La pastro de la domareto Brej sidas en sia antaŭĉambro verkante sian predikajon por la venonta dimanĉo. Pro sia miopeco li sidas en kurba sintenado antaŭ la skribotablo kaj diligente laboras. Sian longan pipon el argilo, kies bruniĝinta kapo ripozas sur ĵurnalo meze de la tablo, li firmitenas per la dentoj, kaj ĉe ĉiu elblovo de fumo la antaŭstaranta suba makzelo sin movas supren. Tiel li skribis jam pli ol unu horon kaj estas skribonta ankoraŭ longan tempon, se nenio interrompos lian skribadon. Ordinare neniu interrompas lin, kiam li verkas la predikajon, ĉar nur pro urĝaj aferoj la servistino havas permeson ĝeni lin.

Ekstere ĉio estas silenta kaj kvieta. Jam ne neĝas; la ĉielo estas klara kaj la vetero agrabla, kvankam malvarma.

Sur la longfoso laŭlonge de la makadama vojo kelkaj knaboj forbalais la neĝon de la frostiĝinta akvo kaj nun glitiras. Jam pli ol centfoje ili pasis kaj repasis la mortintejon antaŭ la pastra domo, sed la pastro ne vidas ilin; li estas tro miopa. Krom tio la glitirado de la knaboj ne interesas lin, li atentis nur la predikajon,

kiun li devos legi voĉe la postan tagon, ĉar en la preĝejo li ĉiam voĉlegas la predikajon, skribitan kun dikaj literoj en maldika kajero. Ĉiun semajnon li plenskribas unu el tiaj kajeretoj, kaj zorge kolektante ilin, li jam posedas grandan aron.

Estas varme en la ĉambro. Gratante la plumo sin movas sur la papero. De tempo al tempo la pastro ekhaltas por rapide tralegi la jam plenskribitajn folietojn sed senlace li ĉiam ree komencas skribi; dume li ne ĉesas fumadi kaj preskaŭ regule la malsupra makzelo moviĝas supren kaj malsupren, pelante antaŭ si malgrandajn nubetojn da tabaka fumo.

La pastro skribas:

„Kaj la akvo revenis kaj kovris la ĉarojn kaj la rajdantojn de la tuta militistaro de Faraono, kiu venis post ili en la maron; ne restis el ili eĉ unu. Sed la Israelidoj iris sur seka tero tra la mezo de la maro, kaj la akvo estis por ili muro dekstre kaj maldekstre. Kaj la Eternulo savis en tiu tago la Israelidojn el la mano de la Egiptoj, kaj la Israelidoj vidis la Egiptojn mortintaj sur la bordo de la maro. Kaj la Israelidoj vidis la grandan manon, kiun la Eternulo aperigis sur la Egiptoj, kaj la popolo...

Subite mallaŭta frapo aŭdiĝas. Iu frapis la pordon, sed ŝajne li frapis kun timo, ĉar la pastro verkas je sia predikajo. Li ne aŭdas la frapon kaj li skribas plue: ektimis la Eternulon kaj ekkredis al la...

Refoje frapo aŭdiĝas, sed pli laŭte, tiel laŭte, ke ĝi trafas la orelojn de la skribanto. Li sulkigas la frunton, la dikaj brovoj preskaŭ sin tuŝas reciproke kaj la buŝo ellasas la pipon, ĉar la pastro devas turni la kapon por rigardi al la pordo, kie iu lin interrompas.

Tria frapo.

— Eniru!

Li estas obeata; la pordo malfermiĝas kaj la kapo kaj unu ŝultro de la servistino timeme montriĝas en la ĉambro.

— Kio estas? — la pastro demandas.

— Moseo.

— Kion li deziras?

— Li venas kun komisiono de fremda sinjoro.

La pastro metas la pipon sur la tablon kaj diras kun surprizo:

— De fremda sinjoro?... Nu, enirigu la knabon.

La ŝultro kaj la kapo retiriĝas kaj anstataŭe aperas Moseo. Li ekhaltas, fermas la pordon post si kaj atendas.

— Nu, Moseo, nur venu; kio estas?

Moseo alproksimiĝas al la pastro. En unu mano li tenas la ĉapon, sub kiu ordinare estas premkaŝitaj la harbukloj, kiuj nun libere pendas sur liaj frunto kaj oreloj; en la alia mano li tenas letereton.

— Bonan tagon, pastro; fremda sinjoro ordonis al mi enmanigi al vi ĉi tiun letereton.

— Ĉu li atendas mian respondon?

— Jes, pastro.

La pastro ekprenas la letereton el la koverto, legas la enhavon kaj rigardas fikse al Moseo.

— Kie estas tiu sinjoro?

— Ĉe ni, pastro.

— En la domo de via patrino?

— Jes, pastro.

— Kiam li venis tien?

— Hodiaŭ nokte, mi kredas, ĉar hieraŭ vespere, kiam mi enlitiĝis, li ne estis ankoraŭ veninta.

Tiu respondo surprizas la pastron supermezure.

— Tion mi ne komprenas, Moseo.

— Nek mi, pastro. Hodiaŭ matene jam tre frue mi

kuŝis maldorme en mia lito sur la subtegmentejo, ĉar jam kelkajn monatojn mi dormas tie. Mia patrino estis vekinta min, kiam ŝi vestigis por iri al la farmodomo; ŝi ĉiam vekas min per la bruoj, kiun ŝi kutime faras. Mi ne povis reekdormiĝi kaj fajfludis. Subite mi ekaŭdis sub mi en la ĉambro strangan belegan muzikon, tiel belegan, kian mi neniam aŭdis antaŭe. Mi komence ektimis, ne sciante, kio tio estas, sed la muziko estis tiel belega, ke larmoj envenis al mi en la okulojn... Fine mi ne plu timis kaj leviĝis por vidi, kiu ludas, kaj venante en la koridoron, mi ekvidis en la ĉambro fremdan sinjoron, kiu ludis sur granda staranta violono... La letereto estas de tiu sinjoro.

— Sed tio estas tre stranga... Kiel li eniris? Via patrino do lasis la pordon nefermita?

— Jes, ŝi ja devas tion, alie mi ne povus eliri, sed tio ne estas grava, ŝtelistoj neniam eniris, nek malbonfarantoj.

— Tiu fremdulo tamen eniris.

— Jes, sed ne por ŝteli... li nur ludis.

— Sed kial li faris tion?... Kion li diris al vi, kiam vi venis en la ĉambron?

— Ho, li estis tre amika... Li ne parolas holande, nek laŭ nia dialekto.

— Ĉu vi do povis lin kompreni?

— Jes, ĉar li parolas kiel la vojaĝantaj muzikistoj.

— Ĉu li estas germano?

— Mi ne scias..., ne demandis pri tio.

— Sed, li ne diris al vi kial li venis?

— Tion mi ankaŭ ne demandis; li diris, ke li volus paroli pri mi al Klomp, sed mi lin petis, ke li prefere parolu kun la lernejestro aŭ kun vi; kaj tial li skribis tiun letereton.

— Bone, Moseo, estas tre saĝe, ke vi petis lin sin

turni al mi; diru al li, ke mi petas lin al mi ĉi tiun posttagmezon je la sesa horo.

La pastro rigardas momenton antaŭ sin; tiam li prenas la pipon, elblovas kelkajn dikajn tabaknubojn kaj meditas; fine li diras:

— Ĉu li ne informiĝis pri vi?

— Jes; li demandis pri mia nomo, pri mia aĝo kaj cetere; tiam li diris, ke li scias, kies filo mi estas.

— Ĉu li diris tion!!?

— Jes, li diris, ke mia patro estas dresisto de sovaĝaj bestoj.

— Kaj kie estas nun via patro?

— En Grekujo.

— En Grekujo!!?

La miopaj okuloj de la bonkora pastro pligrandiĝis, kiam li ekaŭdis, ke la patro de Moseo estas dresisto de sovaĝaj bestoj, sed eksciante, ke tiu dresisto loĝas en Grekujo, li ne kredas al siaj oreloj.

— En Grekujo? — li rediras.

— Jes, tion la fremdulo rakontis al mi.

— Sed, ĉu vi bone lin komprenis, Moseo?

— Mi kredas, ke jes; sed li diris ankaŭ, ke mia patro estas la lia.

— Jen la afero fariĝas pli stranga ankoraŭ... Ĉu la fremdulo estas tiel juna?

— Ho ne, li jam havas griziĝantajn harojn kaj longajn lipharojn.

— Kaj li parolas germane?... Vj nepre ne bone komprenis liajn parolojn, Moseo, li ja neeble povas esti via frato.....

La pastro estas parolonta plue, sed eksilentas, rigardante al la letero, kies subskribon li refoje legas.

— Rikardo Kovács — li flustras; tiam meditante li rigardas antaŭ sin. Post momento li diras plue, kvazaŭ al si mem:

— Kie mi antaŭe legis tiun nomon? Mi legis pri fama violonĉelisto, kiu tiel sin nomis, sed li ne estis Greko, sed Bohemo Nu, li ja mem klarigos al mi tiun enigmon, ĉar enigmo ĉi tio ĉio estas —, tiam sin turnante al la knabo, li diris:

— Aŭskultu, Moseo; reiru al tiu fremda sinjoro kaj diru, ke mi akceptas lin ĉe mi kun plezuro, eĉ antaŭ la sesa horo.

Moseo iras al la pordo kaj estas elironta la ĉambron, sed li hezitas.

— Pastro —, li diras, — la sinjoro diris, ke li intencas instrui al mi ludi sur la violonĉelo kaj li volas paroli pri tio al vi, ĉu vi

— Ho, li vere intencas? Nu Moseo, ni vidos.

La knabo foriras kaj la pastro restas sola. Li refoje sin klinas super la kajero por skribi. Li legas la laste skribitajn liniojn por daŭrigi la predikaĵon kaj li pripensas; tiam li skribas kelkajn vortojn, sed ekhaltas, trastrekas ilin kaj denove pripensas, rigardante fikse antaŭ sin al la muro, kvazaŭ por legi tie, kion li devas skribi. La muro tamen ne helpas al li, ĉar vane li serĉas la skribotan daŭrigon de la predikaĵo. Sinsekve li pensas pri ĝi kaj pri la fremdulo, kiu eble ĵetos lumon sur la misteran naskiĝon de Moseo. Li ekkaptas sian pipon kaj elblovas dikajn nubojn, dum la granda malsupra makzelo regule moviĝas supren kaj malsupren, sed ankaŭ la fumado ne helpas al li trovi la taŭgan daŭrigon, ĉar liaj pensoj pri tio kaj pri la fremdulo intermiksiĝas tia-grade, ke estas neeble al li fini la predikaĵon. Kunpremante la lipojn kaj sulkigante la frunton, li fine metas la plumon sur la tablon, ekstaras kaj dum tabaknubo post tabaknubo eliras lian buŝon, li promenadas tien kaj reen en la ĉambro.

— Rikardo Kovács —, li diras al si mem. — Mi

legis pri li, li sen ia dubo estas la violonĉelisto, kies famo antaŭ kelkaj jaroj disflugis la mondon. Sed kion li volas tie ĉi ĉe la mutulino? Ĉu li vere scias, kiu estas la patro de la trovito? Kial li venis tiel neatendite en la mezo de la nokto en la domon de Rika? Ĉu li estas eble la patro de Moseo? . . . Nu, mi ja baldaŭ ekscios tion.

Nubo post nubo refoje eliras el inter la lipoj de la pastro, neniam antaŭe li tiel fumis. Subite li ekpensas pri sia tasko, la nefinita predikaĵo, sed li konscias, ke nun li neeble povas finverki ĝin; la fremdulo vole-nevole flanken puŝas la ideojn verkotajn, kaj ĉar li nepre devas prediki morgaŭ, li aliras al librokesto kaj elprenas plenmanon da malnovaj predikaĵoj. Serĉante inter ili, li trovas unu, kiun li voĉlegis unu dimanĉon antaŭ tre longa tempo.

— Nu —, li diras al si mem, — miaj aŭskultantoj ja ne memoros, ke ili jam unu fojon aŭdis tiun ĉi predikaĵon, ĝi servos morgaŭ; la nefinitan mi povos uzi post semajno.

Estas nun la kvina horo, kaj ĉar la fremdulo eble ne forrestos longan tempon, la pastro rigardas ĉirkaŭe por ekzameni, ĉu ĉio en la ĉambro estas sufiĉe deca por akcepti vizitanton. Li metas la kajeron en la librokeston, kaj malfermante la pordon de la ĉambro, li vokas al si la servistinon kaj ordonas, ke ŝi pretigu teon por du personoj.

Alia horo pasas kaj obtuza krakado eksterdome en la neĝo anoncas, ke persono alproksimiĝas al la antaŭa pordo.

— Estas li —, diras la pastro, kaj rigardante tra la fenestro, li vidas, ke sinjoro ĵus suriris la solan ŝtupon de la doma peroneto.

En holandaj urboj kaj urbetoj ĉiu domo, kiel ajn

malgranda ĝi estas, posedas sian sonorilon kaj leterujon je la antaŭa pordo. Tute kontraŭe al tio, la domoj en vilaĝetoj kaj sekve ankaŭ en Brej, malhavas ilin ambaŭ. Leterportisto kutime ŝovas la alportatajn leterojn kaj jurnalajn sub la pordon en la koridoron, se la pordo estas ŝlosita, aŭ malfermante ĝin, se ĝi ne estas ŝlosita, li vokas laŭte: — Leteron! — aŭ: — Jurnalon! —, kaj ĵetinte la leteron aŭ la ĵurnalon en la koridoron, li refermas la pordon kaj foriras, tute ne atendente, ĝis la loĝanto venas por ekpreni la ĵetitan objekton.

Personoj, kiuj volas viziti loĝanton de Brej, sen ceremonio malfermas la pordon, eniras ne nur la koridoron, sed eĉ la ĉambron kaj salutinte, eksidas ne invitate, kvazaŭ ili estas la mastro mem. Ĉar reciproke ĉiuj loĝantoj tie agas laŭ tiu sama maniero, neniu estas ofendita aŭ surprizita pri tiu agmaniero, kiu apartenas al la moroj de la vilaĝetoj.

Okazas kelkfoje, ke urbanoj, kiuj ne scias pri tiu kutimo, restas starantaj antaŭ la pordo de vizitota Brejano, atendente vane, ke la loĝanto venos por malfermi al li, ĉar ordinare oni ne malfermas, se oni okaze ne rimarkis lin venantan, aŭ atendantan sur la peroneto de la domo.

La pordo de la pastrejo de Brej ne deflankiĝas de la kutimo pri la malesto de sonorilo, kaj neniam la bona viro pensis pri tio, havigi unu al sia dompordo. Spite tio, neniam vizitanto ankoraŭ atendis sur lia peroneto, por ke unu el la domloĝantoj malfermu al li, ĉar ĉiam la servistino aŭ la mastrumistino, kiuj laboras en la kuirujo, ekvidas jam de malproksime, ke iu venas por viziti la pastron, kaj se okaze ili ne rimarkus lin, tiam la pastro mem aŭdas, ke iu estas venanta kaj tiamaniere la pordo ĉiam malfermiĝas kvazaŭ per si mem por inviti la venanton eniri.

La pastro, aŭdante la krakadon de la ŝuoj en la frostita neĝo, tuj rapidas por saluti la fremdulon.

— Sinjoro Kovács? — li demandas.

— Por servi al vi . . . , ĉu mi havas la honoron paroli kun la pastro de ĉi tiu domareto?

Kovács diras tiujn vortojn germane kaj la pastro respondas samlingve:

— Vi ne eraras, sinjoro, . . . estu la bonvenanto kaj bonvolu eniri —, kaj li montras la malfermitan pordon de la antaŭa ĉambro. La fremdulo plenumas la deziron de la pastro kaj ambaŭ eniras.

— Demetu vian surtuton, sinjoro —, diras la pastro, — ĉar estas varme en la ĉambro, kaj mi esperas, ke vi faros al mi la plezuron esti mia gasto dum kelke da horoj, ĉar mi opinias, ke ni havos multon por interparoli.

Minuton poste la du viroj sidas oportune ĉe la varma forno.

— Mi timis veni al vi en maloportuna horo —, diras la fremdulo, sed post via afabla invito mia timo tute malaperis, kaj kun danko mi jam nun venas ĉi tien . . . Vi sendube miris, ricevante mian leteron, tiom pli, ĉar mia nomo estas al vi nekonata.

— Ne tiom nekonata, kiom vi eble pensas, almenaŭ, se vi estas tiu sama Kovács, pri kiu mi legis.

— Ĉu vi legis pri unu Kovács?

— Jes, pri artisto portanta tiun nomon, kaj kies famo kiel violonĉelisto ĝis nia provinco disvastiĝis. Legante vian subskribon, mi jam ne dubis kaj tuj supozis, ke vi kaj tiu artisto estas la sama persono.

Melankolia rideto glitas sur la vizaĝo de la fremdulo, kaj post kiam li silentis momenton, li diras:

— Vi supozis prave; mi estas tiu Kovács.

Refoje li eksilentas kaj kvazaŭ ekmeditante pri io malĝoja, li fikse rigardas la fornon, dum lia vizaĝo esprimas la antaŭan melankoliecon.

La servistino nun enportas la teon, kaj dum ŝi metas la pladon sur la tablon kaj aranĝas la tasojn, la sukerujon kaj la kuleretojn, la pastro, sulkgigante la frunton, streĉas la okulojn por ekzameni la eksterajon de la artisto kaj spite al sia miopeco ekvidas, ke la vizitanto havas simpatiindan vizaĝon, kiu tre kontentigas lin.

Post kiam la servistino forlasis la ĉambron, regas tie ankoraŭ mallongan tempon la sama antaŭa silentado, kiun fine Kovács interrompas, dirante:

— Mi tamen retiris min el la publika vivo kaj ne donas plu koncertojn.

— Tion la publiko bedaŭros.

— Eble; sed malsano, kiu jam longe subfosas min, devigis min agi tiel —. Refoje la sama melankolia rideto montriĝas sur la vizaĝo de la parolinto.

La pastro miras, ĉar la artisto aspektas korpe, kva-zaŭ li neniam estus estinta malsana; li tial diras:

— Espereble vi preskaŭ resaniĝis?

— Ho ne; verŝajne mi neniam resaniĝos... Verŝajne, mi diras, ĉar estas rimedo, sed nur unu, kiu povas resanigi min, kaj tiun rimedon kune kun absoluta spirita ripozo mi intencas apliki en via vilaĝeto.

— Ĉi tie en Brej?

— Jes; okaze mi venis tien ĉi, kaj okaze mi trafis sur mia vojo kamparanan dometon, kies ĉirkaŭaĵo spiras tiom da paco kaj feliĉo, kaj ĉio estas tie tiel trankvila, ke nenie mi povus trovi pli taŭgan lokon por mia nuna ŝtato.

— Sed la loĝantino estas surda kaj muta.

— Tio ne malhelpas. Ŝi estas bonkorulino; tion mi sufiĉe klare spertis, post kiam tiu knabo konigis al ŝi sian deziron, ke mi provizore, kaj eble longan tempon restadu en la dometo; ĉar ŝi tuj konsentis... Ŝajnas al mi, ke la deziro de tiu knabo estas ankaŭ tiu de la virino.

— En tio vi pravas; li estas ŝia idolo... Kiam li venis kun via letero, li diris al mi, ke vi scias, kiu li estas.

— Surprizite Kovács rigardas al la pastro.

— Ĉu li tion diris?... Li eble ne bone komprenis min.

— Li diris, ke vi konas lian patron.

— Ho, mi memoras; mi diris al li, ke li estas filo de Orfeo, ĉar vera Orfeido li estas. Mi aŭdis lin ludi kaj tuj rimarkis en li mirindan muzikan talenton.

— Sed, sinjoro Kovács, permesu al mi la demandon: Vi do ne konas lian familion?

— Tute ne. Mi nur aŭdis de la knabo mem, ke oni alportis lin en kesteto; kaj tio ŝajnis al mi tre stranga.

La pastro kuntiras la dikajn brovojn, enverŝas du tasojn da teo, kaj ŝovante unu el ili al sia gasto, li diras:

— Li estas trovito. Nekonatulo postlasis lin en la dometo de la mutulino kaj ĉi tiu lin adoptis.

— Ŝi do ne estas lia patrino?

— Nur la adoptinto, sed vera patrino ne povas esti pli zorgema por sia infano, ol Rika por Moseo —; kaj detale la pastro rakontis ĉion, kio pri la knabo okazis.

Kovács aŭskultas atente, kaj post kiam la pastro eksilentis, li diras:

— Kiam vi legis mian leteron, tiam vi sendube tuj supozis, ke mia nuna vizito rilatas plejparte la knabon.

— Kompreneble; sed mi supozis samtempe, ke vi povus doni al mi kelkajn informojn pri lia parenkaro... Bedaŭrinde mi eraris.

Dirinte tion, la pastro prezentas cigaron al Kovács, sed ĉi tiu geste malakceptas, tiam li diras:

— Pardonu al mi, pastro, ke mi devas malakcepti, la kuracisto nepre al mi malpermesis cigarojn, same kiel alkoholajon, ili tre malhelpas al mia resaniĝo; laŭ

ordonita dieto mi eĉ ne trinku teon kaj kafon, tamen kelkfoje mi trinkas unu taseton, sed neniam pli multe... Oni do ne scias tie ĉi, kies filo li estas?

— Oni scias nur tion, kion mi ĵus rakontis al vi, neniom pli.

Kovács enpensigas dum momento, trinkas sian teon kaj diras:

— Ĉu li rakontis, ke mi venis al ili tiel neatendite en horo de l'mateno?

— Jes, kaj mi konkludis el lia rakonto, ke vi nepre devas koni lin, aŭ almenaŭ lian parencon.

— Kiel mi jam diris al vi, mi venis en tiun dometon tute okaze, post kiam mi estis vagadinta longan tempon kaj estis perdinta la ĝustan vojon; sed mi ja pli detale rakontos tion pli poste, ĉar mi esperas resti en ĉi tiu vilaĝeto kaj de tempo al tempo mi volonte interparolos kun vi pri la knabo, kiu tre min interesas. Mi intencas instrui al li ludi violonĉelon, tio distros min kaj mi antaŭvidas, ke mia peno portos fruktojn.

— Sed neniu ĉi tie havas tian instrumenton.

— Mi aĉetos unu por li en Groningen; la mia estas por li tro granda, kaj krom tio, li bezonas apartan instrumenton, la mian li eĉ ne devas ektuŝi.

— Ĉar ĝi estas tro granda?

— Ankaŭ tial, sed li malbonigus la tonon. Pri violonoj oni devas esti singarda, ili estas delikataĵoj kaj ne toleras, ke ĉiu ludas sur ili; nesperta ludanto povas malbonigi la plej bontonan instrumenton en tre mallonga tempo.

— Sed la mutulino neniam — — —

La pastro subite ekhaltas paroli. Kovács, kiu ĝis tiam tenis la jam malplenigitan tason en la mano, subite etendas la brakon, kvazaŭ por montri ion eksterordinaran antaŭ si sur la muro; liaj fingroj rektiĝas kaj ekstremitas.

La taso falas, disrompiĝas en pecojn sur la tapiŝo. La pastro rigardas la montritan lokon de la muro, sed nenio eksterordinara troviĝas tie. Refoje fiksante la rigardon sur sian gaston, li vidas, ke ĉi tiu tremetas de la piedoj ĝis la kapo. Subite la fremdulo eligas laŭtan tirtonan krion, etendas la krurojn, glitas de la seĝo kaj falas sur la plankon, kaj dum la seĝo ŝoviĝas malantaŭen, la kapo de la artisto tuŝegas la plankon kun bruo kiel martelego, kiun forĝisto lasas fali sur amboson.

La pastro salte levigias pro ekteruro, ne sciante, kio okazas, kaj rigardante la falinton, li kredas lin tuj mortonta, ĉar la kompatindulo tremegas kvazaŭ tuŝata de elektra fluo. Lia vizaĝo paliĝas terurige kaj la larĝe malfermitaj okuloj estas fikse turnitaj kontraŭ la plafono; la buŝon kovras blanka ŝaŭmo kaj nun ne ellasas plu la antaŭan tirtonan krion, sed raŭkan penetrantan stertoron kvazaŭ de buĉata bovo.

La terurigita pastro staras alforĝita al la planko, li ne movas sin kaj preskaŭ ne kuraĝas spiri, kaj lia rigardo restas fiksita sur la malfeliĉulo tie antaŭ liaj piedoj.

Post ĉirkaŭe kvin minutoj, kiuj ŝajnas daŭri almenaŭ tutan horon, la tremaj skuadoj fariĝas malpli fortaj, sed la stertorado daŭradas.

— Kompatema Dio! — fine la pastro flustras, — tio estas epilepsio, la malsano, kiun li aludis.

En tiu momento la pordo singarde malfermiĝas, kaj la paliĝinta vizaĝo de la mastrumantino sin ŝovas internen.

— Kio okazis? — ŝi demandas per tremetanta voĉo.

— Tsss! — . . . li jam rekonsciigias.

— Sed kio estas al li? — ŝi demandas plue, enirante kaj alproksimiĝante sur la pintoj de la piedoj. . .

— Ĉu li svenis?

— Jes, svenis . . . , sed baldaŭ . . .

— Sed lin atakis epilepsio!! —, diras la mastrumantino, kaj interfingrigante la manojn, ŝi kun kompato rigardas jen al la pastro, jen al la stertoranta viro.

Fine la stertorado ekhaltas kaj kviete la suferanto kuŝas sen movo kaj fermas la okulojn kiel kvieta dormanto.

En la ĉambro fariĝas morta silento nur interrompata de la regula tiktakado de la kamena horloĝo.

Kun vizaĝoj esprimantaj koran kompaton kun la suferanto, la pastro kaj la mastrumantino atendas . . .

Kovács ekspiras kviete, malfermas la okulojn kaj dum momento rigardas al la plafono; tiam li eksidas kaj ŝajnas orienti sin. Iom post iom li konscias, kie li estas, kaj dum li forviŝas la ŝviton de la frunto per la mandorso, liaj okuloj sin levas al la du antaŭ li starantaj. Esprimo, montranta profundan ĉagrenon, naskiĝas sur lia vizaĝo.

— Ĉu vi sentas vin pli bone? — demandas la kortuŝita pastro post momento.

— Mi dankas; jes mi sentas min pli bone.

— Ĉu vi deziras iom da akvo?

— Dankon; ĝi ne utilis al mi.

— Ĉu mi helpos al vi residiĝi?

— Vi estas . . . tro bona . . . , sinjoro . . . —, balbutas la artisto, — kaj mi devas peti vian pardonon pro . . . pro la maniero . . . per kiu mi vin ĝenas . . .

— Tute ne; vi ja ne estas kulpa . . .

Kovács ekstaras malrapide, kaj etendante la manon al la pastro, li diras plue:

— Jes, mi estas kulpa; mi ja devus averti vin antaŭe.

— Vi tamen ne povis tion, la atako venis tro rapide.

— En tio vi pravus, sed mi devus averti vin, ke tia atako povus surprizi min, sed ĝi okazas tiel malofte en

la lastaj monatoj, ke mi tute ne atendis ĝin hodiaŭ vespere.

Dirante tiujn vortojn, li ridetas kaj silentas momenton, dum kiu la mastrumantino forlasas la ĉambron, post kiam ŝi serĉkolektis la pecojn de la rompiĝinta taso.

La pastro prenās alian tason kaj enversinte teon kun strieto da kremo, li ekbruligas ree sian estingiĝintan pipon kaj ekfumas, tiam li demandas:

— Ĉu tia atako surprizas vin nur malofte?

— La lasta okazis antaŭ tri monatoj... en Parizo... dum koncerto.

— Dum koncerto?

— Ho ve, jes!... Mi solludis en la granda teatro... antaŭ du mil ĉeestantoj... Kiam mi rekonsciiĝis, preskaŭ ĉiuj vizitantoj estis forkurintaj kun teruro... Kompreneble mi devis por ĉiam... senrevene forlasi la koncertojn kaj la postan tagon aperis longa artikolo en multaj Parizaj gazetoj pri la okazintaĵo, kiun la redaktoroj nomis granda skandalo... De post tia tempo mi estas netaŭga por kunlabori en koncertoj, precipe kiel solludanto.

— Kaj estas eble, ke vi resaniĝos?

— Mi esperas... Mi korespondis kun fama profesoro de la universitato en la urbo Groningen; eble li povos resanigi min. Hieraŭ mi intencis viziti lin kaj vojaĝis vagonare al la urbo, sed malfeliĉe mi ekdormis dumvojaĝe, kaj kiam la vagonaro eniris la stacidomon, neniu vekis min. Kiam mi vekigis spontanee, vojaĝanto diris al mi, ke mi troviĝas en... en Winsum, mi kredas. Mi tuj eliris la vagonon kaj volis marŝi returnen al la urbo. Vilaĝano, verŝajne malbone komprenante min, montris al mi neĝustan vojon, kaj post duhora marŝado, kiam mi pensis fine troviĝi en la urbo, mi ekvidis, ke mi refoje estas en vilaĝo, nomata Eenrum. Intertempe ekneĝis, sed mi

ne volis nokti en Eenrum kaj petis informojn de policano, kiun mi renkontis sur la strato. Li montris al mi la vojon al la urbo, kie mi nepre volis alveni kiel eble plej baldaŭ, ĉar la postan tagon jam la dekan horon en la mateno mi devus viziti la profesoron. Tamen mi por la dua fojo perdis la bonan direkton kaj erarmarŝis tien kaj returnen, ĝis kiam mi fiue trafis vian vilaĝeton kaj la dometon, kie loĝas la mutulino kun sia knabo. Ĉe ili mi provizore restos. Se montriĝos, ke la knabo havas la talenton, kiun mi supozas ĉe li, tiam mi instruos lin.

— Sed ĉu tiu domo ne estas tro malgranda? Ĝi enhavas nur unu solan ĉambron.

— Kaj uzeblan subtegmentejon.

— Vi tamen ne povas loĝi tie.

— Sur la subtegmentejo? . . . La virino dormos tie kun la knabo; mi luis la ĉambron.

— Vi jam interkonsentiĝis?

— Jes, mi nepre volas restadi en tiu dometo kaj ĉe tiu knabo. Io neklarigebla altiras min al li. Kiam mi vidis lin la unuan fojon en lia ĉemizo, tiam ŝajnis al mi, kvazaŭ mi vidis min mem kiel juna knabo . . ., li povus esti mia frato. Mi memoras, kiel mi aspektis kiel knabo de lia aĝo. Ni havis hejme en la dormoĉambro grandan spegulon, en kiu mi rigardis min mem ĉiuvespere, kiam mia patrino kondukis min al mia lito. Kiam mi vidis hodiaŭ matene aperi sur la sojlo tiun knabon, blanke vestitan same kiel mi antaŭ multaj jaroj, tiam estis al mi, kvazaŭ mi revidas min en la spegulo de mia dormejo . . . Eble mi trompiĝas, sed mi supozas, ke la knabo kaj mi estas samlandanoj; holanda knabo li ne estas, tion montras klare liaj okuloj kaj haroj.

— Moseo diris, ke vi rakontis al li, ke lia patro estas Greko.

— Greko!?

— Jes, Greka dresisto de sovaĝaj bestoj.

— Ho, mi komprenas, kial li diris tion; mi aludis Orfeon, kiu, kiel vi scias, allogis al si sovaĝajn bestojn per sia liuto. Tion mi rakontis al li, sed li ne komprenis.

La pastro ridetas kaj prezentante al Kovács la tason da teo, li diras:

— Kaj vi vere supozas, ke Moseo estas Orfeido?

— Mi estas preskaŭ certa pri tio. Mi rimarkis, kian impreson faris sur lin la muziko de mia violonĉelo; mi jam antaŭe aŭdis lin fajfi sur simpla fajfilo el lado, kaj mi ne dubas pri la rezultoj de mia instruado. Mi vidis la teoriajn taskojn, kiujn li verkis por sia instruisto, la orgenisto de via preĝejo, kaj mi estis surprizita pri lia muzika kono.

— Kies muziko, tiu de Moseo?

— Jes; foliante liajn notkajerojn, mitrovis komponaĵojn fakte plenajn je eraroj, sed en kiuj mi vidis ion tre belan kaj eksterordinaran. Kiam mi demandis, kiu estas la originala verkisto de tiuj komponaĵoj, kaj el kiu verko li kopiis ilin, li respondis naive, ke li mem skribis tiujn notojn. — Mi aŭdis ilin fantazie —, li diris, — kaj notis ilin en mian kajeron.

— Jen io stranga.

— Por vi tio ŝajnas esti strangajo, sed ne por mi. Mi komponis jam je mia sepa jaro.

— La instruisto neniam parolis al mi pri tiuj komponaj provoj.

— Moseo diris, ke li neniam montris ilin, konsiderante ilin kiel io tre natura; li mem ne konscias, ke li posedas muzikan talenton, kredante, ke liaj talentoj estas io tre natura, kion posedas ĉiuj homoj... Mi faros por li mian eblon. Morgaŭ mi iros al la profesoro en la urbon kaj mi uzos tiun okazon por aĉeti violonĉelon por mia nova lernanto.

— Ĉu vi jam parolis al li pri tio?

— Ne, sed li min akompanos al la urbo, kie li ankoraŭ neniam estis; la vojaĝo kaj la nova instrumento estos surprizaj por li. Kompreneble mi donacos al li la violonĉelon, ĉar lia zorgantino ŝajnas al mi nerica. Feliĉe mi ŝparis sufiĉe da mono, kaj sen peno mi povos preni sur min ĉiujn bezonajn kostojn por la plua edukado de la knabo. La virino ne laboros plu ĉe la farmisto, sed restos hejme, ŝi jam konsentis, ke mi fariĝas ŝia pensionulo, sed ĝuste pro tio mi turnas min al vi por informiĝi, ĉu la moroj de ĉi tiuj provincaj vilaĝoj permesas kaj toleras, ke mi estas la samhejmano de needziĝinta personino.

— Sinjoro Kovács, la loĝantoj de la ĉi tieaj vilaĝetoj estas rilate al moroj tre naivaj kaj modestaj; neniu diros ion kontraŭ tia kunloĝado, kaj se ĝenerale oni kritikus tion, vi povas esti certa, ke ĉiu, kiu konas la mutulinon, scias, ke ŝi estas super ĉia suspekto. Sed... estas io alia, kio eble malhelpus al via loĝado en tiu dometo... Rika estas por si mem tre taŭga mastrumantino kaj kuiristino, ŝi tamen ne lernis prepari manĝaĵojn por persono kiel vi.

— Estonte mi devas vivi laŭ severa dieto; mi ja aranĝos tion kun ŝi, cetere tio estas nur flanka afero.

— Permesu al mi ankoraŭ unu demandon —, diris la pastro... — Ĉu ŝi scias pri via malsano?

— Mi parolis pri ĝi al la knabo, kaj se mi bone lin komprenis, troviĝas samsortulo mia en la vilaĝo Warfum. Moseo certigis al mi, ke la malsano ne timigas lin, nek lian patrinon.

La pastro pripensas kelkan tempon, kuntiras kiel laŭkutime la brovojn kaj pelas antaŭ sin grandajn nubojn da tabakfumo; fine li ekmemoras, kiu estas tiu malfeliĉulo, kaj li demandas;

— Kiom da tempo daŭros, laŭ via opinio, la plena studado de knabo por fariĝi bonega violonĉelisto?

— Mi kalkulas sur liaj talentoj kaj sur lia diligenteco, kaj se ili respondos al miaj supozoj, tiam tri aŭ kvar jaroj sufiĉos.

— Mi estas certa pri lia diligenteco —, diras la predikisto, — la cetero montriĝos baldaŭ; mi esperas, ke vi havu sukceson.

— Ni vidos, ĉiuokaze mi ĝojas, ke la destino kondukis min al tiu izolita dometo, ĉar mi trovos tie almenaŭ ion, kio povas plidolĉigi mian sorton. Mia vivo de nun ne estos plu sen tasko kaj sen celo, kaj mi streĉos ĉiujn miajn kapablojn por trafi tiun celon. Eble mi mem neniam povos plu montri miajn muzikajn talentojn publike, sed mi provos trovi anstataŭanton, kaj se la sorto estus al mi favora, tiam Moseo estos tiu anstataŭanto.

Dirinte tion, Kovács ekstaras.

— Mi ne volas plu ĝeni vĥn hodiaŭ —, li diras plue, — sed mi esperas, ke ni revidu nin ankoraŭ multajn fojojn.

— — — — —


— — — — —

— — — — —

La neĝo ekster la domo de la pastro refoje krakas sub la piedoj de la artisto, kiu returnas sin al sia nova hejmo, kaj la pastro sidas ĉe la varma forno kaj elblovas grandajn nubojn, dum li pensas pri la strangaj kapricoj de la sorto.


Ĉu ĝi estos favora al Kovács kaj al Mosco? — —

Fino de la Dua Parto.



Tria Parto

La Cirka Knabo



Unua Ĉapitro.

Posen — La familio Stuthejm kaj ĝia hejmo — Pri sopo, balailoj kaj doma purigado — Pri persono, kiu rajdas sur balailo kaj kiu tamen ne estas sorĉisto — Strangaj manieroj de mastrino — Avo kaj nepo — La doktoro Stuthejm iras trinkejon, sed ne kiel kutima kliento.

Posen estas provinco en la prusa ŝtato. Ĝi apartenis antaŭe al Polujo kaj post la dividado de tiu lando ĝi fariĝis en 1772^a provinco de la reĝlando Prusujo. Ĝi kuŝas inter Polujo en la oriento, la prusa provinco Nord-pruslando en la nordo, Brandenburgo en la okcidento kaj Silezio en la sudo. Posen estas ebena lando kun multaj marĉoj, sablaj kaj arbaraj regionoj. La ĉefurbo portas la saman nomon kaj kuŝas sur la rivero Warta. La urbo estas unuaranga fortikaĵo kun sepdek miloj da loĝantoj. Ĝi estas tre malnova kaj posedas multajn antikvajn konstruaĵojn, konstruitajn laŭ la gota arkitekturo. Inter ili brilis en granda beleco la gota urbdomo el la dekseca centjaro kaj la sankta Stanislas-preĝejo, la katedralo el la jaro 1725^a kaj la Raczynska biblioteko.

Apud tiu lasta staris en 1909^a vasta duetaĝo domo, en kiu loĝis la doktoro Stuthejm. En realo li loĝis nur en la teretaĝo, ĉar la supra parto de la domo utilis nur kiel dormejo.

Enirante tra la pordo ĉe la strato, oni venis en tre larĝan vastan koridoron, tiel vastan, ke oportune oni povus loĝi tie. En ĝia mezo, ĉe la dekstra flanko sin

trovis larĝa ŝtuparo kun ligna balustrado, kondukanta supren. Antaŭ kaj post tiu ŝtuparo estis po du pordoj. La unua, dekstre, malfermiĝis en la ĉiutagan ĉambron; kontraŭ ĝi troviĝis tiu de la salono. Tiu salono estis neniam uzata, sed utilis nur por gardi kelkajn belajn antikvajn meblojn, pentraĵojn kaj malnovan, sed tre bonan pianon; sed ĉar la doktoro neniam ricevis gastojn, neniu krom la loĝantoj povus diri, kiel aspektis tiu salono. Nur unu fojon semajne la ununura servistino ĝin eniris por senpolvigi la meblojn kaj la pianon.

Kiel ni diris, du pluaj pordoj estis post la ŝtuparo; la dekstra kondukis al la laborejo de la doktoro. Tiu laborejo, utilanta ankaŭ kiel akceptejo de la pacientoj, estis oblonga ĉambro, kies unu muron tute kovris centoj da boteloj kaj boteletoj kun insektoj, serpentoj kaj cetere, ĉiuj en alkoholo, starantaj unu flanke de alia, sur sepo da longaj bretoj. Ĉe la muro staris tablo kaj kvar seĝoj, unu por la doktoro, la aliaj por pacientoj. Multaj pacientoj preskaŭ neniam venis kune, ĉar la klientaro de la doktoro estis negranda, kaj se okaze pli ol unu venis en la sama tempo, tiam ili ordinare atendis en apuda atendejo post la laborejo, ĉe la sama flanko de la koridoro.

Kontraŭ la laborejo kaj atendejo sin trovis la pordo de la kvadrata kuirejo, kie preskaŭ sen interrompo laboradis du personoj, pri kiuj ni poste parolos pli detale.

Post la atendejo kaj la kuirejo kuŝis speco de remizo utilanta kiel veturilejo kaj ĉevalejo, ĉar la doktoro havis veturilon por viziti la pacientojn, kiuj estis tro malsanaj por alveni al li. El la remizo oni povis eniri la atendejon.

La veturilo regule je la deka horo en la mateno eliris kun la doktoro kaj la veturigisto; ĝi veturis tra la remiza pordo laŭ flanko strateto ĉe la dekstra flanko de la domo sur la publikan straton kaj same regule ĝi revenis

la unuan en la posttagmezo. La unuan horon la doktoro manĝis. De la dua ĝis la tria li akceptis la pacientojn kaj de la tria ĝis la sesa li refoje eliris veturilo. Reveninte de la posttagmeza veturo, li vespermanĝis kaj atendis, ĉu personoj venos, kiuj bezonus lian helpon. Ordinare post tiu tempo venis neniu kaj tial li legis tiam siajn gazetojn aŭ skribis leterojn.

Doktoro Stuthejm, kvankam edziĝinta viro, vivis jam multajn jarojn kvazaŭ estante maljuna fraŭlo. Li havis nur unu filinon, kiu en sia juneco kontraŭ la volo de la patro forkuris el la gepatra domo por edziniĝi kun servisto de bakisto. Tiu servisto nun loĝis ekster la urbo en vilaĝo, kie li posedis bakejon. Neniam li vizitis siajn bogepatrojn, ĉar la doktoro ne konsentis akcepti lin, same kiel sian filinon, ĉar neniam li volis pardoni al ŝi la mezaliancon, kiu laŭ lia ideo malhonoris lian familion. Margoto (tiel sin nomis la filino de la doktoro) havis kvin infanojn, el kiuj unu de sia tria jaro estis ĉe la avo, kiu volonte prenis sur sin la edukon de la knabo. Tiu knabeton, beleta, babilema infano, la doktoro adoris. El tiu knabo li intencis fari famulon, ĉu advokaton, ĉu kuraciston, ĉu doktoron, ĉu ion alian, se tio estus nur io fama.

La edzeco de doktoro Stuthejm estis estinta ĉiam malfeliĉa; sian edzinon li estis elektinta pro la riĉaĵoj, kiujn ŝi posedis, tiel ke oni kun rajto povus diri, ke li prenis ŝin ne pro la persono, sed pro la mono.

Fakte la doktorredzino estis bonkora kaj kompatema virino, sed ŝi havis strangajn ecojn, nome ŝi tute ne volis konversacii kun personoj de sia rango. Oni ne povis diri, ke tio estis kaprico, ĉar iom post iom tiu eco ŝin kaptis. La doktoro rigardis ĝin kiel malnormalaĵon de ŝia spirito. En la komenco li estis tre ofendata pro la konduto de sia edzino, sed rimarkinte, ke ĝi devenis de

animdeflankiĝo, li kutimiĝis al ĝi kaj en la lasta tempo jam ne tion atentis.

Sinjorino Stuthejm dum jaroj ne eliris plu la domon, sed restis en la kuirejo, kiun ŝi nur forlasis por iri en la veturilejon, se ŝi nepre devis direkti sin tien pro balailo aŭ alia necesa doma purigilo, ĉar purigilojn ŝi bezonis la tutan tagon. De la mateno ĝis la vespero ŝi laboradis kune kun la servistino, kaj ĉar ŝi estis ĉiam vestita per vestoj, el kiuj ofte gutis la akvo, la doktoro estis malpermesinta al ŝi eniri la ĉiutagan ĉambron, la laborejon kaj la atendejon, unuvorte ĉiujn apartamentojn, kie pacientoj aŭ aliaj homoj povus renkonti kaj vidi ŝin.

La doktoro, kvankam senceŝe laboranta por siaj pacientoj, estis ĉiam vestita per bela nigra kostumo, sur kiu oni neeble povis rimarki la plej malgrandan polveton aŭ makuleton. Kiam li eliris, li ĉiam portis altan silkan ĉapelon, tiel ke li aspektis tre grava, des pli grava, ĉar li havis neordinare dikan ventron, tiel dikan, ke, kiam li marŝis, li apenaŭ povis vidi la pintojn de siaj brilantaj ŝuoj. Kiel multaj aliaj dikventruloj, li havis eksciteman karakteron kaj koleriĝis pro la plej malgranda kontraŭstaro aŭ malhelpo, kiun li renkontis; sed li tre baldaŭ forgesis sian koleron, por refariĝi la plej afabla kaj aminda persono en la mondo. Tial ne estis strange, ke liaj subitaj ekboloj de kolero tute ne efikis je tiu, kiu lin konis. La samejmanoj jam tiel kutimiĝis al ili, ke neniu ofendiĝis pro ili, kaj eĉ la juna servistino, kiu en aliaj okazoj estis timema knabino, aŭskultadis la fluon da riproĉoj de la doktoro, kvazaŭ ŝi estus surda je ambaŭ oreloj; ŝi ja sciis antaŭe, ke la mastro kvin minutojn poste refoje ridos kaj jam estos forgesinta pri sia kolero.

La doktoro havis nek barbon nek lipharojn, sed pomforman kapon kun malmultaj jam tute grizaj haroj, kiuj staris sekte sur la verto. Lia frunto estis malalta

kaj neniam sulkiĝis, kiel ajn kolera li estis. Li havis rondajn blujajn okuletojn kaj lia duobla dika mentono, kiu kovris lian tutan gorĝon, tremetadis senceŝe, kiam li sin movis antaŭen per la mallongaj rapidmovaj kruroj. La koloro de lia vizaĝo estis ĉiam ruĝeta, sed fariĝis ruĝega, kiam io ĝenis aŭ malhelpis aŭ kontraŭstaris lin.

Estis somero de la jaro 1909^a kaj la dua horo en la posttagmezo.

La doktoro sidis en la laborejo kaj estis skribanta leteron. Pro la dikeco de sia ventro li sidis sur angulo de la seĝo. Spiregante (li ĉiam spiregis, kiam li devis klini sin) li skribadis kun lipoj premitaj unu sur la alia, kiel de laboristo, kiu kun peno kaj per streĉitaj fortoj faras malfacilan laboron. La pinto de lia lango tamen faris al si la vojon inter ili kaj montriĝis kiel malgranda peceto da sangruĝa viando, kiu sin movis de unu buŝangulo ĝis la alia laŭ tio, ke la plumo faris la movadon de maldekstra al la dekstra flanko de la letero. La langopinto tiamaniere ĉiam montris, kie sin trovas la plumo sur la papero, kaj la plumo sen eraro ĉiam diris, kie estas la langopinto.

La doktoro skribis, la plumo marŝetis sur la letero kaj la langopinto sin ŝovis inter la premitaj lipoj de la skribanto, kaj jam multfoje tiuj du samvojaĝantoj trairis la saman vojon de maldekstre dekstren. Pacientoj ne estis venintaj kaj la doktoro uzis la okazon por sia korespondado. Li ĵus finis paĝon, metis la plumon sur la tablon flanke de la letero kaj samtempe la langopinto retiriĝis. La doktoro eligis longan sopiron, rektiĝis sur la seĝo, tiris la naztukon el la poŝo kaj forviŝis la ŝviton de la frunto, ĉar li ŝvitis pro streĉeco.

En tiu momento modesta frapo sur la koridora pordo montris, ke modestulo deziras eniri.

— Eniru!

Eniris la juna servistino, malgrasa, sed sanaspekta knabino deksexjara. Ŝi aliris al la doktoro, dirante:

— Du markojn, mi petas, doktoro.

— Du markojn? ... Por kio?

— Por aĉeti sapon.

— Sapon!? ... Refoje aĉeti sapon!? ... Antaŭ-hieraŭ mi ankaŭ donis du markojn por sapo, kial refoje nun?

— Tiu sapo foruziĝis —, respondi kviete la servistino.

La doktoro ekkoleris kaj spiregante li diris plue, dum lia vizaĝo fariĝis ruĝa kiel tomato:

— Ĉu vi ne hontas refoje peti du markojn pro sapo? Vi do ne manĝas sapon? ... Ĉi tiu sapo, sodo kaj cetere malriĉigos min.

— Sinjorino bezonas sapon por purigi la kahelojn de la kuirejo.

— Ĉu tiu malbenita purigado estas absolute necesa?

— La sinjorino diras, ke jes.

La servistino post tiu simpla kaj kvieta demando staras kun etendita mano antaŭ la doktoro; ŝi scias jam antaŭe, ke li donos la petitan monon.

— Nu, jen ... , prenu la du markojn por via sapo kaj foriru je la diablo!

La servistino kvazaŭ ne aŭdis tiun ordonon, ĉar ŝi restis staranta.

— Sinjorino bezonas ankaŭ novan balailon, kiu kostas ...

— Mil diabloj, ... iru for, ... ŝi uzu la malnovan!

La servistino ne atentis tiun duan ordonon kaj diris kviete:

— Ŝi ne povas uzi ĝin, doktoro.

— Ĉu ŝi ne povas? ... , ne povas? ... Kial ŝi ne povas?

— Car Teodoro rajdas sur la malnova balailo en la koridoro, kaj li ne volas cedi ĝin al sia avino.

La kolera humoro de la doktoro subite foriĝis. Li frapis al si la genuon per la mano, laŭte ekridegis kaj diris:

— Ha, ha, ha!... Teodoro rajdas sur ĝi!... Ha, ha, ha!... Jen kio estas ĝojiga... Ha, ha, ha!... Nu, lasu lin rajdi —, kaj ŝovante trian markon en la manon de la servistino, li diris plue:

— Jen unu marko por nova balailo.

La doktoro refoje ekskribis, aperigante la pinton de la lango, kaj la servistino kviete eliris kun la mono. En la koridoro ŝi ekridis al Teodoro, kiu fiermiene rajdis sur balailo, dum li ŝvingis bastoneton. Li estis dika flavhara knabo kun helebluaj okuloj kaj ruĝaj vangoj.

— Ŝi ne ekhavos mian ĉevalon —, li diris arogante. — Mi volas rajdi; se ŝi volas forpreni ĝin, mi iros plendi ĉe aĉjo.

Aĉjo estis la avo, la doktoro, kiu tiel dorlotadis sian nepon, ke ĉi tiu estis kvazaŭ la ĉefo en la domo. Spite tio, li estis aminda knabo, ĉiam gaje ludanta aŭ kantanta kaj neniam malbonhumora, se oni nur ne malhelpis aŭ ĝenis lian ludadon. Fiere kun supren turnita nazo li galopis post la servistino, kiun li sekvis en la kuirejon, kie la sinjorino diligente laboradis.

Starante ĉe plena sitelo, ŝi jus eltiris el ĝi grandan viŝtukon, el kiu longaj strioj da akvo elfluis sur la kahelojn.

Vidante ŝin tie ĉe tiu laboro, neniu supozus, ke tiu virino estas la edzino de doktoro, tiel malzorgeme ŝi estis vestita. Ŝiaj multe tro grandaj botetoj estis preskaŭ eluzitaj, escepte la plandoj, kiuj sufiĉe bone protektis la piedojn kontraŭ la ĉiuloken libere fluanta akvo.

Sur la kapo ŝi portis blankan tufeton ligitan sub la mentono per du ŝnurforme torditaj rubandoj. Estis preskaŭ neeble distingi, kiujn ceterajn vestojn ŝi surhavis, ĉar larĝa longa sako anstataŭanta ordinaran antaŭtukon premkovris preskaŭ ŝian tutan korpon de la brusto ĝis la botetoj.

La doktoredzino estis kvindekjara negranda virino kun maljunaj trajtoj. Ĉar ŝi neniam eliris, ŝia vizaĝkoloro tute flaviĝis. Vidante ŝin laboradi, ĉiu kredus, ke ŝi estas sesdekjara laboristino el la plej maleminenta popola kvartalo de la urbo. Spite al ŝiaj strangaj kutimoj ŝi harmoniis kun ĉiuj, kiuj ŝin konis, ĉar ŝia edzo jam ne kontraŭstaris ŝiajn agmanierojn, sed lasis ŝin fari. Ili vivis kiel nuraj samhejmanoj; ŝi laboradis sen ceŝo kaj laŭdezure en la kuirejo, kaj ĉar ŝi neniam sin montris en la ceteraj apartamentoj de la domo, li ne sin okupis pri ŝi kaj atentis nur siajn pacientojn.

— Anjo, mi estas ulano —, diris Teodoro, galopante kun ŝia balailo en la kuirejon, kie la avino ĵus eltordis la viŝtukon, kiun ŝi estis tirinta el la sitelo.

— Jes, karulo, vi estas ulano.

— Kaj mia ĉevalo neniam laciĝas —, diris plue la knabo, saltante tien kaj reen, dum la akvo, kiu ĉiuloke fluis per longaj strioj sur la planko, disŝprucis tiel alte sub liaj piedoj, ke liaj ŝtrumpoj tute malsekiĝis.

— Atentu Teo, vi malsekiĝos viajn ŝtrumpojn.

— Ili ja resekiĝos, Anjo... Kien eliris Maria? — li subite demandis, vidante, ke ĉi tiu ne estas plu en la kuirejo.

— Maria eliris por aĉeti novan balailon.

— Ha!... novan balailon!

— Jes, ĉar vi ne volas cedi al mi la alian.

— Ĉu ŝi revenos baldaŭ?

— Kompreneble, mi ja bezonas la balailon.

— Cu oni povas rajdi sur du ĉevaloj, Anjo?

SinJORINO StutHEJM, antaŭsentante, ke Teo intencas ludi kun la du balailoj, respondis, altigante la manojn kvazaŭ pro surprizo:

— Kia malsaĝa demando de tia saĝa knabo!... Ĉu oni iam vidis ulanon rajdi sur du ĉevaloj!?

— Sed ĉu ulano povas rajdi sur du?

— Eble li povas, sed rajdante sur du, li ne povus ŝvingi la lancon, kaj vi, kiel kuraĝa ulano, volas tamen ŝvingi ĝin, ĉu ne vere —?

Rimarkante, ke ŝia argumento efikis sur la knabon, ŝi diris plue:

— Vi ja ne volas, ke la homoj mokridu vin.

Teo pripensis momenteton, kaj dum lia avino sin klinis por ekpurigi la kahelojn per la viŝtuko, li diris:

— Sed mi povas rajdi sur nova ĉevalo, ĉu ne vere, Anjo?

— Novaj ĉevaloj aŭ junaj ĉevaloj estas danĝeraj, ili dejetas la ulanojn.

— Mi ne timas novajn ĉevalojn, mi volas rajdi sur la nova balailo —, kaj jetante la malnovan en la sitelon, el kiu diŝprucis la akvo, li galopis al la veturilejo por rigardi, ĉu Maria baldaŭ revenos. Li ne bezonis atendi longe; apenaŭ la servistino aperis, li tuj sin jetis sur la novan balailon kaj ŝirante ĝin el ŝiaj manoj, li ekrajdis sur ĝi kaj galopadis al la koridoro kaj de tie en la laborejon de la doktoro, kiu ankoraŭ ŝidis skribanta sur la angulo de la ŝego.

— Aĉjo, mi akiris novan ĉevalon, rigardu!

La langopinto de la doktoro, kiu ĵus atingis la dekstran buŝangulon kaj estis saltonta al la maldekstra, reiriĝis en la buŝon de la skribanto.

— Novan ĉevalon!?! — La doktoro metis la plumon post la orelon kaj rigardis al sia nepo, kiu staris antaŭ li.

— Ha, la novan balailon!... Kaj kie estas la malnova?

— Tiu uzas Anjo por balai la kuirejon...; ŝi diris, ke ulanoj ne rajdas sur du ĉevaloj, ŝi do povas uzi la alian.

La doktoro ridis, kaj starigante la knabon inter siaj genuoj, li kisis lin sur la dikaj vangoj, tiam li diris:

— Vi estas brava ulano, Teo, ... brava ulano!

— Tion diris ankaŭ Anjo.

— Ĉu vere? — La doktoro ŝovis la okulvitrojn alten sur la frunton, kie ili restis kvazaŭ algluitaj. —

— Ĉu vere!? — li ripetis.

— Jes, sed ŝi volis kredigi al mi, ke novaj ĉevaloj dejetas la ulanojn.

La doktoro ridegis tiel, ke lia malsupra mentono tremetadis same kiel lia dika ventro.

— Sed ĝi ne forjetos min... la nova ĉevalo.

— Ho ne... ha, ha, ha!... Vi estas ja tro brava ulano, kiun neniu ĉevalo povus dejeti, ĉu ne vere?

Teodoro estis respondonta, sed laŭta frapo sur la pordo kondukanta al la atendejo, fermigis la parolontan buŝon.

— Eniru! — diris la doktoro, forpuŝante de si la knabon. Eniris strata bubo; li spiregis pro laceco kaj ĉio montris, ke li estis kurinta per ĉiuj fortoj.

— Nu, knabo, kio estas?

— Doktoro... ĉu vi... bonvolus... veni... ĉe Majer... en la drinkejon?

— Kiu estas malsana?

— Fremdulo, li estas eble mortanta.

— Kio do okazis? — La doktoro surmetis la altan ĉapelon kaj estis preta sin direkti al la drinkejo.

— Mi ne scias —, respondis la bubo. — Mi preteriris, kiam subite Majer alkuris kaj petis min tuj kaj

rapide kuri al vi pro homo, kiu danĝere malsanigis kaj eble estas mortanta.

— Mi tuj iros! — La doktoro metis la okulvitrojn en la ujon, kaj preninte kofreton kun instrumentoj, kiujn li eble uzos, li trairis la atendejon, la veturilejon kaj tuj poste liaj rapidmovaj kruroj portis lin al la „Ora Serpento“ de Majer.

Dua Ĉapitro.

**La Ora Serpento — Pri ia, kiu vidas sovĝaju bestojn —
Morto de burleskulo — Pri cirka veturilo kaj ĝia enhavo.**

Malmultajn minutojn malproksime de la doktora loĝejo staris en flankstrateto la drinkejo „Ora Serpento“ de Majer. Ĝi estis drinkejo vizitata nur de laboristoj, kiuj povis aĉeti tie grandan glason da biero aŭ glaseton da brando por ses pfenigoj. Preskaŭ ĉiuminute en la tago, jam post la sepa en la mateno ĝis malfrue en la nokto, sin trovadis en tiu „Ora Serpento“ vizitantoj.

En la tempo, pri kiu ni parolas, regis en la „Serpento“ la plej granda malordo imagebla. Kelkaj seĝoj estis renversitaj same kiel unu tablo; multaj glasoj, kelkaj el ili rompiĝintaj, kuŝis dise sur la planko, kaj ĉe la muroj kaj antaŭ la bufedo staris deko da klientoj, dum ĉiusekunde eniris aliaj, logataj de neordinara bruo, kiun la preterpasantoj sur la stratoj povis aŭdi en la „Serpento“. En la mezo de tiu haoso de glaspecetoj, biero, brando kaj renversitaj mebloj staris du fortaj laboriste vestitaj viroj, kiuj retenis trian viron, kiu kondutis kiel frenezulo kaj piedfrapadis ĉiufanken. Mortepala, kun ŝaŭmkovritaj lipoj, la okuloj plenaj je sango, li blekis kiel sovaĝa bruto. Per la forto de la frenezeco li klopodis liberigi sin el la manoj de la viroj, kiuj tenis lin per unuigitaj fortoj. Liaj malordigitaj haroj disfalis sur lian frunton, kaj liaj vestoj estis

preskaŭ disŝiritaj en ĉifonojn. Subite li staris kvazaŭ alnajlita al la planko, la okuloj elstaris el lia kapo kaj seninterrompe li fikse rigardis al angulo de la drinkejo, dum tremado trakuris lian tutan korpon. Per raŭka voĉo li kriis:

— For de tie!... Tiu malbenita besto estas atakonta min... Tordu al ĝi la kolon, por ke ĝi min ne ataku!... Mortbatu ĝin do!... Ĝi venas! ĝi venas!...

— Tenu lin firme! — kriis unu el la du viroj al sia kunulo, kiu tute kiel li, nur kun penego povis reteni la brakojn de la furiozanto.

— Rekvietigu do! — li diris al la piedbatanto. — Vi nur imagas tion, tie ne sidas besto.

— Jen!... Jen!... Rigardu!... Ĉu vi ĝin ne vidas!?... Jen la bruto refoje estas saltonta al mi!... Reteuu ĝin, la malbenitan bruton, ĝi estas rabia! — kaj la viro piedfrapadis kvazaŭ li volus defendi sin kontraŭ la besto de sia imago. La ĉeestantoj scivolaj parolis intermikse:

— Li estas nur ebria —, diris unu.

— Kio fariĝis? — demandis virino, kiu, enirinte, ekstaris kun etendita kolo post la aliaj rigardantoj, klopodante vidi trans iliajn ŝultrojn.

— Frenezulo, kiun atakis la nervoj —, grimacridis unu el la aro.

— Tio lin mortigos —, diris terurite unu el la antaŭe starantoj al sia malantauŭlo.

— Oj, ne timu tion, li rekonsciigos baldaŭ —, respondis alia.

— Irigu do iun por venigi kuraciston —, diris unu el la viroj, kiuj tenis la ebrulon. — Rigardu do, mi ne povas plu lin reteni.

La malordo ĉiminute pligrandiĝis. Kelkaj virinoj

laŭte timekkriis kaj tra tio sonis basa voĉo de viro, kiu vokis:

— Eksilentu do!

— Mortigo! — subite ekkriis unu el la du viroj, kiam la furiozulo kun neatendita ektiro liberigis sian dekstran manon kaj per ĝi ekpremis al li la gorgon.

La virinoj volis forkuri, sed ne povis returni sin pro la homamaso, kiu iom post iom plenigis la drinkejon.

— Mortigo!... Helpon...! — stertoris la atakito, al kiu la fera mano de la ebrulo pli kaj pli fermpremis la gorgon.

Subite silentiĝis la blekado; la manoj de la furiozulo senfortiĝis, li ne plu kontraŭstaris, lia kapo kliniĝis antaŭen kaj dum profunda ĝemego siblante, sed laŭte eligiĝis el lia brusto, li falis kiel sako sur la plankon.

Ankoraŭ kelkajn fojojn tremis lia korpo, la okuloj elstaris sangaj el la kapo, la lango blue ŝvelinta pendis sur la malsupra lipo, la naztruoj plilarĝiĝis momenton kaj tuj poste kuntiriĝis, donante al la nazo la karakterizan pintan formon, kiu estas la aŭtaŭsigino de la morto. Ĉiuj trajtoj malstreĉiĝis, la okuloj rompiĝis, stertorante li elspiris la lastan spiron kaj flaveblanka koloro sin etendis sur lia vizaĝo, dum lia korpo sterniĝis sur la planko kaj poste restis kuŝanta senmove.

La ĉirkaŭstarantoj pli kaj pli moviĝis antaŭen kun retenita spiro. Stranga estis la kontrasto de la subita morta silento, kiu regis en la drinkejo, kontraŭ la ĵusa terura bruego.

La drinkejestro, kiu dum longa tempo faris sian eblon kaj sukcesis kvietigi la homojn, fine eliris por rigardi, ĉu la kuracisto venas; li ne bezonis atendi longe, ĉar la marŝetanta dikventrulo atingis lian domon en la momento, kiam lia nova paciento sterniĝis. Ĉe la alveno de la doktoro la homoj tuj faris lokon, por ke

li povu ekzameni la mortantan viron. Li sin klinis kun peno super li, aŭskultis atente, ĉu li spiras ankoraŭ, tuŝis lian bruston kaj gravmiene diris:

— Li mortis —, tiam sin turnante al Majer, li demandis:

— Kio okazis kun tiu viro?... Ĉu vi donis al li tiom da brando? Li mortis pro deliro.

— Li eniris mian drinkejon antaŭ unu horo, doktoro, kaj ŝajne li tiam ne estis ebria. Li trinkis nur du glasojn kaj tiam subite ekkondutis tiel strange, ke ŝajnis al mi, ke li perdis la prudenton. Li parolis sensensajojn, iris tien kaj reen en la drinkejo kaj postulis trian glason da brando, kiun mi tamen rifuzis doni al li. Tiam li ek-koleris kaj tirinte tranĉilon el la poŝo, li jam estis atakonta min, sed feliĉe tiuj du viroj retenis lin. La atako de deliro fariĝis pli kaj pli forta, ĝis kiam li falis kaj mortis.

La doktoro aŭskultis tion kun atento, ĉiam rigardante la mortinton.

— Kiu li estas? — li demandis post momento.

— Mi kredas, ke li estas burleskulo aŭ rajdisto de cirko, ĉar li alvenis en urbo en cirka veturilo.

— Kie staras nun tiu veturilo?

— Sur la strato, proksime de mia domo.

— Ĉu li ne havas kunvojaĝanton?

— Mi kredas, ke ne, ĉar li petis al strata bubo gardi dum momento la ĉevalon.

— Hm! — La doktoro eksilentis, pripensis la aferon kaj tiam demandis plue:

— Sed kion ni nun devos fari kun la mortinto?

— Mi ne scias; ĉiuokaze li ne povos resti en la „Serpento“.

— Kompreneble, li ne povos..., oni devos transporti lin ien..., sed kien?

— Neniu konsentos akcepti ĉe si tian malvivulon; sed oni povos transporti lin al la malsanulejo, kaj...

La doktoro denove ekpripensis. Subite ideo envenis en lian kapon, kaj li diris:

— Portu lin en la veturilon kaj veturu lin en mian veturilejon; mi skribos al la urbestro kaj aranĝos ĉion.

La du viroj, kiuj antaŭe retenis la delirulon, sek-vate de ĉiuj ĉirkaŭstarantoj portis la kadavron al la veturilo.

La pordo estis malfermita; neniu estis interne, oni vidis nur kelkajn malpurajn meblojn kaj ĉe la posta internā flanko du pordetojn de fermita ŝranko. Sub la tablo, staranta ĉe unu flanko sub fenestreto, kuŝis speco de matracoj; tie sekve estis la lito de la mortinta viro.

— Metu lin tien —, ordonis la doktoro, montrante la matracon, kaj refermu la pordon de la veturilo.

La viroj obeis.

— Nun antaŭen al mia domo —, ordonis plue la doktoro.

La bubo, kiu ĝis tiam tenis la bridon de la ĉevalo, ekmarŝis, tirante la kapon de la besto, kaj dek minutojn poste la veturilo kun la kadavro staris en la veturilejo de la resanigisto; la homoj, kiuj scivole sekvis ĝis tie, disiris, ĉiu sian vojon, kaj baldaŭ nenio sur la strato montris, kia terura dramo ĵus finiĝis en la urbo Posen,

Tria Ĉapitro.

Mikelo — En la veturilejo de la doktoro — La stomako de trinkulo — La cirka knabo — Neatendita kliento — Transformiĝo de malpura cigano en belegan knabon.

Vesperigis. Teodoro dormis, Maria sidis kun la doktoredzino en la kuirejo ĉe la tablo, kie ambaŭ flikis ŝtrumpojn, kaj la doktoro estis en la laborejo. Li sidis sur angulo de sia seĝo ĉe la skribotablo kaj ekzamenis kelkajn tranĉiletojn kaj ĥirurgiilojn. Flanke de li staris lia veturigisto Mikelo, vera giganto kun stultega vizaĝo.

Mikelo estis sesdekjara viro, kiu jam dudek jarojn servis la doktoron. Li estis en ĉio la malo de sia mastro: Neniam Mikelo ekkoleris, nek ekkoleretis, neniam li marŝis rapide; ĉiam li estis kaj restis la sama kvieta Mikelo, kiun nenio ajn povis ŝanĝi, malkvietigi aŭ kortuŝi; tamen li estis bona kaj honesta viro. Mikelo vivis sian trankvilan ekzistadon, laborante kviete por servi sian mastron, kiun li obeadis en ĉio, kaj por prizorgi la ĉevalon kaj la veturilon.

La doktoro finis la ekzamenon de la tranĉiletoj, metis ilin kun la ceteraj ĥirurgiiloj en la kofreton kaj ekstarante diris:

- Mikelo, lumigu al mi.
- Kien, doktoro?
- Veturilejon.

Mikelo prenis lampeton (li faris tion tre singardeme, kvazaŭ li timus, ke lia giganta mano rompos ĝin tuj post la unua ektuŝo) kaj iris per longaj, sed malrapidaj paŝoj

al la nomita loko kaj lin sekvis kun rapidaj paŝetoj la doktoro, kiu kunportis la kofreton, sitelon kaj blankan viŝtukon.

— Malfermu la pordon de la cirka veturilo, Mikelo, Mikelo obeis.

— Metu la lampon tien... — La doktoro montris lokon en la veturilo apud la pordo, ĉe kiu li staris.

— Prenu la kadavron ĉe la piedoj kaj tirtrenu ĝin tien ĉi...; atentu la lampon, ne renversu ĝin!... Bone!

Mikelo posteniris kaj la doktoro, staranta ekster la veturilo, disigis la du el la veturilo pendantajn krurojn de la kadavro kaj ekstaris inter ilin, tiam li metis la sitelon kaj la kofreton flanke de la kadavro, kaj malferminte la kofreton, li elprenis tondilon.

La lampo lumigis flave, sed sufiĉe klare la internon de la veturilo kaj la kadavron, kies grimacanta buŝo aspektis teruriga.

Mikelo vidis, ke la doktoro sternis la blankan tukon sur la kapon de la mortinta viro.

— Kial li faras tion? — pensis Mikelo; — tiu kadavro ja ne timigos min —, kaj indifereente li rigardis kaj atendis paciencie tion, kio estis okazonta; li tamen jam divenis, kion estis faronta lia mastro.

La doktoro debutonumis la veŝton de la mortinto kaj tratanĉis lian ĉemizon, tiel ke liaj brusto kaj ventro nudiĝis. Li palpetis ilin.

— Kia viro! — diris al si la doktoro. — Kia fortulo!... domaĝe, ke li tiel ruinigis sian sanon; li povus vivi cent jarojn... domaĝe! domaĝe!

Dirante tion, li prenis tranĉileton kaj faris profundan, longan tranĉaĵon en la ventro de la kadavro.

Mikelo kviete rigardis kaj vidis, ke la dekstra mano de lia mastro malaperis en la ventron kaj ke li elprenis el ĝi la stomakon.

— Kia stomako! — pensis la doktoro. Tiam li ekzamenis ĝin ĉiuflanke, tenis ĝin super la sitelo kaj farinte tranĉaĵon en la malsupra flanko de l' stomoko, li lasis elflui la enhavon, tiam li turnis la eksterajn internen, metis la sitelon ekster la veturilon kaj komencis ekzameni la stomakon.

En tiu momento lia atento estis kaptata de obtuza tuso, venanta el la veturilo. Surprizite li aŭskultis, fluŝtrante al si mem:

— Kio estas tio?

Mikelo ankaŭ estis aŭdinta la neatenditan tuson, sed li diris nenion; lin surprizis nenio.

Dua tuso aŭdiĝis.

— Ĉu vi aŭdis tion, Mikelo? . . . Kio ĝi estas? — demandis la doktoro.

— Tuso —, kviete respondis Mikelo.

La doktoro metis la stomakon en la sitelon, kovris la nudan parton de la kadavro kaj refoje aŭskultis. Post la pordetoj en la veturila fundo io moviĝis. Io knaris, la pordetoj ĵete malfermiĝis, kaj inter ili en malluma liŝranko ekaperis la kapo de knabo.

— Tio estas knabo —, kviete diris Mikelo.

La konsternita doktoro staris inter la pendantaj kruroj de la kadavro kaj rigardis al la knabo, kvazaŭ li vidus fantomon.

Ĉielo, kie mi estas? — demandis la knabo per malforta voĉo.

— Ĉe doktoro Stuthejm —, kviete respondis Mikelo.

— Ĉe doktoro? Kio okazis kun patro?

— Mortis —, same kviete respondis Mikelo.

— Eksilentu, malsaĝulo! — ekkriis la doktoro, turnante sin al la veturigisto.

— Ĉu li mortis!? — demandis la knabo. Li faris tiun demandon laŭ maniero, kiu montris, ke la sciigo lin

ne malkvietigis; ŝajnis eĉ, ke la respondo de Mikelo liberigis la knabon de peza ŝarĝo.

— Ĉu vi dormis tie? — informiĝis la doktoro.

— Jes, sinjoro, feliĉe mi dormis, ĉar mi ne povis dormi dum tri tagoj.

— Ĉu vi estas malsana?

— Mia kruro rompiĝis kaj mi suferis pro febro.

— Kiam rompiĝis via kruro?

— Antaŭ kvar tagoj.

— Mikelo, reŝovu la kadavron sub la tablon —, ordonis la doktoro.

Mikelo kviete rampis en la veturilon kaj obeis la ordonon, tiam li same kviete lasis sin gliti sur la ŝtonan plankon de la veturilejo kaj kviete atendis novajn ordonojn.

— Helpu al mi eniri la veturilon —, diris la doktoro, portu la sitelon kaj la kofreton en mian laborejon kaj revenu tuj, sed rapidu. Mikelo helpis kaj foriris kun la nomitaj objektoj. La veturilo skuigis, kiam la dika doktoro trairis ĝin, kaj li ne rimarkis, ke unu el liaj piedoj fortiris la tukon de la kadavro. Venante antaŭ la malfermitajn pordetojn, li vidis, ke la knabo sidas sur mizera, malpura litaĉo. Liaj karbenigraj okuloj brilis kiel fajro, kiam ili sin fiksas sur la dikulon, kiu eksidis sur malalta sendorsa seĝo tuj apud la litaĉo.

— Mi bedaŭras, mia infano —, diris la doktoro, — sed mi devas sciigi al vi, ke via patro mortis.

La knabo dum momento rigardis al la parolinto, tiam li diris malrapide kaj nelaŭte:

— Nu, li ja ne batos min plu.

— Ĉu li vin batis!? — La doktoro ekkoleris.

— Jes, precipe en la lastaj tagoj.

— Kial!?

— Ĉar mia kruro rompiĝis.

— Tio tamen ne okazis per via kulpo?

— Li diris, ke mi estas kulpa, ĉar mi falis pro nesingardemo.

— Ĉu vi falis el la veturilo?

— Mi falis de trapezo . . . , mi estas gimnastikisto, sed ĉar mi ne povis plu labori pro mia rompiĝinta kruro, la direktoro min eksigis.

— Kiu direktoro?

— De la cirko.

— Via patro tamen povus labori.

— Li! . . . Li jam ne laboris, . . . nur ebriiĝis.

— Ĉu li jam longe estas trinkulo?

— Jes, sinjoro, li ĉiam estis ebria, kaj se li ne estis tia, tiam li dormis . . . aŭ min batis —. La knabo eksilentis dum momento, tiam li diris plue:

— Sed tion li ne povas plu.

La doktoro prenis la manon de l' knabo por palpi al li la pulson.

— Kiel vi sentas vin nun? — demandis li.

— Iom pli bone, sed mi soifas.

La doktoro rigardis post sin por vidi, ĉu la veturigisto estas revenanta, sed Mikelo ne estis tie.

— Kie estas Apolo? — demandis la knabo.

— Apolo!?

— La ĉevalo.

— Ho; ĝi staras en la ĉevalejo ĉe la mia.

En la veturilejo sonis la pezaj paŝoj de la revenanta servisto.

— Mikelo, venu ĉi tien! — ordonis la doktoro.

Mikelo obeis kaj refoje la veturilo skuiĝis sub la pezaj piedoj de la giganto.

— Montru al mi vian rompiĝintan kruron, mia knabo, — diris la doktoro.

La knabo malrapide aperigis la kruron el sub la li-

totuko, kaj dum la doktoro ĝin ekzamenis, li forprenis la bandaĝon kaj diris:

— Kiu almetis tiun bandaĝon?

— Mia patro.

— Ĉu li ne venigis kuraciston?

— Ne, sinjoro.

— Kial ne? — demandis plue la doktoro, ruĝigante pro kolero.

— Ĉar tio kostus tro multe.

— Estas honto! — ekkriis kun indigno la doktoro, kaj li palpatis la kruron, kiu estis ŝvelinta en terura maniero.

— Ĉu tio doloras al vi?

La knabo mordis al si la lipojn pro doloro, tiam li respondis:

— Jes, sinjoro.

— Kompreneble; la osto rompiĝis kaj via patro ne vokis ĥirurgon por reĝustigi ĝin. . . . Rigardu, la kruro estas tute blua, preskaŭ nigra. . . . Ĉu vi estas do-
lortima?

La knabo, pensante pri la multaj batoj, kiujn al li jam donis lia patro, respondis:

— Mi kredas ke ne, sinjoro.

— Nu, ni vidos; mi devos denove rompi la oston por poste reĝustigi ĝin, sen tio vi perdos la kruron.

— Ĉu la kruron?

— Certe, sed mi esperas, ke ĝi estos resanigebla; mi faros mian eblon —, kaj sin direktante al Mikelo, li diris plue:

— Mikelo, portu lin zorge kaj singarde en la salonon kaj metu lin sur la kanapon; mi lumigos.

Mikelo prenis la knabon sur la brakojn, kiel li prenis plumon, kaj post kiam li malsupreniris la veturilon, la doktoro lin sekvis.

La knabo jetis unu solan rigardon sur la korpon sub la tablo.

La mortinto kuŝis sur la dorso, la nigraj, sed jam griziĝintaj haroj senorde dispendis sur la flava frunto, ĉar ĉapo aŭ ĉapelo malestis; lia buŝo estis larĝe malfermita, kvazaŭ li oscedus kaj la ŝvelinta lango elstaris kiel malpura blankiĝinta viandpeco sur la dentoj de la malsupra makzelo; la vitrecaj ruĝaj okuloj fikse rigardis supren al la tabla tabulo super li. Kun abomeno la knabo deturnis la vizaĝon por eviti la teruran vidaĵon.

— Li tamen neniam plu min batos —, li pensis, kaj konsciante, ke li mem estas nun ĉe bonaj homoj, li sin premis al la veturigisto, kiu kun zorgo portis lin el la veturilo, tra la atendejo kaj koridoro en la salonon, kie li metis lin sur la kanapon. La doktoro marŝetadis post ili kun la lampo, kiun li starigis sur tableton apud la kanapo; tiam li fermis la pordon kaj genufleksis antaŭ sia nova paciento, kies malsanan kruron li refoje, sed pli atente rigardadis kaj pripalpadis.

— Tenu lin ĉe la ŝultroj, Mikelo —. Dirante tion, li okulumis al la giganto, kiu, tuj komprenante lin, ek-kaptis la ŝultrojn de la knabo tiel, ke ĉi tiu neeble povis plu sin movi. La doktoro ambaŭmane ĉirkaŭprenis la kruron kaj kunpremante la lipojn, li per unu fortega ekskuego ĝin rompis.

La knabo ne estis montrinta timon al doloro; lia volo, ne montri timon, estis tamen malpli forta ol la doloro, kiun al li kaŭzis la ekskuego de la hirurgo, ĉar dum liaj trajtoj en terura maniero kuntiriĝis, li eligis penetrantan ekkrion de doloro, tiel penetrantan kaj laŭtan, ke ĝi ekvekis ĉiujn ĉojn en la domo. Ĝi estis tuj sekvata de du aliaj pli mallaŭtaj ekkrioj el la kuirejo.

— Kvietiĝu, knabo . . ., jam finiĝis —, diris la dok-

toro, kiu kore kompatis la suferanton, — nun kuŝu kviete, mi denove bandaĝos, kaj ĉio espereble fariĝos bona. Grandaj larmoj rulis sur la vangoj de la kompatinda knabo. Mikelo, kiu ne plu tenis lin, staris apude kiel kolono el salo, kvazaŭ nenio eksterordinara estus okazinta; li tiel kutimiĝis al tiaj ekkrioj, ĉar li ĉiam helpis, kiam lia mastro operaciis, ke li jam ne ilin atentis.

La doktoro almetis la novan bandaĝon kaj preskaŭ estis fininta tiun laboron, kiam tre malrapide la pordo malfermiĝis kaj enrigardis du kapoj, unu super la alia.

— Kio okazis? — demandis mallaute la doktoredzino.

— Kruro rompiĝis —, kviete respondis Mikelo.

— Ĉi tie!?

— Jes.

— Ni ektimis pro la ekkrio, precipe ĉar ni ĝin aŭdis tie ĉi kaj ne en la laborejo; ni pensis ke...

— Maria —, tiel interrompis la doktoro, — alportu tuj pelvon kun akvo, kaj sapon kun pura viŝtuko.

La kapoj malaperis kaj la doktoro, eksidinte ĉe la knabo, demandis:

— Kiel vi nun sentas vin?

— Pli bone, sinjoro; mi dankas.

— Kiel estas via nomo?

— Stanislas.

— Kaj via familia nomo?

Stanislas pripensis, tiam li respondis:

— Sur la afiŝoj de la ĉirko, mia nomo estas Stanislas Mareau^{*)}.

— Stanislas Mareau!... Tio estas stranga, ĉar Stanislas estas pola, kaj Mareau estas franca nomo... Ĉu vi estas Polo?

^{*)} Elparolo: Maró.

— Mi ne scias, sinjoro.

— Kiun lingvon parolis via patro?

— Ordinare li parolis kun mi pole, sed ni ambaŭ povas paroli germane, ĉar ni ofte vojaĝis en Germanujo.

— Ĉu via patro neniam laboris en la cirko?

— Li laboris tie, kiam mi estis ankoraŭ tre juna; li tiam estis gimnatikisto, sed post kiam li instruis al mi, mi sola laboris.

— Kaj li faris nenion?

— Li nur drinkis kaj...

La knabo eksilentis, ĉar eniris Maria kun akvo, sapo kaj viŝtuko. Ŝi rigardis al Stanislas scivole kaj ekridetis al li.

— Pretigu buljonon —, ordonis la doktoro, kaj Maria eliris por obei.

— Nu, kion li faris ankoraŭ? — demandis la doktoro.

— Li min batis.

— Estas honto! — diris la ĥirurgo ruĝigante, ĉar li denove ekkoleris; tiam li komencis lavi la malpuran vizagon de Stanislas.

— Kombilon, Mikelo! — li ordonis post momento.

La veturigisto foriris kaj revenis tuj kun kombilo. La haroj de la knabo tamen estis en tia malordo, ke ili distaris kiel nigra balailo de araneaĵoj.

— Mi mem prefere aranĝos miajn harojn —, diris la knabo. — Mi ne kombis ilin dum kelkaj tagoj, kaj ili tro interimplikiĝis.

Mikelo donis al li la kombilon, kaj Stanislas tiel lerte aranĝis siajn harojn, ke post kelka tempo lia kapo estis kovrita per la plej belegaj nigraj bukloj, kiujn oni povus imagi.

La doktoro kaj Mikelo rigardis silentante; ili ambaŭ miris, (Mikelo la unuan fojon en tuta jaro) pro la metamorfozo, kiun ricevis la kapo de la knabo. El malpura

cigano en kelkaj minutoj fariĝis tia bela knabo, kian iam vidis nek la doktoro, nek lia veturigisto.

En tiu momento revenis Maria kun buljono. Ŝi kun videbla surprizo rigardis al Stanislas, dubante ĉu li estas la sama malpurulo de antaŭe, kaj doninte al li la buljonon, ŝi reiris al la kuirejo kaj diris al la doktoredzino, kiu refoje laboradis: — Ho, sinjorino, kia bela knabo!... ankoraŭ pli bela ol la anĝeloj sur la preĝejaj pentraĵoj; kaj okuloj!!... pli nigraj ol la karboj en nia karbujo.

Stanislas intertempe trinkis avide la buljonon, ĉar li estis malsata kaj soifa.

— Lanan litkovrilon kaj kusenon, Mikelo!

Mikelo foriris.

— Nun kuŝiĝu kviete —, diris la doktoro al Stanislas, — kaj movu la malsanan piedon kiel eble plej malmulte.

Mikelo baldaŭ revenis, la doktoro metis la kusenon sub la kapon de la knabo kaj kovris lin per la lana litokovrilo; tiam li ridetis kaj diris:

— Ĉu vi povus dormi tie ĉi?

— Ho jes, sinjoro, ... mi dankas al vi.

La lastajn vortojn la knabo pro emocio kaj dankemo preskaŭ ne povis eldiri. La doktoro tion rimarkis, kaj frapetante la palajn vangojn de la malsanulo, li diris:

— Nu, mia knabo, estu kuraĝa kaj senzorga... dormu bone!

Li marŝetadis for kun Mikelo kaj fermis la pordon; tiam sin direktante al la laborejo, li prenis la lampon, kaj dum la veturigisto iris dormi, la doktoro eksidis sur la angulo de sia seĝo kaj pasigis almenaŭ unu plenan horon por fünde ekzameni la stomakon de la mortinto.

Kaj ĉi tiu kuŝis sen movo sub la tablo en la cirka veturilo, atendante kun grimacanta vizaĝo la ĉerkon, kiu por ĉiam forportos lin el ĉi tiu mondo, kie postrestis neniu por lin priplori.

Kvara Ĉapitro.

Meditado de Stanislas — Pri akrobatoj kaj patraĉo — Stranga bruado en kuirejoj — Doktoro kaj paciento — Teodoro — La staranta horloĝo kaj ĝia malnovmoda ciferplato — La ĉiam moviĝanta glavo, kiu tamen neniam trafas sian celon — Pri servistino, kiu estas scivola — Koleranta doktoro — La perditaj okulvitroj — Nova samhejmano kaj pri lia kono — Esterigo, kiun ĉeestas nenia parenco.

Tiun nokton Stanislas dormis bonege; lin jam ne turmentis la febro, kaj vekigante la sepan horon en la sekvanta mateno, li sin sentis multe pli bone. Malferminte la okulojn, li aŭdis la bruon de preterirantaj veturiloj kaj la paŝojn de piedirantoj ĉksterdome, sed interne regis ankoraŭ silento.

Li jetis la rigardon ĉirkaŭe kaj miris pri la bela salono, en kiu li kuŝis. Vole-nevole li ekpensis, kiel la cirka veturilo envenis en ĉi tiun porsinjoran domon, kiel mortis lia patro kaj kial tiu al li fremda doktoro tiel amike kondukis kun knabo, kiun li antaŭe neniam estis vidinta. Tiam lin ekfrapis la ekpenso, ke lia patro kuŝas surdorse kun larĝe malfermitaj buŝo kaj okuloj sub la tablo en la veturilo, kaj li pensis pri la momento, en kiu li vidis la kadavron, kiam la giganto forportis lin, kaj tremeto trakuris tra lia tuta korpo. Tiun tremeton ne kaŭzis ĉagreno, sed abomeno. Ĉiam li estis timinta tiun buŝon, ĉar neniam elvenis el ĝi amikaj vortoj. Nun ĝi por ĉiam silentados. Eble en ĉi tiu momento enkuris en ĝin longpieda araneo aŭ muŝo, ĉar tiuj abundis en la veturilo

kaj la iama forta brako, kiu tiom da fojoj lin batis, nun eĉ ne estis kapabla forpeli la insektojn.

Stanislas fermis la okulojn por ne vidi plu la mortinton, sed tiam li vidis lin ankoraŭ pli klare. Li sekve refoje rigardis ĉirkaŭe por distriĝi, kaj image li venigis antaŭ sin la amindan palan kaj belan vizaĝon de sia patrino, kiu mortis antaŭ dek jaroj en malsanulejo ie en urbo, kies nomon li ne plu memoris. Tiam li estis sesjara knabeto, tiam la patro ne batis lin, ĉar la patrino ne toleris tion. Ŝi estis malforta virino, sed spite al tio regis la fortan edzon per sia nekontraŭstarebla energio. Tiam la patro nur malofte ebriiĝis, kaj se okaze li sin donis al tiu malvirto, li estis humila kaj obee sidigis en angulo de la cirka veturilo, ne batante, eĉ ne rigardante la junan knabeton. Antaŭ la morto de la patrino la patro kunlaboradis en la cirko, sed post kiam longdaŭra malsano faris finon al ŝia vivo, la gimnastikisto sentis sin libera kaj tute sin donis al la ebrieco. Dume li laboris nur, kiam la neceso devigis tion al li, kaj post kiam li en dujara instruado instruis al sia filo sian arton, ĉi tiu konstante prenis la lokon de la patro kaj la juna Stanislas Mareau fariĝis konstanta kunlaboristo de la cirka trupo. Li travivis malĝojajn jarojn, ĉar li devis perfektigi sin kiel gimnastikisto, akrobato kaj rajdisto en tro malmulta tempo, sed ĉar li estis vigla, forta kaj sana knabo, kaj ĉar lia facile regebla karaktero neniam kontraŭstaris, li baldaŭ faris grandajn progresojn, tiel ke li post tiuj du jaroj da ekzercado jam laboradis kiel lerta akrobato, rajdisto kaj gimnastikisto.

Malmultaj personoj scias, kiel oni fariĝas akrobato. Ordinare la publiko ŝatas kaj admiras la akrobatojn ne nur pro la lerteco, kiun ili montras, sed precipe pro la danĝero, ĉiam minacanta ilin aŭ pro la fantaziaĵoj,

rakontataj pri la instruado de junaj akrobatoj. Pri tiuj fantaziaĵoj Stanislas nenion spertadis, neniam la patro rompis al li la spinon por fari lin fleksebla, neniam li pendigis lin per unu kruro, lasanta lin en tiu stato dum kelkaj horoj ĉiutage, ĉar ĉio tio estas nur fabeloj por infanoj.

Dum prezentado en cirko, antaŭ kelkaj tagoj li estis falinta de la trapezo pro rompiĝo de ŝnuro, kaj de post tiu tempo li ne povis plu labori. La patro bandaĝis mem la rompiĝintan kruron de la juna akrobato, kaj la leganto scias tion, kio el tio rezultis. Post tiu falo la tiraneco de la patro atingis sian plej altan gradon. Li senkaŭze insultis kaj batis la kompatindan knabon, kuŝantan sur mizera litaĉo en la veturilo, kaj nur la morto de la tirano liberigis lin de liaj malbonaj traktoj kaj kaŭzis lian neatenditan transporton en la veturilejon de fremda resanigisto. Tie, post mallonga dormado li vekigis kaj puŝmalferminte la pordetojn de la litsranko, li subite vidis la patron, kuŝantan surdorse ĉe la veturila elirejo, dum fremda sinjoro staris antaŭ tiu elirejo kun tranĉilo en la mano. Li eksciis baldaŭ, ke la patro estis mortinta kaj ke li mem sin trovas ĉe homoj, kiuj ne kondukos kontraŭ li kiel tiranoj, kaj kun pacienco li atendis la estontecon. Kio okazos kun li kaj kun la ĉevalo? Jen demandoj, kiujn li faris al si, sed ne sciante, kion respondi, li denove rigardis la meblojn, la pentraĵojn, la plafonon kaj la tapiŝon de la salono, kaj komparis ĉion kun la interno de la cirka veturilo. Kia diferenco! Kaj kiel oportune kaj agrable li kuŝis sur la kanapo!

Li estis sidigonta, sed la plej malgranda movo kaŭzis malagrablan senton en la rompiĝinta kruro; li sekve refaligis la jam levitan kapon sur la kusenon kaj atendis.

Jam pli ol unu horon li estis vekiginta kaj de tempo al tempo li direktis la okulojn al la pordo . . ., fine iu ja ĝin malfermos!

En angulo de la salono staris alta horloĝo, kiu jam kvinfoje sonoris ĉe intertempoj; la unuan fojon per sep batoj, poste trifoje po unu sola bato kaj jen ĝi sonoris ok batojn. Stanislas sciis el tio, ke estas nun la oka horo.

La bruado sur la strato iom post iom pligrandiĝis, kaj ankaŭ en la domo, precipe malantaŭ la muro, kontraŭ kiu Stanislas kuŝis, li de tempo al tempo aŭdis paŝojn kaj poste bruadon, kvazaŭ iu verŝis akvon kaj frotpurigadis. Kelkfoje li aŭdis du voĉojn. Li kredis, ke tiuj voĉoj apartenas al la du virinoj, kiuj la antaŭan vesperon tiel ekterurigite enrigardis la salonon.

Super li iu ellitiĝis; klare li aŭdis, kiel tiu saltis sur la plankon, sin ŝovis kaj sin movis, kaj fine foriris. La formortintaj paŝoj tamen tuj ekaŭdiĝis refoje sur la ŝtuparo de la koridoro; ili malsuprenvenis rapide kun laŭta piedfrapado kaj ĉe ĉiu paŝo io forte ektuŝegis la ŝtupojn. La malsupreniranto tuj poste sin direktis al la loko, kie la du virinoj parolis, kaj Stanislas nun distingis, ke tiu nova veninto estas knabo. Tiu vokis, kantis, saltetis kaj neniu kontraŭstaris al tio.

Refoje la alta horloĝo staranta ekaŭdigis sian baton, kaj la pordo de la salono malfermiĝis. Eniris la doktoro. Lia vizaĝo brilis, ŝajne pro bona humoro, ĉar li ridetis, dum li rigardis al Stanislas. Kun mallongaj, sed rapidaj paŝoj li alproksimiĝis, lia dika duobla mentono skuigiĝis tremetante ĉe ĉiu paŝeto, kiun faris la dikventrulo.

— Oho, vi jam vekigiĝis!? . . . Bonan matenon! — li diris afable, ekhaltante antaŭ la knabo. — Kaj kiel vi nun sentas vin?

— Multe pli bone, sinjoro; mi dankas.

La doktoro sidigiĝis sur seĝangulon apud Stanislas kaj kaptis lian pulson.

— Bone! — li diris, — la febro estas for, ĉu la piedo doloras ankoraŭ?

— Nur malmulte, sinjoro.

— Bonege, mia bubo; mi gratulas —, kaj ellasante la pulson, li diris plue:

— Mi nun devas paroli kun vi dum kelkaj minutoj... pri via patro kaj cetere... Vi scias, ke li mortis hieraŭ —. Li ĉesis momenton paroli, tiam li diris plue: — Ĉi tiun vesperon venos lia ĉerko, ĉu vi deziras foje revidi vian patron, antaŭ ol oni lin enĉerkiĝos?

— Ho ne, sinjoro.

Stanislas pensis pri la terura vidaĵo sub la tablo, kaj kontraŭvole lia vizaĝo montris la abomenon, kiun li eksentis, kiam la doktoro faris al li la demandon.

— Nu, vi ja ne bezonas lin vidi... Oni forportos lin tuj post la enĉerkiĝo... Sed, kion vi pensas fari kun la veturilo kaj kun la ĉevalo, kiujn al vi postlasis via patro?

Jen demando, kiu konsternis la knabon kaj la doktoro tion rimarkis.

— Ne konsterniĝu, ni ja povos aranĝi tion, ĉiuokaze ili nun estas via propraĵo, kaj vi povos ilin vendi, se vi ne havas fratojn aŭ fratinojn.

Stanislas rigardis la parolanton kun miro kaj diris:

— Fratojn aŭ fratinojn mi ne havas, tamen mi ne povos vendi la veturilon, nek la ĉevalon.

— Kial?

— Kiam mia kruro estos resaniĝinta, tiam mi ja denove devos loĝi en la veturilo kaj klopodi fari novan kontrakton kun direktoro.

— Ĉu vi tion deziras?

Stanislas kun grandaj okuloj rigardis la doktoron, dum li respondis:

— Ne, sinjoro, sed mi ja devos.

— Ĉu vi ne amas vian metion?

— Ho ne, mi ĝin tute ne amas.

— Kion do vi amas?

Stanislas estis respondonta, sed ĉar Teodoro engalopis sur sia balailo, li silentis kaj rigardis la knabon, kiu tuj alrajdis al la kanapo.

— Jen nia Teo! — diris la doktoro ridetante. — Nu Teo, ĉu vi ne devas konatiĝi kun Stanislas?

Teodoro ekstaris ĉe la fremda knabo kaj diris:

— Maria diris, ke aĉjo rompis al vi la kruron.

La doktoro ridis.

— Jes, tion mi faris —, diris li.

— Kial? — demandis Teodoro.

— Tion vi ja poste ekscios, kiam vi studados —, kaj sin direktante al Stanislas, li diris plue: — Ĉar Teodoro devos fariĝi doktoro, same kiel lia avo.

Teodoro ne atentis tiun klarigon, ĉar li demandis al Stanislas:

— Ĉu vi restos tie ĉi?

— Kiam mia kruro estos resaniĝinta, mi ja devos forveturi.

— Kien?

— Al cirko.

— Al cirko?... Kial?

— Por labori.

— Vi tamen povos labori ĉe aĉjo.

Stanislas mallevis la okulojn kaj eksilentis.

La doktoro ridetis, tiam li diris al Teodoro:

— Iru tuj diri al Maria, ke ŝi venu kun buljono kaj kun kelkaj biskvitoj. Stanislas ja devas matenmanĝi.

Teodoro galopis for sur la balailo.

— Nu! — diris la doktoro, — mi devas lasi vin momenton por finaranĝi kelkajn aferojn en mia laborejo. La servistino zorgos pri via matenmanĝo; mi revenos

antaŭ ol eliri veturife, kaj intertempe vi povos babiladi kun Teo —, kaj frapetinte la knabon sur la vangon, li paŝetadis for kaj la knabeto sekvis lin.

Stanislas restis sola, atendante la portotan matenmanĝon; dume liaj okuloj denove trafis la horloĝon, kaj li rimarkis la unuan fojon, ke io moviĝadas sur la supra parto de la ciferplato. Li rigardis pli atente kaj vidis specon de reĝa trono, sur kiu sidis grava barbhava persono, volvita en longa ruĝa mantelo; li havis stabon en unu mano kaj la alian li etendis al dua persono, staranta antaŭ la trono. Ĉi tiu dua estis nudbraka soldato kun brilanta glavo, kiun li movadis de supre malsupren kvazaŭ por tratraŭci nudan infaneton, kiun li tenis je unu piedo en la alia mano. La glavo, regule moviĝanta laŭ la tiktakado de la horloĝo, tamen ne tuŝis la infaneton, sed nur ĝin minacadis. Kontraŭ la soldato sin trovis du virinoj en longaj ĉemizoj. Unu el ili staris surgente kaj alte etendis la kunigitajn manojn petegante al la soldato ne mortigi la infaneton. La alia virino staris rekte kaj fikse rigardis la soldaton. Ĉe ĉiu tiktako de la horloĝo la glavo faris tremantan movon de supre malsupren kaj returnen.

Stanislas, kiu neniam studadis la biblian historion kaj eĉ ne sciis, ke tia historio ekzistas, miregis pri la stranga grupo, tute ne komprenante la minacadojn de la soldato, nek la teniĝojn de la aliaj personoj. Sed la glavo plue moviĝadis kaj eble faris tion por la miliona fojo, kiam eniris Maria kun la matenmanĝo. Sin sekvis Teodoro.

Timete ŝi aliris al Stanislas kaj prezentis la buljonon kun kelkaj biskvitoj.

— Bonan matenon...; ĉu vi sanas pli bone? — ŝi informiĝis.

— Jes, mi dankas.

— La sinjorino informiĝas, ĉu vi deziras ovojn.

Stanislas, kiu estis modesta, malakceptis la ovojn; li ektrinkis kaj ekmanĝis rapide, ĉar li pensis, ke la servistino devos forporti la tason kaj la telereton.

— Ĉu la kruro ne doloras plu? — ŝi demandis.

— Nur se mi ĝin movas, sed baldaŭ...

— Aĉjo rompis la kruron —, interrompis Teodoro.

— Ni aŭdis tion —, diris Maria. Ŝi daŭre fiksis la rigardon sur la malsanulon kaj ŝi pensis: — Kiajn okulojn..., kiajn harojn!

— Kio estas tio? — demandis Stanislas, montrante la grupon sur la ciferplato.

— Ulano! — respondis Teodoro.

Maria ekridis.

— Ho ne, tio ja estas la reĝo Salomo..., la unua juĝo de Salomo.

— Tio ne estas la judo Salomo —, diris Teodoro,

— tio estas ulano kun svingiĝanta lanco.

Maria denove ridis kaj estis klarigonta la grupon, kiam la doktoro enpaŝetis la salonon. Li estis tute ruĝa pro kolero. Stanislas rimarkis la subitan ŝanĝon de humoro de la doktoro kaj la knabo rigardis la dikulon kun surprizo.

— Pro la diablo! — kriis la doktoro, — nenie ĝi estas... tiu stulta Mikelo memoras absolute nenion..., li forprenis, ne remetis, forgesis... kaj eĉ diras, ke li ne scias pri ĝi kaj lasas min serĉi —... Tute ne atentante Teodoron, nek Marian, nek Stanislason, li ekhaltis antaŭ la kanapo kaj serĉrigardis sur la tableto kaj sur la tapiŝo, sed vane.

— Estas honto! — li kriis, bolante pro eksciteco...

— jam kvaronon da horo mi serĉas..., ĝi ne estas en la laborejo..., ne ĉi tie... ĝi estas nenie!!

— Kion vi serĉas, doktoro? — demandis la servistino.

— Silentu, knabinaĉo, vi ja scias nenion pri tio, kaj eĉ se vi sciuis, vi agus kiel Mikelo...

Refoje serĉante ĉirkaŭe, li diris plue: — Mi tamen ĝin havis antaŭ kvarono da horo, kiam mi eniris tiun ĉi salonon..., mi eĉ havis ĝin en la mano.

— Kion do? — kviete Maria demandis.

— La paron da okulvitroj!! — laŭte kriis la doktoro kurbigante sin kun peno kaj spiregante... — Eble sub la kanapo!...

Maria subpremis ridon, kaj Stanislas, vidante, ke la okulvitroj sidis algluitaj sur la frunto de la serĉanto, rapide, sed trafe tuŝis la serĉatajn objektojn, kiuj subite falis sur la nazon de la doktoro, tuj antaŭ liajn okulojn.

Surprizite li rektiĝis, la kolera esprimo malaperis de lia vizaĝo kaj laŭte ridante li ekkriis, batante al si la genuon:

— He!... Jen ili estas!... Ili sidis sur mia frunto... ha! ha! ha!!... nu, feliĉe ke mi retrovis ilin... —, kaj la doktoro foriris laŭte ridante.

Stanislas postrigardis la formarŝetanton kaj ne sciis, kion pensi pri tia subita humorsanĝo. Lia patro (tiu de Stanislas) neniam ŝanĝis sian humoron, li estis ĉiam la sama viro, nur aspektis malgajema, neniam kontenta aŭ feliĉa kaj parolis nur por ofendi aŭ malbeni. Kia alia viro estis tiu ĉi doktoro!

— Li baldaŭ bonhumoriĝis —, diris Stanislas al la servistino.

— Ho jes; li ekscitiĝas kiel bolanta lakto kaj estas flamiĝema kiel rezina ligno, sed tio nin tuŝas kiel akvo anseron; ni jam ne tion atentis.

— Li estas tamen bona sinjoro, ĉu ne vere?

— Jes, se oni nur lasas lin furiozadi; komence min ektimigis liaj ekboloj, sed jam de longe ili ne tuŝas min

plu. Mi nur silentas kaj atendas, ĝis kiam lia bona humoro revenas, kaj tion faras ankaŭ Mikelo.

Maria, kiu volonte estus restinta pli longe por babiladi, fine eliris la salonon. Teodoro tamen sidigis sur la tapiŝo apud la kanapo kaj faris mil demandojn al Stanislas; ĉi tiu respondis kiel eble plej bone.

— Jen mia ĉevalo! — diris post momento la knabeto. — Mi povas rajdi sur ĝi... ĉu vi iam rajdis?

— Ofte.

— Sur vera ĉevalo?

— Jes, sur vera ĉevalo.

— Kie?

— En la cirko.

— Kio estas cirko?

Stanislas klarigis; la afero ŝajnis interesi la knabeton tre multe, pri ĉio koncernanta cirkon li informigis, kaj post kiam la scivolo estis kontentigita, li silentis momenton, pripensis kaj subite demandis:

— Ĉu vi scias rakonti fabelojn?

— Jes, mi scias rakonti kelkajn. En la cirko kunlaboris ŝercisto, kiu rakontis al mi multajn.

— Rakontu foje al mi.

Stanislas volonte plenumis la deziron de Teodoro kaj li rakontis la fabelojn pri „Lupo kaj sep kapridoj“, pri „Neĝulino“, pri „Bremaj muzikistoj“ kaj aliajn.

Kun malfermita buŝo la knabeto aŭskultis.

Dume la doktoredzino laboradis en la kuirejo, ŝi refoje purigis ĝin per siteloj da akvo, viŝilo kaj balailo, kaj Maria helpis per ĉiuj fortoj. La soldato super la ciferplato ŝvingadis la glavon, la horloĝo tiktakadis kaj kvarono post kvarono da horo pasis for, kaj kiam je la unua horo la veturilo de la doktoro revenis en la veturilejon kaj la doktoro mem eniris la salonon por vidi kiel sanas lia nova paciento, ĉi tiu estis ankoraŭ rakontanta fabelojn.

Teodoro estis ravita.

— Aĉjo! — li diris.

— Nu, mia karulo, kio estas?

— Li ne plu devas foriri.

— Kiu?

— Stanislas, li scias ankoraŭ pli bele rakonti ol avino.

— He!

— Jes! . . . Li restos, ĉu ne vere?

La doktoro ridis bonhumore kaj rigardis al Stanislas, kiu modeste ŝajngigis sin ne aŭskulti.

— Li ne volas resti tie ĉi, li prefere returnos sin al la cirko —, diris ŝercante la doktoro.

— Ho ne, aĉjo, li pli volonte restos ĉe mi.

— Ĉu vere? — demandis la doktoro, fiksante la rigardon sur Stanislason.

— Estos tro maloportune al vi, sinjoro.

— Ne! ne! — kriis Teodoro —, li povas ludi kun mi kaj labori por aĉjo, aŭ por avino.

— Je la trapezo? — demandis la doktoro.

— Ankaŭ je la trapezo kaj krom tio je ĉio ajn —, diris Teo, ĉirkaŭbrakante unu el la kruroj de la avo, kaj li diris plue:

— Nu, aĉjo? . . . Ĉu li restos?

— Jes, mia infano, li restos, almenaŭ, se li volas.

— Hura! — kriis Teodoro, — li restos! . . . mi tujiros tion rakonti al avino —, kaj li forrapidis.

Stanislas sidis kun mallevitaj okuloj kaj la doktoro, rigardinte lin dum momento, demandis:

— Ĉu vi pli volonte restos ol returni vin al cirko?

— Jes, sinjoro, mi ja volonte volas esti via veturigisto, mi povas . . .

— Mi havas bonan veturigiston kaj ne bezonas du.

— Mi eble povos servi alie.

— Nu, mia knabo vi povas resti, sed ne por servi

al mi aŭ al iu alia en mia domo; mi pensis pri tio jam antaŭ ol mia nepeto demandis tion... Ĉu vi facile studadas?

— Mi ne scias, sinjoro sed mi povas klopodi.

— Kiom vi jam lernis?

— Mi lernis rajdi...

— Tion mi ne celas... Ĉu vi facile lernis kalkuli?

— Mi ne scias; neniam oni instruis al mi tion?

— Sekve vi ne lernis la matematikon!

— Ne, sinjoro.

— Ĉu geografion aŭ historion?

— Nek tion, sinjoro.

La doktoro ekscitiĝis, sed li sin retenis.

— Ĉu vi scias skribi sen gravaj eraroj?

Stanislas konfuziĝis en terura maniero kaj estis ploronta pro honto, li tamen kontraŭbatalis la larmojn kaj balbute respondis:

— Mi... mi tute ne scias skribi...

— Kion!? — kriis la doktoro, — vi ne scias skribi!?

— Ne, sinjoro.

— Vi tamen scias legi, ĉu ne vere?

Stanislas ne respondis, kaj kovrante la okulojn per ambaŭ manoj, li ekploris, dum grandaj larmoj fluis el inter liaj fingroj, kaj fine li balbute diris:

— Ne, sinjoro..., mi eĉ ne scias tion..., mi lernis nenion!

— Sed tio estas terura!

— Mi ne estas kulpa, sinjoro; mi deziris lerni, sed mia patro ne konsentis..., ĝi kostus tro multe da tempo kaj tro multe da mono.

— Fi do!!... Nu, ĉesu plori, jam ne pensu pri ĝi, ĉar post sufero venas prospero. Ne estas ankoraŭ tro malfrue, se vi estos nur diligenta.

— Mi estos, sinjoro.

— Pri tio mi ne dubas, vi lernos. Eble vi fariĝos eĉ doktoro aŭ profesoro same kiel Teodoro; ĝi dependos de vi mem.

Stanislas estis kaptonta la manon de sia protektanto por kisi ĝin el dankemo, sed la doktoro sin turnis kaj rapide eliris la salonon.

Je la vespero de tiu tago haltis antaŭ la domo veturilo. Tri viroj eliris el la veturilo longan ĉerkon, kiun ili portis en la veturilejon. Kelkajn minutojn poste tiuj viroj, helpate de Mikelo, reportis la ĉerkon kun la kadavro de la mortinto eksteren, kaj for ĝi veturis al la mortintejo, kie ĝi por ĉiam malaperis en izolita kaj neniam retrovebla fosajo.

Kvina Ĉapitro.

Stanislas kaj Teodoro — Pri fabeloj kaj: La Historio pri Floriso kaj Blankafloredo — (Tiu historio havas nenion komunan kun la herooj de ĉi tiu romano, tial la legantoj ne bezonas legi ĝin, se ili ne amas legi rakontojn el jam longe pasinta tempo).

Dank' al la korpa konstitucio de Stanislas lia kruro en tre mallonga tempo resaniĝis tiom, ke la knabo povis marŝi kun helpo de bastono. Akompanate de sia nova amiketo, la juna Teo, kiu preskaŭ neniam lin forlasis, li faris mallongajn promenadojn sur la strato, kaj post tri monatoj li sentis, ke la kruro estas sufiĉe forta, por ke li povu marŝi kiel antaŭe. De tiu tempo li faris sian eblon esti utila al ĉiuj siaj samhejmanoj. Matene li helpis alportadi sitelojn kun pura akvo, ĉar la sinjorino ankoraŭ ĉiam purigadis kaj frotadis, kaj laŭeble la knabo helpis al ŝi, precipe kiam la doktoro estis eksterdome kun sia veturilo por viziti la malproksimajn pacientojn en la vilaĝoj kaj tre malsanajn en la urbo. Kiam la veturilo refoje staris en la veturilejo kaj Stanislas estis kondukinta la ĉevalon en la ĉevalejon, li ordinare eniris la laborejon por vidi, ĉu li povus esti agrabla aŭ utila al sia protektanto, kaj preskaŭ ĉiufoje la doktoro trovis kialon por teni la knabon apud si, ĉar li ne amis, ke ĉi tiu kiel servisto helpis purigadi la kuirejon, tiom pli, ĉar tiun ĉiutage ripetatan purigadon la doktoro konsideris kiel senutilaĵon kaj kiel ion tute superfluan. La doktoredzino laŭ sia deziro povis laboradi, ŝia edzo jam ne kontraŭstaris; sed li opiniis, ke Stanislas pli bone

povas pasigi alie sian tempon. Okazis kelkfoje, ke la knabo estis helponta la sinjorinon, kiam subite la doktoro lin vokis al si. Stanislas, kiu penadis esti ĉies helpanto kaj amiko kaj volonte servis al kiu ajn, sin trovis tiam en granda embaraso, el kiu la sinjorino lin ordinare eltiris, dirante:

— Nu iru, Stanislas, post la forveturo de la doktoro vi ja povos reveni al mi.

Teodoro sekvis sian amikon kiel ombro. Ili dormadis en la sama ĉambro, ĉar tion la knabeto nepre deziris; ili ludadis kune en la veturilejo, kie la eksakrobato estis farinta trapezon por plaĉi al sia amiketo, kaj sur ĝi li de tempo al tempo „laboris“.

La cirka veturilo staris post sia alveno en angulo kaj restis tie. La du knaboj ofte ludis en tiu iama loĝejo, post kiam Stanislas estis puriginta ĝin ĉiuflanke. La matraco kaj la litaĉo jam ne kuŝis sur sia loko, sed estis forjetitaj, kaj nur la tablo kun paro da kadukaj seĝoj estis la tuta meblaro. En la tirkesto de la tablo kuŝis jam dum jaroj speco de lukse bindita kaj preskaŭ plenskribita kajerego. Stanislas memoris, ke lia patrino ofte legis en ĝi, sed nur, kiam la patro forestis. Ŝajnis al la knabo, ke lia patriĉo tre ŝatis tiun libron kaj tial li ĝin gardis kiel karan memorajon. Strange estis tamen, ke la doktoro, kiu laŭ la opinio de Stanislas estis tre klera viro, estis skuinta la kapon, kiam li foliumis tiujn skribitajn paĝojn, dirante:

— Tion eĉ la diablo ne kapablas legi, tio ne estas franca, ne germana, ne angla, ne latina nek greka... do forjetu, ĝi valoras neniom!

Stanislas tamen ne forjetis, sed gardadis la memorajon, esperante, ke poste li renkontus personon pli kleran ol la doktoro, kiu povus diri, kion ĝi enhavas.

La ĉevalo de Mareau estis vendita kaj la doktoro gardadis la monon por Stanislas.

Ok semajnojn post sia alveno en la domo de la doktoro, Stanislas iun posttagmezon sidis kun Teodoro en la cirka veturilo. Ili estis „laborintaj“ sur la trapezo, iom laciĝis kaj nun ripozis.

— Stanislas, rakontu do ankoraŭ fabelon! — diris Teodoro.

— Pri kio?

— Pri Blua Barbo.

— Mi jam centfoje ĝin rakontis, elektu alian, Teodoro pripensis, tiam li diris:

— Rakontu fabelon, kiun mi ankoraŭ ne aŭdis.

— La cirka burleskulo iam rakontis al mi tre longan rakonton pri Floriso kaj Blankaflo, sed mi timas, ke ĝi estas tro longa por vi kaj ke vi ne povos kompreni tiun rakonton.

— Ho jes, mi komprenos tamen; mi ja ĉiam komprenis viajn fabelojn.

Kaj Stanislas rakontis:

La Historio pri Floriso kaj Blankaflo*).

Antaŭ pli ol mil jaroj vivis en Hispanujo idolana reĝo. Iun tagon tiu reĝo transiris la maron kun granda armeo, alordiĝis en kristana lando kaj ruinigis tie multajn urbojn kaj kastelojn, forbruligis preĝejojn kaj monaĥejojn kaj en la daŭro de tri tagoj tiel rabodezertiĝis ĉion, ke nek domoj, nek homoj troviĝis je tridekmejlaj distanco de la maro.

Li plensargigis siajn ŝipojn kun ĉio, kion li estis rabinta kaj dissendis kvardek armitajn virojn por spionadi kaj elrabi la pilgrimantojn, kiuj preteriris. Inter

* La leganto legu la noton sub la fino de la rakonto: paĝo 331a.

tiuj pilgrimantoj sin trovis duko el Francujo; li havis kun si sian filinon, kiu estis fariĝonta patrino. Ŝia edzo estis mortigita en batalo antaŭ mallonga tempo, tiel ke nur la duko povis protekti ŝin. Li sin defendis kuraĝe kontraŭ la idolanoj, sed fine li estis venkata kaj lia filino estis forkondukata kiel kaptitino. La hispana reĝo tiam rapide returnis sin al sia reĝolando, kie liaj subuloj salutis lin kun ĝojkrioj, kaj la rabitajo estis partigata kaj disdonata al la soldatestroj. La reĝino tre ĝojis, ke ŝia edzo estis kunportinta kristanan virinon; jam longe ŝi petis al li tian virinon kiel korteganinon; nun ŝia deziro estis plenumita kaj ŝi konsentis, ke la nova korteganino restu kristanino. La malfeliĉa vidvino estis pro tio tre danka; ŝi servis la reĝinon de la frua mateno ĝis la malfrua vespero, instruis al ŝi la francan lingvon kaj baldaŭ la kristanino estis amata de la tuta kortegano. Okazis, ke la reĝino kaj ŝia kristana korteganino en la sama tago, nome dum palmofesto, naskis po unu infaneton. Al la reĝino naskiĝis filo kaj al la dukino naskiĝis filino. La filino estis baptata per la nomo Blankaflo-ro kaj la juna princo estis nomata Floriso. La reĝo estis tre ĝoja, kiam li eksciis, ke naskiĝis princo, kaj en la palaco fariĝis granda festo, kiun devis partopreni ĉiuj korteganoj. Li konsentis, ke la princo estis konfidata al la zorgoj de la dukino, sed idolana virino devis suĉigi la infanon. La kristanino kore amis ambaŭ infanojn, kiuj poste ĉiam estis kune, tiel ke ili ne povis vivi unu sen la alia. Tuj kiam la reĝo rimarkis, ke lia filo estas sufiĉe aĝa por studi, li diris: Mi konfidos vin al la zorgoj de l' instruisto Gorbur. Floriso tamen tre malĝojis; li ekploris dirante: Ho patro, mi povos nek lerni, nek skribi, nek legi, nek ion alian, se Blankaflo-ro ne akompanos min al la lernejo. La reĝo tial promesis, ke ili kune iru al la edukpensiono.

Tie ili ĉiam studadis kune, sin ekzercadis en la latina lingvo kaj faris tiajn progresojn, ke ili povis skribi unu al la alia latinajn leteretojn, kiujn la aliaj ne povis kompreni. Tiel ili fariĝis pli aĝaj kaj pli grandaj kaj enamiĝis unu en la alian ĉiam pli kaj pli. Tio tamen tute ne plaĉis al la reĝo kaj li pripensadis rimedojn por disigi la du infanojn. Iun tagon li diris al sia edzino, ke li intencas ekzekutigi Blankafloron, se la princo ne forlasus sian malsaĝan enamiĝon, ĉar estus tro ridinde edzigi princon kun filino de kristana sklavino. La reĝino tamen kontraŭstaris kun ĉiuj fortoj, timante ke Floriso pro malspero memmortigus sin, se Blankaflo-ro estus ekzekutata. Tial ŝi pripensis alian planon. Al la instruisto estis ordonite, ke li ŝajnigu sin malsana, tiel ke Floriso devus aliri alian edukpensionon en Mentorujo. Tie tiutempe estis multaj infanoj de nobela naskiĝo kaj inter ili belegaj knabinoj, kaj la reĝo esperis, ke lia filo baldaŭ forgesus pri Blankaflo-ro. Sed Fenuso sin trompis, kiel ni vidos. Kiam Floriso estis forvojaĝonta, li petis al sia patro, ke Blankaflo-ro kuniru al Mentorujo. — Ne —, diris la reĝo, — ŝi devus resti tie ĉi por flegi vian patrinon, kiu fariĝis malsana —. Oni povas imagi, kiel malĝojis la princo, kiam li eksciis tion. Kiel frenezulo li vagadis tra la palaco, dirante, ke li volus neniam aliri Mentorujon, se Blankaflo-ro ne akompanus lin. La gereĝoj ne sciis kiel rekvietigi la princon, kaj ili nur sukcesis en tio, post kiam ili promesis al li, ke Blankaflo-ro sekvus lin post du semajnoj. Kordeŝira estis la adiaŭo de la du gejunuloj. Al Fenuso tio tute ne plaĉis, sed kion li devus fari? Kun flataj vortoj kaj ĉiaj donacoj li fine irigis la princon al Mentorujo, kie lin feste akceptis la duko Goraso, la dukino Zeŭte kaj ilia filino. La postan tagon li vizitis la lernejon, kie estis multaj nobelaj fraŭlinoj, sed tio efikis nenion, ĉar kiun ajn vidis

Floriso, kaj kion ajn oni faris, ĉiam li pensis pri Blankaflo-ro. Jen li silente sidadis droninta en pensoj, jen li iradis ĉirkaŭe kun ĝemoj kaj plorante, kaj kiam post la du semajnoj ne venis al li Blankaflo-ro, tiam li jam ne sciis, kien sin movi kaj sin ŝovi. Li ektimis, ke ŝi estis mortinta; li volis nek manĝi nek trinki, nek dormi kaj fariĝis malsana. La kortegano akompananta la princon sciigis pri tio al la reĝo kaj granda konsterno estiĝis en la kortego. La reĝo venigis la reĝinon kaj diris: — Kara edzino, mi ne scias, kion fari kun mia filo. Bankaflo-ro sendube ensorĉis nian infanon. Mi tuj ŝin ekzekutigos, tiam li nepre forgesos pri ŝi —. Sed la reĝino respondis: — Sinjoro, tio ne estus saĝa. Blankaflo-ro ne ensorĉis nian infanon, ĉar ŝi lin amas tro multe. Post lia forvojaĝo Mentorujon ŝi ne travivis eĉ unu felicĉan momenton. Daŭre ŝi ploradis kaj suferadis. Estus peko kaj honto mortigi ŝin, ĉar ŝi ne estas kulpa. Prefere kondukigu ŝin al Nicea por vendi kiel sklavinon, tiam ni jam neniam aŭdos pri ŝi —. La reĝo sekvis la konsilon de la reĝino; li venigis du aziajn komercistojn kaj ordonis, ke ili plenumu la deziron de la reĝino.

Monaton poste la knabino estis vendata al riĉa emiro en Babilono. Ĉi tiu emiro, trovanta ŝin belega kaj aminda, intencis edziĝi kun ŝi kaj ŝin kondukigis al la turo de la virgulinoj, kie estis dudek-kvin knabinoj, kiuj devis konsoli kaj gajigi kaj instrui ŝin, ĉar baldaŭ ŝi fariĝus reĝino de la tuta lando.

Jen Blankaflo-ro sin trovis inter fremduloj kaj en salonego, kiun ŝi ne povis forlasi. Ŝi ploris kaj diris ĝemante: — Ho, mia kara Floriso! kiu do nin disigis laŭ tia kruela maniero? Neniam mi vin forgesos. Mi scias, ke vi suferas same kiel mi, ĉar ni amas nin reciproke. Malbenita estu tiu, kiu kaŭzis al ni tiun ĉagrenon kaj doloron, ĉar sen vi mi neniam reĝojiĝos.

La reĝo Fenuso estis tre kontenta, post kiam estis foririnta la bela Blankaflo-ro, sed la reĝino estis senku-raĝiginta. — Sinjoro! — ŝi diris, — kion do ni faros, kiam revenos nia filo? Li ploros ĝismorte. Donu al mi bonan konsilon.

La reĝo pripensis kaj ordonis, ke oni faru belegan tombo-monumenton el marmoro kaj kristalo; sur tiu monumento kuŝu du infanoj el oro, unu similu al Floriso kaj la alia al Blankaflo-ro. Ambaŭ portu reĝan kronon kaj sur tiu de Floriso brilu karbunkolo disiganta nokte tiom da brilajo, kvazaŭ estus hela tago. Sub la du infanoj staru per oraj literoj: „En ĉi tiu tombo ripozas Blankaflo-ro, kiun la junulo Floriso amis kun eterna amo.“

Kaj la reĝo disordonis, ke ĉiu diskonigu, ke Blankaflo-ro estas mortinta. Post kiam ĉio tio ĉi okazis, la reĝo venigis Florison. La princo dancis pro ĝojo. En malmulta tempo li ĉion pretigis por forvojaĝi kaj baldaŭ li staris antaŭ siaj gepatroj. Li ĉirkaŭbrakis ilin kaj tuj informigis pri Blankaflo-ro. Neniu kuraĝis paroli, sed li rapidis al ŝia ĉambro, kie li ne trovis ŝin.

Sed ŝia patrino sidis tie malĝoja kaj ploranta pro la kara filino. Floriso ŝin petis konduki lin al Blankaflo-ro. Komence ŝi agis kvazaŭ ŝi ne komprenis, tiam ŝi respondis eviteme; fine ŝi ŝajnis kredi, ke Floriso volas informi pri tio, kion li jam estis sciiginta. — Mi opinias —, ŝi diris, — ke vi min ŝercmokas —. Ho ne! — respondis Floriso, — mi tute ne ŝercmokas. Venigu rapide mian Blankaflo-ron, mi petas —. Tiam ŝi ne plu povis silenti. — Mi ne scias, kie ŝi estas —, diris ŝi, dum ŝi fikse direktis la okulojn sur la plankon. — Oni ja ordonis al mi, ke mi diru . . . ke ŝi mortis kaj . . . ke ŝi estas entombigita.

Floriso ne aŭdis la lastajn vortojn. Li svenis. La dukino ekterurigis kaj eligis ekkri- on, kiu resonis tra la

tuta kortego, ĉar ŝi kredis, ke la princo kuŝas sen vivo antaŭ ŝiaj piedoj. La gereĝoj tuj alkuris kaj ekploris. Post kelka momento Floriso rekonsciigis kaj oni lin kondukis al la tombo, kie li denove svenis. Rekonsciiginte la duan fojon, li ekkriis: Ho, Blankaflo, kial vi min forlasis! Ni naskiĝis la saman tagon kaj kune ni estis edukataj. Kial do ni ne eliris kune el tiu ĉi mondo?

Dirinte tion, li elujigis ponardeton kaj estis trapikonta sian koron, sed feliĉe lia patrino retenis la jam levitan brakon kaj kaptante la ponardeton, ŝi rapidis al la reĝo kaj diris: — Reĝa moŝto, kompatu do nian infanon. Jen la armilo, per kiu li estus mortiginta sin, se mi ne estus kaptinta ĝin en la ĝusta tempo: Kio fariĝus, se li tiel finus sian vivon!... Ni havas nur unu infanon kaj la tuta lando nin mallaŭdas. Parolu do, sinjoro!... kion ni devas fari? — — Diru al li —, respondis la reĝo, — ke li ĝoju, ĉar Blankaflo vivas ankoraŭ.

Kiam la princo tion ekaŭdis, li diris al sia patro: — Ho patro, permesu, ke mi iru al Blankaflo, ĉar sen ŝi mi ne povas vivi.

La reĝo malĝojis kaj li malbenis la tagon, en kiu li ŝin vendis. Volonte li reaĉetus la knabinon, sed li ne sciis, kie ŝin trovi. Li sekve parolis: — Mia knabo, aŭskultu la bonan konsilon, kiun mi al vi donos. Restu ĉe mi kaj mi havigos al vi belan finanĉimon el pli nobla rango, kiu povos porti kun honoro la reĝinan kronon —. Sed Floriso respondis: — Ho ne, kara patro! Ĉar estas en la mondo nur unu, kiun mi povas ami, kaj ŝi estas Blankaflo. Permesu do al mi, ke mi iru por serĉi ŝin —. Tiam respondis la reĝo: — Nu do, iru, mi havigos al vi la bezonajn vestojn, ĉevalojn, servistojn kaj monon —. Floriso tamen diris: — Sinjor' patro, ĉu ne estus pli saĝe, se mi vojaĝus kiel negocisto deziranta vendadi kaj aĉetadi? Dekdu azenoj devas marŝi antaŭ

mi, tri ŝarĝitaj kun ĉapeloj, tri kun moneroj, du kun veluro, skarlataj kaj silkaj vestaĵoj kaj orbroditaj, la kvar ceteraj portos blankan kaj grizan peltaĵaron. Ĉe la azenoj mi bezonas dekdu kondukistojn. Krom tio, vi donos al mi dekdu militistojn por min protektadi, unu soldatestron kaj unu saĝan korteganon. Fine min akompanados la du komercistoj, kiuj vendis Blankafloron, ĉar ili plej bone scios, kie mi devos ŝin serĉi.

La reĝo konsentis en ĉio kaj pretigis belan ĉevalon, sur kiu lia filo povos rajdi, kaj jen li rajdis for por serĉi Blankafloron. Li iris kun sia sekvantaro Niceon, kien la komercistoj estis kondukintaj ŝin. Post prospera vojaĝo ili ekloĝis tie ĉe riĉa viro, ĉe kiu ili ĉion trovis, kion ili bezonis, kaj kie ili pasigis kelkajn ĝojajn tagojn. Floriso tamen ne partoprenis en la ĝenerala ĝojo; li nur pensadis pri sia karulino, kaj kiam li sidadis ĉetable, li fakte ne sciis, ĉu li enbuŝigis panon aŭ viandon.

Kiam la gastigintino tion rimarkis, ŝi diris al sia edzo: — Sinjoro, ĉu vi ne vidas, kiel malĝoja estas tiu juna fraŭlo? Ĉiam li dronas en pensoj, ĉiam li rigardas sencele kaj fikse antaŭ sin. Kvankam ili pretendas esti negocistoj, mi supozas, ke ili alvenis aliacele.

Unu tagon ŝi jam ne povis kontraŭbatali sian scivolon, kaj ŝi diris al Floriso: — Mi rimarkis, juna fraŭlo, kiom malmulte vi manĝis, kaj ke viaj pensoj disvagas. Laŭ viaj manieroj vi estas simila al juna fraŭlino, kiu antaŭ nelonge estis tie ĉi kaj kiu, same kiel vi, seninterrompe ĝemadis kaj pripensadis. Ŝi nomiĝas Blankafloro. Multfoje ŝi ploris pro sia amato, nomita Floriso, kaj pro kiu ŝi estis vendita kiel sklavino.

— Kien ŝi forvojaĝis? — Floriso demandis.

— Al Babilono —, respondis la virino.

Post kiam ĉiuj estis manĝintaj, ili enlitiĝis. Jam frue la sekvantan matenon Floriso vekis sian korteganon

kaj li ordonis, ke li veku la ĉutan sekvantaron, ĉar li deziris tuj ekvojaĝi. Baldaŭ ili alvenis riveron, nomitan Serio. Ponteto por piedirantoj kuŝis trans tiun riveron, sed, ĉar la princo havis kun si azenojn kaj multe da komercaĵoj, li ne povis ĝin transiri. Ĉe la ponteto elstaris el la tero cipresbastonego, sur kiu pendis ebura trumpeto; ĉiu kiu bezonis la pramiston por esti transkondukata, devis blovi sur tiu trumpeto. Floriso ekblovis kaj la pramistoj alvenis; ili plensarĝis la pramojn kaj Floriso prenis lokon en la pramo de l' pramestro. Ĉe tiu rimarkis, ke Floriso aspektas malĝoja. — Kien vi deziras vojaĝi, kaj kial vi aliras nian landon? — demandis li. — Ni estas komercistoj —, respondis Floriso, — ni intencas vojaĝi Babilonon. Sed estas jam malfrue por ekvojaĝi hodiaŭ. Ĉu troviĝas ĉe vi hotelo por niaj ĉevaloj kaj azenoj? — La pramestro respondis: — Sinjoro, mi posedas bonegan gastejon. Sed mi volas diri al vi, kial mi vin alparolas. Antaŭ tri monatoj mia pramo transportis fraŭlinon, kiu estas tre simila al vi —. — Kien ŝi iris? — demandis Floriso. — Al Babilono.

Floriso kaj lia sekvantaro pasigis la nokton ĉe la pramestro, kaj jam frumatene la sekvantan matenon ili estis pretaj refoje ekvojaĝi. Antaŭ ol foriri, Floriso demandis al la pramisto, ĉu li havas en Babilono amikon, kiu povus gastigi kaj helpi lin se bezone. — Mi havas —, respondis la pramisto. — Antaŭ ol alveni tie, vi renkontos larĝan riveron, trans kiu kuŝas ponto; la viro, kiu ricevas la transirmonon, estas mia plej bona amiko. Li posedas en la urbo domojn kaj loĝejojn, tiel ke li volonte loĝigos vin. Prenu mian ringon kaj montru ĝin kiel signon, ke mi irigis vin al li.

Floriso adiaŭdiris la gastiginton kaj alvenis tiun saman matenon antaŭ la rivero, pri kiu oni estis parolinta. Li montris la ringon al la amiko de la pram-

estro, kaj ĉi tiu kondukis lin kaj lian sekvantaron al unu el siaj hoteloj. La postan matenon, dum li faris promenadon kaj admiris la grandan povon kaj la fortan kastelon de la emiro, li preskaŭ frenezigiĝis kaj parolis al si mem. — Nun mi estas tie, kie estas Blankafloro, sed kion tio al mi utilas? Mi agis malsaĝe forlasante mian patrujon. Ĉu ne estus pli bone revojaĝi? Ĉi tie mi konas neniun, al kiu mi povus konfidi la celon de mia vojaĝo, kaj se la emiro ekscios pri mia celo, li sen dubo kaptos kaj senkapigos min —. Tiel pensante kaj parolante al si mem, li reiris al sia gastiginto kaj ĉi tiu diris: — Ho, mia amiko, pri kio vi do pensas; vi aspektas tiel malĝoja! Ĉu estas io en mia hotelo, kio ne plaĉas al vi? — — Ne, sinjoro —, respondis Floriso, — tute kontraŭe, mi eĉ esperas vivi sufiĉe longe por poste danki vin pro ĉio bona, kion vi al mi faris. Sed mi timas, ke tio neniam okazos. — — Kurage! — diris la gastigisto, — mi ja povos trovi rimedojn por helpi vin.

Dum la manĝado Floriso alportigis pokalon kaj ordonis, ke oni ĝin plenigu je vino. Ĉi estis tiu sama pokalo, por kiu Blankafloro estis vendita; la hotelisto tuj ĝin rekonis. Floriso intertempe malĝojis kaj larmoj elrulis el liaj okuloj. La edzino de la hotelisto tion rimarkis kaj ŝi diris al sia edzo: — Ni formetu la manĝaĵon, ĉar tiu juna sinjoro tute ne havas bonan apetiton kaj li manĝis neniom. Ni lin konsolu.

La manĝaĵoj estis forprenitaj kaj la hotelisto parolis: — Juna sinjoro, diru al mi: kio faras vin tiel malĝoja? — Floriso respondis: — Mi diros al vi la veron. Mi estas la filo de la hispana reĝo; mi serĉas mian karan Blankafloron, kiun oni de mi forŝtelis. Se vi povos doni al mi bonan konsilon por reakiri ŝin, tiam mi vin rekomencos per tiom da mono, kiom vi deziras. Antaŭ ol

monato estos pasinta, mi nepre devos rehavi ŝin, se ne, mi mortos pro ĉagreno — — Estus terure, juna sinjoro, sed mi vere ne scias, kiamaniere vi sukcesos reakiri ŝin. Neniu ĉi tie kuraĝos vin helpi, ĉar la emiro estas tiel potenca, ke kvindek reĝoj staras sub lia ordono. Kiom tio, la urbo Babilono estas dudek mejlojn larĝa kaj dudek mejlojn longa, la muregoj de la urbo estas mirinde dikaj kaj altaj kaj konstruitaj el tiel malmolaj ŝtonoj, ke ili povas kontraŭstari ĉion, tiel ke ni timas neniajn malamikojn. En la urburegoj estas tri-dek-tri metalaj pordegoj kaj el ili elstaras sepcent altaj turoj. En tiuj turoj loĝas sepcent eminentaj sinjoroj, kiuj defendas la urbon. Ĉiu el tiuj eminentuloj estas tiel potenca, ke neniu devas cedi pro kiu ajn reĝo. Mi opinias, ke via entrepreno estas granda malsaĝaĵo. En la mezo de la urbo staras kolosa kastelo, enhavanta kvar loĝejojn, en la kvara kaj plej alta loĝas Blankafloro kun sep aliaj fraŭlinoj, ĉiu en belega salono kun fenestroj el bonodora mirta ligno kaj ebonaj pordoj, kiuj neniam forputriĝos kaj kiuj estas nebruleblaj. Tiu turo nomiĝas la virgulinejo. En la mezo de la virgulinejo staras kristala kolono, ĉe kiu sin trovas fontano, kies akvostrioj altiĝas ĝis la plej alta fenestro. Flanke de tiu kolono estas ŝtuparo, laŭ kiu malsupreniras la fraŭlinoj en la salonon de la emiro, ĉar du fraŭlinoj devas lin servadi dek-kvar tagojn, matene kiam li elitiĝas kaj vespere, kiam li enlitiĝas. La turgardisto estas tre severa. Kiu ajn alproksimiĝas al tiu turo sen sufiĉa kialo, tiun li mortigos. Plie sin trovas tie dek-ses viroj, kiuj ne scias pri kompatato; ili gardadas la loĝejojn de la turo kaj dormas nek tage nek nokte. Fine mi devas rakonti pri io mirinda. La emiro kutimas edziĝi ĉiujare kun alia virino. Je la fino de la jaro li venigas al si ĉiujn eminentulojn de la lando, kaj kiam

ili estas kune, li ordonas, ke ĉiuj virinoj venu antaŭ lin. Tiam ekzekutisto senkapigas ilin unu post alia. Tiu, kiu fariĝas lia edzino, devas ĉiam pagi tiun honoron per sia kapo. Kiam tio estas finiĝinta, la fraŭlinoj devas mal-supreniri la turon kaj kunveni en ĝardeno. Ĉe tiu okazo ili havas mienon tre malĝojan, ĉar neniu deziras havi la honoron fariĝi reĝino, sciante, ke tiam restos al ŝi nur unu jaro da vivo. Ĉirkaŭ tiu ĝardeno, kie la tutan jaron kreskas la plej belaj fruktoj, estas muro el oro kaj lazurŝtono. En la mezo de tiu ĝardeno ŝprucas klara fontano kaj super tio disetendas alta arbo siajn ĉiam fruktojn portantajn branĉojn. Tuj kiam defalas unu frukto, alia ekfloras sur tiu sama loko.

Post kiam la emiro kaj lia sekvantaro venis en la ĝardenon, li eksidas apud la arbo. Tiam la fraŭlinoj unuope devas preteriri inter li kaj la fontano. Tiun, sur kies kapon falos floro, li elektas kiel edzinon, kaj ŝi estas kronata kun honoro, kvankam li ŝin ekzekutigos ĉe la fino de la jaro.

Do, juna sinjoro, mi dubas, ĉu iu sin trovas tie ĉi, kiu povos diri, kiel rehavigi al vi Blankafloron. Antaŭ ol pasos unu monato, la emiro kunvenigos la eminentulojn por festi la geedziĝon, kaj tiam ĉiuj fraŭlinoj devos aperi en la ĝardeno. Mi ekaŭdis, ke li tiom amas Blankafloron pro ŝia beleco, ke li intencas edziĝi kun ŝi — — Ho, mia kara gastiganto! — diris Floriso, kiu estis aŭskultinta kun malfermita buŝo kaj fariĝis mortepala, — donu al mi konsilon . . ., kion do mi faros? — Tiam ekparolis Doriso: — Mia juna sinjoro, mi donos al vi bonan konsilon. Leviĝu jam tre frue morgaŭ matene kaj rigardu atente la turon, en kiu loĝas Blankafloro. Tiam la gardisto demandos vin akratone, kion vi faras. Respondu al li kviete kaj dolĉtone, ke vi deziras konstrui tiajn turojn

en via lando. Kiam li ekaŭdos, ke vi parolas pri tiaj gravaj intencoj, li ekkonatiĝos kun vi kaj invitos vin je ŝakludo. Komprenoble vi akceptos, sed zorgu, ke li gajnu. Reiru al li la postan tagon kaj ne nur malgajnu je la ludado, sed prezentu al li donace la pokalon, por kiu Blankafloro estis aĉetita. Li akceptos kaj pripensos pri rimedoj por kompensi vin pro la bela amikaĵo, kiun li ricevis, kaj li ĵuros al vi fidelecon kaj helpos vin kiel eble plej multe en via entrepreno.

Laŭ la konsilo de sia gastiganto, Floriso iris la sekvantan matenon al la turo. Apenaŭ li staris tie, tuj aperis la gardisto, kiu demandis akrate, ĉu li estas spiono. Sed la respondo, kiun donis Floriso, kontentigis lin kaj tuj li invitis la princon je ŝakludo. Floriso konsentis kaj eniris. La gardisto gajnis kaj invitis lin reveni la postan tagon, al kio Floriso volonte konsentis. Ankaŭ tiun tagon la gardisto gajnis, kaj kiam Floriso forlasis lin, li prezentis la belan pokalon. La gardisto estis ravita kaj ĵuris, ke li helpos sian novan amikon en ĉio, kion ajn ĉi tiu volus entrepreni. Tiam Floriso rakontis malkaŝe, ke li venis por liberigi la belan Blankafloron, ĉar li mortus pro ĉagreno, se li ne povus reakiri ŝin. Tuj kiam la gardisto tion eksciis, li pentis pri sia promeso kaj diris: — Ho, mia amiko! Viaj amikeco kaj amikaĵo min delogis. Mi timas, ke tio kostos al ni ambaŭ la vivon. Sed mi tenos mian ĵuron kaj plenumos vian deziron. Iru al la hotelo kaj revenu post tri tagoj. Tiam estos la unua de Majo. Intertempe mi kunkolektigos la plej belajn florojn troveblajn por sendi kun saluto en korbego al Blankafloro. Mi intencas portigi vin en tiu korbego al via amatino en la turon —, Floriso estis tiel emociita, ke preskaŭ li ne povis paroli. Li premis al la gardisto la manon kaj kun ĝojo reiris sian hotelon. La gardisto tuj pretigis korbegon sufiĉe grandan, por ke Floriso

povu sin kaŝi en ĝi, kaj oni kolektis la plej bonodorajn florojn, sub kiuj li poste sin kaŝus.

La unua de Majo estis veninta. Laŭ la konsilo de la gardisto Floriso sin vestis per ruĝe-purpuraj vestoj, por ke la koloro de lia kostumo ne tro diferenciĝu de tiu de la ruĝaj rozoj. En la ĉambro de la gardisto li trovis la korbegon kaj eksidis en ĝi kun ĉapelo plektita el rozoj; li sin kaŝis sub la floroj, tiel ke li fariĝis tute nevidebla. Tiam la gardisto vokis al si du fortajn knabojn kaj parolis al ili; — Prenu tiun korbegon, portu ĝin supren en la ĉambro de Blankaflo-ro kaj diru al ŝi, ke mi ĝin sendas, poste revenu al mi.

La knaboj obeis, sed mezvoje ili eligis multajn nedecajn vortojn, ĉar florojn tiel multepezajn ili neniam antaŭe portis. Malfeliĉe ili sin trompis pri la pordo de Blankaflo-ro kaj erare metis la korbegon antaŭ la ĉambro de Klariso, kriante: — Fraŭlino Blankaflo-ro! jen estas donaco de la turogardisto —. Klariso, rimarkinte la eraron, diris al si mem mokridante: — Mi volas ekscii, per kio la turgardisto estas surprizanta nian favoratinon —, kaj ekstarante post la pordo ŝi ordonis al la knaboj enporti la korbegon. Kiam ili estis for, ŝi admiris la korbegon kaj elprenis la plej belan rozon. Floriso, pensante ke Blankaflo-ro staras ĉe la korbego, subite salte leviĝis. Klariso morte paliĝis pro ekteruro. Ŝi posten paŝis kaj ekkriis; — Ho, kiu elvenas el la korbego? — La aliaj pordoj ĵete malfermiĝis, fraŭlinoj alproksimiĝis kure kaj demandis: — kio okazis? — Floriso tamen jam estis malaperinta sub la rozoj kaj Klariso havis la spiritan regecon kovri lin tiel per floroj, ke neniu lin rimarkis. Ŝi subite ekpensis pri tio, ke Blankaflo-ro multfoje parolis al ŝi pri unu juna fraŭlo, kiun ŝi amis, kiam ŝi estis ankoraŭ en Hispanujo kaj ke li similis al ŝi. Al la fraŭlinoj Klariso nun diris ridante, ke ŝi ekterurigiĝis pro

granda abelo, kiu neatendite elflugis el la korbego, kaj la fraŭlinoj retiriĝis en siajn ĉambrojn. Dume Floriso sidis en granda embaraso, kvazaŭ sur pingloj.

La bela Blankaflo-ro kaj Klariso tamen estis fidelaj amikinoj.

Post kiam ŝi permesis al Floriso eliri el la korbego, ŝi zorge fermis la pordon de sia ĉambro kaj eniris en tiun de Blankaflo-ro. Ĉi tiu laŭkutime sidis ploranta pro sia kara Floriso.

— Nu do —, parolis Klariso, — jam ne ploru kaj jam ne ĝemu! Iru kun mi kaj mi montros al vi belegajn florojn. Mi vetas, ke neniam vi vidis tiajn belegajn.

— Kara Klariso —, respondis Blankaflo-ro, — viaj floroj ne interesas nek konsolas min, vi ja scias, ke la mezurilo de mia mizero baldaŭ estos plenigita, ĉar post unu monato la emiro min elektos kiel edzinon. Sed mi juras per ĉio sankta, ke mi ne atendas tiun okazon; mi eltrovos rimedon devigi la emiron, ke li mortigos min antaŭ tiu tempo, se mi ne povos alie min liberigi el liaj manoj. Pli-vole mi mortos ol fariĝi malfidela al mia Floriso. Sed Klariso parolis: — Ĉesu lamentadi kaj faru, kion deziras via Floriso. Li deziras, ke vi sekvu min por admiri tiujn belajn florojn.

Blankaflo-ro sekvis sian amikinon. Floriso estis aŭdinta, kion parolis la fraŭlinoj kaj klare, li estis ekkoninta la voĉon de sia Blankaflo-ro. Salte li kuris al la pordo. Blankaflo-ro rekonis lin tuj kaj senparole ili ĉirkaŭbrakis sin reciproke, kizante sin tiel pasie, ke ŝajnis, kvazaŭ la kisoj neniam finiĝus.

Dume Klariso staris en granda angoro, timante la koleron de l' emiro, sed: kiu levas la piedon, tiu devas ekpaŝi, kaj ŝi decidis helpi la geamantojn. Kaj ili manĝis kaj trinkis kaj estis feliĉaj, kaj neniu el la ceteraj fraŭlinoj eksciis tion, kio fariĝis.

Sed ho ve! unu matenon Klariso vekigis, kiam la suno jam staris alte sur la ĉielo. Rapide ŝi ellitiĝis kaj vokis Blankafloron, dirante, ke estas jam malfrue. — Jes, mi venas, mi venas —, respondis Blankafloro, sed tuj ŝi reekdormis. Klariso iris al la fontano, kolektis akvon en la pelvon kaj ĝin portis tremante al sia sinjoro. Trafis lin tuj, ke Blankafloro malestas. Kiam li informiĝis pri ŝi, Klariso respondis: — Sinjoro, ŝi legis la tutan nokton kaj preĝis, ke la dioj donu al vi longan vivon, poste ŝi reekdormis —. La emiro estis kontenta, li diris: — Tio estas bona kaj laŭdinda laboro; kun rajto ŝi povas fariĝi mia edzino —. Sed la postan tagon Klariso refoje vokis sian amikinon por ellitiĝi kaj kolekti akvon, ankaŭ tiam ŝi diris: — Jes, mi venas! — Sed Floriso ŝin tenis en la brakoj, ĝis kiam refoje ŝi ekdormis. La emiro suspektis kaj demandis, kial Blankafloro ne venis. Klariso balbute respondis: — Sinjoro . . ., mi ŝin vekis . . . kiam mi preteriris ŝian ĉambron, kaj ŝi promesis tuj veni.

La emiro tamen ne tion kredis kaj apenaŭ Klariso estis for, tuj li ordonis al ĉambelano, ke li iru al la ĉambro de Blankafloro por venigi ŝin tuj antaŭ la emiron. La ĉambelano, ne sciante, ke Klariso estas malsupre, tuj supreniris en la dormejon de Blankafloro kaj ŝin ekvidis kviete dormantan en la brakoj de Floriso. Kredante tamen, ke Floriso estas Klariso, ĉar tiuj tre similis unu la alian, li reiris al sia sinjoro kaj diris: — Blankafloro kaj Klariso dormas unu en la brakoj de la alia, mi ne kuraĝis ilin vekti.

La emiro fariĝis furioza, aŭdinte tion, ĉar li komprenis, ke Blankafloro kaŝe amis aliulon. Kaj Klariso pro ektimo svenis, ĉar ŝi aŭdis, kion diris la ĉambelano.

— Donu al mi mian glavon! — ekkriis la emiro. — Mi mem iros al tiu fraŭlino; vi mensogis, ĉar Klariso estas malsupre.

Li ordonis al la ĉambelano sekvi lin al la supraj ĉambroj de la turo.

Ne koniginte sian alvenon, li eniris la ĉambron de Blankafloro, puŝmalfermis la fenestrojn, por ke la klara lumo povu lumigi la du dormantojn kaj aliris al la lito; sed kiel miris la emiro, ĉar vidante Florison, li ne sciis, ĉu tiu estas fraŭlo au fraŭlino, tiel bela estis lia vizaĝo. Li ordonis al la ĉambelano sublevi la litkovrilon, kaj rimarkante, ke tie kuŝas fraŭle vestita persono, li tiel furioziĝis, ke neeble li povis eligi unu vorton. Li jam levis la glavon por mortigi ambaŭ, kiam ili vekigis.

Jen staris la terura emiro kun brilanta glavo.

— Kiel vi estas tiel trosentima —, li parolis, — insulti min en tia maniero? Sciu, ke via lasta horo alproksimiĝis.

— Kompaton! — diris Floriso, ŝi min amas pli ol ĉiujn vivantojn, kaj mi amas neniun krom ŝin. Nenies amo estis kiel la nia —. Kaj li petegis al la emiro, ke li indulgu ilin ambaŭ, aŭ ke li kunvoku la juĝojn de la lando, esperante, ke kompatemaj homoj troviĝus, kiuj bonvolus pledi ilian aferon.

La emiro ne eningigis sian glavon kaj igis konduki la kulpulojn en sian salonon, kie ili estus juĝotaj. La plej altaj eminentuloj kunvenis: reĝoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj aliaj altranguloj en multenombra amaso. Ĉi tiu salono estis tiel vasta kaj tiel multekosta, ke tiu de la troja reĝo Priamuso ne povus esti komparata kun ĝi. Ĝi estis longa unu mejlon kaj same larĝa; ĉiuj kolonoj estis el pura kristalo.

Kiam la tuta korteganaro estis kune, tuj aperis la emiro. Li sidiĝis sur sia ora trono, ordonis, ke ĉiuj silentu kaj parolis:

— Aŭskultu, sinjoroj! . . . Mi deziras, ke vi juĝu unuope laŭleĝe kaj laŭjustece —. Granda silento ekregis en la salonego kaj la emiro diris plue:

— Miaj sinjoroj! Ĉar Blankafloro estis tie ĉi nur kvar monatojn, kaj ĉar mi ŝin aĉetis por sumo en oro dekfoje pli peza ol ŝia korpo, mi intencis edziĝi kun ŝi kaj gardi ŝin dum mia tuta vivo. Ŝi devis min servi, por ke mi povu vidi ŝin ĉiutage. Imagu mian koleron, pensu pri la honto, kiun ŝi faris al mi! . . . Mi ŝin trovis kun aliulo. Ambaŭ mi estis mortigonta per mia glavo, sed ili vekigis kaj petis esti juĝataj de la tribunalo. Ili min ofendis en mia propra palaco; sekve, miaj sinjoroj, juĝu, por ke mia ofendita honoro estu venĝata.

La tuta konsilantaro unuvoĉe kondamnis ilin al la morto, sed pri la maniero de l' ekzekutado oni opiniis malsame. Kelkaj diris, ke la kulpuloj estu pendigataj, aliaj preferis, ke ili estu radŝirataj; unuj deziris bruligi ilin aŭ dronigi kun multpezaj ŝtonoj je la kolo, sed ĉiuj samopiniis, ke la ekzekutado estu terura.

Tiam ekstaris unu reĝo, nomita Alfas, kaj li parolis: — Estas honto, ke la ĉi tieaj konsilantoj faras tiom da bruego en ĉeesto de nia estro. Unuj krias pli laŭte ol aliaj. Mi proponas, ke nur unu difinu la juĝon. Ni eksciis la opinion de nia sinjoro; ĉu ne estas juste, ke ni aŭdu, kion Floriso kaj Blankafloro havas por respondi al tio? — — En tio mi tute ne samopinias —, parolis la araba reĝo Balziero, — se ili estas ofendintaj nian sinjoron, tiam ni havas la rajton juĝi. Ili ne havas la rajton defendiĝi.

Intertempe la emiro jam ordonis venigi Florison kaj Blankafloron. Du serĝentoj enkondukis ilin, dum ili rigardadis unu la alian per okuloj ruĝaj de ploro. Floriso unua ekparolis, dirante:

— Sinjor' emiro, mi scias, ke mi devas morti, sed pardonu al Blankaflo-ro. Mi sola estas kulpa. Venĝu vin nur kontraŭ mi. Se mi ne estus trokuraginta enŝteliĝi en ĉi tiun turon, tiam al mia amatino ne estus farita honto. Sekve, mortigu nur min.

— Ne! — parolis la emiro per tondra voĉo, kiu ĉiujn tremigis. — Ne! vi ambaŭ mortos kaj eĉ per mia propra mano —. Li ekstaris kaj eklevis la glavon...

Sed Blankaflo-ro rapidis antaŭen kaj prezentis sian kolon. Tuj kiam Floriso tion ekvidis, li rapidis antaŭen, forpuŝis sian amatinon kaj diris: — Ĉiuj min mallaŭdus, se mi tion tolerus. Vi, kiu estas virino, ne mortu pli frue ol mi —, kaj li prezentis sian kolon, dirante plue: — Ekfrapu, mi estas preta! — Siaflanke Blankaflo-ro ekkaptis lian veston, tiris lin malantaŭen, lokis sin antaŭ la emiro kaj refoje prezentis sian kolon. Tiamaniere daŭris kelkajn fojojn; ĉiu volis morti unua.

La okuloj de la korteganoj pleniĝis je larmoj, kaj ili ekkompatis, eĉ la emiro estis kortuŝita kaj la glavo ekfalis el lia mano. Tiam unu duko, kiu deziris savi al ili la vivon, paŝis antaŭen kaj li parolis malkaŝe: — Mi opinias, ke nia sinjoro pardonu al ili ambaŭ. Lia honoro ne estus riskata pro tio. Kion ĝi al li utilis, se li mortigus ilin? Kaj se li pardonos al ili, tiam Floriso rakontu al ni, kiel li povis veni en tian fortan turon al sia amatino, por ke ni estu pli gardemaj estonte —. La emiro aŭdis kun plezuro, ke la duko probatalis pro la du geamantoj. Li promesis pardonon, se Floriso volus diri, kiel li eniris nerimarkite en la turon. — Miaj sinjoroj —, diris Floriso decidatone, — tion mi ne povas diri, kio ajn estu mia sorto, escepte, se vi antaŭe pardonos al tiu, kiu min helpis.

Tiam la emiro ekkoleris kaj ĵuris, ke neniam li konsentos en tio. La duko tamen ankoraŭ ne cedis;

li sin jetis antaŭ la piedojn de l' emiro kaj petegis: — Sinjoro, pardonu ankaŭ tiujn, kiuj helpis al Floriso. Viaj korteganoj ĝin petegas, ĉar kion povus utili al vi la morto de tiu helpinto? Floriso prefere rakontu sian aventuron. Estos pli bone, aŭskulti la historion pri Floriso ol vidi, ke la geamantoj mortas. Rigardu ilin, ili estas tiel belaj je korpo kaj vizaĝo, ke vane oni serĉas tian paron en la tuta lando —. Kaj ĉiuj ĉeestantoj ekkriis kvazaŭ per unu buŝo: — Sinjor' emiro, pardonu, kaj plenumu la peton de viaj korteganoj!

Fine la emiro cedis; li pardonis ne nur al la geamantoj, sed ankaŭ al tiuj, kiuj estis helpintaj ilin. Ne estas bezone diri, kiel ĝojis la juna paro. Floriso rakontis al ĉiuj pri siaj malhelpaĵoj, malagrablajoj kaj ĉagrenoj de post sia naskiĝo ĝis la tempo, kiam la emiro surprizis lin en la ĉambro de Blankafloro. Tuj kiam li finis sian rakonton, al kiu ĉiuj aŭskultis kun malfermitaj buŝoj, li faris kelkajn paŝojn antaŭen, genufleksis antaŭ la emiro kaj petis, ke li redonu al li Blankafloron, pro kiu li tiom multe suferis kaj riskis, ĉar sen ŝi li ne povus vivi. La emiro donis la manon al Floriso kaj lin starigis, tiam li kaptis la manon de Blankafloro kaj parolis: — Amiko mia, mi redonas al vi ĉi tiun fraŭlinon, kaj laŭ la moroj de la lando mi kavalirigas vin.

Post kiam ĉio finiĝis tiel prospere, grandaj preparadoj estis farataj por belega festo, ĉar la emiro portigis Klarison procesie al la templo, kie li rangaltigis ŝin kiel sian edzinon por gardi ŝin dum tuta sia vivo. En ĉeesto de ĉiuj princoj kaj altranguloj de la lando ŝi estis kronata je reĝino. Blankafloro ankaŭ estis portata al tiu sama templo, kie ŝi edziniĝis kun sia Floriso. Belega edziĝa festeno okazis; la emiro sidis sur la plej alta loko kaj ĉe lia flanko sidis la reĝino Klariso.

Flanke de tiu li sidigis Florison kaj Blankafloron kaj la aliajn, ĉiun laŭ sia rango. Okazis turniro, oni kantis, dancis kaj muzikadis kaj la festo daŭris multajn sinsekvantajn tagojn.

Al la festo partoprenis ankaŭ ambasadoroj el Hispanujo, kiuj ĵus alvenis kun la sciigo, ke la reĝo Fenuso kaj lia edzino estas mortintaj, kaj ke ĉie en la lando regis granda malordo.

Kiam Floriso tion eksciis, li malĝojis kaj petis permeson de la emiro returniri al sia patrujo. La emiro nevolonte konsentis, sed fine li cedis, donante al li la plej multekostajn donacojn el arĝento kaj oro kaj rekomendis lin al la protekto de la Dioj.

Tiel forvojaĝis Floriso kaj Blankafloro al Hispanujo, kie ili baldaŭ alvenis kaj estis akceptataj de la tuta popolo kun laŭtaj ĝojkrioj. Floriso estis proklamata kiel reĝo kaj Blankafloro kiel reĝino, kaj laŭ deziro de Blankafloro Floriso konvertis la tutan popolon al la kristanismo. Longe kaj feliĉe ili vivis kune, ekhavis unu filinon, nomitan Berta, kiu poste fariĝis la edzino de l' reĝo Pepejn.

Noto (por la leganto). Ĉirkaŭ la dektria jarcento vivis en Flandrujo, en la vilaĝo Assenede, poeto, nomita Didrik van Assenede. Ni posedas de li kavaliran romanon en versoj, titolitan: Floriso kaj Blankafloro (*Floris en Blanchefloer*), kiu antaŭ kelkaj jaroj la unuan fojon estis eldonata de Hoffmann von Fallersleben. Lia poemo ne estis originala, li nur faris imitajon de la franca originalaĵo: *Flore et Blanchefleur*, kiu jam antaŭe naskiĝis el la nature poema spirito de niaj mezepokaj prapatroj. La legendo estis tre amata en la mezaj centjaroj. Versajne ĝi estas jam tre malnova kaj devenis el Provence. Ĝin ankaŭ imitis Boccaccio, kaj ĝi eĉ aperis kiel greka traduko. Niaj prapatroj tamen ne kontentiĝis kun la poemo de Didrik, sed verkis el ĝi popolan romanon en prozo, kiu en ĉiuj epokoj volonte estis legata; en la lasta tempo tamen ĝi estas iom post iom forgesata. La romaneto en prozo, kies enhavon mi rakontis nur resume en ĉi tiu romano, versajne aperis en la 16a jarcento, sed neniu scias, kiu estas la verkinto.

Sesa Ĉapitro.

Neinvititaj aŭskultantoj — Sinjoro Klajn — Stanislas akompanas novan konaton eksterurben, kaj ilia interparolado — Unna leciono — Stranga klakado — Pri libroj — Koncerteto ĉe Klajn kaj kiuj ĉeestas — Kion Stanislas deziras fariĝi.

Teodoro estis aŭskultinta kun atento, kaj kvankam li komprenis nur la pli malgrandan parton, li tre sin amuzis dum la rakonto, kaj apenaŭ Stanislas ĉesis rakonti, la knabeto kunfrapis la manojn kriante:

— Hura! tio estis belega, morgaŭ vi denove ĝin rakontu, nun ni laboru je la trapezo.

Li saltis el la veturilo kaj estis kuronta al la gimnastikilo, kiam subite li ekhaltis, ĉar antaŭ li staris du viroj, kiuj, nerimarkite de la knaboj, jam longe kaj kun ridetantaj vizaĝoj estis aŭskultintaj same atente kiel Teodoro mem.

Unu el ili estis la doktoro, la alia estis fremda, tre malgrasa, maldika kaj longa sinjoro kun pala, velkinta vizaĝo. Li estis ĉirkaŭe kvindekjara, havis nek barbon nek lipharojn, sed tre dikajn grizigintajn brovojn, super kiuj sin montris multaj profundaj kaj longaj sulkoj. Liaj grandaj grizaj penetrantaj okuloj rigardis severe antaŭ sin kaj ĉio montris, ke li kutimadis ordoni. Lia vizaĝo, kvankam severa, tamen ne estis malafabla. Li portis kostumon el nigra ŝtofo, kiu sur kelkaj lokoj, precipe sur la genuoj, estis tre frot-eluzita. Li fumis el tre dika porcelana germana pipo, kiun li tenis per la dentoj kaj la maldekstra mano.

— Ha, ha, ha!! — ridis la bonhumora doktoro, — tio estis vere beleaga rakonto —, kaj sin turnante al la fremdulo, li diris plue:

— Ĉu ne vere, sinjoro Klajn?

— Eĉ tre bela —, respondis la fremda viro.

Stanislas, kiu estis sekvinta Teodoron, rigardis kun surprizo la du ne invititajn aŭskultintojn.

— Kaj jen via nova lernanto —, diris plue la doktoro.

La fremdulo fikse rigardis al la knabo, prezentante sian manon.

— Nu, la konatiĝo estas tre agrabla —, li diris.

Stanislas ne sciis kion diri, kaj li demandis al si:

— Kiu li estas? ... kion li devas fari kun mi? — kaj liaj demandantaj okuloj sin direktis sur tiujn de la doktoro, kiu demandis:

— Ĉu vi forgesis pri mia iama promeso?

— Ke mi lernos, doktoro?

— Kompreneble; nu, estas bone, ke vi tion memoras, ĉar ĝi estas signo, ke la promeso plaĉis al vi.

— Ho jes, doktoro!

— Nu, tiu sinjoro, kiu estas lernejestro, instruos vin, kaj hodiaŭ komenciĝos la unua leciono —; tiam gten-
dante la manon al sinjoro Klajn, li diris plue:

— Do, kiel interkonsentite! ... Ĝis renkontiĝo! — Tiam li iris paŝetante al sia laborejo, dum la lernejestro eliris la veturilejon kaj signodonis al Stanislas lin sekvi. La knabo obeis tre mirante, kien li iros.

— Mi kuniros ankaŭ! — ekkriis Teodoro, kiu jam estis sekvinta la ekzemplon de Stanislas, sed la fremdulo diris kviete, sed iom severtone:

— Ne, mia knabeto, vi ne kuniros, vi restos hejme; Stanislas revenos al vi je la vespero.

Kvankam Teodoro ordinare faris nur sian volon, ĉi tiun fojon la severaj grizaj okuloj de la fremdulo tiel

efikis sur lin, ke li ne kuraĝis malobei. Iom surprizite li restis staranta, postrigardis sian forirantan amikon, kaj kiam tiu estis malaperinta tra la elira pordo eksterdomen, li rapidis al sia avo por informiĝi pri tiu fremda sinjoro kaj pri multaj aliaj aferoj rilate al la foriro de Stanislas. Sinjoro Klajn kaj lia nova lernanto intertempe laŭiris kelkajn stratojn kaj post duona horo sin trovis ekster la urbo survoje al apuda vilaĝo. La instruisto marŝis per longaj gravaj paŝoj, ĉiam rigardante rekte antaŭ sin. Stanislas marŝis ĉe lia flanko kaj miris ankoraŭ pli multe ol antaŭe, tial ke la fremda sinjoro lin kondukis ekster-urben. Li tamen ne kuraĝis fari demandojn kaj atendis, ĝis lia kunulo ekparolus al li, de tempo al tempo kaŝe rigardante lin per unu rapida rigardo. La instruisto dume kviete elblovis dikajn nubojn da tabaka fumo el sia pipo. Fine li ekparolis, tamen tute ne rigardante lin:

— Ĉu mi marŝas tro rapide?

— Ne, sinjoro, mi povus marŝi pli rapide ankoraŭ; tio ne lacigas min.

— Via nomo estas Stanislas, ne vere?

— Jes, sinjoro: Stanislas Mareau.

La instruisto ĉesis fari demandojn, sed Stanislas, kuraĝiĝinte per la unua al li adresita demando, diris plue:

— Ĉu tio estas stranga nomo, sinjoro?

La instruisto ekblovis dikajn nubojn, pripensis momenton kaj demandis:

— Kial vi demandas tion?

— Ĉar la doktoro opinias, ke mi havas strangan nomon.

— Hm!... Jes, li opinias tiel, li ankaŭ al mi tion diris, kaj li estas prava.

Refoje elblovante kelkajn nubojn, li diris post momento:

— Ĉu tiu Mareau estis via patro?

— Jes, sinjoro.

— Mi ekaŭdis, ke li tre malzorgis pri via eduko...

Stanislas ne respondis, kaj la instruisto diris plue:

— Sed kun serioza volo, persistado kaj studado vi povos ankoraŭ lerni tre multe.

— Jes, sinjoro.

— Knaboj de via aĝo ordinare jam studadis kelkajn jarojn en legado, skribado, kalkulado, historio, geografio kaj aliaj fakoj. Ĉiu knabo kompreneble komencas la studadon en la unua klaso de la lernejo; sed mi opinias, ke vi ne amas sidi ĉe sesjaraj knaboj, tial mi instruos kaj instruigos vin private kaj ne en la publika lernejo, sed en mia propra domo. De nun vi ne povos plu ludadi tutajn tagojn kun la nepeto de la doktoro, ĉar la horojn, dum kiuj vi ne estos ĉe mi, vi devos pasigi hejme, farante taskojn pri skribado kaj tiel plu. Se vi estos diligenta, vi lernos multon en malmulta tempo, kaj mi esperas kaj atendas, ke vi faros vian eblon, ne pro mi, sed pro via estonto kaj pro via bonfaranto, la doktoro.

— Mi faros mian eblon, sinjoro.

— Ni vidos.

Ciam elblovante nubojn, la instruisto grave promenis plue, dum li faris ĉiajn demandojn al Stanislas pri liaj gepatroj, pri liaj vojaĝoj en Germanujo, en Polujo, en Holandujo kaj en aliaj landoj. Li ne informiĝis pri tio pro scivolemeco, sed por ekscii, kiel lia nova lernanto sin esprimos, por formi al si suprajn opinionon pri lia intelekto. Fine ili alvenis al aro da dometoj, formantaj la komenciĝon de la vilaĝo, kie staris la lernejo de Klajn. Tiu dometaro apartenis plejparte al laboristoj.

Ili preteriris kelkajn dometojn kaj tiam alvenis ĉe malnova preĝejo kaj dikega malalta turo, ĉirkaŭita de burĝaj konstruaĵoj. Unu el ili estis la domo de Klajn,

apud kiu staris la publika lernejo. La instruisto eniris sian loĝejon kaj lin sekvis Stanislas. Ili ekhaltis en koridoro kun pordo ĉe ĉiu flanko kaj unu ĉe la fino. La lasta malfermiĝis en ĝardenon kuŝantan post la domo. Ĉe la dekstra flanko de la koridoro estis la ĉambro, en kiun eniris la instruisto kaj Stanislas. Tuj post ilia eniro venis al ili renkonte ruĝvanga, malgranda, sed dika, kvindekjara virino. Kvankam ŝi estis nebela, ŝi havis agrablan, tute rondan vizaĝon kun bluaj okuloj, esprimantaj bonkorecon. Ŝiaj dentoj, kiujn ŝi ĉiam montris, kiam ŝi parolis aŭ ridetis, estis tiel blankaj, ke Stanislas miris pri ili. Tiu virino, kiu sin prezentis al Stanislas, estis la edzino de l' instruisto. Afable ŝi etendis la manon al la knabo kaj montris al li seĝon por eksidi.

— Ĉu Oskar ankoraŭ ne rehejmiĝis? — demandis la instruisto.

— Ne ankoraŭ —, kaj sin turnante al Stanislas, ŝi diris al li:

— Oskar estas nia filo; li estas muzika profesoro ĉe la konservatorio en la urbo.

Stanislas estis malfermonta la buŝon por responde ion diri, sed ne sciante kion diri, li tusetis.

— Li estas pianisto kaj tre lerta pri la muziko —, diris plue la instruist-edzino... — Ĉu vi ankaŭ amas muzikon?

— Jes, sinjorino, tre multe.

— Ĉu vi jam studadis muzikon?

Stanislas ruĝiĝis; li hontis pensante pri tio, ke li studadis ankoraŭ tute nenion.

— Eble Stanislas poste ĝin studados, almenaŭ se li havas muzikan talenton —, diris Klajn, kiu rimarkis la malĝojigan situacion, en kiu sin trovis la knabo.

— Volonte, sinjoro.

— Kial li ne havos talenton? — demandis la sinjorino, — ĉar li amas muzikon, li ja ankaŭ havos talenton.

— Ni vidos —, mallonge respondis Klajn.

La interparolado ne daŭris longe; la instruisto donis signon al sia edzino retiriĝi kaj ŝi foriris ridetante. La rideton sekvis stranga klaketado kvazaŭ de sonserpento; tia serpento tamen nenie estis videbla kaj Stanislas ekmiris, de kie venis tiu stranga bruetado. La instruisto nun altabliĝis; kaj sidigante la knabon ĉe sia flanko, li tuj komencis la unuan lecionon, kiu daŭris du horojn. Ĝi estis interrompata nur unu fojon, kiam la sinjorino enportis du tasojn da kafe, unu por la edzo, unu por la lernanto. Kiam ŝi metis ilin sur la tablon, Stanislas refoje aŭdis la strangan klaketadon kaj nua li opiniis, ke ĝi devenas de la tasetoj, sed ili staris senmove sur la teleretoj. Kiam la sinjorino foriris, Stanislas refoje aŭdis tiun bruetadon kaj vole-nevole lin trafis la ekpenso, ke la blankaj dentoj aŭdigis tiun klaketadon; li tamen ne povis longe pensi pri tio, ĉar la instruisto jam daŭrigis la lecionon.

Kiam la du horoj finiĝis, Klajn ekstaris, malfermis pordon flanke de la spegulo kaj aperigis sep bretojn, ĉiuj plensarĝitaj per libroj. Li vokis al si la knabon kaj demandis lin:

— Kion vi vidas sur tiuj bretoj, Stanislas?

— Librojn, sinjoro.

— Jes, sed kio estas libro?

— Oni legas ilin, sinjoro.

— Vi pravas, sed vi ne respondis al mia demando . . .

Libro estas en realo multaj folioj da papero, kunligitaj en unu tuton. Ekzistas multaj specoj de libroj. Tie antaŭ vi staras libroj, kiuj nin instruas pri historio, geografio, matematiko kaj cetero. Oni nomas ilin studolibrojn. Krom ili vi vidas tie librojn, utilantajn al ni

por pasigi la tempon laŭ agrabla maniero; ili estas la literaturaj verkoj. Unuj estas tre simplaj, aliaj kontraŭe malsimplaj. Unujn ĉiu povas facile kompreni, aliajn tamen komprenas nur personoj, kiuj studadis kaj legadis multajn simplajn verkojn. Estas literaturaj verkoj, nomataj romanoj. Romano estas literatura verko, penetranta la homan vivon kaj havanta ordinare kiel temon la amon de du personoj. Aliaj literaturaj verkoj enhavas dramojn. Dramon oni povas legi kaj ludi. Poste mi parolos al vi pli detale pri tio. Memoru nun tion, kion mi ĵus diris; mi volas aldoni la jenon. Libroj ĝenerale estas la plej bonaj, kaj se ili ne estas bonaj, ili tamen estas la plej seriozaj amikoj, kiujn ni posedas. Libroj neniam estas kapricaj, nome: ili ĉiam diras al la leganto tion saman, kaj neniam ŝanĝiĝas pri opinio, eĉ se oni forbruligus ilin. Estu rilate al tio simila al libroj.

Se vi lernos diligente, vi post kelkaj monatoj estos kapabla legi ĉiujn verkojn, kondiĉe ke ili estas redaktitaj en la germana lingvo; ĉar sur tiu tria breto staras libroj, kiujn malmultaj germanoj povoscias kompreni, eĉ se ili funde studadis sian gepatran lingvon. La libroj sur tiu tria breto estas francaj, kaj tiuj sur la kvara estas anglaj verkoj. Eble vi neniam lernos sufiĉe por legi ĉiujn tiujn verkojn, sed tio ne estas grava; la ĉefa afero estas por vi studadi tiom, ke vi estas kapabla legi la germanajn. Sur la kvina, sesa kaj sepa bretoj staras germanaj libroj. Mi nomas kelkajn tre klerajn homojn, kiuj verkis ilin. Jen estas la verkoj de Goethe, jen tiuj de Schiller. Memoru tiujn du famajn poetojn, ĉar poetoj ili estis, kaj memoru ĉion, kion mi rakontis pri libroj en ĝenerala senco, kaj mi estos kontenta. Kaj nun vi povas reiri al la doktoro. Faru zorge la taskojn, kiujn mi donis al vi kaj lernu diligente, por ke vi poste povu legi, skribi kaj kalkuli kiel decas. Estas

hodiaŭ sabato, kaj ĉar ĉiusabate mia lernejo estas fermita en la posttagmezo, mi mem povis nun instrui vin; tion mi tamen ne povas ĉiutage. Morgaŭ vi povos ludi kun la nepeto de la doktoro, sed lundon vi devos studadi la tutan matenon kaj la sekvantan posttagmezon mi atendas vin tie ĉi je la tria horo. Unu el miaj lernantoj, estonta instruisto, daŭrigos kun vi la de mi komencitan kurson; ĉiusabate mi mem prenos sur min la gvidadon pri viaj studoj, kaj ĉe tiuj okazoj mi ekscios, kiom da progresoj vi faris dum la semajno, sekve atentu kaj studadu diligente.

Klaja fermis la pordon de sia librobretaro, Stanislas prenis la kajerojn kaj la librojn, kiujn li bezonis, kaj iris for. En la koridoro lin renkontis la sinjorino. Ŝi ridetis afable al li, montris la ebure blankajn dentojn, malfermis por li la pordon kaj diris:

— Ĝis revido, mia amiko.

Stanislas salutis kaj survojiris hejmen, dum la domopordo fermiĝis post li. En tiu sama tempo aŭdiĝis refoje la sama antaŭa klaketado en la koridoro.

Dum lia promenado al la urbo Stanislas pensis pri la instruisto kaj pri tio, kion ĉi tiu estis instruinta al li, kaj li ekpensis pri la libro de sia patrino. Eble li povus legi ĝin poste. Subite li memoris, ke la doktoro estis dirinta: — Do forjetu, neniu povas legi tion —. Ŝajnis al li tamen, ke sinjoro Klajn kapablas legi ĝin, kaj li decidis montri la patrinan memorajon al sia instruisto; povus ja esti, ke li komprenas la lingvon, en kiu lia patrino skribis la kajeron.

Stanislas estis promesinta, ke li studados diligente, kaj li plenumis sian promeson. Klajn estis kontenta kaj kompreneble ankaŭ la doktoro. Malkontenta tamen estis

Teodoro, ĉar de post kiam Stanislas studadis, la knabeto perdis sian kunludanton, sed la doktoro baldaŭ trovis rimedon kontentigi sian nepeton: li promesis al li, ke li akompanos la avon, kiam ĉi tiu veturilo vizitos la pacientojn. Ĉe tiaj okazoj Mikelo, kiu sidadis flanke de la knabeto, enmanigis al li la ekstremajojn de la kondukiloj, kaj Teodoro, imagante, ke li kondukas la ĉevalon, tre sin amuzadis kaj ne pensis plu pri Stanislas, kaj ĉar jam alproksimiĝis la epoko, kiam Teodoro mem devus iri lernejon, Stanislas libere kaj senĝene povus dediĉi sin al sia studado.

Kvin monatoj pasis. Iun sabaton Stanislas refoje estis ĉe Klajn, kaj tie lin atendis agrabla surprizo. La sola filo de l'instruisto, kiu ĵus fianĉiĝis, estis hejme kun sia fianĉino kaj deziris konatiĝi kun Stanislas.

La instruisto tuj post la kursa horo enkondukis lin en la saloneton ĉe la maldekstra flanko de la koridoro, kaj tie li vidis junan viron, same longan kiel la instruisto mem. Li estis nebela kaj pala en la vizaĝo, sed havis afablan aspekton. Ĉiuj liaj movadoj esprimis modestecon kaj ĝentimecon, precipe en societo de fremduloj. Li sidis inter la tablo kaj la piano. Ĉe lia flanko, sed iom pli malproksime de tiu muzikilo, sidis la fianĉino. Ŝi estis mirinde bela fraŭlino, tre lukse vestita. Kontraŭe al sia fianĉo, ŝi kondutis tre facile kaj malĝene je ĉiu ajn kaj estis lerta parolantino, sed nur pri belaj vestoj kaj suprajaj ĉiutagaj temoj. Ŝi tamen tuj eksilentis babiladi, kiam oni parolis pri arto kaj scienco. La pianon ŝi tute ne rigardis, ĉar ŝi ne amis muzikon. Tion baldaŭ rimarkis Stanislas, ĉar kiam li eksidis post la ordinara reciproka saluto, kaj post kiam sinjorino Klajn refoje diris al la knabo, ke ŝia filo estas profesoro ĉe la konservatorio, kaj ke li tre tre bele kaj rave ludas sur la piano, la vizaĝtrajtoj de la fianĉino tuj diris: — Mi petas, ĉesu

do paroli pri muziko, tiu temo tute ne interesas min. — La bonkora sinjorino tamen, ne rimarkante tion, diris plue; — Kaj mia filo sendube hodiaŭ vespere bonvolos ludi kelkajn muzikaĵojn, almenaŭ se Stanislas tion ŝatas.

Stanislas ne sciis, kion respondi. Li deziris esti agrabla al ĉiuj, kaj li sin trovis en embaraso. La pianisto ridetis ĝenate, lia fianĉino prefere ne aŭdus lin ludi; la patrino, kiu estis tre fiero pri sia filo, kompreneble deziris, ke li tamen ludu. Stanislas mem partoprenis tiun deziron. Li ne respondis tuj, sed rigardis al sia instruisto, kvazaŭ por peti helpon. Klajn, kiu estis lerta pri karakteroj, divenis kion signifas la rigardo de la knabo, kaj li diris:

— Stanislas tre ŝatas la muzikon, tion li jam al mi diris; mi sekve proponas, ke Oskar ludu iom antaŭ la foriro de Stanislas.

Oskar kapjesis, sinjorino Klajn afable ridetis kaj refoje aŭdiĝis la stranga klaketado, la fianĉino ekĝemis, tamen ŝi ĝojis, ĉar Oskar ne ludus la tutan vesperon; la instruisto ŝajnis ne diveni la pensadon de sia estonta bofilino, kaj Stanislas ŝajne sen celo rigardadis rekte antaŭ sin por eviti la rigardon de la bela fraŭlino. Intertempe sinjorino Klajn enverŝis kafon kaj prezentis kuketojn, Klajn fumadis el sia porcelana pipo kaj la societo babiladis pri kuvo kaj pluvo, pri vetero kaj cetero, kaj la fraŭlino estis en sia elemento; ŝia lango moviĝadis kiel klaketilo, ŝiaj belaj okuloj briladis, sed ŝi ne rimarkis, kiel terure enuis ŝia fianĉo, kiun tute ne interesis, ĉu hieraŭ pluvis aŭ ne pluvis, kaj ke pasintan vintron la ĉapeloj de la sinjorinoj estis ornamitaj per multekostaj plumoj. La pianisto volonte estus ekparolinta kun sia patro pri aliaj aferoj, sed li ne kuraĝis, timante esti malagrabla al Berta.

Je la sepa horo la leteristo alportis la gazeton kaj leteron por Oskar.

Klajn jetis rapidan rigardon en la gazeton kaj Oskar malfermis sian leteron.

— De kiu? — demandis lia patrino, scivole etendante la kolon por vidi, kiu sendis la leteron.

— De Schulze, panjo —, kaj li eklegis.

— De Schulze, la orkestestro de l' opero?

— Jes —, kaj Oskar legis plue; tiam li diris:

— La okan mi devos partopreni en Lohengrin.

Sinjorino Klajn klarigis al Stanislas, ke Lohengrin estas opero de Wagner, la fama germana komponisto, kaj ke ŝia filo kunludos en la orkestro.

— Lohengrin estas belega —, ŝi diris plue, — mi ĝin vidis jam trifoje, sed mi dezirus vidi ĝin centfoje. Ĉu vi jam vidis operon, Stanislas?

— Neniam, sinjorino, en la cirko oni ne prezentis operojn.

— Oni tamen muzikadas tie.

— Jes, sed ne bele, ordinare ni havis kvar aŭ kvin muzikistojn, kiuj ludis laŭtege, sed malbele.

— Vi sendube volonte aŭdos operon, ĉu ne?

— Ho jes, sinjorino.

— Nu, eble mia filo povos havigi al vi invitilon por la estonta opéro.

— Kun plezuro —, diris Oskar.

— Mi ne scias, ĉu la doktoro trovos tion bona —, mallaŭte diris la knabo, kaj li refoje rigardis al la instruisto.

Klajn komprenis, kion demandis la okuloj de Stanislas, kaj li respondis:

— Kompreneble li trovos tion bona, la doktoro estas amanto de muziko; estas tamen bedaŭrinde, ke li ne havas la tempon ĝui ĝin.

— Oni diras, ke la muziko plinobligas la morojn —, diris la sinjorino.

— Vi pravas, ĝi vere plinobligas la morojn kaj la animojn, almenaŭ se la animo estas sufiĉe influebla je muzikaj impresoj.

Berta silentadis, ŝia rapidmova lango ripozis de la tempo, kiam oni parolis pri arto. Indiferente ŝi rigardis antaŭ sin, fiksan la belajn okulojn sur pentraĵo, kiu pendis kontraŭ ŝi sur la muro kaj prezentanta balsalonon kun bele vestitaj gesinjoroj. Sinjorino Klajn estis respondonta ion, sed anstataŭ respondi ŝi palpebrumis kelkajn fojojn, tiris supren la supran lipon, subite ternis, kaj je la granda teruro de Stanislas la ebure blanka dentaro de la ternintino saltis el ŝia buŝo kaj falis tintante sur la tablon meze de la tasaro.

— Oj, miaj dentoj! — ŝi ekkriis kaj rapide kaptante ilin, ŝi per unu sola movo remetis ilin en la buŝon.

— Berta estis ekridegonta, sed ŝi kovris al si la buŝon kaj retenis la ridegon; ŝiaj brilantaj okuloj tamen esprimis klare, kiun impreson faris sur ŝin tiu intertempa okazintaĵo.

Vidante kun kia facileco la sinjorino remetis la dentaron, kaj ke nenio danĝera aŭ terura estis okazinta, Stanislas baldaŭ rekvietiĝis, sed ankoraŭ kelkan tempon la pala koloro, kiun kaŭzis tiuj dentoj, postrestis sur liaj vangoj. Tiajn dentojn li neniam antaŭe vidis, li eĉ ne sciis, ke ili ekzistas kaj subite la enigmo de la klaketado fariĝis al li klara kaj solvebla.

Oskar kaptis kelkajn muziklibrojn, foliumis dum du aŭ tri minutoj kaj fine elektis muzikaĵon por ludi. Per tio oni baldaŭ forgesus la okazintaĵon pri la dentaro de lia patrino, kaj krom tio li estis promesinta al Stanislas, ke li ludos.

— Kion vi elektis, Oskar?

— Un Orage —, panjo.

— Ho, tio estas bela, sed klarigu antaŭe la enhavon, por ke Stanislas pli bone komprenu.

Oskar klarigis:

— „Un Orage“, aŭ „Uragano“, estas bela, sed simpla salona muzikajo de Weber, kaj la enhavo estas la jeno: Paŝtisto rehejmiĝas kun sia ŝafaro. Dume li fajfas arion sur la fluto. Iom post iom aŭdiĝas de malproksime la bruo de fulmotondro. Ĝi alproksimiĝas pli kaj pli; ekpluvas, la vento ekblovegas tra la branĉoj de la arboj, kaj fine furiozas terura uragano. Ĉie oni aŭdas ekkriojn de angoro kaj sonorilojn de vilaĝaj turoj. Poste iom post iom rekvetiĝas la naturo.

La bela Berta, preskaŭ ne aŭskultante tiujn klarigojn, moke pintigis la buŝon kaj indiferekte ĵetis siajn rigardojn al la balsalono. Stanislas kontraŭe aŭskultis kun streĉita atento; la klarigo de Oskar lin interesis pli ol ĉiuj temoj, ĝis tiam pritraktitaj de la eta societo, kaj li estis scivola, kiel Oskar kapablos esprimi tiujn samajn klarigojn pere de sia piano. Oskar sidiĝis antaŭ la muzikilo kaj ekludis. Estis, kvazaŭ li subite fariĝis tute alia viro. Lia ĝeneco ekmalaperis kaj ŝajnis, kvazaŭ lin tuŝis mistera magia bastono. Sengene li sidis; rapide kiel fulmo la fingroj de l' artisto sin movadis super la klavoj, kaj ĉiu lia ektuŝo naskis tonon tiel belan, ke Stanislas, kiu neniam antaŭe aŭdis bonan pianiston, estis ravita. La knabo aŭskultis senmove kaj kun retenita spiro. Li komprenis ĉion, kion ludis la pianisto kaj kun miro rigardis lin kaj la rapide moviĝantaj fingroj. Kvankam li ne ĵetis eĉ unu rigardon al Berta, li tamen vidis ŝin sidantan kun la moke pintigita buŝo, kiu ne nur ĝenis la knabon, sed indignigis lin. Li ĝojis, ke la fianĉo ne povis rimarki la sintenadon kaj la konduton de sia karulino, ĉar sendube li estus ofendita, se li povus ilin vidi. La pianisto, rimarkante nenion, sed nur sin donante al la muziko, majstre daŭrigis ludi. Lia

patrino kun mieno, kiu esprimis feliĉon kaj fierecon pro la filo, sidis silente kaj ĝojis pro la talento de sia filo, kiu en la tuta urbo estis konata kiel unu el la plej famaj profesoroj de la konservatorio.

Klajn kviete fumadis, kaj aŭskultante, li, kiel vera pedagogo, ekzamenis la mienon de Stanislas.

— Li amas la muzikon —, li diris al si mem, — tion mi klare vidas, la muzikaĵo parolas al lia koro; se li havos talenton por studadi kun sukceso la muzikon, tiam mi proponos al la doktoro, ke la knabo sekvu la kursojn de la muzika lernejo.

Fine „la Uragano“ kvietiĝis, la paŝtisto estis rehejmiĝinta kun la ŝafaro kaj Oskar ĉesis ludi.

La bela Berta eligis ĝemeton, ĝojante ke ŝi povos refoje babiladi pri ĉiutagaj temoj, pri belaj ĉapeloj kaj cetere; sed ho ve, Oskar ekfoliumis en la muzika libro, kaj elektinte duan numeron, li ekludis „la Kalifo de Bagdado“. Tiu muzikaĵo, kiu estas pli longa ol la antaŭa, tedis la fianĉinon en terura maniero. Ŝi tamen devis silente atendi ĝis la fino. Kiam post „la Kalifo de Bagdado“ Oskar estis serĉonta trian numeron, ŝi ne povis pli longe deteni sian senpaciencon, kaj por la unua fojo dum la tuta vespero ŝi turnis sin al la iama cirka knabo kaj demandis:

— Ĉu vere vi amas muzikon?

— Ho jes, fraŭlino, precipe tian muzikon.

— Ĉu vi dezirus fariĝi pianisto? — subite demandis Oskar, turnante sin sur sia seĝo kaj rigardante al la knabo.

— Jes, sinjoro, se nur konsentus la doktoro.

Oskar rigardis al sia patro; ĉi tiu prenis la pipon el la buŝo, blovis antaŭ sin du nubegojn da fumo kaj respondis:

— Nu, mi parolos pri tio kun la doktoro.

La instruistedzino diris nenion, ridetante kaj de tempo al tempo klaketante la blankajn dentojn, ŝi en verŝis kafon, prezentis kuketojn, kaj kiam la kamena horloĝo ekbatis la okan horon, Klaju diris:

— Stanislas, estas la oka, mia amiko, la tempo de via foriro alproksimiĝis.

Stanislas ekstaris, kaj dankinte la pianiston pro la ludado kaj salutinte la societeton, li eliris kaj survojiĝis al la urbo.

Strangaj pensadoj amasiĝis en lia kapo. Multfoje li estis aŭdinta muzikon en la cirko, sed la tieaj muzikistoj neniam al li plaĉis; la ludado de Oskar tamen estis farinta sur lin tian impreson, ke li ne povis forigi ĝin el sia animo, kaj tiun vesperon li enlitiĝis kun la deziro, ke lia instruisto baldaŭ parolu kun la doktoro kaj ke ĉi tiu konsentu la proponon, kiun Klaju estis aludinta tiun vesperon. /

Sepa Ĉapitro.

La moviganta, minacanta glavo — Pri Paganini — La bruado en la kiurejo silentigas — Sinjorino Stuthejm faras teruran konfeson — Kial ŝi sen interrompo laboradas.

Tri jaroj pasis. Stanislas sidis en la salono de la doktoro Stuthejm kaj studadis.

Estis dimanĉo kaj en la mateno; la doktoro ĵus eliris veturite kun Mikelo kaj en la domo estis nur Stanislas, la servistino kaj la doktoredzino. Teodoro estis irinta al kamarado kaj ankoraŭ ne rehejmiĝis.

Ĉio estis silenta en la salono, oni aŭdis nur la unu-tonan tiktakadon de la staranta horloĝo, sur kies ciferplato la glavo de la soldato seninterrompe kaj kun mirinda reguleco moviĝadis supren-malsupren, supren-malsupren laŭ tio, ke la pendolo svingiĝis dekstren-maldekstren, dekstren-maldekstren...

Stanislas tamen ne aŭdis la tiktakadon, nek vidis la glavon de la soldato. Lia atento ne estis interrompata eĉ de la bruo en la kiurejo, kie la sinjorino kiel kutime laboradis kaj purigadis, nek de la preterulantaj veturiloj ekŝtere sur la strato. Kun streĉita atento li studadis la historion pri la muziko kaj pri la vivo de famaj muzikistoj kaj komponistoj.

Por ordinara knabo, kiu studadis nur tri jarojn, tiu studado estus multe tro malfacila, sed Stanislas ne estis ordinara lernanto. Li sentis jam ĉe la komenco de la kurso, kiam al li donis la instruisto Klajn, ke li devus lerni pli multe ol alia komencanto, ne nur, ĉar li estis

pli aĝa ol aliaj komencantaj lernantoj, sed precipe pro la multo, kiu restis al li por studadi. En malmulta tempo li sekve lernis tiom, kiom aliaj knaboj lernas en ses aŭ sep jaroj, tolerante al si mem preskaŭ neniun liberan tagon. Dank' al sia korpa kaj spirita forteco li povis elportadi tiun streĉitan studadon, kaj liaj progresoj estis tiaj, ke li post tri jaroj kapablis studadi la samajn fakojn, kiujn ordinaro studadas lernantoj post sepjara studado. Li do estis studatinginta samaĝajn knabojn, vizitadis nun la publikan lernejon en la urbo kaj dum kelkaj vesperoj en la semajno la kursojn de piano en la konservatorio sub la gvidado de profesoro Klajn, kies plej bona lernanto li estis. Kvankam li partoprenis nur porpiano-kursojn, li tamen devis studadi la vivojn de ĉiuj famaj muzikistoj kaj komponistoj.

Klinita super sia libro, apogante la kubutojn sur la tablo, antaŭ kiu li sidis, kaj ripozigante la kapon sur ambaŭ manplatoj, tiel ke la fingroj estis tute kovritaj de la luksaj, belaj harbukloj pendantaj sur la alta frunto de la knabo kaj ĉiuloke ĉirkaŭ lia kapo, li jus legis kelkajn specialaĵojn pri Paganini.

Li legis, ke strangaj rakontoj pri tiu fama violonisto diskuris la mondon. Kelkaj certigis, ke Paganini mortigis sian propran patrinon kaj ke li ĝemadis multajn jarojn en malliberejo, kie la gardisto konsentis, ke la artisto sin dediĉis al sia arto. La violonisto, por pasigi la tempon kaj kontraŭbatali la enuon, ludis kaj ludadis sur sia violono, ĝis kiam restis sur ĝi nur unu kordo, kaj ĉar neniun zorgis pri novaj, li fine pristudadis sur tiu sola restanta G-kordo multajn muzikaĵojn. Jam antaŭe, kiam sur la instrumento troviĝis nur la G- kaj la E-kordoj, li komponis en la malliberejo la fame konatan muzikan interparoladon inter du geamantoj. La alta E-kordo prezentis la amatinon kaj la alia la

amanton. Stanislas legis pri tio, pri la avareco de Paganini, pri la amo, kiun li sentis por sia sola fileto kaj ĉio tio ĉi tre lin interesis. Li do ne rimarkis kun kiom da bruado la sitelo en la kuirejo estis metata kaj remetata sur la kahelojn, kaj kun kia furiozeco la balailo frotadis tuj poste tiujn samajn kahelojn. Li legis kaj legadis, image sekvante la vivon de Paganini, pri kies arto li miris kaj kies muzikan karieron li mem tiel volonte laŭirus, ĉar Paganini, vivante nur por sia arto, estis feliĉa en sia arto, kaj li (Stanislas) same deziris vivi por sia arto. Li sciis, ke li posedas la bezonajn talentojn, li sciis ankaŭ, ke lia muzika instruado estas bonega, ke lia profesoro estas kontenta pri li; kial do li mem ne fariĝus fama artisto?...

Li revis, revadis, dum la pendolo de la horloĝo regule svingiĝadis tiktakante de unu flanko al alia, kaj la minacanta, sed neniam frapanta glavo samtakte sin movadis supren-malsupren, supren-malsupren...

Kiam ni sidas kvietaj en nia ĉambro, ĉu legante, ĉu skribante, ni preskaŭ neniam rimarkas la regulan tiktakadon de la horloĝo, sed apenaŭ ĝi ekhaltas, ni tuj rimarkas tiun ŝanĝon en nia ĉirkaŭaĵo, kaj vole-nevole ni levas la kapon kaj rigardas al la horloĝo, mirante, ke ni ekaŭdis tiun subite ĉesantan unutonon bruetadon.

Stanislas ankaŭ mirigite levis la kapon kaj aŭskultis. La ĉiam ripetiganta bruo subite eksilentis... Ĝi ne estis la horloĝo, kaj sur la strato aŭdiĝis ankoraŭ la paŝoj de preterirantoj kaj la rulado de la veturiloj. Estis do io alia, kio vekis la atenton de la studanta knabo. Li plue aŭskultis kaj ekrimarkis, ke ĉio en la kuirejo fariĝis senbrua. La sitelo ne estis plu metata tien kaj aliloken, la balailo ripozis kaj eĉ la buŝo de la babilema servistino restis fermita.

— Kio okazis en la kuirejo? — demandis al si la knabo, sed li ne havis la tempon longe sin okupi pri tiu demando, ĉar la salonpordo ekknaris kaj sur la sojlo staris la sinjorino.

Stanislas ektimiĝis vidante ŝin; neniam ŝia vizaĝo estis tiel pala, tiel flave pala kiel nun, kaj ĝiaj trajtoj montris tiom da angoro, ke tuj la ekpenso, ke io terura okazis, eniris en la kapon de la knabo. Li estis parolonta, sed ne kapablis. Li rekte eksidis sur la seĝo, forpuŝis la libron kaj rigardis al la pala virino, kiu kun ŝanceliĝantaj paŝoj alproksimiĝis, lasante post si la pordon nefermita.

Stanislas fine demandis balbute:

— Kio... fariĝis? — tiam li eksilentis, la lango algluiĝis al la palato de lia buŝo kaj kun neesprimebla miro kaj ektimo li fiksas siajn nigrajn okulojn sur la virino.

Ŝiaj sekiĝintaj manoj (kvazaŭ manoj de miljara mumio) kun nekalkulebla nombro da sulkoj pro la ĉiama purigado kun sapakvo en la kuirejo, pendis kvazaŭ velkintaj ĉe ŝiaj flankoj kaj tremetadis.

— Stanislas... —, ŝi flustris kun premita voĉo, kaj subite ŝi ekhaltis kaj restis staranta ne malproksime de la knabo.

— Stanislas...

— Kio estas...?

— Ho Stanislas... —, refoje ŝi ekhaltis paroli.

— Ĉu okazis io kun la servistino?

— Ne..., ŝi eliris...; mi ŝin elirigis komisie por esti sola dum kelkaj momentoj...; ĉar mi havas ion por diri... Ĉiuj nun estas for, nur ni ambaŭ estas en la domo...

Refoje ŝi ĉesis paroli, tiam subite ŝi kovris al si la okulojn per la flavaj manoj kaj eligis subpremitan ek-

krion, kiu penetris la animon de la knabo. Li volis ekstari por iri al ŝi, sed ne povis, li atendis ion teruran kaj restis sidanta senmove, la okuloj fiksitaj sur la malfeliĉulino, kiu staris antaŭ li.

— Stanislas . . . , mi havas ion por diri . . . , por konfesi al vi . . . Vi estas tiel-bona knabo, al vi mi kuraĝas paroli . . . , nur al vi . . .

Nerva tremo trakuris tra ŝia tuta korpo, ŝi ŝanceliĝis kaj falis surgenue antaŭ la knabo, kiu fariĝis pli kaj pli pala pro emocio.

Fine li kapablis paroli.

— Sinjorino, kio do fariĝis! . . . vi ja tremegas, vi estas malsana.

— Ho ne, mi ne estas.

— Vi laboris tro multe.

— Jes, mi laboris . . . , ĝis nun mi havis la lortojn por labori, sed ili estas forlasontaj min . . .

— Sed kial tiel labori? . . . La servistino ja estas en la domo por labori; vi laboras tro multe . . .

— Ho ne, Stanislas, mi devas labori, ĉiam labori . . . Ho Dio . . . kompatu min!

Ŝi eligis profundan ĝemon kaj rampante antaŭen ĝis Stanislas, ŝi faligis la kapon sur liajn genuojn kaj ekploris.

— Vi nepre devas ripozi, sinjorino; kredu al mi, tiu ĉiama laboro en la kuirejo mortigos vin.

— Ho ve, Stanislas; mi ja devas labori . . . , mi ja ne povas ne labori.

— Sed kial? — Stanislas rigardis al la kompatinda virino. En klinita sintenado ŝi staris surgenue antaŭ li kaj ŝia tuta eksteraĵo naskis indan kompaton. Ĝis antaŭ kvarona horo ŝi estis laborinta kiel sklavino, kaj la akvo, kiu malsekigis ŝiajn botojn kaj vestojn, elgutetis el ili sur la tapiŝon kaj estis lasinta siajn postsignojn de la salona pordo ĝis la tablo.

— Kial? — ŝi respondis, — ĉar ŝi ordonis tion al mi antaŭ ol morti —. Ŝi levis la kapon kaj rigardis al la knabo.

— Ŝi frenezigis —, pensis li, kaj ŝi tuj divenis lian penson.

— Ne pensu Stanislas, ke mi perdis la prudenton —, ŝi diris plue, — mi ja tute ne perdis ĝin...

— Sed mi ne komprenas, kio...

— Vi ne povas tion kompreni, kaj ĝuste tial mi nun venis por komprenigi al vi... nur vi povos tion kompreni, ne la aliaj... Ho, Stanislas, se vi sciis, se vi sciis!... sed mi ĝin rakontos al vi, eble vi min forpuŝos kun abomeno kiel lepran hundon, sed tion mi ja indas, ĉar mi indas pli malmulte ol lepra hundo.

— Vi?... Vi sinjorino, kiu estas tiel bona al ĉiuj!

Ŝi ekstaris kaj dum ŝiaj trajtoj kuntirigis konvulsie, ŝi flustris:

— Ho Stanislas... fine mi devas ĝin eldiri... fine vi ekaŭdos, kio mi estas, ĉar vi trompigis pri mi... mi tute ne estas bona, mi estas mizerulino..., mi estas krimulino.

La miro de la knabo pligrandigis pli kaj pli, ŝi tion rimarkis kaj diris plue kun flustranta voĉo:

— Mi estas la plej granda krimulino en la urbo..., mi estas mortigintino.

Stanislas estis atendinta ion teruran, sed ne tion; li tamen ne kredis al la paroloj de la sinjorino, kaj ŝiaj penetremaj okuloj tion rimarkis tuj.

— Vi ne kredas al mi —, ŝi flustre diris; sed mi rakontos tion, kio okazis, kaj tiam vi kredos, ĉar ĝi ja estas vera.

Ŝi etendis la manon al la ciferplato de la horloĝo kaj diris:

Ĉu vi vidas tiun moviĝantan glavon?... Ĝi minacadas..., nur minacadas kaj ne frapas...; sammaniere al mi minacadas jam dum multaj jaroj la du vitrecaj okuloj de mia viktimo... Preskaŭ sen interrompo ili traboras mian animon, ĉiam ili estas antaŭ mi, nokte kaj tage; eĉ dum mi dormas, ili min persekutas kaj nur tiam, kiam mi laboras, ili iom post iom foriĝas, sed tuj revenas, kiam mi volas ripozi pro laceco... Tial mi ĉiam laboras. Ĉiumatene mi purigas la kuirejon jam dum multaj sinsekvantaj jaroj. Neniu scias kial, nek la doktoro, nek la servistino, nek iu alia... Mi volis diri ĝin al neniu, ĉar tute sola mi volis porti la ŝarĝon, kiu pezas kiel plumbo sur mia konscienco. Mi volis porti ĝin, ĝis kiam ĝi rompus mian koron aŭ faligus min senrestariĝe. Sed mia koro ne rompiĝis kaj mia korpo ne falis sub mia ŝarĝo...

Ŝi parolis ĉiujn tiujn vortojn kvazaŭ en deliro kaj rigardante nur la ciferplaton, sur kiu la soldato de Salomo swingadis la minacantan glavon. Fine ŝi deturnis la okulojn de tiu loko kaj direktante ilin sur la knabon, ŝi diris plue:

— Neniam oni supozis, kial mi tiel laboradis, ĉar neniu iam eksciis tion, kio okazis kun mi kaj ŝi; neniu ekaŭdis la terurajn vortojn, kiujn ŝi parolis, kiam ŝi mortis, neniu scias, kiel ili ankoraŭ nun sonas kaj sonadas en miajn orelojn, penetras mian animon kvazaŭ per tranĉanta glavo. Tiuj vortoj formortiĝis kaj jam ne aŭdiĝas, kiam mi laboradas; sed apenaŭ mi ekripozas, ili denove resonadas en miajn orelojn. Nur miaj bruantaj balailo kaj sitelo povas silentigi la buŝon, kiu elparolis ilin.

Stanislas estis demandanta, kiu estas tiu, pri kiu la sinjorino parolis, sed ŝia vizaĝo tiel rigidiĝis en terura tordiĝo, ke li ne povis eligi unu demandan vorton.

Refoje ŝi montris la soldaton sur la cifereplato, frustrante:

— Rigardu!... tiun minacantan glavon, kiu tamen neniam ektrafos sian celon, tiun glavon ŝi fingre montris al mi, kiam ŝi kuŝis tie antaŭ la horloĝo..., kaj dum strio da sango elŝprucis el ŝia buŝo sur tiun tapiŝon, ŝi eldiris tiujn vortojn, minacantajn same terure kiel tiu glavo...

La kompatindulino tremetis kaj refoje kovris al si la vizaĝon per la velkintaj manoj.

— Kion do ŝi diris? — demandis Stanislas.

— Ŝi diris: Vi min mortigis, sed la tempo venos, kiam vi staros antaŭ via juĝanto same kiel tiu malbona virino tie staras antaŭ la ŝia... Kaj kiam mi genufleksis antaŭ ŝi por peti ŝian pardonon, tiam ŝi forpuŝis min kun la teruraj vortoj: Ne tuŝu min, iru for kaj laboru, ĝis kiam via koro krevos same kiel nun krevis la mia.

Ŝi eksilentis momenteton kaj rigardis al Stanislas, tiam ŝi flustris:

— Kaj mi laboris kaj laboradis por plenumi ŝian ordonon, sed mia koro ne krevis... Ho, ke ĝi krevis..., ĉar nur tiam mi trovus ripozon..., sed mi daŭrigos laboradi, ĉar tia estas ŝia volo.

— Sed kial laboradi?

La antaŭa tordiĝo reaperis sur la vizaĝo de la sinjorino.

— Mi rakontos tion, Stanislas, nur al vi mi ĝin rakontos, sed kio ajn okazos, neniam parolu pri ĝi.

Stanislas ekstaris por meti seĝon por ŝi, ĉar li timis ke ŝi falus, sed per rifuza gesto ŝi detenis la knabon.

— Ne!... mi ne volas sidi, ĉar sidi estas ripozi. Mi volas stari, kaj starante mi rakontos... Vi pensas kaj diris, Stanislas, ke mi estas bona, sed vi trompiĝas; mi estas la plej malbona el ĉiuj virinoj, kaj iam mi estis la plej egoista kaj la plej fiera.

Stanislas, pensante pri la ĉiama laborado de la sinjorino, pri ŝia ĝentileco kaj bonkoreco al ĉiuj, kaj pri la ĉifonaj malsekaj vestaĵoj, kiujn ŝi portadis, refoje ekopiniiis, ke ŝi deliras, ĉar li neeble povis kredi al ŝiaj misteraj vortoj. Se li estus iam aŭdinta, ke kelkaj homoj estas persekutataj de monomanio, tiam li sen ia dubo tuj pensus, ke antaŭ li staras monomaniulino, sed ĉe la ekzistado de tia spirita deflankiĝo ĉe la homoj estis al li tute nekonata.

Ne atendante la efikon, kiun faris sur la knabon ŝiaj vortoj, la sinjorino diris plue:

— Kiam mi estis juna knabino, mi estis kvazaŭ la estrino en mia gepatra domo. Miaj gepatroj estis tre riĉaj, kaj ĉar mi ne deziris vizitadi la publikan lernejon, mi ekhavis privatajn instruistojn, kiuj al mi instruis, kaj ĉar mi estas egoista kaj ambicia, mi volis lerni multe pli multe ol aliaj knabinoj el mia rango, nur por esti supera al ili ĉiuj. Mi lernis fremdajn lingvojn, la desegnan arton, mi lernis preskaŭ ĉiujn sciencojn kaj ankaŭ muzikon. Mi ludis mirinde bele sur la piano kaj sur la jena (ŝi fingre montris la instrumenton, kiun uzis ordinare la knabo), mi ludis la samajn muzikaĵojn, kiujn vi nun ĉiutage studadas. Mi havis talenton kaj ĉiuj min admiradis. Tio tamen ne kontentigis min, mi volis esti brilanta stelo inter ĉiuj aliaj ludantoj; mi volis esti artisto de unua rango, kaj sen dubo mi estus trafinta tiun celon, se ne io stranga kaj terura subite estus ŝovinta barilon antaŭ ĉiujn miajn intencojn kaj planojn. Mi tiam konatiĝis kun sinjoro Stuthejm. Li estis bona viro kaj havis doktoran titolon kaj ĉio tio decidigis min fariĝi lia edzino. Ni havis unu infanon, kiel vi scias, kiu estas la patrino de la eta Teodoro. Kiam mia filino estis kvinjara, mi havis du servistinojn en ĉi tiu domo, unu por la kuirejo kaj unu, kiu sin okupadis pri la

ceteraj mastrumaj laboroj, ĉar mi mem laboris neniam; mi estis tro fieri por labori. Mi nur studadis kaj ludadis sur mia piano. Tiu dua servistino, speco de ĉambristino, estis tre malforta kaj iom malsanema knabino de dudek jaroj... Ŝi laboris pli multe ol povis elporti ŝiaj korpaj fortoj, sed tion mi tiam ne rimarkis kaj atentis; mi eĉ ne pensis pri io tia. Mi kontraŭe nur ŝin rapidigis, riproĉis ŝin, se ŝia laboro ne marŝis sufiĉe rapide. Unu matenon, post kiam ŝi estis laborinta en ĉi tiu salono, ŝi devis enpaki kelkajn grandajn kofrojn por parencino mia, kiu estis ĉe ni dum kelkaj tagoj kaj kiu estis forironta al Parizo. Mi ludis sur la piano kaj ŝi enpakis. Mi memoras, ke kelkfoje ŝi spiregis pro laceco, sed mi preskaŭ ne atentis tion; ŝi ja estis nur ĉambristino kaj destinata por labori. Kiam la kofroj estis plenaj, ŝi devis porti ilin en la koridoron, ĉar veturilo estis venonta por veturi ilin al la stacidomo. Kiel mi jam diris, la kofroj estis grandaj, kaj ĉar ili enhavis librojn, ili estis tro pezaj por ŝi. Kun peno kaj streĉado de ĉiuj fortoj ŝi forportis la pli malgrandajn en la koridoron, kaj ĉar ŝi sentis, ke mankas al ŝi la fortoj forporti la grandajn, ŝi demandis, ĉu mi konsentas, ke la kuiristino helpu ŝin. Mi malkonsentis, riproĉante ŝin akre, ke ŝi ĉiam interrompas mian studadon, kaj ke ŝi estas tro maldiligenta eĉ klopodi forporti la kofrojn. Ŝi mordis al si la lipojn, ĉar miaj riproĉoj estis maljustaj kaj vundis ŝian memestimon. Ŝi ne respondis kaj levis kofron. Apenaŭ ŝi faris du paŝojn, ŝi eligis krimon de doloro. La kofro refalis sur la tapiŝon kaj ŝi ekpalsis ambaŭmane sian bruston, dum morta paleco kovris ŝian vizaĝon. Mi ekhaltis ludi kaj rigardis ŝin kun surprizo. Ŝi ŝanceliĝis sur siaj kruroj kaj falis surgenue, kaptante la dorson de la kanapo, ĉe kiu staris la kofro.

— Kio fariĝis? — mi demandis.

Ŝi kunpremism ankoraŭ pli forte la lipojn, rigardis min kun riproĉantaj okuloj, kaj ŝajnis, kvazaŭ ŝi estus sufokonta; ŝi devis malfermi la lipojn, sed anstataŭ vortoj elfluis el ĝi strio da sango.

— Kio fariĝis!? — mi refoje demandis.

— Ho mia brusto —, ŝi diris, premante la manon sur sian koron, — ho, mia koro, ĝi rompiĝis... la kofro estis tro multpeza —. Mi salte leviĝis de mia seĝo por kuri al ŝi kaj por subteni ŝin, ĉar ŝia paleco fariĝis tiel terura, ke mi timis, ke ŝi tuj falos sur la plankon. Ŝi tamen etendis la manon por eviti al mi alproksimiĝi. Refoje strio da sango fluis el ŝia buŝo kaj makulis ŝiajn vestojn kaj la tapiŝon... Jen... tie... tie... ho Dio, Dio!

Kun teruro Stanislas rigardis la lokon, kiun fingre montris la sinjorino. Li tamen ne vidis sangmakulon, sed tapiŝeton.

— Sub tiu tapiŝeto, Stanislas, estis iam tiu makulo. Mi volis forigi ĝin, sed tio jam ne estis ebla; tiam mi fortranĉis la makulon kaj kovris la lokon... la truon... per tiu tapiŝeto...

Ŝi per la piedo forpuŝis la tapiŝeton kaj Stanislas vidis kvadratan truon en la planktapiŝo.

— Tie! — ŝi diris plue, — tie fluis ŝia sango...; tie ŝi kuŝis surgenuie forpuŝante min, dum ŝi kriis al mi: — Iru for, ne tuŝu min, estas tro malfrue helpi al mi...; mia koro rompiĝis —... La doktoro ne estis hejme; mi tuj elkuris la ĉambron kaj la veturigisto venis por kuŝigi ŝin sur la kanapon. Kaj kiam poste mi staris antaŭ ŝi, petante ŝian pardonon kaj demandante, kion mi devus fari por ke ŝi povu pardoni al mi, tiam ŝi eldiris tiujn terurajn vortojn: — Vi mortigis min, sed la tempo venos, kiam vi staros antaŭ via juĝanto, same

kiel tiu malvirta virino tie staras antaŭ la sia --. Ho Stanislas, ŝi mortis du tagojn poste... Mi jam ne kuragiĝis reveni al la malfeliĉulino, ĉar ŝi ne volis pardoni al mi, kiu ŝin mortigis... De tiu tempo mi suferis, kiel povas suferi nur iu kun mortigo sur la konscienco... Nokte tiu pala servistino aperas antaŭ mia lito kaj riproĉas min, dirante ĉiam la samajn vortojn: „Laboru!... laboru ĝis kiam ankaŭ via koro krevos...“ Kaj mi laboris ĝis nun, sed vane; mia koro estas tiel forta, ke ĝi ne povas krevi... Neniu ĝis tiu tago komprenis, kial mi tiel laboradas, kaj neniu tion eksciis, escepte vi... Vi ne mokas min, Stanislas, pro mia laborado, vi komprenos min, ĉar vi estas inteligenta kaj bonkora, sentema knabo.

Stanislas rigardis la sinjorinon, ne sciante, ĉu li devas konsideri ŝin kiel virinon, kiu perdis la prudenton, aŭ ĉu vere tio ĉio okazis, kion ŝi estis rakontinta; sed la truo estis en la tapiŝo, la sangmakulita loko estis fortranĉita, sen dubo la sinjorino estis dirinta la veron; sed spite al tio, ŝajnis al li strange, ke ŝi per tia laborado povus silentigi sian konsciencon. Li ja estis nur juna knabo kaj ne povis tion imagi, al kio monomanio povas instigi la homojn.

— Sed, sinjorino —, li fine diris mallaŭte, timante, ke iu aŭdus liajn parolojn, — vi diras, ke vi mortigis tiun servistinon... vi tamen tion ne faris intence.

— Jes, mi taris, ĉar mi sola estas kulpa en ĉio.

— Vi tamen ne povis antaŭvidi, ke ŝi mortus.

— Spite al tio mi estas ŝia mortigintino, kaj tial Dio min punas, ĉar Li per ŝia buŝo eldiris al mi tiujn terurajn vortojn... Sed mi obeis ilin kaj obeos ilin ĝis la fino de mia vivo, kiom ajn malfacila estos al mi tiu seninterrompa laboro; fine la tempo ja venos, kiam mi povos ripozadi... kaj tiam Li kaj ŝi al mi pardonos.

Sed tiu tempo estas eble ankoraŭ tre malproksima, ĉar kvankam miaj korpaj fortoj plimalgrandiĝas iom post iom, mia koro estas forta. Koro tiel senkompata kaj tiel malsentema kiel la mia nepre devas esti forta kaj povas kontraŭstari kaj elporti longe la pezan ŝarĝon, kiu ĝin premas... Sed fine ĝi krevos, kaj tiam mi estos liberigita de la malbeno, kiun Li paroligis al mi pere de ŝia buŝo... Mi staras antaŭ Li jam multajn jarojn same kiel tiu virino sur la ciferplato staras antaŭ sia juĝanto... Rigardu kiel tiu soldato svingadas la glavon, ne trafante. Same tiuj minacantaj vortoj estas adresitaj al mi tagon post tago, semajnon post semajno kaj jaron post jaro... Tiu soldato neniam ekfrapos, sed fine mi estos liberigata de la vortoj, kiuj minacadas min... tiam mia koro rompiĝos, tiam mi estos feliĉa, ĉar tiam Dio kaj ŝi estos pardonintaj min.

Ŝi rigardis la ciferplaton kaj ŝiaj lipoj tremetis; tiam ŝi diris ilustre: — Ho, mi havos ankoraŭ multe por suferi, sed la laboro senŝarĝigos min... — Tiam ŝi dronis momenton en pensoj.

La pordo de la veturilejo jetfermiĝis kun laŭta bruo kaj interrompis la silenton, kiu regis en la domo.

— Jen Maria, kiu revenas —, ŝi diris subite. — Mi refoje eklaboros.


Ŝi sin turnis por foriri.

Stanislas postrigardis la kompatindan virinon, kiu kiel vera ekzemplo de mizero kun ŝanceliĝantaj paŝoj malrapide aliris al la pordo.

Stanislas restis sola.


Minuton poste laŭta frotado de balailo montris, ke la sinjorino laboradas kiel kutime por forigi de sia koro la ŝarĝon, kiu premus ĝin eble ankoraŭ multajn jarojn.

Fino de la Tria Parto.



Kvara Parto

**Don Kihoto kaj Sanĉo
Panza**



Unua Ĉapitro.

La Daguerrestrat kaj ĝiaj loĝantoj — La geedzoj Bus —
La nova pensionulo — Kontraŭaj opinioj pri kelkaj aferoj —
Du strataj buboj, kiuj admiras bildolibrojn, kaj kio sekvas el
tio — Filozofoj kaj ludantaj buboj — La ĝibulo — Filozofoj,
kiu rebejmigas kun stranga kamarado — Bus estis surprizata
same kiel lia edzino — Pri acidaj haringo — Etiko de
Spinoza — Antaŭzorgoj de filozofoj.

La Daguerrestrato (nomita laŭ Louis Jacq. Maudé Daguerre, pentristo kaj eltrovinto de la fotografarto) estas bela, senbrua strato en Hago. Tie staras plejparte trietaĝaj domoj kaj preskaŭ en ĉiuj loĝas homoj el la burĝa klaso. Unuj estas pensumitaj ŝtatoficistoj, aliaj estas aktivaj oficistoj, librotenistoj, instruistoj de publikaj lernejoj kaj rentuloj. Butikojn, magazenojn aŭ publikajn konstruaĵojn oni ne trovas en tiu strato, kaj nur unu domo estas uzata kiel pensiono, kies mastro, okupinte por si mem ne pli ol unu ĉambron kaj kuirejton, forluigas ĉiujn aliajn apartamentojn, ĉu mebloprovizitaj, ĉu sen mebloj. Tiuj apartamentoj estas okupataj de geedziĝintoj, de fraŭloj, de fraŭlinoj loĝantaj apartigitaj unu de la alia, tiel ke preskaŭ ĉiu vivas sian apartan vivon, kaj ofte okazas, ke loĝantoj de la pensiono tute ne konas sin reciproke, kvankam dum monatoj sinsekvantaj ili vivas en la sama konstruaĵo. Kelkaj el ili estas servataj de la pensionestro, kiu zorgas pri manĝaĵoj kaj cetere, aliaj kontraŭe servas sin mem.

En tiu konstruaĵo, enhavanta dekduon da forluigitaj apartamentoj, loĝis en la jaro 1912-a la geedzoj Bus kiel gepensionestroj.

Bus estis viro, kiu pasigis multajn jarojn en Hindujo kiel soldato de la holanda-hinda armeo. Post kiam li ricevis sian pasporton de ekŝiĝo, li reiris al sia patrujo kun nur unu okulo (la alian li perdis en batalo kontraŭ la Atjinoj), kun flaviĝinta vizaĝo, kalva kapo kaj jara pensio de kvarcent guldenoj. Bus estis sesdekjara, tre nervema homo kaj balbutis. Kiam li parolis kun fremdulo, lia parol-malperfekteco fariĝis terura, ĉar tiam li faris la plej malbelajn grimacojn, kaj preme fermante la ununuron okulon, li el sia buŝo eljetis tiom da kraĉeroj, ke la alparolito ordinare paŝis flanken por eviti tian malbonvenan pluveton. Bus fumis de la mateno ĝis kiam li enlitiĝis el tielnomata nazvarmigilo, tio estas: el mallonga argila pipo. Tiun pipon li nur elprenis el la buŝo, kiam li estis manĝonta. La ekstremaĵo de la piptubo estis provizita de almenaŭ dudek metrojn longa fadeno, kiu, volvita ĉirkaŭe, formis molan dikaĵon por ŝirmi la sendentajn makzelojn kontraŭ la malmola argilo. Bus parolis malofte, sed lia edzino parolis ĉiam, kiam sin prezentis la okazo, kaj tiu sin prezentis oftege, ĉar ŝi devis pretigi la kafon, la teon kaj la manĝaĵon por multaj pensionuloj, kaj alportante ilin en la forluigitajn ĉambrojn, ŝi restis ĉiam kelkan tempon por konversacii pri la vetero kaj ceteraj aferoj. Ŝi estis dika, malbela, sed tre pura kaj laborema virino kaj samaĝa kiel ŝia edzo. Ŝian kapon tamen kovris belaj haroj, pro kiuj ŝi tre fieriĝis, ĉar ili estis bele blondaj kaj eĉ ne unu griza hareto ilin malbeligis. Ĝis sia kvindeka jaro ŝi estis servinta kiel kuiristino ĉe riĉa aristokrata sinjoro, kiu ĉe sia morto testamente postlasis al ŝi dek mil guldenojn. Kiam ŝi okaze konatiĝis kun la eksmilitisto, ili opiniis (ĉiu por si mem), ke estus tre saĝe geedziĝi, ĉar li havis belan pension kaj ŝi posedis renton da kvincent guldenoj, tiel ke ili ekhavis kune

sufiĉan ricevotajon por agrable kaj senzorge vivadi. Komence ili loĝis en du-etaĝa domo en la Fronemanstraat, sed la senlabora vivo ne plaĉis al ili, tial ili malfermis cigaran butikon en la mezo de la urbo, sed ĝi prosperis malbone, ĉar Bus balbutis tro multe kaj fortimigis la klientojn per siaj kraĉeroj, kaj sinjorino Bus babilis tro multe, kiam venis klientoj en la butikon por aĉeti cigarojn aŭ tabakon; sekve de ĉio tio la butikio iom post iom fariĝis tute senklienta.

La pensiono, kiun la geedzoj tuj poste fondis en la Daguerrestraat, prosperis bonege, ĉar sinjorino Bus estis lerta kuiristino kaj tre zorgema por la enloĝantoj. Ŝia edzo ne postulis tro multe da mono por la forluigitaj apartamentoj, kaj ĉiam li estis inklina helpi siajn pensionulojn en ĉio ajn. Li ofte forportis leterojn al la poŝtejo, zorgis pri ĉiaj komisioj kaj estis servema al ĉiuj. Kaŭze de ĉio tio la enloĝantoj tre ŝatis la geedzojn Bus, kaj nur malofte unu el ili transpensionigis.

Bus, maĉante la ekstremajon de sia pipo kaj fumante malrapide, sidis en la kuirejeto kaj muelis kafon; dume li klinis la kapon dekstren por aŭskulti, ĉu iu supreniras la ŝtuparon. Lia edzino staris antaŭ la forno kaj kirladis la enhavon de brilanta kupra kaldrono, el kiu eliris agrable odoranta vaporo.

— La „novulo“ forrestas longe hodiaŭ —, ŝi diris kvazaŭ al si mem.

La „novulo“ estis luanto, kiu antaŭ kvin semajnoj luis du ĉambretojn de la plej supra etaĝo.

Bus jese kapklinis, sed ne respondis.

— En aliaj tagoj li preskaŭ ĉiam rehejmiĝis multe pli frue.

Refoje Bus kapklinis kaj refoje li silentis.

— Ŝajnas al mi, ke li tre amas promenadi, ĉar kelkfoje li eliras eĉ dum pluveta vetero.

Bus triafoje kapjesis, kaj ĉar la kafo estis muelita, li metis la muelilon sur tableton, eltiris la tirkesteton el la muelilo kaj ŝutis la enhavon en kafpoton. Formetinte la muelilon en ŝrankon, li verŝis bolantan akvon en la poton,* kaj kiam ĝi estis plena, li ĝin starigis sur petrolan varmigilon, eksidis, gratis al si la kalvan kapon, fumis, interplektis kviete la manojn, kaj atendante, ke la moviĝema edzino ekparolus, por ke li kiel kutime povu responde kapjesi aŭ kapnei, (ĉar alimaniere li nur respondis tre malofte), li rigardis sencele antaŭ sin. Kiam lia edzino ekvidis, ke li kviete fumetas, farante nenian laboron, ŝi enmanigis al li kupran kaldronon kaj viŝtukon. Bus kiel obeema edzo tuj frotadis la kaldronon, kaj ŝi diris plue:

— Sed mi ne komprenas, kial li tiel ofte vizitas la „Reĝan“.

La „Reĝa“ estis la fama Reĝa Biblioteko, unu el la plej grandaj kaj belaj en la mondo. Sinjorino Bus tamen neniam ĝin vizitis, kaj ne povis formi al si ĝustan opinion pri tiu konstruaĵo. Ŝi ekaŭdis iam, ke tie sin trovas nur libroj, manuskriptoj kaj moneroj el antikvaj tempoj, kaj tiajn objektojn ŝi tute ne ŝatis. Bus, kiu bone sciis, kio estas la „Reĝa“, haltigis sian frotadon, preme fermis la ununuran okulon, faris malbelan grimacon kaj balbutis:

— Kom . . . kom . pren . . . en . . . en . . . eble li le . . . le le . . .

— Jes, mi komprenas, li legas tie; sed mi pli amus legi novajn librojn.

Bus volonte dezirus klarigi, ke en la „Reĝa“ sin trovas ĉiuj libroj, antikvaj kaj modernaj; sed, ĉar tiu klarigado kostus al li tro multe da peno kaj tro multe da kraĉeroj, kaj ĉar la temo ne indas tion, li ne respondis, sed altigis la ŝultrojn kvazaŭ por diri, ke lia edzino

estas prava, kaj li ekfrotis sian kaldronon, ĉiam klinante la kapon por aŭskulti, ĉu iu supreniras la ŝtuparon.

— Plej plaĉas al mi, ke „la novulo“ pagas antaŭe —, diris plue sinjorino Bus; — preskaŭ neniu pagas antaŭe, kvankam tio estus bona regulo en la domo, ĉar se ili antaŭpagus, tiam estus neeble, ke ili malaperas ŝtelire kaj ne paginte, kiel kelkfoje okazas en pensionoj. Feliĉe tio neniam okazis ĉe ni.

Ĉiam babilante laŭ la sama maniero, ŝi kirladis ankoraŭ momenton, kiam subite la okulo de Bus fikse rigardis antaŭ sin, dum kelkaj sulketoj sur lia flava frunto montris, ke li atente aŭskultas. Lia kapo sin klinis ankoraŭ pli multe dekstren al la koridoro, kaj premfermante la okulon, li balbutis:

— J.. j.. jen la no... no... no....

— Jes, estas „la novulo“.

Iu supreniris la ŝtuparon kaj la maniero, laŭ kiu li faris tion, indikis al la aŭskultanta pensionestro, ke longaj piedoj supreniris, ĉar kvankam la ŝtuparo konsistis el tridek ŝtupoj, la novevenanto atingis la supron en ses sekundoj. Liaj piedoj sekve tuŝis nur ĉiun kvinan ŝtupon. Post tiuj ses sekundoj la samaj longaj piedoj haltis momenteton kaj refoje supreniris, tiel ke ili post aliaj ses sekundoj atingis la duan etaĝon. Pordo super la kuirejo jetfermiĝis, kaj ĉio fariĝis kvietita kaj senbrua kiel antaŭe.

— Ĉu vi a-a-alport...?

— Jes, mi alportos al li kafon —. Kaj verŝinte kafon en tason, kie jam la lakto kaj la sukero troviĝis, sinjorino Bus eliris kun ĝi la kuirejon kaj supreniris la tridek ŝtupojn al la duaetaĝa ĉambro, sur kies pordon ŝi frapis. Ne atendante ĝis kiam la loĝanto permesis al ŝi eniri, ŝi malfermis la pordon kaj eniris lukse meblitan ĉambron.

Sur kanapo kuŝe ripozis longa, tre longa viro; li estis sinjore vestita, sed ĉio montris, ke li ne apartenas al la aristokrataro. Afabla rideto ekludis sur lia nebela, sed agrabla vizaĝo, kiam sinjorino Bus metis antaŭ lin sur tableton la kafon, kaj li diris:

— Mi dankas.

— Ĉu vi laciĝis, sinjoro?

— Ne.

La longa sinjoro eksidis malrapide, prenis la tason kaj trinketadis la kafon.

— Ĉu ĝi estas bona, sinjoro? — demandis sinjorino Bus, dum ŝi rigardis la fumantan tason.

— Kompreneble... Kafo ĉiam kaj ĉie estas bona.

— Ĉiam kaj ĉie!? — Sinjorino Bus krucis la brakojn sur la brusto kaj kun miro rigardis la pensionulon.

— Kompreneble, sinjorino.

— Estas tamen diferenco, mi opinias, inter bona kaj malbona.

— Tio dependas de cirkonstancoj.

— Malbona tamen neniam samtempe povas esti bona.

— Tio dependas de cirkonstancoj, kiel mi ĵus diris.

Ju pli mi soifas, des pli bongusta estos al mi la kafo. Se mi trinkis du tasojn da bona kafo, tiam la tria jam ne plaĉos al mi, sekve: tiu sama kafo, kies unua taso estis al mi bongusta, jam ne estos tia, post kiam mi trinkis du tasojn. Sekvas el tio, ke la kvalito de la kafo devas dependi de cirkonstancoj.

— Nu, sinjoro, ne ofendiĝu, sed tio estas stranga opinio.

— Ĝi ne estas stranga, se oni ĝin konsideras el filozofia vidpunkto.

Sinjorino Bus, kiu neniam ekaŭdis pri filozofiaj vidpunktoj, ridetis, kaj ĉar ŝi ne amis disputi pri al ŝi nekonataj temoj, ŝi ŝanĝis la interparoladon demandante:

— Ĉu mia edzo refoje rezervas por vi sidlokon por la morgaŭa teatraĵo?

— Kion oni ludos?

— „La du orfojn.“

— Mi ne amas „La du orfojn,“ tio ja estas fiteatraĵo. Mi amas nur klasikajn teatraĵojn kiel ekzemple: Vilhelmo Tell, Hamleto kaj tiel plu.

— Ĉu vi vidis Vilhelmon Tell kaj Hamleton, sinjoro?

— Mi eĉ kunludis en tiuj dramoj kiel aktoro.

Sinjinorino Bus kunfrapis la manojn, ekkriante:

— Vi estas aktoro!?

— Mi estis aktoro.

— Ho, mi ne sciis tion.

— Jes, mi estis aktoro, sed ho ve! . . . kun tro multe da talento.

La sinjinorino rigardis al la iama aktoro kun nesprimebla surprizo; ŝi ne povis kompreni, ke aktoro povas havi tro multe da talento, kaj ŝiaj okuloj klare petis klarigon.

La eksaktoro malplenigis la tason, ĝin remetis sur la tableton, kaj etendiĝante kviete sur la kanapo, li diris:

— Miaj talentoj estas tiaj, ke la aŭdantaro aplaŭdis nur min, kaj la aliaj aktoroj pro tio ĉiam fariĝis tiel ĵaluzaj, ke ili rifuzis ludi plue, se mi restus pli longe sur la scenejo. Tial mi ekŝiĝis kaj fariĝis maristo.

— Ŝipestro?

— Ne, simpla maristo.

— Simpla maristo!? — Refoje ŝi kunfrapis la manojn.

— Jes, kaj poste promenanta reklamilo.

Sinjinorino Bus jam ne kredis al siaj oreloj kaj ŝi demandis:

— Vi certe ne promenadis tra la stratoj kun reklamilo sur la ŝultro?

— Jes.

— Sed tio ja estas malinda laboro por sinjoro kiel vi!

— Kial? . . . Nenia laboro estas malinda por kiu ajn.

Ĉiuj homoj estas ja egalvaloraj, kaj ĉiuj metioj kaj oficoj estas same ŝatindaj, ĉar la homoj bezonas unuj la aliajn reciproke. Ekzemple: nia reĝino ne povus eliri, se ŝuisto ne farus antaŭe ŝuojn por ŝi, kaj se buĉistoj rifuzus buĉi bovojn kaj bovinojn, tiam la reĝino jam ne povus manĝi bifstekon. Mi elektos alian ekzemplon: Kio estus generalo sen soldatoj? Kio estus ŝipestro sen maristoj? Kio estus reĝo aŭ reĝino sen subuloj? ... Absolute nenio. Pli multe valorus soldato sen generalo, maristo sen ŝipestro kaj subulo sen reĝo.

— Mi tamen preferus esti reĝo.

— Kial?

— Estas pli agrable esti reĝo ol subulo.

— Tio dependas de cirkonstancoj.

— Ankaŭ tio?

— Jes: Karlo la unua estis senkapigata. Ludoviko la deksesta estis senkapigata. Maria Stuart estis senkapigata same kiel Maria Antoinette. Eglo, la reĝo de la Moabitoj estis mortigata, Absalon estis pendigata per la haroj, Nadal estis mortigata de Baza, Ela estis mortigata, Atalia estis mortigata, Joahim, Jehonias kaj Sedecias fariĝis sklavo; pereis Kresuso, Dariuso, Cezaro, Nero kaj multaj aliaj tiel nomataj eminentuloj.

— Spite tion mi prefere estus eminentulo ol simpla metiisto.

— Mija klarigis al vi, ke ĉiuj homoj estas egale eminentaj.

— Vi trograndigas, sinjoro.

— Tute ne; ĉiuj fakte estas egalaj. La reĝo ne volas eliri kun malpuraj botoj; sekvas el tio, ke li devas esti danka, ke purigisto de botoj ekzistas, kiu bonvolas purigi liajn botojn.

— La reĝo tamen pagas por tiu laboro!

— Vi pravas, li pagigas por tio, sed kiel li ekhavas tiun monon, per kiu li pagigas, se okaze li ne estus riĉa?

— De la subuloj.

— Trafe respondite, sed al la subuloj apartenas ankaŭ tiu botpurigisto; sekve la reĝo devas esti danka ne nur, ĉar tiu purigisto bonvolas labori por li, sed ankaŭ, ĉar li partoprenas al la pagado por tiu purigado.

— Mi neniam antaŭe pensis pri tiaj aferoj.

— Kompreneble, ĉar vi ne estas filozofo.

Sinjorino Bus ne parolis plu; la argumentoj de la ĉiam afable ridetanta ĉiametiisto estis tiaj, ke ŝi prefere ne plu disputadis kun li. Malrapide ŝi eliris, demandante, ĉu la sinjoro deziras duan tason aŭ ion alian, kaj li respondis:

— Mi dankas, sinjorino.

Post kiam ŝi estis ferminta post si la pordon, la filozofo kviete fermis la okulojn kaj restis kuŝanta sur la kanapo du horojn. Je la dua horo li rektiĝis, eksidis, tiris paperujeton el la poŝo de sia frako, elprenis la enhavon kaj dismetis ĝin sur siaj genuoj.

Tiam li kalkulis:

— Dek, — dudek, — tridek, — kvardek, — kvindek, — sesdek . . ., tio estas sesdek —. Li kolektis la ses bankpaperetojn, metis ilin aparte kaj kalkulis plue:

— Cent, — ducent; tio estas kune ducent sesdek guldenoj . . . Estas nun la deka de la monato; mi pagis antaŭe por unu monato . . ., mi do povas resti ankoraŭ du monatojn en Hago . . . Nu, mi ja vidos, kion fari poste; ĉio aranĝiĝos per si mem.

Ridetante li enpoŝigis la paperujeton kun la bankpaperoj, ekstaris, promenadis tien kaj reen en la ĉambro, rigardis la pentraĵojn sur la muroj, fajfetis gajan arieton, iris al la librobretaro, prenis libron, refoje sidiĝis, rigardis ilustraĵojn kaj legis kelkajn paĝojn. Tiam li refoje ekstaris, relokigis la libron sur ĝian lokon, surmetis ĉapelon kaj eliris la ĉambron, ĉiam ridetante kaj

fajfetante. Per dudek longaj paŝoj li malsupreniris la du ŝtuparojn, kaj trairinte la vestiblon, li malfermis la pordon kondukantan sur la straton.

Li estis ekstere kaj ekpromenis. Malrapide, sed per longegaj paŝoj li laŭiris la Daguerrestraton. Ĉi tiu estas mallonga, tiel ke li baldaŭ atingis ĝian finon; tiam turnante sin dekstren, li laŭiris la Regentesselaan ĝis la placo, en kies mezo staras la monumento konstruita por memoro de la reĝino Emma, vidvino de la reĝo Vilhelmo la tria. Tiu monumento, ĉirkaŭita de florbedoj kaj fera kadreto, estas speco de obelisko, antaŭ kiu staras virino alte tenanta pacobranĉon. Li jam vidis multfoje tiun monumenton kaj ne ĝin atentante, turnis sin maldekstren kaj eniris la Vejmarstraton. Post cento da longaj paŝoj li ekhaltis antaŭ butikoj de librovendisto. Post la granda vitro de la elmetejo kuŝis multaj libroj, kiujn avide rigardis du ĉifone vestitaj knabetoj. La pli granda, okjara blondulo fingre montris al sia kunulo malfermitan bildolibron.

— Rigardu Klaas, tio estas la Botvestita Kato, kaj jen la Blua Barbo... Bela, ĉu ne?

— Jes, kaj kio estas tio?

— Kaleŝo de la reĝo.

— Kaleŝo?

— Jes, veturilo, ĝi estas de la reĝo.

— Kion do taras tiu kato en botoj?

— Ĉi vi ne scias?... Ĝi krias: „Helpon!... helpon!... la markizo de Karabaso estas dronanta!...“ Sed tio ne estas markizo, sed nur filo de muelisto.

La pli malgranda knabo rigardis atente, sed li ne klare komprenis, kion diris lia kamarado. Subite en la vitro kvazaŭ en spegulo super la bela libro ekaperis la figuro de longa viro.

La knaboj estis forkurontaj, sed la viro, staranta post

ili, ridetis tiel amike, ke ili restis starantaj. Ili tamen sin turnis kaj levis la kapojn, kiuj atingis nur ĝis la veŝto da la fremdulo.

— Ĉu vi amas librojn, miaj bubetoj?

— Jes sinjoro —, respondis la pli aĝa.

— Ĉu vi povas legi tian bildolibron?

— Jes, mi povas; mi sidas en la kvara lerneja klaso.

— Vere?... kaj via frateto, kie li sidas?

— Li ne estas mia frateto; li estas mia kamaradeto.

— Ĉu li povas legi?

— Iomete; li sidas en la dua.

— Ĉu vi havas multajn bildolibrojn?

— Ni havas nenian.

— Ĉu vi volus havi tiun?

La knabetoj, pensante, ke la ridetanta sinjoro mokas ilin, rigardis unu la alian, sed ne respondis.

— Nu?... Ĉu mi aĉetu ĝin por vi?

Refoje la knabetoj silentis, sed la longa sinjoro faris unu paŝegon flanken, malfermis la pordon de la butikio, dirante:

— Eniru kun mi.

Ili eniris, refoje rigardante sin reciproke per tiaj okuloj, kiajn direktus sur nekonatulon plenkreska almozulo, se tiu nekonatulo neatendite dirus al li: „Jen ricevu! mi donacas al vi bankpapereton de mil guldenoj!“

Estis klare, ke la knabetoj ankoraŭ neniam ekhavis bildolibron, kaj ke ili rigardis ĝin kiel neakireblan trezoron, kiu estas destinata nur por riĉaj infanoj.

Post la butika tablo staris fraŭlino. Ŝi kun miro rigardis al la strangaj klientoj.

— Fraŭlino, bonvolu montri al ni kelkajn belajn librojn.

— Kiajn, sinjoro?

— Bildolibrojn por ĉi tiuj bubetoj.

La fraŭlino dismetis sur la montrotablo dekon da diferencaj ekzempleroj, sed la rakontoj de Perault ne estis inter ili.

— Ankaŭ tiun, fraŭlino —. La fremdulo fingre montris la botvestitan katon en la elmetejoj. Ŝi prenis kaj metis ĝin al la aliaj sur la tablon, kaj la kliento diris:

— Nu, buboj, elektu!

La pli aĝa hezite tuŝis la katon en botoj, sed tuj retiris la fingrojn kvazaŭ timante preni sian trezoron.

— Tiun? — demandis la sinjoro.

— Jes, ... se plaĉas al vi.

— Nu, prenu, ĝi estas via —, kaj al la alia knabeto li diris:

— Kaj vi? ... Vi ja ankaŭ amas librojn, ĉu ne vere?

La pli juna trafe maltrafe montris „Fabelojn de Ezopo“.

— Ĉi tiun?

La knabeto kapjesis.

— Ezopo!? ... Sed mi timas, ke tiu libro ne taŭgas por vi; prefere elektu tiujn rakontojn de Grimm —, kaj malfermante dikan lukse ilustritan libron, la longa sinjoro vidigis kelkajn ilustraĵojn, elverkitajn de Gustave Doré; inter ili sin trovis „La lupoj kaj la sep kapridoj“.

— Jes, tiun, diris la bubeto.

— Bonege, nu prenu kaj foriru kun via biblioteko.

La knabetoj eliris la butikon feliĉaj, kaj post kiam la aĉetinto pagis, li same eliris, direktante siajn paŝojn plue al la bela Koningsplein. Tiu plein (= placo), ornamita de multaj florbudoj, altaj arboj kaj dudeko da benkoj por la promenantoj, estas ĉiam multvizitata, precipe de infanartistoj kun infanoj, de maljunaj pensumitaj oficistoj, kiuj abundas en Hago, kaj cetero. Ĉi trovas tie belan kvietan lokon por ripozi, kaj ŝajnis, kvazaŭ la pensionulo de Bus ankaŭ kelkfoje sidis tie, ĉar li tuj sin direktis al angulo de la placo, kie staris

du benkoj. Eksidante sur unu, li rekte etendis la longajn krurojn antaŭ sin, enpoŝigis la manojn kaj kviete rigardis ĉirkaŭe por ĝui la belan ĉirkaŭaĵon, en ĉi tiu momento sin banantan en la radioj de la suno.

Je kelka distanco ludis kvar knaboj. Gaje babilante du el ili per argilaj globetoj ludis kaj laŭvice jetis kelkajn tiajn globetojn en kaveton. Tiu globet-ludado estas speco de hazardludo, kiu tamen estas sen danĝero por la ludantoj, ĉar la ludiloj kostas tiom malmulte, ke la ludantoj riskas preskaŭ nenion. Spite tion, la knaboj plentente sin dediĉis al la ludado, kaj post ĉiu jetado en la kaveton klare iliaj vizaĝoj montris, kiu gajnis aŭ malgajnis.

Ridete la longa sinjoro rigardis al la knaboj. Sendube la ludado rememorigis al li lian propran juncon, kiu estas ĉe preskaŭ ĉiuj homoj la plej feliĉa tempo de la vivo.

La tria knabo havis zumturbon, kiun li kun lerteco manuzis. Zumante la turbo priskribis la plej graciajn cirklojn sur la sablo, kaj de tempo al tempo la knabo, jetante sian ŝnuron ĉirkaŭ la ludilon, suprenjetis ĝin kaj per rapida movado de la mano rekaptis ĝin sur la manplaton, kie ankoraŭ kelkajn sekundojn ĝi turniĝis.

La kvara knabo, kun ŝirita pantalono, por li multe tro grandaj ŝuoj, kiujn li sendube iel donace ekhavis, apogis sin kontraŭ arbo, rigardadis momenton silente; subite li diris:

— Karlo, permesu do, ke mi foje jetstarigu vian turbon.

— Jetstarigi mian turbon? . . . Aĉetu mem turbon!

— Mi ja ne havas monon.

— Iru al via patrino pro mono.

— Ŝi ja estas malsana kaj ne havas monon.

Karlo estis respondonta ion alian, sed voĉo venanta de la apude staranta benko, diris:

— Jen, prenu por aĉeti novan turbon.

Ĉiuj kvar knaboj turnis la kapon por vidi, kiu parolis. Guldeno trembriladis en la suna aero, kaj la knabo, kies patrino estis malsana, divenante, ke la monero estis destinita por li, kaptis ĝin ambaŭmane; tiam danke li ektuŝis sian ĉapon, ekridetis, montrante du vicojn da ebure blankaj dentoj, kaj pafis sin for. La aliaj knaboj lin postrigardis, ili estis jaluzaj pro la belega turbo, kiun li povus aĉeti por tiom da mono.

Ordinare infanoj estas senkompataj kaj egoistaj pro manko de sperto. Ili ja estas tro junaj por sin okupi pri ĉagrenoj de aliuloj kaj ne povas imagi, ke ekzistas altruismo.

La longa sinjoro, kiu estis altruisto en la plej alta grado, ne pensante pri la jaluzo, kiun li naskis ĉe tiuj tri knaboj, nek pri la feliĉo de la kvara, denove enpoŝigis la manon kaj daŭrigadis rigardi rekten, dekstren kaj maldekstren, kaj la tri knaboj siaflanke ekludis plue. Apenaŭ pasis dek minutoj, kiam subite la kvara knabo revenis kurante. Li tenis en unu mano belegan turbon kun ŝnureto. Atinginte la benkon, kie sidis lia bonfarinto, li ekhaltis kaj diris:

— Mi jam aĉetis unu . . ., jen kio restis de la guldeno. — Li etendis la manon, sur kies plato kuŝis kelkaj moneroj el arĝento kaj el kupro. La sinjoro ŝajne ne estis atendinta tion, ĉar li demandis:

— Nu, ĉu vi ne volas gardi tiun restantan monon?

— Mi pensis, ke mi devas realporti la restaĵon, sinjoro.

— Vi estas honesta knabo; gardu la restaĵon por vi mem.

— Dankon, sinjoro. — Refoje li ektuŝis sian ĉapon.

— Kion vi aĉetos plue?

La knabo pripensis, tiam li respondis:

— Ovojn por mia patrino.

— Jen kio estas bona, sed por tiu mono vi povos aĉeti nur malmultajn . . . atendu . . .

Liaj montra kaj granda fingroj malaperis en la veŝta poŝo kaj reaperis el ĝi kun riksdaldero*. Prezentante ĝin al la surprizita knabo, li diris plue:

— Per tiu mono vi povos aĉeti ovojn por via malsana patrino.

— Mi dankas, sinjoro.

Por la tria fojo la knabo tuŝis sian ĉapon kaj rapidis for.

La ĵaluzeco de la tri aliaj knaboj fariĝis ankoraŭ pli granda, sed tion ne rimarkis la bonfarinto. Kviete li ekstaris kaj per longaj paŝoj ekpromenis, intencante eliri el la placo. Ĉe ĝia fino li tamen ekhaltis. Tie staris amaso da homoj, inter kiuj estis kelkaj knaboj kaj knabinoj, kaj ĉiuj kun atento rigardis teren, kie sin trovis la objekto de ĉies atento. Laŭtaj ridoj sonis, interrompataj de strangaj raŭkaj krioj. La longa promenanto aliris al la ĝoja aro, kaj, ĉar lia kapo elstaris super la ceteraj rigardantoj, li tuj rimarkis, pro kio oni tiel multe sin amuzadis.

Sur la sablo, kaj apogante la dorson kontraŭ arbo, sidis simiaspekta viro. Li estis dimanĉe vestita; liaj senordaj haroj dispendis ĉie el sub la posten ŝovita ĉapo. Unu el liaj manoj, per kiu li tenis bastonon, estis tatue ornamita per blua inko. Liaj ŝultroj estis tiel altaj, ke ili tuŝis la orelojn. Tiu viro, kiun ĉiuj mokridis kaj turmente incitetis, estis tiel ebria, ke liaj piedoj ne povis plu lin porti. Li eligis vortojn en fremda lingvo, kiun neniu el la ĉirkaŭstarantoj komprenis, kaj ĉiufoje, kiam unu el la mokantaj knaboj alproksimiĝis por lin tiri ĉe la piedoj, li frapis per la bastono, sed ĉar la knaboj estis pli viglaj ol la ebria viro, la bastono trafis nur la sablon.

* arĝenta monero valoranta 2½ guldenojn.

— Demetu liajn ŝuojn, Jakobo —, kriis unu el la knaboj.

Jakobo kurbiĝis, rampis singarde kelkajn futojn antaŭen kaj nerimarkite de la ebria viro etendis la manon por kapti ŝuon, sed apenaŭ la viro sentis, ke iu tuŝas lian piedon, li levis la bastonon. Sed anstataŭ frapi la tirantan manon de la knabo, li trafis sian propran ŝuon, post kio eksonis laŭtega ridado.

Alia knabo, vidante, ke estas tro malfacile demeti la ŝuojn de la viro, faris maŝon ĉe la fino de ŝnureto kaj klopodis ĵeti ĝin ĉirkaŭ la ŝuon. Ŝajne tio estis sufiĉe facila, ĉar la ŝupintoj de la sidanto prezentis tre bonan celon. La maŝo tamen kelkajn fojojn maltrafis, sed la knabo persistis kaj fine trafis. La ĵetinto tiris al si la ŝnuron kaj samtempe la kruron de la viro, kiu estis maristo. Vane ĉi tiu batis per la bastono por liberigi sin, ĉar li sentis, ke li estas tuj fortirota de la arbo kaj ke li perdos per tio sian egalpezon. Li blekis kiel frenezulo kaj batis kiel furiozanta diablo; dume la rigardantoj ridis el plena gorĝo.

Subite la ĝenerala ridado ĉesis. La longa fremdulo, kiu ĝis tiu ĉi momento staris kviete post la homamaso, ĵetis flanken kelkajn ridantojn, kurbiĝis kaj traŝtrancis la ŝnuron. Tiam li sin levis, turnis sin kaj ekkriis:

— Kiu ajn el vi refoje tuŝos aŭ turmentos tiun mariston, havos aferon kun mi!

Ĉiuj silentis kaj rigardis al la longa viro, kiu tiel neatendite sin prezentis por protekti la ebrian viron.

La maristo klopodis ekstari, sed liaj kruroj estis tro malfortaj; li parolis kelkajn nekompreneblajn vortojn kaj refoje faleksidis ĉe la piedo de la arbo.

La fremdulo kurbiĝis super li kaj diris:

— Ĉu mi helpu al vi ekstari?

La maristo respondis fremdlingve kaj grimace ridetis.

— Sprechen Sie deutsch?* — demandis la alia.

— Ein wenig deutsch... bin Russe**.

— Ĉu vi estas Ruso?... Nu, mia rusa amiko, mi helpos al vi ekstari, venu kun mi, vi ja ne povos resti ĉi tie —, kaj kaptante lin ĉe la kolumo de lia frako, li starigis lin. Tute ne atentante la ĉirkaŭstarantojn, kiuj ne ridis plu, kaj daŭre tenante la mariston ĉe la kolumo, kiel oni tenus netaŭgan bubon, kiun oni estas punonta, li ekmarŝis per longaj paŝoj tra la placo. La maristo marŝis ankaŭ, sed ĉar lia protektanto suprentiris lin kelkfoje tro alte, la piedoj de la maristo nur de tempo al tempo ektuŝis la teron. Ĉiuj vizitantoj de la placo rigardis kun surprizo la du strangajn virojn sin direktantajn al la Vejmarstrato, de tie al la Regentesseplaco kaj fine al al Daguerrestrato. — —

Post kiam lia „novulo“ estis elirinta, Bus estis frote puriginta du kaldronojn, ĝis kiam ili brilis kiel oro; li estis akriginta dekon da tranĉiloj, li estis senŝeliginta sitelon da terpomoj kaj ĵus formetis la plenan sitelon, kiam subite en liajn orelojn eksonis stranga bruo sur la ŝtuparo. Li aŭskultis. Klare li aŭdis voĉon, kaj ŝajnis al li, ke ĝi estas la voĉo de la nova pensionulo; sed ĉi tiun fojon li ne supreniris la ŝtuparon per kvin longaj paŝoj, ĉar paŝon post paŝo li alproksimiĝis al la plej supra ŝtupo, kiu estis tuj apud la kuireja pordo.

Bus aŭskultis kun streĉita atento kaj fariĝis scivola. Li ekstaris, eliris el la kuirejo kaj rigardis malsupren. Sur la mezo de la ŝtuparo li vidis la longan pensionulon, kiu supreniris malrapide. Li etendis flanken la dekstran brakon kaj portis kun si strangan objekton. Komence Bus kredis, ke ĝi estas sako, sed streĉante la okulojn, li rimarkis, ke ĝi ne estas sakó, sed speco de tiaj

* Ĉu vi parolas germane?

** Malmulte germane, mi estas ruso.

timigiloj, kiajn la farmistoj multfoje starigas en la ĝardenon por fortimigi la birdojn, ĉar ĝi havis mallongan korpon, neordinare longajn brakojn, pendantajn ĝis la genuoj kaj maldikajn kruojn, kiuj puŝbatadis kun bruo ĉiujn ŝtupojn, kiujn dum la suprenirado ili renkontis.

— Atentu viajn piedojn, mia kara —, diris la „novulo“, — precipe atentu la kalojn sur viaj piedfingroj... levu la piedojn, ... atentu!

Sed la piedoj ne leviĝis, ili svingpendis ĉe la senfortaj kruoj, kvazaŭ al ili mankus ĉiuj muskoloj.

— Ki... ki... ki... —, balbutis la pensionestro.

— Kion mi kunportas?

— Jes, ... ki...

— Mian novan amikon.

— A... m... m... ikon!?

— Jes, novan amikon... Jen mi prezentas lin al vi.

Dirante tion, la longa pensionulo ekpaŝis sur la plej supran ŝtupon kaj alte levante sian ŝarĝon, kiun li ankoraŭ tenis ĉe la kolumo, li starigis ĝin vizaĝon kontraŭ vizaĝo antaŭ Bus, kiu postenpaŝis kun surprizo.

— Sed tio es... s... s...

— Tio estas mia nova rusa amiko, kiu pasigos ĉe mi ĉi tiun nokton por fordormi sian ebriecon.

— Ho, ĉu li es... s... s...

— Jes, li estas ebria, tiel ebria, ke li ne povas stari sur la piedoj... Antaŭen, mia kara... pli supren, ĉar miaj apartamentoj estas sur la dua etaĝo.

Refoje la svingpendantaj kruoj tuŝrapadis la ŝtupojn kaj baldaŭ la stranga paro atingis la plej supran etaĝon, kie ili malaperis en la ĉambro de la pensionulo.

Bus restis staranta ĉe la ŝtuparo kaj atendis kun malpacienca reveno de sia edzino, kiu antaŭ kelka tempo estis elirinta por fari komision, sed estis tuj revenonta, ĉar longe ŝi forrestis neniam. Li tute ne sciis, kion

pensi pri tiu rusa amiko, kiu pli similis al simio ol al viro, kaj li ĝojis, kiam lia edzino rehejmiĝis. Jam de malsupre ŝi vidis, ke io ne estas en ordo, ĉar Bus faris tian malbelan grimacon, premfermis la ununuran okulon, displuvetigis tiom da kraĉeroj kaj faris tiom da gestoj per la dekstra mano (lia maldekstra estis kaptinta la ŝtuparan apogilon, por ke li ne falu), ke la bona virino timis, ke malfeliĉo estis okazinta. Rapide ŝi supreniris kaj ŝia koro ekbategis.

— Kara ĉielo, kio estas? . . . Ĉu la domo brulas?

Bus fingre montris supren kaj balbutis:

— La no . . . no . . . n . . .

— Ĉu okazis io al la novulo?

— Ebria ru . . . ru . . . ru . . .

Ordianare ŝi tuj komprenis, kion estas dironta ŝia edzo, sed el la silaboj ru . . . ru . . . ru . . . ŝi neeble povis formi precizan vorton. Rapide ŝi teren metis la korbon kun la ovoj, kiun ŝi portis en la mano, ĉe la piedoj de la pensionestro, kaj plue rapidis supren al la dua etaĝo kaj eniris la ĉambron de la „novulo“.

Surprizite ŝi restis kvazaŭ najlita sur la planko. La kanapo estis turnita kontraŭ la muro kaj la longa sinjoro ĵus metis sur ĝin la ebrian mariston, kiun li tenis per ambaŭ manoj, kiel buĉisto tenas ŝafon, kiun li estas jetonta sur buĉtablon.

— Jen, nun dormu! — li diris; tiam li kaptis la falintan ĉapon de la maristo kaj liajn antaŭe demetitajn ŝuojn, metis ilin sub la kanapon kaj turnante sin, rigardis al sinjorino Bus kun ridetanta vizaĝo, kvazaŭ nenio eksterordinara estus okazinta.

— Ĉielo, sinjoro, kion vi faris?

— Mi nur turnis la kanapon, por ke li ne defalu de sia dormejo.

Dirinte tion, li kviete eksidis, jetis unu kruron trans la alian, balancis ĝin, enpoŝigis ambaŭ manojn kaj ridetis.

— Kiun vi do enmetis tien?

— Novan amikon.

— Mi ne komprenas.

— Nek mi.

— Nek vi?

— Nek mi . . . La hazardo estas io stranga, sinjorino. Kiu el ni pensus ĉi tiun matenon, ke mi renkontus hodiaŭ rusan ebrian kolegon, kaj kiu pensus, ke mi metus lin tien, por ke li kviete kaj sen danĝero povu fordormi sian ebriecon? . . . Kiu pensus, ke mi tirus lin tiamaniere el granda danĝero kaj malfeliĉaĵoj?

— Mi ne komprenas, sinjoro.

— Nek mi, sinjorino . . . La buboj tiel turmentis lin, ke mi ne povis ne protekti lin, kaj restis al mi nur unu rimedo antaŭsavi lin el iliaj manoj.

Li eksilentis, rigardis momenton antaŭ sin kun distritaj okuloj; tiam li diris plue:

— Krom tio, mi ne amus, ke policanoj ĵetus lin en malliberejon . . ., mi tial metis lin sur tiun kanapon.

— Kaj . . . ?

— Kaj morgaŭ mi vidos tion, kio estos farota, ĉar tio dependos de cirkonstancoj.

— Sed . . . ĉu li ne estas danĝera?

— Danĝera!? . . . Ne timu! . . . Viro, kiu estas tiel ebria, ne estas ordinara drinkulo.

— Sed mi tamen timas, ke . . .

— Ne timu; mi restos hejme por gardi, ĝis kiam li estos tiel malebria kiel mi mem.

— Ĉu tio ne estos enuiga?

— En realo preskaŭ nenio estas enuiga, sinjorino. Oni ja povas ĉiam iel pasigi sian tempon en agrabla maniero . . . Mi legos ĝis noktomezo, se la legado plaĉos al mi, alie mi legos ĝis la deka, aŭ ĝis la dek-unua. Se tiam li ankoraŭ ne estos vekiginta, tiam li nepre daŭrigos dormadi ĝis morgaŭ matene.

- Kaj kion vi faros post via legado?
- Tio dependas de cirkonstancoj. Eble mi enlitiĝos.
- Sed se okaze li tamen vekigĝos dum via dormado?
- Nu, li vekigu.

SinJORINO Bus alpaŝis al la kanapo kaj rigardis ekzamene la dormanton.

— Sed, ni ja tute ne konas lin; povas esti, ke li estas malbonfarulo aŭ krimulo, li ja povos mortigi nin ĉiujn, ĉar li aspektas kiel vera bandito.

— Jes, li estas malpura kaj tute kovrita je polvo, sed kial li mortigus?

— Kompreneble por priŝteli nin.

— Mi estas responde, nur kvietiĝu. Mi antaŭzorgos, ke li ne mortigos nin. Se bezone, mi ŝnurligos liajn manojn kaj piedojn same kiel la pigmeoj de Lilliputo ŝnurligis Guliveron.

— Li povas mordrompi la ŝnurojn.

— Tion li eble povos . . . Nu, mi pripensos la bezonajn antaŭzorgojn.

Daŭre rigardante la viron sur la turnita kanapo, ŝi diris post momento:

— Kiel vi eksciis, ke li estas maristo?

— Rigardu al lia mano, ankro estas tatuata sur ĝi kaj tion ni vidas nur ĉe maristoj.

— Ŝajnas al mi, ke li havas ĝibon.

— Li havas, ĉiu homo havas sian specialaĵon. Ekzemple vi havas belajn harojn.

La sinJORINO sin sentis flatata kaj ridis.

— Vi estas stranga sinJoro —, ŝi diris bonhumore.

— Vi pravas; tio estas mia specialaĵo, kaj la maristo, kiu nun estas mia gasto, havas korpan specialaĵon, nomitan „ĝibo“ . . . Vi vidas: ĉiu havas siajn ecojn kaj aĵojn, kaj tio estas feliĉiga, ĉar se ĉiuj virinoj posedus tiajn harojn, kiajn ekzemple vi, tiam ja tute ne ekzistus

„belaj“ haroj, ĉar la belaj ekzistas nur tial, ĉar ankaŭ malbelaj troviĝas sur la homaj kapoj.

— Ĉu li restos provizore tie ĉi?

— Tio dependos de cirkonstancoj. Morgaŭ matene ni priparolos tion plue. Mi petas: veku min je la sepa horo, se tiam mi ankoraŭ ne estos leviĝinta, kaj alportu tiam teleron kun tri acidaj haringoj kaj pecon da pano por li, kaj la ordinaran matenmanĝaĵon por mi.

— Tri acidaj haringoj!?

— Jes; ĉiu viro, kiu vekiga, post kiam li ebriiĝis, tre amas acidajn haringojn kun peco da pano.

— Nu, mi ĝin alportos —, kaj turnante sin, la sinjorino eliris kaj malfermis post si la pordon de la ĉambro.

La du viroj restis solaj. La maristo dormis kaj ronketis de tempo al tempo, la alia prenis libron kaj eklegis el „Etiko“ de Spinoza.

Tiu libro, originale verkita en la latina lingvo, estas tradukita en preskaŭ ĉiujn lingvojn de Eŭropo.

Li legis el la kvara parto de la holanda eldono. Tie staras sub la 57^a tezo:

„Vanta homo amas esti ĉirkaŭita de parazitetoj kaj flatistoj, sed li evitas la renkontiĝon de nobelepensantoj, ĉar: Trompofido estas ĝojo, naskita el tio, ke iu sin mem pli multe fidus ol li indas. Vanta homo kiel eble plej multe klopodas plifortigi sin en tiu falsa opinio. Tial li ŝatos la akompanion de parazitetoj kaj flatistoj (ne estas bezone difini pli klare, kio ili estas, ĉar ĉiu konas ilin) kaj evitas la akompanion de nobelepensantoj, kiuj ŝatas lin laŭ lia indeco...“

Li pripensis pri tiu tezo dum kelka tempo; tiam li legis plue kun atento, jen kapjesante, jen kapskuante nee, ĉar kelkaj tezoj estis al li tiel malfacile kompreneblaj,

ke li multfoje devis relegi ilin. La maristo dume ronketadis tute ne turmentante sian cerbon pri filozofiaj tezoj kaj problemoj, nek pri la Etiko de la fama holanda filozofo Spinoza.

Horoj pasis, kaj kiam fine la naŭa eksonis, la leganto formetis sian libron, ekpromenis tien kaj reen en la ĉambro, eksidis antaŭ la fenestro por postrigardi la homojn, kiuj sub li sur la strato preteriris; kaj kiam li pasigis tiel pluan horon, li refoje ekstaris kaj alpaŝis al sia gasto, kiu ronketis kaj kuŝis tiel kviete, kvazaŭ li jam neniam ekvekiĝus. Tiel (sed ne ebria) kuŝis ankaŭ Guliver, kiam la loĝantoj de Liliputo lin trovis.

La Liliputanoj ŝnure ligis la dormanton, ĉar ili timis lin.

Ŝajnis tamen ridinde al la longa pensionulo, ŝnurligi tiun ĝibhavan viron, kiu aspektis tiel sendanĝera.

Li ekpensis momenton. Tiam li tiris el la tirkesto de la tablo ŝnur-volvajeton kaj ligis la ekstremajon ĉirkaŭ unu el la kruroj de la maristo. Farinte tion, li laŭirigis la ŝnuron trans la kanapan dorson malsupren, tiam laŭ post la kanapa piedo kaj de tie al la pordo kontraŭ la kanapo. Malferminte tiun pordon, li eniris malgrandan ĉambron, utilantan kiel lia dormejo. Li kuŝiĝis, demetinte nur ŝuojn, jakon kaj veŝton, ektiris la ŝnuron, ĝis kiam ĝi estis streĉita kaj ligis ĝin sur sian pulson.

La du kuŝantoj nun estis kvazaŭ telegrafie unuigitaj unu al la alia, tiel ke la plej malgranda movo de la maristo nepre devus vekti lian gastiganton, kaj ĉi tiu, konvinkite, ke ĉio aranĝiĝos plue per si mem, fermis la okulojn kaj baldaŭ ekdormis.

Dua Ĉapitro.

Vekiĝo de l'gastiganto — Etiko de Spinoza — Vekiĝo de l'gasto —
Acidaj haringoj — Hago anstataŭ Roterdamo — Malgraŭvola
ŝipforkurinto — La rakonto de la ruso — La horloĝa ĉeno —
Johano, Ivan kaj la Insulano — Pri perdita monujo kaj belaj
fraŭlinoj — Farota promenado al Patersburgo — La ekspozicio
— La eksfiŝkaptisto kaj kiel lia edzino akiris okulvitrojn —
Lumturo kaj bela vojo — Pri promenantaj reklamiloj — Don
Kihoto kaj Saŭo Pauza.

La postan matenon, kiam apenaŭ la kamena horloĝo
sonigis la sepan, la longa dormanto vekigis. Li mal-
fermis la okulojn kaj tuj ekpalpis al si la pulson, ĉirkaŭ
kiu la kordo estis ligita. Tiam li eksidis malrapide.
La kordo, ankoraŭ streĉita kiel telegrafia interligilo, sin
etendis, kiel la antaŭan vesperon, de la lito ĝis la
kanapo; la ĝiba dormanto sekve devis kuŝi ankoraŭ en
la sama sintenado, en kiu lin lasis lia gastiganto. Ĉi tiu
senbrue leviĝis, ekstaris sur la plankon, malligis la
ŝnuron de la pulso kaj jetrulis la kordbuleton sub la
kanapon. Tiam li iris sur la piedfingroj al sia gasto,
klinis sin super la dorson de la kanapo kaj rigardis la
mariston, kiu kuŝis ankoraŭ surdorse. Kviete la ruso
spiris, kaj ŝajnis, kvazaŭ li tute ne sin movis dum la nokto.

— Li vekigu per si mem —, pensis la filozofo, kaj
li iris returne al sia dormejo, almetis la ŝuojn kaj la
veŝton, sin lavis, kombis al si la harojn kaj eksidis antaŭ
la tablo kun la vizaĝo turnita al la kanapo.

— Li ja vekigōs per si mem —, li diris, — mi atendas —, kaj li atendis, enpoŝigis ambaŭ manojn, rekte etendis la krurojn antaŭ sin, tiel ke ili elstaris malproksime el sub la alia flanko de la tablo. Tiam li enprofundiĝis en pensojn, el kiuj lin fine vekis sinjorino Bus. Ŝi eniris kun la matenmanĝaĵo por sia pensionulo kaj kun la haringoj por la fremda maristo.

— Bonan matenon, sinjoro; vi jam leviĝis?

— Jes, sinjorino.

— Kaj li? — La sinjorino ĵetis rigardon al la kanapo.

— Mia gasto? . . . Ho, li dormas, ne mortiginte vin, nek vian edzon, nek iun alian en la domo.

— Ĉu vi ne vekos lin?

— Ho ne! . . . Oni ne veku ebriiĝintan viron. Estas plej bone, se li tute fordormas sian ebriecon.

La sinjorino metis la manĝaĵojn sur la tablon kaj diris:

— Mi tuj alportos la kafon, sinjoro.

— Mi ekmatenmanĝos, kiam mia gasto estos vekiginta; il eble manĝos nur la haringojn. Se mi deziras kafon, vi alportu ĝin poste; mi sciigos tion, se bezone.

Sinjorino Bus, scivola kiel ĉiuj virinoj, alpaŝetis al la kanapo, rigardis la dormanton kaj suprentiris la nazon kvazaŭ por diri, ke la maristo aspektas malpura, tiam ŝi eliris la ĉambron, ĉar la vizaĝo de la filozofo esprimis klare, ke li ne sentis inklinon al babilado. Ŝi malsupreniris al sia kuirejo, lasante la pensionulon kaj la fremdulon kun la matenmanĝaĵo solaj.

La pensionulo manĝis, prenis „Etiko“ de Spinoza por agrable pasigi sian tempon kaj legis:

„Ambicio estas trograndigata deziro al gloro.

Klarigo. Ambicio estas la deziro, per kiu ĉiuj emocioj estas instigataj kaj plifortigataj; kaj tial ĉi tiu emocio povas esti regata tiel malfacile. Ĉar

tiel longe, kiel la homo estas regata de ia deziro, li samtempe estas animata de ĉi tiu deziro. Cicero diras: La plej bonaj homoj plej amas la gloron. Eĉ filozofoj skribis siajn nomojn sur verkoj, traktantaj pri la malkonfesado de la gloro, kaj tiel plu“.

La leganto sencele rigardis antaŭ sin pensante: Mi sekve ne estas bona homo, ĉar mi tute ne amas la gloron . . . , nu, mi ne estas kulpa en tio, tiel mi naskiĝis, tiel mi mortos, kaj li legis plue:

„Diboĉemo, estas malmodera deziro aŭ dezirogo al bongustaj manĝaĵoj.

Drinke mo, estas malmodera deziro al alkoholaĵo . . .“

Li denove pripensis kaj vole nevole direktis la okulojn al la kanapo, kiu en tiu momento komencis tremeti, kaj tuj poste ekaperis super la apogilo la altaj ŝultroj kaj la ĉiuloken disstarantaj haroj de la jus vekiginta maristo. Lia vizaĝo estis kaŝita post la ŝultro, ĉar li rigardis rekte antaŭ sin. Post momenteto li diris kelkajn vortojn en rusa lingvo. La filozofo, kvankam ne komprenante ilin, tuj konjektis, ke tiuj vortoj signifas: „Kie mi estas?“, ĉar tion ordinare ĉiu demandas, vekigante en la cirkonstancoj, en kiuj sin trovis la maristo. Li tial responde diris germane:

— En bona haveno.

La maristo, aŭdante ĉe sia flanko nekonatan voĉon, turnis la kapon dekstren, kaj ekvidante post tablo nekonatulon, kiu rigardis lin ridetante, li kredis sonĝi.

— En bona haveno!?! — li diris post momento . . .

Sed kie?

Tiam vidante la ŝnuron, per kiu estis ligita lia kruro, li demandis germane:

— Kial oni ŝnurligis min?

— Ĉar sinjorino Bus timis, ke vi mortigus dum la nokto ĉiujn ŝiajn samhejmanojn.

— Ke mi mortigus...!?

— Jes, tion ŝi timis... Nu, rigardu vin en la spegulo kaj vi ekvidos, ke vi aspektas kiel vera mortigisto kaj bandito. Mi tial ligis vin kiel la pigmeoj de Liliputo ligis Guliveron, sed mi ne uzis tiom da ŝnuroj kiom ili, ĉar mi opiniis tion superflua.

— Mi ne konas Guliveron, nek ankaŭ Liliputon...

Dirante tion, li refoje rigardis al la ŝnuro, poste al la ĉe la tablo sidanto kvazaŭ por peti klarigon, sed ĉar la sidanto nur ridetis, li fine malligis la ŝnuron kaj demandis konfuzite:

— Nu, sinjoro; diru al mi, mi petas, kiel mi venis ĉi tien.

— Ĉu vi ne memoras?

— Ne, mi nur memoras, ke netaŭgaj buboj turmentetis min, kiam mi volis ripozi momenton ĉe arbo en ... tiu parko...

— Kial ili vin turmentetis?

— Mi ne scias..., eble mi trinkis glaseton tro multe da brando..., tiam mi perdis la vojon al... mia ŝipo...; mi lacigis..., mi sidigis por ripozi momenton... ĉe tiu arbo...

— Vi tamen elektis strangan lokon por ripozi.

La maristo, kiu, kiel ni scias, estis rusa kaj parolis la germanan lingvon nur kripole, pripensis por serĉkolekti ĝustan esprimon, per kiu li povus senkulpigi sin; li tamen serĉis vane, ĉar li eligis nur kelkajn malklarajn frazetojn, en kiuj li uzis almenaŭ dekfoje la adverbbon germanan „da“, signifantan „tiam“. Estis klare, ke li hontis pro sia konduto, kaj la filozofo, rimarkante tion, tiris lin el la embaraso, dirante:

— Kompreneble; vi trinkis tro multe.

— Jes, kaj tiam mi ekripozis . . . , kaj tiam la buboj venis . . .

Refoje li eksilentis, kaj kiel eble plej bone ordigante siajn harojn per la fingroj, li subite diris:

— Kaj forŝtelis de mi mian ĉapon.

— Vi eraras, via ĉapelo kaj viaj ŝuoj kuŝas sub la kanapo.

— He! . . . vere!?! . . . Nu, tiam mi eraras, . . . pardonu al mi.

La maristo rigardis ĉirkaŭe; post momenteto li diris, klakinte la lipojn:

— Sinjoro, ne ofendiĝu . . . mi soifas terure.

— Kompreneble; post ebrieco sekvas soifo. Ĉu vi deziras tason da kafe?

La maristo rigardis antaŭ sin, tiam li respondis konfuzite:

— Mi preferas akvon.

— Bone, vi trinkos akvon, kaj se vi havas apetiton, vi povos manĝi la jenajn haringojn.

— Ĉu haringojn!?! . . . ho, volonte.

— Bonege, do levigu; lavu vin en mia dormejo jen post mi; kombu al vi la harojn per mia kombilo, trinku tiom da akvo kiom vi deziras, ĝi staras en karafo sur la tablo, tiam eksidu tie antaŭ mi kaj agu kvazaŭ vi estus hejme.

La maristo rampis kiel simio trans la apogilon de la kanapo kaj eniris la montritan dormejon. Kiam post kelka tempo li revenis kun purigitaj vizaĝo kaj manoj kaj kombitaj haroj, li alpaŝis al la kanapo, kaptis la ŝuojn kaj almetante ilin, li diris:

— Mi nun ekmemoras, ke vi forpelis tiujn bubojn . . . Kara Josefo! kiel mia pantalono estas kovrita per polvo . . . Ĉu vi havas broson?

— Vi bone ekmemoras . . . Broso estas en la brosingo flanke de la kanapo.

La maristo purigis sian pantalonon, dirante:

— Jes, mi nun memoras . . . , vi forpelis ilin; tiam vi helpis al mi ekstari; kaj tiam ni duope eliris tiun parkon, kaj tiam . . . , tiam, nu tiam . . . Sinjoro, mi ne memoras, kio okazis poste, sed mi dankas vin pro via helpo; . . . vi estas bona viro . . . — Dirinte tion, li donis la manon al sia protektinto, kiu respondis:

— Ĉu vi opinias min bona viro?

— Jes, tre bona viro.

— Nu, vi ne samopinias kun Spinoza, ĉar Spinoza opinias laŭ filozotia vidpunkto, ke mi ne estas bona viro.

— Spinoza . . . !? Mi ne konas Spinoza, sed se li opinias tiel, . . . tiam li estas azeno.

— Ni nun ne disputu pri tio . . . Prenu seĝon, ek-sidu tie tuj antaŭ mi kaj manĝu viajn haringojn.

La maristo obeis, manĝis la haringojn kaj diris:

— Sinjoro, mi refoje dankas.

— Kaj kiel vi nun sentas vin?

— Bonege!

— Vi estas maristo, ĉu ne vere?

— Rusa maristo. Kiel vi divenas, ke mi estas maristo?

— Rigardu nur vian manon, ĝi estas tatuata. Ĉu vi estas jam longan tempon en ĉi tiu urbo?

— Mi alvenis hieraŭ posttagmeze.

— Mi proponas, ke vi estu mia gasto hodiaŭ; vi eble dezirus viziti la vidindaĵojn de la urbo?

— Mi tre dezirus, sed je la deka mi devas esti surŝipe.

— Surŝipe!?

— Jes, mia ŝipo forvojaĝos la dekunan horon.

— Kien? — La gastiganto ridetis mistere, kiam li demandis tion.

— Patersburgon*.

— Sed diru, mia kara rusa amiko, kie do estas via ŝipo?

* La leganto ne miksu Patersburgon kun Peterburgo.

— Sur Y.*

— Sur la Y.!?... En Amsterdamo?

— Ho ne, mi trompiĝas, la pasintan jaron ĝi kuŝis tie.

— Kaj nun?

— Ĉe Feyenoord**, en Roterdamo.

— Sed, ĉu vi opinias esti nun en Roterdamo?

La maristo surprizite rigardis al sia gastiganto kaj demandis:

— Kie alie?

— Nu, mia kara, vi ne estas en Roterdamo, sed en Hago kaj estas neeble al vi esti surŝipe je la deka.

La maristo salte leviĝis kun terurigita vizaĝo, ekkriante:

— Kion vi diras!?... Mi ne estas en Roterdamo!?

— Vi estas en Hago.

— Ho, kara Josefo!... mi venos tro malfrue, la ŝipo foriros sen mi... La konduktoro de la vagonaro informis min malbone; li diris: „Vi estas en Roterdamo“. Mi do eliris el la vagonaro..., eniris la urbon por trinki glaseton da brando..., tiam...

— La ceteron mi jam scias.

— Sed kion mi faros!?... La ŝipo foriros sen mi...

— Nu, ĝi foriru!... Kio fariĝis, tio jam ne refariĝos kaj kio pasis, tio ne revenos...

La maristo iris tien kaj returnen en la ĉambro kaj aspektis tiel malesperanta, ke lin kompatis la filozofo, kiu tamen restis kvieta kaj diris plue:

— Rekvietiĝu, mia amiko, kontraŭ faro farita ne helpas medito...

— Sed la kapitano... la ŝipestro konsideros min kiel forkurinton... Ho Dio! kion fari?

— Kuiru viajn pizojn, mia kara; kuiru viajn pizojn! Ĉio fariĝos bona kaj ĉio aranĝiĝos per si mem.

* Het „Y“ (elparolu Ej) estas haveno en Amsterdamo.

** Haveno en Roterdamo.

La maristo iris al la kanapo, klinis sin por ekkapti sian ĉapelon; tiam pendigante ĝin sur sian pugnitan manon, li svingis la alian en malespero kaj diris:

— Kion do fari!... La ŝipo foriros sen mi!...

— Jes; post unu horo, kaj ne estas rimedo kuratingi ĝin. Mi do konsilas al vi denove: Kuiru viajn pizojn, sidiĝu, rekvietiĝu kaj restu provizore mia gasto... Ĉio aranĝigos per si mem.

La konsternita ruso, komprenante nur malmultajn el la al li adresitaj vortoj, eksidis kaj diris:

— Mi povos esplori, ĉu aliaj ŝipoj iros Patersburgon.

— Vi povos, sed restu ĉe mi hodiaŭ kaj tiel longe, kiel estos necese; morgaŭ ni aranĝos viajn aferojn, kaj nun rakontu al mi kviete, kiel ĉio fariĝis.

— Nu, mi rakontos...

Li pripensis momenton, turnadis la ĉapelon sur la puguita mano kaj ekrakontis:

— Mia ŝipo venis el Londono la dekduan de tiu ĉi monato; ni aliris al Roterdamo, kie ĝi devis resti tri tagojn... Mi diris al mi: Ivan, mi diris, vi uzos tiujn tagojn por rigardi ankoraŭ unu fojon Amsterdemon kaj Roterdamon, ĉar pasis jam kvin jaroj, kiam mi estis en Amsterdamo... Nu, tiam mi unue iris Amsterdemon kaj rigardis ĝin..., tiam mi reiris Roterdamon, kaj kiam mi kredis esti en la stacidomo de ĉi tiu urbo, mi demandis la konduktoron, ĉu mi estas en Roterdamo. Jes, li diris...; nu, tiam mi eliris la vagonon kaj la stacidomon, kaj promenis en la urbon... Mi pensis: la urbo aspektas iom alie ol antaŭe, sed ĉar mi trinkis kelkajn glasetojn, mi ne multe pensis pri tio..., tiam mi ekpromenis kaj promenadis..., tiam mi eniris trinkejon... Multaj fraŭlinoj estis tie..., belaj fraŭlinoj, ho, tre belaj!... Mi regalís ilin..., ili estis gajaj; mi same estis gaja kaj ekkantis kaj mi amuziĝ-

adis bone...; tiam mi trinkis ankoraŭ kelkajn glasetojn da brando... vera Skidama brando...; tiam la belaj fraŭlinoj lasis min sola kaj mi eliris la trinkejon kaj promenadis tra multaj stratoj...; tiam mi venis en tiun parkon... mi eksidis ĉe tiu arbo por ripozi...; tiam la buboj mokridis kaj turmentetis min..., kaj tiam...

— Tiam mi venis por malebligi, ke policanoj arestus vin por ĵeti en malliberejon.

— Jes, same kiel okazis al mi antaŭ kelkoj jaroj en Patersburgo.

— Ĉu tio sama okazis jam antaŭe?

— Feliĉe, jes, ... ĉar tiam mia ŝipo, kun kiu mi devus forveturi, pereis kaj fundiris, kaj mi ne dronis kiel la aliaj maristoj... do, estis feliĉe, ke tiam mi trinkis iom tro multe, ĉar pro tio la policanoj ĵetis min en malliberejon.

Ĉe tiuj vortoj li rigardis dekstren kaj maldekstren al la piedoj de sia seĝo, kie kelka brueto altiris lian atenton; vidante, ke ambaŭflanke de la seĝo elstaris el sub la tablo longa kruro, li subite demandis:

— Kio estas tio...?

— Nur miaj kruroj.

— Ho jes, viaj kruroj..., ili estas tro longaj por meti sub la tablon... — Tiam li rigardis ĉirkaŭe kaj diris plue:

— Ne ofendiĝu, sinjoro; sed vi havas belegan ĉambron kaj belegan domon.

— La domo ne estas mia, kaj ĉi tiujn apartamentojn mi luis.

— He!... do vi ne estas la posedanto?

— Mi estas maristo, aktoro, promenanta reklamilo kaj cetera.

— Maristo!?... .

Subite stranga rideto aperis sur la vizaĝo de Ivan

(la leganto sendube jam rekonis lin), kaj direktante la okulojn sur la ventron de sia gastiganto, li forĵetis la ĉapelon ankoraŭ pendantan sur lia pugno, kaj svingante kelkfoje la manojn supren, kvazaŭ li supren ĵetus kaj rekaptus du pilkojn, li ekkriis:

— Sinjor' kolego!... mi petas... ekstaru!... ekstaru!!

— Kial ekstari?

— Mi tuj diros tion...; ekstaru, mi petas!... ekstaru!!

— Nu, se mi povas fari al vi plezuron per tio, mi ekstaros.

La longa maristo, aktoro, promenanta reklamilo kaj cetere, tiris al si la kruojn, posten ŝovis la seĝon kaj ekstaris.

La okuloj de Ivan denove sin fiksas sur lian ventron kaj jen pendis de la veŝtopoŝo ĝis butontruo, ĉeno farita el brilantaj moneroj. La rideto de Ivan ŝanĝiĝis en esprimon, kiu montris grandan surprizon kaj ĝojon; li same ekstaris, altigis ambaŭ manojn kaj ekkriis:

— Mi trovis!... Mi trovis!... Vi estas Johano!

— Jes, mia kara, mi estas Johano; sed kiel vi eksciis tion?

— Per la ĉeno..., la ĉeno de la moneroj, kiujn donis al vi Jafet.

— Jafet!?

— Jafet, via amiketo de la insuleto, kies nomon mi ne konas.

— Ĉu vi konas tiun knabon?

— Ĉu mi lin konas!?... Ĉiu en Patersburgo lin konas.

— Li do estas en Patersburgo?

— Jes!... Ho, tio estas stranga historio...; mi rakontos ĝin... eksidiĝu, mi petas, kaj mi rakontos... Ho, kiel li ĝojos!

Ili eksidis kaj Ivan rakontis:

— Mi estis surŝipe de „Petro la Granda“, kaj sur la maro ne malproksime de la holanda marbordo. Mi estis kuiristo kaj okaze enrigardis en la maron. Tiam mi ekvidis boaton. Mi diris al mi: Ivan, mi diris, io neordinara estas kun tiu boato, ĉar mi ne vidas maristojn en ĝi. Tiam mi rigardis pli atente..., neniŭ homo videbla. Tiam mi diris al mia kuireja servisto: Petro, mi diris, iru al la ŝipestro kaj diru, ke malplena boato naĝas en la maro. Tiam la ŝipestro venis kaj mi montris la boaton. Tiam li prenis la vidilon kaj ekzamenis... — Ĝi estas senhoma —, li diris. Tiam du maristoj alremis per boato al tiu boato kaj revenis kun ĝi. Tiam ĝi estis supren tirata sur la ŝipon kaj en la boato kuŝis knabo kaj kesto... Sub la kesto estis mortinta hundeto. La knabo estis duone mortinta, sed rekonsciĝis poste. Li estis bela knabo... bukraj brunaj haroj... nigraj okuloj... sed li parolis tian strangan lingvon, nek holandan, nek germanan, nek anglan, nek francan, nek alian konatan... Neniŭ el la maristoj povis paroli kun li. Tiam li ŝipiris kun ni al Patersburgo. Tie ni duope (li kaj mi, ĉar ni estas bonaj amikoj) iris surborden; li deziris vidi la urbon. Tiam ni eniris trinkejon kaj mi trinkis glaseton tro multe... Tiam ni plue promenadis sur la stratoj kaj la bubaĉoj mokis kaj turmentetis min. Tiam mi volis forpeli ilin, sed falis tra vitro de butikoj. Tiam policanoj arestis min kaj ĵetis en malliberejon, kaj kiam mi forlasis ĝin post kelkaj tagoj, la knabo estis malaperinta. Tiam mi lin serĉis, sed ne trovis. Tiam mi reiris maron sur alian ŝipon, ĉar „Petro la Granda“ estis forveturinta sen mi, sed ĝi pereis kaj fundiris, kiel mi jam diris. Post kelkaj jaroj mi revenis Patersburgon kaj unu vesperon mi iris al koncerto kaj aŭdis la faman violoniston Romeskaŭ. Tiam mi refoje trinkis dum la paŭzo tro multe da brando kaj kolegoj rekondukis min surŝipen. La

postan tagon vizitis min en mia ŝipa kuirejo tiu sama violonisto, kaj je mia ĝojo mi eksciis, ke li estas mia malaperinta bubo Jafet. Tiam li parolis flue la rusan lingvon kaj li rakontis pri siaj aventuroj kaj pri sia amiko Johano. Tiam mi promesis al li serĉi lian amikon, ĉar tiu amiko sola scias, kie Jafet naskiĝis, ĉar Jafet ĝis nun ne scias, kie loĝas liaj gepatroj, nek kie kuŝas la insuleto, sur kiu li naskiĝis. Sed nun per vi li ekscios tion... Do, dank' al la glaseto, kiun mi trinkis tro multe, vi trovis min en tiu parko, mi trovis vin per la ĉeno kaj Jafet retrovos siajn gepatrojn... Sekve: Vivu la brando!!

Dum Ivan rakontis, Johano aŭskultis kun ĉiam pli-grandiganta miro, kaj kiam la rakonto finiĝis, li demandis:

— Ĉu tiu knabo fariĝis violonisto!?

— Jes, kaj tre fama, sed spite tion li ne fariĝis fiera; li tamen bedaŭras, ke li ne scias, kiuj estas liaj patro kaj patrino kaj kie ili estas.

— Nu, mi sciigos tion al li. Liaj gepatroj eble vivas ankoraŭ. Ĉu vi scias la adreson de la knabo?

— Jes, ĝi sidis en mia monujo.

Ivan enpoŝigis la manon por aperigi la monujon, li tamen enpoŝigis la malĝustan manon, ĉar la dekstra poŝo estis malplena. Li sekve enpoŝigis la maldekstran manon kaj... ekpaliĝis, dum li murmuretis kelkajn vortojn en al Johano nekonata lingvo, sed kinju tiu tuj divenis.

— Ĉu vi perdis la monujon? — li demandis.

— Jes, mi ĝin perdis... ho sankta Josefo! — kaj li estis ploronta, sed retenis la larmojn.

— Eble la belaj fraŭlinoj de la trinkejo ĝin forprenis, ĉar fraŭlinoj en tiaj trinkejoj ne estas tre honestaj kaj fidindaj.

— Diablo! Mi tuj aliros tien; en la monujo sin

trovis ne nur la adreso de Jafet, sed ankaŭ cent holandaj guldenoj...

— Kiujn vi neniam reakiros.

— Tiam mi plendos ĉe la poliestro.

— Kiu mokridos vin.

— Kial?

— Ĉar neniu havas aferojn ĉe tiuj belulinoj.

— Kion do fari?

— Kuiru viajn pizojn!

— Kion?

— Mi pripensu fojon... Via mono estas neakireble perdita, same kiel la adreso de nia amiko. Sed diru, mi petas: Kial li forlasis boate kaj tute sola la insulon de siaj gepatroj?

— Ĉu vi ne scias!?!... por serĉi vin.

— Por serĉi min?

— Tion li diris al mi, sed kompreneble li ne trovis vin, ĉar vi ne estis en Patersburgo, sed en Hamburgo.

— Se li intencis min serĉi, tiam estas nun mia devo, serĉi lin reciproke, kaj mi iros Patersburgon.

— Per ŝipo?

— Tio dependas de cirkonstancoj. Eble mi ne iros per ŝipo, ĉar provizore mi ne volas refariĝi maristo. Se restos al mi sufiĉa mono, mi iros vagonare; sed tio estos tro multekosta..., nu, tiam mi iros piede.

— Piede al Patersburgo!?

— Jes.

Ivan rigardis sian gastiganton kaj diris:

— Ni iru kune!

Johano ridetis, dirante:

— Ĉu vi ne scias, ke tio estas por vi eble tro longa promenado kaj ke oni nepre devas esti bona marŝanto por tion elporti.

— Ho, mi estas bona marŝanto, sed ni povos eviti

la promenadon. Vi skribu leteron al Jafet Romeskaŭ, violonisto en Patersburgo; tio sufiĉos, ĉar ĉiu lin konas tie.

— Tion mi povus, sed prefere mi volas lin surprizi.

— Nu, ni surprizu lin duope.

— Bone, ni faru tion... Kiam ni ekvojaĝos?

— Tuj kiam vi deziros.

— Antaŭe mi tamen montros al vi Scheveningen; nokte vi povos dormi sur tiu kanapo... Unu promeson vi antaŭ ĉio devas fari al mi.

— Mi promesos ĉion, kion vi deziras.

— Dum la tempo, kiam ni estos kune, vi ne trinku brandon, eĉ ne unu solan ĝlaseton.

— Mi promesas... Jen mia mano.

Johano premis la manon de la kuiristo, ekstaris kaj almetante la frakon kaj la ĉapelon, li diris:

— Ni tuj sciigos al la rusa konsulo, kial estis al vi neeble forvojaĝi per via ŝipo, por ke la ŝipestro ne povu konsideri vin kiel forkurinton; poste vi rigardos la vidindaĵojn de Hago kaj Scheveningen, kaj post du aŭ tri tagoj ni ekpromenos Patersburgon.

— Sed kie ni restos nokte dum nia promenado?... kaj kiel ni manĝos sen mono?

— Mi posedas ankoraŭ kelkan monon, kaj ĉar la vetero estas bona, ni trovos ĉie taŭgan lokon por pasigi la noktojn, kaj se necese, ni laboros dumvojaĝe.

— Labori dumvojaĝe? Sed kiel mi laboros? Mi ne lernis metion.

— Ni laboros laŭ cirkonstancoj; mi povos ludi en teatro kaj vi povos fariĝi promenanta reklamilo.

— Kio estas tio?

— Mi montros al vi hodiaŭ promenantajn reklamilojn sur la stratoj en la urbo, tiam vi ekscios, kio estas tio. Ĉiu, kiu povas marŝi, povas fariĝi promenanta reklamilo, vi ankaŭ.

Ivan ekstaris, ekkaptis sian ĉapelon, kiu estis rulinta

malproksimen, surmetis ĝin kaj la du amikoj malsupreniris la ŝtuparon, Johano ĉiam babilante pri sia knabo, la insulano, liaj gepatroj kaj cetere. Ili iris kune al Maŭritshuis, al Panoramo de Mesdag, kie ili admiris la pentraĵojn, kaj je la tria horo en la posttagmezo ili iris al Scheveningen, kie okazis granda internacia ekspozicio pri komerco, fiŝkaptado kaj sporto. Ĝi estis aranĝata en speciala tentforma konstruaĵo, sude de la Kurhaŭs. La ekspozicio daŭris jam du monatojn kaj estis finiĝonta post unu monato.

En preskaŭ ĉiuj ekspozicioj la elmetitaj objektoj ne ĉiam rilatas la celon, por kiu la ekspozicio okazas, kaj same la granda konstruaĵo por la ekspozicio de komercaĵoj, fiŝkaptaj kaj sportaj aferoj ne nur enhavis objektojn koncernantajn tiujn tri aferojn, sed ankaŭ multajn aliajn, kiel ekzemple pentraĵojn, antikvaĵojn, librojn, kaj tiel plu. Sekve, por ĉiuj homoj sin troviĝantaj tie, kaj ankaŭ por niaj du amikoj, estis tie multaj interesaj, tiel ke ili pasigis kune tie longan tempon en agrabla maniero.

Ivanon interesis plej multe la miniaturaj ŝipoj, ekspozitaj de la Scheveningaj fiŝkaptistoj. Ivan admiris la malbelformajn ŝipojn, nomitajn „bomoj“ kaj metitajn sur grandaj kuŝantaj speguloj, kiuj prezentis la maron. Tiuj „bomoj“ montris, kiel la haringo estas kaptataj. Retoj etendiĝis de la ŝipa bordo ĝis la akvo, kaj amaso da haringo pendis kun la kapo en la maŝoj. La maristoj (pupoj, vestitaj kiel Scheveningaj fiŝkaptistoj, sed multe tro grandaj en komparo kun la ŝipo) tiris al si la retojn. Sur la ŝipo sin trovis ĉio, kion oni bezonas sur la veraj ŝipoj, kaj Ivan kun atento ekzamenis la kaptadon, tute ne pensante pri Johano, kiu staris je kelka distanco ĉe ekspozitaj libroj, kiuj kuŝis malfermitaj sur du longaj tabloj. Frapeto sur lia brako altiris la atenton de la ruso, kaj sin turniate, li staris vizaĝon kontraŭ vizaĝo antaŭ bela fraŭlino, kiu prezentis al li papereton. Ŝi

ridetante montris al li du vicojn de tiaj blankaj dentoj, kaj rigardis lin tiel afable per du brilantaj bluj okuloj, kiuj harmoniis mirinde bele kun la blondaj haroj, kovritaj de koketa ĉapeleto, ke Ivan, pensante, ke ŝi deziras vendi la montritan papereton, kiun li konsideris kiel enirbileton de ia aparta amuzejo en la konstruaĵo, bedaŭris, ke li ne povas plenumi tiun deziron, kaj kun ĉagreno li memoris sian perditan monujon. Li turnis la internon de siaj pantalonaj poŝoj eksteren por montri, ke li estas tute senmona, tiam li grimace ridetis, altigis la ŝultrojn kaj reordigis la poŝojn; tiam la fraŭlino foriris. Ivan refoje turnis la atenton sur la ŝipojn.

— Belaj ŝipoj, kamarado —, li diris al maljuna maristo staranta apude kun la manoj en la poŝoj.

La „kamarado“, kiu havis dikan tabak-maĉaĵon en la buŝo, tiel ke lia vango elstaris rondforme, jese kapklinis, jetis per la lango la maĉaĵon al la alia vango kaj diris:

— Tiel ni kaptas la haringojn. Mi faris tion dum kvindek jaroj . . . Ĉu vi estas ankaŭ maristo?

— Jes, rusa maristo, . . . ŝipa kuiristo.

— Mi estis dum dudek jaroj „Schipper“*.

— Skipper? . . . Mi ne komprenas.

— Kapitano de fiŝkapt-ŝipo.

— Ho, kapitano . . . , kaj nun „pensioniert“**?

— Pensioniert!? — La grizulo laŭte ekridis, kraĉis sur la teron kaj diris:

— Ho ne, oni ne pensumas la maljunajn fiŝkaptistojn en nia lando. Se ili ne dronas kaj fariĝas tiel multaĝaj, ke la ŝipmastro jam ne povas ilin uzi, nu, tiam ili ekhavos lokon en la malriĉulejo.

— Ĉu la ŝipmastroj estas tro malriĉaj por subteni vin kaj la aliajn maljunajn kaptistojn?

* Elparolu *shipet* = kapitano de ŝipo = ŝipestro.

** pensiumita.

— Ĉu ili estas malriĉaj? . . . Riĉaj ili estas, riĉaj kiel nia reĝino.

— Kial do ili ne pensiumas vin?

— Ĉar ili volas fariĝi ankoraŭ pli riĉaj . . . Mi vidas, ke vi tute ne konas la holandajn ŝipo-posedantojn.

— Ĉu neniu estas pensiumata ĉi tie?

— Jes, la ministroj kaj aliaj eminentaj sinjoroj. La grizulo lange ĵetis la maĉajon kontraŭ la dekstra vango, kraĉis refoje kaj eksilentis.

— Ĉu vi havas infanojn? — demandis Ivan.

— Mi havis . . ., du filojn . . .; ambaŭ estas ĉe nia Sinjoro.

— Ĉu ili mortis?

— Ambaŭ dronis. — La maljuna ekskaptisto de fiŝoj emociiĝis, kaj liaj okuloj malsekiĝis. Ivan kompatis la viron kaj li ekpensis refoje pri sia perdita monujo, tiam li demandis:

— Ĉu via edzino vivas?

— Jes, ni estas kune en la malriĉulejo.

— Ĉu ŝi jam vidis la ekspozicion?

— Ŝi! . . . Ho ne, ŝi estas duone lama kaj preskaŭ ne povas marŝi.

— Ĉu ŝi ne povas plu labori?

— Mi laboras hejme por ŝi, kaj ŝi sidas la tutan tagon ĉe la fenestro kaj rigardas eksteren.

— Nenion farante?

— Ŝi amuz legi sian biblion, sed ŝiaj okuloj fariĝis tro malfortaj.

— Ŝi uzu okulvitrojn, kamarado.

— Okulvitrojn! . . . Ili rompiĝis kaj la okulvitroj, per kiuj ŝi povus legi, kostas tro multe . . ., tial ŝi jam ne legas sian biblion, sed rigardadas eksteren.

Ivan komprenis ĉion, kion diris la grizulo; li pensis: — Se mi do havus mian monujon, tiam mi tuj donus al li por aĉeti okulvitrojn por lia edzino.

En tiu momento Johano alproksimiĝis, kaj Ivan diris al li:

— Mi petas, pruntedonu al mi iom da mono.

— Kiom multe?

— Kiom kostas tiaj okulvitroj, kamarado? — demandis Ivan la maljunan mariston.

Ĉi tiu, pensante, ke la demando estis farita pro scivolemo, kraĉis sur la plankon kaj respondis indiferente:

— Kvar guldenojn.

— Pruntedonu al mi dek —, diris Ivan al Johano.

La filozofo elpoŝigis bankbileton kaj estis enmanigonta ĝin al la kuiristo, sed ĉi tiu diris:

— Nur donu al mia nova kamarado, lia lama edzino bezonas okulvitrojn, sed la mono mankas.

La „nova kamarado“ ridetis, ĉar li kredis, ke la du fremduloj volas moki lin, sed vidante, ke ili ne ŝercis, li hezite akceptis la monon, deprenis la ĉapon kaj diris konfuzite:

— Mi dankas, sinjoroj... Nia kara Sinjoro rekompencu vin ambaŭ —, kaj jam ne pensante pri la riĉaj ŝipo-posedantoj, sed nur pri la feliĉo, kiun kaŭzos la novaj okulvitroj, li surmetis la ĉapon, maĉadis sur sia tabaka maĉaĵo kaj ĝoje eliris la konstruaĵon de la ekspozicio.

Liaj bonfarintoj promenis plue, rigardis la ekspozitajn objektojn, kaj post du horoj forlasis la ekspozicion por laŭiri la marbordon, tiel faman pro sia beleco. Ĉe la fino de la larĝa promeneja vojo, kuŝanta paralele kun la marbordo, staras la lumturo. Ili ĝin supreniris por ĝui la belan panoramon sin etendiĝantan ĉiuflanke malproksimen, kaj malsupren irinte la turon, ili ekpromenis tra la Keizerstrato, unu el la plej malnovaj stratoj de Scheveningen, kondukanta de la marbordo ĝis la belega Scheveningena vojo. Tiu fame konata vojo, konsistanta el ses unuopaj vojoj, unu flanke de la aliaj, kuŝas ĉe la okcidento de la hagaj arbaretoj kaj formas kun ili unu el la plej ĉarmaj lokoj de la urbo Hago.

Johano, kiel bona promenanto, kiu ne amis sidi en tramvagono, ekmarŝis sur la plej maldekstra vojo, ĉe kies du flankoj kreskas altaj arboj, ĉiam protektantaj la promenantojn kontraŭ la brulantaj radioj de la suno.

— Ni promenos returnen, ĉu ne? — li diris al la kuiristo.

Ĉi tiu, pripensante pri la longa promenado al Patersburgo, jese kapklinis, dirante:

— Jes, ĉar estos por mi bona antaŭ-ekzercado por nia promenado al Rusujo —; tamen la esprimo sur lia vizaĝo nerefuteble klare kontraŭparolis liajn vortojn; prefere li estus enirinta la tramvagonon, ĉar li jam laciĝis.

Johano ekridetis kaj malsupren rigardis sur sian kamaradon, kiu kiel pigmeo marŝis ĉe lia flanko. Vole-nevole li rimarkis, ke la preterpasantoj rigardis lin kaj la „pigmeon“, ĉar li konsciis, kian strangan kontraston li faris kun la ĝibhava kuiristo

— Kurag'on, mia amiko! — li diris, — kurag'on kaj ĉio finiĝos bone.

Ivan elspiris profundan spiregon, sed li ne respondis.

— Kuiru ilin, mia kara, kuiru ilin; agu kiel mi, kaj arang'u vin laŭ la cirkonstancoj.

Kiam ili atingis la „Promenejon“, la tiel nomatan restoracion, starantan duonvoje inter Scheveningen kaj Hago, Johano aŭdis, ke Ivan komencis spiregadi kiel laca ĉevalo.

— Ĉu vi laciĝis, kamarado? — li demandis.

— Jes.

— Kaj vi volas marŝi kun mi al Patersburgo?

— Mi ja kutimiĝos al la marŝado.

— Mi opinias, ke ne; viro kun tia malforta brusto, kian vi havas, ne povas alkutimiĝi al tio.

— Kion do fari? — melankolie demandis Ivan.

— Ni kompreneble ne promenos al Patersburgo.

— Kiel do ni aliros al Jafet?

— Tio dependas de cirkonstancoj... eble vagonare.

— Sed mankas al ni la bezona mono... Ho ve, mia perdita monujo.

— Ni povos perlabori antaŭe tiun bezonan monon.

— Perlabori?

— Jes, kiel promenantaj reklamiloj. Mi jam pripensis tion... Ĉu vi scias, kiuj estas Don Kihoto kaj Sanĉo Panza?

— Mi ne konas ilin, ... neniam mi aŭdis pri ili.

— Nu, mi aŭdis kaj legis pri ili. Ni imitos tiujn du hispanajn virojn. Nur atendu, vi ja ekvidos... Ĉu mi marŝas tro rapide? — li demandis post momento.

— Jes, tro rapide, viaj kruroj estas tiel longaj... mi laciĝis...

— Ni eniru la tramvagonon, kaj reveninte en mian ĉambron, mi klarigos al vi miajn plaĉon kaj intencon; ili nepre plaĉos al vi.

Tria Ĉapitro.

Sinjinorino Bus estas surprizita, kaj Ivan melankolia — Promenado de Johano — Refoje Spinoza sed... el bronzo, kaj liaj malamiko — Servema sinjinorino — La luotaj apartamentoj — Johano siavice estas surprizita — La nimfo — Edzo, kiu malkontentiĝis pri la konduto de sia edzino — La minacanta revolvero kaj kiel seĝo ŝanĝiĝis en malliberejon — Kiel Johano faras al si elirejon el ŝlosita domo — Pri policanoj, fotografilo kaj teatraj objektoj.

Ivan kaj Johano sidis komforte ĉe la tablo kaj manĝis. Apude, kun brakoj krucitaj unu sur la alia, sinjinorino Bus staris kaj aŭskultis kun surprizo, kion diris Johano.

— Kaj tial —, li diris plue, — kaj tial, sinjinorino, ni ne povos loĝi ĉe vi pli longe. Restas al mi nur tiom da mono por aĉeti kavaliran vestaron.

— Kian vestaron?

— Mi ankoraŭ ne parolis al vi pri tio, sinjinorino Bus; vi scias, ke ni devas perlabori tiom da mono por vagonare vojaĝi al Patersburgo. Tio estas longa kaj multekosta vojaĝo. Vi scias ankaŭ, ke mi estas aktoro, sed nuntempe la teatro restos fermita dum du semajnoj, kiel mi ekaŭdis; mi do ne povas proponi nun miajn teatrajn servojn al iu ajn direktoro. Sekvas el tio, ke ni alimaniere devos perlabori nian vojaĝmonon. Ni (mia amiko Ivan kaj mi) tial devas serĉi laboron ĉe fama komercisto aŭ firma, kaj tiu laboro konsistos el reklamado, ĉar eksci, sinjinorino, ke la reklamo estas la plej forta armilo de komercistoj por superi siajn kolegojn... Ni do fariĝos promenantaj reklamiloj.

— Sed sinjoro, vi do ne povas tiel gradmalaltiĝi...!
Via rango en la societo kiel aktoro...

— Ne parolu pri gradoj aŭ rangoj, sinjorino, ĉar ili ekzistas nur image; mi jam pruvis al vi, ke ĉiuj rangoj estas egalaj kaj same altaj.

— Jes, vi pruvis, sed malgraŭ tio mi ne samopinias.

— Mi scias tion. Vi prefere servas tiel nomatajn „grandajn sinjorojn“ ol „promenantajn reklamilojn“, ĉu ne vere?

— Pardonu al mi, sinjoro, al neniu mi servos kun pli da plezuro ol al vi, eĉ se vi estus tia „ilo“, sed kion diros la homoj, vidante vin tia?... kaj via amiko ja tute ne taŭgos por esti tia „ilo“.

Vi eraras, mi pruvos al vi, ke ni kune estos la plej taŭga reklamilo, kiu iam marŝis tra la urbo; sed mi bezonos la helpon de du kvarpeduloj.

— Du kvar...!?

— Jes, ĉar ni same kiel Don Kihoto kaj Sanĉo Panza bezonos malgrasan ĉevalaĉon kaj azenon.

— Por kion fari?

— Por rajdi sur ili same kiel faris tiu Don kaj lia Sanĉo.

Sinjorino Bus altigis ambaŭ manojn pro surprizo; ŝi tamen tuj rekrucigis ilin sur sia brusto, dirante:

— Estas feliĉe, ke mi vin konas kiel ŝercemulon, alie mi ja kredus, ke vi perdis la prudenton.

— Sinjorino, ni ne interdisputu pri tio, ĉu mi perdis la prudenton aŭ ne; mi volis uur komuniki al vi, ke ni ŝanĝos la pensionon kiel eble plej baldaŭ. Post la manĝado mi serĉos tre malmultekostajn ĉambrojn en alia kvartalo de la urbo kaj tuj post kiam mi estos trovinta ilin, mi adiaŭdiros vin. Ĝis nun mi elspezis multan monon, mi povis tion fari, sed la cirkonstancoj aliĝis; mi devas de nun esti ŝparema, sekve mi estas devigata hui aliajn apartamentojn.

— Nu, sinjoro, mi bedaŭras vian foriron; eble vi revenos post kelka tempo.

— Tio dependos de cirkonstancoj; tio dependos de cirkonstancoj.

Sinjorino Bus malrapide turnis al li la dorson kaj eliris la ĉambron.

Ivan, kiu komprenis nur malmulte la holandan lingvon, precipe ĉar la temo, pri kiu oni parolis, estis iom stranga, ĝis nun kviete manĝis kaj trinkis. Ŝajnis, ke li ĵus satiĝis, ĉar li formetis la forkon, ŝovis la teleron kaj la glason flanken kaj diris:

— Benitan manĝadon, kamarado.

— Mi dankas, Ivan.

Johano same satiĝis kaj la du viroj ekstaris.

— Ivan, mi tuj refoje devas eliri, sed mi vidas, kiel laca vi estas ankoraŭ; do ripozu komforte sur la kanapo, dormu momenton, se tio plaĉas al vi kaj atendu mian revenon.

— Mi spertis, ho ve, ke mi neeble povus piediri al Patersburgo —, diris la kuiristo, kaj li eligis duan ĝemegon. — Mi bedaŭras, ke per tio . . ., ke per tio . . . ke mia brusto . . ., ke . . ., ho ve . . . —

Li traserĉis sian tutan germanan konon por trovi la esprimon, kiun li bezonis por komprenigi, kion li tiel volonte klarigus al sia kunulo, sed li malsukcesis, grimace ridetis, svingis la brakojn kaj estis ploronta.

— Ho, mi komprenas, mia amiko . . . Ne melankoliĝu, mi petas; ĉio ja fariĝos bona. Lasu min nur fari kaj agi, kaj ĉio aranĝigos per si mem. — — — Dormu bone!

Johano surmetis la ĉapelon kaj eliris la ĉambron, dum la kuiristo kuŝiĝis sur la kanapo por ripozi aŭ dormi.

Lia vetero estis varma, sed spite al tio Johano marŝis per siaj regulaj, longaj paŝoj tra multaj stratoj, sed la nova, serĉota pensio ne povis sin trovi en la belaj

kvartaloj de la urbo. Li tial trairis ilin tute ne serĉante. Li laŭiris fine la belan „Wagenstrato“n ĝis la alta ponto, sed opiniante, ke ankaŭ ne trans la ponto estas troveblaj meble provizitaj ĉambroj je malalta prezo, li turnis sin dekstren, trairis la „Dunne Bierkade“ kaj ekhaltis momenteton tie, kie ĝin krucas la „Paviljoensgracht“; tiam li turnis sin maldekstren, transiris la tie kuŝantan ponton, ĉar ŝajnis al li, ke en tiu kvartalo eble troviĝas la ĉambroj, kiujn li bezonas. Li rigardis supren al la fasado de la unua domo por vidi, kiu nomo staras sur la breteto, indikanta la nomon de la strato, kaj legis: „Spinozastraat“. — He! — li ekkriis —, ĉu oni nomas tiun ĉi straton laŭ la granda holanda filozofo?

Se li sciis, ke Spinoza estis loĝinta kaj mortinta en unu el la apudaj domoj, tiam li ne mirus, sed li neniam ekaŭdis pri io tia; li eĉ ne sciis, ke la filozofo estis loĝinta en Hago kaj ke lia tombo staras tie en unu el la plej grandaj preĝejoj.

Johano laŭiris ambaŭ stratflankojn, refoje transiris la ponton kaj rigardis explore la suprojn de la domoj por vidi, ĉu ie post fenestro staras la sciigo, ke la loĝantoj luigas meble provizitajn ĉambrojn. Subite liajn okulojn trafis granda kvadrata marmora ŝtono, masonita sur la fasado de malnova konstruaĵo. Li posteniris kelkajn paŝojn por legi la skulptitajn vortojn sur tiu ŝtono, kaj ie sia surprizo tiuj vortoj sciigis al li:

Hier woonde
Spinoza
van 1675 tot zyn dood
1677*.

Dum kelkaj minutoj li rigardis la marmoran ŝtonon, la fasadon kaj la fenestrojn, post kiuj la verkinto de

* Ĉi tie loĝis Spinoza de 1675 ĝis sia morto 1677.

„Etiko“ versajne verkis sian neforgeseblan filozofiaĵon. Tiam li iris plue kaj jen li staris flanke de la statuo, prezentanta la sidantan, meditantan scienculon mem.

— Jen lia statuo! — tio estis la vortoj, kiuj vole-nevole eliĝis el la buŝo de Johano, kaj li aliris al ĝi, ĉirkaŭiris la feran kradon, en kies mezo sidis sur piedestalo kaj en antikva seĝo la filozofo, droninta en pensojn kaj kun kraĵono en la dekstra mano.

Haltante antaŭ la flanko de la krado, al kiu la statuo turnas la klinitan vizaĝon, li vidis, ke la bronza kapo estis makulita sur tri lokoj: Grandaj sekigintaj tabakmaĉaĵoj estis ĵetitaj sur unu okulon, sur la frunton kaj sur la vangon; krom tio kuŝis sur la genuo de la statuo malpura folio de brasiko.

Johano ekmiris: Kiu povus esti la ĵetinto de tiaj malpuraĵoj —, kiam malrapide alproksimiĝis promenanta maljuna sinjoro.

Johano lin salutis kaj demandis:

— Kiu do tiamaniere malpurigis tiun statuon!

La grizulo haltigis sian promenadon, rigardis supren al la kapo de Spinoza kaj respondis:

— La judoj.

— La judoj!?

— Jes, ili ĉiam ĵetas malpuraĵojn sur ĝin.

— Sed kial do?

— Ĉar ili malamas Spinozan.

— Mi petas, sinjoro, pruntedonu al mi dum unu minuto vian bastonon.

La grizulo ridetis surprizite, sed prezentis la bastonon, mirante pri la stranga peto de la longa fremdulo.

Johano forigis la malpuraĵojn per la bastona pinto kaj redonante la bastonon, li diris:

— Mi dankas, sinjoro... Vi vere opinias, ke la judoj malamas tiun statuon?

— Ne la statuon, sed lin mem ili malamas.

— Kial?

— Spinoza estis mem judo, sed li malfideliĝis... oni ekskomunikis lin, ĉar li verkis filozofiaĵojn, kiuj kontraŭdiras la religiajn principojn de la judoj.

— Mi scias, ke la judoj de lia tempo malamis kaj ekskomunikis lin, sed mi ne sciis, ke la nuntempaj judoj estas tiel malsaĝaj, ke ili ankoraŭ nun sin vengas, malpurigante la statuon de la filozofo.

La maljunulo skuis la kapon kaj diris:

— Ĉu vi estonte preteriros pli ofte tiun statuon?

— Tio dependas de cirkonstancoj.

— Nu, se jes, tiam mi konsilas al vi aĉeti bastonon, ĉar la statuo preskaŭ ĉiam portas sur si tiajn signojn de la juda malamo... hodiaŭ vi forigis ilin per mia bastono, morgaŭ vi denove povos tion fari kaj tiel plu... Bonan tagon sinjoro!

Li levis la ĉapelon kaj ekpromenis plue.

La sonorilo de la alta „Sankta Jakobo-preĝejo“ en tiu momento sonigis la kvinan horon, kaj ĉar Johano deziris trovi siajn ĉambrojn antaŭ la vespero, li same eklevis la ĉapelon kiel signo de resaluto kaj daŭrigis sian iradon laŭlonge de la domoj; sed nenie post la fenestroj li ekvidis la anoncon, ke tie estas haveblaj meble provizitaj apartamentoj.

— Ĉu sinjoro serĉas ion? — Virina voĉo flanke de Johano subite faris al li tiun demandon

— Ĉambrojn.

— Iru tien! — La sinjorino fingre montris proksiman domon duetaĝan, post kies fenestro tamen ne staris anonco.

— Ĉu vi konas la loĝantojn?

— Mi loĝas tie.

— Des pli bone; la serĉado jam tudas min.

— Ĉu vi deziras vidi mian ĉambron?

— Volonte . . . Vi havas nur unu disponeblan ĉambron?

— Mi havas pli ol unu, sed unu sola eble sufiĉos —, ŝi respondis, mistere ridetante kaj okulumante per unu okulo.

Johano, kiu ne rigardis ŝin, sed la domon, ne vidis la palpebrumon, kiun ŝi jetis al li, kaj demandis:

— Kaj la prezo?

— Ni ja interkonsentos —, ŝi diris, — nur sekvu min, la cetero ja aranĝiĝos.

Ili jam atingis la pordon; la sinjorino malŝlosis ĝin, eniris kaj Johano sekvis.

— Mi petas, sinjoro: supreniru!

Li supreniris kaj la sinjorino, ferminte post si la pordon, sekvis. La tapiŝe kovrita ŝtuparo, kondukanta krute supren, estis tiel mallarĝa, ke du homoj apenaŭ povis supreniri unu flanke de la alia. Johano sekve unua atingis la supron kaj atendis. La sinjorino kuratingis lin tuj, kaj ambaŭ staris sur malluma koridoro.

— Nur antaŭen, sinjoro, mi petas.

Johano trairis la koridoron, kiu estis longa ĉirkaŭ ses metrojn. Ĉe la fino li ekhaltis antaŭ pordo. La sinjorino malfermis ĝin kaj ambaŭ eniris ĉambreton, tiam ŝi, ferminte la pordon, montris al Johano kanapon, invitante lin geste, ke li eksidu.

Li eksidis. La ĉambro estis malgranda kaj havis nur unu fenestron, kiu sin trovis tiel alte, ke estis neeble rigardi tra ĝi eksteren. Sur la planko kuŝis diketa tapiŝo multkolora, kaj sur ĝi staris unu kvadrata tablo, tri seĝoj kaj la kanapo, sur kiu estis sidanta Johano. Sur la muroj pendis speguleto kaj kelkaj ilustraĵoj post kadro. En la ĉambro estis, krom la pordo kondukanta al la koridoro, unu alia kontraŭ ĝi, kiun la sinjorino malfermis, dirante:

Mi petas, sinjoro, atendu unu minuton, mi tuj revenos al vi, intertempe rigardu la ĉambron.

Ŝi eliris, ne fermante post si la pordon, kaj Johano restis sola.

Li ĵetis unu kruron trans la alian, metis antaŭ la pli supran genuon la interplektitajn manojn, kaj kviete rigardante antaŭ sin, li atendis la revenon de la sinjorino.

Li pensis pri la strangaj aventuroj de la insula knabo kaj pri la surprizo, kiun li kaŭzos al li ĉe la neatendita revido en Patersburgo.

Post kvarono da horo li aŭdis mallaŭtajn paŝojn ekster la ĉambro, kaj la sinjorino reaperis; sed kiel Johano estis surprizata, vidante, ke ŝi revenas kun libere sur la dorso ondigaĵaj haroj, kaj vestita en negliĝo. Anstataŭ la altaj botetoj ŝi surhavis ruĝajn pantoflojn el veluro, kontrastantaj pentrinde je la blankaj travideblaj ŝtrumpoj elstarantaj el sub la blanka robo. La tuta virina aperaĵo aspektis kiel vera nimfo.

Sin ŝajnigante ne rimarki la surprizon de la antaŭ si sidanta viro, ŝi eksidis senĝene ĉe lia flanko kaj flustris koketvoĉe:

— Pardonu, ke mi vin atendigis tiel longe.

Strangaj pensoj eniris en la kapon de Johano, sed opiniante, ke la virino verŝajne ne estus tia, kia li nun nepre devis ŝin konsideri, li respondis kviete:

— Ĉu ĉi tiu estas la ĉambro, pri kiu vi parolis al mi?

— Ni nun ne parolu pri ĉambroj —, ŝi diris, kokete ŝovante sian manon inter la brakon kaj bruston de Johano. — Ni prefere parolu pri aliaj temoj —, kaj kokete ridante per arĝenta rido, ŝi diris plue: — Ĉu vi ne memoras min?

Johano rigardis ŝin kaj respondis:

— Kiom mi scias, ni neniam antaŭe konatiĝis.

— Tio estas vera —, ŝi diris, elegante forĵetante per la piedo pantoflon, kiun ŝi antaŭe balancadis momenton sur la piedfingroj, kaj priskribante poste per la belforma

piedo imagajn figurojn sur la tapiŝo. — Neniam antaŭe ni faris nian reciprokan konon . . . Spite tion mi renkontis vin multfoje.

— He! . . . Kie?

— Ho, eksterdome, sur la strato, dum vi promenadis. . . Vi loĝas je la Placo numero dektria, ĉu ne vere?

— Ĉu tiu virino estas frenezulino? — ekpensis Johano, kaj li respondis:

— Vi ŝercas, sinjorino.

— Kie do vi loĝas?

Trafe-maltrafe li respondis:

— Mi loĝas en Scheveningen.

Ŝi ridis denove, kaj ŝoviĝante pli proksimen al li, ŝi diris:

— Jes, mi memoras . . ., en vilao, ĉu ne?

— En „Mia Ripozejo“ —, respondis Johano.

— Kion do dirus via ĵaluza edzino, se ŝi scius, ke mi sidas tiel tutproksime ĉe via flanko? — Refoje la virino ridis per sia arĝenta voĉo, kaj premante al sia brusto la brakon de Johano, sur kiu ripozis ŝia mano, ŝi diris plue, svingante la senpantoflan piedon:

— Ŝi nature farus skandaleton.

Johano estis dironta, ke li prefere parolus pri la luota ĉambro, sed li diris nenion, ĉar tuj antaŭ li, post la tablo, parto de la tapetpapere-kovrita muro ŝoviĝis flanken, kaj en la kadro de la pordo, ĝis nun kaŝita al liaj okuloj, ekaperis viro. Li estis unu el tiaj homoj, kiuj ĉe la unua rigardo naskas malfidon. Li estis larĝsultra, sed de meza kresko; lia senbarba vizaĝo surhavis ĉiujn postsignojn de supermezura uzado de alkoholaĵo, kaj liaj mallongaj haroj staris brosfirme sur lia kapo. Kun premitaj lipoj kaj sulkigita frunto li staris tie kaj rigardis la antaŭ si sidantojn kun kolero. Farante unu paŝon antaŭen, li ŝovfermis post si la strangan

pordon. La virino videble ektimiĝis, ĉar vidante la viron, ŝi eligis ekkrion kaj salte leviĝis. La homo rigardis ŝin kaj diris kolere:

— Iru for!!

Ŝi tuj malaperis tra la pordo, per kiu ŝi estis enirinta kaj fermis ĝin. La larĝsultrulo faris duan paŝon, ekhaltis antaŭ la tablo staranta en la mezo de la ĉambro, kaj demandis Johanon.

— Kiu vi estas?

Johano respondis per la sama demando:

— Kiu vi estas?

— Vi ne havas la rajton demandi tion.

— Kaj vi? . . . Ĉu vi havas tiun rajton?

— Mi havas, ĉar mi estas la edzo de la virino, ĉe kiu mi vin trovis sur tiu kanapo.

— Vi tamen scias, ke mi venis por lui ĉambron.

— Mi scias nenion pri io tia.

— Vi tamen luigas apartamentojn.

Johano, kiel vera filozofo, restis kvieta, kvankam la situacio, en kiu li sin trovis, estis al li malagrabla kaj neordinara. La homo ne tuj respondis, sed eksidante ĉe la tablo, tuj kontraŭ Johano, li atendis momenton; tiam li diris:

— Ĉu vi jam antaŭe luis tiun ĉi ĉambron?

— Kial tiu demando? . . . Vi bone scias ke ne. Mi rediras, ke mi venis por lui ĉambrojn; jen mia tuta motivo.

— Se vi intencas lui ĝin, tiam vi povus vin turni al mi kaj ne al mia edzino.

— Ŝi alparolis min sur la strato kaj proponis al mi ĉi tiun ĉambron.

La viro ridis insulte kaj diris:

— Kompreneble, ŝi proponis tion, kaj vi akceptis . . . Nu tio estu; pagu al mi la luprezon kaj ĉio estas finita.

— Ĉu pagi!?

— Nature, pagi; la luprezo estas dudek guldenoj pomonate kaj oni luigas por almenaŭ unu monato, pagigante antaŭe. Se vi pagas al mi tiun sumon, mi estos kontenta, forgesos pri via konduto kaj vi povos forlasi mian domon.

— Kaj se mi ne pagas?

— Ho, vi pagos!

— Ĉu vi estas certa pri tio? ... Supozu, ke mi ne havas ĉe mi tiun monsumon.

La homo ekridis pikmoke kaj diris:

— Sinjoro kiel vi, kiu loĝas en vilao ...

— Kiu diris al vi, ke mi loĝas en vilao?

— Vi mem diris tion al mia edzino.

— Ah! vi aŭskultis post tiu pordo; vi kaj tiu virino sekve agas en interkonsento!

— Tio koncernas nur min.

— Via kolero kontraŭ ŝi do estis komedio!

— Kio ajn ĝi estu, mi ne ludas komedion kun vi. Pagu la luprezon kaj foriru.

Johano sidis sur pingloj. Li povus pagi la postulitan sumon, sed lia karaktero kontraŭstaris. Li rimarkis tamen, ke li estis kaptita en reto kaj pripensis rimedon senigi sin de la fripono sidanta antaŭ li, kaj por lin puni samtempe. Kiel vera filozofo li retenis sian indignon kaj kuiris kiel eble plej bone siajn filozofiajn pizojn, kiuj tamen nun estis tre malmolaj. Fine li diris:

— Kaj se mi rifuzas pagi?

— Vi pagos por eviti skandalon.

— Kiun skandalon? Mi ne komprenas vin.

— Mi esprimos min klare kaj malkaŝe. Se vi ne pagas, tiam via edzino ricevos post du aŭ tri tagoj belan fotografajon, sur kiu vi kaj mia edzino sidas kune sur kanapo. Sen dubo ne plaĉos al via edzino, vidi vin en societo de negliĝe vestita virino.

— Mi nun komprenas vin —, diris Johano ŝajne kvieta; — vi volas eldevigi de mi skandalminace dudek guldenojn.

— Mi povus postuli cent guldenojn.

— Vi ŝercas.

— Por pruvi, ke mi estas sincera, mi montros al vi amikon, kiu devigos vin pagi sen hezito. — Dirinte tion, li prenis revolveron el tirkesto de la tablo.

Johano ekbolis pro indigno kaj kolero, sed ŝajne restis kvieta.

— Nu —, li diris, — nur por eviti la skandalon, kiun vi aludis, mi kontentigos vin —, kaj li ekstaris.

La homo same ekstaris.

Johano enpoŝigis la maldekstran manon, kvazaŭ por eltiri monujon; samtempe li ekkaptis la seĝon, starantan apud la tablo, kaj antaŭ ol lia kontraŭulo tion suspektis, li svingis ĝin supren kaj per la rapideco de fulmo frapis per ĝia ligna sidplato la kapon de la fripono kun tia forteco, ke la sidplato rompiĝis en pecetojn. Laŭtega krakado aŭdiĝis, la seĝo malsupreniĝis laŭ la kapo kaj ŝultroj de la trafito, kaj jen li staris kaptita inter la kvar piedoj de la meblo. Liaj manoj sidis kiel ligitaj ĉe la korpo kaj la pintaj splitoj de la rompiĝinta sidplato ĉiuloke minacadis lin tiamaniere, ke ĉiu klopodo sin senigi de la meblo estis absolute neebla. Li lasis fali la revolveron kaj dum momento ŝanceliĝis sur la piedoj, sed restis staranta. Surprizita pro tia neatendita, rapida atako de nia filozofo, li rigardis lin kvazaŭ songanto, tuj poste kelkaj strioj da sango kuris trans lia vizaĝo.

Johano piede forpuŝis la revolveron, rigardis la kaptiton kun pikmoko kaj diris kviete:

— Jen la maniero, per kiu mi pagas —. Tiam li kaptis la revolveron, malfermis la pordon, tra kiu la bela nimfo estis malaperinta, ŝlosis ĝin per la ŝlosilo, kiu sidis ankoraŭ en la ŝlosiltruo, kaj malfermante la koridoron, li ĵetis lastan rigardon sur la kaptiton kaj diris:

— Mia konto kun vi estas reguligita, sed ne tiu,

kiun la polico estas ankoraŭ reguligonta. Mi revenos tuj por aranĝigi la ceteron. Tiam li trairis la koridoron, malsupreniris la ŝtuparon kaj volis iri sur la straton, sed la pordo estis ŝlosita kaj la ŝlosilo malestis. La nimfo estis eltirinta kaj kunportinta ĝin.

Johano per kelkaj bategoj de sia peza ŝuo rompis la panelojn, kaj rampinte tra la truo, kiun li faris tiamaniere, li staris sur la strato. La stranga maniero tamen, en kiu li forlasis la domon, altiris la atenton de la preterpasantoj, kaj en kelkaj sekundoj amaso da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ li. Inter ili estis knabo kun biciklo. Johano sin turnis al li kaj petis, ĉu li volas venigi tuj policanojn pro mortiga afero. La knabo rapide forveturis kaj baldaŭ alvenis polica inspektoro kun du policanoj. Ili iris kun Johano tra la truita pordo kaj suprenrapidis al la malluma ĉambro.

La loĝanto estis sveninta kaj sidis inter ja kvar seĝopiedoj sur la planko; lia sangkovrita kapo estis klinita sur la bruston. Li estis morte pala kaj jam ne montris signon de vivo.

Kun peno la policanoj forigis la seĝon. La inspektoro alportigis akvon, la sango estis forlavata kaj post kelka tempo la vundito rekonsciigis, sed la vundo sur lia kapo estis tiel grava, ke li ne estis kapabla paroli.

Ekzamenante la forŝoveblan pordon de la flanko ĉambro, oni rimarkis en ĝi du truojn.

La inspektoro eniris la ĉambron, sed ĝi estis tiel malluma, ke komence li vidis nenion en ĝi. Li bruligis alumeton kaj ekvidis ĉe la muro tuj apud la pordo malgrandan tablon, sur kiu staris fotografilo.

— Ĉu li vere fotografis min? — demandis Johano, kiu estis rakontinta detale la tutan okazintaĵon.

— Sendube —, respondis la inspektoro, — sed mi kunportos la fotografilon por esplori, ĉu mia supozo

verigos; ne dubu pri tio, ni konas ĉi tiun domon kaj la loĝantojn, ili estas danĝeraj krimuloj, sed ĝis nun ni ne sukcesis kapti ilin ĉe la freŝa faro. Dank' al via flegma agado, ni fine senigos la urbon de paro el la plej danĝeraj skandalminacantoj, kiuj vivas kaj „laboras“ tie ĉi.

— Ĉu ili estas geedzoj?

— Ne, ilin kunligas nur ilia „laboro“.

Johano transdonis la revolveron, kaj ĉar lia afero estis finita por tiu ĉi momento, li foriris, lasante solaj la policianojn, kiuj poste per homportilo forportis la vunditon al la malsanulejo.

Kiam nia filozofo por la tria fojo trarampis la pordon, li vidis, ke la amaso de scivolemuloj fariĝis tiel granda, ke li nur kun peno povis al si liberigi vojon tra ĝi. Inter la homoj staris ankoraŭ tiu sama knabo kun la biciklo.

— Mi vin dankas, mia amiketo, vi faris al mi grandan servon, sed mi bezonas refoje vian helpon. Montru al mi domon, kie oni luigas aŭ vendas teatrajn objektojn.

— Mi ne konas tian domon, sinjoro.

— Sed mi! — biris aliulo. — Tia domo troviĝas en la Amsterdama-Veerkade; la numeron de la domo mi ne scias, sed antaŭ la fenestro pendas kavaliraj vestoj kaj armaĵoj. La strato estas tute proksima —, kaj li fingre montris la direkton.

Johano salutis kaj iris for.

Kvara Ĉapitro.

Sinjoro Van Elshout, kiel li sin levas, sin lavas kaj matenmanĝas — Sinjoro Van Elshout deziras konatiĝi kun la „novulo“ — La ĉiutaga okupado de Sinjoro Van Elshout — La nova Don Kihoto kaj lia servisto — Sinjorino Bus sciigas al Johano la deziron de Sinjoro Van Elshout — Reciproka konatiĝo — Du kvarpieduloj aperas sur la scenejo — La promenataj reklamiloj kaj pri ilia sukceso.

En la pensiono de Bus, sur la dua etaĝo estis la apartamentoj de Sinjoro Van Elshout*. Ĉi tiu sinjoro estis skribisto ĉe la financa ministrejo, sed sur la nomkarteto, kiun li ĉiam montris, kiam la okazo sin prezentis, staris, ke li estas: „Ŝtata Oficisto ĉe la Financa Ministrejo“. Tiu titolo estas tre multe signifa, tiel ke ricevintoj de tiu nomkarteto neeble povis ekscii, ĉu Van Elshout estas altranga, aŭ malaltranga oficisto, aŭ ĉu li estas tute senranga, ĉar ordinaraj skribistoj ĉe la ministrejoj, same kiel la referatistoj, komizoj, adjunkt-komizoj kaj cetere, povas uzi la titolon, kiun surhavas la nomkarteto de Van Elshout.

Van Elshout estis dudek-kvinjara pedanta dando, havanta apenaŭ sufiĉan salajron por loĝi en „meble provizitaj ĉambroj“, ĉar ĉiumonate li ricevis nur okdek guldenojn, kaj tiu sumo estas tre malalta por persono, kiu deziras esti konsiderata kiel eminentulo. Ĉar li vivis en malpaco kun siaj gepatroj, loĝantaj same kiel li en Hago, li forlasis la gepatran hejmon, kie li laŭ sia opinio ne povus dece vivi kaj akcepti amikojn pro la mal-

* elparolu: Van Elshaŭt.

eminenta kvartalo, kie loĝis la patro, kiu estis bakist-servisto ĉe la granda Haga kooperativa societo „Volharding“*.

Van Elshout, la filo, sekve luis apartamentojn en pli bela kvartalo de la urbo kaj eĉ en la pensiono de Bus. Liaj „apartamentoj“ konsistis el dormejo kaj ĉambro elvidantaj sur la postan partan de najbara domo kaj sur malgrandan ĝardenon, en kiu kreskis kaj floris preskaŭ nenio.

Estas la sepa horo de la sekvanta tago, en kiu Johano tiel strange reguligis sian konton ĉe la bela nimfo, kaj sinjoro Van Elshout vekigis.

Li ĉiam vekigis la saman horon, ĉar lia vivado estas tre orda kaj tre regula.

Zorge li flanken ŝovas la litkovrilon tre kviete, kaj malrapide li eksidas, kaj karesinte dum unu minuto siajn blondajn lipharojn per la dikaj kaj montraĵ fingroj, li sin levas.

Ŝajnas, kvazaŭ li timus, ke la planko estus brulige varmega, kun tiom da singardo li ĝin tuŝas per la piedoj. Singarde li aliras al la tablo, sur kiu staras la lavakvo, kaj tuŝante la kruĉon, kvazaŭ ankaŭ tiu estus brulige varmega, li enverŝas malrapide akvon en la lavovazon kaj sin eklavas. Tio daŭras longe, ĉar kvankam li neniam estas malpura aŭ malpureta, li ĉiumatene lavas al si la bruston, la kolon, la vizaĝon, la harojn, la brakojn kaj la manojn, kvazaŭ tiuj membroj de lia kara korpo apartenus al kamentuba purigisto.

Post la lavado li kviete prenas la kombilon, kvazaŭ ĝi estus brulige varmega, kaj kombas al si la blondajn harojn. Tiam li purigas al si la dentojn kaj la longajn ungojn per ŝajne brulige varmegaj dentobroso kaj tranĉileto, kaj rigardinte kun kontenteco sian purigitan per-

* „Peristado“.

sonon en la spegulo, li almetas sinsekve ŝtrumpojn el blua silko, pantalonon kaj cetere, ĝis kiam li estas preskaŭ tute vestita. Mi diras „preskaŭ“ tute vestita, ĉar sinjoro Van Elshout, kiam li estas forlasonta la „apartamentojn“, kutimas almeti siajn flavajn gamaŝojn, kaj ĉar li devas ankoraŭ matenmanĝi, li ankoraŭ ne surhavas la gamaŝojn, nek la gantojn.

Ankoraŭ tri- aŭ kvarfoje rigardinte sin en la spegulo por ekzameni, ĉu la tolaĵo sidas bone kaj ĉu la kravato pendas precize trans la mezo de la surĉemizo, kaj ankoraŭ tri- aŭ kvarfoje montrinte al si la blankajn, ĵus purigitajn dentojn, li suprenŝovas la lipharojn kaj aliras al sia „ĉambro“, kie la matenmanĝo lin atendas.

Van Elshout ne bezonas mantuŝi la seĝon ĉe la tablo per timantaj fingroj, ĉar la seĝo staras jam tie antaŭ la tablo; li povas tuj eksidi, kaj li eksidas por matenmanĝi.

Per la dikaj kaj montraj fingroj li malvolvas la blankan buŝtukon, skuadas ĝin kelkajn fojojn ĉe sia flanko kvazaŭ por forŝuti polveretojn, kaj kviete-singarde li ŝovas unu el la anguloj de la tuko tra la plej supra butontruo de la blanka veŝto; tiaĉ disvolvante ĝin sur la brusto kaj sur la genuoj, li sin preparas enverŝi tason da teo el la tekruĉo. Ĉar la kurbtenilo de la tekruĉo ĉiam estas varmega pro tio, ke la kruĉo staras sub varmigilo, Van Elshout elpoŝigas la naztukon, kaj volvinte la manon en ĝin, li spite de tiu protektilo tre singarde kaptas la kruĉon kaj elverŝas por si la vaporantan teon; sed ĉar ĝi estas tro varmega por esti tuj trinkata, li kviete atendas momenton, ripozante per la dorso kontraŭ la seĝapogilo, kaj kun kontenteco li rigardas antaŭ sin, direktante la hele blujajn okulojn (antaŭ kiuj sidas eleganta orita nazumo kun tre maldika ĉeneto) sur la muron antaŭ si, ĉar tie pendas deko da fotografajoj. Du el ili prezentas belan knabinon kaj la aliaj prezentas

ĉiuj sinjoron Van Elshout mem en diferencaj sintenaĵoj.

Estas nun la oka horo, kaj li ektrinkas kaj ekmanĝas.

Per la dika kaj la montra fingroj de la dekstra mano li kviete enbuŝigas la zorge traŭĉitajn pecetojn de la buterpanoj, kaj puriginte almenaŭ dekfoje la lipojn per buŝtuko, li fine estas matenmanĝinta. Tiam li ekstaras, rigardas sin en la spegulo, admiras siajn blankajn dentojn, almetas la gamaŝojn kaj sonorigas per eta, sur la tablo staranta sonorilo; post tio li kunvolvas la buŝtukon, kviete ŝovas la blankajn manumojn trans la blankajn manojn en la manikojn de la jako, tiel ke ili ĉiuloke precize elstaras centimetron el ili ĉirkaŭ la pulsoj. Interfingrigante la manojn sur la brusto, li nun gravmienne rigardas la tri orajn, sur la fingroj brilantajn ringojn, kaj pintigante la lipojn kvazaŭ por fajfi, li atendas la alvenon de sinjorino Bus.

Ŝi baldaŭ frapas sur la pordo.

La pintigita buŝo ŝanĝiĝas, la maldikaj lipoj dispartiĝas kaj ellasas mallaŭtan „Jes“, elparolitan laŭ demanda maniero.

Sinjorino Bus estas enironta, sed restas staranta sur la sojlo.

— Bonan matenon, sinjoro Van Elshout... — Ĉu vi sonorigis?

— Jes, sinjorino... hm!... Bonan matenon... Jes, mi sonorigis... Mi petas: eniru, sinjorino, kaj venu pli proksimen; mi havas ion por demandi vin...; por informiĝi... hm!

Ŝi obeas kaj ekstarante antaŭ la sinjoro, ŝi atendas la demandon.

— Sinjorino Bus... hm!

Van Elshout multfoje tusetas, kiam li parolas, sed ĉiufoje ĉe tiuj tusetoj li dece kovras al si la buŝon per la dekstra mano. Post la mallaŭta „hm“, li diras plue:

— Jen pri kio mi deziras informiĝi... En via pensiono estas, kiom mi scias, longa sinjoro..., hm!..., mi ne scias lian nomon; mi tre dezirus konatiĝi kun li. Antaŭe tamen... hm!..., antaŭe mi volas informiĝi pri tio, kio li fakte estas.

— Vi intencas, mi kredas, informiĝi pri sinjoro Johano Dusburg.

— Hm!... Ĉu lia nomo estas Johano Dusburg?

— En mia pensiono estas nuntempe nur unu longa sinjoro, tiu estas Dusburg.

— Hm!... Kio fakte li estas?

— Li diris al mi, ke li estas aktoro.

— Aktoro!?!... Ĉu teatra aktoro?

Van Elshout ekpensas tuj pri invitaj biletoj, kiujn aktoro rajtas disdoni al amikoj, sed pri tio sinjoro Van Elshout ne parolas al sinjorino Bus.

— Jes, ĉar li rakontis al mi, ke li ludis en „Vilhelmo Tell“.

— Povas esti... hm!... Tamen „Vilhelmo Tell“ estas opero; mi neniam ekaŭdis kaj legis pri la teatraĵo „Vilhelmo Tell“.

Van Elshout pravas: Li neniam ekaŭdis kaj legis pri tiu teatraĵo, ĉar li tute ne okupas sin pri kiu ajn literaturo, kaj la dramo, portanta tiun nomon, neniam estis ludita en la Haga teatro.

— Li tamen kunludis en ĝi; li tion certigis al mi.

— Hm!... Li estas afabla homo kaj bonmaniera sinjoro, ĉu ne vere?

— Kompreneble, tre afabla kaj tre bonmaniera.

— Sufiĉe, sinjorino...; mi petas: prezentu al li mian nomkarteton kaj bonvolu informiĝi, ĉu konvenos al li, ke mi vizitos lin hodiaŭ en la posttagmezo, post kiam mi estos reveninta de la ministrejo... hm!... je la kvina horo kaj duono.

SinJORINO Bus akceptas la elegantan nomkarteton, promesas plenumi la deziron de sinjoro Van Elshout kaj foriras.

Sinjoro Van Elshout malrapide ekstaras, rigardas sin dum kvin minutoj en la spegulo, montras refoje al si la brilantajn dentojn, ĵetas rigardon sur siajn fotograf-faĵojn kaj eliras la ĉambron. En la koridoro li prenas tuŝotime sian ĉapelon, kvazaŭ ankaŭ tiu estus brulige varmega kaj ĝin metas sur la glatajn blondajn harojn; tiam li pendigas sian nigran bastonon sur la dekstran brakon kaj malsupreniras la ŝtuparon por aliri al la ministrejo. Li marŝetas per rapidaj dancetantaj paŝetoj, kaj ĉar li amas rigardi kaj admiri sin mem, li enrigardas en ĉiujn fenestrojn, ekhaltas antaŭ ĉiuj butikoj por ekzameni en la grandaj spegulvitroj, ĉu liaj vestoj kaj kravato sidas bone, kaj ĉu liaj lipharoj estas ŝovitaj sufiĉe supren. Post duona horo da marŝetado, dum kiu li renkontas multajn gekonatojn, kiujn li ĉiujn grave salutas, li atingas la oficejon en la ministrejo, kie li ĉiutage pasigas sep sinsekvantajn horojn. En tiuj horoj li transskribas leterojn aŭ plenigas statistikajn listojn per miloj da ciferoj sumigotaj kaj aranĝotaj laŭ difinitaj reguloj de la statistiko.

Tiun enuigan laboron, kiu postulas nenian sciencon aŭ klerecon, li faras, sidante rekte sur sia seĝo, ĉar se li sin klinus, tiam la kravato nepre devus ŝoviĝi flanken, aŭ la surĉemizo ĉifiĝus, kaj li tre malamas ĉifitan tolaĵon. Neniam li ĵetas unu kruron trans la alian, ĉar per tio la pantalono ĉifiĝus kaj laŭ opinio de sinjoro Van Elshout nenio estas pli malbela ol pantalono kun ĉifoj kaj sen belaj akraj faldoj en la tuboj.

Ni lasos la kopiiston en sia oficejo kaj returnos nin al la ĉambro de la persono, kies konatiĝon li tiel kore deziregas.

Ci tiu sidas sur la kanapo. Li estas vestita per plena kavalira armaĵo kun escepto de vizierhava kasko. kuŝanta antaŭ liaj piedoj, kŭjn li rekte etendas antaŭ sin. Sur la genuoj li tenas kvadratan pecon da dika kartono, sur kiu estas gluita blanka papero.

Johano skribas sur tiu papero per nigra inko. Li jam skribis la vorton **DUELINVITO** per grandaj literoj kaj enkadrigis tiun vorton en rektaj dikaj linioj, desegnitaj kun helpo de liniilo. La tiel per ĉefaj literoj skribita vorto estas tiel granda, ke oni povas legi ĝin de granda distanco.

Ivan, staranta flanke de sia amiko, rigardas kun miro, tute ne sciante, kion signifas tiuj desegnaĵoj.

Johano daŭrigas skribi per malpli grandaj literoj la jenan frazon:

„Mi, Don Kihoto, invitas ĉiujn al dueldatalo, kiuj kuragaŝ certigi, „ke la granda ekspozicio en Scheveningen estas malpli grava ol iu ajn ekspozicio jam okazinta!“

— Al kio utilos tio? — fine demandas la kuiristo.

— Por pendigi sur la pinto de tiu lanco.

Johano montras longan lancon starantan en angulo de la ĉambro.

— Kaj kio estas tio? — demandas plue Ivan, direktante la okulojn al la tablo, sur kiu staras stranga por li objekto.

— Artefarita ventrego.

— Ankaŭ por pendigi sur la lancopinto?

Johano ridas kaj respondas:

— Ne, mia kara amiko; tiu ventrego estas por Sanĉo Panza.

— Por Sanĉo Panza? ... Mi ne konas Sanĉo Panzan. Kiu li estas?

— Vi estas Sanĉo Panza. Mi ja diris, ke ni kiel reklamiloj bezonas tiajn objektojn.

— Sed kion mi do devas fari kun tiu ventrego?

— Almeti sur vin, ĉirkaŭ via korpo.

— Ĉirkaŭ...!?

— Jes, mia kara, ĉirkaŭ via korpo. Vi ja ludos la rolon de Sanĉo, kaj ĉar vi ne havas dikan ventron, vi portos la jenan, kaj vi spertos, kia mirinda Sanĉo vi estos.

Dirinte tion, li ĵus finskribas la lastan vorton de la duelinvito, starigas la kartonon sur la kanapo kaj ekstaras por admiri ĝin de malproksime; tiam li diras al Ivan:

— Ĉu tio estas sufiĉe legebla?

Ivan rigardas la invitaĵon konfuzite kaj respondas:

— Tiajn literojn mi neniam lernis; mi povas legi nur rusajn.

— Vi pravas; la rusoj havas apartan alfabeton. Nu, mi povas legi ĝin, sekve: la promenantoj sur la strato ankaŭ povos tion.

— Vi do promenos kun tiu papero sur la stratoj por montri al la preterirantoj?

— Kiel malsaĝa vi estas; ni ja fariĝos promenantaj... aŭ pli ĝuste dirite: rajdantaj reklamiloj.

— Ni do rajdos?

— Jes; mi sur ĉevalaĉo kaj vi sur dika graso longorela grizulo.

— Grizulo!?

— Jes, sur azeno.

Ivan konsternite rigardas sian amikon, dum li denove demandas:

— Ĉu mi devas rajdi sur azeno? ... kaj en tiu ventrego?

— Jes; ni foje ekzamenos, ĉu ĝi bone sidas —, kaj kaptante la ventregon, kiu sur la scenejo multfoje servis al Falstaf, li diras plue:

— Ĉirkaŭmetu ĝin; mi helpos.

Ivan, fine komprenante, ke Johano ne ŝercis, obeas.

— Ĝi sidas perfekte, mia rusa amiko. Se Falstaf povus vidi vin en ĉi tiu momento, tiam li krevus pro jaluzo...; ĝi sidas des pli perfekte, ĉar vi estas malgranda... Ni havos sukceson, mi certigas tion al vi; ni havos sukceson kaj perlaboros tiom da mono, ke post unu monato ni povos vojaĝi kune al Patersburgo por surprizi nian amikon.

Ivan tamen ne partoprenas la entuziasmon de sia longa kunulo; li aspektas tiel melankolia, ke Johano lin kompatas.

— Kio estas? — li demandas. — Tiu ventrego espereble ne ĝenas vin?

— Ĝi ne ĝenas; sed mi ja ne povos montri min tiel al la homoj —. Li eksidas kun peno sur la kanapo kaj grimace ridetas por ne ekplori.

— Nu, do, kamarado, kurag'!... Kuiru viajn pizojn...! vi ja nur rajdos... Ĉio fariĝos bona; pripensu, ke ni faros tion pro la bono de Jafet.

— Ho jes... pro Jafet...; sed mi ne povas rajdi, mi neniam rajdis.

— Vi povos; ĉiu povas rajdi sur azeno, vi ankoraŭ pli bone ol multaj aliaj, ĉar dank' al via dika ventro kaj viaj longaj kruroj vi sidos sur via grizulo kvazaŭ alnajlita.

Mallaŭta frapo sur la pordo interrompas la interparoladon.

Ivan rigardas ĉirkaŭe por ekzameni, ĉu ie estas loko por sin kaŝi, sed eĉ se tiu loko ekzistus, li ne havus la tempon por forkuri kaj por sin kaŝi antaŭ la okuloj de la frapinto, ĉar la pordo malfermiĝas kaj sinjorino Bus staras sur la sojlo de la ĉambra pordo. Ŝi restas staranta, rigardante la du tiel strange vestitajn virojn.

Johano ridas kaj demandas:

— Nu, sinjorino, kion vi opinias pri niaj kostumoj? ...

Ĉu ni ne aspektas kiel veraj Don Kihoto kaj Sanĉo Panza?

— Ĉu vi refariĝis aktoro, sinjoro? — fine ŝi demandas.

— Ne; ni fariĝis rajdantaj reklamiloj —, lakone respondas la filozofo. Mi ja parolis al vi pri tio.

— He! ... vi rajdos en tiuj kostumoj?

— Jes; mi sur ĉevalaĉo kaj li sur azeno.

Ivan honte kaj konfuzite ruĝiĝas kaj sinjorino Bus, ne povante jam ne ridi, ekridegas tiel laŭte, ke ŝi same ruĝiĝas.

— Pardonu al mi, sinjoroj —, ŝi fine diras, ... pardonu al mi, ke mi tiel ridas, sed mi ne povis reteni min. Vi efektive aspektas kiel veraj arlekenoj. Se vi montros vin en tiuj kostumoj, tiam vin sekvos ĉiuj buboj de la urbo.

— Nu! — diras Johano al Ivan —, ĉu mi ne certigis, ke neniam pli belaj reklamiloj promenis aŭ rajdis tra la stratoj de Hago? ... Mi rediras: La sukceso estos giganta.

— Sinjoro —, diras sinjorino Bus, — mi devas emmanigi al vi ĉi tiun nomkarteton. Ĝi estas de sinjoro Van Elshout, unu el miaj pensionuloj. Li tre deziras konatiĝi kun vi kaj petigas, ĉu vi povos akcepti lin je la kvina kaj duono.

Johano akceptas la karteton, jetas sur ĝin rapidan ekrigardon, ĝin metas sur la tablon kaj diras:

— Kial li volas konatiĝi kun mi?

— Mi ne scias.

— Nu, li venu.

— Ĉu vi povas akcepti lin tuj ... en tiuj kostumoj?

— Li atendas?

— Jes, en sia ĉambro; li ĵus rehejmiĝis kaj atendas vian respondon.

— Li estos bonvena, sinjorino.

La sinjorino eliras kaj minuton poste modesta frapo anoncas, ke Van Elshout staras en la koridoro ĉe la pordo.

— Eniru! — vokas Johano.

Malrapide malfermiĝas la pordo, kaj eniras riverencante sinjoro Van Elshout. Liaj vestoj kaj tolaĵo estas kiel ĉiam sen ĉifoj. Li ekhaltas kaj preskaŭ lasas fali la dekstran nigran ganton, kiun tenas lia maldekstra gantkovrita mano, ĉar la renkonto de la strangaj sampensionuloj tre lin surprizas.

— Pardonu! — li diras balbute... Pardonu!... hm!... ĉu mi havas la honoron renkonti sinjoron Dusburg?

Johano ekstaras.

— Jes, mia nomo estas Dusburg, kaj tiu de mia amiko (li montras lin per mangesto) estas Ivan Ivanoviĉ.

Ivan kapsalutas, sed restas sidanta, ĉar la dika ventromalhelpas al li tuj ekstari.

— Tre agrable, sinjoroj... hm!

— Eksidu sinjoro —, diras Johano, montrante seĝon tuj apud la tablo. Van Elshout eksidas tre ĝenate, dirante:

— Mi do ne venas malĝustatempe?... hm!

— Ho ne; neniu venas ĉi tie malĝustatempe, kaj ĉiu, kiu deziras fari mian konon, estas bonvena.

— Mi dankas... hm!... Mi ekaŭdis antaŭ kelkaj tagoj, ke ni estas sampensionuloj, kaj ĉar mi kutimas konatiĝi kun ĉiuj miaj sampensionuloj, mi prenis la liberecon prezenti mian nomkarteton pere de sinjorino Bus.

— Mi ĝin ricevis.

— Mi estas, kiel vi sendube legis, ŝtata oficisto ĉe la financa ministrejo.

— Tion mi ne atentis, mi nur rapide legis vian nomon.

— Hm!... Ĉu vi loĝas jam longe en Hago, sinjoro?

— Nur malmultajn semajnojn.

— Vi estas aktoro, ĉu ne vere?

— Mi estis aktoro.

— He!... hm!... Vidante vin en tiu kostumo, mi ekpensis, ke vi estas tia ankoraŭ nun, kaj ke vi kun via amiko estis studentaj viajn rolojn.

— Vi trafis, ni estis studentaj.

— Mi do ne eraris... Vi sekve estas ankoraŭ nun aktoro... Mi tre ŝatas la teatron... hm!... hm!

— Mi same, sed nun ni ne studadis teatrajn rolojn.

— He!... hm!

— Ĉar ni estas nun reklamiloj; ni ekzamenis, kiel sidas niaj vestaĵoj kaj cetere.

Sinjoro Van Elshout kredas, ke li malbone aŭdis; li sekve demandas:

— Kion!?... hm!... Reklam...!?

— Jes, rajdantaj reklamiloj. Mi estos Don Kihoto kaj mia kamarado estos Sanĉo Panza. Ni intencas labori por la granda ekspozicio, kiu, kiel vi scias, nuntempe okazas en Scheveningen, kaj se oni akceptos niajn servojn, kaj pri tio ni ja ne dubas, tiam ni...

— Pardonu!... hm!... hm!... Vi estas reklamilo!?

La dandeto posten ŝovas sian seĝon. Ŝajnas, kvazaŭ venena serpento subite ekrapas antaŭ liaj galoŝkovritaj ŝuoj; ĉar li ekstaras, rigardas al la pordo kaj montras per sia tuta teniĝo, ke li estas tuj forkuronta el la ĉambro.

Johano rigardas mokridetante la vireton kaj diras:

— Jes, ni estas reklamiloj, ... rajdantaj reklamiloj. Tiu titolo ŝajnas malplaĉi al via moŝto.

— Verdire... hm!... Mi devas konfesi, ke mi venis por konatiĝi kun aktoro. Se mi antaŭe scius, ke vi estas... hm!... reklamilo, tiam mi memkompreneble ne estus prezentinta mian nomkarteton.

Johano ekkoleretas, sed li tuj ekpensas, ke fakte la

konduto de la dando ne indas lian koleron, tial li jam sin regas kaj kviete demandas:

— Kial?

— Nu, ... hm! ... Ŝtata oficisto ĉe la financa ministrejo ja ne povas konatiĝi kun ... hm! ...

— Kun reklamilo, vi estas dironta, ĉu ne vere!

Sinjoro Van Elshout ne respondas tiun demandon, sed diras:

— Se sinjorino Bus ne estus trompintamin, tiam ... hm!

— Tiam vi ne estus prezentinta vian nomkarteton.

— Memkompreneble. Tiam mi ne estus veninta ... hm!

— Nu, vi estas libera tuj foriri; mi ne vokis vin kaj mi ne vin retenos.

— Hm!

Tute ne senkulpigante sin, sinjoro Van Elshout estas forlasanta la ĉambron, sed ŝajnas, ke li tro multe prokrastas sian foriron, ĉar Johano, konsiderante, ke ne penvaloras disputadi kun li pri la diferenco inter aktoro kaj reklamilo, ekstaras per la rapideco de fulmo, kaptas la dandeton ĉe la kolumo, tiel ke la tolaĵo de lia blanka surĉemizo en terura maniero ĉifigias, levas lin de la planko kaj per antaŭen streĉita brako portas al la pordo, kiel oni portas dronigotan hundon. Tiam li ellasas la teruritan vireton en la koridoro, tute ne atentante, ĉu li rompas al si la krurojn aŭ la nukon. Feliĉe la falanta dando tuŝas la tapiŝon per la piedoj, ne perdante la egalpezon, li ŝanceliĝas momenton, sed ne renversiĝas kaj rapide kiel leporo kuras al sia ĉambro, kie li malaperas.

Johano kviete refermas la pordon, dirante:

— Jen, li estas for. Ni konatiĝis, sed ho ve! la konatiĝo ne estis laŭ reciproka plaĉo. Li jam neniam revenos.

Ivan, kiu nur duone estas kompreninta la mallongau

interparoladon de Johano kaj la dandeto, sidas sur la kanapo kaj rigardas sian amikon kvazaŭ por peti klarigon pri la stranga okazintaĵo, kiun li ĉeestis.

Johano ridetas kaj diras:

— Jen la maniero, per kiu mi kutimas reguligi mian konton kun tiaj homoj!

— Mi ne komprenas...

— Ne estas necese, ke vi nun komprenu tion. Poste, se ni okaze havos nenion por fari, mi klarigos al vi tiun aventuron; sed niaj bestoj estas tuj venontaj, ĉar estas la kvina kaj duono.

Laŭta sonorado ekster la ĉambro anoncas, ke sur la strato staras persono.

— Jen la viro kun niaj bestoj —, diras Johano, kaptante la kaskon kaj metante ĝin sur la kapon —. Nun ni povos rajdi, Ivan.

Al Ivan tute ne plaĉas la rajdado, sed li ne kuraĝas kontraŭstari al Johano, kiun li estimas, amas, sed samtempe iom timas pro la maniero, laŭ kiu li reguligas sian konton „kun kelkaj homoj“.

En tiu momento laŭta bruo, ridado kaj vokado estas aŭdataj sur la strato. Johano alligas la kartonon sur la pinto de la lanco kaj diras al Ivan:

— Antaŭen, kamarado, sekvu min!

Ili malsupreniras la ŝtuparon, sur kiu staras la geedzoj Bus, kiuj jam malfermis la stratan pordon, sed kiuj ne komprenas, kial antaŭ la domo staras malgrasa ĉevalo kaj grasa azeno.

— Ki... ki... ki...? — balbulas Bus.

La silabo „ki“ — sen finiĝo estas kelkfoje tre malklara, sed en ĉi tiu cirkonstanco Johano komprenis ĝin bone.

— Mi mendis ilin —, li diras, kaj preterirante la geedzojn, li iras sur la straton, kie multaj scivolaj buboj amasiĝis ĉirkaŭ la du kvarpieduloj.

Johano helpas al Ivan supreniri la azenon, kaj post kiam li mem estas eksidinta sur sia Rosinanto, ili ekrajdas, laŭte aplaŭdataj de multaj buboj, kiuj ne komprenas, kion signifas tiu stranga rajdado. Ĝi tamen estos kiel triumfa rajdado. Johano en plena armajo el kupro kun longa glavo ĉe la flanko, brilanta vizierhava kasko sur la kapo kaj longa lanco en la mano, rajdas kiel vera kavaliro kaj rigardas la rigardantojn kun rava rideto. Ivan tamen, kiu pro la dika ventro sidas tre malkomforte sur sia azeno, aspektas kiel vera mizerulo kaj martiro, sed ĉar la rigardantoj kredas, ke lia malĝoja vizaĝo apartenas al la rolo, kiun li ludas, aplaŭdadas lin laŭvoĉe, dum Don Kihoto diras al li:

— Kuraĝon...! kuiru ilin, mia kara; vi ja vidas, ke ĉio marŝas bone kaj ke ĉio finiĝos laŭ deziro.

Neniam reklamiloj havis tian sukceson. Ĉiuj preterpasantoj ekhaltas por postrigardadi ilin kun miro kaj atento. Ĉiuj pordoj malfermiĝas kaj post ĉiuj fenestroj aperas kapoj de scivolemuloj, kaj ĉiuj legas kun rido la duelinviton de la kavaliro. Neniu tamen akceptas ĝin, ĉar ĉiuj unuvoĉe samopinias, ke tiu reklamilo estas la plej trafa kaj la plej originala, kiun povus elpensi la direkcio de la ekspozicio.

Tia estas la opinio pri tiu elpenso, ke kelkaj amikoj de la direkcio tuj telefone gratulas pro la trafa maniero, per kiu ĝi (la direkcio) reklamas. Kaj la direkcio komprenas nenion pri la telefonaj gratuloj; ĝi komence ekpensas pri ŝercado, tamen, post kiam multaj tiaj gratuloj sinsekve estas telefonitaj inter Daguerrestraat kaj Scheveningen, ĝi (la direkcio) irigas serviston per biciklo renkonte al la mistera reklamilo por tuj eksciigi kaj eksciigi, el kio konsistas la nekonata reklamilo.

Unu horon poste Don Kihoto kaj Sanĉo Panza, ĉirkaŭataj de centoj da buboj, bubinoj kaj aliaj scivol-

emuloj, alvenas ĉe la enirejo de la ekspozicio, kie la ravita direkcio akceptas ilin kun ĉiu honoro, kiun ili indas. La turnkrucoj, starantaj ĉe la enirejo, estas forigataj, kaj la ĉevalaĉo kaj la azeno eniras la konstruaĵon, kie ĝis tiu tempo estis akceptitaj nur dupieduloj.

Ĉiuj volas admiri kaj rigardi la denove naskiĝintajn heroojn de Saavedra; ĉiuj eniras la konstruaĵon, kaj post kiam en la vespero la kasistoj sumigis la ricevitan enirmonon, ili sciigas al la direkcio, ke tiu mono estas la kvaroblo de la plej alta taga sumo, ĝis nun ricevita dum la tuta ekspozicio.

Don Kihoto kaj Sanĉo Panza estas akceptataj kiel reklamiloj por la daŭro de du semajnoj, se ne io eksterordinara okazus, per kio la kontrakto povus esti nuligata, kaj je tiom da salajro, ke ili post tiu tempo sen peno povus fari trifoje la vojaĝon al Patersburgo per la unua klaso de la vagonaro.

Laŭ Johano (kiu estis postulinta tiun kondiĉon) ĉio dependas de cirkonstancoj, kaj li estis prava, ĉar tre stranga cirkonstanco estis la kaŭzo, ke la reklamiloj laboris nur kvin tagojn por la direkcio, kaj ni legos en la sekvanta ĉapitro, kiel tio okazis.

Kvina Ĉapitro.

La sukceso de la rajdantaj reklamiloj — La fraŭlino de la ekspozicio — La loteria bileto kun la kvar sepoj — La granda premio — Kiel filozofo pagas servojn, kiujn oni faris al li — Kiel Sanĉo estas senigata de peza ŝarĝo — Rebejmigo de la reklamiloj — Gesinjoroj Bus estas invitataj al festeno — Refoja forkuro de sinjoro Van Elshout.

Kiel ni diris en la kvara ĉapitro, la du rajdantaj reklamiloj devus reklami per la ekspozicio dum du semajnoj, kaj la sekvantan tagon ili komencis sian rondrajdadon tra la tuta urbo, eĉ ne evitante la plej maleminentajn stratojn, ĉar precipe tie ilia celo estis plej efike trafita. Personoj, kiuj ne legas gazetojn kaj ne ekaŭdis pri la ekspozicio, fariĝis scivolaj ĉe la apero de la strangaj kavaliroj kaj armilservistoj, kaj kredante, ke la ekspozicio estas io sama eksterordinara kiel la rajdistoj, multaj aliris al Scheveningen por viziti ĝin.

La direkto estis kontentega, kaj ĉiufoje en la posttagmezo, kiam Don Kihoto kaj Sanĉo Panza aperis antaŭ la konstruaĵo, la turnkrucoj estis forigataj, por ke la kvarpieduloj sen kontraŭstaro povu eniri, kaj tiam la du rajdantoj estis regalataj kiel veraj herooj. Kaj tion li indis, ĉar la kaso montriĝis post ĉiu tago pli kaj pli plena, tiel ke la akciuloj de la entrepreno, kiuj komence jam estis kontentaj kun kvar procentoj, povis antaŭvidi kaj antaŭkalkuli, ke tiuj procentoj almenaŭ plialtiĝus ĝis dek.

Tamen ne ĉiutage la suno brilas kaj ne ĉiam daŭrus la jam por la direkcio komenciĝinta prospero. Tio veriĝis, post kiam en la kvina tago la reklamiloj revenis en la konstruaĵon post okhora rajdado tra la urbaj stratoj.

Apenaŭ Don Kihoto deĉevaliĝis kaj apenaŭ li estis enmaniginta al sia armilservisto la kondukilojn de Rosinanto, kiam alkuretis al li juna fraŭlino.

Ivan tuj rekonis ŝin. Ŝi estis la sama, al kiu li antaŭ kelkaj tagoj estis montrinta la internajn partojn de siaj poŝoj por montri, ke ili estas tute sen mono. Ŝi ankaŭ lin rekonis, ĉar ŝi ridetis afable al li. Tiam ŝi direktis sin al Johano kaj tuŝante lian kupre kovritan brakon, ŝi diris:

— Sinjoro, unu vorton mi petas.

Johano rigardis de supre malsupren, ĉar la fraŭlino estis kompare kun li tiel malgranda, ke ŝi povus stari sub lia etendita brako. La fraŭlino siaflanke rigardis de malsupre supren, kaj tuj kiam iliaj okuloj sin renkontis, ili ambaŭ ridetis unu al la alia. Johano rekonis ŝin ankaŭ. Spite al la reciproka rekonigo, ŝi diris:

— Ĉu vi min rekonas, sinjoro?

— Jes, fraŭlino.

— Ĉu vi memoras, ke antaŭ kelkaj tagoj vi vizitis la ekspozicion kaj ke vi tiam rigardis la librojn sur tiuj tabloj?

— Mi memoras.

— Vi sen dubo ankaŭ memoras, ke mi ĉe tiu okazo ĝenis vin momenton por vendi al vi bileton de la ekspozicia loterio?

— Jes, mi memoras.

— Ĉu vi memoras ankaŭ la numeron de via bileto?

Johano ridetis dirante:

— Ne, fraŭlino, kiel mi memorus? Mi ja tute ne atentis tion, ĉar mi aĉetis tiun bileton nur por fari plezuron al vi.

La fraŭlino frapetadis al si la manojn kaj ruĝiĝis pro plezuro, tiam ŝi diris plue:

— Rigardu foje, mi petas, ĉu via bileto surhavas la numeron sep mil sepcent sepdek sep, . . . kvar vosthavajn ciferojn*. Mi okaze memoras tion, ĉar tia numero estas eksterordinara pro la kvar vosthavaj ciferoj.

Johano momenteton pripensis; tiam li diris:

— Nu, fraŭlino, kio etas kun tiuj kvar sepoj?

— Sinjoro, rigardu foje vian bileton: povas esti, ke mia memoro min trompis, sed mi estas preskaŭ certa pri tio, ke vi estas la gajninto de la granda premio.

— Ĉu vere!? Nu, mi tuj ekzamenos, sed antaŭe helpu al mi formeti mian kirason, ĉar la bileto sidas en mia veŝta poŝo, se mi ne perdis ĝin.

— Se vi ne perdis!? — La fraŭlino diris tion paliĝante. Ŝi tamen nerveme helpis forigi la kirason, kaj la bileto estis trovata.

— Rigardu al la numero! . . . la numero! diris la fraŭlino, frapetante la manojn kaj piedfrapetante pro senpacienco.

— Vi pravas: Kvar sepoj!

— Antaŭen! . . . tuj! . . . al la direkcio kaj montru vian bileton.

Johano rigardis al sia bileto kaj al la fraŭlino, faris du paŝojn antaŭen, sed subite ekhaltis, dum li demandis:

— Kiom do mi gajnis?

— Ĉu vi ne scias? . . . Kvin dek mil guldenojn!

— Kvin dek mil guldenojn!? — Kaj rigardante al Ivan, li diris: — Ĉu vi aŭdis? . . . kaj ĉu mi ne certigis al vi, ke ĉio finiĝos bone?

— Mi ne bone komprenis tiun fraŭlinon —, diris Sanĉo.

* La tiel nomataj vosthavaj ciferoj 7 kaj 9. Ili alportas feliĉon, oni diras, al posedantoj de loteriaj biletoj.

— Nu, sekvu min kaj vi komprenos —, diris Don Kihoto.

Ili iris, kaj la ravita fraŭlino, kiu ŝajnis esti pli feliĉa ol la longa kavaliro, sekvis je kelka distanco por ĝui la plezuron vidi, kiel la sinjoro, kiu gajnis la premion pere de ŝia bileto, ricevas la grandan sumon, kiu tiel neatendite faris lin riĉulo. Multaj vizitantoj same sekvis.

Johano kaj Ivan eniris kiel laŭkutime la oficejon de la direkcio, kaj la direkciestro jam ekstaris por saluti la revenantajn reklamilojn; sed antaŭ ol li eldiris unu vorton, Johano prezentis sian bileton, dirante:

— Sinjoro direkciestro, kiam mi proponis al vi miajn servojn, ni estis akceptataj kiel viaj rajdantaj reklamiloj por la daŭro de du semajnoj, se ne io eksterordinara okazus, per kio mi povus nuligi la kontrakton, kiu nin ligas. Mi intence postulis tiun kondiĉon, ĉar kiel filozofo mi scias, ke ĉio dependas de cirkonstancoj, kaj jen, sinjoro, la fortune sin montris favora al mi: Mi aĉetis bileton de loterio, kaj sur ĝin falis la granda premio. Per tiu bileto mi fariĝis la posedanto de kvindek mil guldenoj, kaj ĉar posedanto de tiom da mono ne bezonas esti rajdanta reklamilo, mi konsideras min kaj mian amikon kiel eksigitaj, kaj petas vin ĝentile sciigi min, kiam kaj kie mi povos ricevi la gajnitan sumon.

La tuta direkcio gratulis la gajninton, kaj la direkciestro proponis elpagi tuj, kion nia heroo akceptis kun plezuro.

Paketo kun kvindek monbiletoj po mil guldenoj estis transdonata al Johano, kaj post peto de la direkciestro li rekalkulis la biletojn kaj trovis, ke la paketo enhavas la ĝustan nombron. Johano, la eksreklamilo rigardis ĉirkaŭe. Li serĉis per la okuloj la fraŭlinon, kaj ekvidante ŝin, li geste alvokis ŝin al si. Ŝi alproksimiĝis ankaŭ

ruĝigante pro plezuro, sed ŝia plezuro ŝanĝiĝis en ĝojon, kiam Johano diris al ŝi:

— Fraŭlino, pere de vi mi gajnis kvindek monbiletojn po mil guldenoj, kaj pere de vi mi eksciis, ke mi estas la gajniinto, ĉar sen via bona memoro mi neniam estus pensinta pri la tuta loterio; sekvas el tio, ke vi faris al mi du gravajn servojn. Mi do estas via ŝuldanto kaj petas vin, ke vi permesas, ke mi tuj reguligu kun vi vian konton, prezentante al vi po unu monbileton por ĉiu al mi farita servo.

Ridetante li eltiris el la paketo du biletojn, kaj kun gracia movo de la mano prezentis ilin kun la vortoj:

— Fraŭlino, faru al mi la honoron akcepti ilin,

— Ho, sinjoro, tio estas multe tro multa.

— Fakte ĝi estas tro malmulta, sed pri tio ni ne disputu, la ĉefa afero estas, ke vi estas kontenta.

La fraŭlino akceptis konsternite kaj konfuzite; ŝi balbutis kelkajn vortojn pro dankemeco, post kiuj Johano ridetis afable. Tiam sin turnante refoje al la direkcio, li diris:

— Sinjoro direkciestro, bonvolu diri al mi, kiu turnis la loteribiletujon kaj kiu elprenis mian bileton kun la kvar sepoj, kiuj riĉigis min.

Du knabegoj sidantaj ĉe aparta tablo, kie ili aranĝis leterojn, gazetojn kaj aliajn paperaĵojn, subite ekstaris.

— Mi ne bezonas montri ilin —, diris la direkciestro; ili jam montras sin mem; jen ili staras.

— Alproksimiĝu, miaj amiketoj —, diris Johano, . . . — ankaŭ vi faris al mi grandan servon, ankaŭ vian konton mi devas reguligi —, kaj al ĉiu li donis unu bileton po mil guldenoj.

Laŭta aplaŭdado ĉiuloke aŭdiĝis, precipe ekster la oficejo, kie staris la scivolemuloj. Ĉiuj admiris la malavarecon, per kiu la reklamilo rekompencis la al li faritajn servojn.

Eĉ tiuj, kiuj mem agus tute alie kaj kiuj eble ne estus donintaj unu centimon, kriis „brave!!“ kaj „longe li vivu!!“. Sed la reklamilo, kiu kiel filozofo konis la homajn karakterojn, ne atentis tiujn aplaŭdojn, kaj salutinte la direkcion, li kviete per siaj kutimaj longaj paŝoj foriris, sekvate de Ivan, kiu, forgesante por momento pri sia dika ventro, pensis sonĝi.

Dum la malmultaj tagoj, kiam li konis sian longan amikon, li travivis tiom da mirakloj, ke li fine kredis, ke Johano estas magiisto, kiu antaŭvidas la estonton, aŭ sanktulo, kiu estis veninta teren por puni netaŭgajn bubojn; dandojn kaj malicajn nimfojn, kaj por rekompenci ĉiun, kiu honeste kaj sincere promenas la vojon de la virto.

Veninte ekster la konstruaĵon, Johano ekhaltis, pripensante kion fari kun la bestoj, kaj li diris al Ivan:

— Nu, mia rusa dikventrulo, kion ni nun faros?

Ivan, aŭdante la aludon al sia ventregio, subite respondis:

— Mi petas, forigu mian ventraĉon!

— Ĉu ĝi ĝenas vin?

— Jes, ĝi ĝenas. Ĝis nun mi ĝin portis kun rezigno kaj submetiĝo por esti agrabla al vi kaj por vin servi, sed ĉar ĝi fariĝis superflua, mi prefere iros sen ĝi —, kaj li malligis la ŝnuretojn, per kiuj ĝi estis ligita sur lia korpo. Laŭta kaj profunda elspirego eliĝis el lia brusto, kiam la ventregio rulfalis teren, kaj por montri sian abomenon kaj malamon, li piede puŝegis ĝin for kvazaŭ por diri: — Neniam plu tiu ventraĉo turmentos min.

Johano ridetante kaptis ĝin kaj metis antaŭ la selon de Rosinanto; tiam li surĉevaliĝis kaj diris:

— Antaŭen Sanĉanto⁹, surzeniĝu por la lasta fojo

* „-anto“ estas hispana sufikso, kiu signifas „antaŭe“.

Rosinanto = besto, kiu antaŭe estis „rocin“ = ĉevalo.

Sanĉanto = persono, kiu antaŭe estis Sanĉo.

kaj sekvu min; ni rekondukos la bestojn tien, kie ni luis ilin, kaj kiel eble plej baldaŭ ni aranĝos niajn preparaĵojn por ekvojaĝi Patersburgon.

La kuiristo-eksreklamisto obeis tuj, kaj duonan horon poste ili haltis en Daguerrestrato, antaŭ la pensio de Bus.

Ivan sonorigis, kaj post kiam la pordo estis malfermita, li restis gardanta la bestojn, por ke Johano povu supren porti la ventregon kaj la lancon, ĉar li estis aĉetinta tiujn objektojn same kiel la armaĵon, kiuj laŭ lia opinio estonte servus al li ĉiam, kiam mankus al li mono por pasigi sian tempon promenante kaj vivante kiel eminenta sinjoro.

Sur la koridoro okaze sin trovis Van Elshout, kiu estis elironta por ekpromeni, sed apenaŭ la elegantulo ekvidis supreniri la filozofon, li ekpaliĝis kaj forkuris terurite al sia ĉambro kun la vortoj: Ho fi!... la viraĉo!... li... La cetero de lia frazo perdiĝis post la pordo, kiun li tirfermis post si.

Johano ne ekvidis la forkurinton kaj aliris al la kuirejo, kie gesinjoroj Bus laboradis. La sinjorino, vidante la ŝargitan kavaliron, demandis:

— Ĉu la rajdado jam finiĝis hodiaŭ, sinjoro?

Li eksidis kun dorso turnita al la kuireja pordo, kaj etendante rekte antaŭ sin la longajn krurojn, li sin klinis antaŭen, metis la lancon kaj la ventregon teren, kaj restante en klinita sintenado, li respondis:

— Ĝi finiĝis, eble por ĉiam; ni ĉi tiun someron ne rajdos plu.

— Vi tamen rajdis nur kvin tagojn.

— Jes, sed vi scias, sinjorino, ke ĉio dependas de cirkonstancoj, kaj stranga okazintaĵo decidigis min eksreklamistiĝi. Mia amiko staras kun la bestoj sur la

strato antaŭ via domo, kaj ni rekondukos ilin al la posedantoj.

— Sed . . . , kio do okazis?

— Mi tuj klarigos; antaŭe mi devas demandi, ĉu vi povos gardadi por mi miajn teatraĵojn; ĉar provizore mi ne uzos ilin plu.

— Kompreneble; mi povas gardadi ilin por vi. La subtegmentejo estas tiel vasta, ke mi sen peno kaj ĝeno trovos lokon por meti ilin tien.

— Bone; mi dankas . . . Post du tagoj mia amiko kaj mi vojaĝos al Patersburgo en Rusujo; ni sekve devos forlasi jam baldaŭ vian pensionon.

La sinjorino altigis la manojn pro surprizo, kaj Bus, kiu estis muelanta kafon, ekhaltis; li volonte demandus, kial la sinjoroj faros tian longan vojaĝon kaj li jam movetadis la lipojn kun grimacoj, jam premfermis la okulon, jam elĵetis la kutimajn krăĉerojn, sed antaŭ ol li eligis unu silabon, lia edzino ordonis al li:

— Silentu! . . . Mi ja povas paroli!

Ŝi tamen ne parolis, ĉar Johano diris:

— Mi gajnis la grandan ekspozician premion; mi sekve ne bezonas esti pli longe reklamilo . . . Ni vojaĝos pro aferoj al Patersburgo.

— La grandan ekspozician premion!?

— Jes, antaŭ kelkaj tagoj mi aĉetis bileton de loterio, kaj sur tiun bileton falis la kvindek mil guldenoj.

Refoje la manoj de sinjorino Bus altigis kaj ŝi diris:

— Sed, sinjoro, tiam vi ja subite fariĝis riĉulo! . . .

Mi gratulas.

— Dankon! . . . Kaj nun mi rekondukos la bestojn. Mi revenos post unu horo. Ĉu vi povos pretigi en tiu tempo eksterordinaran manĝon por kvar personoj?

— Por kvar?

— Jes, mi invitas vin ambaŭ por manĝi kun ni en mia ĉambro.

— Sed sinjoro! . . .

En tiu momento mallaŭta brueto aŭdiĝis sur la koridoro. Sinjorino Bus, kiu havis bonegajn orelojn, ekaŭdis ĝin tuj. Ŝi ekhaltis paroli kaj rigardis trans la klinitan dorson de Johano en la koridoron, kaj tie, mallaŭte kaj singarde kiel muso, sinjoro Van Elshout elŝteliĝis el sia ĉambro, rapidiĝis al la ŝtuparo kaj malaperis kvazaŭ la diablo persekutus lin. Johano, vidante laŭ la surprizita vizaĝo de la sinjorino, ke io stranga okazis post li, sin turnis kaj ekvidis la malaperantan kapon de la forkuranto. Li laŭte ekridis. Tuj poste la pordo mulsupre fermiĝis kun bruego.

— Kio okazis!? — demandis ŝi.

— Ho, li timas, ke mi refoje ĉifu lian blankan tolajon; sed li ne bezonas timi, mi ja ne atentos tiun dandon plu.

Ŝi suprentiris la brovojn kaj malfermis la buŝon kvazaŭ por peti klarigon.

— Mi rakontos al vi pri tio dum nia festeno.

Johano ekstaris, aliris al sia ĉambro, demetis la armajon kaj malsupreniris tiam la ŝtuparon per kvar longaj paŝoj.

Sesa Ĉapitro.

Ekvojaĝante — Vojaĝanto kun stranga, sed kara ŝarĝo sur la brakoj — Kunvojaĝantoj kaj ilia interparolado kun niaj herooj — Ivan ekpensas pri mirakloj — Iama konato reaperas — Miksitaj „Idoj de Orfeo“ — Nova boufaro de Johano — Kiun Ivan unue volas viziti en Patersburgo — Ivan refoje melankoliĝas, sed Johano kuraĝigas lin.

Estis dum bela, suna dimanĉo, kiam Johano kaj Ivan ekvojaĝis al Patersburgo. Volonte ili estus vojaĝintaj jam du tagojn pli frue, sed Johano estis riĉulo kaj tial li deziris, ke Ivan kaj li alvenus ĉe Jafet dece vestitaj, tiom pli, ĉar tiu ĉi estis nun fama artisto, al kiu ili volis fari ĉiun honoron, kiun li indis. Tial la tajloro loĝanta en strato tuj apud la pensiono de Bus, estis farinta por la du vojaĝantoj tute novajn kostumojn laŭ la lasta modo. Johano aspektis kiel vera ĝentlemano kaj Ivan, malgraŭ sia pinta dorso kaj siaj altaj ŝultroj, havis gravan aspekton en sia nova nigra kostumo, kiu estis tiel farita, ke lia ĝibo ŝajnis malpli granda ol en lia ordinara marista vestajaro.

Johano havis belan odorantan rozon en la butontruo de sia jakso, kaj lia kostumo estis griza.

Estis je la deka horo en la mateno, kiam la du amikoj supreniris la duaklasan kupeon de la ekspresa vagonaro al Germanujo. Johano eksidis komforte sur angula loko ĉe la fenestro kaj diris al la lin sekvanta kunulo:

— Eksidu tie tuj kontraŭ mi, Ivan, por ke ni povu plej komforte paroli dumvojaĝe, kaj por ke vi povu pli bone rigardi la pejzaĝojn, laŭ kiuj ni iros.

Ivan eksidis spiregante; li estis iom laca kaj la mal-larĝa veŝto premis lian elstarantan bruston. Lia vizaĝo tamen ne montris plu la melankolian esprimon de antaŭe, ĉar tuj post kiam li ne plu bezonis rajdi kiel dikventrulo sur azeno, lia melankolio estis malaperinta. Li ridetis kontente kaj diris:

— Bela kupeo, sinjoro, kaj molaj kusenoj; neniam mi vojaĝis en la dua klaso.

— En realo tio estas la sama, ĉu oni vojaĝas en la dua aŭ en la tria klaso —, filozofie respondis Johano.

— Tre povas esti; tamen mi preferas la duan —, diris la kuiristo, tirante el la poŝo cigaredujon kaj prezentante cigaredon al Johano. Ili ambaŭ ekfumis.

En tiu momento Johano rigardis eksteren sur la peronon. Tie alproksimiĝis vilagane vestita viro, kiu portis sur la brakoj maljunan virinon. Ili serĉis lokon en la tria klaso, sed ŝajne ĝi ne estis plu havebla, ĉar la viro kuris tien kaj returnen, ŝajnante preskaŭ mal-esperanta pro timo, ke la vagonaro forveturus sen li kaj lia ŝarĝo. Johano rapidis al la kupea pordo kaj vokis:

— Ĉi tien, sinjoro!

La viro alproksimiĝis al li, sed estis denove forironta, dirante:

— Tiu ja estas duaklasa kupeo; mi havas biletojn por tria.

— Ĉu ne estas plu lokoj disponeblaj en la tria?

— Mi timas ke ne; ĉiuj vagonoj estas plenplenaj. Johano eksaltis sur la peronon kaj alkuris al konduktoro.

— Konduktoro, ĉu ĉiuj kupeoj estas okupitaj? . . . tiuj viro kaj virino serĉas lokon.

— La tria klaso estas plena.

— Nu, ili ja ne povas resti tie ĉi?

— Mi ekzamenos, ĉu...

— Sed la viro ja ne povas resti staranta pli longe kun tiu virino sur la brakoj... Ĉu ili povas eniri mian kupeon?

— Kie ĝi estas?

— Tie... tiu duaklasa.

— Ĉu ili havas triaklasajn biletojn?

— Jes, sed ĉar en la tria klaso ne estas plu lokoj, vi ja povas konsenti, ke ili eniros duaklasan kupeon.

La konduktoro, antaŭvidante bonan trinkmonon, konsentis kaj Johano enirigis la viron kun la virino en sian kupeon, kaj post kiam la viro sidis, Johano sekvis. Li estis tamen surprizita vidante, ke la viro tenis la virinon sur la genuoj, li sekve diris:

— Estas loko por via patrino sur tiu benko... Ŝi ia estas via patrino, ĉu ne vere?

— Ŝi estas, sinjoro, sed ŝi ne povas sidi tie. Ŝi renversigus.

— He!

— Jes, ŝi estas preskaŭ lama pro malsano en la koksoj. Hejme ŝi povas sidi sur apogseĝo, sed ne en ruliĝanta vagonaro. Mi do ŝin tenos sur miaj genuoj... Ne vere panjo? Sur miaj genuoj vi sidas pli oportune.

La maljunulino ridetis kaj diris:

— Jes —. Tiam turnante la okulojn al Johano, ŝi diris plue:

— Kaj li estas forta, sinjoro, tre forta, kaj ĉar mi estas malmultepeza, mi ne ĝenas lin..., ĉu ne vere, Petro?

La lastajn vortojn ŝi diris al sia filo.

— Ho ne, panjo, vi tute ne ĝenas min, kaj eĉ se vi ĝenus min, tio ja ne estus grava, ĉar en mia infaneco mi tiom da fojoj ĝenis vin, kaj tiom da fojoj mi sidis sur viaj

genuoj, ke miavice volonte mi havas vin sur la miaj —. La viro karesis la velkiĝintajn manojn de sia patrino, kaj ŝi toleris tion kun ĝojo kaj fiereco.

— Mi havas bonan filon, sinjoro —, ŝi diris plue al Johano.

— Tre bonan, ne ĉiuj patrinoj estas tiel feliĉaj; ĉu vi ne samopiniis Ivan?

Ivan samopiniis; li ne diris tion, sed pro emocio liaj okuloj malsekiĝis. Li pensis pri sia patrino, kiun ankaŭ li amis kaj kiun li volonte portus sur siaj genuoj, sed, ho ve, li ne estus sufiĉe forta kaj la patriho estis tro malproksime. Feliĉe li revidos ŝin post du tagoj, kaj sekigante la okulojn per la maniko de sia nova jakto, li ridis kaj fumis kiel kamentubo.

La maljuna virino ektusis. Johano demandis:

— Ĉu la fumo de niaj cigaredoj vin ĝenas?

— Ne, sinjoro.

Sed spite al ŝia respondo, refoja tuso klare montris la malon, kaj Johano kaj Ivan forĵetis la cigaredojn el la fenestro.

— Kien vi vojaĝas? — demandis Johano.

— Al Arnhem, sinjoro. Tie loĝas mia filo. Oni atendas min tie kun veturilo ekster la stacidomo... Mi havas du filojn; ambaŭ estas ŝuistoj, kaj laŭvice mi loĝas ĉe ĉiu kvar monatojn. Petro, kiu loĝas en Arnhem, nun iras kun mi al sia hejmo kaj post kvar monatoj Hejn, kiu estas ŝuisto en Hago; siavice rekondukos min al sia hejmo... kaj tiel plu.

— Vi estas tre riĉa, kiel mi vidas —, diris Johano.

— Riĉa?... Ho ne, ni tute ne estas tiaj.

— Riĉeco dependas de la vidpunkto, laŭ kiu oni ĝin konsideras. Mi konas personojn, kiuj estas milionuloj, sed tamen ili estas pli malriĉaj ol vi.

La virino ridetis.

— Mi komprenas —, diris ŝi. — Eble tiuj personoj ne havas tiajn bonajn filojn, kiajn mi havas.

— Vi trafis.

— Jes, dank' al Dio, mi estas tre riĉa; tamen —, kaj ŝi eksilentis.

— Nu?

— Tamen oni povas esti riĉa kaj samtempe sin trovi en financaj maltrankviliĝoj, ĉu ne vere!

— Homoj kun maltrankviliĝoj estas kelkfoje malriĉaj, sed la viaj do ne estos tiel gravaj, mi supozas.

— Sinjoro, mi ne aludas ĉiujn homojn troviĝantajn en tiaj cirkonstancoj, ĉar mi pruvus per tio, ke ankaŭ mi estus malkontenta kun mia sorto; sed ŝajnas al mi, ke vi estas persono, al kiu oni malkaŝe povas eldiri siajn maltrankviliĝojn... Ne estas pro mi, ke ili estas tiel pezaj, sed pro miaj filoj.

— Eble mi komprenas.

— Ne, tion vi ja ne povas kompreni, tial mi klarigos miajn vortojn.

— Ne faru tion, patrino —, interrompis ŝin la filo.

— niaj familiaj aferoj ja tute ne povas interesi la sinjoron.

— Jes, ili tamen min interesas —, diris Johano.

La maljunulino diris plue:

— Miaj filoj havis proceson antaŭ du jaroj, kaj kvankam ilia afero estis justa, ili malgajnis tiun proceson, kaj nun ili devas pagi altan monsumon, tiel altan, ke spite al sia laboro ili pli kaj pli malriĉiĝos.

— Sed panjo, do ne rakontu pri tio al la sinjoro, li...

— Jes, mi ĝin rakontos; mi volus rakonti pri tiu proceso al ĉiu, kiu deziras aŭdi ĝin. La juĝisto estis trompata, Melhior trompe ĵuris antaŭ la tribunalo... Melhior estis ilia kontraŭulo. Ho li estas tiel malbona viraĉo!... Kaj per flamaj vortoj ŝi rakontis ĉion, kio

koncernis la proceson. Johano aŭskultis pacience kaj ridetante, kaj kiam ŝi finis, li demandis:

— Ĉu viaj filoj devas pagi multon?

— Imagu la sumon, sinjoro; ĉiumonate ili havas por pagi po dudek guldenoj, ĝis kiam ili estos kvitaj.

— Kaj kiam ili estos kvitaj?

— Post dek jaroj, ĉar sen la rentoj la pagota sumo estas du mil guldenoj... Ĝi ne estas bagatelo!

— Kaj ĉu ne estas homoj, kiuj volas helpi al vi?

— Kiu volus? — respondis la virino. — Ĉiu scias, ke miaj filoj estas tro malriĉaj por repagi.

— Mi konas tre riĉan homon, kiu volas helpi al vi —, diris Johano, — kaj mi skribos al li; bonvolu sciigi al mi la adreson de unu el viaj filoj.

— Sed miaj filoj prefere ne pruntoprenos, ĉar se iliaj aferoj estos malprosperaj, ili neeble povus repagi.

— Sinjorino, mi pruvos al vi, ke vi estas riĉa kaj prospera pro viaj filoj... Havu paciencon kaj kuraĝon, kuiru viajn pizojn, kaj ĉio fariĝos bona.

Dirante tion, Johano elpoŝigis notlibreton kaj diris plue:

— Kiel estas la adreso?

Post hezito la virino respondis: Petro Velt, ŝuisto en Arnhem, Vilhelminastrato, numero tria.

Johano notis la adreson kaj diris:

— Sinjorino, mi refoje certigas, ke mi pruvos, ke vi estas riĉa, vi nepre devas esti tia; ĉiu, kiu posedas tiajn bonajn filojn, kiajn vi, ne povas esti malriĉa.

La virino ridetis malkonfide. Ŝi tamen estis tre danka pro la afabla maniero, laŭ kiu la sinjoro parolis kaj agis al ŝi kaj al ŝia filo, kaj kiam Petro en Arnhem malsupreniris la kupeon, li etendis al Johano kaj al Ivan la manon, dezirante al ili feliĉan kaj agrablan vojaĝon. Kiam li staris sur la perono kun la patrino sur la brakoj, la virino same etendis la manon; ĝi tamen estis

tiel malgrasa kaj velkinta pro longdaŭra laboro, ke Johano kaj lia kunulo apenaŭ kuraĝis premi ĝin, timante, ke tia forta ektuŝo kaŭzus doloron al la maljunulino.

La vagonaro denove ekmoviĝis antaŭen kaj la du vojaĝantoj starantaj ĉe la fenestro postrigardis la ŝuiston, kiu malrapide laŭiris la peronon kun la patrino sur la brakoj.

— Ĉu vi komprenis, kion rakontis tiu virino, Ivan?

— Nur malmulton mi komprenis; ŝi parolis tro rapide...; sed kion vi notis?

— Ilia adreson.

— Por skribi al ili?

— Ne; nur por poŝtmandate sendi al tiu virino du biletojn po mil guldenoj. Mi faros tion en Berlino, aŭ en alia urbo.

— Ni do ne rekte vojaĝos Patersburgon?

— Estos tro longa vojaĝo. Ni mezvojaĝe rigardos kelkajn urbojn. Niaj biletoj valoras ĝis Berlino. Tie ni pasigos eble unu tagon kaj unu nokton. De Berlino ni daŭrigos vojaĝi al Varsovio kaj eble haltos en alia urbo.

— Ĉu vi ne decidis ankoraŭ?

— Kiel mi povus decidi, tio kompreneble dependos de cirkonstancoj.

Ivan rigardis antaŭ sin kaj iom post iom dronis en pensojn.

Li pensis pri nova miraklo; sendube (tiel li pensis) Johano intence haltos en alia urbo. Io mistera (laŭ lia opinio) sin kaŝas sub tiu vorto „eble“ kaj li revis tiel longe pri tio, ke fine liaj okuloj per si mem fermiĝis kaj... Ivan dormis.

Johano, pensante, ke lia amiko estas laca, lasis lin dormi, tiris „Etika“ de Spinoza el la poŝo kaj eklegis.

Je la vespero niaj vojaĝantoj alvenis en Berlino kaj

elvagoniĝis. Tiun nokton ili pasigis en hotelo apud la stacidomo kaj preskaŭ la tutan sekvantan tagon ili rigardis la urbon. Intertempe Johano forsendis la poŝtmandaton al sinjorino Velt. Post dua nokto ili je la oka matene sidis en la vagonaro al Varsovio. Ili pasigis la tempon kiel eble plej agrable, ĉu parolante kun aliaj vojaĝantoj, ĉu rigardante ekster kupeon por vidi la pejzaĝojn, urbetojn kaj vilaĝojn kuŝantajn laŭlonge de la fervojo. Fine la vagonaro haltis en stacidomo de urbo, kies nomon ili ne legis sur la anonca breto. Ivan ne atentis ĝin, ĉar li ne povis legi latinajn kaj germanajn literojn, kaj Johano, preterveturante ĝin, okaze legis al li tre interesan tezon en Etika.

Tuj post kiam la vagonaro estis haltinta, Ivan malaltigis la fenestron de la vagona pordo kaj klinis la kapon eksteren. Johano fermis la libron, kaj same estis klinonta la kapon ekster kupeon, sed ekvidante subitan ŝanĝon sur la vizaĝo de Ivan, li restis sidanta, rigardis dum momento la vizaĝtraĵojn de sia kunulo, kiuj montris neesprimeblan surprizon, atendis momenton kaj diris:

— Kio estas, amiko, ĉu promenas elefanto sur la perono?

Ivan ne respondis tiun demandon, sed daŭre fiksante la okulojn sur la sama loko, li altigis mistere la fingron kaj diris:

— Jen nova miraklo.

— Miraklo?

— Rigardu mem —. Kaj la kuiristo fingre montris antaŭ sin.

— Mi ne vidas la miraklon, kamarado.

— Jen!... Sur tiu benko, ĉu vi ne lin vidas?

— Kiun do?

— Nian knabon. Jen li sidas sur tiu benko.

Johano okule sekvante la direkton de la fingro,

kiun Ivan ankoraŭ etendis antaŭ sin, vere ekvidis sur benko sidantan knabon, kiu estis tre simila al Jafet. La ĉapelo de la knabo kuŝis ĉe lia flanko, kaj la belaj krispaj haroj pendis ĉiuloke ĉirkaŭ lia kapo. Sur la genuoj li tenis malfermitan notlibron, kiun li ŝajne studadis.

— Estas li! — diris Ivan. — Mi lin vidis antaŭ du jaroj en Patersburgo; estas li, mi ne povas trompi min . . ., nur rigardu.

Johano malfermis la pordon kaj malsupreniris la kupeon. Ivan lin sekvis. En la sama momento la knabo fermis la libron, ekstaris kaj eniris la atendejon.

— Estas li! — refoje diris Ivan, — tiel li marŝas, tiel li aspektas. Ni tuj lin sekvu!

Kaj ili sekvis la knabon, kiu jam estis trairinta la atendejon.

— Li iras sur la straton —, diris Ivan.

— Nu, li iru; ni povas sekvi . . . Mi vere kredas, ke tiu knabo estas la insulano; pasis jam kelkaj jaroj, post kiam mi vidis lin, sed li ŝangigis tiel malmulte, ke eraro estas preskaŭ neebla.

La knabo malrapide kaj kun klinita kapo daŭrigis marŝeti, kvazaŭ li estus revanta pri siaj notoj. La du vojaĝantoj sekvis lin de malproksime.

— Ni ne tuj alparolos lin —, diris Johano. — Ni sekvos lin, kiam li eniros domon; eble li jam ne loĝas en Patersburgo, sed en ĉi tiu urbo.

— Sed en kiu urbo ni estas? — demandis Ivan.

— Me ne scias —, respondis Johano.

La knabo marŝetis ankoraŭ dekon da minutoj, eniris malgrandan parkon kaj eksidis sur benko sub dika arbo.

— Jen li eksidas, ni surprizu lin —, diris la kuiristo.

— Kiamaniere?

— Vi ekstaru post li kaj mi antaŭ li; mi ĉekrios „Ja!“ kaj tuj poste vi ĉekrios „-fet!“

Johano ridis pro la naiva surprizo, sed li konsentis.

Singarde ĉiu iris sian vojon, kaj post kelka tempo ĉiu alvenis sur la indikita loko. La knabo, kiu legis sian notlibron, tute ne rimarkis tion, kio okazas antaŭ kaj malantaŭ li. Tial surprizite li lervis la okulojn, kiam tuj antaŭ li nekonata voĉo laŭte ekkriis:

— Ja-!

La surprizo fariĝis ankoraŭ pli granda, kiam tuj poste, malantaŭ li, alia nekonata voĉo ekkriis: „-fet!“

Li rigardis la vokintojn, fermis la notlibron kaj ne sciis, kion ekpensi. Antaŭ li staris malgranda ĝiba viro, malantaŭ li eksterordinare longa sinjoro, kaj ambaŭ estis al li nekonataj. Ili tamen ridetis tiel aŭfable, ke li ne bezonis timi ion malbonan.

Li laŭvice rigardis al ili, fine ridetis ankaŭ, sed ne parolis, pensante ke la fremduloj volis nur ŝerci kun li.

— Jafet! — ekkriis Ivan.

— Jafet! — ekkriis Johano, sed la knabo, kiu ne sciis, kion signifas tiu nomo, ĉar en Posen ne estis knaboj portantaj tiun nomon, refoje pensis pri ŝercado.

— Ĉu vi ne rekonas min? — demandis Ivan.

La knabo kapskuis nee.

— Ĉu vi ne rekonas vian amikon Johanon? — demandis la filozofo, sed refoje la knabo kapskuis nee.

— Ĉu vi ne rekonas tiun ĉi ĉenon!? — demandis Johano, kaj malbutonumante sian jakon, li tintadis per la bela ĉeno, farita el moneroj.

— Eble vi miksas min kun aliulo —, subite la knabo diris germane.

— Vi do estas muzikisto! — diris samlingve Johano.

— Jes, sinjoro, mi estas muzikisto.

— Vi do loĝis antaŭe sur la Insulo, ĉu ne vere?

— Sur Insulo!?... Mi estis neniam sur Insulo.

Johano eksidis ĉe la dekstra flanko de la knabo,

kaj Ivan, kiu estis certa pri tio, ke la knabo estas Jafet, eksidis ĉe lia maldekstra flanko.

— Aŭskultu foje, mia amiketo —, diris Johano. — Vi ja estas Jafet, naskita sur la Insulo! Mi bone scias, ke vi fariĝis fama muzikisto, sed mi tre bedaŭras, ke vi hontas rekoni vian iaman amikon Johanon, kiu kuris kun vi sur la dunoj por serĉkolekti ovojn de marbirdoj, kaj al kiu mi rakontis tiom da fabeloj.

— Sed mi ne estas Jafet, mi estis neniam sur Insulo por serĉkolekti ovojn; mia nomo estas Stanislas Mareau.

— Stanislas Mareau?

— Jes, sinjoro.

— Kaj vi ne naskiĝis sur la Insulo?

— Eble mi naskiĝis sur Insulo, sed tion mi neniam eksciis.

— Ĉu vi loĝas tie ĉi ĉe via patro?

— Mia patro mortis, sinjoro.

— Kaj via patrino?

— Ŝin mi preskaŭ ne memoras; ankaŭ ŝi mortis.

— Ĉe kiu vi do nun loĝas?

— Ĉe Klajn, la instruisto.

— Ĉu vi jam longe loĝas ĉe li?

— Dum unu jaro. Antaŭe mi loĝis ĉe la doktoro Stuthejm, sed li mortis same kiel lia edzino. Mi estis ĉe ili kiel ilia infano, sed post ilia morto sinjoro Klajn konsentis, ke mi iras al li...

La lipoj de la junulo ektremetadis, kaj larĉoj transkuris liajn vangojn.

— Nu, mia knabo, ne ploru; ĉio fariĝos bona. Diru foje: ĉu vi ne amas esti ĉe tiu instruisto?

— Ho jes, li estas tre bona al mi, sed antaŭe, kiam mi estis ankoraŭ ĉe la doktoro, mi regule vizitis la konservatorion, kie mi studadis je kostoj de la doktoro;

sed post kiam li kaj lia edzino mortis, mi ne povis daŭrigi la studadon, ĉar tio estus tro multekosta por sinjoro Klajn.

— Vi do jam ne studadas?

— Jes, sed nur malmulte. Mi devas kunlabori en koncertoj, kaj parton de mia salajro mi donas al sinjoro Klajn; la ceteron mi bezonas por mia studado, ĉar kelkfoje mi sekvas la kursojn je la konservatorio.

— Ho ve! li ne estas nia Jafet! — diris Ivan, — sed li estas tiel simila al li kiel du akveroj unu al la alia.

— Ĉu vi havas fratojn? — demandis Johano.

— Mi ne scias, sinjoro.

— Ĉu vi ne scias tion!? — ekkriis Johano. — Ĉiu tamen scias tion.

— Mia infaneco estis tiom stranga, ke mi scias nenion pri tio, sinjoro. Eble mi havas fratojn kaj fratinojn, kiujn mi ne konas, same kiel mi preskaŭ ne konis mian patrinon.

— Sed ĉu via patro neniam parolis pri tio?

— Mi prefere neniam parolas pri li, sinjoro.

— Ĉu li estis malbona al vi?

— Jes; li estis akrobato en cirko, ĉiam li ebriiĝis, kaj post kiam li mortis en tiu ĉi urbo, la doktoro trovis min malsana en la cirka veturilo, kaj li min adoptis kiel sian filon. Sed, kiel mi jam diris: la doktoro mortis pro apopleksio, kaj la sinjorino mortis semajnon poste pro... pro io tre stranga.

— Pro ĉagreno?

— Ne, sinjoro... pro monomanio. Ŝi ĉiam laboradis... la tutan tagon kaj super siaj fortoj, ĝis kiam krevis ŝia koro.

— Kie loĝas tiu Klajn?

— En vilaĝeto ekster la urbo.

— Ĉu vi volas konduki min al li?

— Jes, sinjoro —, kaj la knabo ekstaris.

Johano ekstaris kaj pensis: Se ĉi tiu knabo ne estas frato de Jafet, tiam mi jam neniam kuiras miajn pizojn.

Ivan ankaŭ ekstaris kaj li pensis pri tiu ĉi nova miraklo, kaj strabe rigardante sian longan kunulon, li diris al si mem: Se tiu knabo ne estas frato de mia kuirista servisto kaj amiketo Jafet, tiam (li estis dironta: oni pendigu aŭ senkapigu min, sed, ĉar tiaj ekzekutadoj estus neeblaj pro lia tro mallonga kolo kaj tro altaj ŝultroj, li diris:) oni min dronigu kiel rabian hundon.

Marŝante plue, li de tempo al tempo ĵetis rigardon al la juna knabo, kaj la simileco inter li kaj Jafet estis laŭ lia opinio tia, ke li kelkfoje dubis pri la certigo de Stanislas, kredante, ke li pro ia ajn motivo kaŝas la veron. Li memoris, kiel la artisto Jafet Romeskaŭ estis vizitinta lin sur lia ŝipo, kaj kiel li estis vidinta lin la antaŭan vesperon en la teatro, kaj kiel ravige li tiam estis ludinta sur sia violono. Kaj tiu violonisto ne estus ĉi tiu flanke de li marŝanta knabo? Ho, li estis preskaŭ certa pri tio, ke li estas tiu sama, kaj fine jam ne povante reteni sin, li subite demandis lin:

— Ĉu vi parolas ruse?

— Ne, sinjoro, nur germane kaj pole.

— Vi estas violonisto, ĉu ne vere?

— Mi estas pianisto, kviete respondis la knabo.

Ho ve, jen ĉiu dubo estis forigita. Jafet estis violonisto, ĉi tiu knabo sekve ne povus esti lia iama amiketo. Li do resignaciis kaj ne parolis plu, sed aŭskultis la interparoladon de Johano kaj Stanislas dum ilia promonado al la vilaĝeto, kie loĝis la instruisto Klajn.

Estas homoj en la mondo, kiuj tute ne ŝatas monon tiel longe, kiel ili posedas sufiĉe da ĝi. Ni konas ekzemplojn de maristoj, kiuj elspezas en unu semajno la

tutan salajron por kiu ili laboris duonan jaron. Post tiu semajno ili kun plezuro refoje komencas labori, tute ne konsciante, eĉ ne pensante unu momenton pri tio, kion ili faros kun la perlaborota mono ĉe la fino de la sekvanta duonjaro. Preskaŭ ĉiuj tiaj homoj sencele aŭ nur por amuzajoj elspezas la fruktojn de sia laboro kaj okazas nur tre malofte, ke ni renkontas personon kiel Johanon, kiu laboras por poste kviete kaj filozofe pasigi la tempon, ĝis kiam la mono estas for, aŭ ke li elspezas parton de sia havaĵo pro agoj, al kiuj lin instigas lia bona koro.

Kiam Johano kaj Ivan du horojn post sia alveno ĉe Klajn adiaŭis la instruiston, lian edzinon kaj Stanislas, tiam nia filozofo jam estis fordoninta ok biletojn po mil guldenoj, ĉar krom la ses, pri kiuj la legantoj eksciis, li postlasis du pluajn ĉe Klajn, por ke Stanislas senbarile povu daŭrigi sian studadon en la konservatorio de Posen. Tiu monsumo estus, laŭ Klajn, sufiĉe granda, ĉar post du jaroj da diligenta studado Stanislas facile estus kapabla fari sian elirekzamenon, post kiu li povus komenci sian muzikan karieron kiel artisto; kaj neniu dubis pri la sukceso, ĉar la talentoj, kiujn la knabo ĝis nun montris, estis tiaj, ke la estonto promesis nur brilajn rezultatojn.

Sekve Johano, tute ne malkvietiĝante pro la iom post ioma plimalgrandiĝanta sumo, kies posedanto li estis, kun kontenteco kaj bonhumore reiris kun Ivan al la stacidomo de Posen, lasante post si la feliĉan kaj dankeman knabon, kiun la stranga sorto tiel subite jetis sur lian vojon.

La vagonaro, per kiu niaj vojaĝantoj estis alvenintaj en Posen, jam longe estis for sur la vojo al Varsovio, sed tio ne malbonigis ilian humoron. Pacience ili atendis du horojn la alvenon de la sekvanta vagonaro al Varsovio.

Ivan prefere tuj vojaĝus al Patersburgo, sed opiniante, ke en Varsovio refoje okazus miraklo, li sin submetis kun plezuro al la decido de Johano.

En Varsovio tamen okazis nenio eksterordinara. Ili rigardis la urbon, kaj pasiginte tie unu nokton, ili en la sekvanta mateno ekvojaĝis Patersburgon. Kiam ili alvenis tie je la vespero, Johano demandis Ivanon, kion unue fari.

— Ĉu mi povas decidi tion? — li diris.

— Jes.

— Nu, unue ni vizitu mian patrinon.

— Bone, mia amiko, mi ĝojas pro tiu via decido; ĝi pravas al mi, ke ankaŭ vi estas bona filo, kiu ne forgesis sian patrinon. Kaj kion ni faros poste?

— Ĉu mi refoje povas decidi?

— Jes, kondiĉe, ke ni ne eniros trinkejon.

— Ho sinjoro, vi juĝas pri mi malĝuste; vi konsideras min kiel ordinaran drinkulon, sed vi eraras.

— Vi tamen ebriiĝis antaŭ ol vi perdis mian knabon, kaj same vi ebriiĝis antaŭ ol mi trovis vin en Hago sub tiu arbo.

— Vi pravas, tiam mi ebriiĝis; sed mi ne ĉiam ebriiĝas, kiam mi eliras por mia plezuro. Mi nur fariĝas ebria, kiam mi jam trinkis unu glaseton da brando; kaj mi nur trinkas brandon, kiam mi estas en societo de brandon trinkantaj maristoj, kun kiuj mi amuzas min. Sed, ĉar vi ne trinkas brandan, ankaŭ mi ne trinkos nun mian unuan glaseton, sekve, se mi eliras kun vi, mi ne ebriiĝos, eĉ se ni enirus trinkejon.

— Tio estas dirita logike kaj filozofie, mia amiko, sed diru al mi: Ĉu vi neniam ebriiĝas sursipe?

— Neniam, pro mia honoro!

— Mi komprenas, tie ne estas brando.

— Vi estas granda filozofo, kiel mi opinias, sed

rilate al la provizoj de ŝipoj vi maltrafis. En mia ŝipa kuirejo estas tiom da brando, ke centoj da maristoj povus ebriiĝi tie, sed tie mi neniam ĝin tuŝas.

— Nu, ne ofendiĝu, mia kara. Nun decidu, kion ni faros, post kiam ni vizitis vian patrinon?

— Post kiam ni pasigis la tutan vesperon ĉe ŝi, ni dormos en ŝia domo, kie sin trovas malgranda subtegmentejo kun bona lito. Vi dormos en la lito kaj mi sur du seĝoj. La sekvantan matenon mi laŭ mia kutimo lasos al ŝi mian mo...; ho ve! mi ja posedas plu neniom por lasi..., la belaj fraŭlinoj prenis ĉiom kaj mi eĉ ŝuldas al vi la monon, kiun mi donis al tiu holanda maristo, por ke li povu aĉeti okulvitrojn por sia edzino... — Ivan estis melankoliigonta, sed Johano ekridis dirante:

— Kion vi kutime donas al via patrino?

— Mian tutan kuiristan salajron kun escepto de kelkaj rubloj por vestoj kaj tabako kaj por amuzi min kun miaj kamaradoj.

— Nu, mia kara, vi ne povas lasi vian lastan salajron, sed mi posedas tiom da biletoj po mil guldenoj, ke...

Ivan metis manon sur la brakon de sia kunulo kaj diris:

— Vi do ne intencas postlasi ĉe ŝi da tiuj biletoj!?

Johano refoje ridis, sed ne respondis, kaj la kuiristo diris plue:

— Ĉar tion farante hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ kaj cetere al multaj personoj, vi refariĝos almozulo mem en malpli ol unu monato.

— Tio estas dirita malfilozofie, mia kamarado, ĉar ĉio dependas de cirkonstancoj, ankaŭ tio, ĉu mi fariĝos almozulo aŭ ne; krom tio, se la sorto jam decidis, ke mi fariĝos tia, tiam ĉiuj miaj klopodoj malebligi tiun decidon estus vanaj; do lasu min agi kaj fari laŭ mia bontrovo kaj deziro.

Ivan silentis kaj ili ekpromenis.

La leganto jam unufoje vizitis la patrinon de Ivan kun Jafet kaj la kuiristo mem. Sekve li scias, kie ŝi loĝis, kaj li povas imagi kun kiom da ĝojo la filo kun la longa fremdulo estis akceptataj de la maljuna virino.

Johano, kiŭ ĉiam tuj sentis sin kvazaŭ samhejmano ĉe ĉiuj homoj, sin sentis tamen iom ĝenata ĉe la rusa virino, ĉar li ne povis paroli la rusan lingvon. Li do ĉeestis la por li nekompreneblan interparoladon de siaj gastigantoj, kiuj rapide kaj senhalte babiladis la tutan vesperon ĝis noktomezo. Por la unua fojo Johano aŭdis la rusan lingvon, kiu sonis tre strange en liaj oreloj pro la abundo da siblataj konsonantoj, per kiuj ĝi estas karakterizata. Kelkfoje ŝajnis al li, kvazaŭ du birdoj flutadis inter si kaj li opiniis, ke tiu flute-parolata lingvo nepre devas esti mirinde belsona, kiam ĝin parolas inter si aro da babilantaj knabinoj.

Je la deka horo en la sekvanta mateno Ivan kaj Johano kune iris sur la straton por viziti Jafeton, la Insulanon... Sed kie li estus trovebla? La patrino de Ivan ne sciis tion. Ili do informiĝis ĉe multaj lokoj, sed nenie oni povis doni informojn pri la loĝejo de la violonisto. Fine ili iris al la teatro kaj tie la pordisto sciigis, ke la familio Romeskaŭ antaŭ monato estis forlasinta la urbon. Li tamen ne sciis, kien ili estis vojaĝintaj.

— Ĉu la familio vojaĝas pro plezuro? — demandis Ivan.

— Ne, la violonisto Romeskaŭ la juna intencas doni koncertojn en multaj urbegoj de Eŭropo ekster Rusujo.

— Kiel longe daŭros la vojaĝo?

— Duonan jaron, eble pli longe.

— Ili neniam postlasas adreson?

— Mi kredas ke ne, ĉar ili mem antaŭe ne scias, kiam ili estos en Parizo, en Berlino aŭ en alia urbo.

Ivan tradukis al Johano la respondon de la pordisto. La filozofo pripensis momenton, tiam li diris ridetante kiel kutime:

— Nu, spite al tio, ni lin trovos.


Kaj la duo, Johano bonhumora kaj ridetante, Ivan malbonhumora kaj plorante, iris for; kaj Johano, frapetante sian kunulon sur la ŝultron, diris:

— Antaŭen, kamarado! ne melankoliĝu, mi petas, Kuraĝon! Kuiru viajn pizojn kaj ĉio fariĝos bona! —

Fino de la Kvara Parto.

Kvina Parto

Idoj de Orfeo.



Unua Ĉapitro.

En Brej — Ĉe la mutulino — Moseo, vera ido de Orfeo —
Kovács ekpromenas en la lumo de la luno — Maltrankvileco
en la dometo de Rika — Malfrua vizito ĉe la pastro — Terura
nokto — Strauga trovaĵo de leterportisto — La farmisto
Klomp — Ido de Orfeo kaj... de Marso — Pri tio, kion re-
vadas la mutulino.

Kara leganto, botvestu vin per imagaj sepmejraj
botegoj, kaj sekvu min al la vilaĝeto Brej, kiun ni for-
lasis antaŭ kvin jaroj. La domareto kuŝas tie ankoraŭ
tiel same kiel en tiu tempo, ĉar vilaĝetoj kiel Brej pres-
kaŭ neniam ŝanĝiĝas. La ticaj homoj ne loĝoŝanĝas,
ĉar kiu en tia vilaĝeto posedas aŭ luis hejmon, tiu preskaŭ
ĉiam restas tie, ĝis kiam la morto vokas lin al la ko-
muna loĝejo, el kiu ankoraŭ neniu revenis.

Brej tute ne ŝanĝiĝis. La rektaj longfosoj duone
plenaj je purega, kvankam senmove staranta akvo, kie
nenio maltrankviligas la grasajn ranojn, portadas sur
siaj deklivoj ankoraŭ la same aspektantan verdajon de
antaŭe, ĉar neniam falĉisto forfalĉis la longan herbon,
nek la malbonherbojn, kreskantajn tie en plena abundo.
Sur la vojo sterniĝanta inter tiuj longfosoj ankoraŭ ĉiam
kuŝas la sama griza makadamo, sur kiu aŭtunon post
aŭtuno veturadis la farmejoj veturiloj, pezaj pro la riĉa
rikoltajo, kiu estas la fonto de la prospero karakterizanta
ĉiujn vilaĝojn kaj vilaĝetojn en la norda parto de la
provinco Groningen.

La pinta tureto elstaras ankoraŭ super la arboj ĉirkaŭantaj la silentan mortintejon, kaj ĝia koko, turniĝanta mil fojojn ĉiutage de nordo al nordokcidento, de nordokcidento al nordo kaj cetere, ankoraŭ ĉiam klopodas aŭdigi al la Brejanoj sian unutonan grincadon, kiun tamen aŭdas nur la birdo, kiu okaze fariĝis sufiĉe kuraga por eksidi sur ĝia kapo, dorso aŭ vosto. La pastrejo same kiel la preĝejo portas la saman grizan koloron, kiun vidis sur ili jam multajn jarojn la malmultaj preterpasantoj. La samaj nestoj, kiujn jam antaŭ multaj printempoj konstruis la birdoj sub la elstarantaj tegmentaj tegoloj, ankoraŭ troviĝas sur la samaj lokoj, ĉar neniu ruinigis ilin. La laboristaj dometoj ĉiuloke semitaj trafe maltrafe kvazaŭ de giganta mano transe de la longfosoj kaj ĉe la bordo de la sablaj vojoj kondukantaj al multaj farmejoj, estas preskaŭ la samaj, kiujn ni vidis antaŭ kvin jaroj, ĉar eble unu ruinigis pro malnoveco kaj eble unu nova ĝin anstataŭis, sed kun escepto de tiu ne en la okulojn falanta ŝanĝo ĉio estas ankoraŭ kiel en la tempo, kiam ni forlasis Brejon.

Estas en aŭtuno kaj la oka horo en la vespero. La vetero estas belega, kvankam iom malvarma kiel multfoje en la nordo de la provinco Groningen, post kiam la somero estas pasinta.

La luno, staranta plendiske sur la ĉielo, palhele lumigas sub si la tutan vilaĝeton kaj ĉirkaŭaĵojn. Nur de tempo al tempo sole ŝvebanta nuboj por momento jetas vastan antaŭen rapidiĝantan ombron sur la belan domareton, sed tuj poste la arĝenta lumo de la luno disverŝiĝas sur la tutan pejzaĝon. Ĉio estas kvieta kaj silenta. La birdoj jam longe dormas, kaj nur kelkaj strigoj, sidantaj sur la arboj de la mortintejo aŭ sur la preĝeja tegmento, interrompas ĝin per siaj tirtonaj u-krioj. Preskaŭ ĉiuj loĝantoj dormas, ĉar jam frue la sekvantan

matenon ili devos leviĝi por eklabori ĉe la farmistoj. Nur la fenestroj de la pastrejo estas lumigitaj, ĉar la pastro ankoraŭ ne kuŝiĝis.

Ni laŭiras la sablan vojon al la dometo de la mutulino. Jam de malproksime ni vidas ĝin konturigantan kontraŭ la lumigita ĉielo. Ankaŭ en tiu dometo la loĝantoj ne dormas ankoraŭ, ĉar ankaŭ tie brulas lampo en la ununura ĉambro kaj ĵetas siajn flavajn striojn tra la fenestroj sur la strateton kondukantan de la pordo al la vojeto.

Ni eniras. Post la tablo sidas Rika. La kavetoj de ŝiaj vangoj kaj la brilo de ŝiaj okuloj plibeligas ankoraŭ ŝian vizaĝon. Ŝiaj manoj rapidmove aŭdigas mallaŭtan tik-tak-adon de tri trikiloj, ĉar Rika trikas ŝtrumpojn por sia Moseo.

Moseo sidas inter la fenestro kaj la fajrujo, kie brulas gaja fajro, kaj antaŭ liaj disstarigitaj kruroj li tenas belan violonĉelon, sur kiu li ludas. Rika aŭdas nenion de la belaj tonoj, kiujn li triligas tra la ĉambro; tamen ŝi konscias, ke tiu sur la kordoj moviĝanta arĉo povas ravi tiujn, kiuj estas kapablaj senti per la oreloj.

De tempo al tempo la mutulino ĵetas rigardon al la pordo, sur kies sojlo staras Kóvacs. Li tenas la manojn sur la dorso kaj Rika rimarkas, ke la ludado de Moseo kontentigas lin, ĉar tion ŝi legas sur liaj trajtoj, tion ŝi vidas je la kapmovadoj, kiujn li faras ĉe belaj melodioj de la muziko.

Moseo ludas sian amatan Kol Nidrej de Max Bruch, tiun saman muzikaĵon, kiu logis lin de la subtegmenteja lito, kiam li kiel knabo por la unua fojo aŭdis la violonĉelon de Kóvacs. Li ĝin ludas ĝis la fino kaj Kovacs diras:

— Brave, Moseo, brave! vi trafis la ĝustan tonon, neniuj povas plibonigi vian ludadon, ĝi estas perfekta.

Moseo, kiu nun estas dekokjarulo, la plej bela junulo de la tuta ĉirkaŭaĵo, modeste ripozigas la arĉon kaj diras:

— Mi tamen timos ludi ĝin por la publiko.

— Kompreneble; komence ĉiu iom timas, sed baldaŭ oni kutimas, fine eĉ la ludanto jam ne plu atentis la publikon, ĉar tiam li ludas nur kvazaŭ por si mem, forgesante, ke antaŭ li sidas aŭdantaro.

Moseo ne respondas; tuŝetante per la fingroj kelkajn kordojn, li ludas antaŭludadon de alia verko kaj denove la maljuna artisto aŭskultas, kaj Rika, ekzamenante lian vizaĝon, legas sur liaj trajtoj, ke la ludado al li plaĉas.

— Bonege! — li diras, kiam la juna violonĉelisto finis; — bonege! . . . mi ne povus ludi tion pli bele kaj pli ĝuste.

La junulo, kiu estas nelacigebla ludanto, daŭrigas sian studadon kaj la instruisto turnas al li la dorson; li malrapide eliras por aŭskulti eksterdome. Tion li faras ofte, precipe kiam la vetero estas bela. Kelkan tempon li restas staranta sur la strateto, rigardante la helan lunon kaj la pentrindan pejzaĝon ĉirkaŭe. Li pensas pri la sorto, kiu tiel strange lokis lin al ĉi tiu trankvila regiono; li pensas pri la jaroj, kiujn li pasigis tie ĉi, instruante la junan troviton, el kiu li faris veran artiston, kvankam la juna „Ido de Orfeo“ ankoraŭ ne konscias tion mem. La talentoj de la juna artisto estis montrigitaj super ĉiuj atendoj, kaj la rezultojn, kiujn li (Kóvacs) akiris post sia kvinjara instruado, estis tiaj, ke laŭ lia opinio neniu en la nuntempa muzikmondo superus lian lernanton. Moseo fariĝis artisto laŭ la vera signifo de tiu vorto, kaj baldaŭ venus la tempo, en kiu la juna violonĉelisto sin montrus antaŭ la publiko, unue por kunlabori en koncertoj por venki sian tro grandan timon, kiun li sentas pro la aŭdantaro, kaj poste kiel solu-

danto. Kóvacs jam estas korespondinta kun la orkestro de „Harmonio“ en Groningen, sub kies gvidado la junulo baldaŭ komencus sian publikan muzikokarieron. Kovacs, kiu estas certa, ke Moseo estos la plej lerta el ĉiuj membroj de la orkestro, jam antaŭe ĝuas la plezuregon, ke la junulo kiel astro brilos inter ĉiuj artistoj, kaj ke Moseo fine, kiam li aperos kiel solludanto, estos sama famulo, kia li estis mem antaŭ ol tiu terura malsano lin atakis. Revante pri ĉio tio ĉi, li forgesas pri sia malfeliĉo, ĉar lin kontentigas la penso, ke liaj lastaj jaroj ne estas pasintaj senfrukte; la celo, por kiu li estas travivinta siajn lastajn jarojn, estas trafita, li mem ne povos plu ravi la mondon per sia muziko, sed lin anstataŭos lia lernanto. Dum sia revado li malproksimiĝis tiom de la dometo, ke li ne plu aŭdas la ludadon de la junulo. Sed li ĝin aŭdas image tiel kiel ĝi sonis dum la solludado, kaj dum rideto kuras sur la vizaĝtraĵoj de Kóvacs, li marŝetas plue, ĉiam plue sur la sabla vojeto al Brej.

Kutime li neniam promenas sola, ĉar tion toleras nek Rika, nek Moseo. Ili scias, ke tiu terura malsano ĉiuloke kaj ĉiuminute povas refoje lin ataki, kaj en tiaj cirkonstancoj ili volas esti tuj apud li por eviti eventualajn malfeliĉaĵojn, kiuj daŭre minacadas apopleksiulon. Ili tamen kredas nun, ke li estas ankoraŭ proksime de la pordo, aŭskultante la ludadon, kaj tute ne maltrankviliĝas, tiom pli, ĉar la atakoj de la malsano revenis nur tre malofté en la lastaj jaroj.

Moseo ludas plue, Rika trikas plue kaj Kóvacs kviete promenas plue, revante kaj daŭrigante sian vojon al la domareto, kuŝanta tie antaŭ li en la arĝenta lumo de la luno.

Jen supre ekaperas refoje ŝvebpendanta nubego; ĝia granda ombro kiel nigra inkmakulo glitrapidas sur la

tero, malaperigante sinsekve por mallonga momenteto arbojn, dometojn kaj parton de la vojo. Rapide ĝi alproksimiĝas, iras trans la revantan artiston kaj tuj poste ĝi estas jam malproksime . . . , sed kie sin trovas Kóvacs? . . . Ŝajnas, kvazaŭ tiu granda nigra makulo lin farbalais de la vojo, kaj kvazaŭ ĝi forprenis lin kun si per unu rapida ekkapto. La sabla vojo kuŝas tie tute kiel antaŭ unu sekundo, sed la artisto malaperis.

Dume Moseo daŭrigas ludadi kaj fantaziadi, kaj la mutulino trikadás, ĝis kiam ŝiaj fingroj laciĝas; tiam forigante la duone trikitan ŝtrumpon, ŝi subite estas kaptata de la penso, ke „la sinjoro“ ne revenis, kaj ke -pasis longa tempo post lia foriro. Rapidmove ŝi ekstaras kaj eligas ekrion por altiri al si la atenton de la junulo. Li interrompas sian ludadon kaj rigardas al la virino, kiu faras gestojn per manoj kaj buŝo. Moseo tuj komprenas, metas la violonĉelon flanken kaj eliras la ĉambron.

Kóvacs ne staras en la koridoro, nek sur la strateto, nek estas videbla sur la sabla vojo transe de la long-foso, kaj la junulo reiras hejmen por komuniki, ke la onklo (li jam longe nomis Kóvacson sia onklo) estas for; sed li ne bezonas tion komuniki, ĉar la mutulino jam estas sur la strateto. Moseo, timante ke malfeliĉaĵo trafis la artiston, rigardas ĉiuloken, kion kutime oni faras, kiam oni serĉas; sed nenie li ekvidas la onklon. Li ekpaliĝas, kaj lia koro ekbatas . . . ; neniam la onklo tutsola promenas, ĉiam lin akompanas Moseo, kaj nun en ĉi tiu vespero li ekpromenis sen la junulo. Moseo ekkuras sur la sablovojon, ekzamene esploras, sed la onklo restas for. Moseo kuras en la direkto al la farmejo de Klomp, sed baldaŭ revenas. La mutulino kuris en la direkto al Brej, sed ankaŭ ŝi revenas post momento kaj renkontas la junulon apud sia dometo,

kaj ili komprenigas sin reciproke per gestoj, ke la serĉado estis vana. Rika eligas laŭtajn ekkriojn, sed Moseo silente laŭiras la dekstran longfason, ĉar li timas, ke la onklo enfalis tien post subita atako de tiu terura malsano.

Rika esploras, laŭirante la maldekstran longfason, kaj ŝiaj okuloj penadas penetri la akvon, kiu sin etendas sen movo, parte tute nigra pro la ombro de la longfosdeklivo kaj parte brile hela pro la lumo de la luno. Ili ne trovas la artiston, nek en la longfosoj al Brej, nek en tiuj al la farmejo. Aliajn vojojn Kóvacs kutime ne elektis por siaj promenadoj; spite tion, la duo daŭrigas sian serĉadon en ĉiuj direktoj, sed vane. Kóvacs estas malaperinta. Post pli ol du horoj ili kune iras al Brej por informiĝi, ĉu la malaperinto eble estas ĉe la pastro.

Estas nun la dek-unua horo; la pastro sidas en sia studejo, kiam Moseo kaj Rika staras antaŭ la pordo de lia domo. En la vespera silento li tuj aŭdas iliajn paŝojn kaj ekstaras por iri renkonte al la malfruaj vizitantoj. Rika ĵus malfermas la pordon, kiam la pastro enpaŝas en la koridoron. Li estas vestita per sia longa ĉambra jako, la argilan pipon li tenas de la buŝo al la mano, kaj li blovas dikajn fumnubojn. La lampo de lia studejo hele lumigas la postan parton de la koridoro, kie li staras, kaj konturigas klare lian tutan figuron. Fumante li movadas supren kaj malsupren la antaŭstarantan malsupran makzelon, kaj profundaj sulkoj sidas sur lia frunto, ĉar li klopodas trabori per la miopaj okuloj la malhelan parton de la koridoro, ĉe kies fino staras la du vizitantoj sur la sojlo de la pordo. Li ne povas distingi, kiuj ili estas, kaj prenante la pipon el la buŝo, li ekblovas lastan nubon, kaj surŝultrigante la pipon, kvazaŭ ĝi estus pafilo, li aliras al la pordo.

— Pastro —, tiel al li diras Moseo, — ĉu eble onklo estas ĉe vi?

La junulo parolis nerveme, kaj la bonkora pastro tuj konjektas, ke io ne estas en ordo.

— Onklo!?... Ne, Moseo, li ne estas ĉe mi, kaj ne estis...

Rika, kiu havas penetrantajn okulojn, legas la respondon sur la buŝo de la pastro. Ŝi komprenas, eligas raŭkan ekkrion kvazaŭ por paroli; tiam ŝi faras movojn per la brakoj, kiuj diras, ke onklo malaperis kaj estas for.

— Jam longe? — demandas la pastro.

— Li ekpromenis ĉirkaŭe je la oka; mi estis ludanta, sed mi pensis, ke li staras eksterdome por aŭskultadi, kiel kelkfoje li faras. Li tamen forrestis longe, kaj ni maltrankviliĝis; ni do eliris kune por lin serĉi. Ni serĉis ĉiuloke, laŭ ĉiuj vojoj kaj en ĉiuj longfosoj, sed nenie lin trovis. Ni timas, ke malfeliĉaĵo lin trafis.

— Kiam vi estis hejme la lastan fojon?

— Antaŭ du horoj ĉirkaŭe.

— Eble li rehejmiĝis en tiuj du horoj.

— Mi kredas ke ne, pastro —, respondas Moseo, kaj lia voĉo tremetadas, — mi tre maltrankviliĝis, mi timas, ke refoja atako lin ektrafis.

La pastro pripensas... Kion fari!?... Volonte li akompanus Moseon kaj Rikan por denove serĉadi, sed li estas tiel miopa, ke lia helpo estos sen valoro. Fine li diras:

— Mi iros kun vi al via domo; povas ja esti, ke li jam rehejmiĝis.

Moseo ellasas profundan malesperan ĝemon; li antaŭsentas ion teruran, fine li diras:

— Jes, ni reiru hejmen, povas esti, ke onklo revenis tien kaj ke li malkvietiĝas pro ni.

La pastro, vestita per la longa ĉambra jako kaj surhavanta sian veluran ĉapon, sekvas Moseon kaj Rikan, kaj triope, la pastro en la mezo, ili iras laŭ la sabla

vojeto al la loĝejo de la mutulino. Senparole ili eniras . . . paŝante mallaŭte pro la mistera timo, kiu premas la koron de ĉiu. Morta silento regas ĉie . . . Kóvacs ne estas en la dometo.

Rika altiĝas la manojn en malespero kaj refoje ŝiaj raŭkaj krioj interrompas la silenton. Ŝi restas staranta momenton meze de la ĉambro, ne sciante kion fari; ŝi rigardas sur la liton, sed ankaŭ tie ne estas Kóvacs. Ŝi ŝvingadas la brakojn, iras tien kaj reen, supreniras la ŝtuparon en la koridoro por esplori, ĉu li eble estas sur la subtegmentejo, sed vane, ankaŭ tie li ne estas. Ŝi revenas en la ĉambro, eksidas, refoje ekstaras, iras ĉiuloken en la domo, ĉirkaŭiras ĝin, sed ĉiu serĉado restas sen rezultoj. Kóvacs estas malaperinta.

Mosco kaj la pastro, kiuj pli bone povas estru sian maltrankvilon, sidas kune ĉe la fajrujo kaj silentas, dum ĉiu enpense diras al si, ke la artisto neniam revenos viva.

Kaj dum la muta virino senlace daŭrigas sian serĉadon en la domo kaj poste ekstere, kaj Mosco kaj la pastro atendas ĉe la fajrujo, pasas kaj pasas horo post horo . . . Pasas la unua . . . la dua . . . la tria . . . la kvara horo, kaj ankoraŭ ĉiam oni atendas la revenon de Kóvacs.

La luno, kiu jam ekpaliĝis pro la alproksimiĝanta tagiĝo, staras malproksime sur la ĉielo kaj kvazaŭ mokridante rigardas malsupren al la serĉanta virino; sed ŝi ne rimarkas tion, ŝi daŭrigas sian iradon, ĵetante flanken nubeton post nubeto da sablo per siaj pezaj lignaj ŝuoj. Fine ŝi rehejmiĝas, pala kiel la morto; ankaŭ ŝi antaŭsentas, ke li neniam revenos viva, kaj ke io terura okazis kun li. Ŝi lasas sin fali sur seĝon, ŝvingadas momenton la brakojn kvazaŭ por diri: Ĉiu espero perdiĝis! Tiam eligante sian lastan ekkrion de malespero, ŝi restas sidanta sen movo, rigardante antaŭ sin kiel statuo,

Refoje pasas kelkaj horoj, la luno malaperas iom post iom kaj la suno estas leviganta; la birdoj ekvekiĝas, ekkantas, la laboristoj forlasas siajn dometojn por iri al la laboro sur la kampoj, kaj la leterportisto (estas nur unu leterportisto en Warfum, kiu regule je la sepa horo en la mateno komencas sian disportadon en Brej) alproksimiĝas sur la sabla vojeto. Tion li faras ĉiumatene por alporti la gazeton al la farmejo de Klomp. Tiun gazeton kun du leteroj li portas en la mano. Mezvoje de Brej al la farmejo li subite ekhaltas. Ĉe lia dekstra flanko la verdaĵo kaj la alta nefalĉita herbo sur la longfos-deklivo kuŝas platigita en la direkto al la akvo. Ŝajnas kvazaŭ hundo estis tie por persekuti leporon, sovaĝan anason aŭ perdrikon. La leterportisto alpaŝas al la herbo por rigardi pli atente kaj jen antaŭ li sur la deklivo elstaras el la akvo du pantalone kovritaj kruroj kaj du piedoj. Ili elstaras supren el la akvo de la genuoj ĝis la ŝuplandoj. Ĉio cetera kuŝas en la longfoso sub la akvo.

La leterportisto terurita metas la ĵurnalon kaj la leterojn en la lettersakon pendantan ĉe lia flanko kaj flustras:

— Sankta Dio, kio estas tio?

Li sin klinas kaj rigardas ankoraŭ pli atente, preskaŭ ne kuraĝante tuŝi la elstarantajn piedojn, kiuj apartenas al viro, kies brusto kaj kapo kuŝas tie sub la akvo. Li tamen ektuŝas la ŝuojn, altiris al si la piedojn, sed ili estas tiel rigidaj, ke nur kun peno li povas ekmovi ilin. Kiu do dronis? . . . Lia rigardo estas alforĝita sur la piedoj kaj la plandoj de la ŝuoj, kaj li klopodas solvi la enigmon. Fine li kredas scii, al kiu apartenas tiuj kruroj, kaj tirante al si per ĉiuj siaj fortoj la mal-feliĉulon, li post momento trenas el la akvo la kadavron de Kóvacs. La kapo de la droninto estas tute nigra pro la grasa ŝlima koto de la longfosa fundo. Tamen

la akvo, fluanta el la vestoj, forglitigas parton de la malpurajo, kaj la trajtoj de la mortinta artisto iom post iom ekaperas.

La leterportisto eltiras sian poŝtukon, malsekigas ĝin per akvo kaj purigas la vizaĝon, la harojn kaj la barbon de la senviva viro. Tiam li kuras al la dometo de la mutulino kaj ĝin eniras.

Rika, Moseo kaj la pastro tuj ekstaras ĉe lia alveno, ĉar ili legis sur lia vizaĝo, ke li venas kun teruriga sciigo pri la malaperinto.

— Ĉu vi lin trovis? — demandas la pastro kun retenita spiro.

La leterportisto kapjesas, etendante la manon en la direkto, kie kuŝas la droninto; tiam ne parolante unu vorton, li kuras returnen al la montrita loko, kaj lin sekvas la tri aliaj. — — — — —

Klomp, kiu ĉiumatene jam frue faras la rondiradon sur siaj kampoj por ekzameni, ĉu ĉio marŝas bone, kaj ĉu la kamparaj laboristoj diligente laboras, eksaltas trans loĝfoson, trairas per siaj malgraciaj kruroj kelkajn kampojn kaj jen je centkelkaj metroj da distanco li ekvidas tri homojn, kiuj sin klinas super io kuŝanta en la herbo flanke de la sabla vojo. Scivola, kvieta kaj kun la manoj en la poŝoj de la pantalono li aliras tien. Kaj atinginte la tri homojn, li kviete ekhaltas...

Antaŭ li inter la pastro, la leterportisto kaj Moseo kuŝas la kadavro de Kóvacs, kaj la mutulino, eligante laŭtajn ekkriojn, genufleksis tuj apude, tirante al si la harojn, batante al si la bruston, kvazaŭ ŝi sola estus la kaŭzo de la malfeliĉego, kiu trafis la artiston. Klomp, ankoraŭ kvieta, trankvila kaj senkompata, rigardas dum momento la kadavron, kvazaŭ ĝi estus la kadavro de

droninta hundo, tiam altigante la ŝultrojn, li diras kun indiferenteco:

— Hm!... dronis, mortis, finita! — kaj sin turnante, li malproksimiĝas, saltas trans la longfason, trairas refoje siajn kampojn por esplori, ĉu ĉio marŝas bone... kaj malaperas.

Kvaronon da horo poste Kóvacs estas portita en la domon de Rika. La leterportisto estas helpinta porti lin tien, sed ekforirante al la farmejo de Klomp, li ekpensas pri tio, ke en lia lettersako kuŝas du leteroj, kiuj ne estas adresitaj al la farmisto. Li elprenas kaj enmanigas ilin al Moseo. Ambaŭ estas el la urbo Groningen. Unu, skribita de la orkestrestro de „Harmonio“, estas adresita al Kóvacs, kaj la alia al Moseo mem.

Neniam Moseo ricevis leteron; kiu povus skribi al li, la trovito? Li tuj malfermas la leteron kaj konsternite montras ĝin al la pastro. Ĝi estas alvoko al la milit-servado.

— — — — —
— — — — —
— — — — —

Dank' al la bonaj zorgoj de la pastro, la postan tagon en la vespero venas la nigra ĉerko. En la vilaĝoj de Groningen la ĉerkoj estas ĉiam nigraj. La du portantoj lokas ĝin meze de la ĉambro sur la kaheloj, kaj post kiam ili kun helpo de Moseo estas enmetintaj la mortinton, ili foriras flustrante inter si pri la tragika maniero, en kiu mortis la artisto, kaj lasis la mutulinon kaj Moseon solaj.

La junulo ne komprenigis ankoraŭ al sia adoptintino, ke li post du semajnoj devos forlasi ŝin pro la milita servado. Li intence prokrastis tiun sciigon, timante, ke lia foriro kaj la subita morto de Kóvacs estus tro grandaj battoj por la virino en unu fojo.

Silentante li nun sidas ĉe la fenestro kaj rigardas eksteren aŭ iras eksterdomen por stari sur la strateto aŭ sur la sabla vojo. Tiel malĝoje pasas por li la tri tagoj antaŭ la enterigo de Kóvacs. Rika kontraŭe restas hejme. Kun premitaj lipoj, kaj ŝajne kvieta kaj kun resignacio ŝi sidas tie tiujn tri tagojn, nur ekstarante por prepari manĝaĵojn kaj rigardas preskaŭ sen interrompo la ĉerkon. Strangaj pensadoj amasiĝas en ŝia cerbo.

Kiam ŝi estis juna knabino, kelkaj el ŝiaj gefratoj kaj poste la gepatroj mortis. Ankaŭ ilin ĉiujn oni metis en tian nigran keston. Ŝi pensas pri tiu misteraĵo. Ŝi konscias instinkte, ke por ĉiuj enĉerkigitoj ĉi tiu surtera vivo finiĝis. Ĉu tiuj senmove kuŝantaj homoj songos tiam eternan songon? Kiam ŝi songas, tiam ankaŭ ŝi kuŝas sen movo, sed post la songo ŝi ĉiam ekvekiĝis por fari sian kutiman laboron. Ŝi spertis tamen, ke enĉerkigitoj jam neniam revekiĝas, sed restas en la nigra kesto, kaj ke homoj venas por forporti ilin al profunda truo en la tero tuj apud tiu griza konstruaĵo, kie loĝas la blankbarbulo... Kial oni enterigas ilin?... Ĉu ili ne sentas tion?... Ĉu ili ankoraŭ songos en tiu profunda truo?... Ho, tion ŝi volonte ekscius, ĉar ŝi mem ankaŭ kuŝos tie baldaŭ aŭ post longa tempo; ŝi spertis, ke neniu scias antaŭe, kiam venos tiu tempo... Ĉu aliaj homoj scias tion, kio poste okazos?... Ili sendube scias pri tio, ĉar ĝi estas nur mistero por ŝi, kiu ne kapablas senti kaj ekscii per la oreloj... Kial ŝi ne posedas tian kapablon?... Ho, se ŝi posedus ĝin, tiam oni povus komprenigi al ŝi pri ĉio, kio okazos post ĉi tiu surtera vivo... Ŝi pensas, ke post ĉi tiu vivo okazos io stranga, ĉar ĉiuj mortintoj estas bele kaj blanke vestataj, kaj kun zorgo kaj ceremonio oni forportas ilin al tiu ripozejo... Sur kelkajn oni metas pezajn ŝtonojn kun ĉizitaj literoj, sur aliajn oni starigas nigrajn tabulojn kun blankaj sur-

skriboj, sur aliajn oni konstruas terajn tegmentformajn montetojn, kiujn oni poste forigas; sed la pezaj ŝtonoj kaj la starantaj tabuloj ĉiam restas... Kial ekzistas tiu diferenco? Ho, kial ŝi ne estas kiel la aliaj homoj, tiam ŝi ja tion scius... Kion oni metos aŭ starigos sur la truon, en kiu ripozos la kesto de tiu ĉi viro, kiu estis tiel bona al Moseo?... Kion li preferus?... Ho, se ŝi nur scius, tiam ŝi aĉetus ĝin por li... Iam venos la tempo, kiam ankaŭ Moseo estos portata al tiu ripozejo... Ĉu tio daŭros ankoraŭ longe?... Ĉu tio okazus, dum ŝi loĝas ankoraŭ en sia dometo? Ho, ke ŝi mem estu portata tien unua, ĉar ŝi ne povas toleri eĉ la ekspenson, ke oni metos ŝian knabon en tian keston... Ho, kial ŝi do scias nenion, kial do ŝi ne estas kiel aliaj homoj?... Feliĉe, Moseo estas sana kaj li amas ŝin tiom, ke li ĉiam restos ĉe ŝi kaj neniam foriros malproksimen kiel kelkfoje aliaj knaboj foriras... Jes, li restos sendube... Sed kiu donos al ŝi monon por aĉeti vestojn kaj cetere, ĉar la viro, kiu ĉiam donis ĝin, jam ne faros tion estonte... Nu, ŝi ja povos denove labori kiel antaŭe..., sed ne ĉe Klomp..., eble ĉe la blankbarbulo...

Dum ŝi tiel revis jam du tagojn kaj du noktojn ĉe la ĉerko de Kóvacs pri multaj al ŝi misterplenaj aferoj, ŝia kapo ekturniĝas. Neniam ŝi revis tiel longe kaj tiel multe kiel nun. Ŝi interfingrigas la manojn kaj penas forigi ĉiujn pensojn por tute jam ne revadi. Ŝi fermas la okulojn kaj fine pro laceco ekdormas flanke de la ĉerko.

Dua Ĉapitro.

**Daŭrigo de la interrompita Deka Ĉapitro de la Unua Parto —
Kial ĉiuj surpriziĝis — La tri Idoj de Orfeo — La sep Pre-
ĝejoj de Romo.**

..... tiel similaj unu je la du aliaj, ke ĉiu kredis rigardi sin mem en duobla spegulo.

Mi staris antaŭ miaj kolegoj-artistoj, kaj dum momento ŝajnis al mi, ke mia cerbo ekiris promeni. Tio daŭris tamen nur momenteton, ĉar la sintenado de la aŭdantaro, kiu ekstaris (kontraŭ la reguloj de Kurhaŭs), montris al mi, ke la du antaŭ mi starantaj artistoj ne estas fantomoj aŭ bildoj de mia imago, sed veraj, ekzistantaj junaj viroj.

Mi vidis ilian reciprokan surprizon, kaj unua mi ekparolis al la violonĉelisto, staranta plej proksime, dirante al li:

— Mi havas la honoron kaj plezuron prezenti min al vi; mia nomo estas Jafet Romeskaŭ el Patersburgo.

La violonĉelisto ridetis ĝenate; mi tuj rimarkis, ke li ne komprenis miajn vortojn. Li sekve ne estis ruso. Farinte riverenceton, li etendis al mi la manon, dum li respondis holandlingve:

— Estas al mi agrable fari vian konon; mia nomo estas Moseo Landman —. Tiam mi turnis min al la pianisto kaj diris, same ruslingve, ĉar nur en tiu lingvo mi povis esprimi min flue, kaj ĉar mi ne sciis, ĉu li estas ruso, holandano aŭ iu alia:

— Agrable estas al mi konatiĝi kun vi; mi estas Jafet Romeskaŭ.

Li respondis germane, dirante, ke li sin nomas Stanislas Mareau, kaj post kiam li kaj la violonĉelisto estis salutintaj sin reciproke, ni eksidis por ludi.

La publiko dum mia konatiĝo kun miaj kolegoj parolis inter si, kaj inter la murmurado de la voĉoj mi aŭdis inter aliaj rimarkoj, ke oni diris:

— Sen ia dubo, ili estas fratoj!

— Sed laŭ iliaj nomoj ili ne estas samlandanoj!

— Unu tamen estas ruso, alia holandano kaj la tria estas germano.

— Estas mirinde; sed ili tiel similas unu la aliajn, ke...

Ne estis tamen tie la ĝusta loko por ni, interparoli plue, ĉar la aŭdantaro atendis; ni ne povis atendigi ĝin pli longe, kaj ni ekludis.

Laŭte ni estis aplaŭdataj, kaj post la paŭzo ni iris al la artista salono, kie Maksimo Bjelski jam nin atendis; li estis tiel nervema kaj surprizita, ke komence li ne kapblis paroli. Frotante al si la manojn, li rigardis nin, sed ne sciante, kiu estas lia amiko Jafet, li fine balbute demandis ruslingve:

— Pardonu, sinjoroj... , tio estas vere strangege... , tio estas enigmo, pri kiu sin okupas la tuta aŭdantaro... kaj eĉ vi mem... , sed diru al mi, mi petas: kiu el vi estas Romeskaŭ?... , mi ne rekonas lin.

Mi aliris al li, kaj li diris plue:

— Mi neeble povis rekonu vin... Mi petas: prezentu min al la du aliaj sinjoroj; eble mi parolas iliajn lingvojn.

Mi prezentis lin al la artistoj, kaj ni eksidis ĉe tablo, ĉirkaŭ kiu staris kelkaj seĝoj. Tiam mi diris al Maksimo Bjelski:

— Unu el la sinjoroj estas holandano kaj la alia estas germano, sed mi jam miksis ilin, tiel ili similas unu la alian.

Maksimo diris germanlingve:

— Kiu el la sinjoroj parolas germane?

La pianisto respondis:

— Mi parolas la germanan kaj la polan lingvojn; la holandan tamen mi komprenas iomete.

• — Ĉu vi estas germano aŭ polo? — demandis Maksimo.

— Mi vere ne scias.

— Ĉu vi ne scias!?. . . Kaj via kolego?

— Mi ne konis lin ĝis nun; mi kredas, ke li estas holandano, ĉar li parolis holande.

Maksimo sin turnis al la violonĉelisto, dirante germane, opiniante ke tiamaniere li komprenus lin:

— Sinjoro, vi estas holandano, ĉu ne vere? Bonvolu diri al mi, ĉu vi naskiĝis tia. Vi sendube pardonos al mi tiun demandon, mi ne faris ĝin pro scivolo, sed nur por helpi solvi la enigmon, kiu. . .

La violonĉelisto respondis:

— Eble mi estas holandano, ĉar mi ne scias, kie mi naskiĝis.

— Ĉu vi ne scias tion!?. . . Jen kio estas strangege; neniu el vi scias la nomon de sia naskiĝloko, ĉar ankaŭ mia amiko Romeskaŭ povas nur memori, ke li naskiĝis sur insuleto, sed li ne scias, al kiu lando apartenas tiu insuleto.

La pianisto subite diris:

— Sur insuleto!?. . . Antaŭ kvar jaroj mi renkontis en Posen du virojn, kiuj min alparolis, kredante ke mi estas ilia iama amiketo naskita sur insuleto, kaj ili certigis al mi, ke mi similas je tiu insulano kiel du gutoj da akvo similas sin reciproke.

Maksimo Bjelski fariĝis pli kaj pli nervema kaj fro-
tadis al si la manojn en tia maniero, ke mi ektuŝis ilin.
Li komprenis la tuŝon, sed tute ne refariĝante kvieta,
li diris al la pianisto:

— Du viroj!? . . . Kiel ili aspektis?

— Unu estis tre longa, kaj li sin nomis Johano; la
alia estis ĝibhava vireto, nomata Ivan.

Mi ekstaris pro surprizo, dum mi ekkriis:

— Johano kaj Ivan!? . . . Ĉu tiu Johano portis ĉenon
el moneroj sur sia veŝto?

— Jes, ĉar tiun ĉenon li montris al mi tintante kun
ĝi, kiam li renkontis min en Posen.

— Kaj kie estas nun tiu Johano kaj tiu Ivan? —
demandis Maksimo, refoje frotante al si la manojn.

— Mi ne scias, sed tiu Johano estas mia bonfaranto,
mi ŝuldas al li multegan dankon, ĉar li ebligis al mi
daŭrigi kaj fini mian studadon.

La enigmo fariĝis pli kaj pli implika. Du el ni
konis Johanon kaj Ivanon, sed la tria, la violonĉelisto,
neniam ekaŭdis pri ili. La plej mirinda tamen estis,
ke neniu el ni sciis, kie li naskiĝis kaj kiel estas lia
vera nomo. Ni tamen esperis, ke Johano povus solvi
la strangan enigmon, pri kiu ni okupadis nin nun; sed
vole-nevole ni supozis, ke ni portas en realo la saman
nomon, kaj ke ni estas fratoj. Ni do interkonsentis, ke
la sekvantan tagon je la deka horo en la mateno ni
renkontu nin en mia hotelo por pli detale preparoli la
rimedojn, kiuj povus solvi la strangan enigmon, kiu tiel
multe nin okupadis. Tiu hotelo estis: La sep Preĝejoj
de Romo.

Tria Ĉapitro.

La kunveno en „La Sep Preĝejoj de Romo“ — La barilo pro la diferenco de niaj lingvoj — La taglibro de mia patrino — Kiel nia kunveno estis interrompata kaj de kiuj — La taglibro redaktita en Esperanto kaj ĝia enhavo — Kelka lumo sur niaj naskiĝlokoj — La intenco de la kamentubo-purigisto.

La postan matenon je la deka horo ni ĉiuj estis kune en „La Sep Preĝejoj de Romo“. Mi deziris, ke ni ne estu ĝenataj, tial mi estis dirinta al la kelnero, ke neniu dum nia kunveno interrompu niajn preparojn, okazontajn en aparta saloneto de la hotelo.

La preparoj tamen marŝis malbone pro la diferenco de la lingvoj, en kiuj ni esprimis nin. La pianisto parolis nur germane kaj pole, la violonĉelisto nur holande kaj mi ruse, ĉar aliajn lingvojn mi studadis ĝis nun nesufiĉe, kaj mi tute ne kapablis esprimi min sufiĉe klare por la celo, kiu nin kunvenigis. Ni do antaŭvidis, ke ni povus preparoli nur tre malmulte, tiom pli, ĉar Maksimo Bjelski povis traduki nur en la germanan el la rusa kaj male, sed ne en la holandan lingvon, ĉar tiu lingvo estis al li preskaŭ tute fremda. Ni sekve sidis kune, sed ĉiu el ni baldaŭ sciis, ke la rezultoj estus malmultaj.

Maksimo unue rakontis detale en la germana lingvo pri miaj aventuroj kaj la pianisto komprenis lin bone, sed la violonĉelisto ĉeestis kvazaŭ surdmuto. Poste la pianisto rakontis germane ĉion, kio okazis al li dum lia juneco ĝis nun, kaj Maksimo tradukis tion al mi, sed

refoje la violonĉelisto ne povis kompreni tion kaj li mem ne estis kapabla rakonti, kion li tiel volonte rakontus, ĉar nur mi komprenis lin, sed mi ne povis respondi al li en la holanda lingvo, kiun mi, kiel la leganto memoras, povis kompreni, sed ne paroli. La pianisto fine metis kajeron sur la tablon kaj diris germane al Maksimo Bjelski:

— Jen taglibro, kiun postlasis al mi mia patrino. Eble ĝiaj paĝoj disverŝos iom da lumo sur la enigmon, kiun ni ĉiuj klopodas solvi, sed ĝis nun mi neniam renkontis personon, kiu kapablis legi la lingvon, en kiu skribis mia patrino. Mi montris la skribaĵon al famaj profesoroj kaj lingvistoj, sed ĉiuj altigis la ŝultrojn; neniuj povis legi ĝin.

Maksimo malfermis la kajeron, sed kvankam li studadis multajn lingvojn, tiu, kiun estis uzinta mia patrino por redakti sian taglibron, estis al li tute fremda. Kion fari? Jen ni sidis kune, preparolante jam dum du horoj kaj ni sciis preskaŭ neniom pli multe ol ĉe la komenciĝo de nia kunveno. Ni tamen estis konvinkigintaj, ke ni estas fratoj. Kelkfoje du aŭ eĉ tri homoj povas simili unu la alian reciproke, sed nia simileco estis tiel trafa kaj karakteriza, ke tio ne povus esti hazarda cirkonstanco. Krom tio, ni ĉiuj estis artistoj, ni ĉiuj estis kvazaŭ la idoj de la sama Dio Orfeo; ni nepre devus esti fratoj, filoj de la samaj gepatroj. Sed kiuj estis tiuj gepatroj? Kiel ili estis loĝintaj, kiel estis iliaj nomoj? ... Ĉu ili vivis ankoraŭ? La pianisto jam estis rakontinta pri la morto de la siaj, sed ĉu tiu cirka akrobato vere estis lia patro? Ĉu tiu virino, kiun li ĉiam konsideris kiel sian patrinon, ĉu ŝi vere estis lia patrino? Nur la taglibro povus doni lumon, sed neniuj ĝis nun kapablis legi ĝin.

Ni ĉiuj rigardis la kajeron kuŝantan antaŭ Maksimo,

kaj ni eksilentis pripensante, kiamaniere trovi instruitulon, kiu povus deĉifri la manuskripton, kiam subite en la koridoro alproksimiĝis bruo de paŝoj kaj voĉoj. La pordo de nia saloneto malfermiĝis kaj eniris la kelnero, kiu diris:

— Sinjoroj, pardonu al mi, ke mi vin ĝenas; sed jen estas du viroj, kiuj deziras paroli tuj kun sinjoro Jafet Romeskaŭ.

Mi ekstaris.

— Du viroj? — mi demandis.

— Jes sinjoro, du kamentubo-purigistoj.

— Kamentubo-purigistoj!?!... Kion ili povas havi por diri al mi?

— Mi ne scias, sinjoro; mi jam diris al ili, ke vi akceptos neniun en ĉi tiu momento, sed ili rifuzis foriri, pretendante, ke ili venas pro tre gravaj aferoj.

— Nu, enirigu ilin.

La kelnero eliris kaj tuj poste eniris la du kamentubo-purigistoj. Unu el la viroj estis eksterordinare longa kaj la alia eksterordinare mallonga. Tion oni multfoje vidas ĉe tiaj viroj, ĉar preskaŭ ĉiam kamentuba purigisto estas akompanata de knabo. Ĉi tiu mallonga viro tamen ne estis knabo, sed plenkreska viro. Estis klare videble, ke ili ankoraŭ ne estis laborintaj tiun matenon, ĉar iliaj vestoj estis blankaj kaj puraj kiel neĝo. Kapuĉoj kovris iliajn kapojn, ŝnurvolvaĵoj pendis sur iliaj brakoj kaj malplena sako pendis sur ilia dorso.

Neesprimebla estis mia surprizo rekonii en la du nove-venintoj miajn amikojn Johano kaj Ivan. Iliaflanke ilia surprizo ne estis pli malgranda ol la mia. La longa maristo (nun purigisto de kamentuboj), kiam li eniris kun sia malgranda kolego-purigisto, unue sin prezentis al ni kun sia kutima rideto sur la lipoj, kiu tamen subite malaperis por ŝanĝiĝi en esprimon de ĝojo. Ankaŭ la

vizaĝo de la ekskuiristo partoprenis tiun senton, kaj preskaŭ samtempe ili ekkriis:

— Jen nia knabo!!

— Johano!... Ivan! — mi ekkriis.

Mi iris al ili kaj premis al ambaŭ la manon.

La pianisto, kiu ankaŭ ekstaris ekkriante: Sinjoro Johano!... Ivan! — same premis al ambaŭ la manon. Tiam mi prezentis al la du neĝe blankaj kamentubopurigistoj mian amikon Maksimo, kiu pro nervemeco preskaŭ ne povis paroli. Li frotis al si la manojn kaj fine diris al Johano:

— Ĉu vi do estas tiu amiko de Jafet Romeskaŭ... kaj ĉu tiu via kolego vere estas la rusa kuiristo, kiu... kiu tiel bone zorgis pri...

Johano ekridis, dirante: — pri mia knabo, ke li perdiĝis meze de granda fremda urbo, kie neniu povis kompreni lin, ĉu ne vere? Sed feliĉe, ĉio fariĝis bona.

Ivan grimace ridetis, sed li diris nenion. Intertempe la violonĉelisto ekstaris kaj mi prezentis al li la novevenintojn.

— Jen nia amiko Moseo Landman, violonĉelisto — mi diris.

Johano rigardis lin kaj estis posten paŝonta pro nova surprizo, sed ĉar li devis doni la manon al Moseo, li restis staranta kaj rigardis unue la Brejanon, tiam la pianiston, fine min kaj diris:

— Sed, ĉu vi trioblīgiŝ!?

Ivan strabe rigardis al sia longa kunulo, altigis la montran fingron de sia dekstra mano kaj murmuretis tra la dentoj:

— Jen nova miraklo...

Mi respondis al Johano: — Mi ne miras pro via demando, ĉar vidante nin tri vi vere rajtas demandi tion. Sed ni eksidu ĉiuj kaj preparolu tiun mirindaĵon; eble vi povos doni klarigojn.

— Mi? — li diris, eksidante kun Ivan.

— Jes, ĉar vi sola scias, kie mi naskiĝis, kaj kiu estas mia vera nomo.

— Mi povas nur parte kontentigi vian deziron, mia amiko —, li diris, — ĉar pri via bapta nomo mi scias absolute nenion. Sur la Insulo oni vin nomis „knabo“; mi tamen scias, ke la nomo de via patro estas Smit kaj ke la insulo, kie ni tiel agrable konatiĝis, sin nomas Rottumeroog.

— Rottumeroog!?!... Kie do kuŝas tiu insulo?

— Norde de Warfum en la provinco Groningen.

— Sekve mi estas Holandano?

— Almenaŭ se tiuj insulanoj estas viaj gepatroj, pri kiomi tamen dubas —. Li ridetis mistere kaj estis parolanta plue, sed mi lin interrompis:

— Kial vi dubas pri tio?

Unue, ĉar ili tute ne kondukis al vi kiel gepatroj; due, ĉar vi tute ne estas simila nek je tiu viro, nek je tiu virino. Ili ambaŭ havas bluajn okulojn, verajn kvazaŭ porcelanajn germanajn okulojn kaj blondajn harojn... se mi bone memoras. Vi kontraŭe havas bluajn, preskaŭ nigrajn okulojn kaj samkolorajn harojn, due via vizaĝkoloro montras, ke vi ne apartenas al la germana raso; mi ĉiam konsideris vin kiel hungaron, aŭ, ne ofendiĝu, kiel turkon.

— Mi same ofte pensis, ke ili ne estas miaj gepatroj, sed, se ili vivas ankoraŭ, ni povos esplori tion ankoraŭ nun.

— Ni esploros —, li diris; tiam sin turnante al la violonĉelisto, li diris plue holande:

— Mi ekaŭdis, ke vi estas holandano, almenaŭ ke oni konsideras vin tia. Kie vi naskiĝis?

— Mi ne scias.

— Ĉu vi ne scias tion?

— Ne; mi estas trovito.

— Kie oni vin trovis?

— En kesteto sur tablo en dometo apud Brej.

— Apud Brej? — diris Johano. — Sed tio estas proksime de Warfum kaj sekve ankaŭ proksime de tiu insulo, kie mia amiko Jafet pasigis sian junecon.

Mi rigardis la Brejanon kaj diris:

— Sed tio fariĝas pli kaj pli stranga.

— Warfum kaj Brej!? — subite diris la pianisto, kiu komprenis nur tiujn du vortojn. — Warfum kaj Brej!?!... Vi jam antaŭe nomis tiujn vilaĝojn; mi unu fojon estis en Warfum kun nia cirko, mi estis tiam rajdisto.

Johano tradukis holanden, kion diris la pianisto, kaj jen Moseo ekhavis novan kaŭzon pro miro, ĉar li memoris la strangan rajdadon, per kiu li dum la kermeso (la leganto relegu la Kvaran Ĉapitron de la Dua Parto) surprizis ĉiujn rigardantojn en la cirko kaj eĉ sian patrinon, kvankam li mem ĉiam pretendis, ke li tute ne estis rajdinta. Tiu enigmo nun subite solviĝis. La cirka knabo, kiu estis tiel simila je li, tiam lin anstataŭis, dum la rigardantoj kredis, ke li sub hipnoto estas la lerta rajdanto.

— Ne ofendiĝu, Johano —, mi diris, — ĉu vi estas jam longe kamentubo-purigisto? Mi kredis vin riĉulo.

— Mi estas ankoraŭ nun riĉa —, diris Johano.

— Riĉa kaj purigisto de kamentuboj!?

— Mi estas riĉa laŭ filozofa vidpunkto, mia kara.

Ni rigardis lin demande.

— Ĉu vi ne komprenas tion? — li demandis.

— Tio devenas de tio, ke vi estas Orfeidoj, sed ne filozofoj. Sciu do, miaj amikoj, ke mi estas filozofo, ke mi ĉiam kaj ĉie rigardas ĉion el filizofaj vidpunktoj, ke mi ĉiam kuiras miajn pizojn...

— Same kiel tiam, kiam vi estis sur la Insulo —, mi interrompis lin.

— Jes, kaj mi kredas, ke ĉio fariĝos bona en la mondo... Nur paciencon, miaj amikoj, kaj vi spertos, ke mi pravos dirante, ke ĉio fariĝos bona. Ni estas jam sur la ĝusta vojo por esplori, ĉu vi estas fratoj, kie vi ĉiuj naskiĝis kaj kiuj estas viaj nomoj, ĉar venos tempo, kiam vi jam ne nomiĝos Jafet, Moseo kaj Stanislas.

Li eksilentis, kviete enpoŝigis la manojn, etendis antaŭ si la longajn kruojn, apogis la dorson kontraŭ la seĝa apogilo kaj rigardis nin ridetante.

Ivan refoje ĵetis al li straban rigardon kaj murmuretis tra la dentoj kelkajn rusajn vortojn, kiujn nur Maksimo kaj mi komprenis kaj kiuj surprizis nin, ĉar li murmuretis:

— Oni min dronigu, se li jam nun ne scias ĉion pri iliaj nomoj.

La pianisto interrompis la silenton, kiu sekvis; li sin turnis al la filozofo kun la demando:

— Filozofo tamen ne bezonas esti purigisto de kamentuboj.

— Kial ne? La mondo ja bezonas ilin kaj estas la sama, ĉu mi estas kamentubo-purigisto aŭ io alia.

— Vi eble pravas, sed... pardonu al mi la demandon:... Ĉu ne ekzistas por filozofo alia pli agrabla metio?

— Jes, tiu de promenanta reklamilo estas pli agrabla, sed Ivan ne ĝin amas; li prefere estas purigisto de kamentuboj, ĉu ne vere, Ivan?

La vireto ridetis grimace kaj respondis:

— Mi konsentas esti ĉio, nur ne promenanta aŭ rajdanta reklamilo, almenaŭ se mi devas prezenti Sanĉo Panzan.

Johano ridis kaj la pianisto diris plue:

— Aŭskultu foje, sinjoro Johano, vi pagis tiom, por ke mi povu fini mian studadon; reciproke mi nun estus feliĉa, se vi konsentus akcepti ion de mi, mi ja estas via ŝuldanto.

— Vi tamen ne prunteprenis de mi. Ni sekve estas kvitaj; krom tio, mi akceptos nenion, se mi mem povas perlabori mian ĉiutagan panon, . . . tia estas mia karaktero.

— Sed rakontu do fojon, kiel vi perdis vian monon, ĉar sendube vi jam ne posedas ĝin.

— Monon mi ne posedas plu, kaj mi ne deziras posedi ĝin. Sed mi kontentigos vian deziron —, kaj tenante la manojn en la poŝoj, la krurojn rekte etenditaj antaŭ si, kaj dum Ivan kelkfoje grimacidis kaj strabe rigardis al la longa filozofo, ĉi tiu ekrakontis:

— Vi devas scii, ke mi kiel filozofo ĉiam agas laŭ cirkonstancoj, kiuj ajn ili estas, kaj ke ĉiam mi kuiras miajn pizojn pensante, ke ĉiam ĉio finiĝos bone . . . Kiam mi posedis monon, mi vivis kiel granda sinjoro kaj pasigadis mian tempon promenante, legante kaj amuzante min. Kiam mi jam ne posedas monon, nu, tiam mi laboras. Mi jam estis aktoro, kelnero, maristo, reklamilo, frenezul-flegisto kaj tiel plu. Nun mi estas purigisto de kamentuboj kaj ĉiam, sub ĉiuj cirkonstancoj mi laboradis kontente kaj feliĉe . . . Estante reklamilo, mi hazarde (eble tio ne okazis hazarde, sed laŭ destino de la sorto) gajnis la grandan premion de la Scheveningena ekspozicio, kaj ĉar tiam Ivan estis mia kolego-reklamilo, ni duope eniris la mondon kiel eminentaj sinjoroj, por serĉi nian amiketon Jafet. La hazardo (aŭ eble la destino) volis tamen, ke ni ne trovis lin, sed lian duplikaton Stanislas Mareau, kiu tiam loĝis en Posen en nebonaj cirkonstancoj. Mia mono tamen ebligis al mi helpi lin, tiel ke li povis daŭrigi kaj fini sian studadon. Forirante el Posen, ni iris Patersburgon por serĉi Jafeton, sed ho ve! . . . li estis malaperinta, kaj kien ajn ni vojaĝis por lin trovi, ĉio estis vana. Ni pasigis kelkajn monatojn en multaj grandaj urboj en kaj ekster Rusujo. Ĉie ni informiĝis pri nia amiketo, ĉie mi portis mian belan

ĉenon, tiel ke ĉiuj nepre devus vidi ĝin, sed ĉio estis kaj restis senfrukta kaj sen rezultoj. Intertempe mia mono elspezigadis, ĝis kiam restis al mi ankoraŭ du mil guldenoj. Ivan, kiu komence sekvadis min volonte kaj akompanadis min ĉiuloken, fine eksopiris la maron kaj li forlasis min. Jen mi staris tute sola. Lia foriro tre ĉagrenis min, sed... mi kuiris miajn pizojn kaj luis ĉambreton en Berlino, kie mi volis resti tutan jaron, farante nenion krom promeni, legi kaj amuzi min... Post kiam mi estiĝis sola en Berlino dum du monatoj, jen subite iun belan vesperon Ivan revenis. Li konfesis al mi, ke li jam ne povus vivi sen mi.

Ivan grimace ridetis iom ĝenate, sed diris nenion kaj Johano parolis plue.

— Nu, mi akceptis lin kun ĝojo, kaj duope ni ekpromenis; mi legis al li belajn germanajn librojn, sed ĉar ni faris nenion krom promeni, legi kaj nin amuzi, restis al mi fine nur cent guldenoj. Tiam mi diris al mia kamarado, ke ni refoje devus laboradi, kaj mi demandis lin, kiun metion li elektus, ĉar al mi estis indiferente, kiamaniere perlabori mian ĉiutagan panon. Ivan preskaŭ samopiniis, ankaŭ al li plaĉas ĉiu metio (se li ne povus esti maristo) escepte tiu de reklamilo. Ni do elektis alian kaj sinsekve fariĝis kelnero, aktoro kaj tiel plu, ĝis fine ni revenis Hagon. Tie ni fariĝis unue flegistoj en frenezulejo, sed ĉar tio tre multe malbligis al ni promenadi, ni fariĝis purigistoj de kamen-tuboj, kaj nia laboro marŝas laŭ deziro. Regule Ivan sendas monon al sia patrujo kaj ni pasigas nian liberan tempon kelkfoje en legejo, kelkfoje en teatro aŭ en bioskopo, sed ĝis nun pro nia neriĉeco financa ni prenas lokojn la plej malmultekostajn, tamen, ĉar en realo estas egale sidi tie aŭ sur multekosta loko, ni ĉiam amuziĝas bonege. Hieraŭ okaze (aŭ eble laŭ aranĝo

de la sorto, pri tio mi ne volas disputi), ni iris purigi kelkajn kamentubojn, kiam subite kaj neatendite ni retrovis nian amikon Jafet, ĉar mi vidis lian nomon sur granda atišo anoncanta al la preterpasantoj, ke li, Jafet, Stanislas Mareau kaj Moseo Landman kunlaboros en koncerto de Kurhaŭs. Tuj kiam ni estis purigintaj niajn kamentubojn, ni iris al Kurhaŭs kaj eksciis, ke Jafet Romeskaŭ havas sian ĉambron en „La Sep Preĝejoj de Romo“. Ni decidis aliri ĉi tien kiel eble plej baldaŭ kaj jen anstataŭ Jafet kaj Stanislas ni trovis tri artistojn, kiuj laŭ sia eksterajo nepre estas fratoj. Restas nun al mi la tasko esplori, ĉu vi estas tiaj, kie vi naskiĝis kaj kiuj estas viaj gepatroj; sed ĉar ĉio finiĝos bone, mi sukcesos en mia esplorado.

Li eksilentis, rigardis sencele antaŭ sin kaj ĉar liaj okuloj falis sur la taglibron kuŝantan ankoraŭ antaŭ li, li diris plue:

— Unue ni trovu lertulon, kiu povas deĉifri ĉi tiun manuskripton.

Li ĝin malfermis. Subite esprimo de feliĉo kaj ĝojo glitis trans lian vizaĝon, liaj lipoj dispartiĝis, kiel ofte okazis, kiam neatendita ĝojo surprizas nin, kaj rigardante nin laŭvice, li ekkriis: — Eŭreka!!

— Eŭreka!?! — ni diris demande.

— Jes, li respondis, Eŭreka!... tio signifas: „Mi trovis!“

— Kion vi trovis? — mi demandis.

— La ŝlosilon, per kiu mi eble povos malfermi la pordon de la misteraĵo, kiu entenas la nomojn de via naskiĝloko kaj la nomojn de viaj gepatroj.

Ivan refoje altigis la montrofingron kaj diris ruse:

— Jen nova miraklo..., oni dronigu min, se li ne estas sanktulo aŭ magiisto.

Johano, kiu ne komprenis la rusan lingvon, ne atentis la esprimon de la ekskuiristo kaj diris plue:

— Ĉi tiu taglibro estas skribita en la artefarita lingvo Esperanto.

— Esperanto!? — mi ekkriis; — kaj vi studadis tiun lingvon?

— Kompreneble mi ĝin studadis; eĉ Leibniz, kiu estis granda filozofo, sin okupadis pri la ideo de artefarita lingvo... La aŭtoro de Esperanto estas Zamenhof, kaj lia lingvo aperis en 1887^a; sendube la verkinto de ĉi tiu taglibro studadis Esperanton kelkajn monatojn post ĝia apero.

Johano foliumis la kajeron, Maksimo Bjelski denove frotadis al si la manojn kaj la pianisto, la violonĉelisto kaj mi atendis kun malpacienco, kion estis legonta tiu mistera purigisto de kamentuboj, kiu kvazaŭ bona feo ĉiam aperis sur niaj vojoj, kaj kiu nun eble malkovrus al ni la sekreton, kiu ĝis nun al ni estis nesolvebla. Li eklegis kaj tradukis holanden kaj germanen tiujn frazojn, kiuj por ĉi tiu tempo pleje nin interesis. Multaj el tiuj frazoj estis substrekitaj de la aŭtorino. — — — —

Belgrado, 18^{an} de Marto 1889^a — Estas hodiaŭ mia 14^a naskiĝa tago, kaj mia guvernistino donacis al mi ĉi tiun taglibron, por ke mi enskribu ĉiujn okazontajn specialecojn de mia vivo. La guvernistino konsilis al mi redakti mian taglibron en Esperanto. Tiun lingvon ŝi instruas al mi. Kion mi enskribos hodiaŭ?... Ni havos vizitantojn, kiuj venos por gratuli. — — — —

Belgrado, 30^{an} de Marto 1890^a — Mi ĵus venis de koncerto, kie la violonĉelisto Kóvacs solludis. Lia ludado estis admirinda. — — — —

— Kóvacs!?! — ekkriis la Brejano. — Rikardo Kóvacs estis mia muzikinstruisto, kiu loĝis kelkajn jarojn ĉe mia adoptintino. Ĉu tiu Kóvacs, kiu estis fama violonĉelisto, estus tiu sama Kóvacs, pri kiu vi legis?

— Ĉi tie staras Kóvacs, sen antaŭa nomo —. Johano legis plue:

— — — estis admirinda. Lia ludado venkis (kiel diris mia patrino) la korojn de la tuta aŭdantaro, li ne nur per sia arto, sed ankaŭ per sia aspekto impresis ĉiujn, ĉar neniam oni vidis pli belan junan homon. — — — — —

Belgrado, la 15^{an} de Aprilo 1890^a — Hodiaŭ vizitis nin Andanoviĉ. Li multe parolis kun mia guvernistino. Patrino diris, ke li enamigis en ŝin, sed tion mi ne kredas, ĉar ŝi estas malbela kaj nur guvernistino, dum li estas oficiro — —

Johano rapide transrigardis kelkajn paĝojn, sed trovis nenion interesan kaj nenion substrekitan, fine li legis plue:

Belgrado, la 1^{an} de Marto 1892^a — Kóvacs refoje solludis antaŭ multnombra aŭdantaro. Lia ludado fariĝis ankoraŭ pli bela laŭ mia opinio. Mi ek-aŭdis, ke li intencas ludi ĉi tie ĉiun jaron almenaŭ dufoje — — — — —

Belgrado, la 1^{an} de Decembro 1892^a — Hanoviĉ edzigis hodiaŭ kun mia kuzino Albertino. Mi ĉeestis la ceremonion. Mia patrino diris, ke Albertino tute ne amas Hanoviĉon, sed ke ŝi edziniĝis kun li pro lia granda riĉeco. Mi edziniĝos nur kun viro, kiun mi amos — — — — —

Belgrado, la 30^{an} de Marto 1893^a —
Hanoviĉ vizitis nin hodiaŭ. Li aspektis
tre malĝoja. Patrino diris, ke lia edzino
forkuris kun hungara oficiro — — —

Belgrado, la 2^{an} de Marto 1894^a —
Kóvacs refoje solludis. Mi admiris lin
pli ol antaŭe. Mi kredas, ke ĉiuj junaj
knabinoj enamiĝis en lin. Neniam sollud-
isto havis tian sukceson. Mi sidis tuj
apud la scenejo. Li rigardis min kaj
ridetis al mi. Ĉu mi estas pli bela ol la
aliaj fraŭlinoj, kiuj sidis ĉe mi? — — —

Belgrado, la 4^{an} de Decembro 1894^a —
Miaj gepatroj revenis de vojaĝo. Ili
multe parolis pri Hanoviĉ kaj nia kuzino
Albertino, kiuj baldaŭ eksedziĝos pro
ŝia forkuro kun la hungara oficiro. Kial
do ŝi edziniĝis kun viro, kiun ŝi neniam
amis? — — —

Belgrado, la 3^{an} de Marto 1895^a —
Kóvacs revenis en la urbon. Mi iros al
la koncerto. Ĉu li min rekonos? — — —

Belgrado, la 4^{an} de Marto 1895^a —
Kóvacs refoje solludis. Mia patro konat-
iĝis kun li, eble li nin vizitos. — — —

Belgrado, la 6^{an} de Marto 1895^a —
Kóvacs vizitis nin hodiaŭ. Ni pasigis
agrablan vesperon. Li parolis multe
kun mi. — — —

Belgrado, la 7^{an} de Marto 1895^a — Mi
sonĝis pri Kóvacs. Mi lin amas. Ho, kial
mi estas nobelidino? — — —

Belgrado, la 9^{an} de Marto 1895^a —
Kóvacs refoje nin vizitis. Mi kredas,

ke li venis pro mi. Mia patrino riproĉis min, ĉar mi tro multe okupis min pri violonĉelisto. — — — — —

Belgrado, la 12^{an} de Marto 1895^a — Mi ricevis leteron de Kóvacs. Li deziras paroli kun mi kaj petas rendevuon. Mi respondas lian peton. — — — — —

Belgrado, la 14^{an} de Marto 1895^a — Mi parolis kun Kóvacs; li konfesis al mi sian amon. Miaj gepatroj ne konsentos, ke ilia filino fianĉiĝos kun artisto. — —

Belgrado, la 16^{an} de Marto 1895^a — Kóvacs refoje vizitis nin. Li petis mian manon, sed ricevis rifuzan respondon de mia patro. — — — — —

Belgrado, la 30^{an} de Marto 1895^a — Mi forkuros morgaŭ kun Kóvacs kaj ni geedziĝos sekrete en la preĝejo. — — —

Parizo, la 2^{an} de Februaro 1896^a — Al ni naskiĝis tri filoj (trinaskitoj). Iliaj nomoj estas: David, Hugo kaj Stanislas.

Johano ekhaltis legi dirante: — Jen ni havas!... Vi estos tiuj tri knabetoj. Pri Stanislas jam ne ekzistas ia dubo... Mi legos plue:

— — Ili estas tre belaj kaj sanaj... Mi sentas min bone; ni estas feliĉegaj kun nia triobla trezoro — — — — —

Parizo, la 10^{an} de Februaro 1896^a — Kóvacs donis koncerton en la granda opera teatro kaj havis grandegan sukceson. Li perlaboras multan monon.
— — — — —

Parizo, la 20^{an} de Februaro 1896^a — Mi skribis leteron al miaj gepatroj pri la naskiĝo de niaj infanoj. — Kóvacs refoje donis koncerton kun ĉiam pli-grandiganta sukceso — — — — —

Parizo, la 1^{an} de Marto 1896^a — Miaj gepatroj ne respondis ankoraŭ. Ili neniam pardonos al mi mian mezaliancon, kiun mi tamen ne bedaŭras, ĉar mi amas mian edzon kaj ni estas feliĉaj. —

Parizo, la 3^{an} de Aprilo 1896^a — Kóvacs malaperis kun du el la trinaskitoj kaj lasis min kun Stanislas. — — — — —

Parizo, la 4^{an} de Majo 1896^a — Mi estas malesperanta. Mia edzo ne revenis. — Kien li iris? — Kialli min forlasis? — Ĉu li foriris kun amatino? — Ho, tion mi neniam kredos. — La gazetoj lokigis artikolojn pri tiu misterplena malapero.

Parizo, la 10^{an} de Majo 1896^a — Kóvacs ankoraŭ ne revenis. Mi ne kuraĝas reveni al miaj gepatroj — — —; feliĉe ke Kóvacs postlasis multe da mono. — Mi ekdecidis resti ankoraŭ unu semajnon en Parizo; eble li revenos al mi. — — —

Parizo, la 30^{an} de Majo 1896^a — Ĉiuj gazetoj preparolis la subitan malaperon de mia edzo. Kelkaj opinias, ke li forkuris kun amatino, aliaj kontraŭdiras tion, opiniante, ke en tia okazo li ne estus preninta kun si la du infanetojn, kaj ili profundigas en ĉiujn supozojn. Tamen Kóvacs ne reaperas, kaj mi ne volas resti pli longe en ĉi tiu urbo. — — —

Vieno, la 1^{an} de Junio 1896^a — Hieraŭ mi alvenis en Vieno. Mi ne scias ankoraŭ kion fari. En multaj gazetoj mi lokigis anoncon pri la malapero de Kóvacs. Mi promesis grandan rekompencan al tiu, kiu ajn povos doni informojn pri li kaj la du infanoj. — — —

Vieno, la 6^{an} de Junio 1898^a — Alvenis al mi Jules Mareau, cirka direktoro. Li legis la anoncon kaj volas helpi al mi trovi mian edzon. Li proponis, ke mi lin sekvu kun lia cirko, per kiu li volas fari grandan vojaĝon al multaj urboj. — Mi ekhavis apartan veturilon kun unu servistino, kiu kunlaboras en la cirko kiel pantomimistino. Mi promesis grandan monsumon al Mareau, se li retrovos mian edzon. — — — — —

Hamburgo, la 3^{an} de Septembro 1899^a — Mi jam ne posedas monon kaj estas dependa de Mareau. Ŝajnas al mi, ke li estas malhonestulo kaj (ho ve!) ke li min amas, sed mi tute ne lin amas... Ho, se mia edzo revenus! — — — — —

Lubek, la 8^{an} de Decembro 1901^a — Ĉiuj miaj espero estis vanaj; mia edzo ne reaperis. Mareau petis mian manon. Post alvoko en gazetoj li volas antaŭ la tribunalo pruvi, ke Kóvacs mortis... Mi malamas la cirko-direktoron kaj malakceptis liajn proponojn. — Ho, se mi do kuraĝus reiri al miaj gepatroj, sed ili ne akceptos min. — — — — —

Prago, la 3^{an} de Junio 1902^a — Miestas malsana... Kio fariĝos el mia fileto, se mi mortos? Ĉu Mareau zorgos por li? —

Prago, la 20^{an} de Junio 1902^a — Misentas, ke mi ne resaniĝos. Mareau promesis, ke li zorgos por Stanislas. — — — —

Johano ekhaltis legadi kaj diris:

— Nun ni scias, ke la patrino de Stanislas naskiĝis la 18^{an} de Marto 1875^a, ke ŝi edziniĝis kun Kóvacs en Marto 1895^a, ke naskiĝis al ŝi tri filoj la 2^{an} de Februaro 1896^a, ke Kóvacs malaperis la 3^{an} de Aprilo 1896^a kun David kaj Hugo, kaj ke la patrino malsaniĝis en 1902^a. Per la lasta sciigo la taglibro finiĝas. Verŝajne ŝi mortis tuj poste. Restas al ni scii, kun kiu viro, sin nomanta Kóvacs, edziniĝis via patrino kaj kiel ŝi sin nomas, ĉar ŝian nomon mi ne trovis en la taglibro. Por tion sciigi, ni povas nin letere turni al la pastro de l'preĝejo de Belgrado.

— Sed kiu faros tion, kaj al kiu pastro ni devos turni nin? — mi demanĝis.

Johano kviete kaj ridetante eltiris el la poŝo libreton kaj respondis:

— Mi tuj diros tion.

Johano, kiu kiel praktika esperantisto portis kun si ĉiuloken la „Oficialan jarlibron de la Universala Esperanto-Asocio“, serĉis en la libreto la urbon Belgrado kaj vidis, ke la tiea delegito estas Drag. Andoviviĉ, inĝeniero, 23 Brankova; tiam li diris plue:

— Nun lasu al mi la ceteran arangadon kaj la korespondadon pri ĉiuj tiuj familiaj aferoj kaj ĉio finiĝos bone —. Tiam pripensante momenton, li diris:

— Post kiam mi estos forsendinta mian leteron al Belgrado, ni iros kune al Brej, kaj se necese, al tiu

Insuleto por serĉi la pruvojn, ke vi estas fratoj —. Li sin turnis tiam al la violonĉelisto kaj demandis:

— Kiam estos la plej konvena tago por iri al Brej?

— Tio estas tute egala —, diris la Brejano, — ĉar mia patrino kaj la pastro ĉiam estas hejme, kaj ĉiun horon de la tago ili povas akcepti nin.

— Ĉu pastro?

— Jes, li ordigis la aferojn de la mortinta Kóvacs.

— Nu, kiam ni iros?

La Brejano rigardis min demande, kaj mi respondis:

— Estas nun la deka de l'monato, la tutan semajnon ni devos doni koncerton; ni do ne povas iri antaŭ la dek-oka kaj mi proponas elekti la dek-okan por nia vojaĝo.

Johano ekstaris, frapetis Ivanon sur la ŝultron kaj diris:

— Antaŭen, amiko; niaj kamentuboj nin atendas.

Mi ekstaris ankaŭ kaj diris:

— Johano, ĉu vi volas fari al mi plezuron?

— Kompreneble, mia amiko, nur parolu.

— Restu provizore mia gasto kaj jam neniam purigu kamentubojn.

— Kaj Ivan?

— Kia malsaĝa demando! Li restu ankaŭ ĉe ni.

Kvara Ĉapitro.

La ŝlosiloj — Subita forvojaĝo de Johano al...? kaj lia reveno kun interesa sciigo — Ĉu Kóvacs vere mortis? — Pri frenezulejo kaj flegatoj — Holman — Johano, la eksflegisto faras proponon al la resanigisto de frenezulejo — Refoje la Kol Nidrej de Max Bruch kaj kion ĝi efikas — Vekiĝo el stranga longdaŭra sonĝo — Patro kaj filoj.

Johano kaj Ivan tiamaniere fariĝis miaj gastoj. Ili ekhavis apartan ĉambron en „la Sep Preĝejoj de Romo“, manĝis kun ni ĉe la sama tablo kaj ĉeestis ĉiujn koncertojn, kiujn ni donis en Kurhaŭs.

La tagon, post kiam Johano nin trovis, li alportis kaj donis al ĉiu el ni dum la tagmanĝado malgrandan libron. Ili estis ŝlosiloj por studadi Esperanton; la mia estis en la rusa, tiu de Moseo Landman en la holanda kaj tiu de Stanislas Mareau en la pola lingvo.

— Studadu la ŝlosilon —, li diris, — kaj post unu semajno vi jam ne bezonos tradukanton dum via interparolado. Mi eĉ post tiu semajno rakontos al vi en Esperanto novaĵon, kiu tre vin surprizos —, kaj li ridetis tiel mistere, ke ni jam ne dubis pri liaj vortoj.

Kvar tagoj pasis, kaj kiam en la kvina ni kunvenis ĉe la matenmanĝado, ni trovis sur la tablo leteron de Johano, sciiganta, ke li dum du aŭ tri tagoj (tio dependus de cirkonstancoj) ne havos la plezuron manĝi kun ni, kaj ke li dum tiuj tagoj ne povus ĉeesti la koncertojn en Kurhaŭs, ĉar li nepre devos forlasi la urbon pro urgaj aferoj. Post tiuj du aŭ tri tagoj li esperis

reveni kun bona novaĵo. Ni rigardis nin kun surprizo. Kien li vojaĝis tiel subite kaj tiel mistere? Ni kun senpacienco atendis, kaj revenante el Scheveningen la duan tagon post nia meztaga koncerto, nia filozofo subite staris antaŭ ni sur la sojlo de nia ĉambro, kiun ni estis enirontaj. Ridetante li donis al ni la manon kaj per teatra gesto montris la neokupitajn seĝojn ĉirkaŭ la tablo en nia ĉambro. Maksimo Bjelski, kiu ne estis ĉeestinta la lastan koncerton kaj sidis leganta kaj atendanta nian revenon, ekstaris, sed pro nervemeco tiel frotadis al si la manojn (li ne estis farinta tion dum kelkaj tagoj, sed la atendota novaĵo refaligis lin en lian iaman kutimon), ke li tute malzorgis etendi al ni unu el ili por deziri al ni sian kutiman: „Estu bonvenaj, miaj amikoj!“

Ni eksidis, kaj Johano, daŭre ridetante, diris en Esperanto, por ke ni ĉiuj povu lin kompreni en la sama tempo:

— Miaj karaj, kiam mi promesis al vi, ke mi post unu aŭ du tagoj revenus kun bona novaĵo, tiam mi estis certa, ke mi plenumus mian promeson, ĉar mi antaŭvidis, ke mia vojaĝo al Brej portus fruktojn. Mi tien iris sola por serĉi la postsignojn de viro, kiu interesas vin en la plej alta grado. Mi vizitis la maljunan pastron kaj Rikan, la mutulinon, kaj mi trovis tion ĉi.

Dirinte tiujn vortojn, li eltiris paperujon el la poŝo, elprenis el ĝi portreton, kiun li ĵetis antaŭ ni sur la tablon:

— Jen!

Ni rigardis unue la portreton, tiam nin reciproke.

— Portreto de mia onklo, aŭ pli ĝuste: de K ó v a c s —, diris Moseo.

— Jes, diris Johano, ridetante mistere, — ĝi estas la portreto de K ó v a c s,

Sekvis mallonga silento, tiam li diris plue:

— Mi tuj vin kondukos al Kóvacs, sed nur vin —. Li fingre montris Moseon, Jafeton kaj min. — Ĉar Ivan kaj sinjoro Bjelski ne povos nin akompani en ĉi tiu cirkonstanco. Ili bonvolos resti en la hotelo, ĝis kiam ni revenos —. Tiam sin turnante al Moseo, li diris plue:

— Vi kunportu la violonĉelon.

— Ĉu vi kondukos nin al Kóvacs!? — ekkriis Moseo. Kóvacs ja mortis.

— Li mortis kaj tamen li vivas; sekvu min.

Ni ne sciis, kion li intencas, sed li ne lasis al ni la tempon peti klarigon, ĉar li jam eliris la ĉambron. Ni lin sekvis, ne sciante, ĉu li perdis la prudenton, aŭ ĉu li estas mokonta nin. Ni laŭiris la longan Wagenstraton, tiam iris maldekstren laŭ la Vlamingstrato, poste laŭ kelkaj aliaj mallongaj stratetoj, alvenis fine en Slykeinde, kie nia kondukanto ekhaltis antaŭ griza konstruaĵo, kies fenestroj estis provizitaj de dikaj feraj stangoj.

— Ĉu tio estas malliberejo? — flustris al mi Moseo.

— Ĝi estas frenezulejo —, respondis Johano, kiu estis aŭdinta la demandon de la Brejano.

— Ĉu ni devas eniri ĝin? — mi demandis kun surprizo.

— Jes —, respondis lakone Johano, kaj li sonorigis.

— Ĉu Kóvacs estas en ĉi tiu konstruaĵo!? — mi diris.

— Mi nun ne havas la tempon doni klarigojn; havu paciencon dum nur duona horo kaj vi komprenos ĉion.

La pordo malfermiĝis, kaj en ĝia kadro staris pordisto. Apenaŭ li ekvidis Johanon, li ekkriis:

— Kara ĉielo, jen nia eksflegisto —, kaj ili premis al si reciproke la manon.

— Jes, tio estas mi kun tri amikoj. Ĉu la doktoro jam alvenis?

— Ne ankoraŭ, sed li estas tuj venonta.

— Mi deziras paroli al li, ĉu ni povas atendi en la atendejo?

— Certe, eniru, mi petas.

Ni sekvis la pordiston tra longa marmora koridoro, ĉe kies ambaŭ flankoj troviĝis multaj pordoj, surhavantaj numerojn. Malfermite la numeron dek, li eniris nin. Ni eksidis sur longa benko kaj atendis tion, kio okazus. Multaj strangaj pensoj eniris mian kapon, ĉar mi ne sciis, kion pensi pri ĉio tio ĉi. La onklo de Moseo ja mortis kaj ripozis sur la mortintejo en Brej, kion do ni povus havi por fari en ĉi tiu frenezulejo? Neordinaraj sonoj aŭdiĝis de malproksime; krioj kvazaŭ de sovaĝaj bestoj, tirtonaj ridadoj, kaj eĉ kantadoj de la malfeliĉaj flegatoj konfuzo penetris ĝis la loko, kie ni atendis. Fine la pordo malfermiĝis kaj eniris la doktoro. Li ridetis afable, kiam li ekvidis Johanon. Strange! Ŝajnis refoje al mi, ke ĉiuj homoj, kiuj lin renkontis, estas liaj intimaj amikoj, kaj ke ĉiuj ĉiam iras renkonte al li kun ridetanta vizaĝo.

— Doktoro —, diris Johano, — mi venas kun tri amikoj, kiuj sin interesadas pri Holman.

— Ah!

— Jes —, kaj prezentante nin, li diris: Sinjoroj Landman, Mareau kaj Romeskaŭ. Ili havas, kiel vi aŭdas, tre malsamajn nomojn, sed eble vi vidas ion rimarkindan, rigardante ilin.

La doktoro rigardis nin kaj la esprimo de lia vizaĝo tuj diris, kiel li estis frapata de surprizo.

— Trinaskitoj?

— Vi trafis, doktoro, kaj al kiu ili estas similaj?

— Al Holman, sen kontraŭdiro.

— Vi trafis refoje, doktoro; ili estas tre similaj al Holman Kiel nun sanas Holman? — li demandis

rapide, kvazaŭ por eviti demandojn de la doktoro, kiu rigardis nin kun ĉiam pligrandiganta surprizo.

La doktoro responde altigis la ŝultrojn, kaj oni scias, kion tio signifas.

— Li memoras absolute nenion —, li tiam diris.

Mi tion atendis —, diris Johano, — mi flegadis lin sufiĉe longe por scii, ke mi devas tion atendi; tamen li estas resanigebla, mi opinias... Ne estas nun vizita horo, sed vi ja permesos, ke ni iru al li.

La doktoro sen dubo estus rifuzinta tion al kiu ajn, ĉar li ne volonte deflankiĝis de la regularo de la instituto. Sed Johano ne estis „kiu ajn“; li estis viro kun speciala karaktero, li estis tute alia ol ĉiuj ceteraj homoj; al Johano neniu rifuzis, kion li petis, kaj ankaŭ la doktoro ne povis rifuzi; li tamen pripensis momenton antaŭ ol diri:

— Nu, mi plenumos vian deziron.

— Dankon; ĉu ni povos vidi lin en via oficejo?

— Ĉu ne en la granda salono de la vizitantoj?

— Prefere en via oficejo, vi vidos kial.

— Nu do, sekvu min tien.

Ni laŭiris la marmoran koridoron kaj eniris en salonegon, kiun ni devis tute trairi por atingi la oficejon de la doktoro. Ni iris laŭlonge de du vicoj de litoj. Sur ĉiu kuŝis aŭ sidis malsana frenezulo. Estis la unua fojo en mia vivo, ke mi vizitis tian salanon, kaj neniam mi forgesos la impreson, kiun al mi faris la malfeliĉaj frenezuloj. Kvankam ni marŝis sufiĉe rapide, min trafis tuj la rigardoj de kelkaj flegatoj. Unu el ili laŭte ekridegis, sed lia ridado ŝajnis raukaj krioj de sovaĝa bruto. Dua malsanulo sidis kun papera sako plena je prunoj, kiujn antaŭe al li estis doninta vizitanto, eble filo aŭ alia parenco, kaj li manĝegis tiel manĝavide, ke li englutis eĉ la kernojn. Triaj disputadis laŭte kun sia naj-

baro, kiun li minacis per la pugnigita mano. Kvara (juna knabo kun pala vizaĝo kaj ruĝetaj haroj) ploradis, eligante ĝemkriojn, sed larmojn li ne faligis. Kvina ekkriis al ni „Oni ne volas min enterigi, oni ne volas min enterigi!!” — Alia interparolis kun imagebla persono, li rigardis daŭre al la plafono de la salonego kaj faris strangajn gestojn per ambaŭ manoj. Alia kantis melodion el opero. Alia estis elironta sian liton, kaj flegisto nur kun peno lin retenis. Alia flutis, balancante la kapon kaj movante la montrofingron tien kaj reen laŭ la takto de la melodio, kiun li flutis. Alia fikse rigardadis antaŭ sin kaj sidis kvazaŭ li estus ŝtoniĝinta. Mi ĝojis, kiam fine la pordo de la salonego fermiĝis post ni. Ni nun estis en la oficejo de la doktoro. La pensado tuj vidi Kóvacson, tiel okupadis min, ke mi tute ne atentis, kiel la oficejo aspektis; mi memoras nur, ke en angulo staris granda faldebla ŝirmilo, tiel granda kaj alta, ke kvin personoj povus stari post ĝi ne estante vidataj. Johano montris tiun ŝirmilon dirante: — Tion mi bezonas —, kaj li forŝovis ĝin antaŭ angulon de la oficejo, tiel ke la apartigita loko formis malluman triangulan ĉambreton, enireblan laŭ unu flanko de la ŝirmilo. Tiam li lokis seĝon en la apartigitan ĉambreton kaj diris al Moseo:

— Eksidu tie kaj pretiĝu por ludi sur via violonĉelo. Moseo obeis kaj Johano diris al la doktoro:

— Doktoro, mi petas: venigu Holmanon kaj sidigu lin ĉe la pordo, ni kvarope kaŝos nin post la ŝirmilo. Vi restu ĉe Holman. Tuj post kiam li estas sidanta, vi diru al li nur ĉi tiujn vortojn:

— Aŭskultu kaj rememoru!

La resanigisto kapskuante, kvazaŭ por montri, ke li rigardas la okazontajon kiel nuran malsaĝaĵon, eliris kaj ni starigis nin post la ŝirmilo.

— Atentu —, diris Johano al Moseo, — kiam mi flustros al vi: „ludu!“ tiam tuj ludu Kol Nidrej de Max Bruch.

Post kelkaj minutoj la doktoro revenis kun alia persono, kiun ni ne vidis pro la ŝirmilo.

— Eksidu, mia amiko —, diris la doktoro, kaj tuj poste li diris plue: — Nun aŭskultu kaj rememoru!

— Ludu! — flustris Johano.

Moseo ekludis. Kian impreson do povas fari bela muziko al preskaŭ ĉiuj homoj, eĉ al frenezuloj! La krioj el la apuda salonego, kiuj ĝis tiu momento seninterrompe penetris ĝis la plej multaj apartamentoj de la frenezulejo, iom post iom ĉesis. Estis, kvazaŭ la konstruaĵo subite fariĝis senhoma; oni aŭdis nur la ravajn triladojn de la violonĉelo. Kian efikon la „Kol Nidrej“ faris al la flegato sidanta ĉe la pordo de la oficejo, ni ne povis vidi, sed mi estis tiel scivola, ke mi jam ne povis regi min. Mi eltiris la oran pinglon el la kravato de mia taga ĉemizo kaj faris trueton en la ŝirmilo, sufiĉe grandan por vidi ĉion, kio okazis ĉe la alia flanko. Mi rigardis tra ĝi. Jen ĉe la pordo sidis griziginta viro kun longaj bukklaj haroj kaj lipharoj. Li sidis senmove kaj rigardis la ŝirmilon. Komence liaj trajtoj ŝajnis kvazaŭ skulptitaj el marmoro, ĉar eĉ la plej malgranda ŝanĝo ne estis rimarkebla sur ili. Iom post iom tamen la buŝo malfermiĝis, la dikaj grizaj brovoj tiriĝis supren kvazaŭ de surprizo kaj la manoj de la viro konvulsie premis la apogilojn de la seĝo; ŝajnis, ke li estas tuj salte levigonta. Li tamen ne leviĝis, sed aŭskultadis la muzikon. Dume Moseo ludis kaj ludis, ravante ĉiujn per sia instrumento..... Jen subite la grizulo palpis al si la frunton, liaj trajtoj ŝanĝiĝis pli kaj pli, lia tuta eksterajaĵo montris klare, ke io eksterordinara kaptis lian animon. Lia vizagaĵo diris: Mi ekmemoras tion..., mi ekmemoras tion.

Kaj Moseo ludadis plue... La flegato rigardis la doktoron; ŝajnis, kvazaŭ li estus demandonta ion, sed antaŭ ol la doktoro povis respondi aŭ demandi ion mem, subite Johano ekkris laŭtvoĉe:

— Kóvacs!!... Kóvacs!!

— Kóvacs?..... — flustris la grizulo, kaj li ekstaris, sed tuj refalis sur la seĝon.

— Kóvacs!..... Kóvacs!! — refoje ekkriis Johano.

— Kiu min vokas? — flustris germane la viro.

— Unu el viaj filoj! — respondis samlingve Johano.

— Filoj!?... — Denove li palpis al si la frunton, tiam li diris:

— Mia Dio!... Mi ekmemoras!... Mi ekmemoras!..... Sed kiel la knabo povas voki min?

— Tri knabojn vi havas!

— Mia Dio... jes... ili estas tri... Sed kio do estas ĉio tio ĉi?... Kie mi estas?... Ĉu mi songis?... Miaj infanoj ja estas...

— Ili estas tie ĉi,... Davido, Hugo kaj Stanislas!

— Jes, tiel ili sin nomas,... mi nun rememoras —. Kaj sin turnante al la doktoro staranta ĉe lia flanko, li diris plue:

— Sinjoro, klarigu do al mi... Kion signifas tio ĉi?... Kiu parolis al mi? Kion oni faris al mi?... Kie mi estas? kaj kiu vi estas?

Johano ŝovis flanken la ŝirmilon kaj diris:

— Vi estas en Hago, sinjoro Kóvacs kaj viaj filoj venis tien ĉi por iri kun vi de urbo al urbo por doni kun vi tiajn koncertojn, kiajn vi mem donis sola antaŭ multaj jaroj.

— Sed kie estas miaj infanoj, kaj kiel do ili povus... .

Li eksilentis subite, vidante nin. Io, li ne sciis kio, diris al li, ke ni estas tiuj infanoj, sed tiel li ne povis

prezenti ilin al si; li ja imagis, ke ili estas ankoraŭ suĉinfanoj kaj ne junaj homoj, ĉar pli ol dudek jaroj pasis al li kvazaŭ en unu sola nokto plena je misteraj, neklarigeblaj okazintaĵoj. Tiu nokto nun pasis kaj kun ĝi la mistera sonĝo. Antaŭ dudek jaroj li perdis sian memoron; li eĉ jam ne sciis, kiel li sin nomis, ke li havis edzinon kaj infanojn, sed aŭdante tiel subite la „Kol Nidreĵ“, kiun li tiel ofte ludis mem antaŭ la ravata publiko, tiam lia memoro vekigis iom post iom, kaj tuj post kiam li aŭdis sian forgesitan nomon kaj tiujn de la tri knaboj, tiam la nuboj, pezanta kiel densa vualo sur lia frunto, subite forŝoviĝis, kaj ĉio fariĝis al li klara. Sed nun alia misteraĵo sin prezentis al li. Kiel li venis tien ĉi? Per tremanta voĉo li turnis sin denove al la doktoro:

— Sinjoro, ĉu mi sonĝis ĉiujn tiujn jarojn?

La doktoro estis respondonta, sed Johano interrompis lin, dirante:

Sinjoro Kóvacs, mi klarigos ĉion al vi poste. Sciujam nun, ke vi perdis vian memoron en Parizo la 3^{an} de Aprilo 1896^a. Vi malaperis post tiu tago kun du el viaj filoj. De tiu tempo pasis du dek jaroj; vi estas nun en Hago, vi retrovis vian memoron kaj viajn infanojn, la ceteron vi sciigos baldaŭ.

Kóvacs malfermis la brakojn, ekkriante: — Miaj filoj!! — kaj ni ĵetis nin sur lian kolon.

— Kaj Madeleno? — li diris, post kiam li ĉirkaŭbrakis nin.

— Via edzino? — demandis Johano.

— Jes, kie ŝi estas?

— Ĉion, kio rilatas ŝin, vi sciigos post kelkaj tagoj.

La doktoro, kiu ĉeestis tiun neordinaran resaniĝon de unu el siaj flegatoj, staris kelkan tempon rigardante Johanon, kvazaŭ li ne kredus al siaj okuloj kaj oreloj; tiam li demandis subite:

— Sed Johano, . . . kiu en realo vi estas?.. Mi ĝis nun rigardis vin kiel ordinaran flegiston de malsanuloj, sed ŝajnas al mi

La ekflegisto sin klinis ĝis la oreloj de la resanigisto kaj flustris kelkajn al ni neaŭdeblajn vortojn, tiam li iris for, tute ne atendante, kiun efikon faris lia sciigo, kaj ni sekvis lin.

Kvina Ĉapitro.

Ĉi tiu ĉapitro enhavas la korespondadon, kiun inter si faris Kóvacs kaj Johano dum la du semajnoj, en kiuj al la resaniginto estis malpermesate akcepti vizitantojn, ĉar li devis resti sub observado de la doktoro, kiu deziris esplori, ĉu la resanigo estos daŭra, se en tiu tempo la flegato ne vidus slajn flojn. —

Estim-ata sinjor-o Kóvacs!

Mi send-as al vi tag-libr-o-n kaj tri libr-et-ojn. Post la stud-ad-o de unu el la libr-et-o-j (= ŝlos-il-o-j) ebl-e la ĉeĥ-a, ebl-e la hungar-a- aŭ la german-a, vi kapabl-os leg-i tio-n, kio okaz-is kun vi-a edz-in-o, ĉar la tag-libr-o-n ŝi skrib-is mem kaj en Esperant-o.

Se mi pov-os serv-i al vi, tiam sci-ig-u tio-n al mi, kaj mi est-os tuj je vi-a dispon-o.

Ne mir-u, ke mi skrib-as en Esperant-o; ali-a-j-n fremd-a-j-n lingv-o-j-n mi ja ne pov-as skrib-i, kvankam mi parol-as mal-mult-e german-e.

Respond-u, mi pet-as, german-e aŭ en Esperanto, nur tiu-j-n du lingv-o-j-n mi kapabl-as leg-i.

Kun salut-o-j, ankaŭ de vi-a-j fil-o-j, mi est-as: Vi-a sin-don-a

Johano.

Estimata sinjoro Johano!

Ricevis leteron kaj taglibron. Studadis ĉeĥan ŝlosilon kaj komprenis leteron. Estas al mi tre strange. Estas kiel viro, kiu dormis longan longan tempon kaj songis

strangan sonĝon. Rakontos kiel okazis — pardonu erarojn — ĉefa afero estas, ke vi kaj miaj filoj komprenas min. Memoras la trian de Aprilo 1896 a, ĉar estas kvazaŭ tio okazis hieraŭ. Donis koncerton en Parizo kaj havis grandan sukceson. Post koncerto mi iris al mia hotelo per veturilo. Havis strangan kapdoloron, tre teruran; apenaŭ povis pensi. Kapdoloro estis pli terura, kiam mi venis en hotelon. Mia edzino dormis en ĉambro kun la infanoj. Mi sidis ĉe ŝia lito — — kapdoloro ĉiam pli terura. Ĉambro turniĝis kun mi. Tiam viroj kun tranĉiloj, glavoj kaj ŝnuroj (ĉio estis tre stranga) subite sidis antaŭ mi. Ili volis ataki min. Mi kuris en angulon de la ĉambro. Ili rigardis min per sovaĝaj okuloj. Mi kriis, sed neniu aŭdis. Kuris en alian angulon de la ĉambro, sed la viroj sekvis min. Mi timis, ke ili volas rabi infanojn. Mi prenis du infanojn, enmetis ilin en kestetojn (estis tie tri kestetoj, ili utilis por gardi muzik-librojn dum vojaĝoj). Sur tablo ĉe la lito staris boteloj kun lakto, mi enmetis tiujn botelojn ĉe la infanoj kaj kuris el la ĉambro, sed la viroj kun glavoj kuris post mi. Eliris hotelon sur straton kaj kuris kaj kuris. Eniris fiakron kun la kestoj kaj diris al la fiakristo: Tuj al la stacidomo!! Kapdoloro pli terura ankoraŭ, stacidomo turniĝis kun mi, sed mi streĉis fortojn kaj pensojn. Volis aĉeti bileton por vagonaro por iri malproksimen. Mi tiel timis la virojn kun la glavoj, ke mi ne volis resti en Parizo. Mi timis, ke ili reirus kun mi al edzino por rabi la infanojn. Antaŭ mi staris sinjoro, kiu aĉetis bileton por Amsterdamo. Mi aĉetis aukaŭ bileton por tiu urbo, ĉar ĝi estis malproksima de Parizo. Mi pensis: tie la viroj ne povas persekuti min. En vagonaro mi fariĝis tiel dormema, ke mi timis ekdormi. Mi lokis la infanojn post mi. Estis vagonaro, kiu iris dum la nokto kaj preskaŭ sen haltoj al Amster-

damo. La vojaĝo estis terura; la viroj kun la tranĉiloj kuris ĉe la flanko de la vagonaro, sed ili ne eniris al mi, ĉar pordeto estis fermita. En la mateno mi alvenis Amsterdamon. La viroj estis for, sed mi timis. Ili revenos, mi diris al mi; mi vojaĝos pli malproksimen.

Mi rigardis karton sur perono por vidi, kiu urbo estas malproksima, kaj mi aĉetis bileton al Groningen. Post kelkaj horoj mi estis en tiu urbo, prenis novan bileton por ankoraŭ pli malproksima urbo aŭ vilaĝo; mi forgesis nomon. Dum la vojaĝo mia kapo turnis, tiel ke mi ne povis resti en vagonaro. Mia cerbo ŝajnis forflui el mia kapo. En vilaĝo mi eliris vagonaron kaj prenis la kestetojn sub brakojn kaj komencis marŝi. Mi ne sciis, kien mi devus iri, nek kion mi devus fari. Mi sentis, ke mia memoro forlasos min; mi iris al la vilaĝo kaj eniris arbareton ĉe malgranda vilaĝo (nomon mi ne scias). Mi kaŝis min en ligna dometo, kie estis kokoj kaj kokinoj. Mi manĝis ovojn, ĉar mi estis malsata. Infanoj ploris mallaŭte; mi donis lakton. Poste ili dormis. En la nokto mi timis, ke la viroj revenus. Mi forlasis lignan dometon kaj serĉis lokon por meti la infanojn. Mi trovis sole-starantan dometon kaj pensis: Loĝantoj dormas, mi metos kestetojn antaŭ la pordo. Kiam mi venis al la pordo, ĝi ne estis fermita. Mi eniris, la luno lumis en la ĉambron; mi aŭdis nenion kaj metis kesteton sur tablon, tiam alia infano komencis plori. Mi pensis: „li vekos loĝantojn de la dometo kaj kuris for kun tiu infano. Mi kuris al vilaĝo ne malproksima de tiu dometo por meti alian infaneton en alian domon, sed pordoj estis fermitaj kaj mi timis, ke la viroj kun la tranĉiloj revenus, se mi metus la kesteton antaŭ fermitan pordon. Mi sekve eliris la vilaĝon, sed ne sciis kien. Fine mi venis al digo. La luno lumis kaj mi vidis post tiu digo la maron. Serĉis lokon por kaŝi la kesteton. Ĉe la

digo kuŝis boato en kanaletoj iranta de la vilaĝo al la maro. Mi pensis: morgaŭ en la mateno la boatisto trovos la kesteton, se mi metos sub la velon, kiu kuŝis sur fundo de la boato. Mi tiam kaŝis la kesteton tie, kuris for kaj revenis en la vilaĝon kaj pensis: la infanetoj estas ekster danĝero. Mia kapdoloro estis ankoraŭ pli terura. Nebuloj ĉirkaŭis mian kapon; mi vidis tre malklare, kvankam la luno staris hele sur la ĉielo, kaj la timo perdi la memoron, revenis al mi, ĉar mi povis pensi nur kun multa peno. Mi ne scias precize, kio okazis poste. Ĉio estis en nebuloj, eĉ miaj pensoj. — Mi ne memoris plu, ke mi venis el Franclando, ne memoris plu, ke mia nomo estas Kóvacs, ke mi havas edzinon. Mi nur konfuzo memoris pri viroj kun tranĉiloj, glavoj kaj ŝnuroj, sed post kelka tempo ankaŭ ne pensis plu pri ili, nek pri la infanoj. La lasto, kion mi memoras, estas, ke mi iris sur strato; la suno lumis kaj estis varmega vetero. Multaj homoj staris ĉirkaŭ mi. Ili parolis, sed mi komprenis nenion. Tiam viro kun flavaj lipharoj kaj blua uniformo kun kupraj butonoj prenis mian brakon kaj kondukis min for... tre malproksimen... jen en domojn, jen en vagonaron, fine en grandan urbon, sed tion mi memoras nur tre malklare... Kiam la viro kun la uniformo fine estis for, mi kredis esti en ĉambro kaj en lito. Multaj litoj staris tie, ili turniĝis ĉirkaŭ la mia; la nubo, kiu pezis sur mia cerbo, fariĝis pli kaj pli peza kaj mi memoras nenion plu.

Tiam venis tiu longa (kaj tamen tre mallonga) nokto, plena je sonĝoj. Tiu nokto daŭris, ĝis kiam mi aŭdis „Kol Nidrej“, kaj poste mian propran nomon kaj la nomojn de miaj infanoj. Mia sonĝo estis finita, kaj mi trovis min ĉe la sinjoro, kiun mi ofte vidis en mia sonĝo, sed kiun mi neniam komprenis. Tiu sinjoro estis la doktoro de la frenezulejo. Mi sentis min subite tute

sana, sed ne sciis, ke tiu sonĝo estis sonĝo de dudek jaroj. Mi ekdormis Kóvacs kaj juna viro . . ., mi vekigis Holman kaj grizulo, kaj la infanoj subite estis junaj viroj . . . Dudek jaroj de mia vivo flugis for en unu sonĝa nokto, sed mi dankas Dion, ke tiu terura nokto pasis. Nur unu penso turmentas min nun: Ĉu mia edzino vivas? Ŝi ne venis kun vi. Mi petas: sciigu tion al mi, revenu baldaŭ kun la filoj kaj se eble kun mia Madeleno.

Vin atendas:

Kóvacs.

Kara sinjoro Kóvacs!

Oni diras, ke la stilo estas la homo. Ne kredu tamen, ke mi estas tia lakonulo, kia mia unua letero eble kredigis al vi. Ĉio dependas de cirkonstancoj kaj ankaŭ la stilo, kiun ni en multaj okazoj devas ŝanĝi en nia korespondado.

Mi sciis kaj pripensis pri tio, ke vi verŝajne ne studadis Esperanton, tial mi skribis, kiel mi devis skribi, nome ne laŭ mia propra stilo, sed tiamaniere, ke komencanta lernanto de Esperanto facile povus kompreni min. Mi vidis el via letero, ke vi plene min komprenis, kaj nun mi opinias, ke mi ĉi tiun fojon povas uzi mian ordinaran stilon, respondante vian leteron.

Mi ĝojas, ke vi sentas vin tute resaniĝinta, sed bedaŭras, ke ni devas atendi ankoraŭ plenan semajnon por persone kaj sesope gratuli vin, ĉar post tiu semajno mi venos kun viaj filoj kaj kun du amikoj por gratuli vin pro via resaniĝo. Intertempe studadu plue Esperanton, vi ĝin bezonos, ĉar pro la cirkonstancoj viaj filoj ne povas interparoli inter si, kaj eĉ neniu el ili povas paroli kun vi, ĉar ĉiuj parolas diferencon lingvon. Unu el niaj amikoj, nome Ivan, parolas ruse kaj tre malmulte germane, kaj la alia, kies nomo estas Bjelski, studadis multajn

lingvojn, tiel ke li ĝis nun estis nia tradukisto. Vi mem parolas ĉeĉe (neniu el ni komprenas tiun lingvon) kaj eble kelkajn germanajn vortojn, tiel ke vi povas imagi, ke nia okobla interparolado estus tia sama, kian oni aŭdis dum la konstruado de la Babela turego. Por eviti tion, ni ĉiuj studadis de post mallonga tempo unu solan internacian lingvon (Esperanto), tiun saman, kiun antaŭ pli ol dudek jaroj studadis via edzino. Pere de tiu artefarita lingvo ni do kune interbabilados sen ia peno. Tiu interparolado komenciĝos tuj post kiam ni kune venos por liberigi vin el via nuna „loĝejo“, kie vi paŝigis tiom da jaroj. Ni esperas, ke feliĉa tempo atendos vin, kaj mi ne dubas pri tio, ĉar viaj filoj, kiuj fariĝis veraj famaj artistoj, faros ĉion por plifeliĉigi vian estonton vivon. Pri via edzino mi skribos eble (tio dependas de cirkonstancoj) post du aŭ tri tagoj. Mi atendas leteron de „Esperanto-Delegito“ el Belgrado, (mi klarigos poste, kio estas tio) kaj espereble tiu letero ĵetos lumon sur la misteron (rilate al ŝia subita malapero), kiun mi ĝis nun ankoraŭ ne kapablis solvi. Mi tamen konscias, ke la malkvieteco, kiun vi sentas pro ŝi, estas granda, sed kondutu laŭ la proverbo: Kuiru viajn pizojn, kaj ĉio fariĝos bona.

Multajn salutojn de ni ĉiuj.

Via Johano.

P. S. Kiam unu el viaj filoj vin vidis, li kredis revidi mortinton, sed ĉar mortintoj ne povas reaperi el la tombo, li komprenis, ke la mortinto kaj vi devas esti du personoj, kiuj estis tre similaj unu al la alia. Eble tiu alia persono (nun jam mortinta kaj ripozanta sur la mortintejo de Brej) estis via frato. Sciigu al mi, ĉu vi havis fraton kaj kiel estis lia nomo.

Pri „Holman“ mi povas sciigi al vi, ke li estas ankoraŭ vivanta holanda fama violonĉelisto, kiu ofte donis

koncerton en Kurhaüs (Scheveningen, apud Hago). El la gestoj, kiujn vi dum via stranga malsano multfoje faris, oni vidis, ke ankaŭ vi estas violonĉelisto, kaj ĉar vi iom estas simila al tiu Holman laŭ via eksterajo kaj vizago, kaj ĉar neniu sciis vian veran nomon, vi ekhavis tiun de la holanda artisto.

Johano.

Estimata sinjoro Johano.

Mi legis vian leteron kun ĝojo. Via letero helpis al mi forpeli la tempon, ĉar mi deziras, ke la semajno jam estu pasinta. Longan tempon mi uzis por legi vian leteron, ĉar mi devas serĉi multajn vortojn. Jes, mia edzino studadis Esperanton; ŝi diris tion al mi, sed mi opiniis: Esperanto estas ja neuzebla lingvo kaj mi ne volis lerni ĝin. Nun mi spertas, ke mi eraris. Mi faras grandan penon lerni la tutan lingvon por paroli kun vi kaj kun la filoj kaj la amikoj. Montris la leteron al la doktoro; li ridis, sed ne kredis, ke mi povos paroli per tiu lingvo. Mi pensis: Ridu, sed mi studados. Mi legis kelkajn paĝojn de „taglibro“, sed enestas vortoj ne starantaj en ŝlosilo. Mi serĉos poste en pli dika vortlibro. Ĉu vi jam ricevis leteron pri mia edzino? Mi petas: Skribu pri tio. Mi sentas min ankoraŭ tre sana; memoro estas nun tre forta.

Jes, mi havas fraton, li estis, kiel mi, violonĉelisto. Lia nomo estas Rikardo. Kun ĉagreno mi legis en via dua letero, ke li mortis.

Multaj salutoj al vi, al filoj kaj al amikoj.

Kovács.

Post-skribo. Mi dankas, ĉar vi faris al mi plezuron kun via longa letero. En tria letero vi ne bezonas skribi la streketojn inter partoj de vortoj; mi jam scias legi sen la streketoj.

K.

Kara sinjoro Kóvacs.

Ni ĝojas, ke vi sanas tiel bonege kaj ke vi faris tiajn progresojn en Esperanto.

Hieraŭ mi ricevis la deziritan leteron de la Delegito el Belgrado. Mi estis petinta lin esplori por mi kiel estas la plenaj nomoj, la datoj kaj lokoj de naskiĝo de gesinjoroj Kóvacs, kiuj geedziĝis la 30^{an} de Marto 1895^a (laŭ la taglibro) en unu el la katolikaj preĝejoj de Belgrado. Mi petis tion, kiam mi ne estis konatiĝinta kun vi, alie ĝi estus ja superflua. La Delegito respondis al mi la jenan:

„Laŭ la edziĝolibro de la — — preĝejo geedziĝis en Belgrado la 31^{an} de Marto 1895^a:

Eduardo Kóvacs, naskita en Pisek, la 14^{an} de Januaro 1877^a kaj Amalia Sedláková, naskita en Belgrado, la 3^{an} de Junio 1875^a.

Tuj post la ricevo de tiu sciigo mi sendis duan leteron al tiu Delegito, petante informojn, ĉu en lia urbo loĝas ankoraŭ familio Sedláková kaj ĉu tiu familio povas doni novajon pri sia parencino Amalia, kiu malaperis el Belgrado la 31^{an} de Marto 1895^a.

Post semajno mi esperas ricevi la respondon.

Havu paciencon, mi antaŭvidas, ke ĉio fariĝos bona.
Salutojn de ni ĉiuj.

Johano.

Estimata Sinjoro Johano.

Mi dankas pro via lasta letero. Ĝi donis al mi esperon kaj kuraĝon. Dio volu, ke mi revidu mian Amalion.

Morgaŭ mi atendas vin; tiam mi povos foriri el tiu ĉi domo, la doktoro jam promesis.

Vin ĉiujn salutas:

Kóvacs.

Sesa Ĉapitro

Kion ni vidis sur „la Digo“ — Nia vojaĝo al „la Insulo“ kaj nia alveno tie — La sola domo kaj kiel ĉio aspektis tie post multaj jaroj — La loĝantoj de tiu domo — Pri hundo kaj svenanta virino — La reveno de la domestro — Kelkaj misteraĵoj klarigis — Koncerto sur la Insulo, al kiu ankaŭ bestoj partoprenis, el kiuj unu tamen devis esti forigata pro nedezirita partopreno — Kiel ni pasigis la nokton sur la Insulo.

Sesope ni staris sur la verda „Digo“ kaj rigardis la antaŭ ni sterniĝantan maron. Nur du ŝipetoj kun blankaj veloj sin montris sur la horizonto. Iom pli proksime ni distingis du insuletojn. La pli granda estis Borkum, apartenanta al Germanujo, la alia estis Rottumeroog, la insulo, kie mi pasigis la unuajn jarojn de mia vivo.

Neesprimebla emocio ekkaptis min, ĉar post tri aŭ kvar horoj mi metus la piedojn sur „la Havenon“, kaj kelkan momenton poste mi revidus mian domon, kiun mi antaŭ tiom da jaroj estis forlasinta kun mia fidela Jafet.

Mia emocio tiel premis mian koron, ke larmoj fluis sur miaj vangoj, kaj momenton mi devis deturni la okulojn.

Mi revidus fine mian Insulon, sed ĉu mi revidus mian patron (mi eble posedus nun du patrojn) kaj mian patrinon? (Mi eble posedus nun du). Ĉu ili (tiuj de la Insulo) vivus ankoraŭ? Ĉu ili min rekonus? Tiuj demandoj kaj multaj aliaj vole nevole plenigis mian kapon, kaj verŝajne mi estus restinta tie ankoraŭ multe pli longe sur „la Digo“, nur rigardante mian Insulon, se Johano ne estus farinta finon al ĉio tio ĉi.

— Antaŭen, mia kara! — li diris, — la boato nin atendas; estas la dua horo, post tri aŭ kvar ni trovos nin tie, (kaj li etendis la manon al la Insulo) kaj tiam vi povos rigardi ĝin ĝissate.

— Ankoraŭ momenteton mi volas rigardi „la Digo“ —, mi diris, kaj mi rigardis, miregante pro la granda diferenco inter „la Digo“, sur kiu mi estis staranta, kaj „la Digo“, kiun mi pli ol mil fojojn estis rigardinta de la Insulo. Ĉiam mi tiam imagis, ke ĝi estas bruna; mi nun vidis, ke miaj okuloj trompis min antaŭe, ĉar kien ajn mi direktis la rigardon, ĉie „la Digo“ estis verda, ĉar verda freŝa herbo, sur kiu sin paŝtis tie kaj tie ĉi aretoj da ŝafoj, kovris ĝin ĉe ambaŭ flankoj kaj sur la supro, kaj tiel malproksime, kiel miaj okuloj povis sekvi ĝin.

Mi turnis mian dorson al la maro kaj vidis la turojn de la vilaĝoj Warfum kaj Uskvert, tiujn samajn turojn, kiujn mi ĉiam rigardis kiel lumturojn.

Antaŭ mi kuŝis belaj herbejoj inter la multaj longfosetoj, donantaj al ili la formojn de kvadratoj, paralelogramoj kaj aliaj geometriaj figuroj, sur kiuj sin paŝtis bovinoj, bovoj, ĉevaloj kaj ŝafoj. Mirinde bela kaj pentrinda estis la panoramo sin etendanta tie antaŭ la piedo de „la Digo“, kaj miaj okuloj ne povis satiĝi admirante ĝin; sed denove Johano vokis min.

— Antaŭen! ni ne povas atendi pli longe.

Mi forviŝis la larmojn el miaj okuloj kaj sekvis Johanon, miajn fratojn, mian patron (strange, refoje min ekfrapis la ekpenso, ke mi eble posedus du patrojn), Ivanon kaj Maksimon Bjelski.

Kvin minutojn poste ni sidis en la boato, kiun ludonis al ni la kluzogardisto loĝanta apud „la Digo“ ĉe la kanaleteto.

Johano suprentiris la velon, Ivan ekkaptis la direktilon, kaj ni ekglitis inter la markiloj, inter tiuj samaj

markiloj, kiujn mi antaŭ tiom da jaroj tiel ofte rigardadis, sed de la alia flanko. Ili kuŝis, aŭ pli ĝuste dirite: staris laŭ du kurbaĵoj linioj, formantaj kvazaŭ gigantan falĉilon, kies ankoraŭ nevidebla pinto nun direktiĝis al la haveno de mia Insulo.

La vetero estis belega, la vento blovetis el la sudo, plenigante la velon, kaj jen ni glitadis sur la ondetoj.

Ĉi tiun fojon la boato ne trairis la limojn de la falĉilo (glitante inter du markiloj), kaj ni ne perdiĝis en la maro, ĉar lertaj manoj nun manovris velon kaj direktilon. Iom post iom „la Digo“ malaperis post ni, dum la Insulo fariĝis pli kaj pli granda, ĝis fine mi vidis „la Havenon“.

Ni parolis malmulte. Mi estis tro emociiĝinta por paroli. Mi sentis min kiel vagulo, kiu post multaj jaroj de foresto estis revenanta en sian patrujon, ĉar mia patrujo ja estis mia Insulo, kiun mi alproksimiĝis post foresto de dek-du jaroj; kaj dek-du jaroj, kvankam malmultaj ili estas, ŝajnas tamen multaj, kiam oni estas en sia juneco.

Mi pensis refoje pri la patro kaj la patrino, ĉu ili estus vivaj, ĉu li estus ankoraŭ tiu sama viro kiel antaŭe, ĉu li havus ankoraŭ tiujn samajn mentonharojn kiel nia kaprino, ĉu mia patrino portus^o ankoraŭ tiun blankan kufeton, ĉu ŝi rekonus min, kaj tiel plu. Mi ekpensis pri la papago; ĉu ĝi vivus ankoraŭ?... Eble ĝi vivus, ĉar papagoj povas ja fariĝi tre maljunaj. Ĉu ĝi dirus kiel antaŭe: „Go til fanen?“ kaj subite mi turnis min al Johano, demandante:

— Kion do signifas „Go til fanen“?

Li laŭte ekridis.

— Vi pensas pri via papago? — li respondis.

— Jes, kion do signifas tiuj strangaj vortoj?

— Iru alla diablo! — li diris, ridante ankoraŭ pli laŭte.

Mi memoris, ke mi diris tion saman al la doktoro de l'ŝipo, per kiu mi vojaĝis Rusujon, kaj mi jam ne miris, kial mia diraĵo estis kaŭzinta tiom da ridado je la maristoj.

Ni alproksimiĝis pli kaj pli al la Insulo. Aroj da marbirdoj ŝvebflugis super ni kaj ili eligis laŭtajn kriojn, Ĉu ili timis pro siaj ovoĵoj? Ili tamen ne bezonis timi, mi nun ne forprenus ilin el la nestoj.

La „Haveno“, kiu aspektis tute same kiel en la mateno, kiam mi elveliris el ĝi kun la boato de mia patro, estis nun tre proksima. Mia koro ekbategis...; tie, cent paŝojn pli malproksime staris la domo, kaj mi vidis ĝian tutan formon (ĝi similis je ŝtona kubo, ĉar pintan tegmenton ĝi neniam havis) aperantan de supre malsupren.

Ni albordigis, elsaltis el la boato kaj staris sur la Insulo. Mi jetis rigardon ĉirkaŭe; nenio sangiĝis, ĉio estis, kiel mi ĝin vidis lastfoje antaŭ dek-du jaroj. Estis al mi, kvazaŭ mi neniam estus forlasinta la Insulon kaj kvazaŭ la jaroj de mia foresto estus pasintaj kiel en sonĝo. Refoje ekregis min nepriskribebla emocio. Johano tion ekvidis kaj li diris:

— Vi timas, ke ili jam ne vivas, ĉu ne vere?

— Jes, la necerteco turmentas min.

— Kion ni faros? — li demandis. — Ĉu mi iros tien (li etendis la manon al la domo), aŭ ĉu vi preferas, ke ni iru kune?

— Ni iru duope —, mi respondis. — La aliaj ja povos atendi tie ĉi.

Ni iris duope laŭ ĉirkaŭvojo por eviti la fenestron, ĉar mi volis surprizi la gepatrojn, se ili vivus ankoraŭ.

Nenie mi vidis vivantojn, nek homojn nek kvarpiedulojn, kaj terura ektimo ekpemis mian koron. Ĉu la Insulo fariĝis senhoma kaj senbesta? Ni ĉirkaŭiris la domon kaj ekhaltis antaŭ la pordo. Ĝi estis nefermita kaj mi eniris.

Mi eniris singarde kiel ŝtelisto, kiu enŝteliĝas en ĉambron, kaj Johano sekvis min. La stalo estis sen bestoj, sed fojno kuŝis en la sama loko kiel antaŭe. Tio donis al mi kuragecon kaj esperon; la Insulo ne estis sen bestoj, sekve ankaŭ homoj devus vivi tie. La pordo de la ununura ĉambro estis fermita. Mi aŭskultis. Nenia bruo aŭdiĝis. Kun tremanta mano mi malfermis la pordon kaj rigardis internen. Unu sola rigardo sufiĉis por diri al mi, ke unu el „la gepatroj“ vivas, ĉar tuj trafis min la kabalaj figuroj el sablo, kiujn mia „patrino“ estis ŝutinta sur la plankon. Ŝi sekve loĝis ankoraŭ en la domo, sed ĉar mi ne vidis la longajn strekojn el bruna kraĉaĵo inter kaj tra la desegnaĵoj de mia „patrino“, mi ne estis certa, ĉu „ŝi“ vivas.

Mi eniris kaj post mi Johano, kiu fermis la pordon. Ridetante li rigardis ĉirkaŭ sin, montris la plankon, la bildojn pri Vilhelmo Tell, la portretojn sur la muro kaj flustris:

— Ili vivas, sed kie ili estas?

Mi eksidis kaj pripensis kvazaŭ en deliro.

— Jes, ambaŭ vivas —, mi diris, — nur rigardu tion! — kaj mi montris paron da botoj flanke de la pordo, kaj laŭte mi esploris.

Johano komprenis, kial mi ploras, kaj li lasis min fari.

— Sed „li“ ne estas sur la Insulo —, li diris post momento.

— Kial vi scias tion?

— La boato ja ne kuŝas en la haveno.

— Tion mi ne atentis, sed vi pravas, ĝi malestas. Li sendube iris hieraŭ vilaĝon, kaj eble revenos ĉi tiun vesperon. Sed kie do estas „ŝi“?

— Ŝi estas melkanta, la sitelo ne staras sur sia ordinara loko.

— Ankaŭ tion mi ne atentis.

— Kompreneble; vi estas tro nervema, sed nun sekigu viajn larmojn kaj montru ĝojan vizaĝon.

Mi obeis kaj ni aŭskultis.

— Jam ne estas hundo sur la Insulo —, mi diris, aŭskultinte kelkan tempon.

— Jes, hundo estas tie ĉi.

— Kiel vi scias?

— Pro la postsignoj sur la planko; jen, rigardu.

— Vi estas prava; vi rimarkas ĉion, mi nenion.

Johano ridetis, sed ne respondis. Kviete li sidis, unu kruro trans la alia, kaj li rigardis antaŭ sin.

— Mi sentas kvazaŭ mi neniam forlasis tiun ĉi domon —, mi diris post momento, — ĉio estas kiel antaŭe.

— Jes, sed el knabo vi fariĝis juna viro; jen la diferenco.

Mi rigardis Johanon kaj subite mi rimarkis, ke same kiel la tuta ĉirkaŭaĵo ankaŭ li tute ne ŝanĝiĝis de post tiuj pasintaj dek-du jaroj; li estis la sama viro, liaj trajtoj estis la samaj, ĉar nenia sulketo kuris sur lia frunto nek laŭ la buŝanguloj; liaj dentoj brilis kiel ĉiam, kaj liaj blondaj haroj havis ankoraŭ la saman koloron.

Li ne atentis miajn pensojn, liaj rigardoj estis nun fiksitaj sur la pordo; li aŭskultis kun streĉita atento.

Ŝi venas —, li flustris.

Ekstere venis iu en lignaj ŝuoj, kiuj klaketadis sur la malmola argila planko de la stalo; tuj poste hundeto laŭte ekbojis. La venanto metis ion (eble sitelon, ĉar mi aŭdis bruon de fera falanta tenilo) sur la plankon. La hundeto saltis kontraŭ la pordo, ĝiaj ungoj gratis sur la ligno, kaj la bojado fariĝis pli kaj pli laŭta.

— Kuŝu!! — ordonis virina voĉo (tiu de mia patrino, mi tuj rekonis ĝin), sed la gratado ne ekhaltis, nek la bojado; la besto flaris, ke personoj estas en la ĉambro.

— Kuŝu do!!

Sed la hundeto ne obeis.

— Kio do enestas? — mallaŭte diris al si la virino, kaj la pordo malfermiĝis malrapide. Mia „patrino“ eniris, kaj ekvidante du virojn, ŝi estis eligonta ekkrion de surprizo, sed la buŝo, kiu jam malfermiĝis, subite diris:

— Johano!! — kaj ŝi rigardis lin; tiam ŝi turnis la okulojn sur min, ŝiaj manoj altiĝis, kaj post kiam la retenita ekkrio sonis tra la ĉambro, ŝi diris:

— Ĉielo... la knabo! — Tiam ŝi lasis fali la brakojn, kaj falis mem ĉe miaj piedoj. Ŝi svenis.

Johano levis kaj sidigis ŝin sur seĝo ĉe mia flanko.

— Akvon! — li diris al mi.

Mi eliris por alporti ĝin kaj malsekigis ŝian frunton. Ŝi malfermis la okulojn, rigardis min kaj ĝemploris.

— Ho, mia knabo... ĉu ĝi estas vi?

Mi ne kapablis paroli; mi prenis ŝin en miajn brakojn; tiam mi balbute diris:

— Jes... patrino... mi revenis.

Ŝi rekonsciigis tute, kaj dum ŝia kapo kuŝis sur mia brusto, ŝi levis la okulojn al la miaj kaj flustris:

— Dio! Dio!... Kie do vi restis tiel longe?... Kiom mi suferadis pro vi.

— Pardonu al mi, patrino; mi ne devus forlasi vin tiel, sed mi ne povis restadi pli longe.

— Mi scias, mia knabo, mi scias; „li“ estis kulpa en ĉio; milojn da fojoj mi kulpigis kaj riproĉis lin pro tio; sed ne kredu, ke li estas malica, li eĉ ne estis malbona kontraŭ vi, kiam li rifuzis, ke vi lin akompanu al la vilaĝo; li ne kuraĝis agi alie.

— Mi sola estis kulpa —, diris Johano. — Sed jam ne pensu pri tio, ĉio fariĝis bona. Vi retrovis unu la alian, do estu kontentaj.

— Kiam revenos „li“? — mi demandis.

— Li iris hieraŭ vilaĝon, li revenos hodiaŭ vespere, eble tre baldaŭ.

— Ĉu vi ambaŭ sanas bone?

— Jes, tre bone... Kiel lin surprizos via reveno, kaj kiel li ĝojos, kvankam li ne montros tion; tia ja estas lia karaktero.

La hundeto, kiu jam forgesis pri sia furiozeco, refoje ekbojis kaj kuris eksteren. Mia patrino sekvis ĝin per la okuloj.

— Ankoraŭ aliaj viroj sur la Insulo!? — ŝi demandis.

— Jes, ankoraŭ kvin; jen ili venas.

Paŝoj aŭdiĝis en la stalo kaj miaj fratoj eniris. Mia patrino imagis vidi fantomojn kaj estis denove svenonta.

— Miaj fratoj! — mi diris klarige.

— Viaj!?

— Miaj fratoj.

— De kie venas ili?

— Mi ja rakontos tion tuj..., rekvietiĝu...

— Mi jam rekvietiĝas —, ŝi diris, rigardante miajn fratojn kaj min... — Kiel stranga tio estas, ja ne estas diferenco inter vi.

— Ni estas trinaskitoj —, mi diris.

Eniris Ivan kaj Kóvacs.

— Kaj jen mia amiko Ivan, kiu estas unu el miaj savintoj, post kiam mia boato perdiĝis sur la maro...

Kaj jen mia patro —, mi diris plue.

— Via patro!?

— Jes.

— Go til fanen! — ekkriis voĉo post mi. Mi turnis la kapon kaj vidis la papagon.

— Ĝi do vivas ankaŭ! — mi diris.

— Jes; ni ĉiuj vivas ankoraŭ.

Pro manko de seĝoj en la ĉambro ni ĉiuj ne povis eksidi, sed Johano sciis, kiel havigi al ni artefaritan benkon. Li prenis tabulon el la stalo kaj pere de ĝi kaj du seĝoj faris longan benkon kaj ni ĉiuj sidiĝis.

Mia patrino, kiu neniam havis gastojn (krom Johano nenia fremdulo iam estis enirinta ŝian domon), ne sciis kiel kondukti kun ili. Ŝi sidis, rigardante nin kaj sin trovis en granda embaraso. Opiniante tamen, ke ne decas silentadi tiel longe, ŝi fine diris al Johano:

— Mi deziras, ke „li“ jam estu hejme.

— Li ja venos baldaŭ.

— Vi tute ne ŝanĝiĝis —, ŝi diris plue. — Mi tuj vin rekonis.

— Stranga rideto glitis sur la vizaĝo de la filozofo.

— Mi ja restos ĉi am la sama, li diris.

— Ĉiam!?

— Jes, mi ne estas ordinara viro.

Mia patrino ne komprenis la realan sencon de tiu diraĵo, sed ŝi ne petis klarigon, kaj sin turnante al Ivan, ŝi demandis en sia insula dialekto:

— Ĉu vi savis la knabon, sinjoro?... Kiel do tio okazis?

La kuiristo ridis grimace, altigis la altajn ŝultrojn tiel, ke lia kapo preskaŭ malaperis inter ili, rigardis ŝin, tiam min, kaj respondis germane:

— Mi ne komprenas.

Mi devis servi kiel tradukisto, ĉar el ni ĉiuj nur Moseo, mia „patrino“ kaj mi mem parolis la dialekton, parolatan en la nordo de la provinco Groningen kaj sur la Insulo Rottumeroog, kaj nur nun mi eksciis, ke Moseo ankaŭ parolis tiun dialekton.

Kiam per malmultaj vortoj mi kontentigis ŝian scivolecon rilate al la maniero, laŭ kiu la rusaj maristoj min savis de certa morto, mi diris:

— Post la reveno de „patro“ mi rakontos al vi ambaŭ pri ĉio, kio okazis kun mi.

— Nu bone! — ŝi diris; tiam ekstarante, ŝi eliris la ĉambron.

— Kien vi iras? — mi demandis, kaj ŝi respondis:

— Li venas, mi iros renkonte al li por rakonti, ke vi estas tie ĉi.

Dum mi rakontis pri miaj aventuroj, ŝi de tempo al tempo estis ĵetinta rigardon tra la fenestro, ĝis kiam ŝi vidis aperi „lin“.

Per rapidaj paŝoj ŝi direktis sin al la Haveno.

Estas homoj, kiuj posedas nekonsterneblan karakteron. Ilia ĉiama flegmeco estas tia, ke nenia sciigo kapablas konsterni aŭ emocii ilian animon. Se vi rakontus al ili, ke subite ili fariĝis riĉaj kiel Rotŝildo, ili akceptus la sciigon kun kvieta mieno kaj kvazaŭ io tute natura estus okazinta. Se vi rakontus al ili, ke subite ili fariĝis malriĉaj kiel Hiobo, tiam ili sammaniere aŭskultus vin kun tiu sama kvieta mieno kaj ankaŭ kvazaŭ nenio eksterordinara estus tariĝinta. Tiaj homoj akceptas ĉiujn batojn de la sorto kaj ĉiujn favorojn de Fortuno kun la sama kvieta rigardo, dum eĉ ne unu trajto sur ilia vizaĝo montras ilian internan emocijon.

Tia homo estis „li“, mia adoptinto.

Kiam li eniris kun sia edzino en la ĉambron, kie lin atendis la reaperinta knabo, tiam li ne svenis kiel ŝi estis sveninta; li ne ekploris pro ĝojo kiel ŝi estis farinta; li tute simple diris kiel ĉiam:

— Mi venis! — Tiam li estis etendonta la manon al tiu reaperinta knabo, sed vidante tri knabojn, kiuj similis sin reciproke kiel tri haroj el lia mentonbarbo sin similis, tiam li ne etendis ĝin, sed demandis per sia ordinara kvieta voĉo:

— Kiu do estas la knabo?

— Ĉu vi ne rekonas min? — mi demandis.

— He, ĉu vi estas la knabo? — li diris, kaj fine etendante sian manon al mi sola, li diris plue:

— Mi ĝojas, ke vi fine revenis. Estu bonvena —. Kaj salutante la ceterajn vizitantojn per kapklino, li eksidis.

Tiun vesperon mi detale rakontis al miaj geadoptintoj ĉion, kion la leganto jam legis. Mia „patrino“ aŭskultis kun streĉita atento, sed ŝajnis, kvazaŭ niaj aventuroj faris sur „lin“ nenian impreson. Kiam mi finis rakonti, mi demandis, kiel do estas mia nomo.

— Via nomo!? — li diris.

— Jes, ĉar mi mem donis al mi la nomon de Jafet, sed kiun vi donis al mi?

— Jafet estis la nomo de nia hundo —, diris „li“, ne respondante mian demandon.

— Jafet estas nomo el la Biblio —, diris ŝi.

— Sed kiel vi nomis min? — mi denove demandis.

— Ni nomis vin „knabo“ —, li diris kviete.

— Sed ĉiu knaboja havas specialan nomon —, mi diris.

— Jes, ili havas, sed ĉar sur la Insulo estis nur unu knabo, ni neniam pensis pri tio, doni al vi specialan.

— Sekve mi ne havis nomon!?

— Ni nomis vin „knabo“ —, li respondis.

— Sed sub kiu nomo vi enskribigis min?

— En nia Biblio? — li demandis naive.

— En la komunuma registro de la vilaĝo.

— Mi tute ne enskribigis vin tie.

— Kial vi ne faris tion?

— Pro timo, ke la vilaĝestro ne konsentus, ke vi restus ĉe ni.

— Vi do deziris tenadi min ĉiam ĉe vi sur tiu ĉi Insulo?

— Jes. Ni ne havis infanojn kaj decidis adopti vin, kaj tion ni faris.

— Sed kion vi intencis fari kun mi poste?

— Mi ne scias... ni preskaŭ neniam pensis pri tio.

— Valoris tamen la penon, pensi pri io tia.

— Mi pensadis: tio aranĝigos per si mem.

— Sed estis kontraŭleĝe agi tiel. Vi almenaŭ devus enskribigi min.

— Mi opiniis ke ne, ĉar oni estis doninta vin al ni.

— Ĉu... doninta!?

— Jes; mi vin trovis en la kesteto, kiun nekonatulo estis metinta sub la velon de mia boato; mi do rajtis agi kun vi laŭ bontrovo kaj deziro.

— Sed povus esti, ke oni estis rabinta min.

— Mi neniam pensis pri tio. En nia lando neniu rabas infanojn.

— Ĉu vi posedas ankoraŭ tiun kesteton?

— Jes.

Li ekstaris, eliris, supreniris la ŝtuparon en la stalo kaj revenis post momento kun la kesteto.

— Jen! — li diris kviete, metante ĝin sur la tablon.

— En samspeca kesteto la sama fremdulo alportis min en Brej —, diris Moseo, — sed sur la suba flanko de la kovrilo staris skribaĵo per krajono, kiun neniu povis deĉifri.

Kóvacs pripensis momenton, tiam li diris:

— Konfuzo mi memoras, ke mi skribis sur ĝi peton, ke oni zorgu por la infano, kiun malicaj viroj volis mortigi. Mi redaktis tiun peton en la ĉeĥa lingvo, ne subskribante la peton, ĉar mi tiam ne memoris plu mian nomon, nek la lokon de mia naskiĝo.

Nia vojaĝo al Brej kaj al la Insulo havis pli ol unu motivon; ni volis ĉiuj konatiĝi kun Rika (kiu sanis ankoraŭ bone) kaj kun la pastro; due ni deziris viziti la Insulon por esplori, ĉu miaj geadoptintoj vivas ankoraŭ, kaj por havigi al ni la pruvon, ke mi vere estas filo de Kóvacs. La kesteto pruvis sufiĉe.

Ni pasigis agrable la ceteran vesperon parolante pri niaj aventuroj kaj pri la estonto, kaj ĉar ni parolis plejparte en Esperanto (ni nun kapablis tion kaj spertis ĝian netakseblan utilecon), miaj geadoptintoj partoprenis nur malmulte nian interparoladon. De tempo al tempo Moseo

kaj mi konversaciis kun la gastigantoj, ĉar ni parolis ambaŭ la dialekton de la Insulo, kaj ĉe tiuj okazoj Maksimo Bjelski aŭskultis kun granda intereso; li tiam komprenis, kial li antaŭe, kiam li fariĝis mia instruisto, faris tiom da senfruktaj penoj por traduki la al li strangajn vortojn, kiujn mi parolis. Li nun informiĝis pri: b o k s ' m, b ö j n, m a ŭ r, v ö r, s i k, kaj aliaj strangaj vortoj kaj eksciis kun surprizo, frotante al si la manojn, ke ili signifas: pantalono, subtegmentejo, patrino, patro, kaprino; kaj li plengorge ridegis pro la lingvaĉo, kiun li la unuan fojon aŭdis paroli en sia patrujo, kiam li faris mian konatiĝon.

Mia patro (la mentonbarbulo) diris, kiel laŭkutime, tre malmulte, li nur esprimis „parole“ sian kontentecon kaj ĝojon, ke mi ne estis droninta post mia malapero, sed lia vizaĝesprimo tute ne montris, kiel granda estis tiu ĝojo, ĉar liaj trajtoj restis kiel ili estis. La plej multajn vortojn li uzis, kiam li rakontis pri sia embaraso, kiun kaŭzis al li la malaperinta boato.

— Kiel vi akiris alian? — mi demandis.

— Per fajra signalo —, li respondis.

Moseo kaj mi estis kunportintaj niajn muzikilojn, kaj malfrue en la vespero ni elprenis ilin el la ujoj kaj donis koncerton je honoro de miaj geadoptintoj.

Estis la unua fojo, ke muziko aŭdiĝis sur la Insulo. Tie oni aŭdis ĝis nun neniajn sonojn krom la muĝadon aŭ la murmuradon de la vento, la unutonan plaŭdbruon de la ondoj, la raŭkajn kriojn de la marbirdoj kaj la blekadon de la du kvarpieduloj. Nia muziko tre ravis mian „patrinon“. Kiam ŝi aŭdis la „Kol Nidreĵ“ kaj la „Revado“, ŝi ne povis reteni la larmojn. Mia „adoptinto“ tamen estis kiel ĉiam tute nekonsternebla; li aŭskultis, trovis la muzikon „beleta“... sed diris:

— Mi pli amas la violonon de la blinda Petro, ĉar mi konas la melodiojn, kiujn li ludas.

Inter la aŭskultantoj estis du, kiuj laŭ tre malsamaj manieroj konigis sian opinion pri la koncerto. Ili estis la hundo kaj la papago. La hundo eksidis inter la ludantoj, altigis la nazon, rigardis la plafonon, kaj malfermante la buŝon, eligis tian penetrantan kaj tirtonan blekadon, ke ni devis forigi la beston, ĉar la akompano, per kiu ĝi volis honori la koncerton, malbonigis ĉion. Mia „patrino“ tial malfermis la pordetojn de sia litŝranko, la hundo malaperis post ili kaj ni povis ludi plue. La birdo, kiu sidis ĝis nun preskaŭ daŭre dormanta en sia kaĝo, vekigis post la unuaj sonoj de la violonĉelo, ekstaris sur unu piedo, kaj rigardante nin grave kun oblikve tenata kapo, aŭskultadis kun videbla atento kaj laŭte ekfajfis, kiam la muziko finiĝis. Tiam ĝi ekkriis: — *N u b o n e !* — kaj refoje ekdormis.

Estis meznokto, kiam ni iris kuŝiĝi. Mi deziris dormi tiun nokton en la sama ŝranko sur la subtegmentejoj, kie mi estis pasiginta ĉiujn noktojn de mia knabeco; la ceteraj vizitantoj devis ripozi en la stalo kaj kuŝiĝis sur pajlo, ĉar litoj estis nur du en la domo, nome la mia kaj tiu de miaj „gepatroj“.

Strangaj pensoj trairis mian kapon, kiam mi post tiom da jaroj de foresto tiel subite kuŝis en mia antaŭa dormejo, kaj komence la dormo ne volis ektuŝi miajn okulojn. Mi pensis pri la estinto kaj miris, ke ĉio fariĝis tiel bona. Sub mi mi aŭdis refoje tiun saman misteran „segiston“, sed fine li jam ne „laboris“, kaj dum la unutona bruado de la ondoj (ruliĝantaj ĉiam denove ĉi tien kaj returnen sur la bordo de la Insulo) iom post iom formortis, miaj okuloj fermiĝis, kaj mi ekdormis.

Sepa Ĉapitro.

Refoje sur la subtegmenteja ŝtuparo — Refoja matenmanĝado kun preĝado kaj cetere — Mi montras mian Insulon al miaj fratoj kaj al miaj amikoj — Sur la dunoj — „La Fantazio“ — Johano parolas kaj agas laŭ stranga kaj mistera maniero — La leganto fine ekscias, kiu estas Johano kaj kio fariĝis el li — La ĉeno el moneroj — Postskribo kaj fino de Idoj de Orfeo.

Estis ĉirkaŭe je la naŭa horo, kiam en la sekvanta mateno mi vekigis. Mi saltis el mia lito, vestis min kaj rigardis ĉirkaŭe. Ĉio sur la subtegmentejo estis kiel en mia juneco, kaj la ŝtuparo staris sur la sama loko, kvankam mia patrino eble utiligis ĝin neniam por esplori, ĉu „li“ estas venanta. Mi supreniris al la tegmenta aperturo kaj rigardis eksteren, tute same kiel antaŭ dek du jaroj mi faris por la lasta fojo.

Nenio antaŭ mi nek post mi estis aliĝinta. La pecoj da tero (nome la najbara insulo Borkum kaj la „Plataĵo“) elstaris ankoraŭ ĉiam el la ondoj. Post mi la bruna „Digo“, kiun mi la antaŭan tagon por la unua fojo estis vidinta tuj de proksime, sin etendis dekstren kaj maldekstren, ĝis kiam ĝi perdiĝis ambaŭflanke por mia rigardo. Marbirdoj ŝvebis ĉiuloke, sed mi nun ne diris: nur atentu, mi forprenos viajn ovojn, ĉar ovojn mi ja ne plu serĉus. La vidaĵo ravis min; la vento disblovis miajn harojn, kaj ĉio revokis al mia memoro la pasintajn jarojn.

Sed mi ne povis restadi sur la ŝtuparo por daŭre admiri la belan panoramon, kaj mi malsupreniris al la

subtegmenteja planko. Sub mi en la stalo sonis bruo de paŝoj, kaj mi aŭdis la voĉon de Johano kaj de la aliaj vekigintaj gastoj de miaj gepatroj.

Neniam tiom da bruo kaj tiom da movado estis plenigintaj la domon.

Mi malsupreniris la duan ŝtuparon, trairis la stalon, kie la bestoj malestis (eble pro la bela vetero), kaj mi eniris la ĉambron.

La matenmanĝo staris sur la tablo, kaj mi eksidis inter la aliaj. Granda amaso da ovoĵoj, biskvitoj, multa pano, lakto kaj butero atendis nin, kaj ni estis manĝontaj. Laŭkutime mia adoptinto kovris al si la vizaĝon per la ĉapo (liaj longaj mentonharoj refoje pendis inter la du brakoj) kaj li preĝis. Preĝinte, li surmetis la ĉapon, diris: „bonan apetiton!“ kaj ni matenmanĝis. Johano (ĉiam ridetante) estis pli elokventa ol iam antaŭe kaj rakontis jen en la insula dialekto, jen en Esperanto pri multaj aferoj. Mia „patrino“, kiu sin sentis ankoraŭ iom ĝenata inter ĉiuj tiuj gastoj, parolis malmulte kaj „li“ diris tute nenion, ne pro malkontenteco, ne pro malbona humoro (lia humoro estis ĉiam la sama), sed ĉar tia estis lia karaktero; neniam, eĉ nun li ne parolis pli multe ol estis absolute necese.

Post la manĝado „li“ refoje preĝis, kaj Johano proponis, ke mi kaj li montru la Insulon al la vizitantoj. Mia patro komencis legi siajn gazetojn kaj mia patrino diris: — Nu bone!

Mi eliris kun Moseo, Stanislas kaj Kóvacs. Post kelkaj momentoj sekvis la aliaj, unua Maksimo Bjelski kun Ivan kaj lasta Johano kun la hundo, kiu jam fariĝis lia amiko.

Niaj gegastigantoj prefere restis hejme, ŝi por formeti la manĝilaron kaj li por legi siajn gazetojn.

La vetero estis belega. La brilanta suno staris alte

sur la ĉielo, kaj kiam ni alvenis sur la dunoj, la kvieta maro sin etendis antaŭ niaj piedoj kiel arĝenta spegulo, ĉar ne unu sulketo sin movetis sur la supraĵo. La bela vidaĵo ravis nin, kaj ni eksidis momenton sur la sablo por rigardi kaj admiri ĝin. Post kelka tempo ni ekpromenis laŭlonge de la tuta marbordo, de unu duno al alia, fortimigante aretojn da marbirdoj. Laŭte blekante ili flugis ĉirkaŭ ni, eble timante, ke ni forprenus iliajn ovojn; sed kvankam mi montris kelkajn nestojn, ni ne elprenis la ovojn.

Ni venis al la suda flanko de la Insulo, kie kuŝis la ŝlimaĵo, tra iris tra ĝi kaj refoje alvenis ĉe la dunoj.

Kvankam la laciĝo nin ekprenis (ĉar ni ne kutimis marŝi alten kaj malalten sur la mola sablo), ni suriris denove la unuan dunon kaj eksidis por ripozi.

Nur unu ŝipo, velŝipo kun du mastoj estis videbla sur la maro. Ĝi venis el la okcidento kaj sin direktis al la Insulo. Ĝi estis simila al blanka cigno kaj alproksimiĝis majeste sed malrapide, ĉar la vento estis malforta.

Ni rigardis la ŝipon momenton, kaj Johano ekstaris.

Per la mano li ŝirmis al si la okulojn kontraŭ la suno por pli oportune rigardi la ŝipon; tiam stranga, melankolia esprimo, kiun mi preskaŭ neniam vidis ĉe li, glitis sur lia vizaĝo. Ankoraŭ momenton li atente ekzamenis la velojn, tiam li diris kvazaŭ al si mem:

— *La Fantazio.*

Mi ne komprenis la veran signifon de tiuj vortoj, ne povante imagi, ke la alproksimiĝanta velŝipo portas tiun nomon, ĉar nenies okulo, eĉ ne la lia povus distingi je tiu granda distanco, kiu nomo staras sur la antaŭkilo de la ŝipo.

— Ĉu vi rekonas ĉi tiun dunon? — mi demandis al Johano.

— Jes, ĉi tie mi alvenis al vi kiel nudulo... antaŭ dek-du jaroj —, li respondis.

Ni eksilentis momenton, rigardante la ŝipon; tiam li diris plue:

— Estas tempo de veno, kaj estas ankaŭ tempo de foriro; tiel volas la sorto, kaj neniu povas ŝanĝi tion... Kelkfoje la momento de foriro estas malagraba kaj malĝojiga, sed ni devas nin submeti.

Mi ne komprenis, kion liaj vortoj signifas; ili ŝajnis al mi strangaj; post momento li diris plue:

— Ĉi alproksimiĝas pli kaj pli — kaj li etendis la manon al la ŝipo; mi tamen ne vidis ĝin plu, ĉar maldensa nebulo ekĉirkaŭis nin subite. Ŝajnis tamen al mi, ke Johano ĝin vidas ankoraŭ, ĉar liaj rigardoj restis fiksitaj sur la sama loko.

Stranga timo, mi ne sciis pro kio, subite ekregis min. Mi rigardis Johanon; li staris kiel giganta statuo super mi. Liajn trajtojn mi ne povis plu distingi pro la plidensiganta nebulo. Apenaŭ mi povis distingi miajn kruojn, tuj poste mi distingis plu nenion. Kiam mi rigardis refoje supren al Johano, li estis malaperinta, kvankam tuj antaŭe li staris apud mi, eĉ tiel proksime, ke mi estus povinta tuŝi liajn kruojn. Mi pensis, ke li estis farinta kelkajn paŝojn malsupren en la direkto de la maro.

— Kien vi iras? — mi demandis, sed ne ricevis respondon; mi aŭdis nur brueton kvazaŭ de io falanta sur la sablon kelkajn paŝojn antaŭ mi. Du... tri... kvarfoje mi aŭdis tiun saman bruon, sed pro la densa nebulo mi nenion distingis.

Mi rampis antaŭen kaj trovis vestojn. Mi rigardis ilin atente... ili estis la vestoj de Johano. Mi ekmiris kaj ektimiĝis.

— Johano!! — mi ekkriis, sed ne ricevante respondon, mi vokis al mi la aliajn. Ni atendis, esperante ke li revenus aŭ respondus, sed vane. Fine la nebulo supreniĝis, ne iom post iom kiel ĝi estis veninta, sed subite, kaj jen antaŭ ni, je kelkaj paŝoj da distanco ni lin ekvidis. Ĝis la brusto li staris en la maro kvazaŭ por sin bani, sed li tute ne intencis bani sin. Serioze kaj gravmiene li rigardis nin; tiam li donis al ni signon per la mano, kvazaŭ por peti nian atenton, kaj ekparolis:

— Miaj amikoj, aŭskultu min dum kelkaj momentoj; mi havas ion por diri al vi ĉiuj. Sciu do, ke la tempo de mia foriro alvenas. Mi ne povas restadi tie ĉi pli longe. Fakte mi ja tute ne apartenas al la homaro, kaj tial mi ne havas la rajton vivi inter la homoj... Kiam mi alvenis sur ĉi tiun Insulon antaŭ dek-du jaroj, tiam mi venis por ordigi tion, kion la sorto estis malordiginta, ĉar ordinara homo ne povus tion fari. Mi vivis inter la homoj sub multaj strangaj ĉirkonstancoj. Mi estis jen riĉa, jen malriĉa, sed ĉiam feliĉa kaj kontenta, ĉiam agante laŭ ĉirkonstancoj. Mi estis kelnero, maristo, flegisto de frenezuloj, purigisto de kamentuboj, aktoro, promenanta propagandilo, kaj eĉ resanigisto. Kiam mi estis riĉa, mi fordonis mian monon por helpi al malfeliĉuloj, kaj mi faris bonon al ĉiu, kiu ajn bezonis tion. Tia homo ne povas ekzisti en realo, kaj li ne ekzistas, ne ekzistis kaj neniam ekzistos; homoj estas nur homoj.

Kiam mi rakontis al la geadoptintoj de Jafet, ke mi naskiĝis en „la Urbo“, tiam mi diris malverajon. Mi ne naskiĝis en urbo, nek en vilaĝo. Mi naskiĝis en Fantaziujo, kaj la Fantazio portis min ĉi tien, kaj per la Fantazio mi foriros.....

Li etendis la brakon al la ŝipo, kiu nun estis tiel proksima, ke ĝia nomo estis klare legebla sur la antaŭkilo, kaj li diris plue:

— Jen tiu sama Fantazio; per ĝi mi nun foriras sen revene. Antaŭ ol forlasi vin, mi tamen volas doni al vi bonan konsilon.

... Uzu viajn talentojn, kaj se iam la sorto estos kontraŭa al viaj deziroj, ne fariĝu tiam fatalistoj, sed pensu pri la pilgrimanto, kiu kuiris siajn pizojn. Tiam ĉio fariĝos bona... Kaj nun... Adiaŭ! — — — —

Li eksilentis, adiaŭdiris lastfoje per la mano, turnis al ni la dorson kaj naĝis for. Ni okule sekvis lin, ĝis kiam li suprenrampis la ŝnurran ŝtuparon de la ŝipo; ni vidis lin salti trans la ŝirmferdekon, kie li malaperis por ĉiam.

Gracie la Fantazio glitis for tra la ondetoj de la maro kaj kvaronon horon poste ni ne vidis ĝin plu...

Ni staris kvazaŭ vekigintaj el sonĝo. Fine mi klinis min por kolekti la vestojn de la malaperinta amiko, sed... ili estis for, lasantaj nur unu postsignon, ĉar sur la sablo mi trovis... lian ĉenon el miaj arĝentaj moneroj.

Postskribo.

Ni iris returnen al la domo. Miaj geadoptintoj sidis kviete ĉe la tablo, ŝi trikante je ŝtrumpo, li legante gazeton kaj kraĉante ĉiuloken sian brunan kraĉajon, ruinigante la belajn figurojn el sablo, per kiuj ŝi estis ornaminta la plankon de la ĉambro.

Sur la tablo kuŝis letero, postlasita de Johano, kaj sendita de la Delegito el Belgrado. Ĝi estis adresita al Kóvacs en la „Sep Preĝejoj de Romo“. Li malfermis la leteron kaj ekpaliĝis, sed ne pro ektimo, ĉar li legis:

„Mia kara Eduardo,

Dank' al Dio, ni ĉiuj (vi, la filoj kaj mi) vivas. — Dum danĝera malsano atakinta min en la cirka veturilo, Mareau transportigis min al malsanulejo en Buda-Pest, kie mi restis kvin monatojn. Kiam mi estis resaniĝinta, la veturilo kun Mareau kaj Stanislas estis malaperinta kaj ĉiuj penoj trovi ilin, restis senfruktaj. Mi reiris al miaj gepatroj. Ili pardonis al mi mian konduton, kaj mi restadis ĉe ili, pensante neniam revidi vin kaj niajn infanojn. Sed la sorto decidis, ke fine ni revidus unu la aliajn. Ĉi tiun matenon mi ekvojaĝos vagonare al Hago; mi scias, en kiu hotelo vi estos, atendu min tie.

Vin ĉiujn ĉirkaŭbrakas:

Via Amalia.“

Mia patro (Kóvacs) enmanigis al mi la skribaĵon, kaj mi legis ĝin voĉe, tiam mi diris:

— Johano estis prava: Ĉio fariĝis bona.

La postan tagon ni forlasis la Insulon.

Ivan estis tre malĝoja kaj melankolia pro la perdo de sia amiko kaj faris multajn grimacojn por reteni siajn larmojn.

— Kion fari sen li!? — li diris. — Mi ĉiam kredis lin neordinara homo, sed neniam mi atendis, ke li tiel subite malaperus... ho ve! — kaj mi respondis:

— Kuiru ilin, Ivan, kaj ĉio fariĝos bona. Vi estis la amiko de Johano, sekve ankaŭ la nia, kaj ni zorgos pri tio, ke vi povu reiri al via patrino en Patersburgo por restadi ĉe ŝi tiel longe, kiel vi deziras.

Kaj al Maksimo Bjelski mi diris:

— Vi restadu ĉe ni, kien ajn ni vojaĝos; ĉu vi konsentas?

La vireto frotis al si la manojn kaj jese kapklinis;
li estis tro nervema por paroli.

Nia boato, direktata de Ivan, glitis antaŭen. La kontraŭaĵoj de la sorto, kiujn ni spertis ĝis nun, estis forgesitaj, kaj dum en niajn orelojn sonis ankoraŭ la lastaj vortoj de Johano, ni iris renkonte al la antaŭ ni kuŝanta Estonto, plenaj je kuraĝo kaj plenaj je konfido kaj espero, kiel veraj:

Idoj de Orfeo.

Enhavo.

Unua Parto. La Insulano.

	Pago
Ĉapitro Unua	1
" Dua	19
" Tria	43
" Kvara	65
" Kvina	87
" Sesa	107
" Sepa	126
" Oka	145
" Naŝa	168

Dua Parto. La Trovito.

Ĉapitro Unua	175
" Dua	188
" Tria	204
" Kvara	217
" Kvina	232
" Sesa	249

Tria Parto. La Cirka knabo.

Ĉapitro Unua	271
" Dua	282
" Tria	287
" Kvara	297
" Kvina	310
" Sesa	332
" Sepa	347

Kvara Parto. Don Kihoto kaj Sanĉo Panza.

Ĉapitro	Unua	Paĝo
"	Dua	363
"	Tria	386
"	Kvara	406
"	Kvina	420
"	Sesa	436
"	Sesa	445

Kvina Parto. Idoj de Orfeo.

Ĉapitro	Unua	465
"	Dua	479
"	Tria	483
"	Kvara	501
"	Kvina	511
"	Sesa	519
"	Sepa	533

Tabelo de korektoj.

Paĝo	§	linio	8	staras:	opogis	legu:	apogis
"	11	"	26	"	kruelan	"	kruela
"	17	"	28	"	kajan taŭen	"	kaj antaŭen
"	19	"	15	"	ĉenova	"	ĉe nova
"	26	"	6	"	kredistion	"	kredis tion
"	31	"	23	"	vie stas	"	vi estas
"	46	"	4	"	tiel kiel,	"	tiel, kiel
"	56	"	7	"	ka jili	"	kaj ili
"	221	"	2	"	naiveco, de	"	naiveco de
"	279	"	22	"	disprucis	"	disprucis
"	285	"	22	"	en urbo	"	en la urbo
"	303	"	9	"	stabon	"	bastonon
"	346	"	2	"	en verŝis	"	enverŝis
"	386	"	19	"	jetruligis	"	jetrulis
"	399	"	34	"	rulinta	"	ruliĝinta
"	400	"	19	"	ekspozitaj	"	ekpoziciitaj
"	403	"	23	"	ekspozitaj	"	ekpoziciitaj

Druck von Max Schmersow, Kirchhain N.-L.

